


# ODUSSEIAS DE HOMEROS

EL LA ANTIKVA GREKA  
LINGVO TRADUKIS

W. J. A. MANDERS



ELDONEJO:  
FIRMO W. J. THIEME & CIE - ZUTPHEN  
(NEDERLANDO)





R. v. d. KLEIJ

~~Paramaribostraat 9~~

DEN HAAG

*Cannenburgla 20*



**Federación Española de Esperanto**  
**Hispana Esperanto - Federacio**

Rodríguez San Pedro 13 - 3<sup>a</sup> - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (91) - 4668870

16x0000 hof 002892 yy



# ODUSSEIAS DE HOMEROS

EL LA ANTIKVA GREKA LINGVO

TRADUKIS

W. J. A. MANDERS



Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (9)1 - 4468079



ELDONEJO: FIRMO W. J. THIEME & CIE - ZUTPHEN

(NEDERLANDO)

2892





## ENKONDUKO.

*la kolekto*

Kvankam Homeros estas nomata la verkinto de Ilias kaj Oduseias, ni tamen preskaŭ neniom pri li scias. Estas nekonate, kie aŭ kiam li naskiĝis kaj tre multaj scienculoj eĉ dubas, ĉu ambaŭ epopeoj estas verkitaj de unu sama poeto. Tute neeble estus, paroli en ĉi tiu mallonga enkonduko pri la tre ampleksa „Homerosproblemo”. Tial sekvas nur kelkaj ĝeneralaĵoj.

*Troja*

Laŭ malnova tradicio Homeros naskiĝis en Smurna kaj vivis sur la insulo Chios. Ĉiuokaze estas tre verŝajne, ke li vivis en la meza marborda regiono de Malgrand-Azio, kie la Grekoj havis tre riĉajn koloniojn. Ankaŭ estas verŝajne, ke la epopeo Ilias jam estis preta ĉirkaŭ la jaro 700 antaŭ Kr. aŭ pli frue. Oduseias estas iom pli posta verko kaj laŭ enhavo tute alia. Ilias prikantas la batalon kaj la militon; ĝi rakontas epizodon el la deka kaj lasta jaro de la sieĝo de Troia; en ĝi estas laŭdataj heroeco kaj militgloro. Kontraŭe Oduseias laŭdas la hejman feliĉon; ĝi pritraktas la dekjaran rondvagadon de Oduseus post la ruinigo de Troia kaj lian hejmalvenon en la dudeka jaro post la forvojaĝo el Troia.

Grandega estis la influo de Homeros ĉe la antikvaj Grekoj. Ne nur por la poezio, sed ankaŭ por filozofio, historio kaj geografio, skulptarto kaj elokventeco la verkoj de Homeros estis neelĉerpebla fonto. Sed ne nur la Grekojn, ankaŭ la aliajn civilizitajn popolojn Homeros ege influis kaj unuanime oni lin ĉiam nomis la plej granda, aŭ almenaŭ unu el la plej grandaj poetoj de ĉiuj tempoj.

La esprimmaniero de Homeros strange impresas kaj eble la leganto komence sin sentos seniluziigita, kiam li renkontas tiom da nekutimaj adjektivoj kaj frazkonstruoj; tamen li baldaŭ spertos ke ĝuste tio havigas al la verko neordinaran ĉarmon. Mi klopodis konservi kiel eble plej bone la sencon

#### IV

de vortoj kaj frazoj kaj Esperanto montriĝis mirinde taŭga lingvo por la tradukado de la diversaj „epitheta” (klarigaj adjektivoj). Vortoj kiel ekz. *remŝipama*, *virpereiga*, *rapidpieda*, *ruzanima*, kiuj estas simplaj tradukoj de tiaj „epitheta”, ne povas esti formataj en multaj naciaj lingvoj, tiel ke tiuj lingvoj ne povas konservi la plej karakterizan econ de la lingvo de Homeros.

Multan laboron mi dediĉis al ĉi tiu traduko, ĉar min instigis la espero, ke la verko ebligos al multaj Esperantistoj la konatiĝon kun poeto, kiu eĉ post jarmiloj ankoraŭ tra la tuta mondo estas admirata kaj laŭdata.

LA TRADUKINTO.



## LA PROPRAJ NOMOJ.

Rilate la proprajn nomojn mi ĉiam konservis la originalajn formojn. Ili do ne estas skribitaj laŭ la Esperanto ortografio, sed laŭ la Greka. La akcenton mi indikis neniam. Sufiĉas diri ke la Grekaj nomoj ĉiam havas la akcenton sur unu el la lastaj vortoj.

Rilate la elparoladon de Grekaj nomoj mi rimarkas nur la jenon:

1e. th oni elparolas ĝenerale kiel t, ph kiel f kaj ch kiel h.

2e. au = Esp. aŭ, eu = Esp. eŭ, ou = Esp. u; u havas sonon inter Esp. i kaj u (ü).

Homeros tre ofte uzas „patronimica” t.e. vortojn kiuj indikas kies filo oni estas, ekz. „Atreides”, kio signifas „filo de Atreus”. Ĉi tiujn vortojn mi tradukis per la sufikso ido, tiel ke Atreides fariĝas Esperantlingve Atre-ido. (Rimarku la similecon inter la Greka „-ides” kaj la Esperanto „-ido”!).

Inter [ ] mi metis la partojn, kiuj laŭ scienculoj verŝajne en la originala teksto mankis, do fakte ne apartenas al la verko de Homeros.

---

## KLARIGOJ.

### Unua kanto.

25. hekatombo: „oferajo de cent bovoj,” ĝenerale: grandega oferaĵo.
122. flugilhavaj vortoj: la vortoj kvazaŭ forflugas tuj post la elparolado.
277. edziĝodonoj: fakte la aĉetprezo, ĉar la patro vendis sian filinon al ŝia estonta edzo kaj ricevis por ŝi la edziĝodonojn.
442. La riglilo sin trovis interne, sed ekstere pendis tra truo la rimeno, per kiu oni povis ŝovi la riglilon en truon de la pordokadro.

*rapida  
gerlangeld = vluo*

### Dua kanto.

352. didevena: oni kredis ke la reĝoj devenas de Zeus kaj ricevas de tiu sian reĝan potencon.

### Tria kanto.

2. kuproriĉa: oni kredis, ke la ĉielo estas metala volbo.
6. tertremigulo: Poseidon.
9. internaĵoj: nur koro, hepato kaj pulmo.
42. egidoporta: la egido estas la fama ŝildo de Zeus, fabrikita de Hephaistos.
154. virinoj kun malaltaj zonoj: ili havis la zonon ĉirkaŭ la koksoj anstataŭ ĉirkaŭ la brusto.
379. Tritogeneia = Athene.
442. hordeograjnoj: la rostitaj hordeograjnoj, kunmiksitaj kun salo, estis disŝutataj inter la kornojn de la oferbesto.
444. Oni lasis flui la sangon en la pladon kaj poste oni per ĝi ŝpruce malsekigis la altaron.

### Kvara kanto.

129. tripiedo: metala kaldrono sur tri piedoj, sub kiu oni bruligis fajron por boligi akvon; tre ofte ĝi servis nur kiel ornamaĵo.
129. talanto: certa pezo da oro aŭ arĝento.



## VII

### **Kvina kanto.**

93. ambrozio kaj nektaro: nutraĵo de la Dioj.

### **Sesa kanto.**

262. Nausikaa ne findiras la frazon („tiam atendu”).

### **Sepa kanto.**

150. honorigo: diversaj enspezoj, precipe el la kronbieno.  
197. ŝpinistinoj: la sortodiinoj (Parĉoj), kiuj ŝpinas ĉies vivofadenon.

### **Oka kanto.**

35. du: la ŝipanestro kaj la direktisto.

### **Naŭa kanto.**

58. la tempo kiam la bovoj estas maljungataj: post-tagmeze, antaŭ la tagmanĝo.  
94. lotoso: afrika arbofrukto, granda kiel olivo kaj dolĉgusta.

### **Deka kanto.**

86. t.e. la tago estas longega kaj la nokto tre mallonga.  
179. malkaŝinte sian kapon: pro ĉagreno ili estis kaŝintaj la kapon en la mantelon.

### **Dek unua kanto.**

52. La animoj de neenterigitaj mortintoj devis resti antaŭ la eniro de la mortintejo.  
291. la profeto: Melampos, kiu komprenis la lingvon de la bestoj. Komparu kun la 15a kanto 225—242.

### **Dek dua kanto.**

68. Uruganoj de pereiga fajro: la rokoj estis do vulkanoj.

### **Dek tria kanto.**

235. grandbula: fruktodona.  
240. direkte al la aŭroro kaj la suno: en la oriento;  
direkte al la mallumo: en la okcidento.

## VIII

### Dek kvara kanto.

236. senfortigi la genuojn: mortigi.  
257. Aiguptos: la Nilo.  
349. mi forŝovis miajn ĉifonojn: por ke ili ne malhelpu la naĝadon.

### Dek kvina kanto.

246. la sojlo de l'maljuneco: la sojlo, kiu disigas vivon kaj morton.  
293. etero: ĉe Homeros la pura kaj alta supraero.  
373. respektinduloj: nome petegantoj, fremduloj kaj malriĉuloj, kiuj ja estas protektataj de Zeus.  
404. kie la suno sin direktas returne: nome en la okcidento, kie la suno subeniras kaj sub la tero returnas al la oriento.

### Dek sesa kanto.

474. dupintaj lancoj: ankaŭ sube estis pinto, per kiu oni povis piki la lancon en la teron.

### Dek sepa kanto.

545. terni: feliĉanonca antaŭsigno.

### Dek oka kanto.

6. Iros: la Diino, kiu faras la komisionojn por la Dioj, nomiĝas Iris.  
193. Diino de Kuthera: Aphrodite.

### Dek naŭa kanto.

63. ĵetis teren: la planko ne havis pavimon, sed konsistis el tre malmola tero.  
363—369. Eurukleia alparolas enpense Odusseus, kiun ŝi tamen kredas malproksima.  
409. Odusseus: t.e. la kolerulo.  
489. mi ne indulgos vin: nome, se vi ne silentos.

## IX

523. erare mortigis: ŝi enviis sian bofratinon Niobe, kiu havis dek kvar infanojn. Volante mortigi la plej aĝan filon de Niobe, ŝi erare mortigis sian propran infanon.

### Dudek unua kanto.

128. li suprentiris la tendenon: por alkroĉi ĝin en la ringon je la supra parto.  
258. la koncerna Dio: nome Apollon, la Dio de la ark-pafado.  
421—422. La hakiloj staris rekte en la tero kaj la sago estis pafata inter la tenilon kaj la feron de la hakiloj.

### Dudek tria kanto.

228. Aktoris = la Aktor-idino (Eurunome).

### Dudek kvara kanto.

46. Per la detranĉitaj haroj estis kovrata la korpo de mortinta amiko, kiam ĝi estis portata al la brulŝtiparo.  
517. kunuloj: Athene ja havas la staturon de Mentor kaj parolas kvazaŭ ŝi estus Mentor.
-

LISTO DE KELKAJ GRAVAJ NOMOJ.

- Aĉaĉioj*, *Argivoj* aŭ *Danaoj*: estas la ĝenerala nomo por la tiamaj enloĝantoj de Grekujo.
- Aĉeron*: rivero en la mortintejo.
- Aĉilleus*: plej grava heroo de l'Aĉaĉioj kaj patro de Neoptolemos.
- Aigisthos*: edziĝas kun Klutaimnestra, la edzino de Agamemnon; li mortigas Agamemnon, kiam ĉi tiu revenas el Troia. Poste ia filo de Agamemnon, Orestes, mortigas lin mem.
- Aĉolos*: la Dio de la ventoj. Li loĝas sur la insulo Aiolia.
- Agamemnon*: reĝo de Mukene kaj ĉefkomandanto de la Aĉaĉioj ĉirkaŭ Troia. Vidu *Aigisthos*.
- Alkinoos*: reĝo de la insulo Scheria, kie loĝis la Phaiakoj.
- Antikleĉia*: patrino de Oduseus kaj filino de Autolukos.
- Antinoos*: le plej eminenta el la amantoj.
- Aphrodite* (= Venus): filino de Zeus kaj Dione kaj la Diino de amo kaj beleco. Edziniĝis kun Hephaistos.
- Apollon* (= Apollo): filo de Zeus kaj Leto. La Dio de muziko, poezio kaj lumo.
- Li diras profetaĵojn per sia orakolo en Delphi; frato de Artemis.
- Ares* (= Mars): filo de Zeus kaj Hera; Dio de la milito.
- Argivoj*: vidu *Aĉaĉioj*.
- Argos*: 1. la regno de Agamemnon en la suda parto de Grekujo.  
2. kelkfoje = la tuta Grekujo.  
3. la urbo, super kiu regis Diomedes.
- Artemis* (= Diana): Diino de la ĉaso; filino de Zeus; vidu Apollon.
- Athene* (= Minerva): filino de Zeus; Diino de arto kaj scienco; protekta Diino de Oduseus.
- Charitaj* (= Gratiae): Diinoj de la gracieco.
- Charubdis*: marmonstro.
- Danaoj*: vidu *Aĉaĉioj*.
- Demeter*: Diino de agrikulturo.
- Demodokos*: La blinda kantisto de la Phaiakoj.
- Dionusos* (= Bacchus): Dio de la vino; filo de Zeus kaj Semele.
- Eos* (= Aurora): Diino de la tagiĝo.
- Eumaios*: la porkpaŝtisto de Oduseus.
- Eurukleĉia*: la mamnutrintino de Oduseus.

*Eurūlochos*: kunulo kaj parenco de Oduseus.

*Eurumachos*: unu el la ĉefaj amantoj.

*Gorgo*: terura monstro, kies alrigardo ĉiun kaj ĉion ŝtonigas.

*Hādes* (= Pluto): Dio de la mortintejo; frato de Zeus.

*Hēlena*: filino de Zeus kaj Leda; edzino de Menelaos; forrabita de Paris kaj kondukita al Troia; tial la kaŭzo de la milito; post la ruinigo de Troia ŝi reiras kun Menelaos al Sparta.

*Hēlios*, ankaŭ *Huperion Helios* (= Sol): la sundio.

*Hellas*: regiono en nord-Grekujo.

*Hephaistos* (= Vulcanus): Dio de la fajro; filo de Zeus kaj Hera; edzo de Aphrodite; li estis lama.

*Hēra* (= Juno): filino de Kronos; fratino kaj edzino de Zeus.

*Hermes* (= Mercurius): kuriero de la Dioj; filo de Zeus.

*Ilion*: vidu *Troia*.

*Ithaka*: insulo kun samnoma urbo; la regno de Oduseus.

*Kalūpso*: nimfo, filino de Atlas; loĝas sur la insulo Ogugia.

*Kiklōpoj*: unuokulaj grandeguloj.

*Kirke*: filino de Helios; loĝas sur Aiaia.

*Klutaimnestra*: vidu Aigisthos.

*Kronos* (= Saturnus): patro de Zeus, Poseidon kaj Hera;

edziĝis kun Rhea; Zeus lin detronigis kaj ĵetis en la Tartaros.

*Laertes*: patro de Oduseus; sola filo de Arkeisios.

*Lakedaimon*: vidu *Menelaos*.

*Leto* (= Latone): patrino de Apollon kaj Artemis.

*Melanthios aŭ Melantheus*: kaprinpaŝtisto de Oduseus.

*Melantho*: servistino de Penelope.

*Menelaos*: frato de Agamemnon; reĝo de Lakedaimon; vidu *Helena*.

*Mentor*: amiko de Oduseus.

*Mukenai*: vidu *Agamemnon*.

*Nausikaa*: filino de Alkinoos.

*Nestor*: reĝo de Pulos; la plej elokventa el la Aĉaioj.

*Okeanos*: rivero kaj ĝia Dio; la granda mondfluo, kiu ĉirkaŭas la teron kaj la maron kaj el kiu devenas ĉiuj fontoj, fluoj kaj riveroj.

*Oduseus*: reĝo de Ithaka; sola filo de Laertes; patro de Telemachos.

*Ogugia*: Vidu *Kalūpso*.

*Olumpos*: monto en Thessalia; loĝloko de la Dioj.

*Orestes*: vidu Aigisthos.

*Paieon*: la kuracisto de la Dioj.

*Penelope*: edzino de Oduseus kaj patrino de Telemachos.

*Persephone*: reĝino de l'mortintejo; filino de Zeus.

*Phemios*: kantisto en Ithaka.

*Phoibos* (t.e. la luma): kromonomo de Apollon.



## XII

*Peisistratos*: filo de Nestor; akompanas Telemachos al Menelaos.

*Poseidon* (= Neptunus): Dio de la maro; filo de Kronos kaj frato de Zeus.

*Samos*: la insulo Kephallenia apud Ithaka.

*Scheria*: vidu *Alkinoos*.

*Skulla*: marmonstro.

*Seirenoj*: du belege kantantaj virgulinoj, kiuj allogis kaj pereigis la maristojn.

*Stuks*: rivero en la mortintejo.  
*Tartaros*: parto de la mortintejo.

*Telemachos*: filo de Oduseus.

*Troia aŭ Ilion*: urbo kaj regiono.

*Zeus* (= Jupiter): la plej supra Dio; filo de Kronos kaj Rheia; edzo de Hera; Patro de Dioj kaj homoj; reganto de ĉielo kaj tero.

## UNUA KANTO.

### KUNVENO DE L'DIOJ. INSTIGO DE ATHENE AL TELEMACHOS.

Rakontu, ho Muzo! al mi pri la viro ruzega, kiu tre multe vagadis, post kiam li estis ruiniginta la sanktan urbon Troia; de multe da homoj li vidis la urbojn kaj ekkonis la nacian karakteron, multajn dolorojn li ankaŭ suferis en sia animo, penante akiri propran vivosavon kaj revenon de siaj kunuloj. Sed tamen li ne savis siajn kunulojn, kvankam li arde deziris tion: ĉar ili pereis pro sia propra senpripenseco, la stultuloj! kiuj formangis la bovojn de Huperion Helios; sed ĉi tiu deprenis de ili pro tio la hejmalvenan tagon. Rakontu ankaŭ al ni, dieca filino de Zeus, pri tio, komencante, kie ajn vi volas.

Tiam ĉiuj aliaj, kiuj estis evitintaj la teruran danĝeron, hejme jam estis, forsavinte sin el la milito kaj el la maro. Sed nur lin, sopirantan al hejmenvojaĝo kaj al sia edzino, retenis la respektinda nimfo Kalupso, majestoplena inter la Diinoj, en sia kava kaverno, dezirante, ke li iĝu ŝia edzo. Sed kiam, dum la preterturnigado de la jaroj, la jaro venis, je kiu la Dioj estis destinintaj lian revenon al Ithaka, eĉ tiam li ne estis libera de penoj kaj inter siaj karuloj. La Dioj tamen ĉiuj lin kompatis, escepte Poseidon; ĉi tiu pasie koleradis kontraŭ la disimila Oduseus, antaŭ ol li atingis sian patrujon. Sed Poseidon nun iris al la malproksimaj Aithiopoĵ — la Aithiopoĵ, kiuj dividiĝas en du partojn, la ekstreme loĝantaj homoj sur la tero, kiuj parte vivas, kie malleviĝas Huperion, parte, kie li supreniras — por akcepti hekatombon de virbovoj kaj virŝafoj; tie li ĝuis, sidante ĉe l'festmanĝo; sed la aliaj Dioj dume kunestis en la ĉambregoj de l'Olump-ano Zeus. Meze de ili unua ekparolis la Patro de homoj kaj Dioj, [ĉar li pensis en sia koro pri la eminenta Aigisthos, kiun estis mortiginta Orestes, la vastfama Agamemnon-ido, — tiun rememorante, li parolis meze de l'senmortuloj] :

„Ho ve! Kiom do nun la mortidevuloj imputas al la Dioj! Ĉar ili pretendas, ke devenas de ni la malbono. Sed mem ili ankaŭ suferas pro sia propra senpripenseco dolorojn, kiuj

35 fakte ne estis destinitaj por ili. Tiel nun ankaŭ kontraŭ sia destino Aigisthos edziĝis kun la edzino legitima de l'Atre-ido kaj eĉ lin mortigis post lian revenon, kvankam li sciis sian neeviteblan pecon, ĉar ni estis sendintaj la akrevidan Argus-mortiginton Hermes, por antaŭe lin admoni, ke li nek mortigu 40 lin, nek svatigu al ties edzino; ĉar de Orestes venos la puno pro la Atre-ido mortigita, tuj kiam li plenkreska estos kaj sopiros al sia patrujo. Tiel parolis Hermes, sed kiel bonaj ajn intencoj liaj estis, li neniel konvinkis la animon de Aigisthos. Sed nun li estas punsuferinta pro ĉio kune."

Lin post tio respondis la fajrsprucokula Diino Athene:

45 „Nia Patro Kron-ido, plejaltulo el ĉiuj regantoj! tutcerte tiu Aigisthos laŭmerite estas pereigita. Tiumaniere pecu ankaŭ ĉiu alia, kiu plenumas tiajn hontindaĵojn. Sed mia koro disŝiriĝas pro la saĝa Oduseus, la malfeliĉulo, kiu jam longan tempon malproksime de siaj karuloj dolorojn 50 suferas sur la insulo marĉirkaŭata, kie troviĝas la centra punkto de l'maro. La insulo estas multarbara kaj en sia domo tie loĝas Diino, la filino de l'pereigema Atlas, kiu konas la profundecon de l'tuta maro kaj kiu portas mem la longajn 55 kolonojn, kiuj disigas ĉielon kaj teron. Ties filino retenas la malfeliĉulon ĝemantan kaj senĉese ŝi klopodas ĉarmi lin per vortojkaresaj kaj flataj, por ke li forgesu Ithaka. Sed Oduseus, kiu sopiras vidi eĉ nur la suprenirantan fumon de sia patrujo, 60 deziregas morti. Kaj ĉu via koro ne maltrankviliĝas pro tio, Olump-ano? Ĉu do Oduseus ne volonte kutimis al vi oferdoni apud la ŝipoj de l'Argeioj en la vasta Troia? Kial do vi nun koleras tiom kontraŭ li, ho Zeus?"

Sin respondante alparolis la nubokolektulo Zeus:

„Mia infano! Kiaj vortoj eliĝis el la vico de viaj dentoj? 65 Kiel do mi povus forgesi la diecan Oduseus? Li sin ja ege distingas inter la mortidevuloj per sia saĝeco kaj pli ol aliaj li oferdonis al la senmortuloj, kiuj loĝas en la vasta ĉielo. Sed la terĉirkaŭanto Poseidon koleradas senkompate kontraŭ li 70 pro la Kiklopo, kies okulon li blindigis, pro la disimila Poluphemos, kies forto estas plej granda inter ĉiuj Kiklopoj. Lin naskis la nimfo Thoosa, la filino de Phorkus, reganto super la senripoze ondanta maro, post kiam ŝi estis kuniginta sin ame kun Poseidon en kurbiĝanta kaverno. Depost tiu tempo la 70 tertremiga Poseidon, ne volante lin mortigi, lin vagadigas malproksime de l'lando de liaj prapatroj. Nu do, ni ĉiuj interkonsilu, kiel li revenos hejme. Poseidon ja tiam ĉesigos sian

koleron, ĉar neniel li povas kontraŭbatali sola nin ĉiujn, se ni, senmortaj Dioj, tion ne volas.”

- 80 Lin respondis post tio la fajrŝprucokula Diino Athene:  
 „Ho nia Patro Kron-ido, plejaltulo el ĉiuj regantoj! se ĉi tio plaĉas al la feliĉegaj Dioj, nome, ke la tre prudenta Oduseus revenu al sia domo, tiam ni sendu la kurieron kaj Argus-mortiginton Hermes al la insulo Ogugia, por ke li plej baldaŭ komuniku nian fiksan decidon al la nimfo kun belaj harligoj, nome, ke la persistema Oduseus hejmen revenu. Sed dume mi iros al Ithaka, por ankoraŭ pli multe instigi lian filon kaj por
- 90 enirigi kuraĝon en lian koron, por ke li kunvoku la longharajn Aĉaiojn al kunveno kaj malpermesu pluan restadon en sia domo al ĉiuj amantoj, kiuj senĉese buĉadas liajn interpuŝademajn ŝafojn kaj trenpiedajn, kurbkornajn bovojn. Kaj mi lin sendos al Sparta kaj al la multsabla Pulos, por informiĝi pri la reveno de sia kara patro kaj por provi, ĉu eble li povas
- 95 aŭdi ion pri tio kaj ankaŭ, por ke li akiru belegan gloron inter la homoj.”

Tiel parolinte, ŝi ligis sub la piedojn la belajn sandalojn, nepereipovajn kaj orajn, kiuj kutime ŝin portas same rapide kiel la blovoj de l'vento super la maro kaj super la tero senfina; [kaj ŝi kaptis la lancon fortikan, akrigitan per kupropinto,

100 pezan, grandan kaj solidan, per kiu ŝi bridas la vicojn de l'herooj kiam ŝi, filino de patro fortega, ekkleras kontraŭ ili.]. Rapidante ŝi nun malsupreniris laŭlonge de l'pintoj de l'Olumpos.

Baldaŭ ŝi staris en la lando de Ithaka, ĉe la antaŭkorta pordo de l'domo de Oduseus, antaŭ la sojlo de l'korto kaj

105 kupran lancon ŝi portis en la mano kaj ŝi similis al gastamiko, al Mentes, la ĉefulo de l'Taphanoj. Nun ŝi ekvidis la trokuraĝajn amantojn. Ĝuste ĉi tiuj tutkore ĝuis, ludante per damdiskoj antaŭ la pordo kaj sidante sur feloj de bovoj, kiujn ili estis mem buĉintaj. Ankaŭ ĉeestis heroldoj kaj agemaj

110 servistoj: unuj kunmiksitis vinon kaj akvon en la vinmiksujoj; aliaj purigis la tablojn per truhavaj spongoj kaj ilin antaŭmetis kaj ree aliaj tranĉdividis multajn viandaĵojn.

Multe pli frue ol la aliaj ŝin vidis la disimila Telemachos;

115 li ja sidis meze de l'amantoj kun koro zorgoplena, en sia spirito imagante sian bravan patron kaj pripensante, ĉu tiu, de kie ajn reveninte, dispelos la amantojn en sia domo kaj ĉu li mem denove ricevos reĝan honoron kaj mastros siajn proprajn havaĵojn. Dum li pripensadis ĉi tion, sidante meze de l'amantoj, li ekvidis Athene. Rekte li nun iris senprokraste al la antaŭ-

120 korta pordo, ĉar al lia koro malplaĉis, ke longan tempon stari devas fremdulo ĉe la pordo. Ĝin alproksimiĝinte, li kaptis ŝian dekstran manon kaj deprenis ŝian kupran lancon kaj ĝin alparolante, li diris laŭflugilhavajn vortojn:

„Estu bonvena, fremdulo! ĉe mi vi estos gastame regalata! Poste, kiam vi estos bone manĝinta, vi ja povas diri, kion vi deziras.”

125 Tiel parolinte, li antaŭiris kaj lin sekvis Pallas Athene. Kiam ili estis enirintaj la altan domon, li unue portis for la lancon kaj ĝin metis kontraŭ altan kolonon en la bele glatigitan lancigon, kie staris ankoraŭ multaj aliaj lancoj de l'persistema

130 Oduseus; kaj li kondukis ŝin mem al brakseĝo kaj ŝin sidigis sur ĝin, post kiam li estis malfandinta sur ĝi tolan teksaĵon, belan kaj artplene faritan. Sube troviĝis benketo por la piedoj. Flanke de ĝi li metis por si mem apogseĝon multkoloran, malproksime de l'seĝoj de l'amantoj, por ke ne la fremdulo, ĝenate de l'kriegado de ili, eksentu naŭzon kontraŭ la mango

135 pro la renkonto kun la trokuraĝuloj kaj ankaŭ, por ke li povu peti informojn pri sia forestanta patro. Servistino alportis akvon en bela, ora akvujo kaj tiun elverŝis super arĝenta pelvo sur iliajn manojn por tiujn purigi, kaj antaŭ ilin ŝi metis glatpoluritan tablon. [Post tio la respektinda mastrumistino

140 alportis panon kaj antaŭ ilin ĝin metis, post kiam ŝi estis alportinta ankoraŭ multajn aliajn manĝaĵojn, ĉar volonte ŝi donis el la provizaj nutraĵoj.] Tiam la detranĉisto prenis pladojn da ĉiuspecaj viandaĵoj kaj tiujn metis antaŭ ilin kaj orajn pokalojn li metis antaŭ ilin. La heroldo ageme nun iris tien kaj reen por enverŝi vinon al ili.

145 Sed nun eniris la trokuraĝaj amantoj. Envice ili sidigis sur apogseĝojn kaj brakseĝojn. Heroldoj elverŝis akvon sur iliajn manojn kaj en korbetoj amasigis servistinoj panon kaj junuloj tutplenigis la vinmiksulojn per vino. Ĉiuj nun etendis la manojn al la manĝaĵoj, kiuj pretaj kuŝis antaŭ ili.

150 Sed kiam la amantoj estis kontentigintaj sian avidon al trinko kaj mango, tiam aliaj aferoj okupis ilian spiriton, nome kantado kaj dancado: tio ja plibriligas la festmangon. Heroldo enmanigis belegan liron al Plemios, kiu devigite kutimis kanti por

155 la amantoj. Ĉi tiu, fingre sonigante la liron, ekkantis belan kanton. Sed Telemachos alparolis la fajrŝprucokulan Athena, proksimigante sian kapon al ŝi, por ke la aliaj ne aŭdu:

„Kara gastamiko! ĉu vi koleriĝos kontraŭ mi pro tio, kion mi diros? Al ĉi tiuj plaĉas jeno, citroludado kaj kantado,



160 memkompreneble, ĉar ili ja fordiboĉas senpage la posedaĵojn  
de aliulo, de viro, kies blanka ostaro eble kuŝas putranta surtere  
en la pluvo aŭ ruliĝas enmare tra la ondoj. Ho! Se ili lin vidus  
reveninta al Ithaka: tiam ĉiuj dezirus esti pli rapidpiedaj  
165 aŭ pli riĉaj je oro kaj vestaĵoj! Sed tiel li certe pereis laŭ destino  
malbona kaj neniu konsolo restas al mi, eĉ se iu el la surteraj  
homoj pretendas, ke li revenos. Por li ja estas perdita la hej-  
malvena tago. Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj laŭvere rakontu:  
170 kiu kaj de kie inter la homoj vi estas? kie troviĝas via urbo kaj  
kie vivas viaj gepatroj? Per kia ŝipo vi alvenis? Kiel vin  
alveturigis la ŝipanaro al Ithaka? Al kiu popolo ili sin gloris  
aparteni? Ĉar mi opinias, ke neniel vi venis ĉi tien piede.  
Ankaŭ jenon diru al mi laŭvere, por ke certe mi sciu. Ĉu je  
175 la unua fojo vi nun venis ĉi tien, aŭ ĉu vi jam estas gastamiko  
de mia patro? Ĉar jam multaj aliaj viroj venis en nian domon  
por tio, ke ankaŭ mia patro estis gastama.”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Nepre mi tion rakontos al vi laŭvere. Mi gloras min esti  
180 Mentos, la filo de l'saĝa Anchialos kaj mi regas super la remŝi-  
pamaj Taphanoj. Nun mi tiel alvenis kun mia ŝipo kaj miaj  
kunuloj ĉi tie: mi estas ŝipveturanta trans la vinkoloran maron  
al alilingvaj homoj, al Temesa, por kupron akiri kaj inter-  
185 ŝange mi transportas brilan feron. Mia ŝipo staras surborde  
malproksime de l'urbo en la haveno Rheithron, apud la mal-  
supro de l'multarbara Neion. Ni gloras nin esti gastamikoj  
unu de la alia jam de longe, de la tempo de niaj patroj. Iru  
nur al la maljuna heroo Laertes kaj demandu al li, pri kiu  
190 oni diras, ke li ne plu venas en la urbon, sed malproksime en  
la kamparo suferadas dolorojn kune kun servistino maljuna,  
kiu manĝon kaj trinkon antaŭ lin metas, kiam laceco liajn  
membrojn ekkaptas, dum li trenpaŝadas tra la kampo dekliva  
de sia vinbergardeno. Sed nun mi venis ĉi tien, ĉar oni diris  
195 ke li, via patro, jam estas returne en sia lando; sed certe nun  
la Dioj malhelpas lin survoje. Ĉar ankoraŭ ne mortis sur la  
tero la dieca Odusseus, sed vivante li estas ankoraŭ retenata  
ie sur la larĝa maro, sur insulo marĉirkaŭata kaj malamikaj  
viroj sovaĝaj lin malhelpas kaj retenas kontraŭ lia volo. Sed  
200 nun mi antaŭdiros al vi, kiel la senmortuloj sugestias al mia  
koro, kvankam mi tute ne estas antaŭdiristo, nek ankaŭ bone  
konas la birdajn antaŭsignojn: vere, ne plu longan tempon li  
estos for de sia patrujo, eĉ ne se feraĵ katenoj lin retenus. Li  
205 pripensos, kiumaniere li povas reveni, ĉar elpensema li estas.

Sed nu, diru al mi ĉi tion kaj laŭvere rakontu: ĉu vi, tiel vigla, estas envere la filo de Oduseus mem? Ĉar treege vi lin similas rilate al via kapo kaj viaj belaj okuloj. Ni ja tre multe interri-

210 latis unu kun la alia, antaŭ ol li surŝipiĝis por iri al Troia, kien ankaŭ aliaj eminentuloj el la Argeioj foriris sur siaj kavaj ŝipoj. De post tiam nek mi revidis Oduseus, nek li min."

Ŝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Mi certe tion, ho gasto, rakontos al vi laŭvere. Fakte

215 mia patrino diras, ke mi estas lia filo, sed tion mi mem ne scias. Neniu ja konas sian propran devenon. Ve! Ke estus mi la filo de iu viro feliĉa, kiun alproksimiĝas la maljuneco ĉe

220 liaj proprajoj. Sed nun oni diras, ke mi estas la filo de tiu, kiu iĝis plej malfeliĉa el ĉiuj mortidevuloj — jen, se vi tion deziras scii."

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Vere, la Dioj ne faris vian genton senfama por estontaj tempoj, tial, ke tiel brava vin naskis Penelope. Sed nun do,

225 diru al mi ĉi tion kaj laŭvere rakontu: kiaj festeno kaj moviĝado do estas ĉi tie? Kion signifas tio? Ĉu festmanĝo estas aŭ geedziĝa festo? Ĉar komune pagota interamika festo ĝi certe ne estas. Ŝajnas al mi, ke ili kiel impertinentuloj trokurage diboĉas en la tuta domo; ĉiu prudenta viro, kiu ĉi tien venus kaj vidus la multajn hontindaĵojn, indignus."

230 Ŝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Ho gastamiko! ĉar vi demandas al mi pri tio kaj petas informojn: iam ĉi tiu domo estis riĉa kaj altranga, kiam tiu viro estis ankoraŭ en la lando. Sed la Dioj, celante malfeliĉojn,

235 la malon deziris, ĉar ili tenadis lin kaŝita pli ol iun alian. Ĉar mi ne tiom ĉagrenus pro lia morto, se li estus mortinta meze de siaj kunuloj en la lando de l'Troianoj aŭ en la brakoj de siaj karuloj, post kiam li estis partopreninta la tutan militon. Tiukaze ja ĉiuj Aĉaioj estus starigintaj tombmonteton, por

240 li kaj ankaŭ por sia filo li estus akirinta grandan gloron por estontaj tempoj. Sed nun la ventegoj lin fortrenis senglora. Li forestas, nevidebla kaj senpostsigna kaj por mi li nur post-lasis dolorojn kaj ĝemplorojn. Sed jam ne nur lin mi priĝemadas vekriante, ĉar la Dioj destinis por mi ankoraŭ aliajn malfeli-

245 ĉigajn katastrofojn: ĉar ĉiuj, kiuj regas kiel princoj super la insuloj, super Dolichion kaj Samos kaj la multarbara Zakunthos kaj ĉiuj, kiuj potencas super la rokeca Ithaka, ili ĉiuj deziras svatiĝi al mia patrino kaj fordiboĉas mian domon. Kaj ŝi nek rifuzas la abomenan edziniĝon, nek povas decidi

x *παρὰ τὴν ἀπόφασιν*

250 je ĝia efektivigo; kaj ili dume ruinigas festenante mian domon.  
Baldaŭ ili ankaŭ pereigos min mem.”

Malkontente lin nun alparolis Pallas Athene:

„Ve, vi do certe ege bezonas la forestantan Oduseus, kiu  
nepre punus propramane la senhontajn amantojn. Ho! se li  
255 nun alvenus kaj starus antaŭ la pordo de l' domo kun kasko,  
ŝildo kaj du lancoj, ankoraŭ same forta kiel, kiam mi lin vidis  
je la unua fojo en nia domo, trinkanta kaj ĝuanta, kiam li  
260 venis el Ephura, de Ilos, la Mermer-ido. Ĉar ankaŭ tien iris  
Oduseus per sia ŝipo rapida, volante akiri virmortigan venenon,  
por ĝin ŝmiri sur la kuprotegitajn lancojn. Sed ĉi tiu ĝin ne  
donis al li, car li respektis la ĉiamajn Diojn. Sed mia patro ĝin  
265 donis al li, ĉar li ege ŝatis lin. Ho, se Oduseus, ankoraŭ same  
forta, ekbatalus kontraŭ la amantoj! Tiam ili ĉiuj baldaŭ  
estus mortaj kaj iliaj edziĝoplanoj amariĝus! Sed nepre ĉi  
tio kuŝas sur la genuoj de l' Dioj, ĉu li hejmen veninte, punsu-  
ferigos ilin en sia domo aŭ ĉu ne. Mi tamen admonas al vi  
270 pripensi, kiel vi forpelos la amantojn el via domo. Nu do,  
aŭskultu kaj bone atentu je miaj vortoj. Morgaŭ kunvoku la  
heroecajn Aĉaiojn kaj ĉiujn alparolu kaj la Dioj atestu!  
Petu insiste, ke la amantoj disiĝu kaj iru al siaj propraj loĝejoj,  
275 sed irigu vian patrinon, se ŝia koro inklinas al reedziniĝo,  
returne al la domo de ŝia multpotenca patro. La amantoj tiam  
preparos la geedziĝon kaj la edziĝodonojn ili pretigos [multe-  
gajn, kiom konvenas doni por kara filino]. Al vi mem mi  
donos prudentan konsilon, esperante, ke vi agos laŭ ĝi.  
280 Ekipu la plej bonan ŝipon per dudek remistoj kaj forvojaĝu  
por informiĝi pri via longan tempon forestanta patro, provante,  
ĉu eble iu el la mortidevuloj povas ion diri al vi, aŭ ĉu eble vi  
aŭdos iun de Zeus senditan famon, kiu tre ofte alportas sciigon  
al la homoj: iru unue al Pulos kaj pridemandu la diecan Nestor;  
285 iru de tie al Sparta, al la blondhara Menelaos; tiu ja estis la  
lasta el la kuprokirasaj Aĉaioj, kiu revenis. Se vi ekscios, ke  
via patro vivas kaj hejmen revenas, tiam vi ja ankoraŭ unu  
jaron eltenos, kiom ajn vi estas turmentata; sed se vi male  
290 ekscios ke li mortis kaj ne plu vivas, tiam revenu al via kara  
patrujo, starigu por li tombmonteton kaj forbruligu sur ĝi  
ĉion, kio estis kara al li [multnombro, kiom konvenas, kaj  
vian patrinon edzinigu kun iu viro]. Sed kiam vi estos plenu-  
minta kaj finfarinta ĉi tion, tiam pripensu en via spirito kaj  
295 animo, kiumaniere vi mortigos la amantojn en via domo,  
ĉu perruze, ĉu malkaŝe. Ne plu decas al vi kondukti kvazaŭ vi

estus infano, ĉar tiel junaĝa vi ne plu estas. Ĉu vi ne aŭdis, kian gloron akiris la dieca Orestes inter la homoj, tial ke li  
 300 mortigis la mortiginton de sia patro, la ruzan Aigisthos, kiu mortigis lian patron famkonatan? Vi ankaŭ, amiko — ĉar mi vidas, ke vi estas ege bela kaj altkreska — estu forta, por ke multaj, ankaŭ el la posteuloj, vin laŭdu. Sed mi nun reiros al mia ŝipo rapida kaj al miaj kunuloj, kiuj eble min atendas  
 305 tre malpacience; zorgu do pri vi mem kaj pripensu miajn parolojn.”

Ŝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Gasto, vi vere tion diras kun gentilaj intencoj, kiel patro al filo kaj neniam mi tion forgesos. Sed nu do, restu ankoraŭ, kiel arde ajn vi deziras forvojaĝi, por bani vin kaj por man-  
 310 ĝante refreŝigi vian koron kaj por ke vi ankaŭ, ĝojante en via animo, reiru al via ŝipo kun multvalora donaco, kiu estos por vi trezoro de mia flanko, kian karaj gastamikoj kutimas doni unu al la alia.”

Lin respondis post tio la fajrŝprucokula Diino Athene:

315 „Jam ne retenu min nun, ĉar mi sopiras al forvojaĝo; kaj la donacon, kiun vi laŭ instigo de via koro volas doni al mi, donu ĝin, kiam mi estos reveninta, por ke mi ĝin kunportu hejmen, kaj elektu ion tre belan. Vi ricevos de mi alian donacon, kiu valoras interŝanĝon.”

Tiel parolinte, foriris la fajrŝprucokula Diino Athene: kaj  
 320 kiel birdo supren ŝi flugis tra la aero. Sed lian koron ŝi estis fortiginta kaj kuraĝiginta kaj ŝi igis lin memori lian patron ankoraŭ pli multe ol antaŭe. Kaj tion eksentante en sia spirito, li miregis enanime; ĉar li ekkomprenis, ke estis Diaĵo. Tuj la disimila viro nun iris al la amantoj.

325 Meze de ili kantadis la kantisto tre fama kaj silentaj ili sidis kaj aŭskultis. Li prikantis la malĝojan revenon de l'Aĉaioj el Troia, ordonitan de Pallas Athene. De la supra etaĝo aŭdis lian diinspiritan kantadon la filino de Ikaros, la tre prudenta  
 330 Penelope; ŝi malsupreniris la altan ŝtuparon de sia domo, sed ne sola: ŝin sekvis du servistinoj. Kiam ŝi, la dieca inter la virinoj, estis veninta ĉe la amantoj, ŝi stariĝis flanke de l'pordokadro de l'fortike ĉarpentita ĉambrego, sed antaŭe ŝi estis malsuprentirinta antaŭ siajn vangojn la briletan vualon. Kaj  
 335 ambaŭflanke de ŝi staris unu zorgema servistino. Plorante post tio ŝi alparolis la kantiston diecan:

„Phemios, vi ja konas ankoraŭ multajn aliajn ĉarmajn kantojn, la farojn de homoj kaj Dioj, kiujn laŭdegas la kantistoj.

Kantu, sidante meze de ili, unu el tiuj kaj ili trinku silentaj  
 340 sian vinon. Sed ĉesigu ĉi tiun malĝojigan kanton, kiu ĉiam  
 turmentas la koron en mia brusto, ĉar min trafis treege ĉagreno  
 neforgesebla. Mi ja ĉiam sopiradas kaj senĉese memoras la  
 tiel bonan viron, kies gloro etendiĝas en Hellas kaj en la interno  
 de Argos.”

345 Ĝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Mia patrino! kial do vi ne permesas al la fidela kantisto  
 ĝuigi nin tiel, kiel al li instigas lia spirito? Ĉar ne la kantistoj  
 estas kulpaj, sed eble Zeus, kiu al ĉiu el la panomangaj homoj  
 350 malfeliĉon donas laŭ sia volo. Ĉi tiu ne estas mallaŭdinda, ĉar  
 li prikantas la malfeliĉan sorton de l'Danaoj: ĉar tian kanton  
 la homoj plej aprobas, kiu kiel la plej nova ĉirkaŭŝvebas la  
 aŭdantojn. Tial viaj koro kaj animo kuraĝiĝu por aŭskulti.  
 Ĉar ne nur Oduseus perdis la tagon de l'reveno en Troia, sed  
 355 ankaŭ multaj aliaj viroj pereis. [Sed iru al via ĉambro kaj  
 zorgu pri via laboro, pri la teksilo kaj la ŝpinaĵo kaj ordonu  
 al viaj servistinoj, ke ili komencu sian laboron. Kontraŭe  
 la viroj zorgu pri paroloj, ni ĉiuj, sed precipe mi mem, ĉar al  
 mi apartenas la supera potenco en la domo].”

360 Kaj miregante ŝi rapide returne iris al sia ĉambro, ĉar ŝi  
 estis aŭdinta la vortojn prudentajn de sia filo kaj suprenirinte  
 kun siaj servaj virinoj al sia supretaĝa ĉambro, ŝi priploris  
 sian karan edzon Oduseus, ĝis kiam la fajrsprucokula Athene  
 365 ŝutis sur ŝiajn palpebrojn dolĉan dormon. Dume kriegis la  
 amantoj en la ombroriĉa ĉambrego kaj ĉiuj deziris kuŝiĝi flanke  
 de ŝi en la lito. Meze de ili nun ekparolis la saĝa Telemachos:

„Vi, kiuj kun perforta trokuraĝeco svatiĝas al mia patrino!  
 370 ni manĝante ĝoju nun kaj ĉesu la kriado! Ĉar estas ja belege,  
 aŭskulti je tia kantisto, kia ĉi tiu estas, egalanta la Diojn  
 je voĉo. Morgaŭ ni frumatene iru al la kunvenejo kaj kune ni  
 tie sidiĝu, por ke mi eldiru malkaŝe mian volon al vi, [ke vi  
 ĉi tiun domon forlasu; vi preparu aliajn festenojn, fordiboĉante  
 375 viajn proprajn havaĵojn kaj irante de unu domo al alia. Sed  
 se al vi ŝajnas esti pli profitodone kaj pli bone, ruiniĝi senpage  
 la proprajn de nur unu viro, tiam daŭrigu vian diboĉadon.  
 Sed mi alvokos la ĉiamajn Diojn, preĝante, ke Zeus allasu,  
 380 ke vi estu punata pro tio. Senrevenĝe vi tiuokaze pereus en  
 ĉi tiu domo].”

Tiel li parolis. Sed ili ĉiuj mordis la lipojn pro kolero kaj  
 miris pri Telemachos, ĉar li estis parolinta sentime. Lin siavice  
 alparolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

385 „Telemachos, la Dioj mem vin certe instruas esti fanfarona kaj paroli kuraĝe: ke nur ne vin faru la Kron-ido reĝo super la marĉirkaŭata Ithaka, kion vi tamen pro via deveno rajtas esti.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

390 „Antinoos, kvankam vi eble koleriĝos pro tio, kion mi diros, mi konfesas: eĉ tiun honorecon volonte mi akirus, almenaŭ se Zeus ĝin volus donaci al mi. Aŭ ĉu vi opinias, ke tio estas plej malbona inter la homoj? Vere, estas neniel malbone esti reĝo: tre baldaŭ la domo de li fariĝas riĉa kaj li mem pli honorata estas ol la aliaj. Sed, tutcerte, ekzistas ankaŭ multaj aliaj princoj inter la Aĉaioj, en la marĉirkaŭata Ithaka, junaj kaj ankaŭ maljunaj, el kiuj ja iu ekposedos la reĝecon, ĉar mortis la dieca Oduseus; sed mi restos estro de mia domo kaj de l'geservistoj, kiujn militakiris por mi la dieca Oduseus.”

Lin siavice alparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

400 „Telemachos, ĉi tio tutcerte kuŝas sur la genuoj de l'Dioj, kiu estos reĝo super la Aĉaioj en la marĉirkaŭata Ithaka. Viajn proprajojn vi povas konservi por vi kaj vi povas estri vian propran domon. Ne venu iu homo, kiu kontraŭ via volo perforte prirabos vin de viaj havaĵoj, dum Ithaka havos ankoraŭ 405 loĝantojn! Sed nun, estimulo, mi volas demandi al vi pri la fremdulo; de kie do venis tiu viro, al kiu lando li sin gloris aparteni kaj kie troviĝas lia popolo kaj la lando de liaj prapatroj? Ĉu li eble alportis la sciigon, ke via patro estas revenanta? Aŭ ĉu li venis ĉi tien por siaj propraj utiloj? Kiel rapide li 410 foriris kaj kiel baldaŭ li malaperis, eĉ ne atendante, ĝis kiam ni lin konis; tamen li tute ne similis al malaltulo rilate sian vizaĝon!”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Eurumachos, la reveno de mia patro certe neniam okazos. Tial mi ne plu fidas sciigojn, kiuj eble venos kaj mi ne plu 415 maltrankviliĝas pro antaŭdiraĵoj, kiam mia patrino vokas en sian ĉambron klarigiston de antaŭsignoj kaj lin pridemandas. La fremdulo estas de la tempo de niaj patroj nia gastamiko el Taphos. Li gloras sin esti Mentos, la filo de l'saĝa Anchialos kaj li regas super la remŝipamaj Taphanoj.”

420 Tiel parolis Telemachos, sed en sia koro li estis rekoninta la Diinon senmortan. Sed ili ĝuis, turnante sin al dancado kaj al dolĉa kantado kaj tion ili daŭrigis ĝis la proksimiĝo de la vespero. Dum ili tiel ĝuadis, alproksimiĝis la nigra vespero; 425 tiam ĉiu dormdezirante iris hejmen. Telemachos iris tien, kie



por li estis konstruita en la belega antaŭkorto alta dormejo, sur loko ĉiuflanke videbla, al sia kuŝejo, multajn aferojn pripensante en sia spirito. Kaj iris kun li, portante torĉojn flaman-tajn, la zorgema Eurukleia, la filino de l'Pensenor-ido Ops, kiun  
 430 iam Laertes estis aĉetinta per propraj rimedoj, kiam ankoraŭ ŝi estis juna kaj la valoron de dudek bovoj li estis paginta por ŝi. Li ŝin honoris same alte kiel sian zorgeman edzinon en sia palaco, sed neniam kun ŝi li sin kunigis ame, ĉar li evitis la koleron de sia edzino. Ĉi tiu do akompanis lin, portante flaman-  
 435 tajn torĉojn; kaj el ĉiuj servistinoj ŝi plej multe lin amis, ĉar ŝi estis lin nutrinta, kiam li estis infano. Li malfermis la pordon de l'fortike farita dormejo, sidiĝis sur sian liton kaj demetis la molan subveston. Kaj tiun li metis en la manojn de la saĝa maljunulino. Kaj ŝi faldis kaj ŝovglatigis la subveston  
 440 kaj pendigis ĝin sur lignan najlon apud la ĉizajhava lito; post tio ŝi foriris el la dormoĉambro, tirfermis la pordon per la arĝenta pordoringo kaj ŝovis per la rimeno la riglilon antaŭ ĝin. Tie li pripensis la tutan nokton, envolviĝinte en la lanan ŝafofelon, en sia spirito la vojaĝon, kiun estis indikinta al li Athene.

---

## D U A K A N T O .

### KUNVENO DE L'ITHAKANOJ: FORVOJAĜO DE TELEMACHOS.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam leviĝis el sia lito la kara filo de Oduseus, post kiam li estis almetinta la subveston kaj li ĵetis la akran glavon ĉirkaŭ la ŝultron kaj ligis sub la briletaj piedoj la belajn sandalojn. Nun li  
 5 forlasis sian dormoĉambro, similante al Diaĵo je la eksteraĵo. Tuj li nun ordonis al la laŭtvoĉaj heroldoj, ke ili kunvoku la longharajn Aĉaiojn al la kunvenejo. Kaj ili kunvokis kaj tre rapide la popolo kunvenis. Sed kiam ili estis kolektintaj sin  
 10 kaj kune estis, tiam Telemachos iris al la kunsidejo; en sia mano li portis la kupran lancon; sed li ne iris sola. Kune kun li iris du rapidpiedaj hundoj. Diecan belecon Athene nun ŝutis sur lin kaj ĉiuj viroj admire lin rigardis, kiam li preterrapidis. Nun li sidiĝis sur la seĝon de sia patro kaj la maljunuloj cedis  
 15 antaŭ li. Tiam meze de ili ekparolis la heroo Aiguptios, kiu

- jam estis kurbiginta de maljuneco kaj sciis tre multe; ankaŭ lia kara filo estis kunirinta kun la disimila Oduseus sur la kavaj ŝipoj al la multĉevala Ilion, nome la lanĉfama Antiphos.
- 20 Sed la furioza Kiklopo lin mortigis en sia kurbiganta kaverno kaj li pretigis sian lastan vespermanĝon per li. Tri aliajn filojn havis Aiguptios, el kiuj unu, Eurunomos, estis inter la amantoj, dum la du aliaj ĉiam prizorgadis la terposedaĵojn de sia patro. Sed vekriante kaj plendante, li neniam forgesis tiun unu filon. Pro tiu verŝante larmojn, li ekparolis kaj diris meze de ili:
- 25 „Aŭskultu vi nun, Ithakanoj! je tio, kion mi diras. Nek kunveno, nek kunsido iam okazis inter ni, de kiam la dieca Oduseus foriris per la kavaj ŝipoj. Kiu do nun kunvokis nin tiumaniere? Kiun el la junuloj au pliaĝuloj devigis al tio tiom
- 30 granda bezono? Ĉu eble tiu aŭdis sciigon pri la revenanta armeo, kiun li klare povas al ni komuniki, post kiam li mem ĝin aŭdis? Aŭ ĉu li atentigos nin je iu alia grava afero por nia popolo kaj ĉu li tion preparolos? Noblanima ŝajnas al mi la benito. Zeus mem plenumu al li ĉion bonan, kion li deziras
- 35 en sia animo.’’

- Tiel li parolis kaj ĝojis la kara filo de Oduseus pro lia parolo feliĉpromesa; ne plu longan tempon li restis sidanta, ĉar li deziregis paroli. Kaj meze de la kunveno li ekstaris kaj enmanigis al li la sceptron la heroldo Peisenor, sperta je planoj prudentaj. Unue li nun alparolis la grizharulon kaj li diris:
- 40 „Grizharulo, ne malproksima estas la viro — baldaŭ vi mem ekscios tion — kiu kunvenigis la popolon: mi tion faris, ĉar min plej grave trafas ĉagreno. Mi nek aŭdis sciigon pri la armeo revenanta, kiun mi povus al vi komuniki, post kiam mi mem ĝin aŭdis, nek vin atentigos je alia grava afero por nia popolo
- 45 kaj tiun preparolos, sed mi volas paroli pri mia propra mizero, ĉar duobla malfeliĉo trafis mian domon: unue mi perdis mian noblaniman patron, kiu estis iam reĝo super vi kaj kiel patro estis li bonkora. Sed nun ekzistas por mi ankoraŭ multe pli granda malfeliĉo, kiu tutcerte detruos baldaŭ la tutan domon
- 50 kaj mian tutan posedaĵon pereigos. La amantoj sin svatas al mia patrino kontraŭ ŝia volo, la filoj de viroj, kiuj ĉi tie estas la plej eminentaj [; ili ne kuraĝas iri al la hejmo de ŝia patro Ikarios, por demandi al li, ke mem li difinu la edziĝdonacojn kaj ŝin edzinigu kun tiu, kiun li volas kaj kiu estas bonvena
- 55 al li]. Ili venas ĉiutage al nia domo, buĉadas bovojn kaj ŝafojn kaj grasajn kaprinojn kaj festenadas kaj trinkadas senzorge la vinon perlantan. Kaj tiel ĉi ĉio multamase perdiĝas. Ĉar

- tia ĉeestas neniu viro, kia estis Oduseus, kapabla, deteni  
 60 tiun pereon de nia domo. Ni ja tute ne povas ilin deteni. Vere,  
 ankaŭ estontece ni estos malgajaj kaj je defendo nekapablaj.  
 Certe mi min defendus, se nur mia forto sufiĉus. Ĉar faroj ne  
 plu tolereblaj okazas kaj mia domo jam pereis malhonore.  
 Vi ankaŭ malŝatu ĉi tion kaj hontu je la popoloj najbaraj,  
 65 kiuj loĝas ĉirkaŭ ni. Timu vi ankaŭ la venĝemon de la Dioj,  
 por ke ne vin punu ili, malkontentaj pro tiuj malbonfaroj.  
 Mi vin petegas pro la Olump-ano Zeus kaj pro Themis, kiu  
 ĉesigas la kunsidojn de la homoj kaj ilin ankaŭ kunvenigas,  
 70 finu vi vian indiferentecon kaj lasu min sola konsumiĝi de  
 ĉagreno, almenaŭ se mia patro, la nobla Oduseus, ne malice  
 malbonfaris la Achajojn kun bonaj tibiŝirmiloj, tiel ke rekompence  
 por tio vi revenĝe nun malbonfaras al mi, instigante la  
 amantojn. Sed tiam pli bone estus por mi, se mem vi fordi-  
 75 boĉus miajn havaĵojn moveblajn kaj nmoveblajn. Se vi estus  
 mem manĝinta ĉion for, tiam eble mi ricevus iam kompenson:  
 tiam ni ja petegus tra la tuta urbo, repostulante nian proprajon,  
 ĝis kiam ĉio estus redonita. Sed nun vi enirigas nesaniĝeblajn  
 dolorojn en mian koron.”
- 80 Tiel li kolere parolis kaj teren li ĵetis sian sceptron, larmojn  
 verŝante. Kaj kompato ekkaptis la tutan popolon. Tiam ĉiuj  
 aliaj estis silentaj kaj neniu kuraĝis respondi al Telemachos  
 per malĝentilaj vortoj. Nur Antinoos lin respondis kaj diris:  
 85 „Telemachos! fanfaronulo! nekontraŭstarebla je kuraĝo!  
 kiel vi parolis, hontigante nin? Vi certe dezirus imputi mallaŭ-  
 dindajn farojn al ni. Sed la Achajaj amantoj tute ne estas  
 kulpaĵ al vi, sed male via propra patrino, kiu tre sperta estas  
 je ruzaĵoj. Ĉar estas jam la tria jaro, kaj baldaŭ venos la kvara,  
 90 de kiam ŝi trompas la animon en la brusto de l’Achajoj. Ĉiujn  
 ŝi esperigas kaj al ĉiu viro ŝi faras promesojn kaj ŝi alsendas  
 al ni kurierojn, sed ŝia koro deziras ion alian. [Interalie ŝi  
 ankaŭ elpensis en sia animo jenan ruzaĵon: ŝi komencis en sia  
 ĉambro grandan teksaĵon kaj ekteksis tolaĵon delikatan kaj  
 95 tre grandan kaj tuj post tio ŝi diris al ni: „Junuloj, miaj aman-  
 toj, de kiam mortis la dieca Oduseus, vi atendu, kvankam vi  
 deziregas mian edziniĝon, ĝis kiam — por ke la teksaĵo ne  
 fariĝu senutila — mi estos finfarinta mortotukon por la heroo  
 100 Laertes, por la tempo, kiam lin trafos la pereiga sorto de l’mult-  
 dolora morto. Ĉar mi timas, ke iu el la Achajinoj en la popolo  
 min mallaŭdus, se li, kvankam li tiom posedis, kuŝus sen  
 mortotuko.” Tiel ŝi parolis kaj nia kuraĝa koro persvatiĝis.

Tiam ŝi efektive dumtage teksis grandan parton, sed ĉiufoje  
 105 ŝi nokte ĝin malteksis ĉe la lumo de torĉoj brulantaj, kiujn  
 ŝi metis apud ĝin. Tiel dum tri jaroj ŝia ruzo restis nerimarkita  
 kaj ŝi konstante kontentigis la Aĉaiojn. Sed kiam la kvara  
 jaro venis kaj proksimiĝis la novaj sezonoj, tiam unu el la ser-  
 vistinoj, kiu certe ĝin sciis, ĝin diris al ni kaj ni ŝin trovis  
 110 malteksanta la tukon belegan. Tiel ŝi ĝin nun finfaris, kvankam  
 kontraŭvole kaj devigite.] La amantoj tial admonas al vi la  
 jenon, por ke mem vi sciu en via animo kaj ankaŭ sciu ĉiuj  
 Aĉaioj: reirigu vian patrinon al ŝia patro kaj petu insiste,  
 ke ŝi edziniĝu kun tiu, kiun ŝia patro konsilas al ŝi kaj kiu  
 115 al ŝi plaĉas. Se tamen ŝi volas ankoraŭ longtempe inciti la  
 filojn de l'Aĉaioj, ĉiam pensante en sia animo pri tio, kion  
 al ŝi supermezure donacis Athene, nome fari teksaĵojn belegajn  
 kaj posedi bonan intelekton, kaj ankaŭ ruzaĵojn, kiajn ni  
 ankoraŭ neniam aŭdis je antaŭaj virinoj, je tiuj, kiuj estis  
 120 iam la Aĉaianoj kun belaj harligoj, kiel Turo, Alkmene  
 kaj Mukene kun bela harbando... Neniu el tiuj konis ruzojn  
 egalajn al tiuj de Penelope. Sed almenaŭ ĉi tion ŝi ne elpensis  
 je sia profito: ĉar la amantoj tiel longtempe formanĝos viajn  
 havaĵojn kaj posedaĵojn, kiel ŝi persistos en sia decido, kiun  
 125 la Dioj metas en ŝian koron. Certe ŝi tiel akiras grandan gloron  
 por si, sed ankaŭ por vi la perdiĝon de multaj havaĵoj. Ni ne  
 foriros al niaj bienoj, nek aliloken, antaŭ ol ŝi la edzino estos  
 de tiu el la Aĉaioj, kiun ŝi mem deziras."

X Lin siavice alparolis la saĝa Telemachos:  
 130 „Antinoos, estas neeble al mi, forpuŝi ŝin kontraŭvola el  
 mia domo, ŝin, kiu naskis kaj edukis min. Plue troviĝas mia  
 patro aliloke surtere, ĉu vivanta ĉu jam mortinta. Estas ankaŭ  
 hontinde, ke grandan kompenson mi devos pagi al Ikarios, se  
 libervole mi mem resendos mian patrinon al li. Ĉar mi malbon-  
 fartos de la flanko de ŝia patro kaj la Diaĵoj donos ankoraŭ  
 135 aliajn punojn, kiam mia patrino, forlasante la domon, alvokos  
 la vengodiinojn terurajn. Krome min trafos la malestimo de  
 la homoj. Tial neniam mi diros al ŝi tiun malhonoran parolon.  
 Sed se en via animo ankoraŭ troviĝas hontosento, tiam vi  
 foriru el mia domo kaj preparu aliajn festenojn, fordiboĉante  
 140 viajn proprajn havaĵojn kaj irante de unu domo al la alia. Se  
 tamen al vi ŝajnas pli profitodone kaj pli bone ruinigi senpage  
 la havaĵon de unu viro, tiam daŭrigu vian fordiboĉadon. Sed  
 mi alvokos la Diojn eternajn, preĝante, ke Zeus repagigu vin.  
 145 Senrevenĝe vi tiam pereus en ĉi tiu domo."

Tiel parolis Telemachos. Kaj la laŭttondra Zeus igis flugi malsupren, kiel antaŭsignon, du aglojn de sur la supro de alta monto. Kelkan tempon flugis ĉi tiuj sur la ventblovo proksime unu al la alia, kun etenditajflugiloj; sed kiam ili alvenis super la mezo de l'bruparola kunsido, tiam ili rondflugis, senĉese flugilbatante, kaj ili rigardis ĉies kapojn kaj iliaj okuloj profetis malbonon kaj, ŝirvundante per la pintungoj siajn kapon kaj kolon, ili rapide dekstren flugis super la domojn kaj super la urbon de l'Ithakanoj. Pro la birdoj ĉiuj miregis, ilin vidante per la okuloj; kaj en sia animo ili pripensis, kio nun estas okazonta. Meze de ili nun ankaŭ parolis la maljuna heroo Alitherses, la Mastor-ido — ĉar nur li superis siajn samaĝulojn rilate la konon de la aŭguroj kaj la klarigon de antaŭsignoj —

150  
155  
160 ĉi tiu bonvole meze de ili ekparolis kaj diris:

„Aŭskultu vi nun, Ithakanoj, je tio, kion mi diros. Sed precipe, ĉar mi volas informi la amantojn, mi jene parolas. Ilin ja alruliĝas granda malbono. Ĉar Oduseus ne plu longtempe estos for de l'siaj, sed li jam estas ie proksima kaj li projektas morton kaj pereon por ili ĉiuj. Kaj ankaŭ multaj aliaj malbonfartos, kiuj enloĝas la bone videblan Ithaka. Tial do prefere ni pripensu, kiel ni povos trankviligi lian koleron. Sed ankaŭ mem la amantoj trankviliĝu, ĉar tio por ili sendube estas plej profitiga. Mi ja antaŭdiras ne sensperte, sed kiel kompetentulo. Ĉar mi opinias, ke ĉio nun okazos al li kiel mi al li profetis, kiam al Ilion surŝipiĝis la Argeioj, kaj inter ili kuniris la saĝa Oduseus. Tiam mi diris, ke multe suferinte kaj perdinte ĉiujn siajn kunulojn, en la dudeka jaro li revenos hejmen, de neniu rekonate. Kaj ĉio ĉi tio nun plenumiĝas.”

165  
170  
175

Lin siavice alparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

„Grizharulo! iru hejmen kaj profetu viajn infanojn, por ke estontece ilin ne trafu malbono. Ĉar ĉi tion mi povas multe pli bone klarigi ol vi. Multaj birdoj ja flugas en la radioj de l'suno kaj tamen ne ĉiuj estas antaŭsignoj. Sed Oduseus pereis malproksime kaj mi dezirus, ke estus ankaŭ vi pereinta kune kun li. Tiam vi ne estus elparolinta tian antaŭdiron kaj vi ne estus tiom incitinta la kolerantan Telemachos, esperante, ke li donos al vi donacon por via domo. Sed mi eldiros ion al vi, kio ankaŭ estos plenumata: se vi, havante malnovan kaj grandan sperton, rezoninklinigos per viaj vortoj la junan viron kaj lin stimulos al agado malamika, tiam unue li mem je tio malprofitos, dum li tamen nenion efiki kapablos pro la multnombraj amantoj, kaj al vi, grizulo! ni havigos punon, pro

180  
185  
190

kiu vi ĉagreniĝos en via animo; ĉar via turmentigo estos severa. Mi mem konsilas en ĉeesto de ĉiuj al Telemachos jene: li instigu  
 195 sian patrinon, ke ŝi reiru al la domo de sia patro. Dume la  
 amantoj preparos la geedziĝon kaj ili pretigos la edziĝdonacojn  
 [multegajn, kiom konvenas doni por kara filino]. Mi ja opinias,  
 ke la filoj de l'Aĉaioj ne antaŭe ĉesigos siajn malfacilajn  
 200 edziĝopetojn, ĉar ni tute neniun timas, eĉ ne Telemachos, kiom  
 ajn li estas parolema; ankaŭ ni ne iĝas maltrankvilaj pro la  
 profetaĵo, kiun vi, grizulo! sensukcese proklamas: vi nur mal-  
 amindiĝas pro tio pli multe. Kaj ĉiam liaj havaĵoj malhonore  
 estos fordiboĉataj kaj neniel kompenson li havos, tiel longtempe,  
 205 kiel ŝi prokrastas edziniĝon kun iu el la Aĉaioj. [Tamen  
 ni dezirege ĉiujn tagojn konkuradas por ekposedi tiun eminentan  
 virinon kaj neniam ni svatiĝas al aliaj virinoj, kun kiuj ja  
 ĉiu el ni edziĝi povas]."

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

210 „Eurumachos kaj vi, aliaj eminentaj amantoj! pri ĉi ĉio  
 mi ne plu petegas aŭ parolas al vi, ĉar ĉion jam scias la Dioj  
 kaj ĉiuj Aĉaioj. Sed nu, vi donu al mi rapidan ŝipon kaj  
 dudek kunulojn, kiuj kun mi transvojaĝu la maron tien kaj  
 215 reen. Ĉar al Sparta mi iros kaj al la sabloriĉa Pulos, por infor-  
 miĝi pri la reveno de mia longan tempon forestanta patro,  
 provante, ĉu eble iu el la mortidevuloj povas diri ion pri tio  
 al mi, aŭ ĉu mi ekaŭdos ian de Zeus senditan famon, kiu tre  
 ofte alportas sciigon al la homoj. Se mi ekaŭdos, ke mia patro  
 vivas kaj hejmen revenas, tiam mi ja eltenos ankoraŭ unu jaron,  
 220 kiom ajn mi estas turmentata, sed se mi ekscios, ke li mortis  
 kaj ne plu vivas, tiam mi revenos al mia kara patrujo kaj mi  
 starigos tombmonteton por li kaj mi forbruligos sur ĝi ĉion,  
 kio estis kara al li [multnombro, kiom konvenas, kaj mi edzini-  
 gos mian patrinon kun iu viro]."

Tiel parolinte, li sidiĝis kaj meze de ili ekstaris Mentor,  
 225 kiu estis amiko de l'neriproĉebla Odusseus; ĉi tiu, kiam li  
 forvojaĝis per ŝipo, estis konfidinta al li sian tutan domon  
 [por ke ĉiu obeu la maljunulon kaj por ke tiu gardu ĉion sen-  
 difekta]. Tiu ĉi bonvole meze de ili ekparolis kaj diris:

„Aŭskultu vi nun, Ithakanoj, je tio, kion mi diros. Neniu  
 230 sceptroporta reĝo estu ankoraŭ kompleza, mildanima kaj afabla,  
 nek justa en sia koro, sed ĉiam li estu malbonhumora, kaj ple-  
 numu abomenindaĵojn; neniu ja ankoraŭ memoras pri Odu-  
 seus, la dieca inter la popoloj, super kiuj li estis reĝo kaj por kiuj  
 235 li estis dolĉanima kiel patro. Sed envere, mi tute ne envias la



trokuraĝajn amantojn, pro tio ke ili plenumas perfortaĵojn kun ruzaj intencoj: ĉar riskante sian kapon, perforte ili dibočas la posedaĵojn de Oduseus, erarkredante, ke li ne plu revenos. Ne, sed mi malkontentas pro la cetera popolo, pro vi, kiuj  
 240 silente ĉiuj sidadas kaj kiuj eĉ ne per riproĉaj vortoj la malmultajn amantojn haltigas, dum tamen vi mem multnombraj estas.”

Lin siavice alparolis la Euenor-ido Leokritos:

„Mentor, pereigema, freneza! kian parolon vi eligis, instigante la popolon, ke ili nin haltigu? Estus malfacile [batali pro  
 245 manĝo kontraŭ viroj plinombraj]. Ĉar eĉ se la Ithakano Oduseus mem ĉi tien venis kaj dezirus en sia koro forpeli la nobelajn amantojn, festenantajn en lia tuta domo, tiam lia edzino  
 250 tamen ne ĝojus, kiom ajn ŝi sopiregas al lia reveno, sed lin atendus ĉi tie malhonora morto, [se li kontraŭbatalus pli multajn; ne, laŭdece vi ne parolis]. Nu do, vi viroj, disiĝu, ĉiu al sia propra laboro. Dume por tiu rapide preparos vojaĝon Mentor-kaj Halitherses, kiuj ja ambaŭ estas amikoj malnovaj  
 255 de lia patro. Sed mi supozas, ke li, restante ankoraŭ longtempe ĉi tie, atendos sciigojn en Ithaka kaj neniam plenumos tiun vojaĝon.”

Tiel li paroladis kaj li disigis la kunvenon kaj ili rapide foriris. Ĉiuj nun iris disen al siaj propaj domoj, sed la amantoj iris al la domo de la dieca Oduseus.

260 Telemachos tamen iris solece al la bordo de l'maro kaj post kiam li estis puriginta la manojn en la grizkolora maro, li preĝis al Athene:

„Aŭdu min, vi, kiu venis hieraŭ kiel Diaĵo en mia domo kaj kiu ordonis al mi, ke mi iru per ŝipo trans la maron nebulecan por informiĝi pri la reveno de mia longan tempon forestanta  
 265 patro; sed ĉi ĉion malpermesas la Aĉaioj kaj precipe la amantoj, la trokuraĝuloj sentimaj.”

Tiel li parolis preĝante. Kaj flanke de li ekstaris Athene, simila al Mentor rilate staturon kaj voĉon kaj alparolante lin ŝi diris la flugilhavajn vortojn:

270 „Telemachos, ankaŭ estontece vi estos nek malkuraĝulo, nek malprudentulo, ĉar la brava kuraĝo de via patro transfluis en vin kaj vi kiel li kapablas finfari agon kaj parolon. Tial via vojaĝo ne estos sensukcesa nek neplenumota. Sed se vi male ne estus la filo de li kaj Penelope, tiam mi vere ne  
 275 povus esperi, ke vi finfarus, kion vi deziregas. [Malmultaj infanoj ja estas similaj al sia patro, sed plej multaj estas pli

malbonaj kaj nur kelkaj superas la patron.] Sed ĉar ankaŭ estontece vi estos nek malkuraĝulo, nek malprudentulo kaj vin forlasis neniel la saĝeco de Oduseus, tial ankoraŭ ekzistas  
 280 espero, ke vi ĉi ĉion finfaros. Pro tio lasu nun la intencon kaj planon de la frenezaj amantoj: ili ja tute ne estas prudentaj aŭ justaj. Kaj ili atendas neniel la morton kaj la nigran mortosorton, kiu jam estas proksima al ili, nome ke ĉiuj pereos en  
 285 unu tago. Sed por vi la vojaĝo jam ne longtempe forestos, kiun vi deziregas; ĉar tiel bona amiko mi estas por vi de l'flanko de via patro, ke mi mem ekipos por vi rapidan ŝipon kaj vin akompanos. Nu do, nun reiru al via hejmo kaj al la amantoj, preparu vojaĝmangaĵojn kaj ĉion enpaku en ujojn, vinon en  
 290 kruĉojn dutenilhavajn kaj hordeofarunon, la medolon por viroj, en haŭtaĵojn fortikajn. Dume mi kolektos rapide el la popolo kunulojn libervolajn. Multaj ŝipoj troviĝas en la marĉirkaŭata Ithaka, novaj kaj ankaŭ malnovaj. El tiuj mi unu  
 295 elektos, kiu estas plej bona; rapide ekipos ni ĝin kaj ĝin irigos en la vastan maron."

X Tiel parolis Athene, la filino de Zeus; kaj ne plu longtempe atendis Telemachos, kiam li estis aŭdinta la voĉon de la Diaĵo. Sed li rapide nun iris al sia domo, ankoraŭ malkontenta en sia koro; kaj li trovis en la loĝejo la trokuraĝajn amantojn,  
 300 kiuj estis senhaŭtigantaj kaprinojn kaj forbruligantaj la harojn de grasaj porkoj. Alkinoos rekte renkonte iris al Telemachos, kaj ridante li kaptis ties manon, kaj li parolis kaj eldiris:  
 „Telemachos! fanfaronulo! nekontraŭstarebla je kuraĝo! ne plu pripensu en via brusto malbonajn farojn aŭ vortojn, sed  
 305 kunmanĝu kun ni kaj kuntrinku kiel antaŭe. Ĉi ĉion por vi ja preparos la Aĉaioj, ŝipon kaj bonegajn remistojn, por ke vi alvenu tre baldaŭ al la sanktega Pulos por aŭdi pri via patro eminenta."

Lin siavice alparolis la saĝa Telemachos:

310 „Antinoos, neniel mi povas kune kun vi, trokuraĝuloj, festmanĝi trankvile kaj ĝoji kviete. Ĉu do ne estas sufiĉe, ke dum la pasinta tempo vi fordiboĉis, amantoj! miajn havaĵojn, multajn kaj bonajn, kiam mi estis ankoraŭ infano? Sed nun,  
 315 ĉar nun mi estas plenkreska kaj aŭdas la vortojn de la aliaj kaj kuraĝo grandigis ene de mi, [nun mi klopodos sendi al vi la mortosorton pereigan, ĉu irinte al Pulos, ĉu ankaŭ ĉi tie en nia lando,] nun mi iros — kaj ne senfrukta estos la vojaĝo, pri kiu mi parolas — kiel kunvojaĝanto: ĉar mem mi posedas  
 320 nek ŝipon nek ankaŭ remistojn. Tiel al vi ja ŝajnis esti pli bone."

Tiel li parolis kaj li retiris sian manon el la manoj de Antinoos [facile; la amantoj dume preparis la manĝon en la domo] kaj ĉiuj lin mokridis kaj lin ofendis per vortoj. Kaj tiel parolis kelkiuj el la trokuraĝaj junuloj:

325 „Telemachos certe pripensas nian mortigon. Li ja venigos kun si helpantojn kelkajn el la sabloriĉa Pulos aŭ el Sparta, ĉar li treege okupiĝas. Eble li ankaŭ volas iri al Ephura, la fruktodona regiono, por tie akiri venenojn virpereigan, kaj por  
330 jeti tiun en nian vinmiksujon kaj tiel mortigi nin ĉiujn.”

*manmendoj,  
denec kviulo*

Siavice parolis iu alia el la trokuraĝaj junuloj:

„Kiu scias, ĉu eble li ankaŭ, vagante per sia kava ŝipo, malproksime de siaj amikoj pereos, same kiel Oduseus? Sed tiam li igus ankoraŭ pli granda nian laboron. Ĉar ĉiujn liajn  
335 havaĵojn ni tiam dividus kaj lian domon ni donus al lia patrino kaj al tiu, kiu kun ŝi edziĝus.”

Tiel ili parolis. Sed li malsupreniris en la altplafonan, vastan provizejon de sia patro, kie kuŝis amasigitaj oro kaj kupro, kaj la vestaro en kestoj, kaj multe da bonodora olivoleo. Tie  
340 ankaŭ staris kruĉoj da vino malnova, dolĝusta, kiuj entenis la diecan trinkaĵon nekunmiksita kaj kiuj envice staris laŭlonge de l'muro, okaze se iam Oduseus, kvankam nur post suferado de multaj doloroj, hejmen revenos. Antaŭ la ejo sin trovis fortike kunmetita duobla pordo fermebla; ene de ĝi ordi-  
345 nare troviĝis dumnokte kaj tage la mastrumistino, kiu ĉion gardadis kun spirito spertriĉa, nome Eurukleia, la filino de Ops, la Peisenor-ido; ŝin Telemachos tiam vokis en la provizejon kaj parolis al ŝi:

„Nu do, panjo! verŝu por mi en kruĉojn dutenilhavaĵn dolĉan  
350 vinon, la plej bongustan post tiu, kiun vi konservadas, atendante tiun malfeliĉulon kaj esperante, ke li ankoraŭ revenos, la didevena Oduseus, forsaviĝinte el la morto kaj el sia mortsorto. Plenigu dekdu el ili kaj fermu ĉiujn per kovriloj. Verŝu ankaŭ hordeofarunon en bone kudritajn ledajn sakojn; estu dudek  
355 mezuroj da delikata faruno el muelita hordeo. Nur vi sola sciu pri ĝi. Ĉio ĉi tio, kune metita, staru preta; ĉar mem mi venos por ĝi hodiaŭ vespere, kiam jam mia patrino estos suprenirinta al sia supretaĝa ĉambro kaj pensos pri enlitiĝo. Ĉar al Sparta mi iros kaj al la sabloriĉa Pulos por informiĝi pri la reveno  
360 de mia kara patro, provante ĉu eble mi aŭdos ion pri tio.”

Tiel li parolis kaj ekĝemis lia nutritino Eurukleia kaj vekriante ŝi parolis la flugilhavaĵn vortojn:

„Kial, ho kara infano! ekvenis do tia penso en vian spiriton?”

Kien do vi intencas iri sur la vasta tero, vi, ho karulo! tutsola?  
 365 Li ja mortis malproksime de sia patrujo, la didevena Odusseus,  
 ĉe fremda popolo. Kaj ili ja tuj, se vi iros, elpensos malbonon  
 kontraŭ vi por la estonteco, por ke vi pereu perruze kaj ĉion ĉi  
 tion ili mem dividos. Sed restu tial ĉe via havaĵo ĉi tie, ĉar  
 370 neniel necesas, ke vi sur la senripoze ondanta maro suferu  
 malbonon kaj ĉien vagadu.”

Sin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Panĵo!, ekkuraĝigu, ĉar ne kontraŭ la volo de l’Dioj mi  
 ekhavis tiun intencon. Sed ĵuru, ke vi ĉi tion ne rakontos al  
 mia kara patrino, antaŭ ol estos pasinta la deknua aŭ dekdua  
 375 tago, aŭ antaŭ ol ŝi estos mem rimarkinta mian foreston kaj  
 aŭdis pri mia forvojaĝo, por ke ŝi ne malbeligu per la plorado  
 sian belan haŭton.”

Tiel li parolis kaj la maljunulino ĵuris la ĵuron potencan pro  
 la Dioj. Sed post kiam ŝi estis ĵurinta kaj estis tute dirinta  
 la ĵuron, tuj post tio ŝi verŝis por li en dutenilhavajn kruĉojn  
 380 la vinon kaj ŝi verŝis por li hordeofarunon en bone kudritajn  
 ledajn sakojn. Kaj Telemachos iris en la domon kaj sin direktis  
 al la amantoj. Sed tiam elpensis la fajrŝprucokula Diino  
 Athene ion alian: similante al Telemachos ŝi iris ĉien tra la  
 urbo kaj flanke de ĉiu aparte stariĝante, ŝi ilin alparolis kaj  
 385 instigis kolektiĝi en la vespero ĉe la rapida ŝipo. Kaj post tio  
 ŝi demandis al Noemon, la eminenta filo de Phronios, rapiĉan  
 ŝipon. Kaj ĉi tiu ĝin kompleze al ŝi promesis. Nun malleviĝis  
 la suno kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis; tiam ŝi trenis la ŝipon  
 390 rapidan en la maron, kaj ŝi metis en ĝin la tutan rigilaron,  
 kiun kunportas bonferdekaj ŝipoj. La ŝipon nun ŝi ligiŝ ĉe  
 l’ekstremo de l’haveno, kaj ĉirkaŭe kolektiĝis la bravaj kunuloj  
 kaj la Diino ĉiun instigis.

Sed tiam elpensis la fajrŝprucokula Diino Athene ion alian:  
 rapide ŝi iris al la domo de l’dieca Odusseus; tie ŝi ŝutis dolĉan  
 395 dormemon sur la amantojn, tremigis la drinkantojn kaj ĵetis  
 la pokalojn el iliaj manoj. Ili nun leviĝis kaj disiris urbon por  
 dormi, ĉar ne plu longtempe ili restis, post kiam estis falinta  
 la dormo sur iliajn palpebrojn. Sed la fajrŝprucokula Athene,  
 400 similante al Mentor rilate staturon kaj voĉon, elvokis Tele-  
 machos el lia bele kuŝanta loĝĉambrego kaj parolis al li:

„Telemachos! viaj kunuloj kun bonaj tibiŝirmiloj jam sidas  
 ĉe la remiloj, atendante vian foriron; ni do iru, por ne plu  
 longan tempon deteni ilin de la vojaĝo.”

405 Tiel parolinte, rapide antaŭiris Pallas Athene kaj li sekvis

la paŝojn de la Diino. Kiam nun ili alvenis malsupre ĉe la ŝipo kaj ĉe la maro, tiam ili renkontis ĉe la bordo de l'maro la kunulojn longharajn. Meze de ili nun ekparolis la brava kaj forta Telemachos:

410 „Ĉi tien amikoj! ni alportu la vojaĝmangaĵojn; ĉar ĉio kune jam kuŝas preta en nia provizejo. Mia patrino nenion eksciis, nek ankaŭ la servistinoj, nur unu aŭdis mian intencon.”

Tiel parolinte, li antaŭiris kaj ili lin ĉiuj sekvis. Ĉion ili  
415 alportis kaj ĝin metis sur la bonferdekan ŝipon kiel ordonis al ili la kara filo de Oduseus. Nun surŝipiĝis Telemachos; Athene lin antaŭiris kaj sidiĝis sur la posta ferdeko; proksime de ŝi sidiĝis Telemachos. Dume malligis la kunuloj la ŝnuregojn de l'malantaŭa steveno, suriris mem la ŝipon, kaj tiam sidiĝis

420 ĉe la remapogiloj. La fajrŝprucokula Athene nun sendis al ili favoran velventon, kiu forte blovis al nordoriento kaj kiu susuris super la vinkolora maro. Telemachos instige ordonis al la kunuloj pretigi la rigilaron, kaj ili obee aŭskultis je liaj

425 instigoj. Nun ili levis la pinan maston kaj ĝin starigis en la kavaĵon de l'meza trabo; tiam ili ĝin ligis per la ŝnuroj de l'stajo kaj ili suprentiris la blankan velon per bone plektitaj rimenoj. La vento ŝveligis la mezon de l'velo kaj ĉirkaŭ la kilo de l'veturanta ŝipo ŝaŭmis, laŭte muĝante, la nigraj ondoj. Tra la ondoj la ŝipo rapidis, plenumante sian vojon.

430 Tiam, post kiam ili estis fortike ligintaj la rigilaron sur la nigra ŝipo rapida, ili starigis vinmiksulojn tutplenigitajn kaj verŝoferis al la senmortaj Dioj eternaj, sed el ĉiuj plej multe al la fajrŝprucokula filino de Zeus. La tutan nokton la ŝipo tiel trafendis ĝis mateniĝo la marvojon.

## TRIA KANTO.

### EN PULOS.

X Jam leviĝis la suno, forlasante la maron belegan, al la kupro-  
riĉa ĉielo, por lumi super la senmortuloj kaj la mortidestinitaj  
homoj sur la tero grendona; nun ili atingis Pulos, la bele kon-  
struitan urbon de Neleus. Tie sur la bordo de l'maro oni estis  
5 oferdonanta tutnigrajn virbovojn al la nigrahara tertremigulo.  
[Naŭ seĝvicoj tie troviĝis kaj en ĉiu sidis kvincent homoj kaj  
ĉiu sekcio havis antaŭ si naŭ virbovojn.] Kiam ili estis manĝin-

Posidon

taj de la internaĵoj kaj estis forbruligintaj la femurostojn honore al la Diaĵo, ĝuste tiam la Ithakanoj rekte albordegis kaj suprentiris kaj refis la velon de la propercie konstruita ŝipo kaj ili eljetis la ankron kaj elŝipigis mem; ankaŭ Telemachos malsupreniris el la ŝipo, sed Athene lin antaŭiris. Lin unua alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Telemachos! ne plu konvenas al vi timemo, eĉ ne iomete. Tial vi ja traveturis la maron, por informiĝi pri via patro, kie lin kovras la tero kaj kian morton li mortis. Nu do, iru nun rekte al la ĉevalobciga Nestor. Ni sciu, kiun prudentan konsilon li kaŝas en sia brusto [sed vi mem petegu lin, por ke li parolu la veron: kaj mensogojn li ne eldiros, ĉar tre saĝa li estas].”

Sin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Mentor, kiel mi iru al li, kiel mi lin alparolu? Ĉar mi neniel estas sperta je prudentaj alparoladoj kaj mi hontas pro tio, ke mi, junulo, devas fari demandojn al viro pli maljuna.”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Telemachos, parton vi mem elpensos per via propra spirito, kaj la alian parton inspiros ja eble iu Diaĵo. Ĉar mi ne opinias, ke kontraŭ la volo de l'Dioj vi naskiĝis kaj estis elnutrata.”

Tiel parolinte, lin rapide antaŭiris Pallas Athene kaj li sekvis la paŝojn de la Diino. Ili atingis la kunvenejon kaj la seĝvicojn de l'viroj de Pulos; tie sidis Nestor kun siaj filoj kaj preparante la manĝon, kunuloj ĉirkaŭe rostis viandon aŭ ĝin trapikis ĉirkaŭ rostilojn. Tuj kiam ili ekvidis la fremdulojn, ĉiuj amase renkonte iris al ili, bonvenigis ilin per manpremo kaj ilin invitis sidiĝi. Unua la Nere-ido Peisistratos proksimiĝinte kaptis la manojn de ambaŭ kaj ilin sidigis ĉe la mango sur molajn ŝafofelojn sur la sablo de l'maro inter sia frato Thrasumedes kaj sia patro. Kaj li donis al ili partojn de la internaĵoj kaj li enverŝis al ili vinon en oran pokalon. Post tio li bonvenigante parolis al Pallas Athene, la filino de l'egidoporta Zeus:

„Preĝu nun, ho fremdulo! al la estro Poseidon. Ĉar la festmango, kiun vi trovas, veninte ĉi tien, estas honore al li. Sed post kiam vi estos verŝoferinta kaj preĝinta, kiel estas kutime kaj konvene, transdonu tiam ankaŭ al li la pokalon da vino mieldolĉa, ĉar mi supozas, ke li ankaŭ preĝas al la senmortuloj; la helpon de Dio ja ĉiuj homoj bezonas. Sed li pli juna estas kaj samaĝulo kun mi. Tial mi donos unue al vi la oran pokalon.”

Tiel parolinte, li enmanigis al ŝi pokalon da dolĉa vino. Kaj ĝojis Athene pro la viro prudenta kaj bonmaniera, ĉar unue li donis al ŝi la oran pokalon. Kaj verve tiuj ŝi preĝis al la estro Poseidon:

55 „Aŭdu min, Poseidon, terĉirkaŭanto! kaj ne rifuzu al ni, kiuj preĝas al vi, ke ĉi ĉio plenumiĝu: unue vi gloron donu al Nestor kaj liaj filoj, sed donu ankaŭ ĝojigan rekompencan al la aliaj, al ĉiuj Pulanoj, pro la gloroplena oferaĵo. Donu  
60 krom tio, ke Telemachos kaj mi revenu hejmen post efektiviĝo de tio, pri kio ni venis ĉi tien per la nigra ŝipo rapida.”

Tiel ŝi preĝis tiam kaj mem efektivigis ĉion. Nun al Telemachos ŝi donis la belan dutenilhavan pokalon kaj sammaniere  
65 preĝis la kara filo de Oduseus. Sed kiam la kunuloj estis rostin-taj la dorsan viandon kaj ĝin estis deprenintaj de la rostilo, tiam ĝin ili dividis en partojn kaj prenis al si la bonegan manĝon. Sed kiam ili estis kontentigitaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam meze de ili ekparolis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:

„Nun estas pli konvene elaŭskulti kaj eldemandi fremdulojn,  
70 kiuj ili estas, ĉar ili refreŝiĝis per manĝaĵo. Kiuj vi estas, fremduloj? De kie vi ŝipveturis sur la vojo malseka? Ĉu estas por iu afero, aŭ ĉu vi hasarde vagadas tra la maro, simile al marrabistoj, kiuj, riskante sian vivon, rondvagadas kaj faras malbonon al la fremduloj?”

75 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos — ekkuraĝinte, ĉar Athene mem kuraĝon enirigis en lian koron — por lin deman-di pri sia patro forestanta [kaj por ke li akiru belegan gloron inter la homoj]:

„Nele-ido Nestor, granda gloro de l'Aĉaioj! vi demandas  
80 de kie ni estas: mi ĝin rakontos al vi. Ni estas venintaj de Ithaka, apud la malsupro de l'Neion, kaj nia afero, pri kiu mi parolas, estas privata, ne porpopola. Mi venas por serĉi informojn pri la vasta famo de mia patro, provante, ĉu eble mi aŭdos ion pri tio, de l'dieca persistema Oduseus, pri kiu  
85 oni diras, ke, batalante kun vi, li ruinigis la urbon de l'Troianoj. Ĉar de ĉiuj aliaj, kiuj militis kontraŭ la Troianoj, ni eksciis, kie ĉiu el ili pereis je morto kompatinda; sed de tiu faris la Kron-ido eĉ la morton nekonata. Ĉar neniu povas diri certece,  
90 kie li pereis, ĉu li sur la kontinento estas venkita de viroj malamikecaj, aŭ ĉu eble surmare, meze de l'ondoj de Amphitrite. Pro tio mi petegante nun venas ĉe viajn genuojn, ĉu vi bonvolos sciigi ties perein kompatindan, se eble vi ĝin



vidis per viaj okuloj aŭ la rakonton aŭdis de iu alia [pri liaj  
 95 vagadoj; ĉar lin naskis lia patrino supermezure mizera]. Kaj  
 ne mildigu vian rakonton, indulgante aŭ kompatante min,  
 sed precise rakontu al mi, kiel vi vidis la spektaklon. Mi vin  
 petegas, se iam al vi mia patro, la brava Odusseus, plenumis  
 ĉu vorton, ĉu agon, kiun li estis al vi promesinta, en la lando  
 100 de l'Troianoj, kie vi, Aĉaioj, suferis dolorojn, tiam memoru  
 nun pri tio kaj ĉion rakontu al mi laŭvere."

Lin respondis post tio la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:

„Amiko! ĉar vi memorigis min pri la mizero, kiun ni estas  
 trasuferintaj en tiu lando, ni, filoj de l'Aĉaioj, nekontraŭs-  
 tareblaj je braveco, tiel same, kiom ni suferis rondvagante  
 105 per ŝipo tra la nebuleca maro por akiri kaptaĵon, kien ajn  
 nin antaŭiris Achilleus, kiel ankaŭ, kiom ni batalis ĉirkaŭ la  
 granda urbo de l'reĝo Priamos — tie batalmortis, kiuj estis  
 plej bravaj. Tie kuŝas la militema Aiaks, tie Achilleus, tie  
 110 ankaŭ Patroklos, kiu egalas la Diojn kiel konsilanto, tie ankaŭ  
 kuŝas mia kara filo, forta kaj neriproĉebla, Antilochos, ege  
 rapida je la kurado kaj krome bona militisto. Krom tio ni  
 trasuferis ankoraŭ multajn aliajn dolorojn: kiu el la mortodes-  
 tinaj homoj ĉiujn tiujn kapablus rakonti? Eĉ ne, se vi restus  
 115 ĉi tie kvin aŭ ses jarojn kaj min eldemandadus, kiom da mal-  
 bonoj tie suferis la diecaj Aĉaioj; pli frue vi ekenuinte revenus  
 al via lando prapatra. Ĉar naŭ jarojn ni jam estis projektantaj  
 malfeliĉon kontraŭ ili per ruzoj ĉiuspecaj, kaj nur apenaŭ  
 120 plenumigis tion la Kron-ido. Tiam neniu iam volis esti nomata  
 simila al li rilate bonjuĝon, ĉar la dieca Odusseus superis  
 ĉiujn treege per ĉiuspecaj ruzaĵoj, via patro, se vi almenaŭ  
 envere estas lia filo. Respekto min ekkaptas, kiam mi vin rigar-  
 das. Ĉar vere, viaj paroloj estas prudentaj kaj oni ne kredus,  
 125 ke viro junaĝa povas paroli tiel prudente. Tiam do mi kaj  
 la dieca Odusseus longan tempon neniam malsame parolis  
 en la kunveno aŭ meze de l'konsilantaro, sed, havante unu-  
 animecon koncerne opinion kaj prudentan konsilon, ni ĉiam  
 pripensis, kiamamiere ĉio okazos plej bone por la Argeioj.  
 130 Sed post kiam ni estis detruintaj la alte kuŝantan urbon de  
 Priamos [kaj ni estis surŝipiĝintaj kaj Diaĵo disigis la Aĉaiojn,  
 tiam projektis Zeus en sia spirito malĝojan revenon por la  
 Argeioj, pro tio, ke tute ne ĉiuj estis prudentaj nek justaj;  
 tial multaj el ili ekhavis malbonan sorton pro la pereigema  
 135 malpaco de l'fajrsprucokula filino de patro potenca, kiu starigis  
 malpaco inter la du Atre-idoj. Ĉar ili kunvokis ĉiujn Aĉaiojn



- al kunsido, senpripense kaj ne konvene, je la tempo de l'sun-  
 malleviĝo — kaj tiam venis la filoj de l'Achajoj kaptite de  
 140 vino — kaj ambaŭ komunikis, pro kio ili estis kunvenigintaj  
 la popolon. Tiam Menelaos instigis ĉiujn Achajojn pensi pri  
 hejmeniro trans la larĝan dorson de l'maro, sed tio plaĉis  
 neniel al Agamemnon, ĉar li preferis reteni la popolon kaj  
 145 oferi sanktajn bovoferaĵojn por kvietigi la teruran koleron de  
 Athene, — la stultulo, ĉar li ne sciis, ke ŝi ne estos indulganta.  
 Ĉar ne rapide ŝanĝas la inklino de l'Dioj ĉiamaj.
- X Tiel ili staris, respondante unu la alian per koleraj vortoj;  
 kaj tiam leviĝis la Achajoj kun bonaj tibiŝirmiloj, laŭtege  
 150 kriante, ĉar plaĉis al ili decido diversa. La nokton ni pasigis,  
 pripensante en la animo malamikaĵojn unu kontraŭ la alia;  
 ĉar Zeus preparis malbonan pereon; sed frumatene ni trenis  
 la ŝipojn en la maron diecan kaj ni enŝipigis niajn havaĵojn  
 kaj la virinojn kun malaltaj zonoj, sed la duono de la  
 155 popolo postrestis tie ĉe l'Atre-ido Agamemnon, la gardanto de  
 la popoloj. Sed ni, la alia duono, surŝipiĝis kaj forveturis.  
 Tre rapide veturis la ŝipoj kaj iu Diaĵo ebenigis la maron treege  
 grandan. Kiam ni estis alvenintaj en Tenedos, ni donis, hej-  
 160 men dezirante, sanktajn oferaĵojn al la Dioj; sed Zeus, la kura-  
 ĝega, ankoraŭ ne pensis pri nia hejmenvojaĝo, ĉar li denove  
 starigis nebonan malpacon. Unuj turnis la ŝipojn ambaŭ-  
 flanke kurbigitajn kaj iris sub la komando de l'reĝo prudenta  
 kaj elpensema, Oduseus, returne, por komplezi al la Atre-ido  
 165 Agamemnon. Sed mi rapidis for kun la kune restantaj ŝipoj,  
 kiuj min sekvis, ĉar mi komprenis ke la Diaĵo pripensas mal-  
 feliĉon. Kune kun ni rapidis for la militema filo de Tudeus  
 kaj li ankaŭ instigis je tio siajn kunulojn. Nur malfrue post  
 ni foriris la blondhara Menelaos kaj li atingis nin en Lesbos,  
 kie ni estis pripensantaj la longan marvojaĝon, ĉu ni veturos  
 170 okcidente de l'multrifa Chios, ĝin tenante je flanko maldek-  
 stra, al la insulo Psuria, ĉu oriente de Chios, preter la ventega  
 Mimas. Kaj ni petis al la Diaĵo aperigi antaŭsignon; kaj tiu  
 montris ĝin al ni kaj min instigis transiri meze trans la maron  
 175 al Euboia, por ke ni nin plej baldaŭ el la malfeliĉo savu.  
 Nun ekblovis laŭte suzuranta vento favora; tre rapide trave-  
 turis niaj ŝipoj la fiŝplenajn vojojn kaj nokte ili albordeigis  
 en Geraistos. Honore al Poseidon ni oferis multajn femurostojn  
 de virbovoj, ĉar ni estis transirintaj la vastan maron. Estis  
 180 je la kvara tago, kiam la kunuloj de l'Tude-ido, la ĉevalobeiga  
 Diomedes, albordeigis en Argos siajn proporcie konstruitajn

ŝipojn. Mi tamen tuj veturis al Pulos kaj la favora vento nenium momenton ĉesigis sian blovadon, depost kiam la Dio estis ĝin bloviginta.

- Tiel mi alvenis, kara infano! nenion eksciinte kaj neniel  
 185 mi scias pri tiuj el la Aĥaioj, kiuj elsaviĝis kaj kiuj pereis. Sed kion mi eksciis, sidante en nia loĝejo, pri tio vi sciigos, kiel konvenas, kaj nenion mi kaŝos al vi. Oni diras, ke feliĉe revenis la bonegaj lancbatalistoj, la Murmidonoj, kiujn komandis la filo eminenta de la kuraĝa Achilleus kaj ankaŭ Philoktetes,  
 190 la brila filo de Poias. Plue Idomeneus kondukis al Kreta ĉiujn kunulojn, kiuj forsaviĝis el la milito kaj la maro forrabis nenium al li. Kaj vi mem verŝajne aŭdis ankaŭ, kvankam vi loĝas forizolitaj, pri la Atre-ido, kiel li alvenis kaj kiel Aigisthos projektis malĝojan pereon kontraŭ li. Sed envere, mallhonore  
 195 li punsuferis pro tio: ho, kiel bone estas, kiam postrestas filo de viro mortigita: ĉar ankaŭ ĉi tiu punsuferigis la mortiginton de sia patro, la ruzelpenseman Aigisthos, kiu mortigis lian patron bonfaman; [vi ankaŭ, amiko, — ĉar mi vin vidas  
 200 tre bela kaj altkreska — estu batalpova, por ke multaj, ankaŭ el la posteuloj, vin laŭdu].”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

- „Nele-ido Nestor, granda gloro de l’Aĥaioj! vere, li ege lin punis, kaj la Aĥaioj disvastigos lian gloron, por ke ankaŭ la posteularo ĝin aŭdu.
- 205 Ho! ke ankaŭ al mi la Dioj donus tiel grandan fortecon, por punsuferigi la amantojn pro la incitega trokuraĝeco, ĉar ili senhonte elpensas malbonajn farojn. Sed tian feliĉon la Dioj por mi ne destinis, nek ankaŭ por mia patro. Nun male ni devas ĉion toleri.”
- 210 Lin post tio respondis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:  
 „Amiko, ĉar vi memorigis al mi tion kaj parolis pri tio: oni rakontas ke multnombraj amantoj de via patrino en via domo elpensas malbonon kontraŭ la volo de vi. [Diru al mi, ĉu vi senproteste submetiĝas, aŭ ĉu la popolo en via lando,  
 215 obeante la voĉon de iu Diaĵo, vin malamas] Sed kiu scias, ĉu eble li iam revenos kaj punos ilin pro la perfortaĵoj, ĉu tutsola, ĉu kune kun ĉiuj Aĥaioj? Ĉar se la fajrŝprucokula Athene volus vin ami tiom, kiom ŝi tiam zorgadis pri la glororiĉa  
 220 Oduseus en la lando de l’Troianoj, kie ni, Aĥaioj, suferis dolorojn — ĉar neniam mi vidis, ke la Diaĵoj tiel malkaŝe montris sian amon, kiel malkaŝe Pallas Athene donis al li sian helpon —, se tiom ŝi volus vin ami kaj zorgus pri vi en

sia koro, tiam tutcerte multaj el ili por ĉiam forgesus pri la geedzigo."

225 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Maljunulo! mi opinias, ke neniam plenumiĝos tiu parolo de vi; ĉar vi diris ion ege grandiozan; mirego min ekkaptas. Por mi ĉi tio ja neniam okazos, kvankam mi ĝin arde deziras, eĉ ne se la Dioj tion volus."

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

230 „Telemachos! kia parolo eliĝis el la vico de viaj dentoj? Ĉar facile kapablas Diaĵo, se tion li volas, viron savi, ankaŭ de malproksime. Kaj mi nepre preferus, eĉ nur post suferado de multaj doloroj, hejmen reveni kaj vidi la tagon de la reveno, ol reveninte pereji en mia propra loĝejo, kiel Agamemnon estis mortigata perruze de Aigisthos kaj de sia propra edzino. Sed

235 envere, eĉ la Dioj ne kapablas deteni la morton, komunan al ĉiuj, eĉ ne de kara viro, kiam la pereiga sorto de la ĉagrena morto lin trafis."

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

240 „Mentor, ni ne plu parolu pri tio, kiom ajn ni maltrankviliĝas pro tio. Por li la reveno ja estas ne plu realigebla, sed la senmortuloj certe jam projektis morton lian kaj lian nigran mortosorton. Sed nun mi volas esplori ion alian kaj demandi pri tio al Nestor, ĉar pli bone ol la aliaj li konas justecon kaj

245 estas spertulo. [Oni ja diras ke li jam estas reginta super tri generacioj.] Kiel senmortulo li ŝajnas al mi, kiam mi lin rigardas. Ho, Nele-ido Nestor!, rakontu al mi laŭvere: kiumaniere mortis la Atre-ido, la reĝo de vasta lando, Agamemnon? Kie do estis Menelaos? Kian morton elpensis por li la ruza Aigisthos? Ĉar li mortigis viron multe pli fortan ol li mem. Ĉu

250 Menelaos ne estis en la Achaia Argos, sed ĉu li vagadis aliloke inter la homoj, tiel ke nun Aigisthos ekkuraĝis tiun mortigi?"

Lin post tio respondis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:

„Certe mi, ho infano! rakontos ĉion al vi laŭvere. Verŝajne

255 vi mem jam povas supozi, kio estus okazinta, se la Atre-ido, la blondhara Menelaos, reveninte el Troia, estus renkontinta Aigisthos viva en la palaco: tiam oni estus eĉ ne stariginta por li tombmonteton post lia morto, sed la hundoj kaj la rabobirdoj estus lin manĝegintaj, dum li kuŝus sur la ebenaĵo,

260 malproksime de l'urbo kaj neniu el la Achaiinoj lin estus priplorinta. Ĉar li finfaris tre grandan friponaĵon. Ni tie malproksime restadis, trasuferante multajn danĝerojn, dum li trankvile en la interna parto de l'ĉevalonutra Argos estis

tentanta la edzinon de Agamemnon per vortoj karesaj. Eke ŝi  
 265 rifuzis la maldecan hontindaĵon, la dicca Klutaimnestra,  
 ĉar ŝi posedis bonan intelekton. Ankaŭ estis ĉe ŝi kantisto,  
 al kiu la Atre-ido, kiam li forvojaĝis al Troia, estis insiste  
 komisiinta protekti lian edzinon. Sed kiam la destino de la  
 Diaĵoj ŝin devigis submetiĝi al li, tiam Aigisthos kondukis  
 270 tiun kantiston al insulo soleca kaj lin tie postlasis kiel viktimon  
 kaj kaptajon por la rabobirdoj kaj post tio laŭ ŝia deziro kaj  
 kun la permeso de ŝi li forkondukis ŝin al sia domo. Multajn  
 femurostojn li bruligis sur la sanktaj altaroj de l'Dioj kaj li  
 pendigis en la temploj multajn dediĉaĵojn, teksitaĵojn kaj  
 275 oron, post la farado de l'ago abomena, kiun neniam li estis  
 supozinta en sia animo. Nu do, kunc veturis, revenante el  
 Troja, la Atre-ido kaj mi, amikinklinaj unu al la alia. Sed  
 kiam ni atingis la sanktan Sunion, la kabon de Athenai, tiam  
 alproksimiĝis Phoibos Apollon al la direktilisto de Menelaos  
 280 kaj lin mortigis per siaj nedolorigaj sagoj, dum li ankoraŭ  
 tenadis per siaj manoj la direktilon de la rapidanta ŝipo, la  
 Anetor-idon Phrontis, kiu superis ĉiun el la popoloj de homoj  
 rilate la ŝipdirektadon, kiam ventegoj furioze sin ĵetis kontraŭ  
 la ŝipon. Tial li tie haltis, kvankam li arde deziris daŭrigi sian  
 285 hejmenvojaĝon, por entrigi sian kunulon kaj por forbruligi  
 je lia honoro ĉion, kio estis plej kara al li. Sed kiam li ree vetu-  
 ris sur la vinkolora maro per siaj kavaj ŝipoj, kaj vojaĝante  
 atingis la krutan montaron de Maleia, tiam projektis por  
 li la laŭttondra Zeus fatalan vojaĝon kaj elverŝis sur lin la  
 blovegadon de laŭte fajfantaj ventegoj, kaj ondojn fortegajn  
 290 kaj grandegajn, similajn al montoj. Tiam li disigis la ŝipojn  
 kaj li forpelis parton al Kreta, kie loĝas la Kudonoj ĉirkaŭ  
 la fluo de l'Iardanos. Tie troviĝas iu glata kaj kruta roko en  
 la maro, ĉe la ekstrema flanko de Gortuns, en la maro  
 295 nebuleca, kie la sud-okcidenta vento puŝas la grandajn  
 ondojn kontraŭ la promontoron maldekstran apud Phaistos,  
 sed la malgranda roko haltigas la ondojn grandegajn. Tien  
 iris la ŝipoj kaj nur apenaŭ sin forsavis la viroj el la morto,  
 sed la ondoj frakasis la ŝipojn kontraŭ la rifojn. Dume la kvin  
 300 aliajn ŝipojn kun nigraj stevenoj forpelis la vento kaj ondoj  
 al Aiguptos. Tiel do nun Menelaos, kolektante multajn bonaĵojn  
 kaj oron, tie rondvagadis per la ŝipoj inter fremdaj homoj.  
 Dume projektis Aigisthos en lia hejmo tiujn abomenaĵojn;  
 post kiam li estis mortiginta la Atre-idon kaj kiam la popolo  
 305 estis submetinta sin al li, li regis sep jarojn super la ororiĉa

Mukene; sed en la oka jaro revenis la dieca Orestes el Athenai, je lia malfeliĉo, kaj li mortigis la mortiginton de sia patro, la ruzan Aigisthos, kiu mortpereigis lian bonfaman patron. Kaj post kiam li tiun estis mortiginta, li donis funebran manĝon  
 310 al la Argeioj [pro sia abomeninda patrino kaj la malkuraĝa Aigisthos]. Kaj la saman tagon revenis Menelaos, fama je la militkrio, kunportante multajn trezorojn, kiujn enhavis liaj ŝipoj kiel ŝarĝon.

Ankaŭ vi, amiko, ne vagu longtempe malproksime de via domo, ĉar vi postlasis en via domo viajn bonaĵojn kaj virojn  
 315 tiel trokuraĝajn, por ke ili ne diboĉu ĉion, dividinte viajn posedaĵojn kaj vi ne faru vanan vojaĝon. Sed mi insistas kaj konsilas al vi iri al Menelaos; ĉar antaŭ nelonge li revenis el fremdaj regionoj, de homoj tiuspecaj, ke oni ne kuraĝas esperi,  
 320 ke iam oni povos foriri de tie, kiam la ventegoj onin el la ĝusta direkto forpuŝis en la tiel grandan maron, ke eĉ la birdoj ne kapablas ĝin transflugi en unu jaro, ĉar ĝi estas grandega kaj terura. Iru do nun tien per via ŝipo kaj kun la kunuloj de vi; sed, se vi volas, iru surtere: je via dispono estas veturilo kaj ĉe-  
 325 valoj, je via dispono ankaŭ estas miaj filoj, kiuj estos viaj kondukantoj al la dieca Lakedaimon, kie loĝas la blondhara Menelaos. Sed vi mem petegu lin, por ke li parolu la veron: kaj mensogojn li ne diros, ĉar li estas tre saĝa.”

Tiel li parolis; nun malleviĝis la suno kaj krepusko proksimi-  
 330 ĝis. Meze de ili nun parolis la fajrŝprucokula Diino Athene:  
 „Maljunulo, vere vi tion konvene parolis; nu do, eltranĉu la langojn de l'oferbestoj kaj kunmiksi vinon kaj akvon, por ke post verŝoferado al Poseidon kaj la aliaj senmortuloj, ni pensu pri enlitiĝo, ĉar estas jam tempo por tio. Ĉar jam mal-  
 335 aperis la lumo de l'suno malantaŭ la horizonto senluma kaj ne decas al ni, sidi ankoraŭ longtempe ĉe la manĝo je la honoro de l'Dioj, sed decas jes reveni.”

Tiel parolis la filino de Zeus kaj ĉiuj obeis al la parolintino. Heroldoj post tio elverŝis akvon sur iliajn manojn kaj junuloj  
 340 tutplenigis la vinmiksulojn per vino kaj disdonis la vinon al ĉiuj, post enverŝado en la pokalojn, por verŝoferado. Kaj ili ĵetis la langojn de l'oferbestoj en la fajron kaj stariĝis kaj verŝoferdonis sur ilin. Sed kiam ili estis verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom deziris la koro, tiam Athene kaj la disimila Oduseus ambaŭ deziris reiri al la kava ŝipo. Sed ilin retenis  
 345 Nestor, parolante al ili la vortojn:

„Ne permesu tion Zeus kaj la aliaj senmortaj Diaĵoj, ke vi

foriru de mi al via ŝipo rapida, kvazaŭ mi estus tute senvesta kaj malriĉa kaj ne posedus en mia domo multajn mantelojn kaj litkovraĵojn, tiel same por mi mem kiel por gastamikoj, por  
 350 dormi dolĉe sur ili. Sed mi havas sufiĉe da ili, mantelojn kaj belajn litkovraĵojn. La kara filo de tiu brava Oduseus ja certe ne kuŝiĝos sur la ferdeko de l'ŝipo, almenaŭ ne dum mia vivo, kaj poste postrestos filoj en mia domo por gastigi amikojn,  
 355 kiam kiu ajn vizitos mian domon."

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Laŭdece vi tiel parolis, kara grizulo; kaj konvenas ke Telemachos al vi obeu, ĉar tiel estas multe pli bele. Li do nun  
 360 vin sekvas por iri dormi en via loĝejo; sed mi mem reiros al la nigra ŝipo por kuraĝigi la kunulojn kaj indiki al ĉiu lian devon. Ĉar mi gloras min esti sola el ili pliaĝa. La aliaj estas pli junaj kaj nin akompanas pro amikeco; ĉiuj estas samaĝuloj  
 365 de la kuraĝa Telemachos. Tie mi intencas nun kuŝiĝi, apud la kava nigra ŝipo; sed morgaŭ frumatene mi iros al la bravaj Kaukonoj, kie oni ŝuldas al mi, jam de longe kaj ne malmulte. Vi do ĉi tiun, kiu vizitis vian domon, lasu vojaĝi per veturilo  
 370 kaj kun via filo kaj donu al li ĉevalojn, kiuj estas plej rapidaj je la kurado kaj plej bonaj je forteco."

Tiel parolinte, foriris la fajrŝprucokula Athene, similante al maraĝlo. Mirego ekkaptis ĉiujn, kiuj ĝin vidis. Ankaŭ miris la grizulo, kiam li tion vidis per la okuloj; kaj li kaptis la manon de Telemachos kaj parolis la vortojn kaj eldiris:

375 „Amiko! mi ne kredas, ke vi estos malkuraĝa kaj senforta, ĉar vin sekvas kiel akompanantoj Diaĵoj, kvankam vi estas ankoraŭ tiel juna. Ĉar ĉi tiu estis neniu alia el la loĝantoj de la ĉambregoj de l'Olumpos, ol la filino de Zeus, la gloriĉa Tritogeneia, kiu ankaŭ kutimis honori vian bravan patron.  
 380 Nu do, reĝino, estu favora al ni kaj donu al mi belegan gloron, al mi kaj miaj infanoj kaj mia respektinda edzino. Mi por tio oferos al vi bovon, unujaran, larĝfrontan kaj neobeigitan, kiun ankoraŭ neniu subjugigis; tiun mi oferos je via honoro, ĉirkaŭvolvinte la kornojn per oro."

385 Tiel li parolis preĝante, kaj lian peton plenumis Pallas Athene. Nun ilin antaŭiris la grizhara ĉevaldirektulo Nestor, siajn filojn kaj bofilojn, al sia bela loĝejo. Kaj kiam ili alvenis en la famkonata palaco de l'reĝo, tiam ili sidigis envice sur apogseĝojn kaj brakseĝojn kaj por ĉiuj alvenintoj li miksis  
 390 kun akvo vinmiksujon da vino dolĉgusta, kiun nun en la dek-unua jaro la mastrumistino elkruĉigis, post kiam ŝi estis

forpreninta la kovrilon. Da tiu vino la grizulo plenigis mik-sujon kaj verve li verŝoferante preĝis al Athene, la filino de l'egidporta Zeus. Sed kiam ili estis verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom ilia koro deziris, tiam ĉiu el ili dormdezirante iris hejmen. Sed lin lasis dormi en sia propra domo la grizhara ĉevaldirektulo Nestor, Telemachos, la karan filon de l'dieca Oduseus, sur lito ĉizajhava, sub la resona kolonaro kaj flanke de li kuŝigis li la lancospertan Peisistratos, la reganton super la batalistoj, kiu estis la ununura needziĝinto el la filoj de lia domo. Mem li kontraŭe dormi kutimis en la interno de l'alttegmenta domo. Kaj dormis kune kun li en tiu kusejo kaj lito la reĝa edzino.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam leviĝis de sia kuŝejo la grizhara ĉevaldirektulo Nestor kaj eksteren irinte li sidigis sur la glatigitajn marmorbenkojn, kiuj staris antaŭ la alta dompordo, blankajn kaj briletajn de oleo. Sur tiuj iam Neleus kutimis sidi, kiu egalas la Diojn kiel konsilanto. Sed ĉi tiu, venkite de sia destino, jam estis irinta al la loĝejo de Hades, kaj nun sidis la grizhara Nestor, la protektanto de l'Aĉaioj, sur ties loko, portante la sceptron. Densgrupe nun kolektiĝis ĉirkaŭ li, veninte el siaj dormejoj, liaj filoj, Eche-phron kaj Statios kaj Perseus kaj Aretos kaj la disimila Thrasumedes. Post tio venis la sesa, la heroo Peisistratos. Kaj ili tien kondukis la disimilan Telemachos kaj lin sidigis.

Post tio meze de ili ekparolis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:

„Karaj filoj! rapide vi plenumu mian deziron, por ke mi favorigu al ni Athene antaŭ la aliaj Dioj, ĉar ŝi min vizitis malkaŝe dum la brila festmanĝo honore al Poseidon. Nu do, unu el vi al la kampo iru por bovino, por ke ŝi estu ĉi tie plej baldaŭ kaj la bovestro ŝin alkonduku; kaj unu iru al la nigra ŝipo de l'kuraĝa Telemachos kaj ĉiujn kunulojn li venigu ĉi tien kaj nur du li postrestigos; kaj unu ordonu al la orfandisto Laerkes veni ĉi tien por ĉirkaŭtegi la kornojn per oro; vi aliaj restu ĉi tie kune, kaj ene ordonu al la servistinoj pretigi en mia famkonata domo festmanĝon kaj alporti seĝojn kaj brullignon, kaj klaran akvon.”

Tiel li parolis kaj ĉiuj fervore ekpenis. Jam venis la bovo el la kampo kaj venis la kunuloj de l'kuraĝa Telemachos de sur la rapida, proporcie konstruita ŝipo kaj venis la metalforĝisto, portante en la manoj la kupran ilaron: la instrumentojn de sia arto, la amboson kaj la martelon kaj la fortike fabrikitan

435 fajroprenilon, per kiuj li kutimis prilabori la oron; kaj ankaŭ  
 venis Athene por akcepti la festoferajon. Nun la ĉevaldirektulo  
 Nestor donis la oron al la forĝisto kaj ĉi tiu ĝin artplene pri-  
 laboris kaj post tiam ĉirkaŭtegis per ĝi la kornojn, por ke la  
 Diino, vidante la belegajon, ĝoju. Post tio Stratios kaj la dieca  
 Echephron alkondukis la bovinon je la kornoj kaj Aretos  
 venis el la porvirina ĉambro, kunportante por ili lavakvon  
 440 por la manoj en pelvo florornamita kaj en la alia mano li portis  
 hordeograjnojn en korbeto. Alproksimiĝis Thrasumedes,  
 loktenema en la milito, portante la akran hakilon en la mano  
 por bati per ĝi la kapon de l'bovo. Perseus tenis la oferpladon.  
 La grizhara ĉevaldirektulo Nestor nun komencis la solenon  
 445 per prezentado de lavakvo kaj disŝutado de hordeograjnoj kaj  
 verve li preĝis al Athene, dum li dediĉe ĵetis la harojn de l'  
 bovkapo en la fajron.

Sed kiam ili estis preĝintaj kaj estis disŝutintaj la horde-  
 ograjnojn, alproksimiĝis tuj la filo de Nestor, la kuraĝa Thrasu-  
 medes kaj hakbatis; kaj la hakilo tratanĉis la tendenojn de  
 450 l'nuko kaj forprenis la vivoforton de l'bovo. Kaj laŭte alvokis  
 la Diojn la filinoj kaj bofilinoj kaj la respektinda edzino de  
 Nestor, Eurudike, la plej maljuna el la filinoj de Klumenos.  
 Post tio la viroj levis la bovon de la tero larĝvoja kaj ĝin firm-  
 tenadis kaj pikmortigis ĝin la reganto super la popoloj Peisis-  
 455 tratos. Kiam nun la nigra sango elfluis kaj la vivo forlasis la  
 ostaron, tiam rapide ili ĝin dispartigis kaj eltranĉis konvene  
 la femurostojn ĉiujn kaj tiujn kovris per graso, kiun ili surmetis  
 je duobligita tavolo kaj krudan viandon ili metis sur tion.  
 Tion ekbruligis la grizulo sur fendita ligno kaj li verŝoferis  
 460 sur ĝin brilan vinon; kaj flanke de li tenadis junuloj la kvin-  
 denthavan rostilon. Kiam nun estis forbrulintaj la femurostoj  
 kaj ili estis manĝintaj da la internaĵoj, tiam ili tranĉis la ceteran  
 viandon en pecojn kaj ĝin pikis sur la rostilojn, kaj ĝin rostis,  
 tenante la rostilojn en la manoj.

Dume donis banon al Telemachos la bela Polukaste, la plej  
 465 juna filino de l'Nere-ido Nestor. Sed post kiam ŝi estis lin  
 baninta kaj brileta oleinta per olivoleo, tiam ŝi almetis al li la  
 subveston kaj la belan mantelon kaj li forlasis la banujon,  
 simila al la senmortuloj rilate la staturon kaj li iris al Nestor  
 kaj sidiĝis flanke de l'gardanto de la popoloj.

470 Kaj kiam la aliaj estis rostintaj la dorsan viandon kaj  
 ĝin estis deprenintaj de l'rostilo, tiam ili sidante ekmanĝis.  
 Bonaj servistoj ĉion kontrolis kaj vinon enverŝis en orajn



pokalojn. Sed kiam ili estis kontentigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam meze de ili ekparolis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor:

475 „Miaj infanoj! alportu vi nun por Telemachos belkolharajn ĉevalojn kaj jungu ilin antaŭ la veturilon por ke li daŭrigu sian vojaĝon.”

Tiel li parolis kaj ili bonvole je li aŭskultis kaj obeis kaj rapide ili jungis la rapidajn ĉevalojn antaŭ la veturilon. Kaj la mastrumistino metis en ĝin nutraĵojn kaj vinon kaj ankaŭ  
480 almanĝaĵon, kian la didevenaj reĝoj manĝas. Nun suriris Telemachos la belegan veturilon kaj flanke de li la Nestor-ido Peisistratos, la reganto super la popoloj, suriris la veturilon kaj kaptis la bridojn per la manoj kaj svingis la vipon por inciti la ĉevalojn. Ĉi tiuj ne malvol rapidis al la ebenaĵo  
485 kaj forlasis la altan urbon Pulos. Kaj la tutan tagon ili skuis la jugon, kiun ili surhavis.

Jam malleviĝis la suno kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis, kiam ili alvenis en Pherai, ĉe la domo de Diokles, la filo de Orsilochos,  
490 ido de Alpeĥos. Tie ili pasigis la nokton kaj ĉi tiu donis al ili gastdonacojn. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam ili jungis la ĉevalojn kaj iris en la multkoloran veturilon; kaj ili elveturis la antaŭpordegon kaj la laŭtresonan kolonaron; [kaj li svingis la vipon por inciti la ĉevalojn kaj  
495 tiuj ne malvole rapidis]. Ili atingis la tritikkreskigan ebenaĵon kaj tie ili ĉesigis la vojaĝon; ĉar tiel rapide kuradis la rapidaj ĉevaloj; kaj malleviĝis la suno kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis.

---

## K V A R A K A N T O .

### EN LAKEDAIMON.

Ili atingis la profunde kuŝantan, multkavaĵan Lakedaimon kaj veturis al la domo de l'glorriĉa Menelaos. Ĉi tiun ili trovis, kiam li ĝuste estis festmanĝanta en sia domo kun multaj gemikoj, okaze de geedziĝofestoj de sia filo kaj sia bonega  
5 filino. Ŝin li estis sendinta al la filo de l'armetrarompa Achilleus; ĉar iam en Troia li estis promesinta kaj konsentinta edzinigi ŝin kun li kaj nun la Dioj efektivigis la geedziĝon; ĵus li sendis ŝin por iri per ĉevaloj kaj veturilo al la glorriĉa urbo de l'Murmidonoj, super kiuj li regis. Sed li donis kiel edzinon la filinon  
10

MANDERS, Odusseias de Homeros.

- de Alektor el Sparta al sia filo, la forta Megapenthes, kiu nur malfrue naskiĝis al li el servistino; ĉar la Dioj ne plu donis infanojn al Helena, post kiam ŝi estis naskinta sian ĉarmoplenan filinon Hermione, kiu havis la staturon de l'ora Aphrodite.
- 15 Tiel do festenis en la alttegmenta granda domo la najbaroj kaj la geamikoj de l'glorriĉa Menelaos kaj ĉiuj ĝuis, [kaj meze de ili kantadis dieca kantisto, fingre sonigante la liron] kaj du dancistoj rondturniĝadis meze de ili, post kiam la kantisto ekkantis.
- 20 Nun haltis la heroo Telemachos kaj la brila filo de Nestor kun siaj ĉevaloj ĉe la antaŭpordo de l'domo. Ilin tie vidis la antaŭen veninta Eteoneus, la agema ĉefulo de la servistoj de l'glorriĉa Menelaos, kaj rapide li kuris tra la domo por
- 25 ĝin sciigi al la gardisto de la popoloj kaj lin alproksimiĝinte li parolis la flugilhavajn vortojn:
- „Fremduloj staras ekstere, ho didevena Menelaos! du viroj, kiuĵ similas la idaron de l'potenca Zeus. Diru do, ĉu mi maljungos iliajn rapidajn ĉevalojn, aŭ ĉu mi lasos ilin iri al iu alia, por ilin gastame regali.”
- 30 Lin tre malkontentiĝinte alparolis la blondhara Menelaos:
- „Antaŭe vi neniam estis malsaĝulo, Boetho-ido Eteoneus, sed nun vi vere klaĉas same malsaĝe kiel infano. Ni ja mem multfoje estas gastame regalitaj de aliaj homoj, kiam ni hejmen
- 35 vojaĝis — ho, ke Zeus estonte de ni detenu la tiaman mizeron! Sed maljingu la ĉevalojn de la fremduloj kaj ilin enen konduku por esti regalataj.”
- Tiel li parolis kaj tuj forkuris Eteoneus el la palaco kaj ordonis al la aliaj agemaj servistoj, ke ili lin sekvu. Ĉi tiuj maljungis
- 40 la ŝvitantajn ĉevalojn de sub la jugo, ilin ligis ĉe la porĉevalaj fojnokradoj kaj antaŭmetis al ili speltritikon kaj ĝin miksis kun blanka hordeo; kaj la veturilojn ili metis kontraŭ la briletajn flankmurojn; sed la fremdulojn ili enkondukis en la belegan domon. Kaj ili miris, ĉirkaŭrigardante tra la domo de l'didevena reĝo, ĉar en la domo alttegmenta de l'glorriĉa Menelaos
- 45 estis brilo kvazaŭ de l'suno aŭ luno. Sed kiam ili estis ĝuintaj per la okuloj, ĉion rigardante, tiam ili eniris la banujon glatigitan kaj sin banis. Kaj kiam la servistinoj estis ilin banintaj
- 50 kaj oleintaj per olivoleo kaj estis almetintaj al ili subvestojn kaj lanecajn mantelojn, tiam ili sidiĝis sur seĝojn, flanke de l'Atre-ido Menelaos. Servistino nun alportis akvon en bela, ora akvujo kaj tiun elverŝis super arĝenta pelvo sur iliajn manojn, por tiujn purigi, kaj antaŭ ilin ŝi metis glatpoloritan tablon.

Post tio la respektinda mastrumistino alportis panon kaj antaŭ  
 55 ilin ĝin metis, post kiam ŝi estis alportinta ankoraŭ multajn  
 aliajn manĝaĵojn, ĉar ŝi volonte donis el la provizaj nutraĵoj.  
 [Tiam la detranĉisto prenis pladojn da ĉiuspecaj viandaĵoj  
 kaj tiujn metis antaŭ ilin kaj orajn pokalojn li metis antaŭ  
 ilin.] Kaj ilin ambaŭ bonvenigante parolis al ili la blondhara  
 Menelaos:

„Vi prenu da la nutraĵo kaj estu ĝojaj. Sed post tio, kiam  
 60 vi estos bone manĝintaj, ni demandos, kiuj vi estas [inter la  
 homoj: ĉar ne pereis nekonate la idaro de viaj gepatroj, sed vi  
 devenas de la de Zeus edukitaj reĝoj sceptroportaj, ĉar mal-  
 nobeloj ne naskigus tiajn infanojn].”

Tiel li parolis kaj per la manoj li prenis grasan bovadorsaĵon  
 kaj ĝin antaŭmetis al ili, kiun oni estis antaŭmetinta al li mem  
 kiel honorigaĵon. Kaj ambaŭ etendis la manojn al la pretaj  
 antaŭ ili kuŝantaj manĝaĵoj. Sed kiam ili estis kontentigintaj  
 sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam parolis Telemachos al  
 70 la filo de Nestor, proksimigante sian kapon al li, por ke la  
 aliaj ĝin ne aŭdu:

„Alrigardu, ho Nestor-ido, kiu estas tiel kara al mia koro,  
 la brilon tra la domo resona, de l'kupro, de l'oro kaj de la  
 sukceso, de l'argento kaj de la eburo. Ŝajnas al mi, ke la palaco  
 de l'Olumpano Zeus interne estas samspeca, ĉar kiom da nedi-  
 75 reblaj trezoroj estas ĉi tie! Mirego min ekkaptas, dum mi  
 ĉirkaŭrigardas.”

Lian parolon aŭdis la blondhara Menelaos kaj ekparolante  
 li diris al ili la flugilhavajn vortojn:

„Karaj infanoj! Certe neniu el la mortdestinuloj povus vet-  
 konkuri kun Zeus: ĉar senpereaj estas ties loĝejoj kaj trezoroj;  
 80 sed el la homoj povus eble iu konkuri kun mi je riĉeco, aŭ  
 eble ankaŭ neniu: ĉar post longedaŭraj suferado kaj rondvagado  
 mi ĉion kunportis en la ŝipoj, kaj nur en la oka jaro mi revenis  
 post vagado al Kupros, Phoinike kaj la Aiguptioj; mi ankaŭ  
 venis ĉe la Aithiopojoj kaj la Sidonioj kaj Eremboj kaj en Libua,  
 85 kie la virŝafoj tuj post la naskiĝo jam estas kornhavaj. Neniam  
 tie al iu terposedanto aŭ ŝafpaŝtisto mankas fromaĝo kaj viando  
 kaj dolĉa lakto, sed ĉiam kaj senĉese la ŝafoj donas lakton kaj  
 povas esti melkataj: ĉar trifoje en la maturiga jaro la ŝafoj  
 90 tie naskas idojn. Dum mi, kolektante riĉan posedon, estis  
 vaganta en tiuj regionoj, tiam iu alia mortigis mian fraton,  
 sekrete kaj neatendite, per ruzo de lia edzino pereiga; tial mi  
 ne kun ĝojo mastras ĉi tiujn trezorojn. Sed nepre vi jam aŭdis

- 95 ĉi tion de viaj patroj, kiuj ajn ili estas, ĉar tre multe mi suferis kaj ankaŭ min trafis perdoj en mia domo, antaŭe tre prosperanta kaj enhavanta multajn valoraĵojn. Ho! ke mi loĝus en mia domo, havante nur trionan parton de ĉi ĉio kaj ke vivaj ankoraŭ estus la viroj, kiuj tiam pereis en la vasta Troia, malproksime
- 100 de la ĉevalonutra Argos. Sed tamen, kvankam mi ofte sidas en nia domo, vekriante kaj malĝojante pro ili ĉiuj — kelkfoje mi malpezigas mian koron per plorĝemoj, kelkfoje mi ilin retenas: ĉar baldaŭ oni satigas de l'tremiga ĝemado — pro ili ĉiuj mi malĝojas ne tiom, kvankam mi tre ĉagreniĝas pro ili, kiom
- 105 pro tiu sola, kiu malamindigas al mi la dormon kaj la manĝon kiam mi lin memoras; ĉar neniu el la Aĉaioj tiom suferis kiom suferis kaj toleris Odusseus. Estis do al li destinite ekhavi malfeliĉon, sed al mi ricevi doloron ĉiam neforgeseblan pro li, tial, ke li jam longan tempon forestas, kaj ni neniel scias, ĉu
- 110 li ankoraŭ vivas aŭ jam mortis. Lin certe priploras la maljunulo Laertes kaj la saĝa Penelope kaj Telemachos, kiun li postlasis kiel infanon en sia domo."

Tiel li parolis kaj li ekscitis ĉe Telemachos la inklinon al ĝemplorado pro lia patro: aŭdinte la nomon de sia patro, li verŝis el sub la palpebroj larmojn sur la teron, dum li per

115 ambaŭ manoj la purpuran mantelon levis antaŭ la okulojn. Lian malĝojon rimarkis Menelaos kaj tiam li pripensis en sia spirito kaj sia animo, ĉu li lasos lin memori pri lia patro aŭ ĉu li antaŭe pridemandos lin, kaj ĉion klopodos, por ekhavi certecon.

- 120 Dum li ĉi tion pripensis en sia spirito kaj en sia animo, venis el la bonodora altplafona porvirina ĉambro Helena, simila al Artemis kun la oraj sagoj. Adraste, kiu ŝin akompanis, metis antaŭ ŝin apogseĝon bele prilaboritan, Alkippe portis
- 125 tapiŝon el mola lano kaj Phulo alportis arĝentan ŝpinkorbon, kiun estis al ŝi doninta Alkandra, la edzino de Polubos, kiu loĝis en la Aigupta Thebe, kie kuŝas la plej multaj trezoroj en la domoj; tiu ankaŭ donacis al Menelaos du arĝentajn banujojn kaj du tripiedojn kaj dek talantojn da oro. Siaflanke donacis
- 130 lia edzino belegajn donacojn al Helena: ŝi donis oran ŝpinaĵon kaj arĝentan ŝpinkorbon sur radoj, kaj la bordoj estis miksitaj per oro. Ĉi tiun do, plenigitan per bele fabrikita fadeno, alportis la servistino Phulo kaj ĝin metis antaŭ ŝin; kaj flanke de ĝi
- 135 la ŝpinaĵo staris etendita kun lano violkolora. Nun sidiĝis Helena en la apogseĝon, kaj sube staris benketo por la piedoj. Tuj nun ŝi per vortoj demandis ĉion al sia edzo:

„Ĉu ni jam scias, de Zeus edukita Menelaos! kiuj estas tiuj viroj, kiuj sin gloras viziti nian palacon? Ĉu mi eraros, aŭ  
 140 ĉu mi diros la veron? Mia animo min instigas ĝin eldiri. Mi ja opinias, ke ankoraŭ neniam mi vidis iun tiel similan al aliulo, nek viron nek virinon, — kaj miro min ekkaptas ĉe la rigardado — kiel ĉi tiu similas al la filo de l'grandanima Odusseus, al Telemachos, kiun postlasis en sia domo kiel infanon tiu heroo,  
 145 kiam pro mi, senhontulino, vi Achajoj venis al Troia, pripensante kuragan militon.”

Lin respondante alparolis la blondhara Menelaos:

„Tiel nun ankaŭ pensas mi, virino, kiel vi supozas. Li ja havis ĝuste tiajn piedojn kaj manojn, tian ekrigardon de la  
 150 okuloj kaj tian kapon, kaj tian hararon sur ĝi. Kaj ĵus, memorante pri Odusseus, mi parolis pri li, kiom li suferis kaj kiel malfeliĉa li fariĝis pro mi kaj tiam li verŝis amaran larmon el sub siaj brovoj, dum li levis la mantelon purpuran antaŭ la okulojn.”

155 Lin siavice alparolis la Nestor-ido Peisistratos:

„De Zeus edukita Atre-ido Menelaos, reganto super la popoloj! Jes, li estas envere lia filo, kiel vi diras. [Sed li estas prudenta kaj nekuraĝas en sia animo, ĵus alveninte, tuj eligi klandojn al vi, pro kies voĉo ni ambaŭ ĝojas, kvazaŭ ĝi estus de Dio.] Sed min elsendis la grizhara ĉevaldirektulo Nestor, por iri kun li kiel akompananto; ĉar li deziris vin viziti, por ke vi donu konsilon al li per vorto aŭ faro. Ĉar multajn ĉagrenojn  
 160 havas en sia domo la filo de patro forestanta, kiu ne havas aliajn helpantojn. Tiel nun ankaŭ al Telemachos li forestas kaj inter la popolo ne estas aliaj por deteni de li la malfeliĉegon.”

Lin respondante alparolis la blondhara Menelaos:

„Jen, venis do vere al mia domo la filo de tiu kara viro,  
 170 kiu pro mi suferis multajn malagrablojn! Mi ankaŭ intencis post lia reveno plej gastame, pli ol la aliajn Argeiojn, lin akcepti, se la laŭttondra Olumpano Zeus permesos al ni ambaŭ revenon trans la maron per la rapidaj ŝipoj. [Kaj mi estus doninta al li en Argos iun urbon kiel loĝejon kaj palacon mi estus por li konstruinta, post kiam mi estus kondukinta lin  
 175 el Ithaka kun liaj trezoroj kaj lia filo kaj lia tuta popolo, kaj mi estus malokupinta unu urbon el tiuj, kiuj kuŝas en la ĉirkaŭaĵo kaj estas de mi regataj. Multfoje ni tiam irus unu al la alia kaj estus kune kaj nenio alia disigus nin, vivantaj en  
 180 amikeco kaj ĝojo, antaŭ ol la nigra nebulo de l'morto nin

ĉirkaŭkovrus]. Sed la Diaĵo mem opiniis ŝajne tion tro feliĉa, ĉar ĝi igis nun tion malfeliĉulon nerevenonta.”

- Tiel li parolis kaj li ekscitis ĉe ili ĉiuj inklinon al ĝemplorado.
- 185 Ploris la Argeia Helena, la idino de Zeus kaj ploris Telemachos kaj la Atre-ido Menelaos. Ankaŭ al la filo de Nestor ne restis la okuloj senlarmaj; ĉar li memoris en sia animo pri la eminenta Antilochos, kiun estis mortiginta la brila filo de la lumanta Eos. Rememorante ĉi tiun, li parolis la flugilhavaĵn vortojn:
- 190 „Atre-ido! la maljunulo Nestor kutimis diri, ke vi supermezure estas saĝa inter la mortidevuloj, kiam ni pri vi parolis en lia domo kaj eldemandis unu la alian. Aŭskultu do ankaŭ nun je mi, se tio iel eblas; ĉar mi almenaŭ tute ne ŝatas malĝoĵi
- 195 post la vespermanĝo, sed morgaŭ ja revenos la frumatena Eos. Tamen mi neniel mallaŭdas priplori tiujn, kiuj el la mortdestinuloj mortis kaj atingis sian mortosorton. Tio ja estas por la mizeraj mortidevuloj la nura honoraĵo al la mortintoj: fortranĉi sian hararon kaj verŝi larmojn sur la vangojn. Ĉar ankaŭ mia frato estas mortinta, neniel la plej malgrava el la
- 200 Argeioj. Vi mem ĝin povas scii — mi mem ja tie ne estis kaj lin neniam vidis — sed oni diras ke Antilochos superis la aliajn, ĉar treege rapida je la kurado li estis kaj krome brava militisto.”

Lin respondante alparolis la blondhara Menelaos:

- 205 „Amiko! ĉar vi parolis tiel, kiel parolus kaj agus saĝa viro, eĉ se li estus pli aĝa — ankaŭ vi ja devenas de tia patro kaj tial vi mem parolas saĝe: tre facile konebla estas la filo de patro, por kiu la Kron-ido destinis feliĉon ĉe edziĝo kaj naskiĝo, kiel li nun permesis al Nestor senĉese ĉiujn tagojn, ke
- 210 li mem prospere maljuniĝu en sia domo kaj ke liaj filoj estu prudentaj kaj bonegaj rilate la uzon de l'lanco. Sed nun ni ĉesigos la ploradon, kiu ĝis nun nin kaptis kaj ree ni pensu pri la vespermanĝo kaj oni verŝu akvon sur niajn manojn. Ankaŭ morgaŭ matene estos ankoraŭ interparoloj inter Telemachos kaj mi, por ĉion detale preparoli unu kun la alia.”
- 215 Tiel li parolis kaj verŝis akvon sur iliajn manojn Asphaltion, la agema servisto de l'glorriĉa Menelaos. Post tio ĉiuj etendis la manojn al la manĝaĵoj, kiuj pretaj kuŝis antaŭ ili.

- Tiam elpensis Helena, la idino de Zeus, ion alian: tuj ŝi
- 220 ĵetis en la vinon, da kiu ili trinkis, sorĉrimedon sendolorigan kaj senkolerigan, kiu igis forgesi ĉiun malbonon. Ĉiu, kiu da tio trinkis, post kiam ĝi estis kunmiksita en la miksujo, tiu la tutan tagon ne lasus fali larmojn sur siajn vangojn, eĉ ne se estus mortintaj liaj patriĉo kaj patro, aŭ se antaŭ liaj

- 225 okuloj oni batmortigus per la kupra armilo lian fraton aŭ lian karan filon, dum li mem ĝin vidis. Tiajn sagacajn kaj utilajn rimedojn posedis la filino de Zeus, kiujn iam donis al ŝi la edzino de Thon, Poludamna el Aiguptos, kie la tero grendona
- 230 kreskigas tre multajn herbaĵojn, multajn utilajn sed ankaŭ multajn fatalajn, intermikse kreskantajn. Ĉiu tiea kuracisto superas je sperto la aliajn homojn: ili ja estas el la gento de Paieon. Kiam ŝi estis tion eniginta en la miksujon kaj estis ordoninta verŝi la vinon en la pokalojn, tiam ŝi denove diris en la varianta interparolo:
- 235 „De Zeus edukita Atre-ido Menelaos, kaj vi, infanoj de bravaj viroj — la Diaĵo Zeus alterne ja donas bonon kaj malbonon, ĉar ĉion li povas — vi nun, sidante en nia domo, festmanĝu kaj ĝoju pro miaj vortoj: ĉar mi rakontos ion konvenan.
- 240 Ĉion mi ne povus rakonti al vi, nek mi kapablus diri, kiel multnombraj estis la malprosperaĵoj de l'persistema Odusseau, sed jes, kiel li faris kaj kuraĝis la jenon, la forta viro, en la lando de l'Troianoj, kie vi, Aĉaioj, suferis malfeliĉojn. Malkaresinte sin mem per batoj abomenindaj kaj almetinte
- 245 ĉifonajn vestaĵojn ĉirkaŭ siajn ŝultrojn, li ŝteliris simila al sklavo en la larĝstratan urbon de l'viroj malamikaj. Tiel li sin similigis per alivestiĝo al viro alia, al almozulo, kvankam neniel li estis tia ĉe la ŝipoj de l'Aĉaioj. Simila al tiu li ŝteliris en la urbon de l'Troianoj kaj ĉiuj estis sensuspektaj.
- 250 Nur mi sola lin rekonis, kvankam li tiel aspektis, kaj mi lin volis eldemandi: sed perruze li min evitis. Sed kiam mi estis lin baninta kaj oleinta per olivoleo kaj estis almetinta al li aliajn vestaĵojn kaj ĵurinta per ĵuro potenca, ke mi ne publikigos inter la Troianoj, ke li estas Odusseau, antaŭ ol li estos
- 255 reatinginta la ŝipojn rapidajn kaj la tendojn, nur tiam li rakontis al mi la tutan planon de l'Aĉaioj. Kaj post kiam li estis mortiginta multajn el la Troianoj per la longtranĉa glavo, li revenis al la Argeioj kaj li kunportis multan sperton kaj konon pri Troia. Tiam la aliaj Troianinoj laŭte vekriis, sed
- 260 mia koro ĝojis, ĉar mia animo jam estis aliiginta kaj deziris reveni hejmen kaj mi bedaŭris la blindiĝon, kiun estis kaŭzinta al mi Aphrodite, kiam tien ŝi min kondukis, for de la kara lando de miaj prapatroj, kaj kiam mi forlasis mian infanon kaj mian loĝejon kaj mian edzon, kiu neniun malsuperas, nek rilate la saĝecon, nek rilate la eksteraĵon.”
- 265 Sin respondante alparolis la blondhara Menelaos:  
„Vere vi ĉi ĉion, ho virino! parolis konvene. Mi jam konati-



ĝis kun la planoj kaj la spirito de multaj viroj heroecaj kaj grandan parton de la tero mi travojaĝis; sed ankoraŭ neniam  
 270 mi vidis per miaj okuloj tian viron, kia estis la koro de la persistema Odusseus. Sambrave li ankaŭ faris kaj kuraĝis la jenon, la forta heroo, en la fortike ĉarpentita ĉevalo, en kiun ni ĉiuj, la plej kuraĝuloj el la Argeioj, estis enirintaj, por alporti morton kaj pereon al la Troianoj. Tiam vi venis tien: eble tion  
 275 al vi ordonis iu demono, kiu deziris havigi gloron al la Troianoj. Ankaŭ sekvis viajn paŝojn la disimila Deiphobos. Trifoje vi palpante ĉirkaŭiris la kavan embuskejon kaj laŭte vi nomis la nomojn de l'plej kuraĝuloj el la Danaoj, dum vi imitis per la voĉo la edzinojn de ĉiuj Argeioj. Kaj mi kaj la  
 280 Tude-ido kaj la dieca Odusseus, sidantaj en la mezo, ni aŭdis, kiel vi laŭte nin alvokis. Ni ambaŭ rapide leviĝis kaj deziregis ĉu eliri ĉu respondi rapide de interne. Sed Odusseus nin retenis kaj restigis, kiom ajn ni sopiris. [Tiam ĉiuj aliaj filoj de l'Achαιοj estis silentaj, sed sola Antiklos volis respondi al viaj vortoj, sed Odusseus premis senĉese siajn fortajn manojn sur lian buŝon kaj tiel savis ĉiujn Achαιοjn; kaj tiel longtempe li tion faris, ĝis kiam vin foririgis Pallas Athene.]''

290 Lin siavice alparolis la saĝa Telemachos:

„De Zeusedukita Atre-ido Menelaos, reganto super la popoloj! des pli malĝojiga tio estas; ĉar neniel tio detenis de li la ĉagrenan pereon, eĉ ne se li havus feran koron en la brusto. Sed nu, konduku nin al la lito, por ke ni nun enlitiĝu kaj refreŝiĝu per dolĉa dormo.''

Tiel li parolis; kaj la Argeia Helena ordonis al siaj servistinoj starigi en la kolonaro liton, meti sur ĝin kovraĵojn belajn kaj purpurajn kaj sterni sur ĝin litotukojn kaj meti sur ilin lanajn  
 300 mantelojn por sin envolvi sub ili. Ili nun forlasis la ĉambregon, portante torĉon en la manoj kaj ili pretigis la litojn; post tio elkondukis la gastojn la heroldo. Tie, en la antaŭa parto de la domo, kuŝiĝis la heroo Telemachos kaj la brila filo de Nestor. Sed la Atre-ido dormis en la interno de l'altegmenta palaco  
 305 kaj flanke de li kuŝiĝis la malvastvesta Helena, la dieca inter la virinoj. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam leviĝis el sia lito Menelaos, bonega je la militokrio, post kiam li estis almetinta la subveston, kaj ĉirkaŭ la ŝultron li pendigis la akran glavon kaj sub la piedojn briletajn li ligis la belajn  
 310 sandalojn; post tio li rapide iris el la dormejo, kompareble kun Diaĵo laŭ la eksteraĵo, kaj li sidiĝis flanke de Telemachos kaj diris la vortojn kaj laŭte parolis:



„Kiu deziro do kondukis vin ĉi tien, heroeca Telemachos! al la dieca Lakedaimon, trans la larĝan dorson de l'maro? Ĉu aferoj porpopolaj aŭ privataj? Rakontu tion al mi laŭvere.”

315 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„De Zeus edukita Atre-ido Menelaos, reganto super la popoloj! mi venis por provi, ĉu eble vi povos sciigi al mi ian informon pri mia patro. Mia domo estas fordiboĉata kaj miaj fruktodonaĵ terposedaĵoj perdiĝas; de viroj malamikaj estas plena la domo, 320 kiuj senĉese buĉadas miajn interpuŝademaĵn ŝafojn kaj trenpiedajn, kurbkornajn bovojn, la amantoj de mia patrino kun sia trokuraĝa impertinenteco. Pro tio mi petegante nun venas ĉe viajn genuojn, ĉu vi bonvolos sciigi ties pereon kompatindan, se eble vi ĝin vidis per viaj okuloj aŭ la rakonton aŭdis de iu 325 alia [pri liaj rondvagadoj; ĉar supermezure mizera lin naskis lia patrino]. Kaj ne mildigu vian rakonton, indulgante aŭ kompatante min, sed precise rakontu al mi, kiel vi vidis la spektaklon. Mi vin petegas, se iam al vi mia patro, la brava Oduseus, plenumis ĉu vorton ĉu agon, kiun li estis al vi promesinta en la lando de l'Troianoj, kie vi, Aĉaioj, suferis dolorojn, memoru nun pri tio kaj ĉion rakontu al mi laŭvere.”

Lin tre malkontentiĝinte alparolis la blondhara Menelaos:

„Ve! Tutcerte ili deziris kuŝiĝi en la liton de viro kuraĝa, 335 dum ili estas mem malfortaj. Kiel kiam cervino kuŝigas siajn ĵus naskitajn laktosuĉajn idojn en la kuŝejo de forta leono kaj post tio paŝtiĝante esploras intermontaĵojn kaj herboriĉajn valojn; la leono tiam venas al sia kuŝejo kaj preparas malhonoran 340 morton al patrino kaj idoj; tiel ankaŭ Oduseus preparos al ili malhonoran morton. Ke li ankoraŭ estus, ho patro Zeus kaj Athene kaj Apollon! tia, kia li iam en la bele konstruita Lesbos ekstaris kaj konkurse luktis kontraŭ Philomeleides kaj lin fortece teren ĵetis, kaj ĉiuj Aĉaioj pro tio ĝojis — ho, ke Oduseus, ankoraŭ estante tiel forta, interbatalus kontraŭ la amantoj! 345 Tiam ja ĉiuj baldaŭ trovus sian pereon kaj amariĝus iliaj edziĝoplanoj! Tion, pri kio vi min demandas kaj petegas, mi certe ne diros malverete kaj evitante la veron, kaj mi vin ne trompos; sed kion al mi rakontis la verema maljunulo de l'maro, 350 de tio mi kaŝos neniun vorton al vi, nek ĝin prisilentos.

En Aiguptos la Dioj ankoraŭ retenis min, kvankam mi deziris reveni ĉi tien, ĉar mi ne estis oferdoninta al ili neriproĉeblajn hekatombojn; [ĉar la Dioj ĉiam volas, ke oni memoru iliajn ordonojn]. Tie do troviĝas iu insulo en la maro ondeganta, 355 antaŭ la bordoj de Aiguptos, kaj oni ĝin nomas Pharos kaj

- ĝi kuŝas je tia distanco, kian ŝipo kurbigita plenumas dum unu tago, se laŭte susuranta vento favora de malantaŭe alblovas al ĝi; sur tiu insulo troviĝas haveno bonroda, de kie oni forveturigas la ŝipojn proporcie konstruitajn en la maron, post ĉerpado de l'malhela trinkakvo. Tie min retenis la Dioj jam
- 360 dudek tagojn kaj neniam aperis favoraj maren blovantaj ventoj, kiuj estas la akompanantoj de l'ŝipoj sur la larĝa dorso de l'maro. Kaj nun komencus manki ĉiu marista manĝaĵo kaj la kuraĝo de l'viroj, se ne iu el la Diaĵoj estus min kompatinta
- 365 kaj savinta, nome Eidothea, la filino de l'forteca Proteus, la grizharulo de l'maro. Ĉar mia mizero ege ŝin kortuŝis, ŝi venis renkonte al mi, kiam mi sola, for de miaj kunuloj, estis vaganta — ĉar ĉiam ili, ĉirkaŭ la bordoj de l'insulo vagante, fiŝkaptis per hokoj kurbigitaj; ĉar malsato turmentis al ili la stomakon
- 370 — kaj min proksimiĝinte, ŝi diris la vortojn kaj parolis:  
 „Ĉu vi, fremdulo! estas tiel ege malsaĝa kaj stulta? aŭ ĉu vi propravole estas senenergia kaj ŝatas suferi dolorojn? Vi ja restadas jam longtempe sur la insulo kaj neniel vi kapablas atingi vian celon kaj dume malgrandiĝas la forto de viaj kunuloj.”
- 375 Tiel ŝi parolis; sed mi ŝin respondante alparolis:  
 „Mi eldiros al vi, kiu ajn vi estas el la Diinoj, ke mi tute ne restadas ĉi tie propravole, sed eble mi pekofendis la senmortulojn, kiuj enloĝas la vastan ĉielon. Sed vi do diru al mi — la
- 380 Dioj ja ĉion scias — kiu el la senmortuloj min katenas kaj malhelpas mian vojaĝon kaj diru pri mia hejmenreveno, kiumaniere mi povos reveni trans la maron fiŝplenan.”
- Tiel mi parolis kaj tuj respondis ŝi, majestoplena inter la Diinoj:  
 „Certe mi tion rakontos al vi, fremdulo, tute laŭvere. Kutimas veni ĉi tien la grizharulo verema de l'maro, la senmorta
- 385 Proteus el Aiguptos, kiu scias la profundecon de l'tuta maro, la subulo de Poseidon. Oni diras ke li estas mia patro kaj min naskigis. Se vi povas, tiam embuskiĝu kaj lin kaptu, por ke li diru al vi la vojon kaj la longecon de via veturado kaj vian
- 390 revenon, kiumaniere vi povos reveni trans la maron fiŝplenan. Ankaŭ li sciigos al vi, de Zeus edukita, se vi deziras, kiuj malbono kaj bono okazis en via loĝejo, dum vi forestas en longedaŭra kaj maloportuna ŝpirado.”
- Tiel ŝi parolis, sed mi ŝin respondante alparolis:
- 395 „Vi mem indiku do al mi embuskon kontraŭ la dieca grizharulo, por ke li ne, antaŭvidante aŭ antaŭrimarkante, elsaviĝu.

Ĉar malfacile subigebla estas Diaĵo por viro mortideva.”

Tiel mi parolis kaj tuj respondis ŝi, majestoplena inter la Diinoj:

- „Certe mi tion rakontos al vi, fremdulo, tute laŭvere. Kiam  
 400 la suno estos atinginta la mezon de la ĉielo, tiam venos el la maro la grizharulo verema de l'maro, sin apogante sur la blovo de Zephuros kaj kaŝite sub la nigraj ondetoj. Kaj elveninte el la akvo, li ĉiam kuŝiĝas en la volbiĝanta kaverno. Ĉirkaŭ  
 405 li grandamase dormas naĝpiedaj fokoĵoj de l'bela filino de l'maro, elleviĝintaĵ el la grizkolora maro kaj elspirantaj akran odoron de la maro profundega. Tien mi vin kondukos je l'apero de Eos kaj mi vin kuŝigos en la vicojn de la fokoĵoj. Dume vi elektu zorge tri kunulojn, kiuj estas la plej kuraĝaj sur viaj bonferdekaj ŝipoj. Ĉiujn ruzajojn pereigajn de tiu grizharulo mi nun rakontos al vi. Unue li nombros kaj inspektos la fokoĵojn; sed post kiam li estos nombrinta ĉiujn per la fingroj kaj estos ilin inspektinta, tiam li kuŝigos meze de ili kiel paŝtisto meze de l' brutaro de siaj ŝafoj. Sed tuj, kiam vi vidos, ke li kuŝiĝis  
 415 por dormi, tiam vi pensu pri forteco kaj perforto kaj kaptu kaj tenadu lin malgraŭ lia deziro kaj liaj furiozaj klopodoj al elsaviĝo. Ĉar tion li certe provos, sin ĉiel aliigante, en reptiliojn, kiom ekzistas sur la tero, en akvon kaj brulegantan fajron. Sed firme vi lin tenadu kaj lin ĉirkaŭpremu ankoraŭ pli forte.  
 420 Sed kiam li mem vin pridemandos en sama staturo, en kiu vi vidis lin kuŝiĝi por dormi, tiam perforton ĉesigu kaj liberigu la grizharulon, ho heroo, sed demandu al li, kiu el la Diaĵoj vin mizerigas kaj ankaŭ demandu pri via hejmenreveno, kiumaniere vi povos reveni trans la maron fiŝplenan.”
- 425 Tiel parolinte, ŝi subakviĝis en la maron ondantan. Sed mi reiris al la ŝipoj, kie ili staris sur la sablo de l'marbordo kaj mia koro estis ege ekscitita dum la irado. Sed kiam mi estis irinta malsupren al la ŝipo kaj maro, tiam ni preparis la vespermanĝon kaj proksimiĝis la dieca nokto; tiam ni kuŝiĝis apud  
 430 la ondoresaltejo de l'maro. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam mi iris laŭlonge de l'bordo de la maro larĝvoja, verve preĝante al la Dioj; dume mi kunirigis tri kunulojn, kiujn mi fidis plej multe ĉe ĉiu entrepreno. Tiam la  
 435 Diino, subakviĝinte en la larĝan internon de l'maro, alportis kvar fokhaŭtojn el la maro; ĉiuj estis ĵus detiritaj; tiel ŝi projektis ruzon kontraŭ sia patro. Kaj post kiam ŝi estis fosinta por ni kavaĵojn en la marsablo, ŝi sidiĝis, atendante nin.  
 440 Dume ni ŝin proksimiĝis; nun ŝi nin kuŝigis envice kaj ĵetis sur

ĉiun el ni haŭton. Tiam la embusko estus fariĝinta terurega por ni, ĉar ege nin tormentis la tre pereigaodoro de la marnutrataj fokoj — ĉar kiu povus kuŝi flanke de monstro de l'maro — sed ŝi mem nin savis kaj ekpensis grandan refreŝigon: ŝi alportis  
 445 kaj sub la nazon de ĉiu metis ambrozion tre dolĉe bonodorantan kaj tio forpelis la malbonodoron de la monstroj. Tiel ni atendis la tutan matenon kun animo persista. Fine la fokoj venis grandamase el la maro kaj envice ili kuŝiĝis laŭlonge de l'ondores-  
 450 altejo de l'maro. Tagmeze ankaŭ la grizharulo venis el la maro kaj trovis la bonnutriĝintajn fokojn kaj ĉiujn li inspektis kaj nombris ilian nombron. Nin li unue nombris inter la monstroj  
 455 kaj neniel li suspektis iun ruzon. Post tio kuŝiĝis ankaŭ li mem. Nun ni kriegante nin jetis sur lin kaj lin ĉirkaŭpremis per niaj manoj. Sed la grizharulo ne forgesis siajn ruzajn lertaĵojn, sed unue li iĝis leono belbarba kaj post tio serpento kaj pantero kaj granda apro; tiam li iĝis akvo fluida kaj arbo altfoliara. Sed ni lin firme tenadis kun animo persista. Kaj kiam sen-  
 460 kuraĝiĝis la grizharulo, sperta je ruzoj pereigaj, tiam demandante li diris al mi la vortojn:

„Kiu do el la Dioj, ho filo de Atreus! donis al vi la konsilon, ke vi kontraŭ mia volo per embusko min kaptu? Kion vi bezonas?“

Tiel li parolis; sed respondante mi lin alparolis:

465 „Vi scias, maljunulo — kial vi evite tion al mi demandas? — ke jam longan tempon mi restadas sur la insulo kaj neniel mi kapablas atingi mian celon kaj dume malgrandiĝas la kuraĝo en mia brusto. Sed vi do diru al mi — la Dioj ja ĉion scias — kiu el la senmortuloj min katenas kaj malhelpas mian vojaĝon  
 470 kaj diru pri mia hejmenreveno, kiumaniere mi povos reiri trans la maron fiŝplenan.“

Tiel mi parolis kaj tuj li respondante diris al mi:

„Vi estus devinta oferedoni al Zeus kaj al la aliaj Dioj belajn oferaĵojn antaŭ ol surŝipiĝi, por, ŝipveturante sur la vinkolora maro, atingi vian patrujon plej baldaŭ. Ĉar ne estas destinite  
 475 al vi, revidi viajn karulojn kaj reveni al via bele konstruita domo kaj la lando prapatra, antaŭ ol vi estos reirinta al la akvo de la pluvnutrata rivero Aiguptos kaj estos oferinta sanktajn hekatombojn al la Dioj senmortaj, kiuj enloĝas la  
 480 vastan ĉielon. Nur tiam permesos al vi la Dioj vian vojaĝon, kiun vi deziregas.“

Tiel li parolis sed mia koro rompiĝis, tial ke li ordonis al mi denove iri trans la nebulecan maron al Aiguptos, vojo

longa kaj malfacila. Sed malgraŭ tio respondante mi diris al li la vortojn:

485 „Tion do mi plenumos, ho maljunulo! kiel vi ordonas. Sed diru al mi ĉi tion kaj laŭvere rakontu, ĉu ĉiuj Aĉaioj kun siaj ŝipoj sendifekte revenis, ĉiuj, kiujn Nestor kaj mi postlasis, kiam ni iris for el Troia, aŭ ĉu kelkaj pereis je morto amara

490 sur sia ŝipo [aŭ en la manoj de l'siaj, post kiam li travivis la militon.]”

Tiel mi parolis kaj tuj li respondante diris al mi:

„Atre-ido! kial vi demandas tion al mi? Neniel vi ja bezonas tion scii, nek konatiĝi kun mia scio. Ankaŭ mi opinias, ke vi ne longtempe restos senlarma, kiam vi estos ĉion ekaŭdinta

495 precise. Multaj el ili ja pereis, sed ankaŭ multaj restis vivaj. Kaj nur du ĉefuloj de la kuprakirasaj Aĉaioj pereis ĉe la hejmenvojaĝo; la militon ankaŭ vi mem ĉeestis. Krome ankoraŭ unu estas viva retenata ie sur la larĝa maro. Aiaks pereis meze

500 de siaj longremilaj ŝipoj. Unue Poseidon lin irigis al la grandaj rokoj de Gurai, sed tamen lin savis el la maro; kaj nun li estus evitinta sian mortosorton, kiom ajn li estis malamata de Athene, se li ne estus eliginta trokuraĝan parolon kaj ne estus blindiĝinta ege. Li ja pretendis ke spite la Diojn li elsaviĝis el la

505 granda abismo de l'maro. Sed Poseidon lin aŭdis, kiam li trokuraĝe fanfaronis. Kaj tuj kaptante la tridenton per siaj manoj fortecaj, li bategis la rokon de Gurai kaj ĝin fendis; kaj unu parto tie restis, sed la disŝirita parto, sur kiu antaŭe Aiaks sidis kaj blindiĝe fanfaronis, falis en la maron kaj lin

510 kuntrenis en la maron senfinan kaj ondantan. [Tiel li tie pereis, ĉar li trinkegis la salan akvon.] Ankaŭ via frato forsaviĝis kaj evitis la mortosorton sur siaj kavaj ŝipoj; lin savis la respekta Hera. Sed kiam li estis baldaŭ atingonta la krudan

515 montaron Maleia, tiam ventego, lin kuntrenegante, puŝis lin en la maron fiŝplenan, malgraŭ lia ĝemado. Sed kiam ankaŭ de tie aperis la ŝanco je sendanĝera reveno kaj kiam la Dioj

520 estis returnintaj la venton kaj ili hejme alvenis, ĉe la ekstremo de l'lando, kie enloĝis iam sian palacon Thuestes, sed tiutempe la Thuest-ido Aigisthos, tiam li ĝojante surpaŝis la prapatran landon kaj kisis, kuŝante sur tero, sian patrujon kaj multaj varmaj larmoj elruliĝis el liaj okuloj, kiam ĝojplene li revidis sian landon. Sed lin vidis de sur la observejo la gardisto, kiun

525 tie estis sidiginta la ruzoplena Aigisthos kaj du talantojn da oro li estis promesinta kiel rekompenco al li. Jam dum unu jaro ĉi tiu estis gardanta, por ke li ne alvenu nerimarkite kaj

ne intencu furiozan defendon. Rapide ĉi tiu nun iris al la palaco por informi la reganton super la popoloj. Tuj nun Aigisthos projektis ruzan lertaĵon: elektinte el la popolo dudek virojn plej kuraĝajn, li embuskigis ilin kaj li ordonis prepari festmanĝon je la posta parto de la palaco. Sed mem li iris per ĉevaloj kaj veturilo por inviti Agamemnon, la reganton super la popoloj, sed pripensante hontindaĵojn. Kaj li alkondukis lin, ne konscian pri la kontraŭ li projektita perejo, kaj post la manĝo lin mortigis kiel oni mortigas bovon ĉe la manĝujo. Kaj neniuj el la kunuloj de l'Atre-ido, kiuj lin akompanis, restis viva [nek iu el la amikoj de Aigisthos, sed ili pereis en la festĉambrego]."

Tiel li parolis; sed mia koro rompiĝis kaj sidante sur la sablo mi ploris kaj ne plu deziris mia koro vivi kaj vidi la lumon de l'suno. Sed kiam mi satiĝis de la plorado kaj turniĝado de doloro, tiam parolis al mi la grizharulo verema de l'maro:

„Jam ne, ho filo de Atreus! tiel longtempe senĉese ploradu, ĉar tiel ni ne trovos solvon de l'malfacilaĵoj. Sed plej baldaŭ provu, kiel vi atingos vian prapatran landon. Ĉar vi trovos Aigisthos ankoraŭ viva, aŭ eble Orestes lin mortigis antaŭ ol vi ĝin povis fari, kaj tiam vi povos partopreni lian enterigon.”

Tiel li parolis; sed miaj koro kaj fiero animo denove varmiĝis en la brusto, kiom ajn mi ĉagreniĝis kaj lin alparolante mi diris la flugilhavajn vortojn:

„Ties sorton mi nun scias; sed nomu nun la trian viron, kiu, ankoraŭ vivante, estas retenata sur la larĝa maro [aŭ mortinte; ĉar mi deziras tion aŭdi, kiom ajn mi ĉagreniĝas].”

Tiel mi parolis kaj tuj li respondante diris al mi:

„Estas la filo de Laertes, enloĝanta sian domon en Ithaka. Lin mi vidis sur insulo, dum li verŝis multajn larmojn, en la loĝejo de l'nimfo Kalupso, kiu lin perforte retenadas. Ankaŭ li ne povas atingi sian patrujon, ĉar remilhavajn ŝipojn kaj kunulojn li ne havas por lin akompani sur la larĝa dorso de l'maro. Sed por vi, de Zeus edukita Menelaos, ne estas destinita de la Dioj, ke vi mortos en la ĉevaloriĉa Argos kaj atingos vian mortosorton, sed la senmortuloj vin irigos al la Elizeaj kampoj kaj al la ekstremaj partoj de l'tero, kie loĝas la blondhara Rhadamanthus. Tie la vivo por la homoj estas oportuna: ne ekzistas neĝblovego nek longedaŭra vintro, nek iam pluvo, sed ĉiam Okeanos sendas laŭtete susurantajn ventojn de l'Zephuos, por freŝigi la homojn [ĉar vi posedas kiel edzinon Helena kaj estas por la Dioj la bofilo de Zeus].”



570 Tiel parolinte li subakviĝis en la maron ondantan. Sed mi  
 reiris kun miaj disimilaj kunuloj al la ŝipoj kaj mia koro estis  
 ege ekscitita dum la irado. Sed kiam ni estis irintaj malsupren  
 al la ŝipo kaj maro, tiam ni preparis la vespermanĝon kaj  
 575 proksimiĝis la dieca nokto. Tiam ni kuŝiĝis apud la ondoresalte-  
 tejo de l'maro. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos,  
 tiam ni unue trenis la ŝipojn en la diecan maron kaj ni starigis  
 la mastojn kaj velojn sur la proporcie konstruitaj ŝipoj kaj  
 ankaŭ la aliaj surŝipiĝis kaj sidiĝis ĉe la remapogiloj kaj sidante  
 580 envice, ili bategis per la remiloj la grizkoloran maron. Kaj  
 denove mi haltigis la ŝipojn ĉe la akvoj de la pluvonutrata  
 rivero Aiguptos kaj oferdonis neriproĉeblajn hekatombojn, sed  
 kiam mi estis paciginta la koleron de la ĉiamaj Dioj, tiam mi  
 starigis tombmonteton honore al Agamemnon, por ke lia  
 585 gloro estu neperea. Tion plenuminte mi reiris, ĉar donis al  
 mi la senmortuloj venton favoran, kiu rapide min kondukis  
 al mia kara patrujo.

Sed nu, restadu en mia loĝejo, ĝis kiam estos veninta la  
 dekunua aŭ dekdua tago; kaj tiam mi favoros vian vojaĝon  
 590 kaj donos al vi belegajn donacojn: tri ĉevalojn kaj glatpoluritan  
 veturilon, kaj krome mi al vi donacos belan pokalon por  
 verŝoferi al la Dioj senmortaj, min memorante ĉiujn tagojn."

Lin siavice alparolis la saĝa Telemachos:

„Atre-ido! ne min retenu longan tempon ĉi tie. Ĉar eĉ  
 595 tutan jaron mi eltenus sidi flanke de vi kaj min ne ekkaptus  
 sopiro al mia hejmo aŭ miaj gepatroj. Ĉar treege mi ĝuas,  
 aŭdante viajn rakontojn kaj parolojn; sed jam senkuraĝiĝis  
 miaj kunuloj en la sanktega Pulos, ĉar jam longan tempon  
 600 vi min retenas ĉi tie. Sed la donaco, kiun vi volas doni al mi  
 nur estu juvelo; ĉar ĉevalojn mi ne kunportos al Ithaka, sed  
 ilin mi ĉi tie lasos kiel belegajojn por vi mem. Vi ja regas  
 super vasta ebenaĵo, sur kiu kreskas blanka trifolio multa kaj  
 Kupra herbo kaj tritiko kaj spelto kaj larĝkreska blanka hordeo.  
 605 Sed en Ithaka ekzistas nek ĉevalkurejoj vastaj nek herbejo.  
 Ĝi estas kaprinonutra kaj pli ĉarmplena ol lando ĉevalonutra."

Tiel li parolis kaj ridetis Menelaos bonega je la militokrio  
 610 kaj lin karesis per la mano kaj li diris la vortojn kaj laŭte  
 parolis:

„Vi devenas de sango nobela, kara infano, ĉar vi tiumaniere  
 parolas. Tutcerte mi ŝanĝos miajn donacojn por vi, ĉar tion  
 mi povas. El la donacoj, kiuj troviĝas en mia domo kiel juveloj,  
 mi donos tion, kio estas plej belega kaj plej valora. Mi donos

615 al vi artplene faritan miksuojn; ĝi estas tute arĝenta, kaj la  
bordoj estas miksitaj kun oro; ĝi estas laboraĵo de Hephaistos.  
Donacis tion al mi la heroo Phaidimos, la reĝo de la Sidonioj,  
kiam lia domo min gastigis je mia reveno ĉi tien. Al vi mi  
volas nun donaci ĝin."

620 Tiel ili parolis unu al la alia. [Dume la kunmangontoj venis  
al la palaco de l'reĝo dieca. Kelkaj kunportis ŝafojn kaj vir-  
fortigan vinon; kaj panon sendis al ili la belvualaj edzinoj.  
Tiel ili okupiĝis pri la manĝo en la domo].

625 Dume la amantoj antaŭ la domo de Odusseus sin amuzis,  
ĵetante per diskoj kaj ĵetlancoj sur la plankon malmolan, kie  
ili kutimis jam de longe montri sian trokuraĝecon. Tie sidis  
Antinoos kaj la disimila Eurumachos, la ĉefoj de l'amantoj,  
kaj je kuraĝo ili estis multsupere plej bonaj. Ilin proksimiĝinte

630 Noemon, la filo de Phronios, demandis kaj alparolis Antinoos  
per la vortoj:

„Antinoos, ĉu iel ni scias aŭ ne, kiam revenos Telemachos  
el la sabloriĉa Pulos? Ĉar per mia ŝipo li foriris kaj nun mi  
635 mem bezonas ĝin, por transiri al la vaste etendiĝanta Elis,  
kie mi havas dudek inajn ĉevalojn kun idoj: muloj laborkapa-  
blaj kaj nebriditaj. Unu el tiuj mi intencas forkonduki kaj  
subjugigi."

Tiel li parolis kaj ili miregis en sia animo, ĉar ili opiniis,  
ke li ne estas for al Pulos, la urbo de Neleus, sed ie restadas  
640 sur la kamparo, ĉe siaj ŝafoj aŭ ĉe la porkisto. Lin siavice al-  
parolis Antinoos, la filo de Eupeithes:

„Diru al mi laŭvere, kiam li forveturis kaj kiuj eminentaj  
junuloj el Ithaka lin sekvis? Aŭ ĉu tiuj estis liaj propraj  
tagpagatoj kaj sklavoĵoj? Ĉar ankaŭ tion li kapablus fari. Ankaŭ  
645 ĉi tion diru al mi laŭvere, por ke mi bone sciu, ĉu li forrabis  
perforte kaj kontraŭ via volo vian nigran ŝipon, aŭ ĉu vi  
libervole ĝin donis al li, ĉar li petegis tion."

Lin alparolis Noemon, la filo de Phronios:

„Mi mem ĝin libervole donis al li; kion ja farus iu alia,  
650 kiam tia viro, havante zorgojn en sia koro, lin petegus? Estus  
ja malfacile rifuzi la donon. Kaj la junuloj, kiuj estas plej  
altrangaj el la popolo post ni, tiuj lin sekvis kaj mi rimarkis,  
ke kiel kondukanto enŝipiĝis Mentor, aŭ iu Diaĵo, kiu je ĉio  
655 similis al li. Sed pro tio mi miras: hieraŭ je la mateno mi  
vidis ĉi tie la diecan Mentor kaj tiam li surŝipiĝis al Pulos."

Tiel parolinte, li foriris al la domo de sia patro, sed koleriĝis  
al ili ambaŭ la trokuraĝa animo kaj ili kune sidigis la amantojn



kaj haltigis la konkurson. Kaj meze de ili parolis Antinoos,  
660 la filo de Eupheithes, indignite, kaj lia tutnigra animo pleniĝis  
de kolero kaj liaj okuloj similis brilantan fajron:

„Ve, tutcerte plenumis Telemachos trokuraĝe grandan agon,  
farante ĉi tiun vojaĝon! kaj tamen ni opiniis, ke ĝi ne estos  
665 farata de li. Se kontraŭ la volo de tiel multaj juna knabo  
simple forveturas, post kiam li trenis enmaren ŝipon kaj elektis  
el la popolo la plej altrangajn, tiam li ankaŭ estonte komencos  
esti danĝera por ni. Sed Zeus pereigu al li la forton, antaŭ  
ol li estos atinginta sian plenan forton. Sed nu, vi donu al mi  
rapidan ŝipon kaj dudek kunulojn por embuski kontraŭ li,  
670 kiam li revenos kaj por gardadi en la markolo inter Ithaka kaj la  
multrifa Samos, por ke li malhonore navigu pro sia patro.”

Tiel li parolis kaj ili ĉiuj aprobis kaj konsilis ĝin. Tuj post  
tio ili leviĝis kaj eniris la domon de Odusseus.

675 Sed ne longan tempon Penelope estis nescianta pri la planoj,  
kiujn la amantoj en sia koro sekrete projektis: ĉar la heroldo  
Medon, kiu ekster la antaŭkorto estis aŭdinta iliajn intencojn,  
dum ene ili elpensis planojn, diris ĝin al ŝi. Kaj rapide li  
680 trairis la domon por informi Penelope. Kiam li estis surpaŝinta  
la sojlon, lin alparolis Penelope:

„Heroldo, kial vin la eminentaj amantoj sendis? Ĉu por diri  
al la servistinoj de la dieca Odusseus, ke ili ĉesigu sian laboron  
kaj preparu por ili la manĝon? Ho, ke ili [ne svatiĝinte je  
685 mi, nek kolektiĝinte pro alia kaŭzo,] nun la lastan kaj plej  
lastan fojon ĉi tie festmanĝus! Vi, kiuj multfoje kolektiĝas  
kaj diboĉas la havaĵon grandan, la posedaĵon de la prudenta  
Telemachos! Ĉu do neniel vi aŭdis iam, kiam vi estis ankoraŭ  
infanoj, de viaj patroj, kia Odusseus estis en la tempo de viaj  
690 gepatroj, neniam farante aŭ dirante ion nekonvenan meze de  
la popolo? Kaj tamen tio estas kutimo inter la reĝoj diecaj  
[; kelkajn el la mortidevuloj ja malamas reĝo kaj aliajn li  
estimas]. Sed li tamen tute neniam kondutis malice kun iu;  
sed nun montriĝas via karaktero kaj viaj abomenindaj faroj  
695 kaj ne ekzistas poste dankemo pro spertitaj bonfaroj.”

Sin siavice alparolis Medon kun bona prudento:

„Ho, reĝino! ke tio estus la plej granda malfeliĉo! Sed alian  
agon multe pli grandan kaj pli ĉagrenan projektas la amantoj,  
700 kiun ne plenumu la Kron-ido! Ili deziras mortigi per la akra  
kupro la hejmen revenantan Telemachos. Ĉar tiu foriris, por  
aŭdi sciigojn pri sia patro, al la sanktega Pulos kaj al la dieca  
Lakedaimon.”

Tiel li parolis; sed senfortiĝis ŝiaj genuoj kaj koro kaj longan tempon ŝi ne kapablis vorton eligi; pleniĝis ambaŭ okuloj  
705 ŝiaj de larmoj kaj ŝia klara voĉo mutiĝis. Fine ŝi respondante diris al li la vortojn:

„Heroldo! kial forestas mia infano? Li ja tute ne bezonis suriri la rapidveturajn ŝipojn, kiuj estas por la homoj la ĉevaloj de la maro kaj trafendas la grandan malŝekan maron.  
710 Aŭ ĉu li iris, por ke lia nomo ankaŭ malaperu inter la homoj? ”

Ŝin post tio respondis Menon kun bona prudento:

„Mi ne scias, ĉu iu Diaĵo lin instigis, aŭ ĉu ankaŭ lia propra animo deziris iri al Pulos por informiĝi pri la reveno de sia patro aŭ pri lia sorto, kiel li pereis.”

715 Tiel parolinte, li reiris al la loĝĉambrego de Odusseus. Sed vivmortiga doloro ĉirkaŭkaptis ŝin kaj ŝi ne plu kuraĝis sidiĝi sur benkon, da kiuj troviĝis multaj en la domo, sed ŝi sidis sur la sojlo de la bele konstruita dormoĉambro, mizere ĝem-  
720 plorante, kaj ĉirkaŭ ŝi ĝemploris ĉiuj servistinoj, kiuj estis en la domo, junaj kaj maljunaj. Vekriante nun parolis meze de ili Penelope:

„Aŭskultu vi, amikinoj! Ĉar supermezure donis la Olumpano dolorojn al mi, pli ol al la aliaj, kiuj kune kun mi naskiĝis kaj estis elnutrataj. Unue mi ja perdis mian bravan leon-  
725 kuraĝan edzon, kiu je ĉiaj virtoj ĉiujn superis inter la Danaoj, la bravan, kies gloro etendiĝas en Hellas kaj la interno de Argos. Kaj nun la ventegoj fortrenis senglora mian amatan infanon el mia domo kaj mi eĉ ne pri lia forvojaĝo aŭdis!  
730 Kruekulinoj, neniu el vi ekpensis min veki, kvankam vi certe sciis en via animo, kiam li suriris la kavan ŝipon nigran. Ĉar se mi estus aŭdinta, ke li deziras fari tiun vojaĝon, tiam li certe estus restinta, kiom ajn li sopiris al tiu vojaĝo, aŭ li  
735 estis forlasinta min morta en mia domo. Sed iu rapide alvoku la maljunulon Dolios, mian serviston, kiun iam donis al mi mia patro, kiam mi venis ĉi tien, kaj kiu prizorgas mian arboriĉan ĝardenon, por ke li plej rapide ĉi ĉion komuniku al Laertes, sidiĝante flanke de li, por provi ĉu eble tiu elpensos iun kon-  
740 silon en sia spirito kaj venos kaj vekriante alparolos la popolon, kiu deziras pereigi lian genton kaj la genton de l'disimila Odusseus.”

Ŝin siavice alparolis la kara nutristino Eurukleia:

„Kara infano, mortigu min per la senkompata kupro aŭ lasu min en via domo: mi tamen nenion vorton kaŝos al vi.  
745 Mi sciis tion ĉion kaj mi donis al li, kion li ordonis, nutraĵon

kaj dolĉan vinon. Sed li min ĵurigis la ĵuron potencan, ke mi ĝin ne diros al vi, antaŭ ol estos pasinta la dek dua tago, aŭ antaŭ ol vi estos mem rimarkinta lian foreston kaj aŭdis pri lia forvojaĝo, por ke vi ne malbeligu per la plorado  
 750 vian belan haŭton. Sed post kiam vi estos vin lavinta kaj almetinta belajn vestojn ĉirkaŭ la korpon kaj suprenirinta kun la servistinoj al via supretaĝa ĉambro, tiam preĝu al Athene, la filino de l'egidporta Zeus. Ĝi ja povus savi lin eĉ el la morto. Kaj ne ĉagrenu la maljunulon per tiu malbona sciigo. Ĉar mi ne opinias, ke la idaro de l'Arkeisi-ido  
 775 estas tute malamata de la feliĉegaj Dioj, sed iu ja postrestos ankoraŭ por posedi la altegmentan palacon kaj la malapudajn fruktodonajn kampojn."

Tiel ŝi parolis kaj ŝi kvietigis ŝian koleron kaj ĉesigis la ploradon de ŝiaj okuloj. Kaj post kiam ŝi estis sin lavinta kaj almetinta belajn vestojn sur la korpon, tiam ŝi supreniris kun la  
 760 servistinoj al sia supretaĝa ĉambro kaj ŝi metis hordeograjn en korbeton kaj preĝis al Athene:

„Aŭdu min, ho filino de l'egidporta Zeus! nesubigebla Diino! Se iam honore al vi la ruzega Oduseus en sia loĝejo bruligis grasajn femuraĵojn de bovo aŭ ŝafo, tiam nun memoru tion kaj  
 765 savu mian karan filon kaj detenu la amantojn ege trokuraĝajn."

Tiel parolinte ŝi laŭtvoĉe alvokis Athene kaj la Diino aŭdis ŝian preĝon. Dume la amantoj laŭte kriis en la ombroriĉa loĝĉambrego kaj tiel parolis kelkiu el la junuloj trokuraĝaj:  
 770 „Tutcerte preparas por mi edziĝofeston la multsvatata reĝino kaj ŝi neniel scias la mortigon destinitan kontraŭ ŝia filo."

Tiel kelkiu parolis, sed ili ne sciis, kiel ĉio estas envere. Meze de ili nun ekparolis Antinoos kaj li diris:

775 „Stultuloj! evitu vi ĉiuj kune parolojn trokuraĝajn, por ke ne iu komuniku ilin ene. Sed nu, ni tute silente leviĝu kaj plenumu la planon, kiu ja plaĉas al ni ĉiuj en nia animo."

Tiel parolinte, li elektis dudek virojn plej kuraĝajn kaj rapide ili iris al la ŝipo rapida kaj al la bordo de la maro. Unue ili  
 780 trenis la ŝipon al la profunda akvo de la maro, post tio ili stariĝis la maston kaj la velojn sur la nigra ŝipo kaj fiksis la remilojn per la rimenoj ledaj [ĉion konvene; kaj tiam suprentiris la blankan velon]. La kuraĝaj servistoj nun alportis al ili la armilojn. La ŝipon ili nun ankrigis malproksime sur la ondoj kaj  
 785 ĝin mem forlasis. Tie sur la bordo ili prenis la vespermanĝon kaj atendis, ĝis proksimiĝis la vespero.

Dume la tre prudenta Penelope tie kuŝis en sia supretaĝa ĉambro, nemanĝinte kaj ne volante preni manĝon kaj trinkon kaj pripensante, ĉu la morton evitos ŝia eminenta filo, aŭ  
 790 ĉu li pereos pere de la amantoj trokuraĝaj. Same kiel leono meze de aro da viroj timplene pripensas, kiam ili formas ĉirkaŭ li ruzan rondon, tiel ŝi pensadis, ĝis kiam proksimiĝis la refreŝiga dormo; posten kliniĝinte ŝi ekdormis kaj malstreĉiĝis ĉiuj ŝiaj membroj.

795 Tiam ion alian elpensis la fajrŝprucokula Diino Athene: ŝi faris fantomon, kiu similis je staturo al virino, al Iphthime, la filino de l'grandanima Ikarios, kiun havis kiel edzinon Eumelos, enloĝanta domon en Pherai. Ĉi tiun ŝi sendis al la  
 800 domo de la dieca Oduseus por ĉesigi la ploradon kaj multlarman vekriadon de la ĝemanta kaj ploranta Penelope. Ŝi eniris la dormejon laŭlonge de l'rimeno de la riglilo kaj ŝi stariĝis, kliniĝante super ŝian kapon kaj diris al ŝi la vortojn:  
 „Ĉu vi dormas, Penelope, kun zorgoplena koro? Vere, la  
 805 Dioj senzorge vivantaj ne allasas, ke vi ploras kaj malĝojas, ĉar certe via filo ankoraŭ revenos. Ĉar neniel li estas pekinta kontraŭ la Dioj.”

Ŝin post tio respondis la tre prudenta Penelope, tre dolĉe dormante ĉe la perdo de la sonĝoj:

810 „Kial, fratino! vi venis ĉi tien? Antaŭe vi ne kutimis veni, ĉar ege malproksime de ni vi loĝas en via domo. Kaj nun vi ordonas al mi ĉesigi mian ĝemadon kaj grandan doloron, kiuj min ekscitas en spirito kaj animo. Unue mi ja perdis mian  
 815 bravan leonkuraĝan edzon, kiu je ĉiaj virtoj ĉiujn superis inter la Danaoj, la bravan, kies gloro etendiĝas en Hellas kaj la interno de Argos. Kaj nun mia filo amata foriris per la kava ŝipo, la malsaĝulo, nek sperta pri laboroj nek pri vortoj. Pro  
 820 li mi tremas kaj timas, ke io malbona okazos al li, ĉu inter la popolo de tiuj, kien li iris, ĉu surmare; ĉar lin insidas multaj malamikoj, dezirantaj lin mortigi antaŭ ol li estos atinginta la landon de siaj prapatroj.”

Ŝin respondante parolis la fantomo ombreca:

825 „Kuragiĝu kaj tute ne timu tro multe en via koro; ĉar tia kondukantino iras kun li, kian ankaŭ aliaj viroj dezirus kiel helpantinon — ĉar multon ŝi kapablas — Pallas Athene. Ŝi vin kompatas vekriantan kaj ŝi nun sendis min al vi por diri tion.”

830 Ŝin post tio alparolis la tre prudenta Penelope:

„Se vi estas iu Diaĵo kaj aŭdis la voĉon de la Diino, nu do,

rakontu al mi ankaŭ pri tiu malfeliĉulo, ĉu li ankoraŭ ie vivas kaj vidas la lumon de la suno aŭ ĉu li jam mortis kaj estas en la domo de Hades.”

835 Sin respondante parolis la fantomo ombreca:

„Vere, mi ne rakontos detale pri li, ĉu li vivas aŭ jam mortis. Malbone estas babilaĉi pri vanaĵoj.”

Tiel parolinte ŝi malproksimiĝis laŭlonge de la riglilo de l'pordokadro sur la blovo de l'vento. Kaj leviĝis el la dormo  
840 la filino de Ikarios kaj revarmiĝis ŝia koro, post kiam venis al ŝi la klare konebla sonĝo en la mallumo de l'nokto.

Dume la amantoj surŝipiĝis kaj veturis sur la vojoj malsekaj, projektante en sia koro morton minacan kontraŭ Telemachos.

Troviĝas iu insulo rokeca en la mezo de l'maro, inter Ithaka  
845 kaj la multtrifa Samos, nome Asteris, nur malgranda; sed estas sur ĝi duobla ŝipankreja haveno. Tie la embuskantaj Achajoj lin atendis.

## KVINA KANTO.

### LA GROTO DE KALUPSO; LA FLOSO DE ODUSSEUS.

Eos sin levis el sia kuŝejo je l'flanko de la nobla Tithonos, por alporti la taglumon al la senmortuloj kaj la mortidevuloj. Nun la Dioj en kunveno sidigis kaj inter ili la alttondra Zeus,  
5 kies forto estas plej granda. Al ili nomis Athene la multajn malfeliĉojn de Odusseus, pri kiu ŝi ekmemoris; ŝi ja malŝatis, ke li restadis en la loĝejo de l'nimfo:

„Ho nia patro Zeus kaj vi aliaj feliĉegaj Dioj ĉiamaj! neni  
sceptroporta reĝo estu ankoraŭ tutkore mildanima kaj kompleza,  
10 nek inklina al la justo en sia animo, sed ĉiam li estu malbonhumora kaj faru nedecaĵojn, ĉar neni ja memoras ankoraŭ pri la dieca Odusseus inter la popoloj, super kiuj li regis kaj por kiuj li estis mildanima kvazaŭ patro. Sed li troviĝas sur insulo, suferante akrajn dolorojn en la loĝejo de l'nimfo Kalupso,  
15 kiu perforte lin retenadas. Kaj li ne povas reveni al la lando de siaj prapatroj, ĉar li ne posedas ŝipojn remilhavajn kaj kunulojn, kiuj lin povus akompani trans la larĝan dorson de la maro. Sed nun intencas ili mortigi lian amatan filon, hejmen revenantan; ĉar por ekaŭdi pri sia patro li iris al la sanktega  
20 Pulos kaj al la dieca Lakedaimon.”

Sin respondante alparolis la nubkolektulo Zeus:

„Mia infano! kia parolo eliĝis el la vico de viaj dentoj?  
 Ĉu do ne vi mem projektis la planon, ke vere Odusseus revenos  
 25 kaj punos la amantojn? Sed vi konduku saĝanime Telemachos  
 — ĉar vi ĝin povas — por ke li atingu tute sendaĝere la landon  
 de siaj prapatroj, sed la amantoj sur sia ŝipo senrezulte revenu.”

Tiel li parolis kaj post tio li diris al Hermes, sia kara filo:  
 „Hermes — vi ja ankaŭ aliajn fojojn estas mia heroldo —  
 30 diru al la nimfo kun belaj harligoj nian neŝanĝeblan decidon,  
 ke la persistema Odusseus hejmen reiru sen akompano de  
 Dioj aŭ homoj mortidevaj. Sed sur fortike kunmetita flosa la  
 dudekan tagon li atingu multe suferante la fruktodonan Scheria,  
 35 la landon de l'Phaiakoj, kiuj diparencaj estas; ĉi tiuj lin ege  
 honoros en sia koro kiel Diaĵon kaj ili lin akompanos sur ŝipo  
 al la kara lando de liaj prapatroj, abunde donacinte al li  
 kupron kaj oron kaj vestojn, multamase, eĉ tiom, kiom neniam  
 40 estus akirinta Odusseus el Troia, eĉ ne se li estus sendifekte  
 reveninta kun sia lotakirita parto de l'militkaptajo. Ĉar tiel  
 estas al li destinite revidi siajn karulojn kaj reveni en sian  
 alttegmentan domon kaj en la landon de siaj prapatroj.”

Tiel li parolis kaj ne malobeis la kondukisto kaj Argusmorti-  
 ginto. Tuj post tio li ligis sub la piedoj la belajn sandalojn,  
 45 nepereipovajn kaj orajn, kiuj kutimas lin porti trans la maron  
 kaj trans la senfinan teron, kune kun la blovoĵ de l'vento;  
 [kaj li kaptis la sorĉbastonon, per kiu li sorĉdormigas la okulojn  
 de l'homoj, kiujn li volas, kaj aliajn, kiuj dormas, li vekas.  
 Tiun portante en la mano, flugrapidis la forta Argusmortiginto];  
 50 kaj superŝvebinte Pieria, li malsupreniris el la etero sur la  
 maron kaj post tio li rapide sin movis sur la ondoj kiel mevo,  
 kiu sur la teruraj profundoj de l'senĉese ondanta maro, ĉasante  
 fiŝojn, malsekigas siajn densplumajn flugilojn en la marakvo.  
 [Simila al tiu estis portata sur la ondoj Hermes]. Sed kiam li  
 55 fine atingis la malapude kuŝantan insulon, tiam li eliris la  
 violkoloran maron kaj ekpaŝis sur la firman teron, ĝis kiam li  
 atingis la grandan kavernon, en kiu loĝis la Diino kun belaj  
 harligoj; li ĝuste ŝin trovis ene. Granda fajro brulis en la kameno  
 kaj ĝis malproksime bonodoris tra la insulo la odoro de bru-  
 60 lantaj cedroligno kaj fendita citronligno; kaj ene ŝi kantante  
 per bela voĉo iradis tien kaj reen ĉe la teksotrabo kaj teksis  
 per ora glitbobeno. Verdiĝanta arbaro ĉirkaŭkreskis la groton,  
 alnoj kaj poploj kaj bonodoraj cipresoj. Tie larĝflugilaj birdoj  
 65 nestis, strigoj kaj falkoj kaj pinttongaj markornikoj, kiuj



- surmare sin okupi ŝatas. Tie ĉirkaŭ la volbiĝanta groto ankaŭ sin etendis vinberujo sarmentriĉa, plena je maturiĝantaj vin-  
 70 beroj. Kvar fontoj envice tie fluis kun klara akvo, kuŝantaj unu apud la alia sed turnantaj sin en diversajn direktojn. Ĉirkaŭe floradis molaj herbejoj kun violoj kaj apio. Tie do ĉiu vizitanto, eĉ se li estus senmortulo, admire alrigardus ĉi ĉion kaj ĝojus en sia animo.
- 75 Tie haltis kaj admire ĉirkaŭrigardis la kondukisto kaj Argusmortiginto; sed kiam li estis ĉion admire rigardinta en sia animo, tiam li tuj eniris la vastan kavernon. Tuj lin rekonis Kalupso, majestoplena inter la Diinoj, kiam ŝi vidis lin antaŭ ŝi, ĉar ne fremduloj estas unu por la alia la Dioj senmortaj,  
 80 eĉ ne se iu el ili malproksime loĝas en sia palaco. Sed la grandaniman Oduseus li ne trovis ene, ĉar tiu sidis kiel kutime plorante ĉe la marbordo, disŝirante sian koron per larmoj kaj ĝemoj kaj malĝojo, kaj verŝante larmojn li rigardadis al la senripoze ondanta maro.
- 85 Tiam demandis al Hermes Kalupso, majestoplena inter la Diinoj, sidante en brila brakseĝo polurita:  
 „Kial, Hermes kun ora bastono! vi venis al mi, vi, respektinda kaj kara? Vi ja alie ne ofte min vizitas. Diru, kion vi deziras; mia koro al mi instigas ĝin plenumi, se mi almenaŭ  
 90 kapablas fari ĝin kaj se ĝi estos plenumebla. [Sed min sekvu pli enen, por ke mi metu antaŭ vi porgastajn donacojn].”
- Tiel parolinte, la Diino antaŭmetis tablono, kiun ŝi estis tutpleniginta per ambrozio, kaj miksis la purpurkoloran nektaron. Kaj trinkis kaj manĝis la kondukisto kaj Argusmortiginto. Sed kiam li estis manĝinta kaj refortiginta sian koron per la nutraĵo, tiam li, ŝin respondante, parolis la vortojn:  
 95 „Vi, ho Diino! demandas al mi, kiu estas Diaĵo, pri mia veno. Laŭvere mi diros al vi la sciigon, ĉar vi ĝin postulas. Zeus ordonis al mi, sed kontraŭ mia volo, iri ĉi tien. Kaj  
 100 kiu ja volonte transrapidus tian neeldireble grandan akvon saletan? Ankaŭ ne estas proksima iu urbo de mortidevuloj, kiuj donas oferojn al la Dioj kaj bonegajn hekatombojn. Sed tute neeble estas al alia Diaĵo eviti aŭ vanigi la volon de l'egid-  
 105 porta Zeus. Li diras, ke ĉe vi restadas la plej mizera viro el ĉiuj, kiuj bataladis ĉirkaŭ la urbo de Priamos, [naŭ jarojn, sed en la deka ili reiris hejmen, ruiniginte la urbon; sed en la hejmenvojaĝo ili ofendis Athene, kiu alpelis kontraŭ ilin  
 110 pereigan venton kaj altajn ondojn. Tiam ĉiuj aliaj bravaj kunuloj pereis, sed lin kunportis la vento kaj ondoj kaj pelis

ĉi tien]. Pri ĉi tiu li ordonas, ke vi lasu lin foriri kiel eble plej baldaŭ. Ĉar ne estas destinite al li ĉi tie morti malproksime de siaj kunuloj. Sed estas lia destino, ankoraŭ revidi siajn amikojn  
115 kaj reveni al sia alttegmenta loĝejo kaj al sia patrujo.”

Tiel li parolis kaj ektremis Kalupso, majestoplena inter la Diinoj. Kaj lin alparolante ŝi diris la flugilhavajn vortojn:  
„Kruelaj vi estas, ho Dioj! kaj supermezure ĵaluzaj, kiuj  
120 envias al la Diinoj, ke ili malkaŝe dormas kun viroj mortidevaj, se iu elektis por si karulon kiel edzon. Tiel, kiam la rozofingra Eos estis elektinta Orion, tiam vi, Dioj senzorge vivantaj, ŝin eniadis, ĝis kiam la ĉasta ortrona Artemis en Ortugia proksimiĝis kaj mortigis lin per siaj nedolorigaj sagoj. Tiel ankaŭ, kiam Demeter kun belaj harligoj, konsentante al  
125 la inklino de sia koro, ame kuniĝis kun Iason sur trifojeto plugita nesemita kampo: sed ne longtempe tio restis nerimarkita de Zeus, kiu ĵetmortigis lin per fulmo brilega. Tiel vi ree min envias, ho Dioj! ĉar vivas kun mi mortideva viro. Lin mi mem  
130 elsavis, kiam li sola kun disigitaj kruroj sidis sur la kilo, post kiam Zeus la ŝipon rapidan per fulmo brilega estis trafinta kaj disfendinta meze de l'vinkolora maro. Tiam ĉiuj aliaj bravaj kunuloj pereis, sed lin kunportis la vento kaj ondoj  
135 kaj pelis ĉi tien. Lin mi gastigis kaj nutris kaj mi promesis igi lin senmorta kaj eterne juna dum ĉiuj tagoj estontaj. Sed ĉar tute neeble estas al alia Diaĵo eviti aŭ vanigi la volon de l'egidporta Zeus, li do foriru sur la senripoze ondanta maro,  
140 se tiu lin instigas kaj ordonas. Sed mi almenaŭ lin neniel sendos for: ĉar mi ne disponas je remilhavaj ŝipoj kaj kunuloj por lin akompani sur la larĝa dorso de la maro. Sed bonvole mi al li konsilos kaj mi nenion kaŝos al li, por ke li tute sendangere atingu sian patrujon.”

145 Sin siavice alparolis la kondukisto kaj Argusmortiginto:  
„Tiel do nun lin lasu foriri kaj respektu la venĝemon de Zeus, por ke li ne poste, koleriĝinte, kondutu malamike kontraŭ vi.”

Tiel parolinte foriris la forta Argosmortiginto. Sed la respek-  
tinda nimfo iris al la grandanima Odusseus, kiam ŝi estis ekscin-  
150 ta la ordonon de Zeus. Kaj ŝi lin trovis sidanta ĉe l'bordo de l'maro. Neniām sekiĝis la larmoj en liaj okuloj kaj forkonsumiĝis la dolĉa vivo dum li ĝemsopiradis al hejmenreiro, ĉar ne plu plaĉis al li la nimfo. Kaj tamen devigite kaj kontraŭ  
155 sia volo ĉiujn noktojn li kundormis en la volbiĝanta kaverno kun ŝi, kiu arde deziris ĉi tion; sed dumtage sidante sur rokoj



kaj ĉe la bordo de l'maro, [disŝirante sian koron per larmoj kaj ĝemoj kaj malĝojo,] kaj verŝante larmojn, li rigardadis al la senripoze ondanta maro. Proksimiĝinte parolis al li la Diino majestoplena:

- 160 „Malfeliĉulo! ne plu ĉi tie vekriu kaj ne konsumiĝu mizere via vivtempo; ĉar nun mi plej bonvole lasos vin foriri. Nu do, vi haku longajn trabojn per la kupra hakilo kaj kunmetu larĝan floson; sed ĉarpentu sur ĝi altan bordon, por ke ĝi sendanĝere portu vin sur la maro nebuleca. Sed mi enmetos sufiĉege da
- 165 manĝaĵo kaj da akvo kaj da ruĝa vino, por de vi deteni la malsaton, kaj mi almetos al vi vestaĵojn; plue mi sendos al vi favoran venton de malantaŭe, por ke vi tute sendanĝere atingu vian patrujon, se nur ĉi tion volas la Dioj, kiuj enloĝas la larĝan ĉielon kaj kiuj estas pli potencaj ol mi rilate la elpensadon kaj la plenumadon de siaj planoj.”

Tiel ŝi parolis kaj ekstremis la persistema dieca Oduseus kaj ŝin alparolante li diris la flugilhavajn vortojn:

- „Vi, ho Diino! per tio ja projektas ion alian kaj ne mian hejmenvojaĝon, ĉar vi min instigas transveturi pere de floso
- 175 la grandan abismon de l'maro, teruran kaj maloportunan. Ĝin eĉ ne la proporcie konstruitaj ŝipoj rapidiraj transveturas, eĉ ne se ili ĝojas pro vento favora. Krome mi ne surirus la floson kontraŭ via volo, se vi, ho Diino! ne povus decidi ĵuri per ĵuro potenca, ke vi ne projektas iun alian pereigan malfeliĉon kontraŭ mi.”
- 180 Tiel li parolis kaj ridetis Kalupso, majestoplena inter la Diinoj kaj per la mano ŝi lin karesis kaj diris la vortojn kaj parolis:

- „Vere, vi estas ruzulo kaj vin ne okupas pri vanaĵoj, ĉar vi ekpensis pri eligado de tia ideo. Nu do, sciu la jenon la
- 185 tero, la vasta ĉielo super ĝi kaj la malsupren fluanta akvo de l'Stuks, kio ja estas ja ĵuro plej potenca kaj terura inter la feliĉegaj Dioj, ke mi ne projektas iun alian pereigan malfeliĉon kontraŭ vi. Sed tion mi pripensas kaj konsideras, kion mi projektus por mi mem, se tia bezono al mi mem okazus. Ĉar
- 190 ankaŭ mia karaktero estas justa kaj mi ne havas feran koron en la brusto, sed estas ĝi kompatema.”

- Tiel parolinte, rapide lin antaŭiris la Diino majestoplena kaj li sekvis la paŝojn de la Diino. Baldaŭ alvenis en la volbiganta kaverno la Diino kaj la viro kaj tie li sidiĝis sur la brakseĝo de kiu ĵus estis leviĝinta Hermes kaj la nimfo antaŭmetis ĉian nutraĵon por manĝi kaj trinki, kian kutime prenas morti-

devaj homoj. Mem ŝi sidiĝis kontraŭe de la dieca Oduseus kaj ŝiaj servistinoj metis antaŭ ŝin ambrozion kaj nektaron. Ambaŭ  
 200 nun etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj nutraĵoj. Sed kiam ili estis ĝuintaj manĝon kaj trinkon, tiam inter ambaŭ ekparolis Kalupso, majestoplena inter la Diinoj:

„Didevena Laert-ido, elpensema Oduseus, ĉu do vi vere  
 205 tuj nun volas iri hejmen, al via kara patrujo? Malgraŭ tio fartu vi bone! Se vi nur sciis en via animo, kiom da malfeliĉoj laŭ via destino vi devos ankoraŭ travivi antaŭ ol alveni en la patrujo, tiam verŝajne vi restus ĉi tie kaj daŭre kun mi enloĝus ĉi tiun domon kaj senmorta vi estus, kiom ajn vi deziras  
 210 revidi vian edzinon, al kiu vi ĉiam kaj ĉiujn tagojn sopiradas. Vere, mi gloras min esti tute ne malsupera al ŝi rilate staturon kaj eksteraĵon, ĉar tute ne decus, se mortidevulino vetkonkuris kontraŭ senmortulinoj rilate staturon kaj eksteraĵon.”

Sin respondante parolis la ruzega Oduseus:

215 „Respektinda Diino, tial ne koleriĝu kontraŭ mi. Ankaŭ mi mem ja scias ĉi ĉion bone, kiom la inteligenta Penelope estas malsupera al vi rilate staturon kaj altkreskon laŭ la eksteraĵo; ŝi ja estas mortidestina kaj vi senmorta kaj eterne juna. Sed spite al tio mi volas kaj deziras ĉiujn tagojn iri hejmen kaj  
 220 vidi la tagon de l'hejmreveno. Sed se iu el la Dioj pereigos mian flosan sur la vinkolora maro, tiam mi ĝin toleros, ĉar en mia brusto mi havas dolorelteneman koron. Ĉar vere mi jam suferis multajn malfeliĉojn kaj jam multon mi travivis sur la ondoj kaj en la milito. Krom tio okazu ankoraŭ ĉi tio.”  
 225 Tiel li parolis; dume la suno malleviĝis kaj proksimiĝis la krepusko; ambaŭ nun iris en la internon de l'volbiĝanta kaverno kaj kune ĝuis la amon.

Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam Oduseus tuj almetis mantelon kaj subveston kaj la nimfo mem sin  
 230 vestis per granda blankbrila vesto, delikata kaj gracia, kaj ĉirkaŭ la koksojn ŝi ligis belan oran zonan kaj metis sur la kapon vualkufon; kaj tiam ŝi zorgis pri la forvojaĝo de Oduseus. Ŝi donis al li hakilon grandan, ĝustforman por liaj manoj,  
 235 kupran kaj ambaŭflanke akriĝitan; kaj estis al ĝi belega tenilo olivligna, firme fiksita. Post tio ŝi donis al li bele glatigitan hakrabotilon. Nun ŝi lin antaŭiris al la ekstrema parto de la insulo, kie kreskis altaj arboj, alnoj kaj poploj, kaj ĉielaltaj  
 240 pinoj, jam de longe sekaj kaj sensukaj, kiuj facile povis flosi. Sed kiam ŝi estis montrinta al li la lokon, kie kreskis la altaj arboj, tiam reiris al sia loĝejo Kalupso, majestoplena inter

la Diinoj. Kaj dume li hakis trunkojn kaj lia laboro rapide  
 progresis. Entute li hakfalis dudek arbojn kaj ilin prilaboris  
 245 per la kupra hakilo kaj post tio li spertece ilin rabotis kaj  
 rektigis pere de la rektiga ŝnuro. Tiam alportis borilon Kalupso,  
 majestoplena inter la Diinoj; nun li boris truojn en ĉiujn kaj  
 ilin metis unu flanke de l'alia kaj per lignaj najloj kaj liglatoj  
 li ĉarpent-kunmetis la floson. Tiel granda kiel viro, sperta  
 250 je ĉarpentarto, konstruas la fundon de vasta ŝarĝoŝipo, tiel  
 vasta faris Oduseus sian floson. Kaj li starigis bordotabulojn  
 kaj ilin fiksas per multnombraj latoj kaj li finfaris ĝin per longaj  
 bordotraboĵoj. Post tio li starigis la maston kaj al ĝi alligis la  
 255 velstangon. Krome li faris direktilon por povi direktili. Tiam  
 la floson li ĉirkaŭbaris per kunplektaĵoj de salikbranĉetoj  
 kiel ŝirmprotekto kontraŭ la ondoj, kaj multajn branĉetojn  
 li ŝutis sur la floson. Tiam alportis tolon Kalupso, majestoplena  
 inter la Diinoj, por fari velon, kaj ankaŭ ĉi tiun li lerte fabrikis.  
 260 Tiam li ligis al la veloj brasojn kaj velŝnurojn kaj la ŝkotojn  
 kaj tiam li ŝovis per leviloj la floson en la maron.

Estis je la kvara tago, kiam li ĉion estis fininta. En la kvina  
 lasis lin foriri de la insulo da dieca Kalupso, post kiam ŝi  
 estis lin baninta kaj almetinta al li bonodorajn vestojn. Kaj  
 265 la Diino metis en la floson unu ledan sakon da nigreca vino  
 kaj unu grandan da akvo kaj ankaŭ sakon en kiun ŝi estis metinta  
 por li abunde multajn almanĝaĵojn kaj ŝi sendis venton favoran  
 kaj varmetan. Goja pro la favora vento la dieca Oduseus  
 270 malfaldis la velojn kaj sidante ĉe la direktilo li spertece direk-  
 tis, kaj ne deglitis dormo sur liajn palpebrojn, dum li rigardadis  
 al la Pleiadoj kaj al la malfrue malsupreniranta Bootes kaj al  
 Arktos, kiun alnome oni ankaŭ nomas Veturilo, kaj kiu senĉese  
 275 tie turniĝadas kaj observadas Orion kaj estas la nura nepartohava  
 al la banoj en Okeanos. Ĉar Kalupso, majestoplena inter la  
 Diinoj, estis al li ordoninta transvojaĝi la maron, havante  
 ĉi tiun stelaron je l'flanko maldekstra. Tiel li deksep tagojn  
 veturis sur la maro, sed la dekokan aperis la ombroriĉaj montoj  
 280 de l'lando de la Phaiakoj, plej proksime al la parto de l'flos  
 kie li sidis. Kaj ĝi aspektis kiel ŝildo sur la nebuleca maro.

Sed revenante de la Aithiopoĵoj lin ekvidis la tertremiga  
 reganto, de malproksime, de la montoj de l'Solumoj, ĉar li  
 vidis lin veturi sur la maro. Ankoraŭ pli ege li nun koleriĝis  
 285 en sia koro kaj skuante la kapon, li diris al si mem la vortojn:  
 „Ve! Tutcerte la Dioj ŝanĝis sian decidon pri Oduseus, dum  
 mi restadis inter la Aithiopoĵoj; kaj li jam estas proksima al la

lando de la Phaiakoj, kie la sorto permesos al li, ke li sin elsavu el la longedaŭra malfeliĉo, kiu lin tenadas. Sed tamen mi  
 290 opinias, ke mi ankoraŭ sufiĉe pelos lin en malfeliĉegon.”

Tiel parolinte li kolektis la nubojn kaj kaptante per la mano  
 la tridenton, li maltrankviligis la maron kaj li ekblovigis  
 ĉiujn uruganojn el ĉiuj ventodirektoj, kaj teron kaj maron li  
 kovris per nuboj; kaj malsupreniĝis nokto el la ĉielo. Inter-  
 295 puŝiĝis la sudorienta kaj suda ventoj kun la kontraŭe blovanta  
 nordokcidenta kaj l'eterdevena norda ventoj kaj ili ruladis gran-  
 dajn ondojn. Tiam senfortiĝis la genuoj kaj la koro de  
 Oduseus kaj senkuraĝiĝinte li diris al sia brava animo:

„Ve al mi, mizerulo. Kio do fakte okazos al mi? Mi timas,  
 300 ke tamen la Diino diris ĉion laŭvere, kiam ŝi asertis, ke mi  
 ankoraŭ suferos dolorojn surmare antaŭ ol atingi la prapatran  
 landon; ĉi ĉio nun evidente plenumiĝas. Per kiaj nuboj Zeus  
 ĉirkaŭe envolvas la vastan ĉielon kaj kiel ege li maltrankviligas  
 305 la maron kaj blovigas uruganojn el ĉiaj ventodirektoj! Nepre  
 min nun atendas la neevitebla perejo! Trifoje kaj kvarfoje  
 feliĉegaj estas la Danaoj, kiuj pereis tiam en la vasta  
 Troia servante al la Atre-idoj. Ho, ke mi estus pereinta kaj  
 atinginta mian morton en tiu tago, kiam tre multaj Troianoj  
 310 ĵetatakis min per kuprotegitaj lancoj en la batalo ĉirkaŭ la  
 mortigita Pele-ido. Tiam mi estus akirinta la honoron de  
 enteriĝo kaj mian gloron estus vastigintaj la Aĉaioj, sed nun  
 destinite estas, ke mi estos fortirata de morto malĝojiga.”

Ĝuste li estis tiel parolinta, kiam grandega ondo, terure  
 alrapidante, de supre sin ĵetis sur lin kaj rondturnegis la floson.  
 315 Malproksime de l'foso li falis en la maron kaj lasis forgliti la  
 direktilon; terura ventego de kunmiksitaĵoj, rapidege  
 alblovanta, rompdividis la maston kaj malapude falis en la  
 maron velo kaj velstango. Lin la ondoj longan tempon tenis  
 320 sub la akvo kaj li ne kapablis sin rapide superakvigi de el la  
 potenca alruliĝado de l'ondoj; ĉar la vestaĵoj lin pezis, kiujn  
 estis al li donacinta la dieca Kalupso. Fine li reaperis kaj  
 kraĉis el sia buŝo la akran salakvon, kiu abunde fluis de lia  
 kapo. Sed eĉ nun li tamen ne forgesis sian floson, kvankam li  
 325 estis lacega, sed meze de la ondoj li postnaĝis kaj ekkaptis  
 ĝin, kaj li sidiĝis sur ĝia mezo kaj tiel evitis vivofinon kaj  
 morton. La floson kuntrenis grandaj ondegoj tien kaj reen  
 kun sia fluo. Kiel kiam la postsomera norda vento pelas la  
 kardojn tra la kampo kaj ili dense sin fiksas unu al la alia, tiel  
 330 la floson kuntrenis la ventoj tra la maro tien kaj reen. Jen la

sudokcidenta vento ĝin alĵetis al la norda vento por kuntreni ĝin, jen la sudorienta vento ĝin delasis al la nordokcidenta vento por ĝin persekuti.

335 Sed lin ekvidis la filino de Kadmos, la belpieda Ino Leukothea, kiu iam estis mortidevulino kun homa voĉo, sed nun ŝi estis akirinta dian honoron en la ondoj de la maro. Ĉi tiu ekkompatis la flosvagantan, suferantan Oduseus; [similante al fluganta mevo ŝi superakviĝis] kaj ŝi sidiĝis sur la fortike kunmetitan floson kaj diris al li la vortojn:

340 „Malfeliĉulo! kial do tiel terure koleras kontraŭ vi la tremiga Poseidon, ĉar li elpensas tiel multajn malfeliĉojn? Tamen li ne mortigos vin kvankam li ege koleras. Sed ĉiukaze jene agu — ĉar ŝajnas al mi, ke vi ne malprudentas — demetu viajn vestaĵojn kaj forlasu vian floson, kiun la ventoj forpelu, sed penu, naĝante per la manoj, akiri la alvenon en la lando de l'Phaiakoj, kie estas al vi destinite elsaviĝi. Jen! malfaldu ĉi tiun nepereipovan vualon sub la brusto; tiam vi ne havu timon, ke vi ion suferos aŭ pereos. Sed tuj post kiam vi estos atinginta per la manoj firman teron, tiam ĝin ree malligu kaj 350 ĵetu ĝin en la maron vinkoloran malproksime de l'tero, sed mem deturnu la vizaĝon.”

Tiel parolinte, la Diino donis al li la vualon kaj mem ŝi returne subakviĝis en la ondantan maron, simila al mevo; kaj ŝin kaŝis nigraj ondoj. Sed pripensis la persistema dieca 355 Oduseus kaj malbonhumore li diris la sia grandanima koro:

„Ve mi! se nur ne denove iu el la senmortuloj projektas ruzon al mi, tial ke ŝi konsilas al mi forlasi la floson. Sed mi ankoraŭ ne obeos, ĉar ĵus mi ankoraŭ vidis per la okuloj malapuda la landon, kie ŝi diris, ke estas por mi evitebleco. Male 360 mi agos tiel, kaj tio ŝajnas al mi esti plej bona: dum la traboj ankoraŭ restos kunigitaj en la kunligoj, tiel longe mi ĉi tie restos kaj eltenos, ke mi suferas dolorojn; sed tuj kiam la ondoj disbategos mian floson, mi komencos naĝi, ĉar tute ne estas eble pripensi ion pli bonan.”

365 Dum li pripensis ĉi tion en sia spirito kaj animo, la tertremiga Poseidon alpelis grandan ondegon kontraŭ li, teruran, nerezisteblan kaj kun alta supro, kaj li igis ĝin falegi sur lin. Kiel la bloveganta vento disŝutas amason da grenŝeletoj kaj 370 ĝin disigas en ĉiujn direktojn, tiel li disbategis la longajn trabojn de l'foso. Sed Oduseus sidiĝis sur trabon kun unu kruro ambaŭflanke, kvazaŭ sidante sur rajdĉevalo, kaj li demetis siajn vestaĵojn, kiujn estis al li donacinta la dieca Kalupso.

Tuj li nun malfaldis la vualon sub la brusto kaj mem li  
 375 antaŭen sin faligis en la maron, kun etenditaj manoj, dezirante  
 naĝi. La tertremiga reganto vidis ĝin kaj skuante la kapon  
 li diris al si mem:

„Tiel vi vagadu nun sur la maro, suferante multajn mal-  
 felicojn, ĝis kiam vi fine alvenos inter la de Zeus edukitaj  
 homoj. Sed mi supozas, ke vi eĉ tiam ne opinios tro malgranda  
 vian mizeron.”

380 Tiel parolinte li vipis siajn belkolharajn ĉevalojn kaj li alvenis  
 en Aigai, kie troviĝis lia famkonata palaco.

Sed Athene, la filino de Zeus, pripensis ion alian. Ŝi  
 malebligis la vojon de l'aliaj ventoj kaj ŝi ordonis al ĉiuj  
 385 ĉesi kaj kvietiĝi; sed ŝi ekblovigis la rapidan Boreas kaj antaŭ  
 Oduseus ŝi rompis la ondojn, por ke la didevena Oduseus  
 atingu la remŝipamajn Phaiakojn, evitinte la morton kaj la  
 mortodestinon.

Tie li rondvagadis du noktojn kaj du tagojn sur la potencaj  
 ondoj, kaj ofte antaŭvidis la pereon lia koro. Sed kiam la bel-  
 390 hara Eos aperigis la trian tagon, tiam la vento malfortiĝis  
 kaj senventeco kuŝis sur la kvieta maro kaj li ekvidis, tre  
 akre rigardante antaŭ si, kiam lin levis granda ondo, en la  
 proksimeco teron. Kiel kiam al la infanoj ĝojiga fariĝas la vivo  
 395 de l'patro, kiu kuŝas en malsano, suferante akrajn dolorojn  
 kaj longan tempon konsumiĝante — ĉar malaminda demono  
 lin atakis, sed je lia ĝojo la Dioj lin liberigis de lia malsano —  
 same ĝojiga aperis al Oduseus la tero kaj arbaro, kaj rapide  
 li naĝadis por povi surpaŝi la firman teron per siaj piedoj.  
 400 Sed kiam li estis ankoraŭ je tia distanco, ke krianta homo  
 povas sin aŭdebligi kaj kiam li aŭdis jam la muĝadon de  
 l'maro kontraŭ la rifoj — ĉar grandegaj ondoj, terure alten  
 saltantaj, brupuŝegadis kontraŭ la sekan teron, kaj ĉio estis  
 kaŝkovrata de l'ŝaŭmo de l'maro; tie ja ne estis havenoj, la  
 405 protektantoj de l'ŝipoj, aŭ albordiĝejoj, sed estis tie elstarantaj  
 pintoj kaj akraj rifoj kaj ŝtonegoj — tiam senfortiĝis la genuoj  
 kaj la koro de Oduseus kaj senkuraĝiĝinte li diris al sia brava  
 animo:

„Ve al mi, ĉar post kiam Zeus ja lasis min vidi kontraŭ  
 mia espero la teron kaj mi jam tranaĝis kaj transiris tiun abis-  
 410 mon, nun nenie montriĝas eliro el la griza maro; ĉar ekster  
 ĝi sin trovas akraj ŝtonegoj kaj ĉirkaŭe muĝadas la brusaŭ-  
 mantaj ondoj kaj glata rokaro supren sin levas; kaj profunda  
 estas la maro apud la marbordo kaj neniel estas eble tie stariĝi



sur ambaŭ piedoj kaj forsaviĝi el la malfeliĉo. Se nur ne grandega  
 415 ondo, kuntrenante min, kontraŭ la ŝtonecan rokaron min ĵetegos,  
 kiam mi klopodos eliri la maron; ĉar vana estus mia klopodo.  
 Kaj se mi ankoraŭ pluen naĝos laŭlonge de l'bordo, por provi,  
 ĉu eble mi trovos marbordon ebenan, sur kiu la ondoj fluetas,  
 kaj marhavenon, tiam mi timas, ke la ventego subite min ree  
 420 kuntrenegos kaj portos min, ege ĝemantan, tra la maro fiŝ-  
 plena, aŭ ke demono incitos kontraŭ mi grandegan marmon-  
 stron el la maro, kiajn la famkonata Amphitrite multajn nutras;  
 mi ja scias kiel koleras kontraŭ mi la fama tertremigulo."

Dum li ĉi tion pripensis en siaj animo kaj koro, grandega ondo  
 425 lin puŝis kontraŭ la krudan marbordon. Tie estus al li la haŭto  
 defrotita kaj liaj ostoj estus frakasitaj, se ne la fajrŝprucokula  
 Diino Athene estus al li inspirinta ideon; ĉar ĵetante sin sur  
 ĝin per ambaŭ manoj la rokon li ekkaptis kaj ĝemante li tenadis  
 ĝin ĝis kiam la grandega ondo estis preterfluinta. Tiel li ĝin  
 430 evitis, sed returnen fluegante ĝi denove alrapidis kaj lin trafis  
 kaj ĵetis malproksimen en la maron. Kiel kiam polipo estas  
 eltirata el sia rifuĝejo kaj densa aro da ŝtonetoj sin fiksas al  
 ĝiaj suĉbrakoj, tiel de liaj kuraĝaj manoj estis forŝiritaj haŭt-  
 435 pecetoj kiuj postrestis gluiĝintaj al la rokoj; sed lin mem  
 kaŝkovris ondo grandega. Tiam tutcerte kontraŭ sia destino  
 estus pereinta la malfeliĉa Oduseus, se ne la fajrŝprucokula  
 Athene estus al li doninta spiritan kvietecon. Supreniginte  
 sin el la ondoj, kiuj ŝaŭmsaltegis kontraŭ la firman teron, li  
 naĝis for de ili, ĉiam rigardante al la bordo, ĉu eble li trovos  
 440 marbordon ebenan, sur kiu la ondoj fluetas, kaj marhavenon.  
 Sed kiam li naĝante alvenis kontraŭe de l'enmariĝo de bele  
 fluanta rivero, tiam sin tie montris al li plej taŭga loko mal-  
 plena de rokoj, kaj tie estis ŝirmo kontraŭ la vento. Li ĝin  
 ekvidis antaŭen fluanta kaj preĝis en sia animo:

445 „Aŭdu min, ho reĝo de l'fluo, kiu ajn vi estas! Mi venas al  
 vi, la arde dezirata, forigante min el la maro kaj min savante  
 el la kolero de Poseidon. Estiminda ja estas ankaŭ ĉe la Dioj  
 senmortaj ĉiu el la homoj, kiu vagadante sin turnas al ili, kiel  
 ankaŭ mi nun, multon trasuferinte, min turnas al via fluo kaj  
 450 viaj genuoj. Tial kompatu, reĝo! ĉar mi gloras min esti via  
 peteganto."

Tiel li parolis kaj tuj ĉi tiu haltigis sian fluon kaj retenis  
 la ondojn kaj antaŭ li trankvila faris la maron kaj lin savis  
 al la enmariĝo de l'rivero. Ĉi tie li fleksis ambaŭ siajn genuojn  
 teren kaj liaj fortaj manoj malleviĝis teren, ĉar estis lia koro



- 455 venkita de l'maro. Sur sia tuta korpo li ekŝvelis kaj multa marakvo elfluis el liaj buŝo kaj nazo; kaj li kuŝis senmove, senspire kaj senvoĉe, ĉar terura laceco lin ekkaptis. Sed kiam li ree ekspiris kaj lia vivoforto sin ree estis kolektinta, tiam li malligis de sia korpo la vualon de la Diino kaj li faligis ĝin
- 460 en la marenfluantan riveron, kaj returne ĝin portis grandega ondo en sia fluado kaj rapide ĝin ekkaptis Ino per siaj manoj; nun li sin malproksimigis de la rivero kaj kuŝiĝis sub la scirpojn kaj li kisis la grendonan teron kaj senkuraĝiĝinte li diris al sia brava animo:
- 465 „Ve al mi, kion mi suferos? kio do fakte okazos al mi? Se mi maldormos apud la rivero la zorgoplenan nokton, tiam mi timas, ke kune la pereiga prujno kaj la freŝa roso min, apenaŭ spiri povantan, ekkaptos pro mia senforteco; ĉar blovas frumatenene vento malvarma el la direkto de la rivero. Sed se mi grimpos
- 470 al la deklivo kaj la ombroriĉa arbaro kaj tie ekdormos en la densaj arbitaĵoj, se eble min forlasus la malvarmeco kaj laceco kaj la dolĉa dormo proksimiĝus al mi, tiam mi timas ke mi fariĝos la kaptajo kaj viktimo de l'ŝovaĝaj bestoj.”
- Kaj tiel ŝajnis al li, dum li ĝin pripensis, esti plej bone:
- 475 li ekiris al la arbaro; ĉi tiun li trovis apud la fluo sur ĉiuflanke videbla loko; tie li rampis sub du arbitojn, kiuj el unu sama loko kreskis; unu el ili estis de mirto, la alia de olivujo. Nek trablovnis ilin la forto de l'malsekete blovantaj ventoj, nek la suno luma iam ilin trafis per siaj radioj, nek penetris en ilin
- 480 tute la pluvo; tiel dense ili reciproke estis enkreskintaj unu en la alian; sub tiujn nun rampis Oduseus; tuj li nun amasigis per siaj manoj vastan kuŝejon; ĉar abunde granda amaso da folioj tie kuŝis sufiĉe por ŝirmi du aŭ tri virojn en la vintra
- 485 sezono, eĉ se tiu estus malvarmega. Tiun vidante ekĝojis la tolerema dieca Oduseus kaj meze de ĝi li kuŝiĝis kaj amason da folioj li ŝutis sur sin. Kaj kiel kiam brulantan torĉon iu sub nigra cindramaso kaŝas sur la ekstrema parto de l'kampoj, se li ne havas aliajn kiel najbarojn kaj klopodas konservi eron
- 490 de l'fajro, por ke li ne ĝin devu ekbruligi de aliloke: tiel Oduseus sin kaŝis sub la folioj. Post tio Athene al li ŝutis la dormon sur la okulojn, por ke ĉi tiu plej baldaŭ involvu liajn palpebrojn kaj ĉesigu lian penan elĉerpiĝon.
-

## S E S A K A N T O .

## LA ALVENO DE ODUSSEUS ĈE LA PHAIAKOJ.

- Tiel la tolerema dieca Odusseus tie dormis venkite de dormo kaj laceco; Sed Athene iris al la popolo kaj la urbo de l'Phaiakaj viroj; ĉi tiuj antaŭe iam loĝis en la vaste sin etendanta Hupereia
- 5 proksime al la trokuraĝa popolo de la Kiklopoj, kiuj kutimis ilin prirabi, ĉar estis ili pli fortaj. De tie foririgis ilin la disimila Nausithoos kaj li kondukis ilin kaj ekloĝigis ilin sur Scheria, malapude de l'panomangaĝ homoj, kaj li starigis muron
- 10 ĉirkaŭ la urbo kaj konstruis domojn kaj fondis templojn honore al la Dioj kaj disdividis la kampojn. Sed ĉi tiu jam estis, subigite de l'mortodestino, irinta al la loĝejo de Hades kaj tiutempe regis Alkinoos, per la favoro de l'Dioj sperta je prudentgvido.
- 15 Al ties loĝejo nun iris la fajrŝprucokula Diino Athene, projektante la revenon de la grandkuraĝa Odusseus. Rapide ŝi iris al la artplene konstruita dormoĉambro, en kiu dormis la knabino, simila al la Diinoj rilate staturon kaj eksterajon, Nausikaa, la filino de l'grandkuraĝa Alkinoos, kaj dormis ĉe ŝi du servistinoj, kiuj belecon estis ricevintaj de la Charitoj, ambaŭflanke de l'pordokadroj; la brila pordo estis fermita. Tiam ŝi
- 20 rapide kiel la blovo de l'vento ŝvebis al la kuŝejo de la knabino, tie ekstaris kaj sin klinis super ŝian kapon kaj al ŝi parolis, similante la filinon de l'ŝipfama Dumas, kiu samaĝa estis kiel ŝi kaj al ŝia koro estis tre kara. Similante al tiu ŝin alparolis la fajrŝprucokula Athene:
- 25 „Nausikaa, kial do via patrino vin naskis tiel neakurata? Ĉar la briletaj vestaĵoj kuŝas neprizorgitaj kaj jam proksima estas via edziniĝo, kiam vi devos vesti vin mem per belaj vestoj kaj havigi aliajn al tiuj, kiuj vin kondukos en la geedziĝoĉam-
- 30 bron; ĉar pro tio bona famo inter la homoj vastiĝas kaj ĝojas via patro kaj via respektinda patrino. Nu do, ni iru por lavi je la unua mateniĝo kaj mi vin akompanos kiel kunhelpantino por ke vi plej rapide ĉion pretigu, ĉar ne plu longan tempon virgulino vi estos. Jam svatiĝas ja al vi la eminentuloj tra la tuta popolo
- 35 de l'Phaiakoj, kie ankaŭ via generacio havas sian devenon. Sed nu do, instigu vian famkonatan patron, por ke li frumatene mulojn kaj ĉaron pretigu por transporti la zonojn kaj vestojn kaj kovraĵojn briletŝtofaĵn. Ankaŭ por vi mem ja tio estos multe
- 40 pli komforta ol iri piede; ĉar la lavejoj estas malproksimaj de la urbo.”

Tiel parolinte, foriris la fajrŝprucokula Athene al la Olumpos, pri kiu oni diras, ke tie troviĝas la ĉiam neŝancebla restadejo de la Dioj. Nek de l'ventoj ĝi estas skuata, nek iam malsekigata de la pluvoj, nek neĝo ĝin alproksimiĝas, sed ĉie sin etendas  
 45 sennuba klareco kaj brila lumado ĝin ĉirkaŭas. En ĝi la feliĉegaj Dioj ĉiujn tagojn ĝuadas. Tien foriris la fajrŝprucokula, post kiam ŝi estis doninta al la knabino klarajn indikojn.

Tuj nun venis la bele tronanta Eos, kiu la bele vestitan Nausi-  
 50 kaa vekis; tuj ŝi miris pri la sonĝo kaj rapide ŝi iris tra la domo por ĝin komuniki al siaj gepatroj, al sia kara patro kaj sia patrino. Kaj ambaŭ ŝi trovis ene. Ŝia patrino sidis apud la kameno kun siaj servantaj virinoj, movadante la ŝpinfadenon purpuran tien kaj reen; sian patron ŝi renkontis, kiam li iris  
 55 elen al la gloriĉaj eminentuloj por la kunsido, kien la nobelaj Phaiakoj estis lin invitintaj. Ŝi nun ekstaris tre proksime al li kaj diris al sia kara patro:

„Kara paĉjo, ĉu vi ne povus pretigi al mi altan ĉaron kun fortikaj radoj, por ke mi la famajn vestojn, kiuj malpurigintaj kuŝas ĉi tie, transportu al la rivero por ilin lavi? Ankaŭ al  
 60 vi ja decas kun puraj vestoj al la korpo meze de la unuaj el la popolo fari konsilojn. Ankaŭ al vi naskiĝis en via domo kvin amataj filoj, du el ili edziĝintaj, kaj ankoraŭ tri florantaj fraŭloj; ĉi tiuj ja ĉiam volas kun ĵus lavitaj vestoj iri al la dancejo,  
 65 kaj ĉi ĉio estas konfidita al miaj zorgoj.”

Tiel ŝi parolis, ĉar ŝi hontis paroli pri la floranta edziniĝo al sia kara patro. Sed ĉi tiu ĉion komprenis kaj respondis per la vortoj:  
 „Infano, mi nek rifuzas al vi la mulojn nek ion alian. Iru;  
 70 kaj la servistoj al vi pretigos altan ĉaron kun fortikaj radoj, provizitan de supre staranta korbajo.”

Tiel parolinte, li ordonis al siaj servistoj kaj ili obeis. Ĉi tiuj nun ekstere pretigis la muloĉaron kun fortikaj radoj, subjugigis la mulojn kaj ilin jungis al la veturilo. Nun la knabino portis el sia dormoĉambro la brilaĵn vestojn kaj ilin metis  
 75 sur la bele poluritan ĉaron; post tio la patrino en keston metis sufiĉe da manĝaĵo ĉiuspeca kaj ankaŭ almanĝaĵon en ĝin metis kaj enverŝis vinon en sakon kaprinledan — dume la knabino grimpis sur la ĉaron — kaj donis al ŝi en ora boteleto  
 80 mildan olivoleon por sin olei per ĝi kun siaj servantaj virinoj. Fine ŝi kaptis la vipon kaj la briletajn bridojn, kaj ŝi vipis la mulojn por inciti ilin; kaj sonis la trotado de la muloj. Senripoze ili rapidis kaj transportis la vestojn kaj ŝin mem, sed ne ŝin solan; kune kun ŝi ja piediris ŝiaj servistinoj.

- 85 Kiam ili nun estis alvenintaj al la belega fluo de la rivero, kie la ĉiam akvoplenaj lavkavaĵoj estis kaj multa klara akvo el la profundo suprenfluis por purigi eĉ la plej malpuran aĵon, tiam ili maljungis la mulojn el sub la jugoj de la ĉaro. Kaj kelkaj ilin pelis laŭlonge de l'multkirla rivero por manĝi mioldolĉan
- 90 agropiron; sed la aliaj forprenis per la manoj la vestojn de la ĉaro kaj ilin portis en la malluman akvon kaj ilin piedbatadis en la kavaĵoj, vetkonkurante je rapideco. Sed kiam ili estis ilin lavintaj kaj purigintaj de ĉio malpura, tiam ili sternis ilin envice laŭlonge de l'bordo de l'maro, kie plej multe la maro
- 95 elkraĉis sur la firman teron ŝtonetojn. Kaj kiam ili estis sin banintaj kaj sin ŝmirintaj per brileta olivoleo, tiam ili prenis la matenmanĝon apud la bordo de l'rivero; kaj dume la vestoj restis kuŝantaj en la radioj de l'suno por sekiĝi. Sed kiam la servistinoj kaj ŝi mem de l'manĝo estis ĝuintaj, tiam ili for-
- 100 ĵetis siajn vualojn kaj ekludis per la pilko; kaj meze de ili komencis la ludon la blankkubuta Nausikaa. Kiel la sagpafulino Artemis rapidas tra la montaro, ĉu super la longe sin etendantan Taugetos ĉu super la Erumanthon, ĝojante pro la
- 105 kaproj kaj rapidaj cervoj — kaj kune kun ŝi sin amuzas ĉasante la nimfoj, filinoj de l'egidporta Zeus, kaj ĝojas en sia koro Leto; sed ŝi elstaras super ĉiuj je la kapo kaj la vizaĝo kaj facile ŝi estas rekonebla kvankam ĉiuj estas belaj — tiel la virga knabino elstaris inter siaj servistinoj.
- 110 Sed kiam ŝi estis revenonta hejmen, post kiam ŝi estis junginta la mulojn kaj kunfaldinta la belajn vestojn, tiam ion alian elpensis la fajrŝprucokula Diino Athene, nome ke vekigis Oduseus kaj vidos la belvizaĝan knabinon, kiu lin gvidos al la
- 115 urbo de l'Phaiakaj viroj. La reĝidino ĝuste ĵetis al iu servistino la pilkon, sed ŝi maltrafis la servistinon kaj ĵetis ĝin en la profundan akvoturniĝon; pro tio ili laŭte kriis, kaj la dieca Oduseus vekigis kaj eksidante li pripensis en sia animo kaj sia spirito:
- „Ve al mi! En la lando de kiuj mortidevuloj mi ĉi tiun fojon
- 120 alvenis? Ĉu ili estas trokuraĝaj kaj sovaĝaj kaj nejustaj, aŭ ĉu ili estas gastamaj kaj havas direspektan animon? Ĉar min ĉirkaŭsonis kriadado virina kiel de knabinoj, [kiel de nimfoj kiuj loĝas sur la krutaj suproj de la montoj kaj en la fontoj de
- 125 l'riveroj kaj sur la herboriĉaj paŝtejoj]. Ĉu do eble mi estas proksima al voĉohavaj homoj? Sed mem mi tion esploru kaj vidu.”
- Tiel parolinte la dieca Oduseus sin levis el sub la arbetoj, kaj per forta mano li rompis el la densa foliaro bastonon kun folioj por kovri antaŭ la korpo sian viran pubon. Tiam li ekiris,

- 130 kiel, fidante al sia forto, en la montaro elkreskinta leono, kiu tra pluvo kaj vento iras, kaj liaj okuloj estas flamaj; kaj li persekutas bovojn aŭ ŝafojn aŭ sovaĝajn cervojn; aŭ lia malsata stomako lin devigas atakante ŝafojn eĉ penetri en fortikan stalon:
- 135 tiel ankaŭ Oduseus intencis sin direkti inter la knabinojn kun belaj harligoj, kvankam li estis nuda; ĉar urĝa bezono venis al li. Abomena li aperis al ili kaj aĉiĝinta de la marakvo, kaj ili treme forkuris en ĉiujn direktojn al la maren elstaranta bordo. Nur la filino de Alkinoos restis; ĉar Athene enirigis en
- 140 ŝian animon kuraĝon kaj forprenis la timon el ŝiaj membroj. Si restis staranta kontraŭe de li; sed Oduseus pripensis, ĉu li ĉirkaŭprenante la genuojn de l'belvizaga knabino ŝin petegos, ĉu nur malapude starante, per afablaj vortoj [li petegos ĉu ŝi bonvolos indiki la vojon al la urbo kaj doni vestojn]. Kaj
- 145 tiel ŝajnis al li, dum li ĝin pripensis, esti plej bone: malapude restante per afablaj vortoj ŝin petegi, por ke la knabino ne koleriĝu kontraŭ li, kiam li ĉirkaŭprenus ŝiajn genuojn. Tuj li nun eldiris per ruzecan parolon:
- „Urĝe mi petegas vin, reĝulino! Ĉu Diino vi estas aŭ morti-
- 150 devulino? Se vi iu Diino estas kiaj enloĝas la vastan ĉielon, tiam mi vin komparas pleje kun Artemis, la filino de l'granda Zeus, rilate la eksterajon kaj grandecon kaj staturon; sed se vi estas iu el la mortidevulinoj, kiuj loĝas sur la tero, tiam trioble feliĉaj estas via patro kaj via honorinda patrino, trioble feliĉaj
- 155 viaj fratoj; ĉar certe ilia koro ĉiam ĝojvarmiĝas pro feliĉo pri vi, kiam ili tian prosperan virgulinon iri al la dancejo vidas. Sed tamen tiu estos multe plej feliĉega super la aliaj, kiu, vin akirinte per edziĝdonacoj, kiel edzinon vin kondukos al
- 160 sia hejmo. Ĉar ankoraŭ neniam mi vidis per la okuloj tian mortidevulon, nek viron nek virinon; respekto min ekkaptas kiam mi alrigardas vin. En Delos mi iam apud la altaro de Apollon vidis suprenkreski same belan junan branĉon de daktilujo — ĉar ankaŭ tien mi venis kaj min sekvis multaj viroj
- 165 je tiu vojaĝo en kiu estis por mi destinite, ke min trafos teruraj malfeliĉoj — kaj sammaniere mi longan tempon miregis en mia animo tiun alrigardante, ĉar ankoraŭ neniam tia trunko kreskis el la tero, kiel mi nun, ho virino, vin admiras kaj primiras kaj ege nekuraĝas ĉirkaŭpreni viajn genuojn, kvan-
- 170 kam terura malĝojo trafis min. Hieraŭ, la dudekan tagon, mi elsaviĝis el la vinkolora maro; ĝis tiam min ĉiam portis la ondoj kaj la rapidaj ventegoj for de l'insulo Ogugia. Sed nun demono min jetis ĉi tie sur la bordon, por ke mi eble ankaŭ

ĉi tie ankoraŭ suferu malbonon; ĉar mi ne kredas, ke la malfeliĉoj ĉesos, sed ankoraŭ multajn okazigos antaŭe la Dioj.

175 Sed tial kompatu, reĝulino; ĉar multajn malfeliĉojn trasuferinte, mi unue min turnis al vi por helpo, ĉar mi konas neniun el la aliaj homoj, kiuj ĉi tiujn urbon kaj landon enloĝas. Indiku al mi la vojon al la urbo kaj donu al mi ĉifonon por min involvi, se eble vi havis, ĉi tien venante, involvilon por viaj vestoj.

180 Kaj ke la Dioj donu al vi kiom vi deziras en via animo, edzon kaj domon, kaj ili donacu al vi bonegan harmonion; ĉar vere nenio estas pli belega kaj pli bona, ol kiam en unuanimeco la domon mastrumas edzo kaj edzino je granda ĉagreno por malbonanimuloj, sed je ĝojo por noblanimuloj; kaj la Dioj mem

185 volonte plenumas iliajn petojn."

Lin siavice alparolis la blankkubuta Nausikaa:

„Fremdulo — ĉar vi nek similas al malbona nek al stulta homo — la Olumpa Zeus dividas mem la feliĉon inter la homoj, al bonaj kaj malbonaj, al ĉiu kiel al li plaĉas; ankaŭ al vi li

190 nepre donis vian sorton kaj spite al ĉio vi devas ĝin toleri. Sed ĉar vi nun atingis nian urbon kaj nian landon, tial al vi mankos nek la vestoj nek io alia, kion laŭkonvene devas ricevi sortbategita peteganto, kiun oni renkontas. Ankaŭ mi montros al vi la urbon kaj diros la nomon de nia popolo. La

195 Phaiakoj loĝas en ĉi tiu urbo kaj en ĉi tiu lando, kaj mi filino estas de l'grandanima Alkinoos, kaj de tiu dependas la forto kaj potenco de la Phaiakoj."

Tiel ŝi parolis kaj ŝi ordonis al siaj servistinoj kun belaj harligoj:

„Haltu vi do, servistinoj! Kien vi forkuras vidante viron?

200 Vi ja ne opinias, ke li estas iu malbonintenca viro? Ĉi tiu viro ne estas timinda mortidevulo, kaj tia viro ne naskiĝos, kiu kun malamikaj intencoj venos en la landon de la Phaiakoj, ĉar ege karaj estas ili al la senmortuloj. Krome ni loĝas forizolite en la multmoviĝanta maro, tute je la ekstremo, kaj neni

205 alia el la mortidevuloj nin vizitas. Sed ĉi tiu kiel malfeliĉa vagadanto venis ĉi tien kaj tiun ni devas nun flegi. Ĉar de Zeus senditaj estas ĉiuj fremduloj kaj mizeruloj, kaj donaco eĉ malgranda tamen estas bonvena. Tial vi donu, servistinoj,

210 al la fremdulo manĝon kaj trinkon kaj lin banu en la rivero, kie loko estas ŝirmita kontraŭ la vento."

Tiel ŝi parolis kaj ili haltis kaj sin reciproke kuraĝige alvokis; kaj ili irigis Odusseus al ŝirmita loko, kiel estis ordoninta Nausikaa, la filino de l'grandanima Alkinoos; kaj



flanke de li mantelon kaj subveston ili metis kiel vestaĵojn  
 215 kaj donis al li en ora boteleto mildan oliveleon kaj lin invitis  
 bani sin en la fluo de l'rivero. Tiam do meze de la servistinoj  
 parolis la dieca Oduseus:

„Servistinoj, tiel starigu malapude, por ke mi mem de miaj  
 ŝultroj lavu for la salecajn malpuraĵojn kaj min tute enŝmiru  
 220 per oliveleo; ĉar vere jam longan tempon mankas al mia haŭto  
 la ŝmiraĵo. Sed antaŭ viaj okuloj mi ne volus bani min; ĉar  
 mi hontas min nudigi en ĉeesto de knabinoj kun belaj harligoj.”

Tiel li parolis kaj ili flankeniris kaj ĝin diris al la knabino.  
 Sed post tio la dieca Oduseus lavpurigis per la akvo de la  
 225 rivero sian haŭton de la salecaj malpuraĵoj, kiuj kovris lian  
 dorson kaj liajn larĝajn ŝultrojn kaj forviŝis de sia kapo la  
 sekigitan ŝaŭmon de la senĉese ondanta maro. Sed kiam li  
 estis sin tute lavinta kaj brilete sin oleinta kaj estis almetinta la  
 vestojn, kiujn al li doninta estis la ĉasta virgulino, tiam Athene,  
 230 la filino de Zeus, lin faris pli granda kaj pli dika je la aspekto  
 kaj lasis de lia kapo dependi lanecajn harojn, similajn al la  
 floraro de la hiacinto. Kiel kiam oron en arĝenton enka-  
 drigas artkapabla viro, kiun Hephaistos kaj Pallas Athene  
 instruis en ĉia arto — kaj tial li fabrikas graciajn laboraĵojn —  
 235 tiel ŝi etendis graciecon super lian kapon kaj liajn ŝultrojn.  
 Post tio li sidiĝis aparte sur la bordo de la maro, briletante  
 pro beleco kaj gracio; kaj mirrigardis lin la knabino. Tiam  
 ŝi parolis meze de siaj servistinoj kun belaj harligoj:

„Aŭdu vi min, ho blankkubutaj servistinoj! por ke mi ion  
 240 al vi diru. Ne kontraŭ la volo de ĉiuj Dioj, kiuj sur la Olumpos  
 loĝas, venis ĉi tiu viro inter la disimilaj Phaiakoj. Antaŭe  
 li ja al mi ŝajnis esti malbelforma, sed nun li similas la Diojn,  
 kiuj la vastan ĉielon enloĝas. Ho, ke tia viro, ĉi tie loĝante,  
 245 estus nomata mia edzo, kaj ke plaĉus al li ĉi tie resti. Sed donu  
 vi nun, ho servistinoj, al la fremdulo manĝon kaj trinkon.”

Tiel ŝi parolis kaj ili volonte je ŝi aŭskultis kaj obeis kaj  
 metis antaŭ Oduseus manĝon kaj trinkon. Kaj trinkis kaj manĝis  
 la persistema dieca Oduseus, rapide, ĉar longan tempon li  
 250 estis neĝuinta dieca nutraĵon. Sed la blankkubuta Nausikaa pripensis  
 ion alian: kunfaldinte la vestaĵojn ŝi metis ilin sur la belan  
 ĉaron, jungis la forthufajn mulojn kaj surĉariĝis mem. Post  
 tio ŝi instigis Oduseus kaj diris la vortojn kaj parolis:

255 „Leviĝu nun, fremdulo, por iri urben, por ke mi vin konduku  
 al la domo de mia inteligenta patro, kie, mi ĝin al vi certigas,  
 vi ekkonos ĉiujn, kiuj plej eminentaj estas inter la Phaiakoj.



- Sed ĉiukaze jene agu — ĉar ŝajnas al mi ke vi ne malprudentas —: dum ni iros tra la kampoj kaj la kulturitaj lokoj, vi iru
- 260 rapide kune kun la servistinoj post la muloj kaj la veturilo. Sed mi gvidante antaŭiros sur la vojo. Sed tuj kiam ni enpaŝos en la urbon, ĉirkaŭ kiu turmohava alta muro estas, kaj sin trovas bela haveno ambaŭflanke de la urbo, sed mallarĝa estas la urbaliro kaj ambaŭflanke kurbigitaj ŝipoj estas tiregitaj sur
- 265 la teron laŭlonge de l' strato, ĉar por ĉiu el la Phaiakoj tie estas ŝipstarloko. Tie ankaŭ kuŝas ilia kunvenejo, ĉirkaŭ la bela templo de Poseidon, provizita per kuntrenitaj ŝtonoj enfositaj en la teron. Tie ankaŭ prizorgas ili la rigilaron de la nigraj ŝipoj, ŝnuregojn kaj velojn, kaj glatigas la remilojn. Ĉar al
- 270 la Phaiakoj nek la arkpaŭlo plaĉas nek la sagujo, sed nur la mastoj kaj remiloj kaj proporcie konstruitaj ŝipoj, per kiuj ili fierante trairas la grizkoloran maron. Mi volas eviti la kladadon malestiman de ili, por ke ne poste iu min riproĉu — ĉar estas homoj ege trokuraĝaj inter la popolo — kaj eble iu
- 275 malaltrungulo, renkontante nin, parolos tiamaniere:  
 „Kia fremdulo, bela kaj granda, tie venas post Nausikaa? Kie ŝi lin trovis? Certe li iĝos ŝia edzo. Eble ŝi kunprenis iun vagadanton el lia ŝipo, iun el malproksima popolo, ĉar estas neniuj najbaraj al ni. Aŭ eble iu arde alvokita Dio venis pro ŝia preĝado el la ĉielo suben kaj ŝin ĉiujn tagojn havos kiel edzinon. Estus ankoraŭ pli bone, se ŝi mem, por edzo serĉirante, lin trovus alilande, ĉar malestimas ŝi ja la Phaiakojn ĉi tieajn, kiuj svatiĝas al ŝi multnombraj kaj noblaj.”
- 285 Tiel ili parolos, sed tio por mi estus malhonoro. Ĉar ankaŭ alian virinon mi malŝatas, kiu tiajn agojn faras kaj kiu kontraŭ la volo de tiuj, kiuj ŝin amas kaj dum ŝiaj patro kaj patrino ankoraŭ vivas, interrilatas kun viroj antaŭ ol okazis la publika geedziĝo. Aŭskultu do rapide je miaj vortoj, ho fremdulo,
- 290 por ke vi ekhavu plej baldaŭ de mia patro akompanon kaj revenon. Vi trovos apud la vojo belegan sanktarbaron de poploj je la honoro de Athene. En ĝia interno fluas fonto kaj ambaŭflanke de ĝi troviĝas herbejo; tie ankaŭ kuŝas la kronbieno de mia patro kaj floranta vinbergardeno, nur tiel malproksime de la urbo, ĝis kie resonas la voĉo de vokanto. Tie sidigu kaj
- 295 restu kelkan tempon, ĝis kiam ni estos atingintaj la urbon kaj alvenintaj en la domo de mia patro. Sed kiam vi supozos, ke ni la domon atingis, tiam iru al la urbo de la Phaiakoj kaj demandu pri la domo de mia patro, la grandanima Alkinoos. Ĝi estas ja
- 300 facile rekonebla; eĉ neparolkapabla infaneto povus esti via

- gvidanto, ĉar neniel iu domo de la Phaiakoj al ĝi similas aŭ estas tia, kia la domo de la heroo Alkinoos. Sed kiam vi estos en la domo kaj en la antaŭkorto, tiam tre rapide iru tra la
- 305 porviran ĉambregon, ĝis kiam vi venos ĉe mia patrino. Ŝi sidas apud la kameno en la lumo de la fajro, movadante la ŝpinfadendon purpuran tien kaj reen, — mirindaĵo vidi ĝin! — kaj ŝi kliniĝas kontraŭ la kolono; kaj sidas ŝiaj servistinoj post ŝi. Tie ankaŭ la trono de mia patro kontraŭ la sama kolono staras, en kiu li sidante vinon trinkas, simila al senmortulo.
- 310 Preterirante lin vi ĉirkaŭprenu per la manoj la genuojn de nia patrino, por ke vi baldaŭ vidu ĝojante la tagon de la reveno, eĉ se vi loĝas ege malproksime. [Se ŝi en sia koro bonvolece pri vi pensos, tiam por vi ekzistas la espero revidi viajn karulojn
- 315 kaj atingi vian bele konstruitan domon kaj la landon de viaj prapatroj.]”

Tiel parolinte ŝi vipis per la brila vipo la mulojn; kaj ili rapide forlasis la fluantan akvon de la rivero; kaj ili bone kuris kaj bone paŝrapidis per la piedoj. Sed forte ŝi bridadis ilin, por ke

320 la servistinoj kaj Oduseus povu sekvi piede; kaj prudente ŝi subenirigis la vipŝnuron sur la mulojn. La suno malleviĝis kaj ili nun atingis la famkonatan sanktarbaron, dediĉitan al Athene, kie la dieca Oduseus sidiĝis. Tuj post tio li preĝis al la filino de la granda Zeus:

- „Aŭdu min, filino de l'egidporta Zeus! nesubigebla Diino!
- 325 Plenumu almenaŭ nun al mi, ĉar vi antaŭe neniam plenumis miajn preĝojn, kiam estis frakasata mia ŝipo kaj kiam ŝiprompulo faris min la famkonata tertremigulo. Donu ke mi venu inter la Phaiakojn kiel amiko kaj kompatindulo.”

- [Tiel li parolis preĝante kaj lin aŭdis Pallas Athene. Sed ankoraŭ ne malkaŝe ŝi aperis antaŭ li, ĉar respektis ŝi la fraton
- 330 de sia patro; ĉi tiu ja terure koleradis kontraŭ la disimila Oduseus antaŭ ol li estis atinginta sian landon.)

## SEPA KANTO.

## LA ALVENO DE ODUSSEUS ĈE ALKINOOS.

Tiel preĝis tie la tolerema dieca Odusseus kaj dume la knabino kondukis al la urbo la fortajn mulojn. Kiam ŝi atingis la glorriĉan domon de sia patro, tiam ŝi haltis apud la antaŭpordego  
 5 kaj ŝiaj fratoj, egalantaj la senmortulojn, stariĝis ĉirkaŭ ŝin kaj maljungis de la veturilo la mulojn kaj portis la vestojn enen. Sed ŝi mem al sia dormoĉambro iris; tie por ŝi fajron ekbruligis la maljuna ĉambristino el Apeira, Eurumedousa, kiun iam estis kunportintaj la ŝipoj ambaŭflanke kurbigitaj  
 10 el Apeira. Por Alkinoos ŝin estis elektintaj ili kiel honorigajon, pro tio ke li la reĝo estis super ĉiuj Phaiakoj kaj la popolo aŭskultis je li kvazaŭ je Diaĵo. Ĉi tiu kutimis zorgi pri la blankkubuta Nausikaa en la domo. Ĉi tiu por ŝi fajron ekbruligis kaj ene preparis la vespermanĝon.

Kaj tiam leviĝis Odusseus por iri al la urbo; sed densan  
 15 nebulon nun disŝutis Athene, bonvolece pensante pri Odusseus, por ke ne iu el la grandanimaj Phaiakoj, renkontante lin, per vortoj lin insultu kaj demandu, kiu li estas. Sed kiam li estis enironta la urbon agrable kuŝantan, tiam venis renkonte al  
 20 li la fajrŝprucokula Diino Athene, similante virgan knabinon portantan akvokruĉon. Kaj ŝi haltis antaŭ li kaj la dieca Odusseus demandis:

„Infano, ĉu vi ne povus gvidi min al la domo de Alkinoos, de la viro kiu estas la reĝo super ĉi tiuj homoj? Ĉar mi ĉi tie  
 25 alvenis kiel sortbategita fremdulo, de malproksime el malapuda lando; tial mi konas neniun el la homoj, kiuj ĉi tiujn urbon kaj kampojn enloĝas.”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Certe mi montros al vi, fremdulo kaj patro, la domon kiun vi deziras, ĉar ĝi kuŝas proksime al la domo de mia propra patro  
 30 neriproĉebla. Sed tiel nun iru silente pluen — kaj mi dumvoje antaŭiros — kaj alrigardu neniun el la homoj kaj ne demandu. Ĉar ĉi tiuj ne volonte toleras fremdajn homojn, nek ili gastame bonvenigas kaj ricevas tiun, kiu de aliloke venis. Sed fidante  
 35 al siaj rapidaj, facilmovaj ŝipoj ili transveturas la grandan marprofundon, ĉar tion permesis al ili la tertremigulo; rapidaj estas iliaj ŝipoj kiel flugilo aŭ ekpenso.”

Tiel parolinte rapide antaŭiris Pallas Athene kaj li sekvis

la paŝojn de la Diino; sed lin ne rimarkis la ŝipfamaj Phaiakoj  
 40 dum li iris tra la urbo kaj meze de ili; ĉar ne permesis tion  
 Athene kun belaj harligoj, la respektinda Diino, kiu, bonvolece  
 pensante pri li en sia koro, mirindan nebulon nun disŝutis super  
 lin. Admiris nun Oduseus la havenojn kaj la proporcie konstrui-  
 tajn ŝipojn, la kunvenejojn de la herooj kaj la longajn, altajn  
 45 urburegojn, provizitajn je palisaroj, mirindaĵon por la aspekto.  
 Sed kiam ili alvenis al la gloriĉa domo de la reĝo, tiam komencis  
 paroli inter ili ambaŭ la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Jen, fremdulo estiminda! la domo, kiun vi al mi petis  
 montri. Vi tie trovos la de Zeus edukitajn reĝojn, dum ili estas  
 50 ĝuantaj la manĝon. Sed vi nun enen iru kaj neniel timu en via  
 koro. Energia viro ja estas taŭga en ĉiuj aferoj, eĉ se li venas  
 de ie aliloke. Unue vi devos vin turni al la reĝino en la loĝo-  
 ĉambro; Arete estas la nomo per kiu ŝi estas nomata, kaj ŝi  
 55 devenas el la samaj pragepatroj, el kiuj ankaŭ devenis la  
 reĝo Alkinoos. Nausithoos unue vivigis la tertremigulo  
 Poseidon kaj Periboia, laŭ staturto la plej bela inter la virinoj,  
 la plej juna filino de l' grandanima Eurumedon, kiu iam estis  
 la reĝo super la trokuraĝaj Gigantoj. Sed ĉi tiu pereigis la  
 60 popolon malbonfaran kaj ankaŭ mem pereis. Kun ŝi do ame sin  
 kunigis Poseidon kaj li naskigis filon, la grandaniman Nausi-  
 thoos, kiu regis super la Phaiakoj. Nausithoos naskigis Rexenor  
 kaj Alkinoos. La unuan trafis Apollon, la Dio kun arĝenta ark-  
 pafilo, dum li estis senfila kaj ankoraŭ juna edzo, kaj nur unu  
 65 filinon li postlasis: Arete. Ĉi tiun tiam faris Alkinoos sia edzino  
 kaj li honoris ŝin kiel sur tero neniu alia virino estas honorata  
 el ĉiuj, kiuj la domon mastrumas sub la estreco de l'edzoj.  
 70 Tiel ŝi estas kaj restas tutkore honorata de siaj karaj infanoj  
 kaj de Alkinoos mem kaj ankaŭ de la gentoj, kiuj, ŝin alri-  
 gardante kvazaŭ Diinon, ŝin salutas per afablaj vortoj, kiam  
 ŝi iras tra la urbo. Ĉar neniel mankas al ŝi mem spirito nobla  
 kaj per la solvoj, kiujn ŝi elpensas juste, ŝi forigas malpacojn eĉ  
 75 inter la viroj. Se ŝi en sia koro bonvolece pri vi pensos, tiam  
 por vi ekzistas la espero revidi viajn karulojn kaj atingi vian  
 bele konstruitan domon kaj la landon de viaj prapatroj.”

Tiel parolinte foriris la fajrŝprucokula Athene super la  
 senripoze ondantan maron kaj ŝi forlasis la ĉarman Scheria kaj  
 80 ŝi atingis Marathon kaj la larĝastratan Athenai kaj eniris la  
 fortikan domon de Erechtheus.

Sed Oduseus iris al la famkonata palaco de Alkinoos; sed  
 multon pripensis lia koro dum li haltis, antaŭ ol li paŝis trans

- la kupran sojlon. Ĉar estis brilo kvazaŭ de suno aŭ luno tra la  
 85 alttegmenta palaco de l'grandkuraĝa Alkinoos. Kupraj muroj  
 estis ĉiuflanke konstruitaj, de la sojlo ĝis la malantaŭa parto  
 kaj supre ilin ĉirkaŭis kornico de blua glazuro; oraj pordoj  
 fermis interne la fortikan domon; arĝentaj pordokadroj staris  
 90 sur la kupra sojlo, arĝenta estis ankaŭ la transversa trabo sur  
 la kadroj kaj ora la pordoringo. Ambaŭflanke staris oraj kaj  
 arĝentaj hundoj, kiujn Hephaistos estis fabrikinta per artos-  
 perta spirito, por gardadi la loĝejon de la grandkuraĝa Alkinoos,  
 [ĉar ili estis ja senmortaj kaj ĉiam nemaljuniĝaj]. Ene  
 95 staris firme kontraŭ la muro ĉiuflanke seĝoj, en senfina vico  
 de la sojlo ĝis la malantaŭa parto, sur kiuj delikataj, bele  
 teksitaj tukoj estis sternitaj, la artlaboraĵo de virinoj. Tie do  
 kutimis sidi la ĉefuloj de la Phaiakoj, [trinkante kaj manĝante,  
 100 ĉar ĉion ili ĉiam abunde ricevis]. Plue tie staris sur bele kon-  
 struitaj altaroj oraj knaboj, portantaj brulantajn torĉojn en la  
 manoj kaj vespere lumantaj tra la domo por la gastoj. [Kvindek  
 servistinojn li posedis en sia domo kaj kelkaj el ili muelas en  
 105 la muelilo la pomkoloran grenofrukton, aliaj teksas per la  
 teksilo kaj ŝpinas lanfadenojn, kune sidante kiel la folioj de  
 l'altkreska poplo; de la dense ĉenstebita tolaĵo defluas malseka  
 olivoleo. Kiom la Phaiakoj super ĉiuj viroj estas lertaj veturigi  
 la rapidan ŝipon sur la maro, tiom artospertaj estas la virinoj  
 110 rilate la ŝpinadon; ĉar supermezure donis al ili Athene la konon  
 pretigi belegajn laboraĵojn kaj ankaŭ bonan intelekton. Ekster  
 la antaŭkorto troviĝas apud la pordego vasta ĝardeno, granda  
 je kvar arpentoj; ĉiuflanke estas konstruita ĉirkaŭ ĝi barilo.  
 115 Tie kreskas altaj abunde florantaj arboj, pirujoj kaj granatuloj  
 kaj fruktbelegaj pomujoj, kaj ankaŭ dolĉaj figuoj kaj abunde  
 florantaj olivujoj. Neniam la frukto de tiuj pereas aŭ forrestas,  
 nek dum vintro nek somere, sed la tutan jaron estas fruktoj.  
 Sed la blovetado de la okcidenta vento ekkreskigas senĉese  
 120 unujn fruktojn kaj maturigas aliajn; piro post piro iĝas matura  
 kaj pomo post pomo kaj ankaŭ vinbero post vinbero kaj figo  
 post figo. Tie ankaŭ ekĝermis por li multfrukta vinber-  
 ĝardeno, de kiu unu parto, la sekigejo, sur ebena loko estas  
 sekigata de la suno, kaj en alia parto oni rikoltas la vinberarojn  
 125 kaj piedpremeas aliajn; je la antaŭflanko pendas ankaŭ nema-  
 turaj vinberaroj, kiuj jam faligas la floraĵojn, kaj denove aliaj  
 jam malheliĝas. Tie plue kreskas post la malantaŭa vico da  
 vinberujoj envicigitaj legombedoj ĉiuspecaj, la tutan jaron  
 freŝverdantaj. Ankaŭ tie estas du fontoj: unu tra la tuta ĝardeno

ἄλλοι ποσειδάων  
 ἰσοδότηται  
 ἄλλοι ἰσοδότηται  
 ἄλλοι ἰσοδότηται  
 ἄλλοι ἰσοδότηται

disvastigas sian akvon, sed la alia el la kontraŭa direkto  
 130 fluas sub la sojlon de la antaŭkorto al la alta domo, kaj el tiu akvon ĉerpas la urbanoj]. Tiaj belegaj donacoj de la Dioj estis en la palaco de Alkinoos.

Tie haltis kaj admiris la tolerema dieca Oduseus; sed kiam  
 135 li estis ĉion admire pririgardinta en sia animo, tiam li rapide paŝis trans la sojlon en la domon. Tie li trovis la ĉefulojn kaj regantojn super la Phaiakoj, verŝoferantaj el pokaloj honore al la akrevida Argusmortiginto, al kiu ili kutimis laste verŝoferi kiam ili pensis pri enlitiĝo. Sed li transiris la domon, la tolerema dieca Oduseus, ĉirkaŭata de densa nebulo, kiun estis Athene ĉirkaŭ lin ŝutinta, ĝis kiam li alvenis al Arete kaj al la reĝo Alkinoos; tie la brakojn streĉis Oduseus ĉirkaŭ la genuojn de Arete, kaj nur tiam fortiriĝis de li la de la Diino kaŭzita nebulo. Ĉiuj silentaj estiĝis tra la tuta ĉambrego, vidante la viron kaj  
 145 ili miris ĉe la aspekto. Sed Oduseus ŝin petegis:

„Arete, filino de l'disimila Reksenor, mi venas al via edzo kaj viaj genuoj kiel peteganto, multe trasuferinte, kaj ankaŭ al ĉi tiuj viaj gastoj; la Dioj donu al vi feliĉon dum via vivo kaj ĉiu al siaj infanoj posedaĵojn postlasu en sia domo, kaj la  
 150 honorigon, kiun la popolo al li donis. Sed havigu al mi mem akompanantojn por atingi mian patrujon, baldaŭ, ĉar jam longan tempon mi suferas malfeliĉojn malproksime de miaj karuloj.”

Tiel parolinte li sidigis apud la kameno en la polvon, flanke de la fajro; kaj ĉiuj restis senbrujaj kaj silentis. Fine tamen meze  
 155 de ili parolis la maljuna heroo Echeneos, kiu estis la plejaĝulo inter la Phaiakaj viroj kaj superis je la parolado, ĉar malnovan kaj riĉan sperton li posedis: ĉi tiu bonvole ekparolis en la kunveno kaj diris meze de ili:

„Alkinoos, nenial estas tio laŭdinda, nek konvenas, ke la  
 160 fremdulo sidas surtere apud la kameno en la polvo; la aliaj ja retenas sin, atendante vian decidon. Nu do, ekstarigu la fremdulon kaj tiam lin sidigu en arĝentnajlan apogseĝon, kaj ordonu al la heroldoj denove kunmiksi la vinon, por ke ni ankaŭ  
 165 verŝoferu al la fulmojetegulo Zeus, kiu protekte akompanas respektindajn petegantojn. Ankaŭ donu la mastrumistino al la fremdulo vespermanĝon el tio, kio estas ene proviza.”

Sed kiam tion aŭdis la forta kuraĝa Alkinoos, tiam li prenis la inteligentan elpenseman Oduseus je la mano, lin foririgis de la kameno kaj sidigis sur briletan apogseĝon, el kiu li ekstarigis  
 170 sian filon, la bataleman Laodamas, kiu sidis je lia flanko, ĉar plej multe li amis ĉi tiun. Post tio alportis servistino en



bela, ora kruĉo akvon, ĝin elverŝis super arĝenta pelvo sur liajn manojn por ilin purigi, kaj metis antaŭ lin glatpoluritan  
 175 tablon. Kaj la honorinda mastrumistino alportis panon kaj ĝin metis antaŭ lin, post kiam ŝi estis ankoraŭ multajn aliajn manĝaĵojn surmetinta, ĉar volonte ŝi donis el la provizo. Nun trinkis kaj manĝis la tolerema dieca Oduseus. Kaj tiam alparolis la forta Alkinoos sian heroldon:

„Pontonoos, plenigu la vinmiksujon kaj disdonu vinon al  
 180 ĉiuj tra la ĉambrego, por ke ni ankaŭ verŝoferu al la fulmojete-gulo Zeus, kiu protekte akompanas la respektindajn petegantojn.”

Tiel li parolis kaj Pontinoos miksis la mioldolĉan vinon kaj ĝin disdonis al ĉiuj post kiam li estis enverŝinta iom da vino en la pokalojn por la verŝoferado. Sed kiam ili estis verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom deziris ilia koro, tiam ekparolis  
 185 en la kunveno Alkinoos kaj diris meze de ili:

„Aŭdu, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj, por ke mi eldiru, kion inspiras la koro en mia brusto. Vi nun post finiĝo de l'manĝo iru hejmen kaj tie dormu, sed morgaŭ frumatene, kunvokinte la plejaĝulojn pli multnombre, ni gastame regalos la fremdulon en la loĝoĉambro kaj ni oferdonos  
 190 al la Dioj belajn oferaĵojn, kaj plue ankaŭ pensos pri akompanantoj por li, por ke la fremdulo sen peno kaj malfeliĉo sub nia akompano atingu rapide kaj ĝojante la landon de siaj prapatroj, eĉ se ĝi ege malproksime kuŝas, kaj por ke li ne suferu dume malbonon kaj ĉagrenon, antaŭ ol surpaŝi sian landon; tie li poste suferos kiom al li la sorto kaj la grava destino de la ŝpinistinoj ŝpinis en la estiĝanta fadeno, kiam lin naskis lia patrino. Sed se iu el la senmortuloj el la ĉielo al ni  
 200 venis, tiam ja ion alian la Dioj per tio intencas. Ĉar alie la Dioj ĉiam aperas videblaj al ni, kiam ni oferas al ili gloriĉajn hekatombojn, kaj manĝas kun ni sidante sur la sama loko kie ankaŭ sidas ni; kaj se iu vojaĝanta sole ilin renkontas, 205 tiam neniel ili kaŝas sian diecon, ĉar parencaj estas ni al ili, same kiel la Kiklopoj kaj la sovaĝaj gentoj de l'Gigantoj.”

Lin respondante parolis post tio la ruzega Oduseus:

„Alkinoos, vi havu alian opinion en via animo; mi ja ne similas al la senmortuloj, kiuj enloĝas la vastan ĉielon, nek  
 210 rilate la staturon nek rilate la kreskon, sed al homoj mortidevaj. Kiujn vi el la homoj konas, kiuj plej ege suferas mizeron, kun tiuj mi povus min kompari rilate al miaj doloroj. Kaj eĉ mi povus rakonti ankoraŭ pli gravajn malfeliĉojn, kiom da malbonoj



- ĉiujn kune mi jam suferis laŭ la decido de la Dioj. [Sed lasu vi  
 215 nun min, kiom ajn mi ĉagreniĝas, vespermanĝi: nenio alia  
 estas ja pli senhonta kompare kun la malaminda stomako,  
 kiu devigas eĉ la ege turmentatan kaj en sia animo doloron  
 havantan homon kontraŭ sia volo pri ĝi pensi, same kiel ankaŭ  
 220 mi nun en mia animo doloron havas, sed ĝi senĉese min devigas  
 manĝi kaj trinki kaj forgesigas al mi ĉion, kiom mi suferis  
 kaj ĝi ordonas al mi plenumi ĝiajn postulojn.] Sed vi favore  
 interkonsilu je la komenciĝo de l'aŭroro, kiel vi min, mizerulon,  
 post kiam mi multon trasuferis, igos eksurpaŝi mian patrujon.  
 Ke eĉ la vivo min forlasu, se mi nur estos vidinta mian havaĵon  
 225 kaj la servistojn kaj mian alttegmentan, grandan loĝejon.”  
 Tiel li parolis kaj ĉiuj ĝin aprobis kaj insistis ke oni lasu  
 iri la fremdulon, ĉar laŭdece li parolis. Sed kiam ili estis  
 verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom deziris ilia koro, tiam ili  
 230 iris ĉiu al sia propra domo dormdezirante. Sed la dieca Oduseus  
 postrestis en la loĝĉambrego kaj sidis flanke de li Arete kaj la  
 disimila Alkinoos, dum la servistinoj forordigis la ilaron de  
 la manĝo. Nun komencis paroli meze de ili la blankkubuta  
 Arete, ĉar ŝi estis rekoninta, kiam ŝi ilin vidis, la mantelon  
 235 kaj la subveston, la belajn vestojn kiujn ŝi estis mem farinta  
 kun siaj servistinoj; kaj lin alparolante ŝi diris al li la flugil-  
 havajn vortojn:  
 „Fremdulo, ĉi tion mi volas mem unue demandi al vi:  
 kiu kaj de kie inter la popoloj vi estas? kiu al vi donis tiujn  
 vestojn? Ĉu vi ne diris, ke vi vagadante sur la maro ĉi tie  
 alvenis?”  
 240 Sin respondante parolis post tio la ruzega Oduseus:  
 „Estus malfacile, reĝino, detale al vi rakonti miajn mal-  
 feliĉojn, ĉar multajn donis al mi la ĉielaj Dioj; sed ĉi tion  
 mi diros al vi, pri kio vi demandas kaj esploras: kuŝas iu insulo,  
 245 Ogugia, malproksime en la maro, kie loĝas la filino de Atlas,  
 la ruzema Kalupso kun belaj harligoj, la timinda Diino; kaj  
 neniu kun ŝi rilatas, nek el la Dioj nek el la mortidevaj homoj.  
 Sed min, malfeliĉulon, alkondukis demono al ŝia kameno,  
 min solan, post kiam Zeus mian rapidan ŝipon per ekfulmo  
 250 brilega estis trafinta kaj disfendinta meze de l'vinkolora maro.  
 Tiam ĉiuj aliaj bravaj kunuloj pereis, sed mi, kaptinte en  
 miajn brakojn la kilon de l'ambaŭflanke kurbigita ŝipo, naĝadis  
 naŭ tagojn; sed en la deka nokto malluma min pelis la Dioj  
 sur la insulon Ogugia, kie loĝas Kalupso kun belaj harligoj,  
 255 timinda Diino, kiu min akceptis kaj zorge gastigis kaj nutris,

kaj ŝi promesis igi min senmorta kaj eterne juna dum ĉiuj tagoj estontaj; sed neniam ŝi persvadis mian koron en la brusto. Tie mi restadis senĉese dum sep jaroj, kaj ĉiam mi malsekigis per miaj larmoj la nepereipovajn vestojn, kiujn estis al mi donacinta Kalupso; sed kiam, dum la preteturniĝado de la jaroj, alvenis por mi la oka jaro, nur tiam ŝi insiste al mi ordonis reiri, ĉu pro komando de Zeus, ĉu tial, ke ŝia propra opinio estis aliiĝinta. Post tio ŝi lasis min iri sur fortike kunmetita flosa, kaj multon ŝi donis al mi, nutraĵon kaj dolĉan vinon, kaj ŝi vestis min per nepereipovaj vestoj, kaj ŝi sendis venton favoran kaj varmetan. Tiel mi deksep tagojn veturis sur la maro, sed la dekokan aperis la ombroriĉaj montoj de via lando kaj ĝojis la koro en mi, malfeliĉulo. Ĉar vere mi estis ankoraŭ parthavonta al multa mizero, kiun alpelis kontraŭ min la tertremigulo Poseidon; ĉi tiu ja puŝegis kontraŭ min la ventojn kaj malebligis mian vojaĝon kaj li agitis neeldireble alta la ondaron, kaj neniel ankoraŭ permesis al mi, kiu laŭte ĝemadis, veturi sur la flosa. Post tio la ventego disbategis la floson; sed mi naĝante la grandan abismon transiris, ĝis kiam al via lando min pelis la vento kaj la akvo. Tiam la ondoj min ŝetegis, kiam mi klopodis elmariĝi, sur la firman teron, kontraŭ grandajn rokojn kaj sur danĝeran lokon, kaj preskaŭ estus ili min perforte frakasintaj; sed postenirante mi naĝis returnen, ĝis kiam mi venis apud la rivero, kie sin montris al mi plej taŭga loko, malplena de rokoj, kaj tie estis ŝirmo kontraŭ la vento. Tie mi teren falis kolektante novajn fortojn kaj proksimiĝis la dieca nokto. Sed mi nun iris flanken de la pluvonutrita rivero kaj tie mi ekdormis en la arbetoj, post kiam mi estis amasiginta ĉirkaŭ min foliojn. Kaj longedaŭran dormon ŝutis iu Diaĵo super min. Tie mi dormis en la folioj kun zorgoplena koro dum la tuta nokto kaj ankaŭ dum la mateno kaj posttagmezo. Sed subeniris la suno kaj forlasis min la dolĉa dormo. Tiam mi vidis ludi la servistinojn de via filino apud la marbordo, kaj meze de ili estis ankaŭ ŝi mem, simila al la Diinoj. Petege mi turnis min al ŝi kaj tuj ŝi prenis saĝan decidon, kiel oni ne esperus, ke iu pli juna agos, kiu nin renkontas; ĉar ĉiam la plijunuloj agas senpripense. Ŝi donis al mi abunde manĝon kaj perlantan vinon kaj ŝi donis al mi banon en la rivero kaj ankaŭ ĉi tiujn vestojn. Per tio mi rakontis malgraŭ mia ĉagreno ĉion al vi laŭvere."

Lin siavice respondis Alkinoos kaj li parolis:

„Fremdulo, vere, almenaŭ ĉi tion ne pripensis laŭdece mia

300 infano, ke ŝi ne kune kun la servistinoj vin kondukis al nia loĝejo; vi ja unue estis vin petege turninta al ŝi."

Lin respondante parolis post tio la elpensema Oduseus:

„Heroo, pro tio ne mallaŭdu la neriproĉeblan knabinon, ĉar ŝi ordonis ja al mi sekvi kun la servistinoj; sed mi ne volis  
305 pro timo kaj respekto, por ke via koro ne koleriĝu kontraŭ mi kiam vi min vidus; ĉar ekkoleremaj estas ni, la homaj gentoj sur la tero."

Lin siavice respondis Alkinoos kaj li parolis:

„Fremdulo, tian koron mi ne havas en la brusto por koleri  
310 senmotive. Kaj estas ja pli bone ke ĉio estas modereca. Ho patro Zeus kaj Athene kaj Apollon, ke tia viro, kia estas vi, kaj inklinanta al la samo kiel mi, posedu mian filnon kiel edzo kaj, ĉi tie restante, estu nomata mia bofilo! Mi donus domon kaj  
315 havaĵojn, se vi libervole restus; sed kontraŭ via volo vin neniu el la Phaiakoj retenos; tio ja ne estus plaĉa al patro Zeus! Akompanadon vian mi fiksas por ke vi certe sciu, ĉirkaŭ ĉi tiu tempo, je la morgaŭa tago. Tiam vi estos kuŝanta, venkite de l'dormo, kaj la aliaj transveturigos la ŝipon trans la maron trankvilan, ĝis kiam vi estos atinginta vian patrujon kaj vian  
320 loĝejon kaj kien ajn vi ŝatas iri, eĉ se tio estos ankoraŭ multe pli malproksima ol Euboia, kiu ja estas plej malproksima laŭ tio, kion diras ili, kiujel nia popolo vidis ĝin, kiam ili kondukis tien la blondharan Radamanthus por viziti Tituos, la filon de  
325 Gaia. Eĉ tien ili iris kaj sen laciĝo ili ĝin plenumis kaj finveturis ree hejmen en unu sama tago. Sed ankaŭ vi mem ekscios en via spirito, kiom superaj estas miaj ŝipoj kaj junuloj por suprenŝpruci per la remilplataĵoj la maron."

Tiel li parolis kaj ekĝojis la persistema dieca Oduseus kaj  
330 preĝante li parolis kaj diris la vortojn kaj ekkriis:

„Ho patro Zeus! Ke ĉion plenumu Alkinoos, kion li diris. Lia gloro estus tiam tra la grendona tero neestingebla, kaj mi atingus mian patrujon."

Tiel ili paroladis unu al la alia, sed dume la blankkubuta  
335 Arete ordonis al siaj servistinoj meti sub la kolonaran galerion liton, ĵeti en ĝin belegajn purpurajn kovraĵojn, sterni sur ilin tukkovraĵojn kaj sur tiujn meti lanecajn mantelojn por envolvi sin en ili. Ili nun eliris la ĉambregon, portante torĉon en la  
340 manoj; sed kiam ili ageme estis pretigintaj la fortikan liton, tiam ili proksimiĝis al Oduseus kaj invitis lin per la vortoj:

„Leviĝu nun kaj iru dormi, ho fremdulo; jam pretigita estas via lito."

Tiel ili parolis kaj ŝajnis al li agrable enlitiĝi. Tiel la per-  
 345 sistema dieca Oduseus tie dormis en la ĉizajhava lito sub la  
 laŭtresona kolonara galerio. Sed Alkinoos kuŝiĝis en la interno  
 de la alta domo kaj dormis kune kun li en la kuŝejo kaj lito  
 lia potenca edzino.

## O K A K A N T O .

### LA KUNESTO DE ODUSSEUS KUN LA PHAIAKOJ.

Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam leviĝis  
 el sia lito la forta kuraĝa Alkinoos, kaj ankaŭ la didevena  
 urbruinigulo Oduseus sin levis el sia kuŝejo. Antaŭiris lin  
 5 la brava kaj forta Alkinoos al la kunvenejo de l'Phaiakoj,  
 kiu sin trovis apud la ŝipoj.

Tie alveninte ili sidiĝis sur la glatigitajn ŝtonajn benkojn,  
 unu flanke de la alia. Dume trairis Pallas Athene la urbon,  
 similante al heroldo de la inteligenta Alkinoos, projektante  
 10 la revenon de la grandkuraĝa Oduseus, kaj haltante flanke de  
 ĉiu viro, ŝi diris la vortojn:

„Ĉi tien, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj, iru vi al  
 la kunvenejo, por aŭskulti je la fremdulo, kiu ĵus alvenis en  
 la domo de Alkinoos, post kiam li vagadis sur la maro, kaj  
 kiu rilate la staturon estas simila al la senmortuloj.”

15 Tiel parolante ŝi incitis la deziron kaj animon de ĉiu. Rapide  
 nun la kunvenejo kaj sidlokoj estis plenigataj de la kolektiĝintaj  
 mortidevuloj; kaj vidante la inteligentan filon de Laertes  
 multaj lin admiris. Ĉar Athene etendis diecan gracion super  
 20 liajn kapon kaj ŝultrojn, kaj lin faris pli granda kaj pli dika  
 je la aspekto, por ke li estu plaĉa al ĉiuj Phaiakoj [kaj timinda  
 kaj respektinda, kaj por ke li finplenumu la multajn konkursojn,  
 per kiuj la Phaiakoj provis poste Oduseus]. Sed kiam ili estis  
 25 kolektiĝintaj kaj kunvenintaj, tiam ekparolis en la kunveno  
 Alkinoos kaj diris meze de ili:

„Aŭdu, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj, por ke mi  
 eldiru, kion inspiras la koro en mia brusto. Ĉi tiu fremdulo,  
 mi ne scias kiu li estas, venis vagadante al mia loĝejo, ĉu  
 30 de la homoj okcidentaj aŭ orientaj. Li petegas akompanion kaj  
 petpreĝas, ke li nepre ĝin ekhavu. Ni do, kiel kutime, baldaŭ  
 al li donu akompanion. Ankaŭ neniu alia, kiu al mia loĝejo

venas, tie ja longan tempon restas, ĝemsopirante al la akompano. Sed nu do, ni trenu nigran ŝipon, unuafoje enmariĝantan, 35 en la diecan maron, kaj plue estu elektataj du kaj kvindek junuloj el la popolo, kiuj ĉiam estis la plej bravaj. Kaj kiam vi ĉiuj estos fortike ligintaj la remilojn al la remapogiloj, tiam vi ree elŝipiĝu; sed post tio, veninte al mia domo, vi devos rapide ĝui la manĝon; kaj mi al ĉiuj abunde manĝon havigos. 40 Al la junuloj mi tion ordonas. Sed la aliaj, la sceptroportaj reĝoj, iru al mia bela loĝejo, por ke ni gastame regalu la fremdulon en la loĝĉambrego, kaj neniu rifuzu veni. Vi ankaŭ venigu la diecan kantiston, Demodokos; ĉar supermezure al li donis iu 45 Diaĵo la kapablecon pri la kantado por ĝojigi per ĉio, kion la koro al li inspiras prikantadi.”

Tiel parolinte li antaŭiris kaj lin sekvis la sceptroportuloj; dume la heroldo iris por venigi la diecan kantiston. La du kaj kvindek elektitaj junuloj nun iris, kiel li estis ordoninta, al 50 la bordo de la senripoze ondanta maro. Sed kiam ili estis malsuprenirintaj al la ŝipo kaj la maro, tiam ili trenis la nigran ŝipon en la profundan akvon de la maro, starigis la maston kaj la velojn sur la nigra ŝipo kaj fiksitis post tio la remilojn en la ledajn bantojn, [ĉion laŭdece, kaj ili hismalfaldis la blankajn 55 velojn]. La ŝipon ili nun ankrigis pli malproksime en la bordakvo, sed post tro ili rapidis al la granda loĝejo de la inteligenta Alkinoos. Kaj baldaŭ la kolonaraĵoj kaj la ĉirkaŭbarita antaŭkorto kaj la ĉambregoj de l'domo estis plenaj de viroj [kiuj sin estis kolektintaj; multnombraj ili estis, junuloj kaj grandaĝuloj]. Por ili nun buĝigis Alkinoos dekdu ŝafojn, ok 60 blankdentajn porkojn kaj du trenpiedajn bovojn. Ĉi tiujn ili senhaŭtigis kaj pretigis kaj agrablan manĝon ili aranĝis.

Nun la heroldo alproksimiĝis kun la nobla kantisto, kiun supermezure la Muzo amis kaj ŝi donis al li bonon kaj malbonon: ŝi rabis al li la vidkapablon de liaj okuloj sed donis al li la dolĉan 65 kanton. Por li nun metis Pintinoos arĝentnajlan apogseĝon kontraŭ grandan kolonon meze de la manĝantoj; kaj la heroldo pendigis super lia kapo la laŭtsonan liron sur najlon kaj montris al liaj manoj la direkton por ĝin preni; post tio li metis antaŭ 70 lin korbeton kaj belan tablon kaj pokalon da vino por trinki ĉiufoje, kiam lia animo lin al tio instigos. Nun ili etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj manĝaĵoj. Sed kiam ili estis kontentigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam la Muzo inspiris la kantiston kantadi pri la gloriĉaj agoj de la herooj, la kanton, kies famo tiutempo ĝis la vasta ĉielo sin

75 etendis: li prikantis la malpacon inter Oduseus kaj la Pele-ido Achilleus, kiel ili iam per vortoj kolertonaj ekdisputis ĉe la abunda manĝo honore al la Dioj, kaj interne ĝojis la reĝo de la popoloj Agamemnon, pro tio ke la plejbravuloj inter la Aĉaioj disputis. Tiel ja estis orakole sciiginta al li Phoibos

80 Apollon en la sanktega Putho, kiam li transpaŝis la ŝtonan sojlon por konsulti la orakolon; ĉar tiam alruliĝis, laŭ la decido de la granda Zeus, al la Troianoj kaj Danaoj la komenco de la mizero.

Tion do prikantis la gloriĉa kantisto; sed Oduseus prenis per fortaj manoj la purpuran grandan mantelon kaj ĝin tiris

85 antaŭ sian kapon, kaj li kaŝis sian belan vizaĝon; ĉar li hontis antaŭ la Phaiakoj elfaligi de sub la brovoj larmojn. Sed ĉiufoje kiam la dieca kantisto ĉesigis la kantadon, tiam li, forviŝante la larmojn, de sia kapo forprenis la mantelon kaj prenante la dutenilhavan pokalon li verŝoferis al la Dioj; sed ĉiufoje

90 kiam la kantisto rekomencis kaj la plej nobelaj el la Phaiakoj lin instigis kanti, ĉar ili ĝuis pro liaj rakontoj, tiam denove Oduseus kaŝis sian kapon kaj plorĝemis. Tiam ĉiuj aliaj ne rimarkis ke li verŝis larmojn, sed nur Alkinoos lin observis

95 kaj rimarkis ĝin, sidante proksime al li, kaj aŭdis ke li ĝemadis profunde. Tuj li nun parolis meze de la remŝipamaj Phaiakoj:

„Aŭskultu, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj! Ni jam sufiĉe regalis nian koron per la bongusta manĝo kaj per la liro, kiu estas akompano necesa de abunda manĝo; sed nun ni iru

100 eksteren kaj provu ĉiajn konkursojn, por ke la fremdulo, hejmen reveninte, rakontu al siaj amikoj, kiom ni ĉiujn superas rilate la pugnan batalon kaj la luktadon kaj saltadon kaj piedan rapidecon.”

Tiel parolinte li antaŭiris kaj ili lin sekvis. Nun la heroldo

105 ree pendigis la laŭtsonan liron sur la najlon kaj li kaptis la manon de Demodokos kaj lin elkondukis el la loĝĉambrego; kaj li irigis lin laŭ la sama vojo, kiun laŭiris la aliaj, la plej nobelaj el la Phaiakoj, por admiri la konkursojn. Ili nun iris al la kunvenejo, kaj ilin sekvis granda homamaso, nenombreble multaj. Nun leviĝis por la konkurso multaj bravaj junuloj.

110 Sin levis Akroneos kaj Okualos kaj Elatreus, kaj Nauteus kaj Prumneus, kaj Agchialos kaj Eretmeus kaj Ponteus kaj Proreus kaj Thloon kaj Anabesineos kaj Amphialos, la filo de l' Teknon-

115 ido Poluneos. Sin levis ankaŭ Eurualos, simila al la virpereiga Ares, kaj Naubolides, kiu rilate eksteraĵon kaj staturon estis supera al ĉiuj Phaiakoj escepte al la neriproĉebla Laodamas;



ankaŭ sin levis plue tri filoj de la neriproĉebla Alkinoos: Laodamas kaj Halios kaj la disimila Klutoneos.

- 120 Unue ili provis sian kapablecon rilate piedan rapidecon. De la startkolono sin etendis ilia kurejo; tie ili ĉiuj kune, levante polvan nubon, rapideflugkuris tra la ebenajo; sed multe plej bona rilate la kuradon estis el ili la neriproĉebla Klutoneos; kiom granda estas la distanco, kiun la muloj ĉiufoje sur la kampo  
125 plugtrairas, tiel malproksime kurante antaŭ la aliaj li alvenis ĉe la popolo, kaj la aliaj postrestis.

Nun aliaj provis sian kapablecon rilate la penan luktadon. Sed je tio superis Eurualos ĉiujn plej bonajn. Je la saltado tamen estis Amphialos plej bonega; per la ŝetdisko estis multe  
130 plej lerta el ĉiuj Elatreus kaj en la pugna batalo Laodamas, la brava filo de Alkinoos.

Sed kiam ĉiuj estis ĝuintaj en la koro pro la konkursoj, tiam meze de ili parolis Laodamas, la filo de Alkinoos:

- „Nu, amikoj, ni demandu al la fremdulo, ĉu li konas kaj lernis iun konkursbatalon; rilate la korpan strukturon li certe  
135 ne estas malbona, fortika je femuroj kaj tibikarno kaj ankaŭ supre, je ambaŭ brakoj kaj la nuko, kaj granda estas lia forto; ankoraŭ ne mankas al li juneca forto sed li kurbiĝis pro multaj malfeliĉoj. Ĉar mi opinias ke nenio alia estas pli sanecdetrua kaj kapabla senfortigi viron, ol la maro, eĉ se li ege forta estus.”

- 140 Lin siavice respondis Eurualos kaj li parolis:

„Tute laŭdece vi parolis tiujn vortojn. Iru nun mem al li kaj lin alparolu kaj invitu al iu konkurso.”

Sed kiam estis tion aŭdinta la brava filo de Alkinoos, tiam li iris en la mezon kaj li alparolis Odusseus:

- 145 „Nu do, fremdulo kaj patro, ankaŭ vi nun provu vian kapablecon en la konkursoj, [se vi eble konas iun; ja decas al vi konkursbatalojn koni]. Ĉar certe por viro ne ekzistas, dum li vivas, gloro pli granda, ol tio, kion li faras per siaj piedoj kaj manoj. Nu do, ĝin provu kaj forigu la zorgojn el via koro; 150 ĉar via forveturo ne plu longan tempon forestos sed jam estas la ŝipo enmarigita kaj tutpretaj estas la kunuloj.”

Lin respondante parolis la elpensema Odusseus:

- „Laodamas! kial vi min ofende devigas al tio? Multe pli multe mi havas zorgojn en la koro ol deziron al vetludado: 155 mi, kiu antaŭe jam tre multe suferis kaj multe malĝojis kaj kiu nun sidas ĉi tie en via kunveno, sopirante al la reveno kaj petegante la reĝon kaj la tutan popolon.”



- Lin siavice respondis Eurualos kaj malkaŝe lin insultofendis:  
 „Nun mi tute neniel, ho fremdulo, vin kredas simila al  
 160 viro sperta je vetludoj, kiaj ekzistas multaj inter la homoj,  
 sed simila al iu, kiu veturadante per ŝipo kun multaj rema-  
 pogiloj, kiel estro de ŝipanoj kiuj estas komercistoj, ĉiam pen-  
 sante pri ŝarĝo kaj aspirante pri komercaĵoj kaj alloga gajno,  
 ŝipvojaĝas; sed al atleto vi ne similas.”
- 165 Lin siavice alparolis la elpensema Oduseus, de sub la  
 brovoj minace lin alrigardante:  
 „Fremdulo! vi ne konvene parolis; al viro nepripensema vi  
 similas. Tiel do la Dioj ne ĉiujn ŝatindaĵojn kune donas [al  
 la homoj; nek belan eksterajn nek intelekton nek elokventecon].
- 170 Unu viro estas ja pli eta je statur, sed Dio abunde donas  
 belformecon al liaj paroloj; liaj aŭdantoj ĝuante lin alrigar-  
 dadas; kaj senhezite li paroladas kun dolĉa modesteco kaj li  
 sin distingas super la kolektiĝintaj; kaj kiam li iras tra la  
 urbo ili respekte lin alrigardas kvazaŭ Diaĵon. Alia estas je  
 175 la statur egala al la senmortuloj, sed al li ne kronas gracieco  
 la parolojn; tiel ankaŭ via statur estas belega kaj eĉ Diaĵo  
 ne kapablus fari ĝin pli bela, sed vi estas senvalora rilate la  
 spiriton. Vi estas konsterninta mian animon en la brusto per  
 viaj nekonvenaj vortoj; kaj mi ne estas nesperta je vetludoj,  
 180 kiel vi pretendas, sed mi opinias, ke mi estis inter la unuaj  
 dum mi povis fidi al mia juneca forto kaj miaj manoj. Sed  
 nun mi estas premata de mizereco kaj doloroj, ĉar multon mi  
 suferis, eltenante militojn kun viroj kaj penalportajn ondojn.  
 Sed spite al tio, kvankam suferinte multajn malfeliĉojn, mi  
 provos mian kapablecon rilate la vetludoj; ĉar korinsulta  
 185 estis via parolo kaj vi min estas incitinta per viaj vortoj.”
- Tiel li parolis kaj ankoraŭ alhavante sian mantelon li eksaltis  
 kaj ekprenis diskon, pli grandan kaj dikan, kaj certe ne mal-  
 multe pli pezan, ol tiu, per kiu la Phaiakoj kutimis ĵeti inter si.  
 Ĉi tiun li turnirigis kaj tiam forĵetegis el sia fortmuskola  
 190 mano. Zumante forrapidis la ŝtono kaj la Phaiakoj, la viroj  
 kun longaj remiloj kaj famkonataj pro siaj ŝipoj, teren kliniĝis  
 sub la trajektorion de la ŝtono. Ĉi tiu, rapide forflugante el la  
 mano, superflugis ĉiujn markojn. Tiam Athene metis la  
 finmarkojn, simila al viro rilate la staturon, kaj ŝi diris la  
 parolon kaj elvokis:
- 195 „Fremdulo! eĉ blindulo povus distingi palpe vian markon,  
 ĉar neniel ĝi staras inter la multaj aliaj, sed senkompare plej  
 antaŭe. Estu do trankvila, almenaŭ pri ĉi tiu konkurso: neniu

el la Phaiakoj atingos tiun markon aŭ ĵetos preter ĝin.”

Tiel ŝi parolis kaj ekĝojis la persistema dieca Odusseus,  
200 feliĉante ĉar li ekvidis bonvolan amikon sur la vetludejo. Kaj  
tiam pli gajece li parolis meze de la Phaiakoj:

„Klopodu vi nun, junuloj, atingi tiun diskon! Mi kredas  
ke mi baldaŭ ĵetos alian post ĝi, same malproksimen aŭ ankoraŭ  
pli malproksimen. Nu do, kiun el la aliaj lia koro kaj animo  
205 al tio instigas, tiu provu sian kapablecon — ĉar vi ege min  
ekkolerigis — ĉu rilate la pugnan batalon aŭ la baraktadon aŭ  
piedan rapidecon — nenion mi rifuzas — ĉiujn Phaiakojn mi  
invitas escepte Laodamantos mem. Li ja estas mia gastamiko  
kaj kiu dezirus batali kontraŭ amiko? Senprudenta kaj senva-  
210 lora ja estas tiu viro, kiu kontraŭ sia gastiganto komencas  
vetkonkurson meze de fremda popolo; per tio li malutilas al  
si mem. Sed el la aliaj mi nenium malakceptas aŭ malŝate  
rifuzas, sed mi volas koni lin kaj malkaŝe provi miajn fortojn.  
Ne malsperta mi estas je ĉiuj vetludoj kiuj ekzistas inter la  
215 homoj, bone mi scias uzi la glatigitan arkpafilon; [mi unua  
meze de aro da viroj malamikaj trafus per la sago viron, eĉ  
se ege multaj kunuloj starus proksime flanke de mi kaj arkpafus  
al la viroj. Nur Philoktetes kompreneble min superis je la  
220 arkpafilo en la lando de la Troianoj, ĉiam, kiam ni Aĉaioj  
arkpafis. Sed mi pretendas ke mi estas je tio multe pli bonega  
ol ĉiuj aliaj, ĉiuj mortidevuloj kiuj nun ankoraŭ vivas sur la  
tero kaj per pano nutras sin. Sed kun la iamaj viroj mi ne volas  
vetkonkuri, nek kun Herakles nek kun Eurutos el Oichalia,  
225 kiuj eĉ kun la senmortuloj vetkonkuris per la arkpafilo. Tial  
do baldaŭ mortis la altkreska Eurutos kaj ne atingis maljunecon  
ensia loĝejo; ĉar Apollon koleriĝinte lin mortigis, ĉar li invitis  
lin al vetkonkurso je la arkpafado.] kaj per la ĵetlanco mi  
ĵetas tiel malproksimen, kiel neniu alia pafas per sago. Nur  
230 je pieda rapideco mi timas, ke iu el la Phaiakoj preterkuros  
min; ĉar ege terure mi elĉerpiĝis en la multnombraj ondoj,  
[ĉar mankis sur la ŝipo daŭra flegado]; tial miaj membroj  
senfortiĝis.”

Tiel li parolis; kaj ĉiuj restis senbrujaj kaj silentis. Nur  
235 Alkinoos lin respondante alparolis:

„Fremdulo, ĉar ne malĝentile vi diras ĉi tion meze de ni,  
sed vi volas montri la bravecon kiu vin akompanas, koleriĝante  
ĉar tiu viro alproksimiĝis al vi kaj insultofendis vin, kiel ja  
povus malaprobi vian bravecon neniu mortidevulo, kiu scias  
240 en sia animo paroli konvene: nu do, aŭskultu al miaj vortoj

por ke vi povu komuniki ankaŭ al iu alia inter la herooj, kiam en via loĝoĉambrego vi manĝos flanke de via edzino kaj viaj infanoj, memorante nian bonecon, kiajn gloriojn ankaŭ al ni senĉese havigas Zeus, jam de la tempo de miaj prapatroj. Ni ja estas nek neriproĉeblaj pugnobatalantoj nek luktantoj, sed rapide ni kuras per la piedoj kaj je la ŝipoj ni estas superaj; ĉiam ankaŭ estas al ni karaj manĝo kaj liro kaj dancrondo [kaj variaj vestoj kaj varmaj banoj, kaj litoj]. Nu do, plej bonaj dancistoj el la Phaiakoj, ekdancu, por ke la fremdulo, hejmen reveninte, rakontu al siaj amikoj, kiom ni ĉiujn superas rilate la ŝipveturadon kaj piedan rapidecon kaj dancadon kaj kantadon. Rapide iu iru kaj portu al Demodokos la laŭtsonan liron, kiu ie kuŝas en nia loĝejo.”

Tiel parolis la disimila Alkinoos; kaj sin levis la heroldo por porti la kavan liron el la domo de la reĝo. Nun sin levis naŭ ludjuĝistoj, ĉiuj elektitaj el la popolo, kiuj kutimis ĉion prizorgi sur la vetludejo; ili glatigis la dancejon kaj difinis la vastecon sur la bela vetludejo por la dancado. Nun la heroldo alproksimiĝis portante la laŭtsonan liron al Demodokos. Ĉi tiu nun iris en la mezon kaj ĉirkaŭ lin stariĝis junaĝaj knaboj, spertaj je la dancado, kaj ili plenumis belegan dancon, rapide piedfrapante. Sed Oduseus admire rigardis la rapidegan moviĝadon de iliaj piedoj kaj miris en sia koro.

Sed Demodokos, fingre sonigante la liron, komencis belege kantadi pri la amo de Ares kaj la belkrona Aphrodite, kiel unuafoje ili sekrete en la palaco de Hephaistos ame sin kunigis; multajn donacojn li donis al ŝi, sed li senhonorigis la kuŝejon kaj liton de l' reĝo Hephaistos. Sed tuj ĝin venis al li sciigi Helios, kiu estis rimarkinta, ke ili ame sin kunigis. Sed tuj kiam Hephaistos estis aŭdinta la kordolorigan rakonton, li rapide iris al sia forĝejo, intencante malbonon en sia koro, kaj li metis la grandan amboson sur la ŝtipon kaj forĝis katenojn, nerompeblajn kaj ne malligeblajn, por ke ambaŭ restu senmovaj en ili. Sed kiam li estis pretiginta la ruzecan ilon, kolerante kontraŭ Ares, tiam li iris al la dormoĉambro, kie sin trovis lia lito; kaj ĉie li volvis en granda rondo la katenojn ĉirkaŭ la litofostojn; ankaŭ de la plafono pendis multaj ligiloj suben, kiel delikata araneaĵo, kiun neniu eĉ povus ekvidi, eĉ neniu el la feliĉegaj Dioj; ĉar tre ruzece ili estis fabrikitaj. Sed kiam li estis la ruzecan ilon tute volvinta ĉirkaŭ la liton, tiam li ŝajnis iri al fortike konstruita urbo sur Lemnos, kiu el ĉiuj terregionoj estas plej kara al li. Sed dume la orbrida Ares ne

285 blinde estis gardanta, kiam li vidis ke la artbonfama Hephaistos iris for; rapide li nun iris al la domo de la gloriĉa Hephaistos, arde dezirante al la amo de la belkrona Diino de Kuthera; ĉi tiu, ĵus reveninte de sia potencega patro la Kron-ido, sidis en la  
290 palaco; nun li eniris la loĝejon, kaj li varme salutpremis ŝian manon kaj diris la vortojn kaj elvokis:

„Nu do, karulino, ni iru en la liton por kune dormi; Hephaistos ja ne plu estas en la lando, sed verŝajne li nun foriris al la barbarlingvaj Sintioj.”

295 Tiel li parolis kaj ŝajnis al ŝi agrable enlitiĝi. Kaj ambaŭ nun iris en la liton kaj ekdormis; sed subite ilin ĉirkaŭkaptis la ruzecaj ligiloj de la multprudenta Hephaistos kaj ne plu eble al ili estis movi aŭ levi iun el siaj membroj. Kaj tiam ili ekkomprenis, ke la ligiloj nebligas elsaviĝon. Nun proksimiĝis al ili la gloriĉa fortbrakulo, returnen reveninte antaŭ  
300 ol li atingis la landon de Lesbos; ĉar Helios por li gardadis kaj estis al li dirinta la okazintaĵon. [Rapide li nun iris al sia domo malkontentiĝinte en sia koro.]

Li staris apud la antaŭpordo kaj furioza kolero lin ekkaptis; 305 terure li kriegis kaj al ĉiuj Dioj li elvokis:

„Ho nia patro Zeus, kaj vi aliaj feliĉegaj Dioj ĉiamaj! venu ĉi tien, por ke vi vidu aĵojn ridindajn kaj nekonvenajn, kiel min, lamulon, la filino de Zeus, Aphrodite, ĉiam malestimas, sed amas la pereigeman Ares, tial ke li estas bela kaj  
310 rekt pieda, sed mi naskiĝis invalida; sed neniu alia estas de tio la kaŭzo ol miaj ambaŭ gepatroj, kiuj ne estus devintaj min vivigi. Sed vidu, kiel tiuj ambaŭ ame kune dormas, irinte en mian liton; sed ĉagreniĝas mi vidante ĝin. Sed mi kredas, ke  
315 ili eĉ ne plu momenton tiel kuŝi deziras, kiom ajn sin reciproke ili amas; baldaŭ ambaŭ ne plu volos tiel dormi. Sed la ruzece fabrikitaj katenoj ilin retenos, ĝis kiam ŝia patro estos redoninta al mi ĉiujn edziĝdonacojn, kiujn mi donis al li por  
320 la nehontema knabino, ĉar bela estas lia filino, sed ne estas ŝi prudenta.”

Tiel li parolis kaj la Dioj kolektiĝis en lia loĝejo kun kupra fundamento. Tien venis la terĉirkaŭulo Poseidon, kaj venis la profitalporta Hermes, kaj venis la reĝo kaj sagpafulo Apollon. Sed la virinseksaj Diaĵoj restis ĉiuj pro honto en  
325 siaj loĝejoj. Nun stariĝis apud la antaŭpordon la Dioj, la donacantoj de la bono; tiam eksplodis senfina ridado inter la feliĉegaj Dioj, kiam ili vidis la ruzajojn de la multprudenta Hephaistos. Kaj tiel kelkiu parolis alrigardante la flanke de li starantan Dion:

„Malbonaj faroj neniam prosperas; la malrapidulo kelkfoje  
 330 atingas la rapidulon, kiel ankaŭ nun Hephaistos, kiu estas  
 malripada kaj lama, per sia arto kaptis Ares, kvankam tiu  
 estas la plej rapida el la Dioj kiuj loĝas sur la Olumpos; tial li  
 nun punsuferas pro sia adulto.”

Tiel ili parolis unu al la alia. Nun al Hermes diris la reĝo  
 Apollon, la filo de Zeus:

335 „Hermes, filo de Zeus, kondukisto kaj donacanto de la bono,  
 ĉu vi volus, enkatendigite en tiuj fortikaj ligiloj, dormi en la  
 lito flanke de la ora Aphrodite?”

Lin respondis post tio la kondukisto kaj Argusmortiginto:

340 „Ke tio okazus, ho reĝo kaj sagpafulo Apollon! Eĉ se trifoje  
 tiom aŭ eĉ sennombraj ligiloj min ĉirkaŭadus kaj se vi, Dioj,  
 kaj ĉiuj Diinoj alrigardus, eĉ tiam mi dezirus dormi flanke de  
 la ora Aphrodite.”

Tiel li parolis kaj ridado eksplodis inter la senmortaj Dioj.  
 Sed ne kunridis Poseidon, sed senĉese li petegis al la artfama  
 345 Hephaistos ke li malligu Ares. Kaj lin alparolante li diris la  
 flugilhavajn vortojn:

„Lin malligu; mi mem al vi promesas tion, ke li, kiel vi  
 postulas, en ĉeesto de la senmortaj Dioj ĉion justece kompensas.”

Lin siavice alparolis la gloriĉa fortbrakulo:

350 „Tion, ho terĉirkaŭa Poseidon, ne de mi postulu. Malbona  
 estas la garantiaĵo, kiun oni donas por friponoj. Kiel mi povus  
 vin kateni, se eble Ares evitus sian ŝuldon kunĉ kun  
 la katenojn?”

Lin siavice alparolis la tertremiga Poseidon:

355 „Hephaistos, se do eble Ares forkurante evitos siajn ŝuldojn,  
 tiam mi mem por tio vin kompensas.”

Lin respondis post tio la gloriĉa fortbrakulo:

„Neeble estas kaj ne konvene rifuzi vian proponon.”

Tiel parolinte malligis la katenojn la forta Hephaistos. Sed  
 360 kiam ili estis liberigitaj el la fortikaj katenoj, tiam ili tuj eksaltis  
 el la lito kaj la Dio rapide iris al Thrakia, sed la ridema Aphro-  
 dite iris al Paphos sur Kupros; tie sin trovis ŝia sankta arbaro  
 kaj ŝia bonodora altaro. Tie la Charitoj ŝin lavis kaj ŝmiris per  
 365 nepereipova olivoleo, kiu ĉirkaŭbrietas la ĉiamajn Diojn, kaj  
 ŝin vestis per graciaj vestoj, mirindaĵo por la aspekto.

Tion do prikantis la gloriĉa kantisto, sed Odusseus ĝojis  
 en sia animo ĝin aŭdante, kaj ankaŭ la aliaj, la Phaiakoj,  
 la viroj kun longaj remiloj kaj famkonataj pro siaj ŝipoj.

365 Nun ordonis Alkinoos al Halios kaj Laodamas ke ili solaj

dancu, ĉar neniu egalas ilin je tio. Post kiam ili estis prenintaj en la manojn belan purpuran pilkon, kiun por ili estis fabrikinta Polubos, unu kun posten kliniĝinta dorso ĝin ĉiufoje supren  
 375 ĵetis al la ombroriĉaj nuboj; tiam la alia, de la fundo supren saltante, ĝin lertece kaptis antaŭ ol atingi ree la teron per la piedoj. Sed kiam ili estis provintaj sian kapablecon rilate la pilkjetadon rekte supren, tiam ili dancadis sur la multajn nutranta tero, rapide alternadante la piedojn. La aliaj junuloj,  
 380 starante sur la dancejo, kunfrapadis takte la manojn, kaj multa bruado ekestis. Tiam la dieca Oduseus parolis al Alkinoos:

„Ho reganto Alkinoos, plej bonega inter ĉiuj popoloj, vi atestis, ke viaj dancistoj estas plej bonaj, kaj vere tio estas prava. Respekto min ekkaptas, kiam mi alrigardas ĝin.”

385 Tiel li parolis kaj ĝojis la brava, forta Alkinoos. Tuj li nun parolis meze de la remŝipamaj Phaiakoj:

„Aŭskultu, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj! Tiu fremdulo ŝajnas al mi esti tre saĝa. Nu do, ni donu al li, kiel  
 390 konvenas, porgastajn donacojn. Dekdu bonegaj reĝoj inter la popolo reĝas kiel ĉefuloj, kaj mi mem ja estas la dektria; ĉiu el ni donacu al li mantelon bele lavitan kaj subveston, kaj talanton da multvalora oro. Tuj ni donu ĝin al li kaj ĉion  
 395 kune, por ke la fremdulo ĝin jam posedante kaj ĝojante en sia koro, iru al la vespermanĝo. Ankaŭ Eurualos repacigu sin kun li per vortoj kaj donaco, ĉar ne konvene li alparolis lin.”

Tiel li parolis kaj ĉiuj ĝin aprobis kaj insistis. Ĉiu nun forsendis sian heroldon por alporti la donacojn. Lin siavice  
 400 Eurualos respondis kaj li diris:

„Ho reganto Alkinoos, plej bonega inter ĉiuj popoloj, tutcerte mi pacigos min kun la fremdulo, kiel vi ordonas. Mi al li donacos ĉi tiun glavon tutkupran, al kiu estas arĝenta  
 405 tenilo, kaj ingo de freŝe polurita eburo ĝin ĉirkaŭas, kaj multe ĝi por li valoros.”

Tiel parolinte li metis en liajn manojn la arĝentnajlan glavon kaj lin alparolante li diris la flugilhavajn vortojn:

„Fartu bone, ho patro kaj fremdulo; kaj se estas de mi parolita ofenda vorto, ke tiam la ventegoj tuj forblovu ĝin.  
 410 Sed la Dioj permesu al vi revidi vian edzinon kaj atingi vian patrujon, ĉar jam longan tempon vi suferas malfeliĉajn malproksime de viaj karuloj.”

Lin siavice alparolis la elpensema Oduseus:

„Ankaŭ vi, amiko, fartu tre bone kaj ke la Dioj al vi donu

feliĉon. Ke neniel poste vi ekhavu deziron al ĉi tiu glavo,  
415 kiun vi donis al mi kun vortoj repacigaj.”

Tiel li parolis kaj li pendigis la arĝentnajlan glavon ĉirkaŭ  
la ŝultrojn. Nun subeniris la suno kaj venis por li la belegaj  
donacoj. La estimindaj heroldoj ilin portis en la loĝejon de  
420 kaj ili metis la belegajn donacojn ĉe sian respektindan patrinon.  
Sed antaŭiris ilin la brava forta Alkinoos kaj en la ĉambregon  
veninte ili sidigis sur altajn brakseĝojn. Kaj tiam parolis al  
Arete la forta Alkinoos:

„Nu do, virino, alportu al mi tre taŭgan keston, kiu la plej  
425 bonega estas, kaj metu en ĝin la mantelojn bele lavitajn kaj  
la subvestojn. Kaj vi, servistinoj, varmigu en la fajro kupran  
kaldronon kaj igu la akvon varma, por ke li, sin baninte kaj  
vidinte, ke estas bone enpakitaj ĉiuj donacoj, kiujn la neri-  
proĉeblaj Phaiakoj portis por li ĉi tien, ĝoju ĉe la manĝo kaj  
430 pro la aŭskultado je la melodio de la kantado. Ankaŭ mi  
donacos al li ĉi tiun mian belegan pokalon oran, por ke li,  
ĉiujn tagojn memorante min, verŝoferu per ĝi en sia domo al  
Zeus kaj al la aliaj Diaĵoj.”

Tiel li parolis kaj meze de siaj servistinoj ordonis Arete  
starigi plej baldaŭ grandan tripiedon super la fajron. Kaj ili  
435 starigis super la brulantan fajron tripiedon por la banakvo  
kaj verŝis akvon en ĝin kaj metis brullignon en la flamojn.  
La fajro nun ĉirkaŭis la ventron de la tripiedo kaj varmiĝis  
la akvo. Dume kunportis Arete por la fremdulo belegan keston  
el la provizejo kaj metis en ĝin la belegajn donacojn, la vestojn  
440 kaj la oron, kiujn al li estis donacintaj la Phaiakoj. Post tio  
ankaŭ ŝi mem enmetis en ĝin mantelon belan kaj subveston,  
kaj lin alparolante ŝi diris la flugilhavajn vortojn:

„Mem kontrolu nun la kovrilon, kaj rapide faru nodon sur  
ĝi por ke neniu vin prirabu dumvoje, kiam vi estos dormanta  
445 la dolĉan dormon, veturante sur la nigra ŝipo.”

Sed kiam tion aŭdis la persistema dieca Odusseus, tiam li  
fiksitis tuj la kovrilon sur ĝin, kaj rapide faris nodon artifikan,  
kiun al li iam estis instruinta la respektinda Kirke. Tuj post  
tio lin invitis la mastrumistino iri en la banokuvon kaj sin  
450 bani; kaj li vidis kun ĝoja koro la varman banakvon, ĉar  
neniel li estis ofte flegita post kiam li forlasis la loĝejon de la  
belhara Kalupso; sed dum la tempo, kiam li estis ankoraŭ ĉe ŝi,  
tiam li estis konstante prizorgata kiel Diaĵo. Sed kiam la ser-  
vistinoj estis lin banintaj kaj ŝmirintaj per olivoleo kaj estis



455 ĵetintaj ĉirkaŭ lin mantelon belan kaj subveston, tiam li forlasis la banokuvon kaj iris al la vinotrinkaj viroj. Tie Nausikaa, kiu belecon ricevis de la Dioj, staris flanke de la pordokrado de l' fortike ĉarpentita porvira ĉambrego, kaj admire ŝi rigardis en la okulojn de Odusseus kaj lin alparolante

460 ŝi diris la flugilhavajn vortojn:

„Fartu bone, fremdulo, kaj ke vi iam, estante en la lando de viaj prapatroj, min memoru, ĉar unue al mi vi dankas vian vivosavon.”

Lin siavice alparolis la elpensema Odusseus:

„Nausikaa, filino de l' grandkuraĝa Alkinoos, ke Zeus, la  
465 laŭttondra edzo de Hera, al mi nun tiel destinu, ke mi revenu hejmen kaj vidu la hejmalvenan tagon; tiam mi ankaŭ tic kiel al Diino al vi preĝos, ĉiam, ĉiujn tagojn; ĉar vi, knabino, savis al mi la vivon.”

Tiel li parolis kaj li sidigis nun sur la brakseĝon flanke de reĝo  
470 Alkinoos. Servistoj jam estis dividantaj la manĝojn kaj kunmik-santaj la vinon. Nun la heroldo proksimiĝis kondukante la noblan kantiston, Demodokos, altestimata inter la popolo, kaj li sidigis lin meze de la manĝantoj, kontraŭ granda kolono. Tiam la heroldon alparolis la elpensema Odusseus dum li  
475 detranĉis pecon — sed pli multe ankoraŭ postrestis al li — de la dorsaĵo de blankdenta porko, kaj ambaŭflanke estis multgrasa lardo:

„Heroldo, jen, ĉi tiun viandon donu al Demodokos, por ke li manĝu ĝin, kaj tiel mi volas, kvankam malĝojante, pruvi mian amikecon; inter ĉiuj surteraj homoj la kantistoj ja estas  
480 partohavaj al honoro kaj estimo, tial ke al ili instruas la Muzo kantojn, kaj ŝi amas la genton de la kantistoj.”

„Tiel li parolis kaj la heroldo ĝin portis kaj metis en la manojn de la heroo Demodokos. Kaj ĉi tiu ĝin akceptis kaj ĝojis en sia animo. Nun ili etendis la manojn al la pretaj antaŭ  
485 ili starantaj manĝaĵoj. Sed kiam ili estis kontentigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam parolis al Demodokos la elpensema Odusseus:

„Demodokos, supermezure mi laŭdas vin super ĉiuj mortidevuloj. Vin ja instruis ĉu la Muzo, la filino de Zeus, ĉu Apollon. Ĉar ege konvene vi prikantas la malbonsorton de la Aĉaioj  
490 [kiom la Aĉaioj faris kaj suferis kaj kiom ili penis,] kvazaŭ vi estus ĉeestinta mem aŭ ĝin aŭdinta de iu alia. Sed nu do, transiru nun al alia temo kaj prikantu la ordigon de la ligna ĉevalo, kiun per helpo de Athene Epeios fabrikis, kaj kiun

iam la dieca Oduseus ruze portis sur la akropolon, post kiam  
 495 li estis ĝin per viroj pleniginta, kiuj estas ruinigintaj Ilion.  
 Se vi al mi ĉi ĉion konvene rakontinta estos, tiam mi tuj  
 sciigos al ĉiuj homoj, ke iu bonvola Diaĵo al vi havigis la  
 diinspiritan kantadon.”

Tiel li parolis, kaj ekkantis la kantisto, inspirite de Diaĵo  
 500 kaj li sonigis la kanton, komencante je tio, kiel la Argeioj,  
 ekbruliginte la tendojn, iris sur la bonferdekajn ŝipojn kaj  
 forveturis, kaj kiel la aliaj kun la gloriĉa Oduseus jam sidis  
 kaŝitaj en la ĉevalo meze de la kunvenintaj Troianoj; ĉar la  
 Troianoj mem ĝin estis trenintaj sur la akropolon.  
 505 Tiel ĝi tie staris, kaj la Troianoj, ĉirkaŭ ĝi sidante,  
 priparoladis senorde ĉiajn planojn. Trispeca plano plaĉis al  
 ili: ĉu disbategi per la senkompata kupro la kavan lignan  
 egaĵon, ĉu ĝin treni ĝis la supro de la akropolo kaj tiam faligi  
 de la rokoj, ĉu ĝin lasi stari kiel grandan dediĉaĵon por esti  
 510 repaciga rimedo por la Dioj, kiel do ankaŭ poste estis okazonta:  
 ĉar estis al la urbo destinite pereji, kiam ĝi havus interne de  
 la muregoj la grandan lignan ĉevalon, en kiu sidis ĉiuj plej  
 kuraĝaj el la Argeioj, portante la morton kaj pereon al la Troi-  
 anoj. Plue li kantis kiel la filoj de la Aĉaĵoj, elrapidinte el  
 515 la ĉevalo kaj forlasinte la kavan embuskon, ruinigis la urbon.  
 Ankaŭ li kantis ke ili, irante de unu loko al la alia, ĝisfunde  
 detruis la alte kuŝantan urbon, sed ke Oduseus, simila al Ares,  
 kun la disimila Menelaos iris al la domo de Deiphobos. Kaj  
 diris la kantisto, ke ĉi tiu estis tie malevitinta la plej teruran  
 520 militon kaj fine ankaŭ venkinta per helpo de la grandanima  
 Athene.

Tion prikantis la gloriĉa kantisto; sed Oduseus kormoliĝis,  
 kaj de sub liaj okulharoj malsekigis larmoj liajn vangojn.  
 Kiel virino ploras, kuŝanta sur sia mortinta edzo, kiu antaŭ la  
 urburegoj kaj en la unua vico falis, batalante por deteni de  
 525 siaj urbo kaj infanoj la tagon de la perejo — ŝi, vidante lin  
 mortanta kaj ankoraŭ agonianta, sin ĵetas sur lin kaj laŭte  
 vekrias; sed la malamikoj trafas per la lancoj la forkurantojn  
 en dorso kaj ŝultroj kaj ili ŝin kondukas for en malliberecon por  
 530 labori kaj esti malfeliĉa; kaj ŝiaj vangoj ekvelkas de plej  
 kompatinda malĝojo — tiel Oduseus verŝis kompatindan  
 larmon de sub la okulharoj. Tiam ĉiuj aliaj ne rimarkis ke li  
 verŝis larmojn, sed nur Alkinoos lin observis kaj rimarkis ĝin,  
 sidante proksime al li, kaj aŭdis ke li ĝemadis profunde.  
 535 Tuj li nun parolis meze de la remŝipamaj Phaiakoj:

„Aŭskultu, ĉefuloj kaj regantoj super la Phaiakoj! Demodokos nun ĉesigu la ludadon de la laŭtsona liro; ĉar neniel kantas li ĉi tion je plaĉo de ĉiuj. De kiam ni vespermanĝantaj estas kaj ekkantis la dieca kantisto, de tiam nia gasto ankoraŭ

540 ne ĉesigis sian malĝojan ĝemadon; tutcerte ĉirkaŭas ĉagrenolian animon. Nu do, la kantisto silentu, por ke ni ĉiuj kune ĝoju, gastigantoj kaj gasto, ĉar tiel estas multe pli konvene; ĉar por la estimenda gasto ĉi ĉio ja estas pretigita, [dumvoja

545 akompano kaj amikecaj donacoj, kiujn ni donis al li pro altes-timo. Ĉar gasto kaj peteganto estas kvazaŭ frato por la viro kiu eĉ nur malmulte komprenas per sia intelekto]. Tial vi ne kaŝu per ruzaj elpensajoj kion mi al vi demandas; ĉar estas

550 pli konvene ke vi parolas. Diru la nomon, per kiu vin nomis tie viaj patrino kaj patro kaj la aliaj, la urbanoj kaj ili kiuj loĝas ĉirkaŭ la urbo; neniu el la homoj ja tute sennoma estas, nek la ordinara viro nek la nobelo, tuj post kiam li naskiĝis, sed la gepatroj donas nomon al ĉiuj de post la naskiĝtago.

555 Diru ankaŭ al mi vian landon kaj viajn popolon kaj urbon, por ke la ŝipoj tien vin konduku, alcelante tien en la spirito. Ĉar la Phaiakaj ŝipoj ne havas direktistojn, kaj ankaŭ ne direktilojn, kiel aliaj ŝipoj tiujn havas, sed ili scias mem la decidojn kaj pensojn de l' viroj kaj ili konas la urbojn kaj

560 fruktodonajn kampojn de ĉiuj homoj; kaj kaŝite en nuboj kaj nebulo ili rapide transveturas la profundon de la maro. Kaj neniam ekzistas timo ke ili difektiĝos aŭ pereos. [Sed ĉi tion mi aŭdis kelkfoje de mia patro Nausithoos, kiu diris ke

565 Poseidon nin envias ĉar ni donas sendanĝeran akompanon al ĉiuj. Li diris ke iam tiu Diaĵo fortike konstruitan ŝipon de la Phaiakaj viroj, revenantan de akompanon, frakasos sur la nebuleca maro kaj ke li ĉirkaŭigos ĉirkaŭ nian urbon altan

570 montaron. Tiel parolis la grizulo; kaj tion eble la Diaĵo povus plenumi aŭ lasi neplenumita, kiel al li plaĉis en la koro]. Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj rakontu ĝin laŭvere, kien vi erarvagadis kaj en kiujn landojn de la homoj vi alvenis, kaj nomu ilin mem kaj ankaŭ iliajn bele kuŝantajn urbojn, kaj diru

575 kiuj el ili estas malamikecaj kaj sovaĝaj kaj nejustaj kaj kiuj estas gastamaj kaj havas direspektan animon. Diru plue kial vi ploras kaj profunde en via koro ĝemas, aŭdante la pereon de la Argeiaj Danaoj kaj de Ilion. Tion ja estas kaŭzintaj la Dioj, kaj ili estas destinintaj la pereon por la homoj, por ke

580 la kanto ĝin rakontu ankaŭ al la posteuloj. Ĉu eble iu boparenco de vi pereis antaŭ la muregoj de Ilion, noblulo, bofilo aŭ

bopatro, kiuj estas plej karegaj al ni post nia propra sango kaj familio? Aŭ ĉu eble iu kunulo, viro inklina al komplezo, kaj noblulo? Ĉar ne malpli kara ol frato estas al ni kunulo kiu inklina estas al saĝeco.”

## NAŬA KANTO.

### PRI LA KIKLOPOJ.

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Ho reganto Alkinoos, plej bonega inter ĉiuj popoloj! vere, tio estas bela, aŭskulti je tia kantisto, kia ĉi tiu estas, egalanta la Diojn rilate la voĉon. Ĉar mi opinias, ke oni ne povas deziri ion pli agrablan ol kiam gajeco regas tra la tuta popolo kaj la gastoj sidante envice, aŭskultas en la domo je la kantisto, kaj kiam antaŭ ili la tabloj plenaj estas de pano kaj viandaĵoj kaj la vinverŝisto, ĉerpante la vinon el la vinmiksujo, tiun portas al la gastoj kaj enverŝas en la pokalojn. Tio ŝajnas al mia animo esti io plej bela. Sed via koro decidis demandi pri miaj multĝemaj suferoj, por ke mi ankoraŭ pli multe plendante ĝemu. Kion mi do rakontos al vi unue, kaj kion laste? Ĉar multajn malfeliĉojn donis al mi la ĉielaj Dioj. Sed nun unue mi diros mian nomon, por ke ankaŭ vi ĝin konu kaj por ke mi poste, forsaviĝinte de la senkompata mortotago, estu via gastamiko, kvankam mi malapude enloĝas mian domon. Mi estas la Laert-ido Oduseus, kiu pro miaj ruzoj estas konata ĉe ĉiuj homoj kaj mia gloro atingas la ĉielon. Mi enloĝas la de malproksime videblan Ithaka kaj sur tiu kuŝas monto, la multfoliara kaj belega Neriton; ĉirkaŭe kuŝas multaj insuloj tre proksimaj unu al la alia, Doulichion kaj Same kaj la arbaror- iĉa Zakunthos. Ithaka mem ebena estas kaj kuŝas plej ekstreme en la maro je la okcidento — la aliaj kuŝas je kelka distanco en la direkto de l'aŭroro kaj de l' suno —, ŝtoneca ĝi estas, sed bona nutristino de junuloj; vere, nenion alian pli dolĉan mi povas imagi ol kiam oni vidas sian propran landon. Certe, tie min volis reteni ĉe si Kalupso, majestoplena inter la Diinoj, [en sia volbiĝanta groto, arde dezirante ke mi iĝu ŝia edzo]; sammaniere min volis reteni en sia palaco la ruza Aiaia Kirke, arde dezirante ke mi iĝu ŝia edzo; sed neniam ili persvadis mian koron en la brusto. [Tiel nenio estas pli dolĉa ol nia patrujo

35 kaj niaj gepatroj, eĉ se oni malapude loĝas en luksa loĝejo en fremda lando, malproksime de siaj gepatroj.] Sed nu do, mi ankaŭ al vi rakontu mian multmizeran hejmenvojaĝon, kiun por mi destinis Zeus, kiam mi forveturis el Troia.

De Ilion min pelis la vento al Ismaros, la urbo de la Kikonoj; 40 tie mi detruis la urbon kaj mortpercigis la enloĝantojn. Sed el la urbo ni kaptakiris la edzinojn kaj multajn posedaĵojn kaj ilin disdividis, por ke neniu min forlasu, ne ricevinte sian parton. Tiam mi ordonis al la miaj, ke ni per rapida piedo forkuru, sed ili, ege stultaj, ne obeis. Tie multe da vino estis 45 trinkata kaj multajn ŝafojn ili buĉis apud la marbordo kaj trenpiedajn kurbokornajn bovojn. Dume la forkurintaj Kikonoj vokis aliajn Kikonojn, kiuj estis iliaj najbaroj kaj, pli multnombraj kaj kuraĝaj, loĝis en la interna parto de la lando kaj kiuj scipovis de sur la militoĉaroj batali kontraŭ la malamikoj 50 kaj se necese, ankaŭ piede. Frumatene ili venis grandamase, tiom, kiom kaj la folioj kaj la floroj, kiuj ekestas en la printempo; tiam proksimiĝis al ni, malfeliĉuloj, la malbona destino de Zeus, por ke ni multajn dolorojn suferu. [Kaj ili komencis la batalon kaj batalis apud la rapidaj ŝipoj kaj ili trafis unu la 55 alian per siaj kuprornamitaj lancoj.] Dum ankoraŭ estis mateno kaj plifortiĝis ankoraŭ la sankta taglumo, tiam ni defendante loktenis kontraŭ ili, kvankam ili pli multnombraj estis; sed kiam la suno komencis malleviĝi kaj venis la tempo, kiam la bovoj estas maljungataj, tiam la Kikonoj cedigis la subigitajn 60 Achajojn. Ses kunuloj kun bonaj tibiŝirmiloj pereis el ĉiu ŝipo; sed ni aliaj evitis la pereon kaj la mortosorton.

De tie ni ŝipveturis pluen kun malĝoja koro, feliĉaj ĉar ni evitis la morton, sed tamen perdinte karajn kunulojn. Sed ne daŭrigis la veturadon miaj ambaŭflanke kurbigitaj ŝipoj, antaŭ 65 ol ni estis tri fojojn vokintaj per la nomo ĉiun el miaj malfeliĉaj kunuloj, kiuj falis sur la ebenaĵo, mortigitaj de la Kikonoj. Sed nun la nubokolektulo Zeus igis ekblovegi la nordan venton en terura ventego kontraŭ la ŝipojn kaj li kaŝis la teron kaj la maron per la nebuloj kaj nokto venis malsupren de la 70 ĉielo. Tiam la ŝipoj, antaŭen kliniĝante, estis kuntiregataj kaj la forto de la vento disŝiris al ili la velojn en tri kaj kvar pecojn. Tiujn ni malhisis sur la ŝipferdekojn, timante la pereon kaj la ŝipojn mem ni rapide remveturigis antaŭen al la firma tero. Tie ni kuŝis du noktojn kaj du tagojn senĉese, dum ni 75 konsumis nian koron pro laceco kaj doloroj. Sed kiam la trian tagon estis komencinta Eos kun belaj harligoj, tiam ni starigis

la mastojn kaj hisis la blankajn velojn kaj sidiĝis; kaj la vento kaj la direktistoj direktis la ŝipojn. Kaj nun mi estus sendifekte atinginta la landon de miaj prapatroj, sed la ondoj  
80 kaj la fluo kaj la norda vento min repuŝis, kiam mi volis fleksveturi ĉirkaŭ Maleia kaj min forpelis de Kuthera.

De tie mi estis kuntrenata dum naŭ tagoj de pereigaj ventoj tra la fiŝriĉa maro; sed la dekan tagon ni surpaŝis la landon de la Lotophagoj, kiuj florajn nutraĵojn manĝas. Tie do ni surbordigis kaj ĉerpis akvon; kaj miaj kunuloj rapide prenis al si la manĝon apud la rapidaj ŝipoj. Sed kiam ni estis ĝuintaj manĝon kaj trinkon, tiam mi elsendis kelkajn kunulojn por esplori, kiaj viroj tie loĝis el la sur la tero panon manĝantaj homoj  
90 [, elektante por tio du virojn kaj kiel trian mi al ili kundonis la heroldon]. Ĉi tiuj, rapide forirante, sin miksis inter la Lotophagojn. Kaj la Lotophagoj ne projektis kontraŭ niaj kunuloj pereon, sed donis al ili da lotoso por gustumi. Sed ĉiu el ili, kiu estis manĝinta la mieldolĉan frukton de la lotoso, ne plu  
95 volis returne alporti sciigojn aŭ reveni, sed ili preferis resti tie meze de la Lotophagoj, manĝante lotoson, kaj forgesi pri la reveno. Sed perforte mi kondukis ilin plorantaj sur la ŝipojn, kaj treninte ilin sub la rembenkojn en la kavaj ŝipoj, mi ilin tie  
100 alligis. Sed al la aliaj fidelaj kunuloj mi ordonis, ke ili senprokraste iru sur la rapidajn ŝipojn, por ke ne kelkiu, manĝante de la lotoso, forgesu la revenon. Ili rapide surŝipiĝis kaj sidiĝis apud la remapogiloj, kaj envice sidante, ili bategis la grizan maron per la remiloj.

De tie ni ŝipveturis pluen kun malĝoja koro. Kaj ni atingis la landon de la trokuraĝaj kaj senleĝaj Kiklopoj, kiuj, fidante al la Dio senmortaj, nek per la manoj plantas nek plugas, [sed ĉio tie kreskas nesemite kaj neplugite: tritiko kaj hordeo  
110 kaj vinberujoj, kiuj portas grandberajn vinberarojn kaj la pluvo de Zeus prospere kreskigas ilin.] Ĉe ili ankaŭ ekzistas nek kunvenoj interkonsiliĝaj nek juĝaj kunsidoj, sed ili loĝas sur la suproj de altaj montaroj en siaj volbigantaj grotoj kaj ĉiu  
115 juĝdecidas super siaj infanoj kaj edzinoj kaj ili ne okupas sin unu kun la alia.

Oblikve kontraŭe de la haveno sin etendas ebena insulo, nek proksime al la lando de la Kiklopoj, nek malproksime de ĝi kaj multarbara; sur tiu insulo vivas nenombreblaj sovaĝaj kaprinoj, ĉar neniam ilin timretenas la paŝo de homoj [kaj  
120 neniam ĝin vizitas ĉasistoj, kiuj penojn trasuferas, iradante trans la suprojn de la montoj]. Nek de ŝafaroj ĝi estas okupita, nek de

- agrikulturo, sed, nesemita kaj neplugita, ĝi ĉiam, tago post tago, estas malplena de viroj, kaj nutras nur blekantajn kaprinojn. Ĉar la Kiklopoj ne posedas ruĝkolorajn ŝipojn kaj ankaŭ ne ekzistas tie ŝipkonstruistoj por pene fabriki bonferdecajn ŝipojn, kiuj, atingante la urbojn de la homoj, povus efektiviĝi ĉiajn aferojn, kiel multfoje la viroj per siaj ŝipoj transiras la maron por viziti unu la alian. Tiaj ŝipveturantoj estus ankaŭ igintaj la insulon bone kulturita. Ĉar neniel la tero estas netaŭga kaj ĝi kreskigus fruktojn ĉiusezonajn; ĉar apud la bordoj de la griza maro estas akvoriĉaj, molaj herbejoj kaj la vinberujoj restus ĉiam fruktodonaj; ankaŭ tie troviĝas ebenaj kampoj kaj tie denskreskan grenokampon oni povus falĉi en ĉiu rikolttempo, ĉar tie graseca estas la suba tavolo de la tero. Plue estas haveno kun taŭga ankrejo, kie ne bezona estas ŝnuro, nek por elĵeti la ankroŝtonojn, nek por alligi la postajn kablojn, sed estas tie eble albordigi la ŝipon kaj resti kelkan tempon, ĝis la koro de la ŝipanoj ilin denove instigas al ŝipveturado kaj ventoj favoraj al ili blovas. Kaj sur la havena digo fluas brila akvo, fonto de sub kaverno, kaj ĉirkaŭe kreskas poploj. Tie ni albordiĝis, kaj iu Diaĵo nin kondukis tra la malluma nokto [kaj estis nenia lumradio por ion vidi]; ĉar ĉirkaŭ la ŝipoj estis densa nebulo kaj ankaŭ la luno ne lumis sur la ĉielo, sed ĝi estis kaŝata de la nuboj. Tiam neniu ekvidis la insulon per la okuloj kaj ankaŭ la longajn ondojn ruliĝantajn al la firma tero ni ne vidis antaŭ ol niaj bonferdecaj ŝipoj albordiĝis, kaj kiam estis alteriĝintaj la ŝipoj, ni malhisis ĉiujn velojn kaj elŝipiĝis mem apud la ondoresaltejo de la maro. Kaj ekdorminte, ni tie atendis la diecan tagiĝon.
- Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam ni mirante trairis la insulon. Kaj la nimfoj, la filinoj de l'egidporta Zeus, peltimigis kelkajn montarajn kaprinojn, por ke miaj kunuloj povu manĝi. Tuj ni prenis el la ŝipoj niajn kurbigitajn arkpafilojn kaj longtubajn ĵetlancojn kaj dividinte nin en tri grupojn ni komencis ĉasi; kaj baldaŭ donis iu Diaĵo abundan ĉaskaptaĵon.
- 160 Dekdu ŝipoj sekvis min kaj ĉiu el ili sortakiris naŭ kaprinojn; sed sola por mi ili dek elektis. Tiel ni sidis tie la tutan tagon ĝis la malleviĝo de la suno, manĝante abundan viandaron kaj trinkante dolĉan vinon; ĉar la ruĝa vino en la ŝipoj ankoraŭ ne estis forkonsumita, sed estis ankoraŭ da ĝi provizo. Ĉar ĉiuj ni estis ĉerpintaj multe da vino en dutenilhavajn kruĉojn, 165 post kiam ni estis venkokupintaj la sanktan urbon de la Kikonoj. Nun ekvidis ni la landon de la proksimaj Kuklopoj kaj la fumon



kaj ni ekaŭdis la voĉojn de ili mem kaj la blekadon de iliaj ŝafoj kaj kaprinoj. Sed kiam malleviĝis la suno kaj alproksimiĝis la krepusko, tiam ni kuŝiĝis apud la ondoresaltejo de la maro.

170 Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam mi kunvo-  
kis kunvenon kaj parolis meze de ĉiuj:

„Vi aliaj restu ĉi tie, miaj fidelaj amikoj! sed mi foriros  
kun mia propra ŝipo kaj miaj propraj ŝipanoj kaj esploros pri  
175 tiuj viroj, kiaj ili estas kaj ĉu ili estas trokuraĝaj kaj sovaĝaj  
kaj nejustaj, aŭ ĉu ili estas gastamaj kaj havas direspektan  
animon.”

Tiel parolinte, mi surŝipiĝis kaj ordonis al miaj kunuloj, ke  
ili ankaŭ mem sin surŝipigu kaj malligu la postajn ŝnuregojn.  
Rapide nun ili iris en la ŝipon kaj sidigis ĉe la remapogiloj;  
180 kaj envice sidante ili bategis la grizkoloran maron per la remiloj.  
Sed kiam ni alvenis apud tiu proksima loko, tiam ni vidis je  
la ekstrema parto, apud la maro, altan kavernon, tegment-  
kovritan de laŭroj; tie multnombraj brutaroj, ŝafoj kaj kaprinoj,  
185 kutimis pasigi la nokton; ĉirkaŭe estis konstruita alta barilo el  
enfositaj ŝtonoj kaj altkreskaj pinoj kaj altfoliaraj kverkoj.  
Tie ankaŭ pasigis kutime la nokton grandega viro, kiu ĉiam  
sola kaj malproksime de la aliaj paŝtis sian brutaron; kaj li  
ne rilatis kun aliaj, sed forizolite li inklinis al maljusteco.  
190 Ĉar li estis grandega mirindulo, kaj li tute ne similis al pano-  
manĝa viro, sed al multarbara pinto de altaj montoj, kiu sin  
levas izolite de la aliaj.

Tiam mi ordonis al la aliaj fidelaj kunuloj resti tie apud la  
195 ŝipo kaj ĝin gardi, sed mi mem foriris, elektinte la dekdu plej  
kuraĝajn el miaj kunuloj; kaj mi kunportis kaprinledan sakon  
da nigra vino dolĉa, kiun estis donacinta al mi la filo de Euan-  
thes, Maron, pastro de Apollon, la protektanto de Ismaros,  
ĉar ni estis pro respekto lin lasintaj viva kun lia infano kaj  
200 lia edzino; ĉar li loĝis en la multarba sanktarbaro de Phoibos  
Apollon; tial li donis al mi belegajn donacojn: li donis al mi  
sep talantojn da bele prilaborita oro; ankaŭ li donis al mi  
tutarĝentan vinmiksujon kaj plue dolĉan, nemiksitan vinon,  
205 diecan trinkaĵon, kiun li estis ĉerpinta en dekdu dutenilhavajn  
kruĉojn entute. Kaj neniu el la sklavo kaj servaj virinoj en la  
domo konis ĝin, sed nur li mem kaj lia kara edzino kaj unu  
mastrumistino. Kaj ĉiufoje, kiam ili volis trinki tiun mioldolĉan  
ruĝan vinon, li plenigis unu pokalon kaj elverŝis sur ĝin dudek  
210 mezurilojn da akvo, kaj dolĉa, dieca, bonodoro tiam elvenis  
el la miksujo; Tiam oni ne volonte sin de ĝi detenus; da tiu

pleniginte grandan sakon, mi kunportis ĝin kaj ankaŭ porvojaĝ-  
ajn vivrimedojn en leda sako; ĉar mia kuraĝa animo antaŭsent-  
is tuj, ke mi iros al viro, naturdotita per grandega forto kaj  
215 al sovaĝulo, nek scianta pri justeco nek pri leĝaj ordonoj.

Baldaŭ ni atingis nun la kavernon, sed ne ene ni lin trovis,  
ĉar li estis paŝanta sur la abunda herbejo sian brutaron. Kaj  
enirante la kavernon, ni mire ĉion rigardis: plektaĵoj estis  
plenŝarĝitaj per fromaĝoj kaj plenplenaj estis la staloj de ŝafoj  
220 kaj kapridoj; ĉi tiuj estis ĉiuj enfermitaj, apartigite laŭ la  
aĝo, aparte la plej maljunaj, aparte la mezaĝaj, kaj ankaŭ  
aparte la lastnaskitaj. Plenaj de selakto estis ĉiuj ujoj, siteloj  
kaj pelvoj, fortike fabrikitaj, en kiujn li kutimis melki; tiam  
al mi petegis miaj kunuloj per insistaj vortoj, ke ni unue  
225 forprenu de la fromaĝoj kaj kun ili reiru kaj post tio rapide pelu  
la kapridojn kaj la ŝafojn el la staloj al la rapida ŝipo kaj tiam  
forveturu sur la ŝaleta akvo; sed mi ne persvadiĝis — kaj  
tamen tio estus estinta multe pli profitodona — ĉar mi volis  
mem lin vidi kaj provi, ĉu eble li donos al mi porgastajn donacojn.  
230 Sed li ne estis estonta afabla por miaj kunuloj, kiam li estis  
aperinta.

Tiam, ekbruliginte fajron, ni oferis, kaj ankaŭ mem ni  
prenis kelkajn fromaĝojn kaj ilin manĝis, kaj tiam ni atendis,  
sidante en la kaverno, ĝis kiam li revenis de la paŝtejoj. Li  
kunportis pezan ŝarĝon da seka ligno por prepari sian vesper-  
235 manĝon, kaj ĝin ĵetegante en la kavernon li kaŭzis teruran  
brulon; timante ni kurrapidis al la interno de la kaverno. Sed  
li kunpelis en la vastan kavernon ĉiujn grasajn ŝafojn, kiujn  
li kutimis melki, sed la virajn, la virŝafojn kaj la kaprojn,  
240 li lasis ekstere, ene de la alta barilo. Kaj post tio li alten  
levis grandan pezan pordoŝtonon kaj ĝin metis en la enirejon;  
Tiun ŝtonon ne povus fortransporti de la loko dudek du fortikaj  
kvarradaĵ veturiloj. Tiom grandan kaj altan ŝtonegon li metis  
en la eniron. Sidigante li nun komencis melki la ŝafojn kaj  
245 blekantajn kaprinojn, tute laŭ konveno, kaj sub ĉiun li metis  
unu suĉidon. Tuj li kazeigis nun la duonon de la blanka lakto  
kaj farante bulojn el ĝi, li metis tiujn en plektitajn korbojn;  
sed la alian duonon li verŝis en ujojn, por ke li povu da ĝi  
250 preni kaj trinki dum la vespermanĝo. Sed kiam li ageme estis  
farinta sian laboron, tiam li ekbruligis fajron kaj nun li ekri-  
markis nin kaj li demandis al ni:

„Fremduloj, kiuj vi estas? De kie vi veturis sur la malseka  
marvojo? Ĉu eble estas por aferoj? Aŭ ĉu vi hazarde vagadas

255 sur la maro same kiel la piratoj, kiuj, riskante sian vivon, vagadas kaj alportas malfeliĉon al la alilandanoj?"

Tiel li parolis, sed nia koro rompiĝis, ĉar ni ektimis pro la malalta voĉo kaj la grandegulo mem. Sed spite al tio respondante, mi lin alparolis per la vortoj:

260 „Ni estas Aĉaioj, kiuj, de Troia forpelite de ĉiaj ventoj sur la grandan abismon de la maro, kaj hejmen sopirante, laŭiris ĉiajn vojojn kaj direktojn; tiel certe plaĉis al Zeus decidi. Ni gloras nin esti el la popolo de la Atre-ido Agamemnon, kies bonfamo nun estas plej granda sub la ĉielo; tiom potenca

265 urbon li ja ruinigis kaj multajn popolojn li pereigis. Sed ni, venante al viaj genuoj, vin petegas, ĉu vi bonvolos doni al ni iun porgastan donacon aŭ ĉu vi alie volos donaci iun donacon, kiel estas kutimo rilate fremdulojn. Kaj ankaŭ, amiko, respektu

270 la Diojn, ĉar petegantoj ni estas. Zeus ja estas la protektanto de la petegantoj kaj fremduloj, [la protektanto de la gastorajto, kiu ĉiam akompanas estimindajn fremdulojn].”

Tiel mi parolis sed tuj li respondis al mi kun senkompata animo:

„Stultulo vi estas, fremdulo, aŭ vi venis de malproksime, ĉar vi konsilas al mi, ke mi timu la Diojn aŭ evitu ilian venĝon;

275 la Kiklopoj sin ja ne okupas pri la egidporta Zeus kaj pri la feliĉegaj Dioj, ĉar ni estas multe pli potencaj. Kaj mi tute ne, volante eviti la malamikecon de Zeus, indulgos vin aŭ viajn kunulojn, se mia animo min ne instigas al tio. Sed diru al mi, kie vi venante alterigis vian forlike konstruitan ŝipon, ĉu

280 je la ekstremo de la insulo aŭ proksime, por ke mi sciu ĝin.”

Tiel li parolis, volante min provi, sed ne restis tio nerimarkita de mi, kiu jam multon estis spertinta, sed mi ree lin alparolis per ruzaj vortoj:

„Mian ŝipon frakasis la tertremigulo Poseidon, ĵetante ĝin kontraŭ la rokojn je la fino ekstrema de via lando, kie li ĝin

285 puŝis kontraŭ elstarantan rifon, ĉar la vento ĝin forkondukis el la maro. Sed mi evitis kun ĉi tiuj kunuloj la minacian pereon.”

Tiel mi parolis, sed li kun senkompata animo nenion respondis al mi, sed eksaltante li metis la manojn sur kelkajn kunulojn

290 kaj kaptinte du el ili, li ilin batis kiel hundidojn kontraŭ la teron; kaj la cerboj fluis sur la fundon kaj malsekigis la teron. Post tio, distranĉante membron post membro, li pretigis sian vespermanĝon. Kaj kiel montara leono li formanĝegis — kaj nenion li postlasis — intestojn kaj karnon kaj medolplenaĵojn ostojn. Plorĝemante ni tiam etendis la manojn al Zeus, kiam

295 ni vidis tiun friponan fi-faron kaj senespero ekkaptis nian  
 koron. Sed kiam la Kiklopo estis pleniginta sian teruran ventr-  
 egon, manĝante homan karnon kaj trinkante nemiksitan lakton,  
 tiam li kuŝiĝis en la kaverno, sin etendante inter la ŝafoj.  
 Tiam mi ekintencis en mia grandkuraĝa koro, proksimigi min  
 300 al li, elingigi la akran glavon, pendantan je mia flanko kaj  
 per la mano lin palpante, piktrafi lin en la brusto, kie la dia-  
 fragmo enfermas la hepaton; sed alia ekpenso min retenis. Ĉar  
 tie estus ankaŭ ni mortintaj en minaca perejo. Ni ja ne kapablus  
 305 de la alta enirejo forpuŝi per la manoj la pezan ŝtonon, kiun li  
 estis metinta antaŭ ĝin. Tiel niĝemante tie atendis la diecan Eos.

Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam li ekbruligis  
 fajron kaj melkis la belegajn ŝafojn, tute laŭ konveno, kaj  
 310 metis suĉidon sub ĉiun. Sed kiam li ageme estis farinta tiun  
 laboron, tiam li denove kaptis du kunulojn kaj pretigis per  
 ili sian matenmanĝon. Kaj kiam li estis manĝinta, li pelis la  
 grasajn ŝafojn el la kaverno, post kiam li estis senpene for-  
 preninta la grandan pordoŝtonon. Sed post tio li denove ĝin  
 antaŭmetis, kvazaŭ li metus la kovrilon sur sagujon. Kaj  
 315 laŭte fajfante la Kiklopo nun direktis siajn grasajn ŝafojn al  
 la montaro; sed mi postrestis, intencante malbonon, ĉu eble  
 mi povos venĝi kaj ĉu Athene donos al mi gloron. Ĉi tio  
 ŝajnis al mi en la spirito la plej bona decido: kuŝis ja la granda  
 bastonego de la Kiklopo apud stalo, verda trunko de olivujo;  
 320 ĉi tiun li estis detranĉinta por kunporti ĝin, kiam ĝi estus  
 sekiginta, kaj ni taksis ĝin, dum ni ĝin rigardis, same longa  
 kiel la maston de dudekremila, nigra, vasta ŝarĝoŝipo, kiu  
 transiras la grandan marabismon; tiel granda estis ĝia longeco  
 kaj tiel granda ĝia dikeco je la aspekto. Antaŭ tiu mi haltis  
 325 kaj dehakis de ĝi foston, longan je unu klafto kaj ĝin metis  
 antaŭ miajn kunulojn kaj mi ordonis al ili hakglatigi ĝin;  
 kaj ili ĝin faris glata. Kaj mi venis al ĝi kaj akiris la ekstremon  
 kaj tuj mi ĝin nun prenis kaj turnadis en la flamanta fajro por  
 malmoligi ĝin. Post tio mi ĝin sekure formetis, kaŝante ĝin  
 330 sub la sterkon, kiu tra la tuta kaverno ege grandamase kuŝis;  
 kaj nun mi ordonis al la aliaj, ke ili decidu per lotskuado,  
 kiuj el ili riskos kune kun mi la foston levi kaj tordi en lian  
 okulon, kiam la dolĉa dormo estos veninta al li. Kaj tiun  
 taskon lotakiris tiuj kvar kunuloj, kiujn ankaŭ mi volonte  
 335 estus elektinta, sed mi mem inter ili min kalkulis kiel la kvinan.

Vespere li revenis, paŝtante siajn bellanajn ŝafojn. Tuj li  
 pelis nun en la vastan kavernon la grasajn ŝafojn, ĉiujn sen-

escepte, kaj neniun li lasis interne de l'alta barilo, ĉu suspektante  
 ion, ĉu ĉar iu Diaĵo tiel al li instigis. Kaj post tio li alten  
 340 levis la pezan pordoŝtonon kaj ĝin metis en la enirejon.  
 Sidiĝante li nun komencis melki la ŝafojn kaj blekantajn  
 kaprinojn, tute laŭ konveno, kaj sub ĉiun li metis ŝian suĉidon.  
 Sed kiam li ageme estis farinta sian laboron, tiam li denove  
 kaptis du (kunulojn) kaj pretigis per ili sian vespermanĝon.  
 345 Tiam mi proksimiĝante alparolis la Kiklopon, dum mi tenadis  
 en la manoj pelvon da nigra vino:

„Kiklopo! jen, eltrinku vinon, post kiam vi estas manĝinta  
 homan karnon, por ke vi sciu, kian bongustan trinkaĵon enhavis  
 nia ŝipo. Por vi mi ĝin kunportis kiel trinkoferaĵon, por ke  
 350 kompatante vi min lasu reveni hejmen; sed ne plu elteneble vi  
 furiozas. Maliculo! kiel vin povus poste ankoraŭ viziti iu el la  
 multnombraj homoj? Ĉar vi ne agis laŭ konveno!”

Tiel mi parolis, sed li akceptis kaj eltrinkis ĝin. Kaj treege  
 li ĝuis, trinkante la dolĉan vinon kaj li denove demandis:

355 „Donu al mi bonvole ankoraŭfoje da ĝi kaj diru al mi tuj  
 vian nomon, por ke mi al vi donu porgastan donacon, pro kiu  
 vi ĝojos. [Ĉar ankaŭ ĉe la Kiklopoj kreskigas la grendona tero  
 grandberajn vinberarojn, kaj la pluvo de Zeus ilin prosperigas;  
 sed ĉi tio estas ekstrakto el ambrozio kaj nektaro.]”

360 Tiel li parolis kaj denove mi donis al li perlantan vinon.  
 Trifoje mi da ĝi alportis kaj donis kaj trifoje li eltrinkis kun  
 neprudenteco. Sed kiam la vino al la Kiklopo ekmontis al la  
 kapo, tiam mi alparolis lin per vortoj afablaj:

365 „Kiklopo, ĉu vi demandas mian glororiĉan nomon? Nu do,  
 mi ĝin eldiros al vi; sed vi al mi nun donu la porgastan donacon,  
 kiel vi promesis. „Neniu” estas mia nomo, kaj „Neniu”  
 min nomas miaj patrino kaj patro kaj ĉiuj aliaj kunuloj.”

Tiel mi parolis, sed tuj li respondis al mi kun senkompata  
 animo:

370 „Laste mi formanĝos Neniun inter liaj kunuloj, sed ĉiujn  
 aliajn antaŭe; tio al vi estos mia porgasta donaco.”

Li parolis kaj posten ŝanceliĝante li falis dorsen, kaj tiam li  
 kuŝis tie, la dikan nukon flanken klininte, kaj la ĉiovenka  
 dormo lin ekkaptis; el lia gorgo fluegis vino kaj pecoj da homa  
 karno; ĉar li vomis vinebria. Tiam mi puŝis la foston sub  
 375 grandan amason da cindro por ke ĝi varmiĝu; tiam per vortoj  
 mi kuraĝigis ĉiujn miajn kunulojn, por ke neniu ektimante  
 ĉesu partopreni. Sed kiam la olivuĵa fosto baldaŭ en la fajro  
 estis ekbrulonta, kvankam ĝi estis ankoraŭ verda, kaj ĝi

ŝajnis tute ardeganta, tiam ni ĝin prenis el la fajro kaj miaj  
 kunuloj starigis ĉirkaŭ ĝin; kaj iu granda Diaĵo nin instigis  
 380 al kuraĝo. Nun ili prenis la olivujan foston, akrigitan je la  
 fino, kaj ĝin puŝegis en lian okulon; sed mi de sur la supro  
 tordis ĝin, kiel, kiam viro boras per drillborilo en ŝipotrabon,  
 385 kaj liaj kunuloj sube per la rimeno ĝin ekmovas, ambaŭflanke  
 ĝin prenante, tiel ke ĝi enpenetras, ĉiam pli profunden. Tiel  
 ni metis en lian okulon la ardpintan foston kaj ĝin tordadis  
 kaj la sango ĉirkaŭfluis la varman foston: ĉiuflanke la ardo  
 390 de la brulanta pupilo bruldifektis liajn okulharojn kaj brovojn  
 kaj la okulfluidaĵo siblis de la fajro. Kiel kiam metalforĝisto  
 grandan hakilon aŭ duoblan hakilon, kiun li volas malmoligi,  
 kun laŭta siblado trempas en malvarman akvon — ĉar tio  
 donas fortikecon al la fero — tiel siblis lia okulo ĉirkaŭ la  
 395 olivuja fosto. Treege terure li nun vekriadis — kaj la rokecaj  
 muroj ĉirkaŭe resonis — kaj ektimante ni rapidis for; tiam  
 li tiris el sia okulo la foston, makulitan de multe da sango, kaj  
 ĵetis ĝin for de si kaj furioze li batis per la manoj ĉirkaŭ si, kaj  
 tiam li laŭtvoĉe vokis la Kiklopojn, kiuj loĝis ĉirkaŭ li en  
 400 kavernoj inter la multventegaj montosuproj. Ĉi tiuj, aŭdante  
 lian kriadon, venis el ĉiuj direktoj kaj ĉirkaŭante lian kavernon  
 ili demandis, kio lin turmentas:

„Kio do, Poluphemos, estas vin ĉagreninta tiel ege, ke vi  
 tiel kriegis meze de la didevena nokto kaj sendormaj faris nin?  
 405 Iu el la mortidevuloj ja ne volas kontraŭ via volo forpeli  
 viajn ŝafojn? Iu ja ne volas vin mem mortigi perruze aŭ  
 perforte?”

Ilin siavice alparolis de el sia kaverno la fortega Poluphemos:

„Ho amikoj! Neniu min volas mortigi perruze kaj ne  
 perforte.”

Ili respondante parolis la flugilhavajn vortojn:

410 „Se do neniu vin perforte atakas en via soleco, nu do, necblas  
 eviti malsanon senditan de la granda Zeus, sed preĝu al via  
 patro, la reĝo Poseidon.”

Tiel ili parolis kaj tiam foriris; sed en mia koro mi ridis ĉar  
 mia nomo kaj mia bonega ruzo lin estis trompintaj. Gemante  
 415 kaj turmentate de doloroj la Kiklopo nun palpante per la  
 manoj forpenis la ŝtonon de la eniro kaj tiam li mem sidigis  
 en la enirejo, etendante la manojn, por provi, ĉu eble li povos  
 kapti iun, kiu inter la ŝafoj klopodus iri eksteren; ĉar eble  
 li esperis en sia koro, ke mi estos tiel stulta. Sed mi dume estis  
 420 pripensanta, kiamaniere povos plej bone ĉio okazi kaj ĉu mi

povos trovi savon el la morto por miaj kunuloj kaj mi mem. Mi kunteksis ĉiajn ruzaĵojn kaj planojn, ĉar koncernis nian vivon; ĉar granda malbono estis proksima. Ĉi tio nun ŝajnis al mi en mia spirito la plej bona decido: estis virŝafoj bon-  
 425 nutritaj kaj denslanaj, belaj kaj grandaj, kun violkolora lano; senbrue mi tiujn kunligis per flekseblaj branĉetoj, sur kiuj kutimis dormi la Kiklopo, la monstrulo, inklina al maljustaĵoj kaj ĉiufoje mi prenis tri virŝafojn kune; ĉiu meza portis viron,  
 430 kaj ambaŭ aliaj iris ambaŭflanke por ŝirmprotekti la kunulojn. Tiel do ĉiufoje tri virŝafoj portis unu viron; sed mi — ĉar estis unu virŝafo multsupere plej granda inter ĉiuj ŝafoj — ĉirkaŭprenis ties dorson kaj sub lia harkovrita ventro kurbigante min, mi tiel restis pendanta; kaj envolvinte la manojn en la densegan lanon mi tenadis min konstante al ĝi kun persistema animo.  
 435 Tiel ni tie ĝemante atendis la diecan Eos.

Sed kiam aperis la frumatena rozofingra Eos, tiam la virŝafoj elrapidis al la paŝtejoj, sed la inaj ŝafoj blekante restis nemelkitaj en la staloj, ĉar iliaj mamoj estis laktoplenaj. Sed ilia mastro, turmentata de teruraj doloroj, palpadis la dorsojn de ĉiuj virŝafoj rekte starantaj; sed tion ne rimarkis la stultulo, ke miaj kunuloj estis ligitaj sub la brustoj de la lankovritaj virŝafoj. Laste el ĉiuj iris eksteren mia virŝafo, ŝargite per sia  
 445 lano kaj per mi kun miaj inteligentaj pensoj. Lin palpante parolis al li la fortega Poluphemos.:

„Kara virŝafo! kial vi tiel, lasta el ĉiuj, iras el la kaverno? Alie vi ja neniel venis post la aliaj virŝafoj, sed multsupere unua vi paŝtas vin kaj grandpaŝe irante vi formangas la delikat-  
 450 ajn florojn de la herbejo kaj unua vi alvenas al la fluoj de la riveretoj kaj ankaŭ vespere vi unua deziras reiri al la stalo; sed nun vi venas plej laste. Aŭ ĉu vi ĉagreniĝas, ĉar forestas la okulo de la mastro? Tiun tutblindigis viro malbona kun siaj abomenaj kunuloj, post kiam li estis senpoviginta min  
 455 per vino, Neniu, kiu laŭ mia opinio ankoraŭ ne estas evitinta sian pereon. Ho, se vi nur povus min kompreni kaj estus parolkapabla por diri al mi, kie li sin kaŝas por eviti mian koleron; tiam liaj cerboj diskrevus en ĉiujn direktojn tra la kaverno, dum mi lin batfrakus sur la teron kaj mia koro retransviliĝus  
 460 de la malbono, kiun al mi faris tiu senvalora Neniu,“

Tiel parolinte, li lasis eksteren iri la virŝafon. Sed kiam ni estis venintaj je malgranda distanco de la kaverno kaj la barilo, tiam unue mi malligis min mem de sub la virŝafo kaj tiam mi liberigis miajn kunulojn. Rapide ni kunkpelis la grandpaŝajn



- 465 virŝafojn grasegajn laŭlonge de multaj malrektaj vojoj, ĝis kiam ni alvenis ĉe la ŝipo; kaj tre bonvene ni alvenis ĉe niaj karaj kunuloj, evitante la morton; sed la pereintojn ili vekriante priploris. Sed mi al ili ne permesis plori kaj faris ordone okulsignon al ĉiu; tiam mi komandis al ili, ke ili rapide metu la multnombrajn, belharajn ŝafojn en la ŝipon kaj forveturu sur la saletan akvon de la maro. Post tio ili rapide surŝipiĝis kaj sidiĝis apud la remapogiloj kaj envice sidante, ili bategis per la remiloj la grizan maron. Sed kiam mi estis je tia distanco, ke krianta homo ankoraŭ povas sin aŭdebligi, tiam mi alparolis la Kiklopon per incitegaj vortoj:
- 475 „Kiklopo! do tamen ne estis viro senforta, kies kunulojn vi volis formanĝegi kun fortega perforto en via kurbiĝanta kaverno. Tutcerte estis vin trafanta malfeliĉo, krudelulo! ĉar vi ne hontis formanĝegi viajn gastojn en via domo; tial vin estas punintaj Zeus kaj la aliaj Dioj.”
- 480 Tiel mi parolis, sed li ankoraŭ pli koleriĝis en sia koro kaj derompante la supron de alta monto, li ĝin ĵetegis kaj ĝi falis antaŭ la nigra antaŭstevenco de la ŝipo [kaj ne multe mankis, ke ĝi estus trafinta la postan parton de la direktilo]. Kaj supren ondegis la marakvo de sub la malsupren falanta rokego; tiam
- 485 el la maro returne fluanta ondego ree kunportis la ŝipon al la tero kaj ĝin devigis iri al la marbordo. Sed mi kaptis per la manoj tre longan stangon kaj la ŝipon puŝis oblikve for de ĝi. Tiam mi instigis miajn kunulojn kaj per la kapo signante, mi donis al ili miajn ordonojn, ke ili sin ĵetu sur la remilojn,
- 490 por ke ni evitu la pereon, kaj antaŭen kliniĝinte, ili forremis. Sed kiam ni, traveturante la maron, estis je duoble pli granda distanco ol la unuan fojon, tiam mi volis denove alparoli la Kiklopon, sed de ĉiuj flankoj klopodis min deteni miaj kunuloj per afablaj vortoj:
- „Trokuraĝulo! kial vi volas inciti tiun sovaĝan viron?
- 495 Ankaŭ ĵus li ja, ĵetante ĵetilon en la maron, ree puŝis nian ŝipon al la tero kaj ni jam kredis tie pere. Se li tie estus aŭdinta ies voĉon aŭ ekkrion, tiam li estus frakasinta niajn kapojn kaj la trabojn de la ŝipo, ĵetante akrepintan rokstonegon; ĉar tiel fortece li ĵetas.”
- 500 Tiel ili parolis, sed ili ne persvadis mian grandkuraĝan koron, sed denove mi parolis al li kun kolerega animo:
- „Kiklopo! se eble iu el la mortidevaj homoj demandos al vi pri la hontinda blindeco de via okulo, tiam diru, ke blindigis

505 ĝin la urbdetruulo Odusseus, la filo de Laertes, loĝanta en Ithaka en sia loĝejo.”

Tiel mi parolis, sed dolorĝemante li respondis per la vortoj:

„Ve! tutcerte min nun trafas ĵam de longe antaŭdirita profetaĵo. Iam ĉi tie estis iu profeto, bela kaj granda, la Eurumido Telemos, kiu superis je la kono de la profetado kaj kiu kiel  
510 profeto estis maljuniĝinta inter la Kiklopoj. Ĉi tiu al mi diris, ke ĉi ĉio iam plenumiĝos, nome ke mi estos prirabata de vidpovo per la manoj de Odusseus. Sed ĉiam mi atendis, ke ĉi tien venos viro granda kaj bela, naturdotita per grandega forto;  
515 sed nun prirabis min de mia vidkapablo iu eta kaj senvalora kaj senforta ulo, post kiam li estis senpoviginta min per vino. Sed nu do, venu ĉi tien, Odusseus! por ke mi metu antaŭ vin porgastajn donacojn kaj instigu la glorriĉan tertremigulon, ke li donu al vi akompanon; ĉar mi estas lia filo kaj li sin  
520 glorasesti mia patro; li mem kuracos min, se li volas, kaj neniu alia, nek el la feliĉegaj Dioj nek el la mortidevaj homoj.”

Tiel li parolis; sed respondante mi lin alparolis:

„Ke mi povus vin prirabi de spiro kaj vivo kaj sendi en  
525 la loĝejon de Hades, same certe kiel eĉ la tertremigulo ne kuracos vian okulon.”

Tiel mi parolis, kaj li post tio, etendante siajn manojn al la steloriĉa ĉielo, preĝis al la reĝo Poseidon:

„Aŭdu min, Poseidon, nigrahara terĉirkaŭulo. Se vere mi estas via ido kaj se vere vi gloras vin esti mia patro, tiam permesu, ke la urbdetrua Odusseus ne revenu hejme [ , la filo de  
530 Laertes, loĝanta en Ithaka en sia loĝejo]. Sed se estas al li destinite revidi siajn karulojn kaj reveni al sia bone konstruita loĝejo kaj al la lando de siaj prapatroj, tiam li revenu malfrue kaj mizera, sur fremda ŝipo kaj perdinte ĉiujn kunulojn kaj li  
535 trovu malfeliĉojn en sia domo.”

Tiel li parolis preĝante kaj lin aŭdis la nigrahara Dio. Sed nun li levis denove ankoraŭ multe pli grandan ŝtonegon kaj ĝin swingante, li ĵetis kaj li kundonis al ĝi nemezureblan rapidecon, — kaj li ĵetegis ĝin post la ŝipon kun nigra antaŭstevano,  
540 kaj ne multe mankis, ke ĝi estus trafinta la postan parton de la direktilo. [Kaj supren ondegis la marakvo de sub la malsupren falanta rokego; sed nun la ondoj puŝegis la ŝipon antaŭen kaj ĝin devigis iri al la marbordo.]

Sed kiam ni estis alvenintaj al la insulo, kie la aliaj bonferdekaj ŝipoj kune kuŝis, kaj ĉirkaŭ kiuj niaj kunuloj malĝoj-  
545 ante sidadis, ĉiam arde atendante nin, tiam ni, tie alveninte,

- surterigis nian ŝipon sur la marbordsablon, kaj elŝipiĝis mem apud la ondoresaltejo de la maro. Kaj ni metis el la kava ŝipo la virŝafojn de la Kiklopo kaj ilin dividis inter ni, por ke neniu min forlasu, ne ricevinte sian parton. Sed la grandan virŝafon
- 550 donis miaj kunuloj kun bonaj tibiŝirmiloj ĉe la dividado de la ŝafoj al mi sola kiel apartan honorigon. Tiun mi oferis sur la marbordo kaj forbruligis la femurostojn honore al Zeus, la nigranuba Kron-ido, kiu super ĉiuj regas. Sed ĉi tiu ne atentis
- 555 pri la oferaĵoj, [sed li pripensis, kiel ĉiuj bonferdekaj ŝipoj kaj miaj fidelaj kunuloj pereos. Tiel ni sidis tie la tutan tagon ĝis la malleviĝo de la suno, manĝante abundan viandaĵon kaj
- 560 trinkante dolĉan vinon. Sed kiam malleviĝis la suno kaj alproksimiĝis la krepusko, tiam ni ekkuŝis apud la ondoresaltejo de la maro. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam mi instigis miajn kunulojn kaj al ili ordonis, ke ili sin surŝipigu kaj malligu la postajn ŝnuregojn. Rapide ili nun iris en la ŝipojn kaj sidiĝis apud la remapogiloj kaj envice sidante,
- 565 ili bategis la grizan maron per la remiloj]. De tie ni ŝipveturis pluen kun malĝoja koro, feliĉaj ĉar ni evitis la morton, sed tamen perdinte karajn kunulojn.

---

## DEKA KANTO.

### PRI AIOLOS, LA LAISTRUGONOJ KAJ KIRKE.

- Nun ni atingis la insulon Aiolia; tie loĝis la Hupot-ido Aiolos, kara al la senmortaj Dioj, sur naĝanta insulo. Ĝin tute ĉirkaŭas kupra muro netrapenetrebla kaj glata rokego sin levas supren.
- 5 De li devenas en lia loĝejo dek du infanoj, ses filinoj kaj ses filoj en plena juneco. Tie li donis siajn filinojn al siaj filoj kiel edzinojn. Ĉi tiuj ĉiam manĝas ĉe sia kara patro kaj sia zorgema patrino kaj antaŭ ili tiam kuŝas sennombraj refreŝigaj
- 10 manĝaĵoj, kaj rostodoras la domo kaj dumtage ĝi resonas ĉirkaŭe de la kantado. Sed dumnokte ili dormas flanke de siaj estimindaj edzinoj en la kovraĵoj kaj en la ĉizajhavaj litoj. Kaj tie ni venis en ilian urbon kaj en ilian belan loĝejon. Tutan monaton li gastigis min kaj li demandis al mi pri ĉio, pri
- 15 Ilion kaj la ŝipoj de la Argeioj kaj la reveno de l'Aĉaioj kaj mi rakontis ĉion al li konvene. Sed ankaŭ kiam mi demandis pluan vojaĝon kaj petis al li, ke li lasu min foriri, tiam li

neniel rifuzis kaj havigis al ni ĉion por la forvojaĝo. Li donis al mi la felon de naŭjara bovo, kiun li estis senhaŭtiginta, kaj en ĝin li ligis la vojojn de la fajfegaj ventoj, — ĉar la Kron-ido estis lin farinta estro de la ventoj, por ĉesigi kaj ekblovigi, kiun venton ajn li volis — kaj tiam li ĝin ligis en la kava ŝipo per brila, arĝenta ŝnuro, por ke nenio, eĉ ne malmulte, elblovu. Sed por mi li tiam blovigis la blovon de la okcidenta vento por puŝi niajn ŝipojn kaj nin mem. Sed ne tute estis plenumota tio: ĉar pro nia propra neprudenteco ni pereigis nin.

Naŭ tagojn ni tiel veturadis dumnokte kaj dumtage, sed je la deka jam ekaperis la prapatra lando kaj ni jam ekvidis proksime la paŝtistojn ĉirkaŭ la fajroj. Tiam surprizis min, kiu lacega estis, la dolĉa dormo, ĉar senĉese mi direktis la ŝkoton de la velo kaj al neniu alia el miaj kunuloj mi estis ĝin doninta, por ke des pli baldaŭ ni atingu la landon de niaj prapatroj. Sed nun komencis miaj kunuloj paroli unu kun la alia kaj ili opiniis ke mi kunportas hejmen oron kaj arĝenton, donacojn de la grandkuraĝa Hupot-ido Aiolos. Kaj tiel kelkiu parolis, alrigardante sian najbaron:

„Mirinde! kiel ŝatata kaj honorata ĉi tiu estas de ĉiuj homoj, en kies urbon kaj landon ajn li venas. Multajn belajn trezoraĵojn li kunportas el Troia, el la militkaptaĵo, sed male ni, kiuj la saman vojaĝon finfaris, ni hejmen revenas kun malplenaj manoj. Ankaŭ nun al li Aiolos ĉi tion donis, pro amikeco malavara. Nu do, ni plej baldaŭ vidu, kio tio estas kaj kiom da oro kaj arĝento do estas en tiu felo.”

Tiel ili parolis kaj efektiviĝis la malbona decido de miaj kunuloj; ili malligis la sakfelon kaj ĉiuj ventoj elrapidis; nun la ventego rapide kuntrenegis la plorantojn en plenan maron, malproksimen de la patrujo. Sed, vekigante, mi pripensis en mia neriproĉebla animo, ĉu mi, saltjetante min el la ŝipo, dronigos min en la maro, aŭ ĉu mi silente ĝin toleros kaj restos ankoraŭ inter la vivantoj. Sed mi toleris kaj restis kaj, kaŝante mian vizaĝon per la mantelo, mi kuŝis en la ŝipo; tiel la ŝipoj pro la fatala blovegado de l' ventego returne naĝis al la insulo Aiolia, dum ĝemadis miaj kunuloj.

Tie ni surbordiĝis kaj ĉerpis akvon kaj miaj kunuloj rapide prenis al si la manĝon apud la rapidaj ŝipoj. Sed kiam ni estis ĝuintaj manĝon kaj trinkon, tiam mi kunirigis heroldon kaj kunulon kaj iris al la belega loĝejo de Aiolos; lin mi trovis manĝanta kun lia edzino kaj liaj infanoj. Kaj veninte al lia

domo, ni sidiĝis sur la sojlon apud la pordokadro; kaj ili miris en sia animo kaj al mi demandis:

65 „Kiel okazis, ke vi revenis, Oduseus? kiu malbona demono vin atakis? ĉar tute certe ni vin lasis foriri zorge preparita, por ke vi alvenu en via patrujo kaj via domo aŭ kie ajn vi deziras.”

Tiel ili parolis; kaj mi parolis meze de ili kun ĉagrenita koro:

„Min trompis malbonaj kunuloj kaj krom tio la pereiga dormo. Sed rebonigu, geamikoj, ĉar tiun povon vi havas.”

70 Tiel mi parolis, alparolante ilin per afablaj vortoj, sed ili restis silentaj. Tiam la patro respondis per la vortoj:

„For de ĉi tiu insulo plej baldaŭ, plejhontulo el ĉiuj vivantoj!

Ĉar al mi ne estas permesite, doni prizorgadon kaj akompanion al tiu viro, kiu estas malamata de la feliĉegaj Dioj. For de

75 ĉi tie, ĉar vi alvenis, malamate de la senmortuloj.”

Tiel parolinte, li forsendis min el sia loĝejo dum mi profunde ĝemadis.

De tie ni plue veturis kun malĝoja koro. Ĉar senkuraĝiĝis la animo de la viroj dum la doloriga remado, pro nia propra stulteco, ĉar ne plu venis akompano. Ses tagojn ni tiel veturis

80 dumnokte kaj dumtage, sed je la sepa ni atingis la alte kuŝantan urbon Lamos, Lastrugonia kun pordegoj kiuj kuŝas malproksimaj una de la alia, kie unu paŝtisto alvokas la alian, kiam vespere li pelas sian brutaron al la urbo kaj la alia lin respondas kiam li denove pelas sian brutaron el la urbo. Tie sendorma

85 viro povus gajni duoblan tagpagon, unu per bovpaŝtado kaj la alia per la paŝtado de brilblankaj ŝafoj: ĉar la vojoj de nokto kaj tago estas tie proksimaj unu al la alia.

Kiam ni estis tie venintaj apud la belega haveno, ĉirkaŭ kiu seninterrompe je ambaŭ flankoj troviĝis kruta roko kaj kie

90 la internaj bordoj en la eniro unu kontraŭe de la alia elstaras kaj la alirejo pro tio estas mallarĝa, tiam ili ĉiuj tie direktis siajn ambaŭflanke kurbigitajn ŝipojn enen. Ĉi tiuj nun ene de l' kava haveno estis kunligataj unu al la alia; ĉar neniam en ĝi sin levis

ondoj, nek grandaj nek malgrandaj, sed ĉirkaŭe estis brila kaj

95 trankvila maro; nur mi sola retenis ekstere mian nigran ŝipon, je la ekstrema parto, kie mi estis liginta la ŝnuregojn al rokaĵo.

Post tio, grimpinte sur rokecan observejon, mi tie stariĝis. Tie nek de bovoj nek de homoj sin montris signoj, sed nur

fumon ni vidis, suprenirantande la tero. Tiam mi elsendiskelkajn

100 kunulojn por esplori, kiaj viroj tie loĝas el la sur la tero panon manĝantaj homoj kaj mi elektis por tio du virojn kaj kiel trian mi al ili kundonis la heroldon.

Ĉi tiuj elŝipiĝis kaj iris laŭ ebena vojo, laŭ kiu la veturiloj  
 transportis lignon de la altaj montoj al la urbo. Antaŭ la urbo  
 105 ili renkontis knabinon, kiu iris por ĉerpi akvon, la fortan filinon  
 de l' Laistrugono Antiphates; ŝi ĝuste subeniris al la bele  
 fluanta fonto [Artakia; ĉar el tiu oni kutimis porti akvon al la  
 urbo]; kaj ili, proksimiĝante, ŝin alparolis kaj demandis, kiu  
 110 super la loĝantoj estas reĝo kaj super kiuj li regas; tuj ŝi tiam  
 indikis la alttegmentan domon de sia patro. Kaj kiam ili estis  
 enirintaj la belegan loĝejon, tiam ili trovis tie lian edzinon,  
 grandan kiel la supro de monto, kaj ili ektimis je ŝi. Rapide  
 ŝi nun venigis de la kunsido la glorriĉan Antiphates, sian  
 115 edzon, kiu kontraŭ ilin projektis malĝojigan pereon. Tuj li  
 kaptis unu el la kunuloj kaj per li preparis sian manĝon. Sed  
 la du aliaj forrapidegis kaj kurante atingis niajn ŝipojn. Sed  
 nun eligis li kriegon tra la urbo kaj el ĉiuj direktoj kurante  
 120 venis la fortaj Laistrugonoj, sennombraj kaj ne similitaj al  
 viroj, sed al Gigantoj. Ĉi tiuj ĵetis de la rokoj virŝarĝajn ŝtonojn  
 kaj tuj leviĝis terura bruvo sur la ŝipoj, tiel same de mortantaj  
 viroj kiel ankaŭ de frakasataj ŝipoj; tiam, ilin trapikante kvazaŭ  
 fiŝojn, ili je terura festmanĝo kunportis ilin. Dum ili mortigis  
 125 ilin interne de la tre profunda haveno, mi elingigis la akran  
 glavon je mia flanko kaj tratranĉis per ĝi la ŝnuregojn de  
 l' ŝipo kun nigra antaŭstevano. Kaj, rapide instigante miajn  
 kunulojn, mi ordonis ke ili sin ĵetu sur la remilojn por ke ni  
 130 evitu la pereon; kaj, timante la morton, ĉiuj suprenŝprucis  
 la marakvon. Feliĉe mia ŝipo tiam forrapidis de la tegment-  
 formaj rokoj al la maro; sed la aliaj ŝipoj tie kune pereis.

De tie ni ŝipveturis pluen kun malĝoja koro, feliĉaj ĉar ni  
 evitis la morton, sed tamen perdinte karajn kunulojn.  
 135 Nun ni atingis la insulon Aiaia; tie loĝis Kirke kun belaj  
 harligoj, la timinda Diino kun homa voĉo, la samsanga fratino  
 de la pereigema Aietes; ambaŭ devenis de Helios, kiu lumas  
 por la mortidevuloj, kaj de sia patrino Perse, la filino de  
 140 Okeanos. Tie ni silente per la ŝipo veturis al la marbordo en  
 la kiel ŝipankrejo uzatan havenon kaj iu Diaĵo gvidis nin. Tie  
 ni tiam elŝipiĝis kaj du tagojn kaj du noktojn tie kuŝis kun  
 koro, konsumita tiel same de laceco kiel ankaŭ de ĉagrenoj.  
 Sed kiam Eos kun belaj harligoj estis efektiviginta la trian  
 145 tagon, tiam mi prenis mian lancon kaj mian akran glavon  
 kaj rapide mi iris de mia ŝipo supren sur altaĵon por ĉirkaŭ-  
 rigardi, ĉu eble mi vidos signojn de homa laboro kaj aŭdos  
 homajn voĉojn. Tiel, grimpite sur rokecan observejon, mi tie

- stariĝis kaj sin levis fumo de l' larĝstrata tero [ , super la loĝejo  
 150 de Kirke kaj super la densaraj kverkoj kaj la arbaro]. Tiam mi  
 pripensis en miaj spirito kaj animo, ĉu mi iros kaj esploros,  
 post kiam mi vidis la ruĝkoloran fumon. Tiel nun ŝajnis al  
 mi, dum mi ĝin pripensis, esti plej bone: unue iri al la rapida  
 155 ŝipo kaj al la bordo de la maro kaj doni al miaj kunuloj sian  
 manĝon kaj elsendi kelkajn por esplori. Sed kiam, tien irante,  
 mi jam proksima estis al la ambaŭflanke kurbigita ŝipo, tiam  
 iu el la Diaĵoj ekkompatis min, ĉar sola mi estis, kaj grandan  
 altkornan cervon li igis veni ĝuste sur mian vojon; ĝi volis iri  
 160 de l' paŝtejo en la arbaro al la rivero, por trinki, ĉar la forto  
 de l' suno evidente ĝin turmentis. Ĝin mi trafis, kiam ĝi venis  
 el la arbaro, en la mezo de la dorso en la spino, kaj la kupra  
 ĵetlanco ĝin tute trapenetrus; blekante ĝi falis en la polvon  
 kaj forflugis ĝia vivo. Tiam mi metis sur ĝin la piedon kaj  
 tiris la kupran lancon el la vundo. Kaj mi ĝin metis sur la  
 165 teron kaj tie lasis kuŝi. Post tio mi ŝirkolektis branĉetojn  
 kaj vergojn kaj plektinte el ili bone flekseblan ŝnuron, longan  
 je unu klafto, mi per ĝi kunligis la krurojn de l' grandega besto.  
 Tiam mi iris, ĝin portante sur la nuko kaj apogante min sur mia  
 170 lanco, al la nigra ŝipo, ĉar estis tute necble, ĝin porti sur la  
 ŝultro per helpo de unu mano; ĉar treege granda estis la besto.  
 Mi ĝin deĵetis ĝuste antaŭ la ŝipo kaj, proksimiĝante al ĉiu  
 viro aparte, mi instigis miajn kunulojn per afablaj vortoj:  
 „Amikoj! kiom ajn ni estas zorgŝarĝitaj, ni tamen ne mal-  
 175 supreniros en la loĝejon de Hades, antaŭ ol estos veninta la  
 de l' sorto destinita tago. Nu do, dum en nia rapida ŝipo  
 ankoraŭ estas manĝo kaj trinko, ni pensu pri manĝado kaj ne  
 konsumiĝu de malsato.”

Tiel mi parolis kaj rapide ili obeis al miaj vortoj, kaj mal-  
 180 kaŝinte sian kapon, ili rigardis mire sur la bordo de la senripoze  
 ondanta maro la cervon, ĉar treege granda estis la besto. Sed  
 kiam ili ĝoje estis rigardintaj ĝin per la okuloj, tiam ili lavis  
 siajn manojn kaj pretigis manĝon tre bongustan.

Tiel ni sidis tie la tutan tagon ĝis la malleviĝo de la suno,  
 manĝante abundan viandaĵon kaj trinkante dolĉan vinon. Sed  
 185 kiam malleviĝis la suno kaj alproksimiĝis la krepusko, tiam ni  
 ekkuŝis apud la ondoresaltejo de la maro. Sed kiam aperis la  
 frumatena, rozofingra Eos, tiam, kunsidon kunvokinte, mi  
 parolis meze de ĉiuj:

„[Aŭskultu vi je miaj vortoj, jam multon suferintaj kunuloj!]”  
 190 Amikoj! ni nek scias, kie la okcidento, nek kie la oriento



estas, nek kie la suno, kiu lumas por la mortidevuloj, malle-  
 viĝas sub la teron, nek kie ĝi supreniras; nu do, ni interkonsiliĝu  
 plej baldaŭ, ĉu ankoraŭ ekzistos iu konsilo por ni. Mi opinias,  
 ke tia ne ekzistas. Mi vidis, grimpite sur rokecan observejon,  
 195 la insulon, ĉirkaŭ kiu sin etendas ĉie la senfina maro; ĝi mem  
 ebene kuŝas; per miaj okuloj mi ekvidis fumon en la mezo  
 super la densaraj kverkoj kaj la arbaro.”

Tiel mi parolis kaj ilia koro rompiĝis, dum ili pensis pri la  
 faroj de la Laistrugono Antiphates kaj pri la perforteco de la  
 200 grandkuraĝa Kiklopo, la hommanĝegulo. Laŭte ili ploris,  
 abunde larmojn verŝante; sed tio ja tute ne alportis utilon al  
 la vekriantoj. Sed mi denombriis kaj dividis en du grupojn  
 ĉiujn kunulojn kun bonaj tibiŝirmiloj kaj al ambaŭ mi donis  
 205 ĉefon. Unujn mi komandis, la aliajn la disimila Eurulochos.  
 Tiam ni rapide skuis lotojn en kuprotegita kasko kaj elsaltis  
 la loto de la grandkuraĝa Eurulochos. Tiam li iris kaj kune kun  
 li dudek du plorantaj kunuloj, sed vekriantaj nin postlasis ili.  
 210 Baldaŭ ili trovis en montarbaro la loĝejon de Kirke, konstru-  
 itan el glatigitaj ŝtonoj, sur ĉirkaŭe ŝirmita loko. Ĉirkaŭ la  
 domo estis montaj lupoj kaj leonoj, kiujn ŝi estis mem ensor-  
 ĉinta, post kiam ŝi estis ilin iginta manĝi pereigajn herbojn.  
 Sed ili ne atakis la virojn, sed stariĝis, svingetante per siaj  
 215 longaj vostoĵoj. Kiel, kiam hundoj svingetante per la vosto  
 ĉirkaŭas sian mastron, revenantan de festmanĝo — ĉar ĉiam  
 li kunportas bongustajojn — tiel ilin ĉirkaŭis svingetante per  
 la vosto fortunegegaj lupoj kaj leonoj; sed ili ektimis, kiam ili  
 220 vidis la terurajn monstrojn. Kaj ili haltis ĉe la antaŭpordo de  
 la domo de l' Diino kun belaj harligoj kaj ili aŭdis Kirke,  
 kantantan ene per bela voĉo, dum ŝi, tien kaj reen irante,  
 teksis grandan, nepereipovan teksaĵon, delikatan kaj gracian  
 kaj brilan, kiaj la laboraĵoj de Diinoj estas. Inter ili tiam ekpa-  
 225 rolis Polites, la ĉefulo de l' popoloj, kiu al mi estis la plej  
 kara kaj zorgema el miaj kunuloj:

„Amikoj! Ene ja iu kantas bele, tien kaj reen irante ĉe  
 granda teksilo — kaj la tuta tero resonas de ĝi — ĉu Diino  
 aŭ virino; nu do, ni tuj nin aŭdebligu.”

Tiel li parolis kaj ĉiuj ekkriis vokante. Rapide ŝi nun venis  
 230 eksteren, malfermis la brilajn pordoĵojn kaj vokis ilin; kaj ili  
 ĉiuj kune ŝin sekvis pro nescio; sed Eurulochos postrestis,  
 suspektante ke tio estas ruzo. Kaj kiam ŝi estis ilin enen kondu-  
 kinta, ŝi sidigis ilin sur apogseĝojn kaj brakseĝojn kaj miksis  
 por ili fromaĝon, hordefarunon kaj flavan mielon kun Pram-

- 235 neia vino; sed ankaŭ ŝi miksis pereigajn herbojn en la manĝon,  
 por ke ili tute forgesu la prapatran landon. Sed kiam ŝi estis  
 ĝin doninta kaj ili ĝin estis eltrinkintaj, tuj post tiam ŝi frapis  
 ilin per sia sorĉbastono kaj ilin enfermis en porkejojn. Ili  
 240 nun ekhavis la kapon kaj voĉon kaj harojn kaj la eksteraĵon  
 de porkoj, sed la spirito estis nedifektita kaj kiel antaŭe. Tiel  
 ili plorante estis enfermataj; kaj antaŭ ilin ĵetis Kirke glanojn  
 kaj kaŝtanojn kaj la frukton de 1' kornuso por manĝi, kiujn la  
 sur la tero kuŝantaj porkoj ĉiam manĝas.

- Sed Eurulochos reiris al la rapida ŝipo nigra por alporti  
 245 sciigon pri siaj kunuloj kaj ilia doloriga sorto. Sed li ne kapablis  
 elparoli unu vorton, kiom arde ajn li ĝin deziris, ĉar ege tuŝita  
 li estis en sia koro de granda ĉagreno; liaj okuloj pleniĝis de  
 larmoj kaj lia koro antaŭsentis ĝemploradon. Sed kiam ni  
 250 ĉiuj mirigite lin pridemandis, tiam li fine rakontis al ni la  
 pereon de siaj aliaj kunuloj:

- „Ni iris, brilglora Oduseus, kiel vi estis ordoninta, tra la  
 kverkaro; baldaŭ ni trovis en montarbaro belan fortike kon-  
 struitan loĝejon [el glatigitaj ŝtonoj, sur ĉirkaŭe ŝirmita loko].  
 Tie iu laŭte kantis, tien kaj reen irante ĉe granda teksilo, ĉu  
 255 Diino aŭ virino; kaj ili ekkriis vokante. Rapide ŝi nun venis  
 eksteren, malfermis la brilajn pordojn kaj vokis ilin; kaj ili  
 ĉiuj kune ŝin sekvis pro nescio; sed mi postrestis suspektante  
 ke tio estas ruzo. Sed ili ĉiuj kune nevidebliĝis kaj neniu el  
 260 ili reaperis; kaj tamen longan tempon mi observante tie sidis.”

- Tiel li parolis; sed mi ĵetis ĉirkaŭ miajn ŝultrojn la grandan  
 kupran glavon arĝentnajlan kaj ankaŭ mian pafarkon; al li  
 mi tiam ordonis, returne antaŭiri min laŭ la sama vojo. Sed  
 per ambaŭ manoj kaptante miajn genuojn, li petegis [kaj  
 265 plendante li diris al mi la flugilhavaĵajn vortojn]:

- „Ne min tien konduku kontraŭ mia volo, didevenulo, sed  
 min postlasu ĉi tie; mi ja scias ke nek vi mem revenos nek  
 rekondukos iun alian el viaj kunuloj. Sed plej rapide ni forkuru  
 kun ĉi tiuj; ĉar eble ni ankoraŭ evitos la tagon de la malfeliĉo.”  
 270 Tiel li parolis; sed respondante, mi lin alparolis:

„Eurulochos! nu do, tiam vi restu ĉi tie, sur ĉi tiu loko,  
 manĝante kaj trinkante, apud la kava ŝipo nigra; sed mi iros;  
 ĉar estas tio por mi urĝa neceso.”

- Tiel parolinte, mi iris de la ŝipo kaj la maro en la insulon.  
 275 Sed kiam, irante tra la sanktaj montarbaroj, mi estis alvenonta  
 al la granda loĝejo de Kirke, riĉa je sorĉherboj, tiam renkonte  
 venis al mi, dum mi iris al ŝia loĝejo, la orbastona Hermes,

similante al ĵuna viro, kies unuaj barboharoj komencas elkreski  
 280 kaj kies ĵuneco estas plej gracia; varme li prenis mian manon  
 kaj li parolis la vortojn kaj diris:

„Kien vi denove iras, malfeliĉulo! tutsola inter la monto-  
 suproj kaj nekonante la regionon? Viaj kunuloj estas enfermitaj  
 en la loĝejo de Kirke, kiel porkoj, kaj sidas en tutbaritaj  
 porkejoj. Aŭ ĉu vi eble venas ĉi tien por ilin liberigi? Mi  
 285 opinias, ke ankaŭ vi mem ne revenus, sed vi restus, kie ankaŭ  
 la aliaj estas. Sed nu, mi vin liberigos de malbonoj kaj vin  
 savos. [Jen, iru kun ĉi tiu bonefika herbo al la loĝejo de Kirke;  
 ĝi detenas de via kapo la tagon de la malfeliĉo:] Ĉiujn pereigajn  
 290 planojn de Kirke mi diros al vi. Ŝi preparos por vi mikstrinkaĵon  
 kaj ĵetos en tiun nutraĵon sorĉherbojn. Sed tamen ŝi ne povos  
 vin ensorĉi; ĉar tion ne allasos la bonefika herbo kiun mi donas  
 al vi; kaj ĉion mi al vi rakontos. Tuj kiam Kirke vin estos  
 frapinta per sia tre longa sorĉbastono, tiam vi elingigu la  
 295 akran glavon je via flanko kaj kuru al Kirke, kvazaŭ vi dezirus  
 ŝin mortigi. Kaj ektiminte, ŝi vin invitos iri kun ŝi en la liton.  
 Tiam vi ne plu rifuzu la kundormadon kun Diino, por ke ŝi  
 liberigu viajn kunulojn kaj zorgu pri vi mem; sed ordonu al ŝi,  
 ke ŝi ĵuru la potencan ĵuron de la feliĉegaĵ Dioj, ke ŝi ne projek-  
 300 tos alian pereigan malfeliĉon kontraŭ vi mem, por ke ŝi ne vin  
 faru mizera kaj sendefenda, kiam vi estos nudiginta vin.”

Tiel parolinte, la Argusmortiginto donis al mi la herbon,  
 forŝirinte ĝin el la tero, kaj montris al mi ĝian naturon: ĉe la  
 radiko ĝi estis nigra, sed al lakto simila estis la koloro de la  
 305 floro: „molu” ĝin nomas la Dioj kaj malfacile estas, ĝin  
 elfosi [por mortidevaj homoj; sed la Dioj ĉion povas].

Post tio foriris Hermes tra la arbarriĉa insulo al la alta  
 Olumpos kaj mi nun iris al la loĝejo de Kirke kaj mia koro  
 estis ege maltrankvila dum la irado. Fine mi haltis ĉe la antaŭ-  
 310 pordo de l' domo de la Diino kun belaj harligoj. Tie starante  
 mi vokis kaj la Diino aŭdis mian voĉon. Rapide ŝi nun venis  
 eksteren, malfermis la brilajn pordojn kaj vokis min; kaj mi  
 ŝin sekvis kun zorgoplena koro. Kaj kiam ŝi min estis enen  
 kondukinta, ŝi min sidigis sur brakseĝon arĝentnajlan [, belan,  
 315 arte prilaboritan; kaj sube estis benketo por la piedoj;] kaj  
 preparis por mi mikstrinkaĵon en ora pokalo, por ke mi trinku,  
 sed projektante malbonon en sia koro, ŝi aldonis al ĝi sorĉherb-  
 ojn. Sed kiam ŝi estis ĝin doninta al mi kaj mi ĝin estis eltrin-  
 kinta — sed ŝi ne ensorĉis min — tiam, min frapante per sia  
 sorĉbastono, ŝi diris la vortojn kaj parolis:

320 „Iru nun al la porkejo; tie kuŝigu ĉe viaj aliaj kunuloj.”

Tiel ŝi parolis; sed tiam mi elingigis la akran glavon je mia flanko kaj kuris al Kirke, kvazaŭ mi dezirus ŝin mortigi. Sed laŭte kriante, ŝi kliniĝinte rapidis al mi kaj ĉirkaŭprenis miajn genuojn kaj plendante ŝi diris al mi la flugilhavajn vortojn:

325 „Kiu kaj de kie vi estas inter la homoj? kie estas via naskiĝ-urbo kaj kie loĝas viaj gepatroj? Miro min ekkaptas pro tio, ke neniel vi estis ensorĉata trinkinte ĉi tiujn sorĉherbojn. Ĉar neniŭ alia viro iam rezistis ĉi tiujn herbojn, kiam li estis trinkinta kaj kiam estis transirinta tiu miksaĵo trans la vicon de liaj dentoj. Sed en via brusto estas nesorĉebla spirito. Aŭ

330 ĉu eble vi estas la ruzega Oduseus, pri kiu ĉiam al mi diris la orbastona Argusmortiginto, ke li ĉi tien venos, revenante el Troia per sia rapida ŝipo nigra? Sed nu, metu vian glavon en la ingon, kaj tiam ni iru sur nian liton, por ke ni, ame kuniĝ-

335 inte sur la kuŝejo, fidu unu al la alia.”

Tiel ŝi parolis, sed respondante, mi ŝin alparolis:

„Ho Kirke! kiel vi povas min instigi, esti kompleksa por vi? Vi, kiu miajn kunulojn en via loĝejo faris porkoj kaj kiu, min mem ĉi tie retenante, ruze min invitas iri en vian dormoĉambron kaj iri sur vian liton, por ke vi faru min mizera kaj sendependa, kiam mi estos nudiginta min. Kaj mi tute ne volus iri sur vian liton, se vi, Diino, ne decidus, ĵuri potencan ĵuron al mi, ke vi ne projektos alian pereigan malfeliĉon kontraŭ mi mem.”

340

345 Tiel mi parolis kaj tuj ŝi ĵuris, kiel mi estis ordoninta. Sed kiam ŝi estis ĵurinta kaj tute elparolinta la ĵuron, tiam mi iris sur la belegan liton de Kirke.

Dume en la ĉambrego estis penantaj kvar servistinoj kiuj en la domo kutimis por ŝi labori [; ĉi tiuj estas naskiĝintaj

350 el fontoj kaj sanktarbaroj kaj el sanktaj riveroj, kiuj en la maron fluas]. Unu el ili ĵetis sur la brakoseĝojn belajn, purpurajn kovraĵojn, sub kiujn ŝi tolan tukon sternis. La dua

355 metis antaŭ la apogseĝojn arĝentajn tablojn kaj metis sur ilin orajn korbojn; la tria miksis en arĝenta vinmiksuro mieldolĉan, bongustan vinon kaj dividis la orajn pokalojn; la kvara alportis akvon kaj ekbruligis altan fajron sub granda tripiedo kaj la

360 akvo varmiĝis. Sed kiam ekbolis la akvo en la brila kupra kaldrono, tiam ŝi sidigis min en la banokuvon kaj min banis dum ŝi la varman akvon el la granda tripiedo korgojige miksis kun malvarma akvo, kaj ŝi ĝin elverŝis sur miajn kapon kaj

ŝultrojn por forigi el miaj membroj la kordetruan lacecon. Sed kiam ŝi estis min baninta kaj brileta min ŝmirinta per  
 365 olivoleo kaj estis ĵetinta ĉirkaŭ min mantelon belan kaj sub-  
 veston, tiam ŝi min enkondukis kaj sidigis sur brakseĝon  
 argentnajlan [, belan, arte fabrikitan; kaj sube estis benketo  
 por la piedoj. Post tio alportis servistino en bela ora kruĉo  
 370 akvon, ĝin elverŝis super argenta pelvo sur liajn manojn por  
 ilin purigi kaj metis antaŭ lin glatpoluritan tablon. Kaj la  
 estiminda mastrumistino panon alportis kaj ĝin metis antaŭ  
 lin, post kiam ŝi estis ankoraŭ multajn aliajn manĝaĵojn  
 antaŭmetinta, ĉar volonte ŝi donis el la provizo;] kaj min  
 instigis manĝi. Sed tio ne plaĉis al mia koro, sed mi sidis,  
 pensante pri aliaj aferoj, kaj mia animo antaŭsentis malbonon.  
 375 Sed kiam Kirke rimarkis, ke mi tiel sidas, ne etendante la  
 manojn al la manĝaĵoj, kaj ke terura ĉagreno min premas, tiam  
 proksimiĝante, ŝi diris al mi la flugilhavajn vortojn:

„Kial, Oduseus! vi tiel sidas, simila al senvoĉulo, forkon-  
 sumante vian koron, kaj kial vi ne tuŝas al manĝo aŭ trinko?  
 380 Ĉu eble vi suspektas iun alian ruzon? Vi ja ne plu bezonas timi,  
 ĉar mi jam ĵuris al vi potencon ĵuron.”

Tiel ŝi parolis, sed respondante mi ŝin alparolis:

„Ho Kirke! kiu viro, kiu estas justa, kuraĝus ja gustumi  
 de manĝo kaj trinko, antaŭ ol li estus liberiginta siajn kunulojn  
 385 kaj ilin vidus per propraj okuloj? Sed se vere vi tutkore min  
 instigas trinki kaj manĝi, tiam ilin liberigu, por ke mi vidu  
 per miaj okuloj miajn fidelajn kunulojn.”

Tiel mi parolis; tuj nun Kirke iris tra la ĉambrego eksteren,  
 portante sian bastonon en la mano; kaj ŝi malfermis la pordojn  
 390 de la porkejo kaj ilin elpelis, similajn al naŭjaraj grasporkoj.  
 Nun ili stariĝis unu kontraŭe de la alia, kaj ŝi, irante inter  
 ili, per alia herbo nun ĉiun el ili ŝmiris. Kaj defalis de iliaj  
 membroj la haroj, kiuajn antaŭe estis kreskiginta la pereiga  
 sorĉherbo, kiun estis doninta al ili la respektinda Kirke; denove  
 395 ili fariĝis viroj, pli junoj ol ili antaŭe estis kaj multe pli belaj  
 kaj grandaj je la aspekto. Kaj ili rekonis min kaj ĉiu varme  
 premis miajn manojn; ĉe ĉiuj sin levis hejmsopira ĝemado kaj  
 400 ĉirkaŭe la domo terure resonis de ĝi; kaj ankaŭ la Diino mem  
 kompatis kaj proksimiĝante, min alparolis ŝi, majestoplena  
 inter la Diinoj:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! iru nun al via  
 rapida ŝipo kaj al la bordo de l'maro; tutunue vi trenu vian  
 ŝipon sur la teron kaj transportu viajn posedaĵojn kaj la tutan

405 ilaron en kavernojn; kaj post tio mem revenu kaj kun vi kon-  
duku viajn fidelajn kunulojn."

Tiel ŝi parolis kaj mia brava koro obeis al ŝi kaj mi iris al  
la rapida ŝipo kaj al la bordo de la maro kaj tie mi trovis apud  
la ŝipo miajn fidelajn kunulojn, kompatinde vekiantajn kaj  
410 versantajn abundajn larmojn. Kiel kiam la en la kamparo vivantaj  
bovidoj ĉiuj kune renkonte saltetas al la bovinoj, kiuj revenas  
al la stalo, kiam ili estas satigitaj de la herbo — eĉ bariloj  
ne plu ilin retenas, sed senĉese muĝante ili kuretas ĉirkaŭ  
siaj patrinoj — tiel ankaŭ miaj kunuloj faris, kiam ili vidis  
415 min per siaj okuloj, [kaj ĝojplorante ili ĉirkaŭis min; ĉar  
ŝajnis al ilia koro ke estis, kvazaŭ ili estus atingintaj la patrujon  
kaj la urbon mem de l'kruta Ithaka, kie ili estis edukitaj kaj  
naskitaj]. Kaj ĝojplorante ili diris al mi la flugilhavajn vortojn:

„Pro via reveno, ho didevena! ni tiom ĝojas, kiom se ni estus  
420 alvenintaj en Ithaka, la lando de niaj prapatroj; sed nu, rakontu  
al ni la pereon de niaj aliaj kunuloj."

Tiel ili parolis; sed mi parolis al ili kun afablaj vortoj:  
„Tutunue ni trenu nian ŝipon sur la teron kaj transportu  
niajn posedaĵojn kaj la tutan ilaron en kavernojn; sed vi  
425 rapidu, por ke vi post tio kune kun mi iru por vidi viajn kunulojn  
en la sankta loĝejo de Kirke trinkantaj kaj mangantaj; ĉar  
ili havas abundon."

Tiel mi parolis kaj rapide ili obeis al miaj vortoj. Nur Euru-  
lochos klopodis reteni ĉiujn miajn kunulojn kaj alparolante  
430 ilin, li diris la flugilhavajn vortojn:

„Ve, mizeruloj! kien vi iras? Kial vi deziras al tiu malbono?  
Ĉu vi volas iri malsupren al la palaco de Kirke, kiu ja faros  
nin ĉiujn porkoj aŭ lupoj aŭ leonoj, por ke ni gardadu ŝian  
grandan loĝejon, kvankam kontraŭvole? Same kiel la Kiklopo  
435 nin enfermis, kiam niaj kunuloj venis en lian brutejon, kaj  
ilin akompanis tiu riskemulo Oduseus; ĉar pro lia senpri-  
penseco ankaŭ ili pereis."

Tiel li parolis; sed mi pripensis en mia animo, ĉu mi elingigos  
la longpintan glavon je mia dikmuskola femuro kaj per tiu  
440 lin senkapigos, tiel ke lia kapo falos sur la teron, kvankam  
li estis tre proksima boparenco de mi. Sed miaj kunuloj min  
retenis je ĉiuj flankoj per afablaj vortoj:

„Didevenulo! ĉi tiun ni lasu ĉi tie, se vi konsentas pri tio  
445 [, por resti ĉe la ŝipo kaj por gardi ĝin]; sed gvidu nin al la  
sankta loĝejo de Kirke."

Tiel parolinte, ili iris de la ŝipo kaj la maro en la landon.

Ankaŭ Eurulochos ne postrestis ĉe la kava ŝipo, sed li sekvis nin; ĉar li ektimis pro mia terura minaco.

Dume Kirke en sia loĝejo banis la aliajn kunulojn zorge kaj  
450 ilin briletaj ŝmiris per olivoleo kaj ĉirkaŭ ilin ŝetis ŝi mantelojn  
lanajn kaj subvestojn; ni ilin ĉiujn trovis, ĝuantaj de abunda  
manĝo en la loĝĉambrego. Sed kiam ili reciproke sin revidis  
kaj laŭ la vizaĝo rekonis, tiam ili vekriante ploris kaj ĉirkaŭe  
455 la domo resonis de ĝi. Sed min proksimiĝante, parolis ŝi,  
majestoplena inter la Diinoj:

„[Didevena Laert-ido, elpenslerta Odusseus!] Ne plu nun  
aŭdigu vian malĝojan ĝemadon; mi scias ja mem, kiom da  
doloroj vi suferis sur la multfiŝa maro kaj kiom da malprofito  
al vi kaŭzis sur la tero malamikecaj viroj. Sed nu do, manĝu  
460 la nutraĵojn kaj trinku vinon, ĝis kiam vi denove ekhavas  
kurageon en via brusto, same kiel, kiam vi unuafoje forlasis la  
landon de viaj prapatroj, la krutan Ithaka. Ĉar nun vi estas  
elĉerpitaj kaj senkuraĝaj kaj ĉiam pensantaj pri via malfacila  
465 vagirado kaj neniam via koro gajecon havas, ĉar multajn  
malbonojn vi estas suferintaj.”

Tiel ŝi parolis kaj niaj bravaj koroj obeis. Tiam ni restadis  
tagon post tago ĝis la fino de l' jaro, ĝuante abundajn viandaĵ-  
ojn kaj dolĉan vinon; sed kiam la jaro estis pasinta kaj la sezonoj  
470 ree komencis sian preteturniĝadon [kaj kiam je la lasta duono  
de l' monato la longaj tagoj ree komenciĝis], tiam miaj fidelaj  
kunuloj min elvokis el la domo kaj diris:

„Malfeliĉulo! pensu do fine pri la lando de niaj prapatroj,  
se estas didestinite al vi, elsaviĝi kaj atingi vian alttegmentan  
domon kaj vian prapatran landon.”  
475 [Tiel ili parolis kaj mia brava koro al ili obeis.

Tiel ni sidis tie la tutan tagon ĝis la malleviĝo de la suno,  
manĝante abundajn viandaĵojn kaj trinkante dolĉan vinon.  
Sed kiam malleviĝis la suno kaj alproksimiĝis la krepusko,  
tiam kuŝiĝis ili en la multombra loĝejo.]

480 Sed mi, irinte sur la belegan liton de Kirke, ĉirkaŭprenis  
ŝiajn genuojn kaj ŝin petegis kaj la Diino aŭdis mian voĉon  
kaj ŝin alparolante, mi diris la flugilhavajn vortojn:

„Ho Kirke, plenumu al mi la promeson, kiun vi faris, nome,  
ke vi lasos min foriri hejmen; ĉar nun mia koro arde al tio  
485 sopiras, kaj ankaŭ la koroj de miaj aliaj kunuloj, kiuj premas  
mian koron, ĉiam vekriante ĉirkaŭ mi, kiam vi kelkfoje estas  
malapude.”

Tiel mi parolis kaj tuj respondis ŝi, majestoplena inter la Diinoj:



„Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! Vi do ne plu restu kontraŭ via volo en mia loĝejo. Sed unue vi devas ankoraŭ  
 490 fari alian vojaĝon kaj iri al la loĝejo de Hades kaj de la terura Persephone, por demandi profetaĵon al la fantomo de la Thebano Teiresias, la blinda profeto, kies spirito ankoraŭ estas neŝanĝita: ĉar nur al li havigis Persephone ankaŭ post la morto  
 495 intelekton kaj penskapablecon; sed la aliaj ĉirkaŭflugetas kiel ombroj.”

Tiel ŝi parolis, sed rompiĝis mia koro; kaj sidante sur la lito, mi ekploris kaj mia koro ne plu volis ankoraŭ vivi kaj vidi la lumon de la suno. Sed kiam mi estis satigita de plorado kaj  
 500 turniĝado de doloro, tiam respondante mi ŝin alparolis per la vortoj:

„Ho Kirke! kiu min do gvidos dum tiu vojaĝo! Ĉar en la domon de Hades ankoraŭ neniu venis per sia nigra ŝipo.”

Tiel mi parolis kaj tuj respondis ŝi, majestoplena inter la Diinoj:

„[Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus!] Vi ne estu  
 505 zorga pro la deziro al gvidanto por via ŝipo: starigu la maston kaj malfaldu la blankajn velojn kaj sidiĝu kviete: tiam la blovo de Boreas antaŭen puŝos vian ŝipon. Sed kiam vi estos transveturinta per via ŝipo la Okeanos, tiam tie, kie sin trovas ebena marbordo kaj la sanktarbaroj de Persephone, altaj  
 510 poploj kaj fruktdisŝutaj salikoj, albordigu vian ŝipon ĉe la Okeanos kun profundaj akvoturniĝoj kaj tiam iru mem al la mallumeta loĝejo de Hades. Tie enfluas en la Acheron la Puri-phlegethon kaj la Kokutos, kiu estas riverbranĉo de la fluo  
 515 Stuks, kaj ĉe roko estas la kuniĝa loko de ambaŭ laŭte muĝantaj riveroj: tie vi tiam, ho heroo! kiam vi estos alveninta en ĝia proksimeco — tiel mi konsilas al vi — fosu kavaĵon, grandan unu ulnon je longeco kaj larĝeco; ĉirkaŭ tiu fosu vi plenumu verŝoferajojn honore al ĉiuj fantomoj, unue de miellakto, post  
 520 tio de dolĉa vino kaj trie de akvo; kaj ŝutu sur tion blankan hordefarunon. Post tio arde preĝu al la senfortaj fantomoj kaj al ili promesu, ke vi, kiam vi estos veninta en Ithaka, oferos en via domo malfekundan bovon, la plej bonan, kaj ke vi la brulŝtiparon plenŝarĝos per valoraj aĵoj; plue ke vi honore al  
 525 Teiresias aparte oferos tutnigran virŝafon, kiu superas viajn aliajn ŝafojn. Sed kiam vi estos per preĝoj peteginta la famajn arojn da fantomoj, tiam oferu tie virŝafon kaj nigran ŝafinon, turnante ilin al la mallumeta mortintejo, sed mem deturnu viajn okulojn kaj ilin direktu al la akvoj de la fluo. Tie tiam

530 aperos multaj fantomoj de jam mortintaj homoj. Post tio  
 tuj instigu viajn kunulojn kaj al ili ordonu, ke ili la ŝafojn,  
 kiuj tie kuŝas, mortpikitaj de la senkompata kupro, sen-  
 haŭtigu kaj bruligu, kaj ke ili preĝu al la Dioj, al la fortega  
 535 Hades kaj al la terura Persephone; sed elingigu mem la akran  
 glavon je via flanko kaj sidiĝu kaj ne allasu, ke la senfortaj  
 fantomoj proksimiĝu al la sango, antaŭ ol vi estos prideman-  
 dinta Teiresias. Tie tiam tuj la profeto, la ĉefulo de l' popoloj,  
 venos al vi, kiu antaŭdiros al vi la vojaĝon kaj longecon de  
 540 la vojo kaj vian revenon, kiel vi revenos trans la maron mult-  
 fiŝan."

Tiel ŝi parolis kaj tuj aperis la ortrona Eos. Nun min ĉirkaŭ-  
 vestis Kirke per vestaĵoj, per mantelo kaj subvesto; kaj la  
 545 nimfo mem sin vestis per granda, blankbrila vesto, delikata  
 kaj gracia, kaj ĉirkaŭ la koksojn ŝi ligis belan oran zonon  
 kaj metis sur la kapon vualkufon. Sed mi, irante tra la domo,  
 instigis miajn kunulojn, proksimiĝante al ĉiu aparte, per  
 afablaj vortoj:

„Nun vi ne plu restu, kuŝante en dolĉa dormo, sed ni iru;  
 ĉar jam donis al mi indikojn la respektinda Kirke.”

550 Tiel mi parolis kaj ilia brava koro obeis.

Sed eĉ ne de tie mi forkondukis sendifektaĵojn miajn kunulojn.  
 Estis iu Elpenor, la plej juna, nek tre kuraĝa en la milito, nek  
 saĝa je la spirito, kiu malproksime de siaj kunuloj, vinebria  
 555 kaj dezirante malvarmeton, estis kuŝiĝinta supre sur la sankta  
 loĝejo de Kirke; sed ekaŭdinte la bruadon kaj kriadon de siaj  
 ekscititaj kunuloj, li subite eksaltis kaj forgesis pro sia kon-  
 fuzita spirito, returne iri malsupren laŭ la longa ŝtuparo, sed  
 li falis rekte de l' tegmento kaj rompis al si la nukon, kiu  
 560 elvertebriĝis, kaj lia animo malsupreniris al la loĝejo de  
 Hades.

Sed kiam ili volis foriri, mi parolis meze de ili la vortojn:

„Eble vi opinias ke vi iros hejmen nun, al la kara lando de  
 viaj prapatroj; sed Kirke destinis al ni alian vojaĝon, al la  
 loĝejo de Hades kaj de la terura Persephone, por demandi  
 565 profetaĵon al la fantomo de la Thebano Teiresias.”

Tiel mi parolis kaj ilia koro rompiĝis. Plorante ili tie sidis  
 kaj eltiris al si la kapharojn; sed tio ja tute ne alportis utilon  
 al la vekriantoj.

Sed kiam ni malĝojante kaj verŝante abundajn larmojn,  
 venis ĉe la rapida ŝipo kaj la bordo de l' maro, tiam dume  
 570 estis alveninta tie Kirke kaj estis alliginta apud la nigra

ŝipo virŝafon kaj nigran ŝafinon, post kiam ŝi estis senpene preterpasinta nin: kiu ja povus vidi per la okuloj Diaĵon kontraŭ ties volo, ĉu ĝi iras aŭ venas?

## DEK UNUA KANTO.

### PRI LA FANTOMOJ DE L' MORTINTOJ.

Sed kiam ni estis subenirintaj al la ŝipo kaj la maro, tiam ni tutunue trenis la ŝipon en la diecan maron, starigis post tio la maston kaj la velojn sur la nigra ŝipo kaj prenante la ŝafojn, 5 ni surŝipigis ilin kaj ankaŭ mem ni surŝipigis malĝojante kaj verŝante abundajn larmojn. Kaj Kirke kun belaj harligoj, la timinda Diino kun homa voĉo, sendis al ni malantaŭ la ŝipon kun nigra antaŭsteveno favoran velŝveligan venton kiel multvaloran akompananton. Kaj post kiam ni estis prizorgintaj la tutan rigilaron en la ŝipo, ni sidigis; kaj la vento kaj 10 la direktisto direktis la ŝipon. Kaj la tutan tagon estis streĉitaj la veloj de la marveturanta ŝipo; [nun mallevigis la suno kaj ĉiujstratoj krepuskiĝis]. Nun alvenis nia ŝipo al la transa bordo de la profundflua Okeanos. Tie sin trovas la lando kaj urbo 15 de la Kimeriaj viroj, kaŝitaj en nuboj kaj nebuloj; neniam la luma suno rigardas ilin de supre per ĝiaj radioj, nek kiam ĝi supreniras al la multstela ĉielo, nek kiam ĝi ree sin turnas de la ĉielo al la tero; sed pereiga nokto estas etendita super la 20 mizeraj mortidevuloj. Tie alveninte, ni surterigis nian ŝipon sur la marbordsablon kaj elŝipigis la ŝafojn. Sed mem ni iris laŭlonge de la fluo de la Okeanos por alveni al la loko, kiun estis indikinta Kirke.

Tie tenis Perimedes kaj Eurulochos la oferbestojn pretaj. Sed mi, elingiginte la akran glavon je mia flanko, fosis kavaĵon 25 grandan unu ulnon je longeco kaj larĝeco; ĉirkaŭ tiu foso mi plenumis verŝoferaĵon honore al ĉiuj fantomoj, unue de miel-lakto, post tio de dolĉa vino kaj trie de akvo, kaj mi ŝutis sur ĉi ĉion blankan hordefarunon. Post tio arde mi preĝis al la sen- 30 fortaj fantomoj kaj al ili promesis, ke mi, alveninte en Ithaka, oferos en mia domo malfekundan bovon, la plej bonan, kaj ke mi la brulŝtiparon plenŝarĝos per valoraj aĵoj; plue, ke mi honore al Teiresias aparte oferos tutnigran virŝafon, kiu superas miajn aliajn ŝafojn. Sed kiam mi estis per promesoj kaj preĝoj

35 peteginta la famajn arojn da fantomoj, tiam mi prenis la ŝafojn  
 kaj senkoligis ilin super la foso kaj la nigra sango fluis en  
 ĝin. [Tiam kunvenis de sub la malluma mortintejo la fantomoj  
 de mortintaj homoj; junulinoj kaj junuloj kaj multsuferintaj  
 40 kaj multaj, vunditaj per kuprotegitaj lancoj, viroj, falintaj  
 en la batalo, alhavantaj sangmakulitan armaĵon. Multnombre  
 ili vagflugetis ĉirkaŭ la foso je ĉiuj flankoj kun terura kriadado  
 kaj paliga timo min ekkaptis.] Post tio mi tuj instigis miajn  
 45 kunulojn kaj al ili ordonis, ke ili la ŝafojn, kiuj tie kuŝis  
 mortpikitaj per la senkompata kupro, senhaŭtigu kaj bruligu  
 kaj ke ili preĝu al la Dioj, al la fortega Hades kaj al la terura  
 Persephone; sed mem mi elingigis la akran glavon je mia  
 flanko kaj sidiĝis kaj ne allasis, ke la senfortaj fantomoj prok-  
 50 simiĝu al la sango, antaŭ ol mi estos pridemandinta Teiresias.

Unue venis la fantomo de nia kunulo Elpenor; li ja ankoraŭ  
 ne estis enterigita sub la larĝostratan teron, ĉar ni estis post-  
 lasintaj en la loĝejo de Kirke lian kadavron, nepriplorita kaj  
 neenterigita, ĉar nin premis aliaj zorgoj. Lin vidante, mi  
 55 ekploris kaj ekkompatis en mia koro kaj lin alparolante, mi  
 diris la flugilhavajn vortojn:

„Elpenor, kiel vi malsupreniris en la nebulecan mortint-  
 ejon? Piede vi ankoraŭ pli baldaŭ alvenis ol mi per mia nigra  
 ŝipo.”

Tiel mi parolis, sed plendante li respondis per la vortoj:  
 60 „[Didevena Laert-ido, elpenslerta Odusseus!] Min blindigis  
 la pereiga destino de iu demono kaj ega dormo. Kuŝiginte  
 min supre sur la domo de Kirke, mi ne pripensis, ke mi devis  
 returne malsupreniri laŭ la longa ŝtuparo, sed falis rekte de la  
 65 tegmento kaj rompita al mi la nukon, kiu elvertebrigis kaj mia  
 animo iris malsupren al Hades. Sed nun mi petegas al vi  
 pro viaj tieaj geparencoj forestantaj, pro via edzino kaj via  
 patro, kiu vin edukis, kiam vi estis ankoraŭ malgranda kaj  
 pro Telemachos, kiun vi postlasis en via domo kiel ununuran  
 filon — mi ja scias, ke vi forveturante de ĉi tie el la loĝejo  
 70 de Hades, ree direktos vian fortike konstruitan ŝipon al la  
 insulo Aiaia; mi arde vin petas, ho reĝo! ke tie vi memoru  
 min — tie vi je via forvojaĝo ne, vin deturnante, min post-  
 lasu nepriplorita kaj neenterigita, por ke mi ne fariĝu la kaŭzo  
 de l'koloro de la Dioj kontraŭ vi, sed min bruligu kun  
 75 la armiloj, kiujn mi posedis kaj starigu tombmonteton sur la  
 bordo de l' griza maro por mi, mizera viro, por ke ankaŭ

la posteuloj ĝin sciigu; plenumu tion por mi kaj fikse starigu sur mia tombo la remilon, per kiu mi ankaŭ dumvive kutimis remi meze de miaj kunuloj.”

Tiel li parolis; sed respondante mi lin alparolis:

80 „Tutcerte mi ĉi ĉion, ho malfeliĉulo! plenumos kaj faros.”

Tiel interparolante per malgajaj vortoj, ni ambaŭ tie sidis, dum mi, je unu flanko sidante, ĉiam preta tenis la glavon super la sango kaj je la transa flanko parolis multvorte la fantomo de mia kunulo.

Sed nun alproksimiĝis la fantomo de mia mortinta patrino, 85 Antikleia, la filino de la grandkuraĝa Autolukos, kiun mi, forvojaĝante al la sankta Ilion ankoraŭ viva postlasis. Ŝin vidante mi ekploris kaj ekkompatis en mia koro, sed malgraŭ tio mi ne lasis ŝin, kiom ajn mi ĉagreniĝis, proksimiĝi al la sango, antaŭ ol mi estis eldemandinta Teiresias.

90 Nun proksimiĝis la fantomo de l' Thebaia Teiresias, portante oran sceptron; kaj tuj li min rekonis kaj parolis:

„[ Didevena Laert-ido elpenslerta Odusseus!] Kial do nun, ho malfeliĉulo! vi venis ĉi tien, forlasinte la lumon de l' suno por vidi la mortintojn kaj la senĝojan lokon? Sed foriru 95 de la foso kaj detenu vian akran glavon, por ke mi trinku da la sango kaj diru al vi la veron.”

Tiel li parolis, kaj mi returne cedis kaj puŝis mian glavon en la ingon; kaj kiam li estis trinkinta la nigretan sangon, tiam min alparolis la neriproĉebla profeto per la vortoj:

100 „Facilan revenon vi deziras, glorbriila Odusseus: sed tiun multpena al vi faros iu Diaĵo; ĉar mi kredas ke vi ne restos nevidata de la tertremigulo, kiu enirigis en sian animon mal-amikecon kontraŭ vi, koleriĝinte, ĉar vi tutblindigis lian karan filon. Sed spite al tio vi tamen ankoraŭ povus hejmen reveni, kvankam suferante multajn malfeliĉojn, se vi volus 105 bridi vian avidon kaj tiun de viaj kunuloj, tuj kiam vi, evitinte la violkoloran maron, estos proksimiginta vian fortike konstruitan ŝipon al la insulo Thrinakia kaj tie trovos la paŝtiĝantajn bovojn kaj fortajn ŝafojn de Helios, kiu ĉion vidas kaj 110 ĉion aŭdas. Se vi ilin lasos sendifektaj kaj nur atentos pri via reveno, tiam vi povas ankoraŭ alveni en Ithaka, kvankam suferante multajn malfeliĉojn; sed se vi difektos ilin, tiam mi antaŭdiras al vi pereon por via ŝipo kaj viaj kunuloj. Kaj 115 se vi eble mem elsavos vin, tiam vi malfrue kaj mizera sur fremda ŝipo revenos, post kiam vi estos perdinta ĉiujn kunulojn; kaj vi trovos malfeliĉojn en via domo, trokuraĝajn virojn,

kiuj fordibočas vian havaĵon kaj sin svatas al via disimila edzino, donante edziĝdonacojn. Sed reveninte vi punos la perfortajn farojn de ili; kaj kiam vi estos mortiginta la amantojn en via palaco, ĉu perruze aŭ malkaŝe per la akra kupro, tiam prenu faciluzeblan remilon kaj forvojaĝu, ĝis kiam vi alvenos ĉe tiaj homoj, kiuj la maron ne konas kaj ankaŭ ne manĝas kun salo miksitajn manĝaĵojn; ankaŭ ne konas ili ŝipojn kun ruĝaj antaŭstavenoj, nek faciluzeblajn remilojn, kiuj estas laflugiloj por la ŝipoj. Plue mi diros al vi tre klaran signon, kaj vi ne ĝin nerimarkos: ĉar kiam alia piediranto vin renkontos kaj opinios ke vi portas grenŝovelilon sur via forta ŝultro, tiam puŝtarigu la faciluzeblan remilon en la teron, plenumu honore al la reĝo Poseidon belan oferon, virŝafon kaj virbovon kaj gravedigan virapron kaj tiam revenu hejmen kaj tie oferu sanktajn hekatombojn al ĉiuj senmortaj Dioj laŭvice, kiuj loĝas en la vasta ĉielo. Fine proksimiĝos al vi tre maldolora morto ne surmare, kiu vin mortigos, dum vi iom post iom malfortiĝos en prospera maljuneco; kaj ĉirkaŭ vi feliĉe vivos via popolo; ĉi ĉion mi diras al vi laŭvere.”

Tiel li parolis, sed respondante mi lin alparolis:

„Teiresias, tion do estas al mi destininta la Dioj mem; sed nu, ĉi tion diru al mi kaj rakontu ĝin laŭvere: jen mi vidas la fantomon de mia ĵam mortinta patrino; silente ŝi sidas apud la sango kaj ne kuraĝas rigardi sian filon en la okulojn aŭ lin alparoli. Diru al mi, ho reĝo! kiel ŝi povus min rekoni estanta ĉi tie?”

145 Tiel mi parolis sed tuj li respondante min alparolis:

„Facile estas, kion mi diros kaj inspiros al vi en vian spiriton: ĉiu el la mortintoj, kiun vi lasas proksimiĝi al la sango, diros al vi la veron, sed ĉiu, al kiu vi rifuzas ĝin, tiu reiros returne.”

150 Tiel parolinte, la fantomo de reĝo Teiresias reiris en la loĝejon de Hades, post kiam li estis dirinta la profetaĵon. Sed mi konstante tie restis, ĝis kiam mia patrino proksimiĝis kaj trinkis la nigretan sangon. Tuj ŝi nun rekonis min kaj plendante ŝi parolis la flugilhavajn vortojn:

155 „Mia infano! kiel vi venis, ankoraŭ viva, en la mallumeta mortintejo? Estas ja malfacile por vivantoj vidi ĉi ĉion. [Ĉar kuŝas inter ĉi tiu loko kaj la tero grandaj riveroj kaj teruraj fluoj, unualoke la Okeanos, kiun oni neniel transiri povas, se oni piede vojaĝas kaj ne havas fortike konstruitan ŝipon.]

160 Aŭ ĉu vi longan tempon vagadante per via ŝipo kaj kun viaj

kunuloj venis ĉi tien el Troia? Kaj ĉu vi ankoraŭ ne alvenis en Ithaka kaj ĉu vi ankoraŭ ne vidis vian edzinon en via domo?"

Tiel ŝi parolis, sed respondante mi ŝin alparolis:

- „Mia patrino! La neceso min kondukis en la loĝejon de  
 165 Hades, por ke mi demandu profetaĵon al la fantomo de la  
 Thebaia Teiresias; ĉar mi ankoraŭ ne atingis la Achaian landon,  
 nek surpaŝis mi jam la landon nian, sed ĉiam mi estas rond-  
 vagadanta kun mizero, de post kiam mi sekvis la diecan Aga-  
 memnon al la multĉevala Ilion por batali kontraŭ la Troianoj.  
 170 Sed nu, ĉi tion diru al mi kaj rakontu ĝin laŭvere: kiu sorto  
 de la doloriga morto vin subigis? Ĉu estis longedaŭra malsano  
 aŭ ĉu la sagpafulino Artemis, proksimiĝante al vi, per siaj  
 mildaj sagoj vin mortigis? Parolu ankaŭ pri mia patro kaj  
 175 pri mia filo, kiun mi postlasis, ĉu mia reĝeco ankoraŭ estas  
 en iliaj manoj, aŭ ĉu jam posedas ĝin iu alia el la viroj, ĉar  
 oni opinias, ke mi jam ne revenos. Parolu ankaŭ al mi pri  
 la intencoj kaj deziroj de mia legitima edzino, ĉu ŝi restas ĉe  
 sia filo kaj gardas ĉion neŝanĝita, aŭ ĉu jam la plej eminenta  
 el la Achaioj kun ŝi edziĝis.”
- 180 Tiel mi parolis kaj tuj respondis mia respektinda patrino:  
 „Tutcerte ŝi ankoraŭ estas kun persistema koro en via  
 loĝejo; sed la noktoj kaj tagoj ĉiam mizerplene preterpasas  
 al ŝi, dum ŝi larmojn verŝadas. Ankaŭ vian belan reĝecon ankoraŭ  
 185 neniu posedas, sed Telemachos kviete administras la kron-  
 bienon kaj ĝuas sian decan parton de la festenoj, je kiuj kon-  
 venas, ke partoprenu juĝdecida viro; ĉar lin invitas ĉiuj al fes-  
 tenoj. Kaj via patro restas ĉiam sur la kamparo kaj venas  
 neniam en la urbon. Ankaŭ li ne havas liton aŭ kuŝejon, aŭ  
 190 mantelojn kaj brilatajn kovraĵojn, sed vintre li dormas, kie  
 liaj servistoj en lia domo dormas, en la polvo apud la fajro  
 kaj lia korpo estas vestita per malluksaj vestoj; sed kiam estas  
 veninta la somero kaj la fruktodona rikolto tempo, tiam ĉie  
 sur la dekliva kampo de lia vinberĝardeno kuŝas por li surtera  
 195 kuŝejo el falintaj folioj. Sur tiu li kuŝas malĝojante kaj ĉiam  
 li pligrandigas la ĉagrenon en sia koro, ĉar arde li sopiras al  
 via reveno; kaj tiel proksimiĝas al li la malagrabla maljuneco.  
 Tiel mi ankaŭ mortis kaj atingis la mortosorton; nek la akre-  
 vida sagpafulino en mia domo, proksimiĝante al mi, per siaj  
 200 mildaj sagoj min mortigis, nek iu malsano min atakis, kiu  
 plejofte pro terura konsumiĝo el la membroj la vivoforton  
 forprenas; sed la sopirado al vi kaj la deziro al via prudenteco,



ho glorbriila Oduseus! kaj al via mildanimeco forprenis al mi la vivon.”

205 Tiel ŝi parolis; sed, pripensinte en mia animo, mi volis ĉirkaŭpreni la fantomon de mia mortinta patrino; trifoje mi rapidis al ĝi kaj mia animo min instigis kapti ĝin, sed trifoje ĝi forflugis el miaj manoj simila al ombro aŭ al songobildo; kaj pli akra fariĝis en mia koro la malĝojo, kaj ŝin alparolante mi diris la flugilhavajn vortojn:

210 „Mia patrino! kial vi ne atendas min, kiu deziregas ĉirkaŭpreni vin, por ke ni eĉ en la loĝejo de Hades, ĉirkaŭbrakante unu la alian, ambaŭ satigu nian frosttremigan doloron. Aŭ ĉu la honorinda Persephone sendis al mi ĉi tiun ŝajnaĵon, por ke mi ankoraŭ pli multe vekriante ĝemu?”

215 Tiel mi parolis, kaj tuj respondis mia respektinda patrino:

„Ve al mi, ho mia infano, supermezure malfeliĉa inter ĉiuj viroj! neniel vin trompas Persephone, la filino de Zeus, sed ĉi tio estas la destino por la mortidevuloj, kiam ili estas mortintaj; ĉar tiam ne plu la tendenoj tenas kune la karnon kaj la ostojn, 220 sed la grandega forto de la brulanta fajro ĉi ĉion detruas, post kiam la vivoforto forlasis la blankan ostaron, sed la animo, forfluginte el la korpo, tiam vagflugetas kvazaŭ songobildo; sed klopodu nun reveni plej baldaŭ en la lumon kaj ĉi ĉion ne forgesu, por ke vi ankaŭ povu ĝin rakonti poste al via edzino.”

225 Tiel ni ambaŭ interparolis per vortoj, sed subite alvenis la virinoj — ĉar la honorinda Persephone ilin sendis — kiuj estis la edzinoj kaj filinoj de la eminentuloj. Grandare ili kolektiĝis ĉirkaŭ la nigra sango. Sed mi pripensis, kiel mi

230 povos pridemandi ĉiun aparte. Ĉi tio ŝajnis al mia spirito la plej bona decido: elingiginte mian longapintan glavon je la dikmuskola femuro, mi ne allasis, ke ili ĉiuj kune trinku la nigran sangon. Unuope ili nun proksimiĝis kaj ĉiu rakontis al mi pri sia deveno; ĉar pri tio mi demandis ĉiujn.

235 Unue mi tie vidis Turo, idinon de nobla patro, kiu al mi diris, ke ŝi estas la filino de la neriproĉebla Salmoneus kaj ankaŭ ŝi diris ke ŝi estis la edzino de Kretheus, la Aiol-ido; sed ŝi ekamis la diecan flu(diaj)on Epineus, kiu kiel multe

240 plej bela el ĉiuj riveroj fluas tra la lando kaj tial ŝi ofte vizitis la belan akvon de Epineus. Tiun similante la terĉirkaŭa tertremigulo estis ame kuŝinta flanke de ŝi apud la enfluo de la rivero kun multaj akvoturniĝoj; ĉirkaŭe staris kiel monto la kurbigintaj violkoloraj ondoj kaj kaŝis la Dion kaj la morti-

245 devan virinon. [Nun li malligis la zonon de la virgulino kaj

malsuprenirigis la dormon sur ŝin]. Sed kiam la Dio estis plenuminta la agon de l'amo, tiam li varme premis ŝian manon kaj diris la vortojn kaj parolis:

„Ĝoju, virino, pro tiu amo. Dum la preterturnigado de la jaro vi naskos belegajn infanojn, ĉar ne senfrukta estas la  
250 kundormado kun la senmortuloj; sed zorge ilin vartu kaj eduku. Iru nun hejmen kaj silentu kaj ĝin diru al neniu; sed sciu, ke mi estas la tertremigulo Poseidon.”

Tiel parolinte li subakvigis en la ondantan maron. Kaj ŝi,  
255 gravediĝinta, naskis Pelias kaj Neleus, kiuj ambaŭ fariĝis fortaj servistoj de la granda Zeus; Pelias, ŝafriĉa, loĝis en la vasta Iaolkos, kaj la alia en la multsabla Pulos. Ankaŭ ŝi naskis, la reĝulino inter la virinoj, al Kretheus ĉi tiujn aliajn filojn: Aison kaj Pheres kaj la ĉarbataleman Amuthaon.

260 Post ŝin mi vidis la filinon de Asopos, Antiope, kiu sin gloris esti ame dorminta eĉ en la brakoj de Zeus kaj ŝi naskis du filojn, Amphion kaj Zethos, kiuj unuaj fondis la urbon de l' seppordega Thebe kaj konstruis turmuregojn, ĉar ili ja ne  
265 povis loĝi sen muregaj turoj en la vasta Thebe, kvankam ili estis tre fortaj.

Post ŝin mi vidis la edzinon de Amphitruon, Alkmene, kiu, ame dorminte en la brakoj de l' granda Zeus, naskis la bravaniman Herakles kun leona kuraĝo. Plue mi vidis la filinon  
270 de la tre kuraĝa Kreion, Megara, kiun havis kiel edzinon la filo de Amphitruon kun nevenkebla kuraĝo.

Tiam mi vidis la patrinon de Oidipous, la belan Epikaste, kiu kun nescia spirito plenumis teruran fiagon, ĉar ŝi edziniĝis kun sia propra filo, kiu, post kiam li estis mortiginta sian patron, ŝin faris sia edzino. Sed tuj la Dioj ĝin igis konata  
275 inter la homoj. Sed dolorojn suferante li regis en la multŝatata Thebe super la Kadmeoj laŭ la pereigaj decidoj de la Dioj; sed ŝi al la loĝejo iris de la fortega pordgardisto Hades, post kiam, venkita de sia doloro, ŝi estis pendiginta mortigan  
280 banton je la alta plafono; sed al li ŝi ege multajn ĉagrenojn postlasis, kiom efektivigas la malbenoj de patrino.

Ankaŭ mi vidis la belegan Chloris, kiun iam Neleus faris sia edzino pro ŝia beleco, post kiam li estis doninta sen-nombrajn edziĝdonacojn; ŝi estis la plej juna filino de l' Iasido Amphion, kiu iam forte regis en la Minueia Orchomenos.  
285 Ŝi nun estis reĝino de Pulos kaj naskis al Peleus belegajn infanojn, Nestor kaj Chromios kaj la multestiman Periklumenos. Krom tiujn ŝi ankaŭ naskis filinon, la fortecan Pero,

kies beleco estis primirata de la mortidevuloj, kaj al kiu sin svatis ĉiuj ĉirkaŭe loĝantaj; sed Neleus ŝin donis kiel edzinon al neniŭ, kiu ne forkondukos la kurbkornajn, larĝfrontajn, malcedemajn bovojn el Phulake, el la potenco de Iphiklos. Nur la neriproĉebla profeto promesis, ke li forkondukos ilin. Sed la neevitebla destino de la Dioj kaj dolorigaj katenoj kaj kamparaj bovpaŝtistoj malebligis ĝin al li. Sed kiam monatoj kaj tagoj dum la preterturniĝado de l' jaro estis finpasintaj kaj revenis la sezonoj, tiam lin elkatenigis la forta Iphiklos, ĉar li estis eldirinta al li profetaĵon kaj tiel estis plenumata la volo de Zeus.

Ankaŭ mi vidis Leda, la edzinon de Tundareus, kiu al Tundareus estis naskinta du bravanimajn filojn, la ĉevalobeigan Kastor kaj la pugnofortan Polluks [, kiujn, ambaŭ ankoraŭ vivajn, tenas enfermita la viviga tero], kiuj, eĉ sub la tero honorataj de Zeus, ĉiun duan tagon jen revivas, jen denove mortas; kaj ili partohavas al honoro egala al la honoro de la Dioj.

Post ŝin mi vidis la edzinon de Aloeus, Iphimedeia, kiu diris, ke ŝi ame kunigis sin kun Poseidon: kaj tiel ŝi naskis du filojn — sed nur mallongan tempon ili vivis — la disimilan Otos kaj la vastfaman Ephialtes. Ilin kreskigis la grendona tero grandegaj kaj multsupere plej belaj, almenaŭ escepte de la glora Orion; ĉar kiel naŭjaruloj ili jam estis naŭ ulnojn [je la larĝeco, kaj je la longeco ili estis naŭ klaftojn]. Eĉ minacis ili la senmortulojn, ke ili sur la Olumpos kaŭzos la militobruon de l' multpena milito. [Ili intencis loki la Ossa sur la Olumpos, kaj sur la Ossa la multfoliaran Pelion, por ke la ĉielo fariĝu atingebla.] Kaj ili vere estus plenumintaj tion, se ili estus atingintaj la plenan viriĝon. Sed ilin pereigis la filo de Zeus, kiun estis naskinta la belhara Leto, ambaŭ kune, ankoraŭ antaŭ ol la unuaj barboharoj komencis kreski sub iliaj tempioj kaj dense kovris la mentonon per plenkreska lanaĵo.

Plue mi vidis Phaidra kaj Prokris kaj la belan Ariadne, la filinon de l' pereigema Minos, kiun iam Theseus volis forkonduki el Kreta al la altaĵo de l' sankta Athenai, sed li ne profitis je tio: ĉar antaŭe ŝin mortigis Artemis [sur la marĉirkaŭata Dia, laŭ la atesto de Dionusos].

Ankaŭ mi vidis Maira kaj Klumene, kaj la abomenan Eriphule, kiu multvaloran oron akceptis interŝange por la vivo de sia edzo. Sed ĉiujn mi ne povas mencii, nek nomi, kiom da

edzinoj kaj filinoj de herooj mi vidis. Ĉar la dieca nokto estus  
 330 antaŭ tiam tute pasinta. Sed ankaŭ estas nun la tempo por  
 iri dormi, ĉu mi iros al la rapida ŝipo al miaj kunuloj, ĉu mi  
 restos ĉi tie. Sed pri mia akompano hejmen zorgos ja la Dioj  
 kaj vi."

Tiel li parolis; kaj ĉiuj senbruaĵ restis kaj silentaj kaj de  
 ravo estis ili kaptitaj tra la tuta multombra ĉambrego. Tiam  
 335 meze de ili unua ekparolis la blankkubuta Arete:

„Phaiakoj! kia viro ŝajnas al vi ĉi tiu, je staturaj kaj grandeco  
 kaj je la proporcia saĝeco en lia spirito? Krome li estas mia  
 gasto kaj ĉiu el vi ja partohavas al tiu honoro. Tial vi lasu  
 baldaŭ lin foriri kun via akompano kaj ne avaraj estu je la  
 340 donacoj al iu, kiu urĝe ilin bezonas; ĉar multaj trezoroj kuŝas  
 pro la favoro de l' Dioj en viaj ĉambregoj."

Ankaŭ parolis meze de ili la maljuna heroo Echeneos [kiu  
 estis la plej maljuna el la Phaiakaj viroj]:

„Amikoj! tutcerte ne kontraŭ mia intenco kaj mia opinio  
 345 parolas la tre prudenta reĝino; nu do, vi obeu; sed estas la  
 rajto de Alkinoos agi kaj paroli."

Lin siavice respondis Alkinoos kaj li parolis:

„Tiu parolo de ŝi envere estu tiel plenumata, se vere mi  
 viva regas super la remŝipamaj Phaiakoj. Sed mia gasto decidu,  
 350 kvankam li ege sopiras al la hejmenvojaĝo, resti malgraŭ  
 tio ĝis morgaŭ, ĝis kiam mi estos pretiginta ĉiujn donacojn.  
 Tiam estos prizorgata lia akompano de ĉiuj viroj, sed precipe  
 de mi; ĉar al mi apartenas la potenco en la lando."

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

355 „Reganto Alkinoos, plej eminenta inter ĉiuj viroj! se vi  
 insistus, ke mi restu eĉ tutan jaron ĉi tie kaj se vi rapidigus  
 mian dumvojaĝan akompanon kaj donus al mi brilegajn donacojn,  
 tiam eĉ tion mi preferus, kaj estus multe pli profitodone  
 al mi, reveni kun sufiĉe plenaj manoj en mian karan patrujon;  
 360 ankaŭ mi estus tiam pli estiminda kaj pli ŝatata de ĉiuj viroj,  
 kiuj min vidis, kiam mi revenos en Ithaka."

Lin siavice respondis Alkinoos kaj li parolis:

„Oduseus! tion ni vere pri vi ne opinias vin alrigardante,  
 nome ke vi estas trompisto kaj fi-ruzulo, kiajn la nigra tero  
 365 nutras multajn, ĉie troviĝantajn homojn, kiuj elpensas men-  
 sogojn, kies devenon neniu ekscii povas; sed vi posedas graciajn  
 parolmanieron kaj estas en vi normala prudento; ankaŭ vian  
 rakonton vi artece al ni komunikis same kiel kantisto [, la  
 ĉagrenajn malfeliĉojn de ĉiuj Argeioj kaj de vi mem]. Sed nu,

370 -diru al mi ĉi tion kaj rakontu ĝin laŭvere, ĉu vi vidis ankaŭ  
 iujn el viaj disimilaj militkunuloj, kiuj kune kun vi veturis  
 al Ilion kaj tie atingis sian mortosorton? La nokto ja estas  
 longa, neeldireble longa por mi; ankaŭ ankoraŭ ne estas tempo  
 por iri dormi en la dormoĉambro; tial daŭrigu rakonti al  
 375 mi pri aferoj mirindaj. Eĉ ĝis la dieca tagiĝo mi eltenus, se  
 vi decidi volus rakonti en ĉi tiu ĉambrego viajn malpros-  
 peraĵojn."

Lin respondante parolis la elpensema Oduseus:

„Reganto Alkinoos, plej eminenta inter ĉiuj viroj! Ekzistas  
 tempo por longaj rakontaj, sed ankaŭ tempo por la dormo.  
 380 Sed se vi deziras aŭdi ankoraŭ pli multe, tiam mi ne rifuzos  
 rakonti al vi ankoraŭ pli kompatindajn aĵojn ol la ĵusaj, la  
 dolorojn de miaj kunuloj, kiuj poste pereis, ili, kiuj elsaviĝis  
 el la multsuferiga batalo kontraŭ la Troianoj, sed tamen dum  
 la hejmenvojaĝo mortis kaŭze de la volo de malbona virino.  
 385 Sed kiam la sankta Persephone estis dispelinta en ĉiujn  
 direktojn la fantomojn de la delikataj virinoj, tiam proksi-  
 miĝis al mi la fantomo de l'Atre-ido Agamemnon, malĝojante;  
 kaj ĉirkaŭ li sin estis kolektintaj ĉiuj aliaj, kiuj kune kun li  
 en la domo de Aigisthos estis mortintaj kaj atingintaj sian  
 390 mortosorton. Tuj li min rekonis, post kiam li estis trinkinta  
 la nigran sangon; laŭte li ekploris verŝante abundajn larmojn  
 dum li etendis al mi la manojn, dezirante ĉirkaŭbraki min;  
 sed ne plu li posedis la fortecon, nek la elastecon, kiun li antaŭe  
 posedis en siaj facilflekseblaj membroj. Lin vidante mi ekploris  
 395 kaj kompatis en mia animo kaj lin alparolante mi diris la  
 flugilhavajn vortojn:

„Glorriĉa Atre-ido, reĝo de la popoloj, Agamemnon! Kiu  
 sorto de la doloriga morto do subigis vin? Ĉu vin venkis sur  
 la ŝipo Poseidon, post kiam li estis kaŭzinta kontraŭ vi la for-  
 400 tegan blovadon de teruraj ventoj? Aŭ ĉu malamikecaj viroj  
 vin mortigis sur la firma tero, dum vi volis rabi bovojn kaj  
 belajn aĵojn da ŝafoj? Aŭ ĉu ili batalis por defendi sian urbon  
 kaj siajn edzinojn?"

Tiel mi parolis kaj tuj li respondante alparolis min:

405 „Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! Nek min  
 venkis sur la ŝipo Poseidon, [post kiam li estis kaŭzinta kontraŭ  
 mi la fortegan blovadon de teruraj ventoj,] nek malamikecaj  
 viroj min mortigis sur la firma tero, sed, preparante al mi  
 410 pereon kaj la mortosorton, min mortigis Aigisthos kun mia  
 pereiga edzino, post kiam li estis invitinta min en sian palacon

- [, post la manĝo, sammaniere kiel oni batmortigas bovon ĉe la manĝujo]. Tiel mi mortis plej kompatindan morton; kaj ĉirkaŭ mi la aliaj kunuloj miaj estis unu post la alia mortigataj; same kiel blankdentaj aproj, kiujn oni buĉas en la
- 415 loĝejo de riĉa, multpotenca viro, okaze de geedziĝa festo aŭ interamika manĝo aŭ abunda festmanĝo. Vi ĉeestis jam la morton de multaj viroj, kiuj estis mortigataj en la dubatalo aŭ en la terura milito. Sed plej multe vi estus vekrianta en via koro, se tion vi estus vidinta, kiel, ĉirkaŭ la vinmiksulo kaj
- 420 la abundaj tabloj, ni tie kuŝis mortigitaj en la loĝĉambrego kaj la tuta planko fumis de sango. Plej kompatinda tamen el ĉio, kion mi aŭdis, estis la voĉo de l' filino de Priamos, Kassandra, kiun la insidema Klutaimnestra mortigis je mia flanko; tiam mi metis miajn manojn sur la teron kaj klopodis min levi, kvankam mi estis trapikita per la glavo; sed la sen-
- 425 hontulino foriris kaj eĉ ne povis decidi, kvankam mi jam iris al la loĝejo de Hades, premfermi miajn okulojn per la manoj kaj fermi mian buŝon. Tiel do estas nenio pli kruela kaj senhonta ol virino [tia, kiu tiajn agojn projektas en sia spirito]; tiel ankaŭ ŝi elpensis abomenindan faron, kiam ŝi preparis
- 430 mortigon al la edzo de sia juneco. Kaj tamen mi estis opiniinta, ke mi revenos hejmen, bonvenigite de miaj infanoj kaj servistoj; sed ŝi, supermezure inklina al hontindaĵoj, superŝutis per malhonoro sin mem kaj ankaŭ ĉiujn estontajn delikatajn virinojn, eĉ se vere iu el ili estus virta."
- 435 Tiel li parolis, sed respondante mi lin alparolis:  
 „Ve! tiam vere la laŭttondra Zeus treege malamamis la idaron de Atreus kaj ĝin trafis pere de virinaj insidoj, jam de la komenco; pro Helena jam multaj el ni mortis, kaj kontraŭ vi projektis Klutaimnestra, kiam vi estis malproksima, ruzan pereon."
- 440 Tiel mi parolis, sed tuj li respondante alparolis min:  
 „Tial ankaŭ vi neniam estu troĝentila al via edzino; ne rakontu al ŝi ĉiun penson, kiun vi scias, sed diru al ŝi iun kaj lasu la alian kaŝita por ŝi. Sed vin ne trafos, ho Oduseus, mortigo, almenaŭ ne de l' flanko de via edzino; ĉar treege
- 445 prudenta kaj tre inklina al pripenseco en sia animo estas la filino de Ikarios, la saĝanima Penelope. Vere, kiel junan virinon ni postlasis ŝin, kiam ni iris militon; kaj sur ŝia mammo kuŝis la malgranda knabeto, kiu eble nun sidas en la rondo
- 450 de l' viroj, la feliĉulo! Ĉar certe lin revidos lia kara patro, kiam li estos reveninta, kaj li ĉirkaŭbrakos sian patron, kiel

kutime estas. Male ŝi, mia edzino, eĉ ne allasis, ke mi satigu min per la okuloj, vidante mian filon; sed jam antaŭe ŝi mortigis min [. Sed nun mi diros al vi ion alian kaj vi konservu  
 455 ĝin en via koro: sekrete, kaj ne malkaŝe, alterigu vian ŝipon al la kara lando de viaj prapatroj, ĉar ne plu fidindaj estas la virinoj]. Sed nu do, diru al mi ĉi tion, kaj rakontu ĝin laŭvere! ĉu eble vi ekaŭdis, ke vivas ankoraŭ ie mia filo, ĉu ie en Orchomenos aŭ en la multsabla Pulos, aŭ eble ĉe  
 460 Menelaos en la vasta Sparta; ĉar sur la tero ankoraŭ ne mortis la dieca Orestes.”

Tiel li parolis, sed respondante mi lin alparolis:

„Atre-ido! kial vi ĉi tion al mi demandas? Neniel mi scias, ĉu li vivas aŭ jam mortis. Kaj nebone estas senutile paroli.”  
 465 Tiel interparolante per malgajaj vortoj ni tie staris, malĝojante kaj verŝante abundajn larmojn. Tiam proksimiĝis al mi la fantomo de la Pele-ido Achilleus kaj plue la fantomoj de Patroklos kaj de l' neriproĉebla Antilochos kaj de Aiaks, kiu je staturo kaj eksteraĵo estis supera al la aliaj Danaoj,  
 470 escepte al la neriproĉebla Pele-ido. Tuj rekonis min la fantomo de l' rapidpieda nepo de Aiakos kaj vekriante li diris la flugilhavajn vortojn:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Odusseus! trokuraĝulo! Kiun ankoraŭ pli grandiozan faron vi elpensos en via spirito?  
 475 Kiel vi kuraĝis malsupreniri en la loĝejon de Hades, kie loĝas la mortintoj senkonsciaj, la ŝajnbildoj de l' mortintaj homoj?”

Tiel li parolis, sed respondante mi lin alparolis:

„Ho Achilleus, filo de Peleus, multe plej supera inter la Aĉaioj! mi venis, ĉar mi bezonis Teiresias, ĉu eble li povos  
 480 diri iun konsilon al mi, kiel mi povos reveni al la rokeca Ithaka. Ĉar mi ankoraŭ ne atingis la Aĉaian landon, nek mi jam ekpaŝis sur nian landon, sed ĉiam ankoraŭ mi suferas malfeliĉojn. Sed pri vi, Achilleus! neniu viro estis antaŭe nek poste pli feliĉega ol vi! Ĉar antaŭe, dum via vivo, ni, Argeioj, vin honoris same alte kiel la Diojn kaj nun, dum vi  
 485 ĉi tie estas, vi multe superas ĉiujn mortintojn; tial ne malĝoju ĉar vi mortis, Achilleus!”

Tiel mi parolis, sed tuj li respondante alparolis min:

„Ne konsole parolu al mi pri la morto, ho multglora Odusseus! Mi preferus surtere esti tagpagata servisto de alia, de  
 490 malriĉa viro, kiu ne posedas multan posedaĵon, ol esti reĝo super ĉiuj mortintoj. Sed nu, rakontu al mi pri mia admirinda filo, ĉu li kuniris al la milito por esti bona pioniro en la milito,



aŭ ĉu ne. Diru ankaŭ al mi, ĉu vi ion eksciis pri la neripro-  
 495 ĉebla Peleus, ĉu li ankoraŭ posedas sian reĝecon inter la multaj  
 Murmidonoj, aŭ ĉu oni malestimas lin en Hellas kaj en Phthia,  
 ĉar la maljuneco malfortigas liajn manojn kaj piedojn. Ho,  
 ke mi povus esti lia helpanto sub la radioj de l' suno, ankoraŭ  
 same forta, kiel kiam en la larĝa Troia mi iam venkis, protekt-  
 500 ante la Argeiojn, la tiean tre kuraĝan popolon. Se mi, ankoraŭ  
 same forta, eĉ nur mallongan tempon venus en la domo de  
 mia patro, tiam mi timindigus miajn forton kaj nevinkeblajn  
 manojn al multaj, kiuj perforton uzas kontraŭ li kaj volas lin  
 prirabi de lia honoro."

Tiel li parolis, sed respondante mi lin alparolis:

505 „Vere, nenion mi eksciis pri la neriproĉebla Peleus, sed  
 pri via kara filo Neoptolemos mi rakontos al vi la tutan veron,  
 kiel vi min petas; ĉar mem mi lin kondukis sur la kava, pro-  
 porcie konstruita ŝipo, el Skuros al la Aĉaioj kun bonaj tibiŝ-  
 510 irmiloj. Kaj ĉiufoje, kiam ni ĉirkaŭ la urbo Troia projektis  
 militplanon, tiam li kutimis paroli unua kaj ne malĝuste  
 li parolis; nur la disimila Nestor kaj mi superis lin je elok-  
 venteco. Kaj ĉiufoje kiam ni batalis per la kupro en la eben-  
 aĵo de l' Troianoj, tiam li neniam restis inter la amaso aŭ  
 515 inter la aro de l' militistoj, sed multe antaŭen li kuris, cedante  
 al neniuj rilate kuraĝon kaj multajn virojn li mortigis en  
 la terura milito. Ĉiujn mi ne povus mencii nek denombri,  
 kiom da viroj li mortigis protektante la Argeiojn, sed nur la  
 Telephidon, la heroon Eurupulos, kiun li mortigis per la  
 520 kupra lanco. Ĉirkaŭ li estis mortigataj multaj kunuloj, Keteioj,  
 sekve de donacoj al virino. Li certe estis la plej bela viro kiun  
 mi iam vidis, escepte de la dieca Memnon. Plue, kiam ni, la  
 plej kuraĝaj el la Argeioj, malsuprenigis nin en la ĉevalon,  
 kiun estis pene konstruinta Epeios — sed estis donita al mi  
 525 la komando super ĉio — [tiel same por malfermi la pordon de  
 l' bone elpensita insidilo, kiel ankaŭ por ĝin fermi], tiam  
 la aliaj regantoj kaj ĉefuloj de la Danaoj forviŝis larmojn kaj  
 sube tremetis iliaj membroj; sed lin mi tute neniam vidis per  
 miaj okuloj nek paliganta sur sia bela vizaĝo, nek forviŝi  
 530 larmon de siaj vangoj. Tre arde li petegis, ke mi lasu lin iri  
 el la ĉevalo, kaj li jam pripalpis la tenilon de sia glavo kaj  
 sian pezan kuprotegitan lancon kaj li deziregis malfeliĉon  
 al la Troianoj. Sed kiam ni estis ĝisfunde ruinigintaj la altan  
 urbon de Priamos, tiam li sendifekte suriris la ŝipon kun sia  
 parto el la militakiraĵo kaj belega honoriga donaco kaj li estis

535 per la akra kupro nek de malproksime nek de proksime iam trafita, kiel tamen ofte okazas en la milito, ĉar Ares furiozas ne diferencigante.”

Tiel mi parolis kaj la fantomo de l' rapidpieda nepo de Aiakos grandpaŝe foriris tra la asfodela herbejo, ĝoje ĉar  
540 estis mi dirinta, ke lia filo estas tre famkonata.

La aliaj fantomoj de la mortintoj tie staris malĝojante, kaj ĉiu demandis pri la objektoj de sia zorgo. Nur la fantomo de l' Telamon-ido Aiaks staris malapude, ankoraŭ kolerante  
545 pro la venko, kiun mi iam akiris super li, kiam apud la ŝipoj mi malkonsentis kun li pri la armilaro de Achilleus; lia respektinda patrino estis promesinta ĝin kiel premion kaj la kaptitaj Troianoj decidis kune kun Pallas Athene. Ho! ke mi estus neniam venkinta je tia premio: ĉar pro ĝi la tero prenis tian  
550 viron al si [, Aiaks, kiu superis, rilate staturon kaj farojn, ĉiujn aliajn Danaojn escepte de l' neriproĉinda Pele-ido]. Lin mi alparolis per afablaj vortoj:

„Aiaks, filo de l' neriproĉebla Telamon, ĉu do eĉ post via morto vi ne estas forgesonta vian koleron kontraŭ mi pro tiuj  
555 fatalaj armiloj? Estis ja la Dioj, kiuj ilin faris malfeliĉego por la Argeioj: ĉar vi mortis, estante kvazaŭ fortika turo por ili. Kaj pro via morto senĉese malĝojas ni, la Achaioj, same kiel pro la morto de la Pele-ido Achilleus. Tamen neniu  
560 alia estas kulpa je tio ol Zeus, kiu terure malamis la armeon de la lancosvingaj Danaoj kaj tiel destinis al vi la mortosorton. Nu do, ĉi tien, ho reĝo! por ke vi aŭdu miajn parolojn kaj sciigojn; kaj bridu vian koleron kaj vian troferan inklinon.”

Tiel mi parolis, sed nenion li al mi respondis, sed li reiris en la mortintejon, al la aliaj fantomoj de l' mortintoj. [Tiam  
565 li tamen, kiel ajn kolera li estis, estus parolinta al mi, aŭ mi al li: sed la animo en mia brusto deziris vidi la fantomojn de la aliaj mortintoj.]

Tie mi plue vidis la brilan filon de Zeus, Minos, kiu tie sidis, portante oran sceptron kaj juĝdecidante super la mortintoj; kaj ĉi tiuj demandis al la reĝo lian decidon, sidante kaj starante ĉirkaŭ li en la larĝpordega loĝejo de Hades.

Post lin mi vidis la grandegan Orion, kiu sur la asfodela herbejo ĉaskunpelis la bestojn, kiujn li estis iam mem mortiginta sur la solecaj montoj, havante en la manoj la tutkupran bastonegon ĉiam nerompeblan.

Ankaŭ mi vidis la filon de l' gloriĉa Gaia, Tituos, kuŝantan sur la tero. Li kuŝis etendita sur naŭ hektaroj; ambaŭflanke

sidis vulturo, kiu formanĝis lian hepaton, penetrante en la membranon; kaj li ne povis ilin deteni per siaj manoj. Li ja  
 580 estis turmentinta Leto, la gloran edzinon de Zeus, kiam ŝi iris al Putho tra Panopeus kun belaj dancejoj.

Plue mi ankaŭ vidis Tantalos, kiu, suferante terurajn dolorojn, tie staris en la lageto; la akvo ondetis kontraŭ lian mentonon. Li gestmontris, ke li soifas, sed ne kapablis atingi la  
 585 akvon; ĉar ĉiufoje kiam la maljunulo sin klinis, dezirante trinki, tiam la akvo forglutite malaperis kaj ĉirkaŭ liaj piedoj videbliĝis nur la nigra fundo, ĉar iu demono ĉiufoje sekigis la akvon. Super lia kapo altfoliaraj arboj pendigis siajn frukt-  
 590 ojn, [: pirujoj kaj granatujoj kaj brilfruktaj pomujoj kaj dolĉaj figoj kaj abundkreskaj olivoj]; sed ĉiam, kiam la maljunulo sin rektigis por klopodi kapti ilin, tiam la vento ĉiufoje ilin suprensvingis al la multombraj nuboj.

Plue mi ankaŭ vidis Sisuphos, kiu, suferante terurajn dolorojn, ambaŭmane penforportis grandegan ŝtonon. Ĉiufoje li, per  
 595 manoj kaj piedoj penapogante sin, puŝis la ŝtonegon supren sur monteton; sed ĉiam, kiam li estis ĵetonta ĝin trans la supron, tiam ĉiufoje iu superforto returnis ĝin; kaj tiam denove ruliĝis al la ebenaĵo la senkompata ŝtonego. Sed ree li tiam streĉe  
 600 puŝadis ĝin supren, kaj dume la ŝvito defluis de liaj membroj kaj super lia kapo sin levis polvonubo.

Post lin mi vidis la fortegan Herakles [,sed nur lian ŝajnbildon, ĉar vivas li mem ja inter la senmortaj Dioj kaj tie li ĝuadas je festenoj, kaj kiel edzinon li havas la belmaleolan Hebe, la filinon de l' granda Zeus kaj de l' orsandala Hera.]  
 605 Ĉirkaŭ li estis la bruado de l' mortintoj kvazaŭ de klakadantaj birdoj, timigite forflugantaj en ĉiujn direktojn; sed li, simila al nokto malluma, havis en la manoj la nudan arkpafilon kaj la sagon sur la tendeno, dum li terurokule ĉirkaŭrigardadis kaj ŝajne ĉiam estis pafonta. [Ĉirkaŭ lia brusto pendis la  
 610 timiga portrimeno, la ora balteo, sur kiu sin trovis mirindaj artaĵoj: ursoj kaj sovaĝaj aproj kaj fajrokulaj leonoj kaj plue bataloj kaj militoj kaj mortigoj kaj virpereigoj. Ke tiu, kiu tiun portrimenon tiel artece fabrikis, faru neniun alian artaĵon  
 615 post kiam li faris ĉi tiun!] Tuj li min rekonis, kiam li min vidis per la okuloj kaj plendante li diris al mi la flugilhavajn vortojn:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Odusseus! Ve, mizerulo!  
 Ankaŭ vi kuntrenas malfeliĉan sorton, kian ankaŭ mi portadis  
 620 sub la radioj de l' suno. Mi estis la filo de l' Kron-ido Zeus,

sed tamen mi suferis senliman mizeron: ĉar mi estis la subulo de iu viro, kiu multe malsuperis min kaj kiu ordonis al mi malfacilajn laborojn. Ankaŭ ĉi tien li iam min sendis por forporti la hundon; ĉar li opiniis, ke verŝajne neniu alia laboro estos pli malfacila ol ĉi tiu. Tamen mi kunportis supren kaj 625 kondukis el la loĝejo de Hades la hundon: ĉar akompanis min Hermes kaj la fajrŝprucokula Athene."

Tiel parolinte, li reiris en la loĝejon de Hades.]

Sed mi senĉese tie restis por atendi, ĉu ankoraŭ venos iu el la heroecaj viroj, kiuj mortis en pli fruaj tempoj. Kaj tut- 630 certe mi estus ankoraŭ vidinta la praaajn virojn, kiujn mi deziris vidi [, Theseus kaj Peirithoos, la gloregajn filojn de l' Dioj], sed tiam jam kolektis sin sennombra aro da mortintoj kun terura kriado kaj paliga timo min ekkaptis, ke la esti- 635 minda Persephone sendos el la loĝejo de Hades kontraŭ min la kapon de Gorgo, la terura monstro. Tuj mi nun rapidis al mia ŝipo kaj ordonis al miaj kunuloj ke ili surŝipiĝu mem kaj malligu la postajn ŝnuregojn; kaj rapide ili iris sur la ŝipon kaj sidiĝis ĉe la remapogiloj. Tiam la fluado de la ondoj portis 640 nian ŝipon tra la fluo de l'Okeanos, unue per remado kaj poste per belega vento favora.

---

## DEK DUA KANTO.

### LA SEIRENOJ, SKULLA, CHARUBDIS, LA BOVOJ DE HELIOS.

Sed kiam nia ŝipo estis forlasinta la fluan de l' rivero Okeanos kaj estis veturinta ekster la ondojn de l' maro larĝvoja kaj alveninta al la insulo Aiaia, kie sin trovas la loĝejo kaj la dancejoj de l' frumatena Eos, kaj la loko de l' supreniro de 5 Helios, tiam ni, tie alveninte, surterigis nian ŝipon sur la marbordsablon kaj elŝipiĝis mem apud la ondoresaltejo de la maro; kaj ekdorminte ni tie atendis la diecan tagiĝon.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam mi sendis kelkajn kunulojn al la palaco de Kirke por transporti 10 la kadavron de l' mortinta Elpenor. Rapide ni dehakis trunkojn kaj tie, kie la marbordo plej alte elstaras, ni lin enterigis malĝojante kaj verŝante abundajn larmojn. Sed kiam estis for-

bruligitaj la kadavro kaj la armilaro de l' mortinto kaj kiam ni estis starigintaj tombmonteton kaj surtrentintaj tomboŝtonon sur ĝin, tiam ni puŝfiksitis sur la supro de l' tombmonteto lian faciluzeblan remilon.

Tiel ni ĉi ĉion prizorgis; dume ne restis nerimarkite de Kirke, ke ni estis revenintaj el la loĝejo de Hades, sed, post kiam ŝi estis bele sin vestinta, ŝi tre rapide venis; kaj, sekvante ŝin, la servistinoj portis panon kaj multe da viandaĵoj kaj perlan, ruĝan vinon. Tiam ŝi, majestoplena inter la Diinoj, paŝis mezen de ni kaj parolis:

„Kuraĝuloj! kiuj subeniris vivaj en la domon de Hades, dumortuloj, dum la aliaj homoj nur unufoje mortas! Sed nu do, manĝu vi manĝaĵon kaj trinku vinon ĉi tie, la tutan tagon; sed je la apero de Eos vi tuj ekforveturu. Sed mi indikos al vi la vojon kaj sciigos ĉion necesan, por ke vi ne priploru poste malĝoje iun malfeliĉon, ĉu surmare aŭ surtere, sekve de via propra ĉagrena senpripenseco.”

Tiel ŝi parolis kaj nia brava koro al ŝi obeis.

Tiel ni sidis tie la tutan tagon ĝis la subeniĝo de la suno, manĝante abundajn viandaĵojn kaj trinkante dolĉan vinon. Sed kiam malleviĝis la suno kaj alproksimiĝis la krepusko, tiam ili kuŝiĝis ĉe la postaj ŝnuregoj de l' ŝipo; sed ŝi, kaptante mian manon, min sidigis malproksime de miaj kunuloj kaj tiam kuŝiĝis flanke de mi kaj demandis pri ĉio; kaj mi rakontis al ŝi ĉion laŭ konveno. Kaj tiam la honorinda Kirke min alparolis per la vortoj:

„Tiel do ĉi ĉio estas finita; sed vi aŭskultu nun, je tio, kion mi al vi parolos; kaj la Diaĵo mem vin rememorigos je ĝi. Unue vi alvenas ĉe la Seirenoj, kiuj ensorĉas ĉiujn homojn, kiu ajn al ili venas. Ĉiu, kiu pro nescio proksimigas sin al ili kaj aŭdas la voĉon de l' Seirenoj, tiu neniam plu revenos hejme kaj plu neniam liaj edzino kaj malgrandaj infanoj ĝojante renkonte iros al li; sed la Seirenoj, sidante en herbejo, lin ensorĉas per laŭta kantado; kaj ĉirkaŭe kuŝas granda amaso da ostoj de putrantaj kadavroj de viroj, kies haŭto jam ĉie malaperas. Tie do preterveturu, sed unue moligu mi dolĉan vakson kaj ŝmiru tiun sur la orelojn de viaj kunuloj, por ke neniu el ili aŭdu la kantadon. Sed se eble vi deziras mem ĝin aŭdi, tiam viaj kunuloj ligu sur la rapida ŝipo viajn manojn kaj piedojn, dum vi rekte staros kontraŭ la mastingo, kaj estu la ŝnuroj al tiu alligitaj, por ke vi povu aŭskulti kun ĝuo je la voĉo de l' Seirenoj. Sed kiam vi petegos viajn kunulojn

kaj al ili ordonos vin malligi, tiam ili ligu vin per ankoraŭ pli multaj ŝnuroj.

55 Sed kiam estos preterpasintaj viaj kunuloj la Seirenojn, kiun el ambaŭ vojoj vi tiam devos sekvi, mi ne plu tion rakontos al vi detale, sed mem vi tion pripensu en via spirito; mi nur al vi mencios ambaŭ kazojn. Je unu flanko troviĝas tegmento-  
60 formaj rokoj; kaj kontraŭ ilin bategas la teruraj ondoj de l' nigrokula Amphitrite; Planktaj ilin nomas la feliĉegaj Dioj. Tie ne birdoj pretervenas, eĉ ne la timemaj kolomboj, kiuj al Patro Zeus alportas ambrozion; ĉar ankaŭ el ili ĉiam la glata roko kelkajn forprenas; sed tiam la Patro ĉiufoje  
65 sendas aliajn por kompletigi la nombron. Tie ankaŭ neniam elsaviĝas ŝipo de l' homoj, kiu tie venis, sed la ondoj de l' maro kaj uruganoj de pereiga fajro ĉiam kuntrenas la tabulojn de la ŝipoj kaj la kadavrojn de l' viroj. Nur unufoje tie sendifekte pasis tiu marvetura ŝipo Argo, de ĉiu famkonata, kiam ĝi estis revenanta el la lando de Aiates. Ankaŭ tiun la tieaj ondoj estus ĵetintaj baldaŭ kontraŭ la grandegajn rokojn, sed Hera ĝin preterkondukis, ĉar Iason estis al ŝi kara.

Je la alia flanko sin trovas du rokaĵoj, el kiuj unu kun pinta supro atingas la vastan ĉielon kaj ĉiam ĝin ĉirkaŭas blukolora  
75 nebulo; tiu neniam malaperas kaj neniam sin trovas klara ĉielo ĉirkaŭ ĝia supro, nek somere nek aŭtune. Neniu mortdestinulo povus ĝin suriri kaj alveni supre, eĉ ne se li havus dudek manojn kaj piedojn; ĉar glata estas la roko kaj kvazaŭ  
80 ĉirkaŭe polurita. Kaj en la mezo de la roko troviĝas krepuska kaverno, direktanta sin al okcidento kaj al la mallumeta mortintejo, laŭlonge de kiu vi eble povos preterdirekti vian ŝipon, ho brilglora Oduseus! Sed eĉ ne forta viro povas, de el la kava ŝipo arkpafante, per la sagoj atingi la kavernon. En tiu loĝas Skulla [terure bojanta; ŝia voĉo estas same kiel la voĉo de ĵusnaskita hundido, kaj ŝi mem estas abomena monstro]. Kaj neniu ĝojus, ŝin vidante, eĉ ne se iu Diajo ŝin renkontus. Ŝi havas dekdu piedojn kaj ĉiuj estas  
90 maldikaj, kaj plue ses longegajn kolojn kaj sur ĉiu sin trovas malbelega kapo, en kiu trivicaĵaj dentoj estas, densaraj kaj multnombraj, kaj plenaj de malluma morto. Ĝis la mezo de l' korpo ŝi kuŝas kaŝita en la kava kaverno, sed ŝiajn kapojn  
95 ŝi tenas ekster la terura abismo; tie ŝi fiŝkaptas delfenojn kaj fokojn kaj kelkfoje, kiam ŝi povas, ankaŭ pli grandajn marmonstrojn, kiajn sennombre elnutras la laŭtbrua Amphitrite. Ankoraŭ neniam sin gloris ŝipanoj, ke ili laŭlonge de tiu sen-

difekte elsaviĝis kun sia ŝipo: sed por ĉiu el siaj kapegoj ŝi  
 100 forrabas viron kaj detrenas lin de l' ŝipo kun nigra antaŭ-  
 steveno.

Tiam vi vidos, Oduseus, la duan, pli malaltan rokaĵon;  
 ili kuŝas unu apud la alia. Vi eĉ povus pafi sagon de unu al la  
 alia. Supre sur tiu staras granda figuro freŝfoliara kaj je ĝia  
 malsupro englutegas la dieca Charubdis la malhelan akvon;  
 105 [ĉar ĉiutage ŝi tri fojojn supren vomegas la akvon kaj tri fojojn  
 ŝi ree ĝin englutas;] terure! Ho, vi ne troviĝu tie, kiam ŝi  
 englutas; ĉar eĉ la tertremigulo ne povus vin savi el tiu danĝero.  
 Sed tute proksimiĝu al la rokaĵo de Skulla kaj tiam rapide  
 preterpasigu vian ŝipon, ĉar estas ja multe pli bone priplori  
 110 ses kunulojn sur la ŝipo ol ĉiujn kune."

Tiel ŝi parolis, sed respondante mi ŝin alparolis:

„Nu do, rakontu, ho Diino, ĉi tion al mi laŭvere, ĉu eble  
 mi povos elsaviĝi el la pereigema Charubdis kaj ĉu mi povos  
 min defendi kontraŭ Skulla, kiam ŝi volos rabi miajn kunulojn."  
 115 Tiel mi parolis, sed tuj respondis ŝi, majestoplena inter la  
 Diinoj:

„Trokuraĝulo! Ĉu do vi denove deziras al militaj okupoj  
 kaj al penado? Ĉu do vi eĉ ne cedos antaŭ la senmortaj Dioj?  
 Ĉar ŝi ne estas mortideva, sed ŝi estas senmorta malbono,  
 terura kaj abomena kaj sovaĝa kaj nevenkebla; kaj neniuj  
 120 defendo estas ebla; plej bone estas forrapidi de ŝi. Ĉar se longan  
 tempon vi tie restos, armante vin apud la rokaĵo, tiam mi  
 timas ke ŝi, denove vin atakante, vin atingos kun same multaj  
 kapoj ol la unuan fojon kaj forrabos same multajn virojn.  
 125 [Tial plej rapide remu kaj alvoku Krataiis, la patrinon de  
 Skulla, kiu ŝin naskis kiel malfeliĉon por la mortdestinuloj;  
 tiu ŝin detenas tiam de dua atako.]

Post tio vi atingos la insulon Thrinakia; tie sin paŝtas multaj  
 bovoj kaj fortaj ŝafoj de Helios, sep aroj de bovoj kaj same  
 130 multaj belegaj aroj de ŝafoj, kvindek en ĉiu aro. Idojn ili ne  
 naskas kaj tamen ili neniam malmultiĝas. Diinoj estas la  
 paŝtistinoj de la aroj, la nimfoj kun belaj harligoj Phaethousa  
 kaj Lampetia, kiujn al Helios Huperion naskis la dieca Neaira.  
 Kiam ŝi estis ilin naskinta kaj edukinta, tiam la respektinda  
 135 patrino ilin transportis al la insulo Thrinakia por loĝi fori-  
 zolite kaj por gardi la ŝafojn kaj kurbkornajn bovojn de l'  
 patro. Se vi ilin lasos sendifektaj kaj nur atentos pri via reveno,  
 tiam vi povas ankoraŭ alveni en Ithaka, kvankam suferante  
 multajn malfeliĉojn; sed se vi difektos ilin, tiam mi antaŭ-



140 diras al vi pereon [por via ŝipo kaj viaj kunuloj. Kaj se vi eble mem elsavos vin, tiam vi malfrue kaj mizere revenos, perdinte ĉiujn kunulojn].”

Tiel ŝi parolis kaj tuj aperis la ortrona Eos. Post tio ŝi, majestoplena inter la Diinoj, foriris en la insulon. Sed mi nun iris sur la ŝipon kaj ordonis al miaj kunuloj, ke ili ankaŭ mem  
145 sin surŝipigu kaj malligu la postajn ŝnuregojn. Rapide nun ili iris en la ŝipon kaj sidigis ĉe la remapogiloj [kaj envice sidante ili bategis la grizkoloran maron per la remiloj]. Kaj  
150 Kirke kun belaj harligoj, la timinda Diino kun homa voĉo, sendis al ni malantaŭ la ŝipon kun nigra antaŭsteveno favoran velŝveligan venton kiel multvaloran akompananton. Kaj post kiam ni estis prizorgintaj la tutan rigilaron en la ŝipo, ni sidigis; kaj la vento kaj la direktisto direktis la ŝipon. Tiam mi parolis kun malĝojanta koro meze de miaj kunuloj:

„Amikoj — ĉar ne konvenas, ke nur unu aŭ du la profetaĵon  
155 scias kiun al mi diris Kirke, majestoplena inter la Diinoj — tial mi ĝin diros, por ke ni, konante ĝin, ĉu mortu, ĉu eble nin elsavu kaj evitu la morton kaj la mortosorton. Unue ŝi nin instigas, ke ni evitu la kantadon kaj la multfloran herbejon  
160 de la fatalaj Seirenoj. Nur al mi permesis ŝi aŭskulti je ilia voĉo. Sed vi min ligu per katenoj nerompeblaj por ke mi tie restu senmove, dum mi rekte staros kontraŭ la mastingo, kaj estu la ŝnuroj al tiu alligitaj. Sed se mi vin petegos kaj al vi ordonos min malligi, tiam vi ligu min per ankoraŭ pli multaj ŝnuroj.”

165 Tiel mi, ĉi ĉion dirante, informis miajn kunulojn; dume baldaŭ atingis nia fortike konstruita ŝipo la insulon de l'ambaŭ Seirenoj, ĉar favora vento ĝin puŝis antaŭen. Sed tuj post tio la vento ĉesis blovi kaj la trankvila maro estiĝis senventa,  
170 ĉar iu demono trankviligis la ondojn. Ekstarante miaj amikoj nun malhisis la velojn de la ŝipo, ilin metis en la kavan ŝipon, kaj sidigante ĉe la remiloj ili ŝaŭmigis la akvon per la glatigitaj remiloj. Sed dume mi prenis grandan diskon da vakso kaj kiam mi estis per la akra kupro distrancinta ĝin en pecojn malgrandajn, mi ĝin knedis per miaj fortikaj manoj; baldaŭ  
175 nun moliĝis la vakso sekve de l' granda forteco de miaj manoj [kaj sekve de l' radioj de la reĝo Helios Huperion]. Laŭvice mi surŝmiris nun la orelojn de ĉiuj kunuloj kaj ili ligis sur la ŝipo miajn manojn kaj piedojn dum mi rekte staris kontraŭ la mastingo, kaj estis la ŝnuroj al tiu alligataj; tiam ili sidigis  
180 kaj batadis la grizkoloran maron per la remiloj. Sed kiam ni,

rapide veturante, estis venintaj je tia distanco, ke krianta homo jam povas sin aŭdebligi, tiam ne restis nerimarkita de ili la rapidvetura ŝipo, kiu proksime sin levis, kaj ili ek-kantis la laŭtan kanton:

- „Venu do ĉi tien, multlaŭdata Odusseus, granda gloro de  
 185 l' Aĉaioj! vian ŝipon surterigu por aŭskulti je la voĉo de ni  
 ambaŭ! Ĉar ankoraŭ neniam preterveturis ĉi tie iu per sia  
 nigra ŝipo, antaŭ ol aŭskulti je l' dolĉsona kanto el nia buŝo,  
 sed ĉiu reiras, ĝojante kaj sciante pli multe ol antaŭe. Ĉar  
 190 ni scias ĉion, kion en la vasta Troia la Argeioj kaj Troianoj  
 laŭ la volo de la Dioj trasuferis; ni eĉ scias ĉion, kio okazas  
 sur la multajn nutranta tero.”

- Tiel ili parolis, kantante per bela voĉo; kaj mia koro deziris  
 aŭskulti, kaj signante per la brovoj mi ordonis al miaj kunuloj  
 ke ili min malligu. Sed antaŭen kliniĝinte ili daŭrigis la  
 195 remadon. Kaj tuj ekstaris Perimedes kaj Eurulochos kaj min  
 ligis per ankoraŭ pli multaj ŝnuroj kaj ankoraŭ pli bone min  
 enkatenigis. Sed kiam ili estis preterremintaj ilin kaj ni ne  
 plu povis aŭdi la voĉon kaj la kanton de la Seirenoj, tiam  
 miaj fidelaj kunuloj rapide forprenis la vakson, kiun mi estis  
 200 ŝmirinta sur iliajn orelojn, kaj min liberigis de miaj ligiloj.

- Sed kiam ni estis preterpasintaj tiun insulon, tiam mi  
 subite ekvidis vaporon kaj terurajn ondojn kaj mi ekaŭdis  
 obtuzan bruon. Pro timo ili lasis gliti la remilojn el la manoj  
 kaj susurante tiuj kunflue fornaĝis. Kaj la ŝipo restis sur la  
 205 sama loko, ĉar ili ne plu movis per la manoj la maldikfinajn  
 remilojn. Sed mi, irante tra la ŝipo, instigis miajn kunulojn,  
 proksimiĝante al ĉiu aparte, per afablaj vortoj:

- „Ho amikoj! neniel ni ja estas senspertuloj rilate danĝerojn;  
 vere, ĉi tiu malbono ne estas pli granda ol kiam la Kiklopo  
 210 per potenca perforto nin enfermis en sia volbiĝanta kaverno;  
 kaj tamen ankaŭ de tie ni forsavis nin per miaj kuraĝo, konsilo  
 kaj prudento, kaj mi opinias ke ankaŭ pri la nuna danĝero  
 ni eble iam memoros. Nu do, ni ĉiuj obeu, ĝuste tiel, kiel mi  
 215 ordonos. Vi batadu, sidante ĉe la remapogiloj, per la remiloj  
 la profundan ondoresalton de l' maro, por provi, ĉu eble Zeus  
 permesos al ni eviti ĉi tiun pereon kaj elsaviĝi. Sed al vi,  
 direktilisto, mi jene ordonas — sed atentu pri ĝi en via koro,  
 ĉar vi ja zorgas pri la direktilo de la kava ŝipo — detenu la  
 220 ŝipon ekster tiu vaporo kaj tiuj ondegoj kaj direktu ĝin al la  
 rokaĵo, por ke ĝi ne forrapidu al alia direkto pro via neatenteco  
 kaj ĵetu nin en la pereon.”

Tiel mi parolis kaj rapide ili obeis al miaj vortoj. Mi ne plu parolis pri Skulla, la neevitebla malfeliĉego, por ke ne 225 ĉesigu la remadon miaj kunuloj pro teruro kaj sin kaŝu interne de la ŝipo. Kaj tiam mi estis forgesinta la malagrablan ordonon de Kirke, kiam ŝi insistis, ke mi ne kirasu min; sed mi almetis mian gloran armaĵon kaj, prenante du longajn lancojn en la manojn, mi iris sur la ferdekon de l' antaŭstevano de nia ŝipo.

230 Ĉar mi atendis ke el tiu direkto unue aperos la rokloĝanta Skulla, kiu estis alportonta malfeliĉon al miaj kunuloj. Sed nenie mi povis ŝin ekvidi kaj miaj okuloj laciĝis dum ĉiu-direkten mi rigardadis sur la nebulecan rokaĵon.

Nun ni ĝemplorante veturis en la malvastajon; je unu flanko 235 kuŝis Skulla, kaj je la alia terure englutegis la dieca Charubdis la salecan akvon de l' maro. Ĉiufoje, kiam ŝi elvomis, ĉiosupren-ŝaŭmis, furioze interturniĝante, same kiel kaldrono super granda fajro; kaj supre sur la pintojn de ambaŭ rokaĵoj falis 240 la ŝaŭmo. Sed kiam ŝi denove englutegis la salecan akvon de l' maro, tiam interne ĉio furioze estis interturniĝanta kaj terure bruegis ĉirkaŭe la roko kaj sube videbliĝis la fundo el nigra sablo. Kaj paliga timo ekkaptis miajn kunulojn;

245 ni ŝin alrigardis, timante la pereon; tiam Skulla kaptis el mia kava ŝipo ses kunulojn, kiuj estis la plej fortaj rilate la brakojn kaj la muskolecon. Kiam mi ree rigardis al mia rapida ŝipo kaj miaj kunuloj, tiam mi jam vidis ilin ŝvebi super mi kaj barakti per piedoj kaj manoj. Kriante ili kun 250 malespera koro min vokis per la nomo, tiam lastfoje! Kiel kiam sur elstaranta roko fiŝkaptisto je tre longa bastono allogaĵon kiel manĝaĵon por la fiŝoj malgrandaj ĵetas en la akvon kaj subakvigas en la maron la tubeton fabrikitan el la korno de kampara bovo kaj poste sian baraktantan kaptaĵon tiras 255 el la akvo, tiel ankaŭ ili baraktante estis supren levataj sur la rokaĵon. Tie ŝi ilin formanĝegis ĉe la eniro de la kaverno, dum ili laŭte kriis kaj etendis siajn brakojn en terura agonio. Tio certe estis la plej kompatinda spektaklo, kiun mi iam vidis per miaj okuloj, el ĉio kion mi trasuferis, esplorante la vojojn de l' maro.

260 Sed kiam ni estis nin forsavintaĵ de la rokaĵoj kaj de la terura Charubdis kaj de Skulla, tiam ni baldaŭ alvenis apud la bonega insulo de l' Dio. Tie sin trovis belaj, larĝfrontaj bovinoj kaj multaj fortaj ŝafoj de Huperion Helios. Tiam mi jam aŭdis, dum mi estis ankoraŭ sur la maro en mia nigra 265 ŝipo, la muĝadon de la inter bariloj enfermitaj bovoj kaj

la blekadon de l' ŝafoj. Kaj nun mi ekmemoris en mia spirito pri la vortoj de l' blinda profeto, la Thebaia Teiresias, kaj de l' Aiaia Kirke, kiuj tre insiste estis ordonintaj al mi, eviti la insulon de l' homĝojiga Helios.

- 270 Tiam meze de miaj kunuloj mi parolis kun malĝojanta koro:  
 „Aŭskultu vi je miaj vortoj, ho kunuloj, kiuj jam tiel multe da malbonoj trasuferis! por ke mi komuniku al vi la antaŭdiron de Teiresias kaj de la Aiaia Kirke, kiuj tre insiste estas ordonintaj al mi, eviti la insulon de l' homĝojiga Helios;  
 275 ĉar ili diris, ke tie nin trafos plej terura malfeliĉo. Tial vi remu la ŝipon nigran preter la insulon.”

Tiel mi parolis, sed ilia koro rompiĝis, kaj tuj al mi respondis Eurulochos per la incitaj vortoj:

- „Senkompata vi estas, Oduseus; supermezure vi havas fortecon kaj neniam vi estas laca je la membroj. Vere, ĉio estas al vi el fero, ĉar vi ne permesas al viaj kunuloj, ĝenataj de laceco kaj dormo, iri sur la teron, kie ni sur la marĉirkaŭata insulo ree povus pretigi manĝon bongustan, sed facilanime vi al ni ordonas, ke ni dum la rapidema nokto, fornaĝante de  
 285 la insulo, vagadu sur la nebuleca maro. Sed en la noktoj ekestas danĝeraj ventoj, pereigaj por la ŝipoj; kien do oni povus sin elsavi el la minaca pereco, se eble subite proksimiĝus blovanta ventego, ĉu suda vento aŭ fajfe blovanta nord-okcidenta  
 290 vento? Tiuj ja plej ofte frakasas ŝipon, eĉ kontraŭ la volo de siaj estroj, la Dioj. Nu do, nun ni obeu al la nigra nokto kaj ni preparu nian vespermanĝon sur la bordo kaj tie restu apud la rapida ŝipo; sed morgaŭ frumatene ni sursipiĝu kaj direktu nian ŝipon al la vasta maro.”

- Tiel parolis Eurulochos kaj la aliaj kunuloj aprobis liajn  
 295 vortojn. Kaj tiam mi ekkomprenis, ke do iu demono projektas malbonon kontraŭ ni kaj lin alparolante, mi diris la flugilhavajn vortojn:

- „Eurulochos! tutcerte ĉi ĉiuj min devigas, ĉar mi nur sola estas. Sed nu do, vi ĉiuj ĵuru fortan ĵuron al mi, ke neniuj, se eble ni trovos iun aron da bovoj aŭ grandan aron da ŝafoj, mortigu en pereiga nepripenseco bovon aŭ ŝafon; sed vi manĝu kviete la manĝon, kiun al ni donis la senmorta Kirke.”

- Tiel mi parolis kaj tuj ili ĵuris kiel mi ordonis. Sed kiam ili  
 305 estis ĵurintaj kaj tute eldirintaj la ĵuron, tiam mi albordigis la forti ke konstruitan ŝipon en la kurba haveno, proksime al trinkebla akvo kaj miaj kunuloj elŝipiĝis kaj post tio lertece preparis al si la vespermanĝon. Sed kiam ili estis satigintaj

- sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam ili rememoris kaj pri-
- 310 ploris siajn karajn kunulojn, kiujn Skulla estis preninta el la kava ŝipo kaj formanĝinta. Dum ili ankoraŭ estis plorantaj, proksimiĝis al ili la dolĉa dormo. Sed kiam estis je la tria parto de l' nokto kaj jam la steloj estis pasintaj la supron de l' ĉielo, tiam la nubokolektulo Zeus igis ekblovegi la nordan venton je terura ventego kaj li kaŝis la teron kaj la maron
- 315 malantaŭ la nebuloj, kaj nokto venis suben de la ĉielo. Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam ni trenis nian ŝipon en kavan kavernon kaj ĝin ankrigis; tie sin trovis la belaj dancejoj kaj sidlokoj de la nimfoj; tie kunvenon mi kunvokis kaj meze de ili parolis la vortojn:
- 320 „Amikoj! en nia rapida ŝipo ja estas manĝo kaj trinko; tial ni detenu nin de l' bovoj, por ke neniuj malfeliĉo okazu al ni: ĉar ĉi tiuj bovoj kaj fortaj ŝafoj apartenas al terura Dio, al Helios, kiu ĉion vidas kaj ĉion aŭdas.”
- Tiel mi parolis kaj ilia brava koro persvadiĝis. Sed tutan
- 325 monaton nun senĉese blovis la suda vento, kaj neniuj aliaj ventoj ekblovis, sed nur la sud-orienta vento kaj la suda vento. Dum ili ankoraŭ havis manĝon kaj ruĝan vinon, ili sin detenis de la bovoj, dezirante savi la vivon. Sed kiam ĉiuj vivrimedoj el la ŝipo estis konsumitaj kaj ili jam vagante, devigate de
- 330 l' neceso, ĉase persekutis fiŝojn kaj birdojn, kio ajn al ili enmaniĝis [per kurbigitaj hokoj — ĉar malsato turmentis ilian stomakon —], tiam mi foriris en la insulon por preĝi al la Dioj, ĉu eble iu el ili indikos al mi la vojon por la hejmen-
- 335 iro. Sed kiam mi, irante tra la insulo, estis forlasinta miajn kunulojn, tiam mi lavis miajn manojn sur loko, kie ŝirmo estis kontraŭ la vento kaj preĝis al ĉiuj Dioj, kiuj loĝas sur la Olumpos; kaj ili ŝutis sur miajn palpebrojn dolĉan dormon. Sed dume proponis Eurulochos al miaj kunuloj jenan pereigan konsilon:
- 340 „Aŭskultu vi je miaj vortoj, ho kunuloj, kiuj jam tiel multe da malbonoj trasuferis! Estas vere ke ĉiuj specoj de mortado estas abomenaj por la mizeraj mortidevuloj, sed plej kompatinde estas, de malsato morti kaj atingi sian mortosorton. Nu do, ni kumpelu la plej bonajn el la bovoj de Helios kaj ilin oferu al la senmortuloj, kiuj loĝas en la vasta ĉielo.
- 345 Kaj se eble ni iam alvenos en Ithaka, la lando de niaj prapatroj, tiam ni fondos tuj honore al Huperion Helios riĉan templon kaj ni metos en ĝin multnombrajn valorajn trezorojn. Sed se li, kolerante pro la bovoj rektkornaj, deziras pereigi

nian ŝipon kaj la aliaj Dioj lin helpas je tio, tiam mi preferas,  
 350 je unu fojo malfermi la buŝon por engluti la ondojn, ol longan  
 tempon konsumiĝi de malsato sur ĉi tiu soleca insulo.”

Tiel parolis Eurulochos kaj la aliaj kunuloj aprobis liajn  
 vortojn. Tuj nun ili kumpelis la plej bonajn el la bovoj de Helios  
 en la proksimeco — ĉar ne malproksime de l' ŝipo kun nigra  
 355 antaŭstevano sin paŝtis la kurbkornaj, belaj bovoj larĝfrontaj —  
 kaj ili stariĝis ĉirkaŭ la brutojn kaj preĝis al la Dioj, post  
 kiam ili estis ŝirkolektintaj freŝajn foliojn de altfoliara kverko;  
 ĉar ili ne plu havis blankan hordeon en la bonferdeka ŝipo.  
 Sed kiam ili estis preĝintaj kaj ilin estis buĉintaj kaj sen-  
 360 haŭtigintaj, tiam ili detranĉis la femuraĵojn kaj tiujn kovris  
 per duobla tavolo da grasaĵo kaj metis super ilin krudan karnon.  
 Ankaŭ ili ne havis vinon por verŝoferi sur la brulantan oferaĵon,  
 sed verŝoferante per akvo, ili rostis ĉiujn internaĵojn. Sed  
 kiam la femuraĵoj estis forbrulintaj kaj ili estis manĝintaj  
 365 da la internaĵoj, tiam ili dispecigis la ceteran viandon, kaj  
 ĝin pikis ĉirkaŭ la rostilojn.

Tiam malaperis la dolĉa dormo de miaj palpebroj kaj mi  
 reiris al la rapida ŝipo kaj al la bordo de l' maro. Sed kiam  
 mi, irante, jam estis proksima al la ambaŭflanke kurbigita  
 ŝipo, tiam ekĉirkaŭis min la vaporeto agrabla de oferodoro;  
 370 kaj vekriante mi laŭtvoĉe alvokis la Diojn senmortajn:

„Patro Zeus kaj vi aliaj feliĉegaj Dioj ĉiamaj! Vere, ĝuste  
 je mia malfeliĉo vi endormigis min en dormon senkompatan  
 kaj dume miaj postrestintaj kunuloj elpensis teruran krimon.”

375 Rapide nun iris la streĉvesta Lampetia al Huperion Helios,  
 por sciigi al li, ke ni estas mortigintaj liajn bovojn. Tuj li  
 nun parolis, kolerante en sia koro, meze de l' senmortuloj:

„Patro Zeus kaj vi aliaj feliĉegaj Dioj ĉiamaj! Punu do la  
 kunulojn de l' Laert-ido Oduseus, kiuj trokuraĝe mortigis  
 380 miajn bovojn, pro kiuj mi ĉiam ĝojis, kiam mi supreniris al  
 la multstela ĉielo kaj kiam ree mi turnis min de la ĉielo al la  
 tero. Sed se ili ne pagos justan kompenson por la bovoj, tiam  
 mi subeniros al la loĝejo de Hades kaj lumos inter la mort-  
 intoj.”

Lin respondante alparolis la nubokolektulo Zeus:

385 „Helios, lumu nur inter la senmortuloj kaj inter la morti-  
 destinaj homoj sur la grendona tero; sed ties rapidan ŝipon  
 mi baldaŭ trafos per mia brila ekfulmo kaj meze de l' vinkolora  
 maro mi disfrakasos ĝin en pecojn!”

Ĉi tion mi poste ekaŭdis de l' belhara Kalupso; kaj ŝi

390 pretendis, ke ŝi mem ĝin aŭdis de l' kondukisto Hermes.

Sed kiam mi estis subenirinta al mia ŝipo kaj la maro, tiam mi ĉiun riproĉis, irante de unu al la alia, sed nenian savrimedon ni kapablis trovi, ĉar jam estis mortaj la bovoj. Tuj post tio la Dioj montris al ili antaŭsignojn: ekrapmis la haŭtoj kaj ekmuĝis la viando ĉirkaŭ la rostiloj, la rostita kaj la kruda, kaj estis same kiel la muĝado de bovoj.

Ses tagojn miaj fidelaj kunuloj nun ĉasis la plej bonajn el la bovoj kaj ilin formanĝis. Sed kiam la Kron-ido Zeus aperigis la sepan tagon, tiam la vento, kiu unue estis furiozinta kiel urugano, ĉasis blovi kaj rapide ni surŝipiĝis kaj direktis nian ŝipon al la vasta maro, post kiam ni estis starigintaj la maston kaj hisintaj la blankajn velojn. Sed kiam ni estis forlasintaj ĉi tiun insulon kaj neniu alia lando plu montriĝis, sed nur ĉielo kaj maro, tiam la Kron-ido aperigis malluman nubon super la kava ŝipo kaj malheliĝis sub ĝi la maro. Ne tre longan tempon nun la ŝipo ankoraŭ velveturis, ĉar rapide proksimiĝis fajfeganta nord-okcidenta vento, furioze alrapidanta kune kun terura ventego. Subite la bloveganta ventego rompis la ambaŭ antaŭŝnurojn de l' masto; kaj la masto falis malantaŭen kaj la tuta rigilaro falis en la holdon. Kaj la masto trafis sur la malantaŭa steveno la kapon de l' direktlisto kaj ĝi frakasis ĉiujn ostojn kune de la kapo. Tiam li defalis, simile al akrobato, de la ferdeko, kaj lia brava animo forlasis la ostaron. Dume Zeus tondrigis kaj ĵetegis en la ŝipon sian ekfulmon; kaj la tuta ŝipo tremis, trafite de l' fulmo de Zeus, kaj ĝi estis pleniĝanta de sulfuraodoro; kaj miaj kunuloj falis el la ŝipo. Same kiel markornikoj ili naĝis ĉirkaŭ la nigra ŝipo sur la ondoj: kaj la Diaĵo forprenis de ili la hejmenvojaĝon.

420 Sed dume mi iris tien kaj reen sur la ŝipo, ĝis kiam la ondo-bato disigis la tabulojn de la kilo; nun la ondoj ĝin kuntrenis tutdifektita. Post tio ili frakasis la maston kaj ĝin faligis sur la kilon; sed sur la masto ankoraŭ pendis la rimeno, farita el la felo de bovo. Per tiu mi kunligis ambaŭ: la kilon kaj la maston, kaj sidiĝante sur ilin, mi estis kuntrenata de pereigaj ventoj. Sed tiam la nord-okcidenta vento, kiu antaŭe estis furiozinta je urugano, ĉasis blovi, sed nun rapide proksimiĝis la suda vento, alportante ĉagrenon al mia koro, ĉar nun mi ankoraŭfoje estis reironta al la pereigema Charubdis. La tutan nokton mi estis kuntrenata, sed je la leviĝo de l' suno mi alvenis apud la rokaĵo de Skulla kaj la terura Charubdis. 425 Ĉi tiu ĝuste englutegis la salecan akvon de l' maro. Sed rapide



mi suprentiris min en la altan figujon kaj min premante kontraŭ ĝin, mi tie pendis kiel vespereto. Sed nenie mi povis firme min apogi per la piedoj kaj ankaŭ mi ne povis grimpi pluen; 435 ĉar la radikoj sin etendis ĝis malproksime kaj la longaj, grandaj branĉoj dependis malproksime super mi kaj ombris super la Charubdis. Senĉese mi firmtenadis min, ĝis kiam ŝi estos elvomanta ree la maston kaj la kilon. Sed nur malfrue ili revenis al mi, kiu sopire ilin atendis. Je la tempo, kiam viro jam sin levis de la foirejo, por iri al la vespermanĝo, post kiam li 440 juĝdecidis multajn malkonsentojn inter kunuloj, kiuj deziris juraplikadon, nur tiam reaparis la traboj el la Charubdis. Nun mi rapide delasis miajn piedojn kaj manojn, por faligi min de supre en la maron kaj meze de la turnakvejo mi brue falis flanke de l' tre longaj traboj kaj sidiĝante sur ilin mi remadis 445 per la manoj. Sed la patro de homoj kaj Dioj ne plu lasis al mi vidi Skulla; ĉar tiam mi tamen ne estus evitinta la minacan pereon.

De tie mi floris naŭ tagojn, sed en la deka nokto la Dioj min proksimigis al la insulo Ogugia, kie loĝas Kalupso kun 450 belaj harligoj, la terura Diino kun homa voĉo, kiu min gastigis kaj prizorgis. Sed kial mi detale tion rakontus? Mi ja hieraŭ jam rakontis ĝin en via domo al vi kaj via forta edzino; kaj estas malagrabla al mi, denove rakonti tion, kio jam estas tre precise menciita."

---

### DEK TRIA KANTO.

#### FORVETURO DE ODUSSEUS EL LA LANDO DE L' PHAIKOJ KAJ ALVENO EN ITHAKA.

Tiel li parolis, kaj ĉiuj senbruaĵ restis kaj silentaj, kaj de ravo estis ili kaptitaj tra la tuta multombra ĉambrego. Sed lin siavice respondis Alkinoos kaj li parolis:

„Odusseus! Ĉar nun vi atingis mian kuprafundamentan, 5 alttegmentan loĝejon, tial mi opinias ke ve ne denove, repelite, longan tempon vojaĝos hejmen, kiom ajn vi estas jam suferinta, sed ĉi tion mi diras kaj ordonas al ĉiu el vi, kiuj en mia palaco ĉiam trinkas la perlantan porgrizulan honoran vinon 10 kaj aŭskultas je la kantisto: vestoj jam kuŝas por la gasto en

la bele polurita kesto, kaj artplene prilaborita oro, kaj ĉiuj aliaj donacoj, kiujn la konsilantoj de la Phaiakoj ĉi tien alportis. Sed nu do, unuope ni donu krome ĉiuj grandan tripiedon kaj pelvon, sed ni kompensas nin per kolekto tra la tuta popolo.

15 Ĉar estas malfacile por unuopulo senrepage bonfari."

Tiel parolis Alkinoos kaj liaj vortoj plaĉis al ili. Post tio ili ĉiuj iris, dormdezirante, al sia propra loĝejo; sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam ili rapidis al la ŝipo kaj 20 kunportis la fortikan kupron. La forta kaj kuraĝa Alkinoos, irante tra la ŝipo, ĉi ĉion bone metis sub la rembenkojn, por ke ĝi malhelpu nenium el la kunuloj remantaj, kiam ili estos rapidantaj per la remiloj; post tio ili iris al la palaco de Alkinoos kaj preparis la manĝon. Por ili buĉoferis la forta kaj kuraĝa 25 Alkinoos bovon honore al la nigretnuba Kron-ido Zeus, kiu super ĉiuj regas. Kaj kiam ili estis bruligintaj la femuraĵojn, tiam ili ĝuante prenis al si la bonegan manĝon. Kaj meze de ili kantis la dieca kantisto Demodokos, estimata de la popolo. Sed Oduseus multfoje turnis la kapon al la brilanta suno, 30 arde dezirante ke ĝi subeniru; ĉar nun li arde sopiris al hejmenreveno. Kiel kiam ege deziras al la vespermanĝo viro, kies ambaŭ ruĝbrunaj bovoj la tutan tagon trenadis la fortike kunmetitan plugilon tra la malalte kuŝanta kampo; je lia ĝojo fine subeniras la lumo de l' suno, tiel ke li povas iri al la vespermanĝo, ĉar liaj genuoj ŝanceliĝas dum la paŝado; 35 tiel ankaŭ por Oduseus je lia ĝojo subeniris la lumo de l' suno. Tuj li nun parolis meze de l' remŝipamaj Phaiakoj, sed precipe komunikante al Alkinoos li diris la vortojn:

„Reganto Alkinoos, plej eminenta inter ĉiuj popoloj! Vi verŝoferu nun kaj lasu min sendanĝere forvojaĝi, kaj vi ĉiuj 40 bonfortu! Nun ja estas plenumita tio, kion deziris mia koro: akompano kaj amikaj donacoj; la ĉielloĝantaj Dioj ĉi ĉion faru prospera al mi; kaj reveninte mi retrovu hejme mian neriproĉindan edzinon kaj miajn bonfartajn karulojn; kaj vi, 45 ĉi tie restantaj, estu la ĝojo de viaj junecaj edzinoj kaj de viaj infanoj; kaj la Dioj havigu al vi prosperon ĉian, kaj neniu malfeliĉo disvastiĝu inter la popolo."

Tiel li parolis kaj ĉiuj aprobis kaj insistis ke oni lasu foriri la gaston, ĉar laŭ konveno li estis parolinta. Tiam la forta Alkinoos parolis al sia heroldo:

50 „Pontinoos! plenigu la vinmiksujon kaj disdonu la vinon al ĉiuj en la ĉambrego, por ke ni preĝu al patro Zeus kaj tiam lasu foriri la gaston al lia prapatra lando."

Tiel li parolis, kaj Pontinoos miksis la mioldolĉan vinon,  
 kaj alpaŝante al ili, li disdonis al ĉiuj da ĝi; nun ili verŝoferis,  
 55 ĉiu de sur la loko kie li sidis sur sia seĝo, al la feliĉegaj Dioj  
 kiuj loĝas en la vasta ĉielo.

Sed ekstaris la dieca Odusseus, kaj al Arete li donis en la  
 manon dutenilhavan pokalon, kaj ŝin alparolante li diris la  
 flugilhavajn vortojn:

„Bonfartu, reĝino, senĉese, ĝis kiam maljuneco kaj morto  
 60 venos al vi, kiuj ŝvebas ĉirkaŭ ĉiuj homoj. Mi nun iros hejmen;  
 sed vi feliĉa ĉiam en ĉi tiu loĝejo pro viaj infanoj kaj via  
 popolo kaj la reĝo Alkinoos.”

Tiel parolinte la dieca Odusseus paŝis trans la sojlon. Sed  
 kunsendis kun li heroldon la forta Alkinoos, por gvidi lin  
 65 al la rapida ŝipo kaj la bordo de l' maro. Kaj Arete kunsendis  
 kun li virinojn servajn, unu, kiu portis la purlavitan mantelon  
 kaj la subveston, kaj la alian ŝi irigis kun li por porti la fortikan  
 keston, kaj ankoraŭ alia alportis manĝaĵon kaj ruĝan vinon.  
 70 Sed kiam ili estis subenirintaj al la ŝipo kaj la maro, tiam la  
 noblaj akompanantoj ĝin akceptis kaj rapide demetis en la  
 kavan ŝipon kaj ankaŭ ĉiujn manĝon kaj trinkon. Post tio  
 ili sternis por Odusseus kovraĵon kaj tolaĵon sur la posta ferdeko  
 de l' kava ŝipo, por ke li profunde dormu. Ankaŭ li mem nun  
 75 surŝipiĝis kaj silente kuŝiĝis; tiam ili ordece sidiĝis ĉiu ĉe sia  
 propra remapogilo kaj malligis la ŝnuregon el la kavigita  
 ŝtono. Nun ili, posten kliniĝinte, suprenjetis per la remiloj  
 la marakvon; tuj nun falis sur liajn palpebrojn dolĉa, profunda  
 80 kaj plej agrabla dormo, treege simila al la morto. Kaj la ŝipo  
 — kiel sur la ebenaĵo jungokvaro de virĉevaloj; ĉiuj kune  
 ekrapidante sub la batoj de l' vipo kaj alten saltante de la  
 tero, rapide finkuras la vojon — tiel la antaŭsteveno de l' ŝipo  
 85 sin levis alten, kaj malantaŭe ege ŝaŭmbruis la malhelbriletaj  
 ondoj de l' laŭte muĝanta maro. Sendanĝere kaj senĉese la  
 ŝipo pluen rapidis. Kaj eĉ ne la cirkle fluganta falko, la plej  
 rapida inter la birdoj, ĝin povus sekvi. Tiel rapide veturante,  
 la ŝipo tratranĉis la ondojn de l' maro, portante la viron ega-  
 90 lantan la Diojn rilate intelekton, kiu antaŭe estis suferinta  
 tre multajn dolorojn en sia animo, eltenante batalojn kontraŭ  
 malamikaj viroj kaj traveturante la danĝerplenajn ondojn,  
 sed kiu nun trankvile dormis, forgesante, kiom li estis suferinta.

Sed kiam leviĝis la tre brila stelo, kiu antaŭe venas por  
 95 anonci la lumon de l' frumatena Eos, tiam la marvetura  
 ŝipo proksimiĝis al la insulo.

Sin trovas en la lando Ithaka haveno dediĉita al Phorkus, la marloĝanta grizulo; ĉe ĝia eniro kuŝas du elstarantaj, krutaj altaĵoj, deklivetaj al la haveno, kiuj je la ekstera flanko ŝirmdetenas la grandegajn ondojn kaŭzitajn de blovegantaj ventoj; je la interna flanko kuŝas sen ligiloj la bonferdekaj ŝipoj, kiam ili estas atingintaj la rodon. Sur la havena digo staras longafoliara olivujo, kaj proksime al ĝi troviĝas agrabla, nebuleca kaverno, la sanktejo de l' nimfoj, kiuj nomiĝas Neiadoj.

105 Ene staras vinmiksuloj kaj ŝtonaj kruĉoj dutenilhavaj, en kiuj abeloj nestkonstruas. Ankaŭ en ĝi estas ege longaj ŝtonaj teksiloj, per kiuj la nimfoj teksas marpurpurajn tolaĵojn, mirinda aspekto. Ankaŭ tie estas ĉiam fluantaj fontoj. Du eniroj estas al la kaverno, unu je la norda flanko, enirebla por la homoj, kaj la alia je la suda flanko, kiu nur pordia estas; kaj tie ne eniras homoj, sed estas ĝi la vojo por la senmortuloj.

En tiun havenon ili enremis, ĉar ili ĝin jam de antaŭe konis. Post tio la ŝipo rapidante iris ĝis la duono de sia tuta longeco

115 sur la landon: ĉar tiel fortaj estis la manoj de l' remantoj kiuj ĝin antaŭen puŝis. Tiam ili iris el la fortike kunmetita ŝipo sur la teron, sed ili unue levis Oduseus kune kun la tolaĵo kaj la brila kovraĵo el la kava ŝipo, kaj ili lin metis, dum li ankoraŭ estis kaptita de l' dormo, sur la bordan sablon; post tio ili elŝipigis la bonaĵojn, kiujn la noblaj Phaiakoj estis al li donacintaj, kiam li iris hejmen, laŭ arango de l' grandkuraĝa Athene. Kaj ili kune metis ĉi ĉion ĉe la trunko de l' olivujo, flanke de la vojo, por ke neniu el la preterpasantaj homoj eble venu kaj forrabu ilin antaŭ ol Oduseus vekigo; post tio ili mem reiris hejmen.

125 Dume la tertremigulo ne forgesis la minacojn, per kiuj li iam estis minacinta la disimilan Oduseus, kaj tuj li demandis la konsilon de Zeus:

„Patro Zeus! mi ne plu estos honorata meze de l' senmortaj Dioj, kiam la mortidevuloj min tute ne estimas, la Phaiakoj, 130 kiuj tamen havas sian devenon el mi. Mi ja opiniis, ke Oduseus, post kiam li estas suferinta multajn malfeliĉojn, nun revenos hejmen: — ĉar neniam mi volis tute forpreni de li la hejmalvenon, de post kiam vi ĝin estas promesinta kaj konsentinta per favora kapsigno — sed nun ili estas kondukintaj lin trans la maron dum li dormis trankvile sur la rapida ŝipo kaj ili 135 lin metis en Ithaka kaj donis al li abundajn donacojn, kupron kaj oron grandamase kaj teksitajn vestojn, eĉ tiom, kiom neniam estus akirinta Oduseus el Troia, eĉ ne, se li estus

sendifekte reveninta kun sia lotakirita parto de l' militkaptajo."'

Lin respondante alparolis la nubokolektulo Zeus:

- 140 „Fi! vastpotenca tertremigulo, kiel vi parolis! Neniel la Dioj malestimas vin; estus ja malfacile konduti malestime kun plej maljuna kaj plej eminenta Dio. Sed se iu el la homoj, nebridante sian forton kaj potencon, neniel vin timas, tiam
- 145 tamen poste la revenĝo estas al vi. Agu kiel vi volas kaj kiel estas plaĉe al via animo."'

Lin respondis post tio la tertremigulo Poseidon:

- „Tuj mi farus, ho nigretnuba, kiel vi instigas: sed ĉiam mi timas kaj evitas vian koleron. Sed nun mi volas frakasi
- 150 sur la nebuleca maro la belegan ŝipon de l' Phaiakoj, revenantan de sia akompano, por ke ili de nun detenu sin kaj ĉesu akompani homojn, kaj mi volas ĉirkaŭigi altan montaron ĉirkaŭ ilian urbon."'

Lin respondante alparolis la nubokolektulo Zeus:

- „Estimulo! tiel ŝajnas al mia animo esti plej bone: kiam jam
- 155 ĉiuj homoj el la urbo vidas la ŝipon alrapidanta, tiam ŝanĝu la ŝipon, proksime al la bordo, en ŝtonaĵon, similan al rapida ŝipo, por ke ĉiuj homoj pri ĝi miru, kaj ĉirkaŭigu altan montaron ĉirkaŭ ilian urbon."'

Sed kiam estis ĉi tion aŭdinta la tertremigulo Poseidon,

160 tiam li rapidis al Scheria, kie loĝas la Phaiakoj. Tie li atendis. Nun venis tre proksimen la marvetura ŝipo, rapide antaŭen irante; sed nun ĝin proksimiĝis la tertremigulo kaj ĝin frapante per la plata mano li ĝin faris ŝtonaĵo kaj ĝin ĝisfundigis sube; post tio li tuj foriris.

- 165 Tiam la longremilaj Phaiakoj, la ŝipfamaj viroj, parolis unu al la alia flugilhavajn vortojn. Kaj tiel kelkiu parolis alrigardante la plej proksime starantan:

„Ve! kiu haltigis la rapidan ŝipon sur la maro, dum ĝi hejmen rapidis? Kaj tamen ĝi jam tute videbliĝis."'

- 170 Tiel parolis kelkiu; sed tion ili ne sciis, kiel tio estis okazinta. Sed nun ekparolis meze de ili Alkinoos, kaj li diris:

„Ve! tutcerte min nun trafas jam de longe antaŭdirita profetaĵo de mia patro, kiu diris, ke Poseidon nin envias, ĉar ni donas sendanĝeran akompanon al ĉiuj. Li diris, ke iam tiu

- 175 Diaĵo fortike konstruitan ŝipon de la Phaiakaj viroj, revenantan de akompano, frakasos sur la nebuleca maro, kaj ke li ĉirkaŭigos ĉirkaŭ nian urbon altan montaron. Tiel parolis la grizulo; kaj ĉi ĉio nun do estas plenumita. Nu do, ni ĉiuj obeu, kiel
- 180 mi al vi parolis: vi ĉesu akompani la mortidevulojn, kiam iu

petegante venas al nia urbo; kaj ni buĉoferu al Poseidon dek du elektitajn bovojn por provi, ĉu li kompatos kaj ne ĉirkaŭigos altegan montaron ĉirkaŭ nian urbon.”

Tiel li parolis, kaj ili ektimis kaj pretigis la bovojn.

185 Tiel la ĉefuloj kaj regantoj de la popolo de l' Phaiakoj, starante ĉirkaŭ la altaro, preĝis al la reĝo Poseidon.

Dume la dieca Odusseus, dormante en la lando de siaj prapatroj, vekigis, sed li ne rekonis ĝin, ĉar jam longan tempon li estis forestinta; ankoraŭ disetendis ĉirkaŭe iu Diaĵo nebulon  
190 [ , Pallas Athene, la filino de Zeus, por fari lin mem nere-konebla kaj diri ĉion necesan al li, por ke ne rekonu lin lia edzino kaj la urbanoj kaj amikoj, antaŭ ol la amantoj estos punsuferintaj ĉiun trokuragecon. Tial ĉio ŝajnis aliaspekta  
195 al la reĝo, la longetendaj piedvojetoj kaj la multankreja haveno, kaj la krutaj rokoj kaj la florantaj arboj]. Eksaltinte li tie staris kaj rigardis la landon de siaj prapatroj; tiam li ekĝemis kaj pro malespero li batis per la plataj manoj sur anbaŭ femurojn, kaj vekriante li diris la vortojn:

200 „[Ve al mi! En la lando de kiuj mortidevuloj mi ĉi tiun fojon alvenis? Ĉu ili estas trokuraĝaj kaj sovaĝaj kaj nejustaj, aŭ ĉu ili estas gastamaj kaj havas direspektan animon? Kien do mi portos ĉi tiujn multajn bonaĵojn? Kaj kien mi mem nun ree devas vagi? Ho! ke mi estus restinta tie ĉe la Phaiakoj,  
205 tiam mi estus petegante irinta al iu alia el la multpotencaj reĝoj, kiu min eble estus gastiginta kaj lasinta hejmen iri. Sed nun ne scias mi, kie mi kaŝu ilin, sed tamen mi ilin ne postlasos ĉi tie, por ke ili ne fariĝu eble la rabakiraĵo de aliaj.]

210 Ve, do estis neniel prudentaj nek justaj la ĉefuloj kaj regantoj de la Phaiakoj, kiuj min kondukis al alia lando. Kaj tamen ili pretendis al mi, ke ili min kondukos al la malproksime videbla Ithaka, sed tion ili ne plenumis. Zeus ilin punu, la protektanto de la petegantoj, kiu ankaŭ atentadas la aliajn homojn kaj  
215 punsuferigas ĉiun, kiu pekas. Sed nu, mi nun denombri tiujn bonaĵojn kaj mi kontrolu, ĉu ili ne kunportis ion sur la kava ŝipo, kiam ili foriris.”

Tiel parolinte li denombri la belegajn tripiedojn kaj pelvojn, kaj la oron kaj la belajn vestojn teksitajn. Sed nenio el ĉi ĉio mankis; nun ree li priploris la prapatran landon, dum li multe  
220 plendante rondvagis laŭlonge de l' bordo de l' laŭte muĝanta maro.

Nun alproksimiĝis al li Athene, similante rilate la staturon al juna viro, al paŝtisto de ŝafoj, diketmola, kiaj la infanoj

de reĝoj estas, kaj alhavante ĉirkaŭ la ŝultroj duoblan, bele  
 225 prilaboritan mantelon; sub la briletaj piedoj ŝi havis sandalojn,  
 kaj en la manoj ŝi portis ĵetlancon. Ŝin vidante ekĝojis Oduseus  
 kaj li iris renkonte al ŝi kaj ŝin alparolante li diris la flugil-  
 havajn vortojn:

„Amiko! ĉar vi estas la unua, kiun mi renkontas en ĉi tiu  
 lando, mi salutas vin kaj vi ne min renkontu kun malbona  
 230 inklino, sed protektu ĉi ĉion kaj ankaŭ protektu min. Mi ja  
 preĝas al vi kiel al Diaĵo kaj petegante mi venas al viaj genuoj.  
 Ankaŭ ĉi tion al mi laŭvere rakontu, por ke mi bone sciu:  
 kiu lando kaj kiu popolo estas ĉi tie? Kiuj homoj en ĝi vivas?  
 Ĉu ĝi estas eble malproksime videbla insulo, aŭ ĉu ĝi estas iu  
 235 marborda regiono de l' grandbula kontinento?”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Stultulo vi estas, fremdulo, aŭ vi venis de malproksime,  
 ĉar vi demandas pri ĉi tiu lando; ĉar ĝi tute ne estas tiel neko-  
 nata; tre multaj ĝin ja konas, tiel same ili kiuj loĝas direkte  
 240 al la aŭroro kaj la suno, kiel ili kiuj loĝas malantaŭe, direkte  
 al la nebuleca mallumo. Estas vere ke ĝi estas rokeca kaj net-  
 aŭga por ĉevaloj, sed tamen ĝi ne estas tre malfekunda, sed  
 ankaŭ sin ne vaste etendas. Ĉar kreskas sur ĝi multega greno  
 kaj ankaŭ sin trovas sur ĝi vinbergardenoj kaj ĉiam ĉi tie  
 245 estas sufiĉe da pluvo kaj da refreŝiga roso. Ankaŭ ĝi estas  
 bona paŝtejo por kaprinoj kaj bovoj, kaj ĉiaj arbaroj troviĝas  
 ĉi tie, kaj trinkigaj lokoj, ĉiam akvoplenaj. Tial, ho fremdulo,  
 la nomo de Ithaka eĉ atingis Troia, pri kiu oni tamen diras,  
 ke ĝi estas malproksima de l' Achaia lando.”

250 Tiel ŝi parolis, kaj ekĝojis la persistema dieca Oduseus,  
 ĝojante pro la lando de siaj prapatroj, laŭ tio, kion estis al li  
 rakontinta pri ĝi Pallas Athene, la filino de l'egidporta Zeus.  
 Kaj ŝin alparolante li diris al ŝi la flugilhavajn vortojn — sed  
 255 li ne diris la veron kaj retenis la vortojn, ĉiam pripensante en  
 sia interno ruzegajn planojn —:

„Pri Ithaka mi ekaŭdis eĉ en la vasta Kreta, malproksime  
 trans la maro, sed nun mi ankaŭ mem ĉi tien venis kun ĉi  
 tiuj bonaĵoj. Kaj postlasinte ankoraŭ same multon al miaj  
 infanoj mi forŝavis min, ĉar mi estas mortiginta la karan filon  
 260 de Idomeneus, la rapidpiedan Orsilochos, kiu en la vasta  
 Kreta venkis ĉiujn panmangajn virojn rilate piedan rapidecon,  
 ĉar li volis min prirabi de mia tuta militakiraĵo el Troja, pro  
 kiu mi estis suferinta multajn dolorojn en mia animo, eltenante  
 batalojn kontraŭ malamikaj viroj kaj traveturante la danĝer-



265 plenaĵojn, tial ke mi ne ŝatis esti serva al lia patro en la  
 lando de l' Troianoj sed mem kondukis aliajn kunulojn. Lin  
 mi trafis per la kupra lanco, kiam li hejmeniris el la kampo, dum  
 mi kun kunulo embuskis proksime al la vojo; tute malluma  
 270 nokto kovris la ĉielon, kaj neniu el la homoj nin rimarkis, kaj  
 nevidate mi deprenis de li la vivon. Sed kiam mi estis morti-  
 ginta lin per la akra kupro, tiam mi tuj rapidis al ŝipo de  
 noblaj Phoinikoj kaj ilin petegis pri helpo kaj donis al ili  
 sufiĉe grandan parton de mia militakiraĵo; mi petis al ili, ke  
 275 ili min prenu sur la ŝipon kaj konduku al Pulos, aŭ al la dieca  
 Elis, kie la Epeioj regas. Sed la forto de l' vento ilin de tie  
 forpuŝis, tute kontraŭ ilia volo, ĉar ili ne volis trompi min.  
 De tie forvagadante ni alvenis ĉi tie hodiaŭ nokte. Pene ni  
 280 remis en la havenon, kaj neniu ekpenson ni havis pri la vesper-  
 manĝo, kvankam ni ege avidis ĝin preni, sed nemanginte  
 ni iris el la ŝipo kaj ĉiuj kuŝiĝis. Tiam proksimiĝis al mi, kiu  
 estis laciĝinta, la dolĉa dormo; dume ili prenis el la kava  
 ŝipo miajn bonaĵojn kaj ilin metis tie kie mi mem dormante  
 285 kuŝis sur la marborda sablo. Post tio ili enŝipiĝis kaj foriris  
 al la bele kuŝanta Sidonia; sed mi postrestis kun malĝojanta  
 koro."

Tiel li parolis, kaj la fajrŝprucokula Diino Athene ridetis  
 kaj per la mano lin karesis — kaj subite ŝi similis al virino,  
 bela kaj altkreska kaj sperta je brila laboro — kaj lin alparo-  
 290 lante ŝi diris al li la flugilhavajn vortojn:

„Vere ruza kaj lerta devus esti tiu, kiu vin superus je ĉiaj  
 ruzaĵoj, eĉ se Diaĵo vin renkontus. Grandkuraĝulo, multruzulo,  
 nesatigebla je ruzoj! Ĉu do vi eĉ nun, estante en via propra  
 patrujo, ne estas ĉesigonta vian trompemon kaj viajn ruzaĵajn  
 295 vortojn, kiuj en la fundo de via koro estas karaj al vi? Sed nu,  
 ni ne plu parolu pri tio, ni ambaŭ inklinaĵoj al ruzeco, ĉar vi  
 inter ĉiuj mortidevuloj estas multsupere plej bonega je prudent-  
 gvido kaj paroloj, kaj mi inter ĉiuj Dioj estas konata pro mia  
 300 prudento kaj miaj ruzaĵoj; eĉ vi ne rekonis Pallas Athene, la  
 filinon de Zeus, min, kiu ĉiam en ĉiaj malfacilaĵoj vin helpas  
 kaj gardas, kaj kiu vin faris amata de ĉiuj Phaiakoj. Sed nun  
 mi venis ĉi tien por projekti kune kun vi planon kaj por kaŝi  
 305 la bonaĵojn, kiujn la noblaj Phaiakoj laŭ mia konsilo kaj volo  
 donacis al vi, kiam vi hejmen iris, kaj ankaŭ por diri, kiom da  
 ĉagrenoj laŭ la destino de via sorto vi devos toleri en via  
 fortike ĉarpentita loĝejo; sed vi eltenu tion, kvankam kon-  
 traŭ via volo, kaj eldiru al neniu el la viroj kaj la virinoj,

kaj al neniu el ĉiuj, ke vi vagadinte revenis, sed silente suferu  
 310 la multajn dolorojn, eltenante la perforon de la viroj.”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Malfacile estas, Diino, por vin renkontanta mortidevulo,  
 vin rekoni, kiom ajn li estus sagaca: ĉar vi similigas vin mem  
 al ĉiaj homoj. Sed tion mi bone scias, ke vi antaŭe estis al mi  
 315 bonvola, dum ni, la filoj de l'Aĉaioj, militis en Troia.  
 Sed post kiam ni estis ruinigintaj la alte kuŝantan urbon de  
 Priamos kaj estis irintaj en la ŝipojn, kaj iu Diaĵo estis disiginta  
 la Aĉaiojn, de post tiam mi ne plu vidis vin, filino de Zeus,  
 nek vin rimarkis [venante sur mian ŝipon por iun ĉagrenon  
 320 deteni de mi; sed ĉiam mi vagadis kun vundita koro en mia  
 interno, ĝis kiam la Dioj liberigis min de mia mizero. Sed  
 iam vi tamen en la fruktodona lando de l' Phaiakaj viroj  
 estas kuraĝiginta min per viaj paroloj kaj vi mem min estas  
 kondukinta al la urbo]. Sed nun mi vin petegas per via patro  
 325 — ĉar ne kredas mi, ke mi estas alveninta en la malproksime  
 videbla Ithaka, sed certe mi vagas en iu alia lando, kaj mi  
 opinias, ke vi tion diris por min moki kaj pro trompi mian  
 spiriton — diru al mi, ĉu vere mi estas atinginta mian karan  
 patrujon.”

Lin post tio respondis la fajrŝprucokula Diino Athene:

330 „Ĉiam vi havas tiajn pensojn en via animo! Tial mi ja  
 vin ne povas forlasi dum vi estas malfeliĉa, ĉar lertparola  
 vi estas, kaj sagaca kaj prudenta. Alia viro ja ĝojplene dezirus  
 revidi en sia domo siajn infanojn kaj sian edzinon, kiam li  
 335 estus reveninta post longa vagado; sed vi neniel ŝatas pri tio  
 ekaŭdi aŭ demandi, antaŭ ol vi estos provinta vian edzinon,  
 kiu ĉiam sidadas en via loĝejo, kaj senĉese la noktoj kaj la  
 tagoj ĉagrene preterpasas al ŝi, dum ŝi ploradas. Sed pri tio  
 mi neniam malesperis, sed mi sciis en mia animo ke vi revenos  
 340 perdinte ĉiujn viajn kunulojn; sed mi ne volis kontraŭbatali  
 Poseidon, la fraton de mia patro, kiu en sia animo tenis koleron  
 kontraŭ vi, ĉar vi tutblindigis lian karan filon. Sed nu do,  
 mi montros al vi la landon Ithaka, por ke vi fidu al mi. Jen  
 345 estas la haveno dediĉita al Phorkus, la marloĝanta grizulo;  
 kaj tie staras sur la havena digo la longfoliara olivujo; [ kaj  
 proksime al ĝi troviĝas agrabla, nebuleca kaverno, la sanktejo  
 de l' nimfoj, kiuj nomiĝas Neiadoj;] kaj tie estas la volbiĝanta  
 350 kaverno, kie vi kutimis oferi al la nimfoj sukcesigajn hekat-  
 ombojn; kaj tie estas la monto Neriton, vestita per arbaro.”

Tiel parolinte la Diino disigis la nebulon kaj sin montris

la pejzaĝo. Tiam ekĝojis la persistema dieca Oduseus, ĝojante pro sia patrujo, kaj li kisis la grendonan teron. Tuj nun eten-  
355 dante la manojn li preĝis al la nimfoj:

„Nimfoj Neadoj, filinoj de Zeus! mi opiniis, ke neniam mi revidos vin; sed nun mi vin salutas per afablaj preĝoj; sed ankaŭ donacojn mi donos, kiel antaŭe, se bonfavore la milit-  
360 akiraĵon donanta filino de Zeus min mem lasos vivi kaj prosperigos mian karan filon.”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Kuraĝiĝu! tio ne kaŭzu zorgojn al via spirito. Sed nu, ni tuj nun metu viajn bonaĵojn en la internon de l' sankta  
365 kaverno, por ke tie ili restu sekure; kaj tiam ni kune pripensu, kiel ĉio okazos plej bone.”

Tiel parolinte, la Diino eniris la nebulecan kavernon, palpserĉante tra la kaverno kaŝeĵojn; sed Oduseus ĉion pli proksimen alportis, la oron kaj la nedetruetblan kupron, kaj la bele fabrikitajn vestojn, kiujn la Phaiakoj estis donintaj al li. Bone  
370 li ĉi ĉion deponis kaj Pallas Athene, la filino de l'egidporta Zeus, metis antaŭ la eniron ŝtonon. Post tio ambaŭ sidiĝis ĉe la trunko de l' sankta olivujo kaj kune konsilis pri la pereado de l' trokuraĝaj amantoj. Tiam inter ambaŭ ekparolis la fajrŝprucokula Athene:

375 „Divevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! nun pripensu kiel vi metos manon sur la senhontajn amantojn, kiuj nun jam tri jarojn mastras en via domo kaj prezentante edziĝajn donacojn sin svatas al via edzino disimila; sed ŝi, en sia koro  
380 ĉiam malĝoje atendante vian revenon, ilin esperigas ĉiujn kaj faras promesojn al ĉiu viro, sendante al ili kurierojn, sed ŝia koro deziras ion alian.”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Ve! Tutcerte mi estus pereonta en mia propra domo laŭ la sama malbona sorto, kiu ankaŭ trafis la Atre-idon Agamemnon  
385 se vi, Diino, ne estus ĉion dirinta laŭ konveno, Nu do, tekstu planon, kiel mi punos ilin; sed ankaŭ mem min helpu kaj enirigu en min multkuraĝan sentimecon, same kiel kiam ni disbategis la briletajn muregorandojn de Troia. Se vi tiel arde helpus min, ho fajrŝprucokula, tiam mi povus eĉ batali  
390 kontraŭ tri cent viroj [per via helpo, honorinda Diino, kiam vi bonvole min subtenus].”

Lin post tio respondis la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Tutcerte mi vin helpos, kaj vi ne estos nevidata de mi, kiam ni komencos tiun laboron; kaj mi opinias ke multaj

395 el la amantaj viroj, kiuj fordibočas vian havaĵon, per sia sango  
 kaj siaj cerboj ege ŝprucmakulos la plankon. Sed nu, mi faros  
 vin nekonebla por ĉiuj mortidevuloj: mi malŝveligos la belan  
 karnon je viaj bonflekseblaj membroj kaj la blondajn harojn  
 400 mi deprenos de via kapo, kaj mi ĉirkaŭvestos vin per ĉifonoj,  
 tiel ke sentos naŭzon la homo, kiu vidas la alhavanton de ili,  
 kaj mi senbriligos viajn antaŭe belegajn okulojn, por ke vi  
 aspektu malbelforma al ĉiuj amantoj kaj al via edzino kaj via  
 filo, kiun vi postlasis en via palaco. Vi mem unue iru al la  
 405 porkpaŝtisto, kiu estas la gardisto de viaj porkoj kaj kiu ankoraŭ  
 same afablan inklinon al vi havas kaj ŝatas vian filon kaj la  
 saĝan Penelope. Vi lin trovos sidanta apud la porkoj; ĉi tiuj  
 sin paŝtas apud la roko de Koraks kaj apud la fonto Arethouse,  
 410 manĝante abundajn glanojn kaj trinkante akvon malhelan,  
 kio prosperigas al la porkoj la ŝvelantan lardon. Tie atendu  
 kaj sidante flanke de li demandu pri ĉio, por ke dume mi  
 iru al la belvirina Sparta por venigi Telemachos, vian karan  
 filon, ho Oduseus, kiu foriris al la vastdanceja Lakedaimon,  
 415 al Menelaos, por ekscii iun famon pri vi, ĉu vi ankoraŭ ie  
 vivas."

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Kial do vi mem lin ne informis, ĉar vi ja scias en via spirito  
 ĉion? Ĉu eble por ke ankaŭ li, vagante sur la senripoze ondanta  
 maro, suferu dolorojn dum aliaj fordibočas lian havaĵon?"

420 Lin respondis post tio la fajrŝprucokula Diino Athene:

„Ĉi tiu ne tro multe zorgplenigu vian koron. Mi mem lin  
 ĉiam akompanis por ke, tien irante, li akiru belegan gloron;  
 sed neniun malfacilaĵon li havas, sed kviete li sidas en la palaco  
 de l'Atre-ido kaj abunda manĝo staras antaŭ li. Estas vere  
 425 ke embuskas lin junuloj sur nigra ŝipo, dezirante lin mortigi  
 antaŭ ol li atingos la landon de siaj prapatroj; sed mi opinias,  
 ke tio ne okazos; pli baldaŭ la tero kovros multajn el la amantoj,  
 kiuj fordibočas vian havaĵon."

Tiel parolinte lin ektuŝis Athene per sia bastono. Tuj ŝi  
 430 malŝveligis la belan karnon je liaj bonflekseblaj membroj  
 kaj la blondajn harojn ŝi deprenis de lia kapo, kaj ĉirkaŭ  
 ĉiujn membrojn ŝi igis ekesti la haŭton de maljunega grizulo  
 kaj ŝi senbriligis liajn antaŭe belegajn okulojn. Post tio ŝi  
 ĉirkaŭĵetis al li alian veston, malluksan ĉifonon kaj subveston,  
 435 disŝiritajn kaj malpurajn kaj makulitajn de densa fumo mal-  
 agrabla. Ankaŭ ŝi lin vestis per granda, senhara felo de rapida  
 cervo; kaj ŝi donis al li almozulan bastonon kaj malpuregan

dorsosakon, multloke ŝiritan; kaj ŝnuro servis kiel portrimeno.

Tiel interkonsilinte, ili disiris. Kaj post tio ŝi iris al la dieca  
440 Lakedaimon por venigi la filon de Odusseus.

## DEK KVARA KANTO.

### LA KUNESTO DE ODUSSEUS KUN EUMAIOS.

Sed li nun supreniris laŭlonge de l' rokeca montvojeteto en multarbara regiono, inter la montosuproj, al la loko, kie Athene estis al li indikinta la diecan porkpaŝtiston, kiu el la servistoj, kiujn posedis la dieca Odusseus, plej bone prizorgis  
5 lian havaĵon. Ĉi tiun li trovis sidanta en la antaŭdomo, kie estis konstruita de li, sur ĉirkaŭe videbla loko, la alta barilo, bela kaj granda kaj ĉirkaŭe sin etendanta. Dum la foresto de sia mastro kaj sen la helpo de sia estrino kaj de l' maljunulo Laertes ĝin estis konstruita por la porkoj la porkpaŝtisto  
10 mem el altrenitaj ŝtonoj kaj supre li estis ĉirkaŭplektinta ĝin per dornarbetoj. Je la ekstera flanko li estis ĉirkaŭe stariginta neinterrompitan vicon da palisoj, densaj kaj multnombraj, kiujn li estis dehakinta el senŝeligitaj kverkoj. Interne de l' barilo li estis konstruita dek du porkejojn, unu proksime al la alia, kiel stalojn por la porkoj; kaj en ĉiu el ili ĉiam estis  
15 enfermataj kvindek terkuŝemaj porkinoj, kiuj estis naskintaj; sed la virporkoj ekstere pasis la nokton; ili estis multe pli malmultaj, ĉar la disimilaj amantoj senĉese malpligrandigis ilian nombron festenante, dum ĉiam devis sendi al ili la porkpaŝtisto la plej bonan el ĉiuj bonnutritaj grasaj porkoj. [Da  
20 ili nur ankoraŭ estis tricent sesdek]. Ĉe ili ĉiam dumnokte gardis kvar hundoj, similaj al lupoj, kiujn la porkpaŝtisto, la ĉefo de l' servistoj, estis elnutrinta. Mem li ĝuste estis bonforme tranĉanta ĉirkaŭ siaj piedoj sandalojn el belkolora bova haŭto. El la aliaj paŝtistoj jam estis foririntaj tri en  
25 diversajn direktojn kun la kumpulitaj porkoj; la kvaran li estis forsendinta al la urbo, por konduki devigite porkon al la trokuraĝaj amantoj, por ke ili ĝin buĉu kaj satigu sian koron per la viando. Subite nun ekvidis la laŭtbojemaj hundoj  
30 Odusseus. Laŭte bojante ili alkuris. Sed ruze Odusseus ekkaŭris kaj la bastonon faligis el sia mano. Tiam li estus suferinta hontan doloron apud sia propra porkejo, sed la porkpaŝtisto

per rapidaj piedoj ilin postkuris kaj rapidis al la antaŭpordego  
 35 kaj la ledο falis el lia mano. Laŭte ilin alvokante, li forpelis  
 disen la hundojn per aro da ŝtonoj kaj li alparolis la reĝon:  
 „Grizulo! ne multe mankis, ke la hundoj vin subite estus  
 disŝirintaj kaj tiam vi estus superŝutinta min per malhonoro.  
 Kaj tamen jam donis al mi la Dioj aliajn dolorojn kaj priĝ-  
 40 emindaĵojn: ĉar ĉi tie mi ĉiam sidas, plorante kaj malĝojante  
 pro mia disimila mastro kaj por aliaj mi elnutras la porkojn  
 grasaj por ke tiuj manĝu ilin. Kaj dume eble li vagadas, avid-  
 ante al manĝo, inter la popolo kaj en la urbo de alilingvaj  
 viroj, se li almenaŭ ankoraŭ ie vivas kaj vidas la lumon de  
 45 l' suno. Sed min sekvu, ni iru al mia dometo, por ke ankaŭ  
 vi, post kiam vi estos satiginta vian koron per manĝo kaj  
 vino, diru, de kie vi estas kaj kiom da malfeliĉoj vi jam suferis.”

Tiel parolinte la dieca porkpaŝtisto antaŭiris lin al la dometo  
 kaj li enkondukis kaj sidigis lin sur densfoliarajn arbetojn,  
 kiujn li estis disŝutinta sur la plankon kaj sur kiujn li estis  
 50 sterninta la grandan kaj denslanan felon de longhara montara  
 kapro, sur kiu li mem kutimis kuŝi. Ĝojis Odusseus, tial ke li  
 tiel lin gastigis kaj li diris la vortojn kaj parolis:

„Gastiganto! Zeus donu al vi, kaj ankaŭ la aliaj senmortaj  
 Dioj, kion vi plej arde deziras, ĉar bonvole vi gastigis min.”  
 55 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Gasto! Ne decas al mi fremdulon malestimi, eĉ ne, se  
 venus iu ankoraŭ pli mizera ol vi; ĉiuj fremduloj kaj mal-  
 riĉuloj ja estas senditaj de Zeus kaj nia donaĵo estas malgranda  
 60 sed tamen bonvena; tio ja estas kutimo de servistoj, kiuj ĉiam  
 timas, kiam junaj mastroj regas. Ĉar malhelpis la Dioj certe  
 la revenon de li, kiu atenteme min prizorgus kaj estus havig-  
 inta al mi havaĵon propran, domon kaj bienon kaj belforman  
 edzinon, kiajn bonkora mastro kutime donas al sia servisto,  
 kiu multe penlaboris por li kaj kies laboron prosperigis la  
 65 Diaĵo, kiel ankaŭ prosperas ĉi tiu laboro mia, kiun mi fidele  
 plenumas. Tial min estus multe profitiginta mia mastro, se  
 ĉi tie li estus maljuniĝinta. Sed li pereis! Ho, ke la familio  
 de Helena estus tute pereinta, ĉar de multaj homoj ŝi senfortigis  
 70 la membrojn; ankaŭ li ja iris por venĝi pro Agamemnon  
 al la multĉevalida Ilion, por batali kontraŭ la Troianoj.”

Tiel parolinte, li rapide kuntiris sian subveston per zono  
 kaj iris al la porkejo, kie aroj da porkidoj estis enfermitaj.  
 Tie li prenis du el ili kaj tiujn kunportis kaj li ilin ambaŭ  
 75 buĉis, forbrogis iliajn harojn kaj ilin distranĉis kaj trapikis

ĉirkaŭ la rostilon. Kaj kiam li estis ĉion rostinta, li ĝin portis kaj antaŭmetis al Oduseus, dum ĝi ankoraŭ estis varma kaj ankoraŭ sidis ĉirkaŭ la rostilo kaj blankan hordeofaronon li ŝutis sur ĝin. Post tio li miksis mielĉolĉan vinon en kuvo kaj tiam li sidiĝis kontraŭe de li kaj instigante li lin alparolis:

- 80 „Nun manĝu, fremdulo! kion ni, servistoj, havas: porkidan viandon; kontraŭe grasigitajn porkojn manĝas la amantoj, kiuj en sia koro ne pensas pri la revenĝo kaj ne inklinaj estas al kompatato. [ La feliĉegaj Dioj ja ne ŝatas farojn hontindajn, sed ili estimas la justecon kaj decajn farojn de l' homoj.]
- 85 Eĉ viroj malamikecaj kaj malbonintencaj, kiuj invadas en la landon de iu alia kaj al kiuj Zeus havigas rabaĵon kaj kiuj, plensarĝinte siajn ŝipojn, rapidas por reveni hejmen, eĉ en ties korojn penetras terura timo je dia revenĝo. Sed ĉi tiuj amantoj scias iel — kaj eble ili aŭdis ian orakolon — pri la
- 90 malĝojiga morto de mia mastro, ĉar ne laŭdece ili volas svatiĝi al ŝi, nek volas ili reiri al sia propra domo, sed kviete ili fordiĉoĉas perforte liajn posedaĵojn kaj ili tion faras sen indulgo. Kiom ajn da noktoj kaj da tagoj de Zeus devenas, neniam ili buĉas honore al li eĉ nur unu aŭ du oferbestojn; kaj ili for-
- 95 trinkas la vinon, ĉerpante ĝin trokuraĝe. Ĉar vere li posedis havaĵon nemezublancan; neniue el la herooj posedis tion, nek sur la nigra kontinento, nek sur Ithaka mem. Eĉ dudek viroj kune ne havas tian riĉaĵon. Sed mi denombros ĉion al vi.
- 100 Dek du bovaroj sur la kontinento, same multaj aroj da ŝafoj, same multaj aroj da porkoj kaj same multaj aroj da dise paŝtigantaj kaprinoj tie paŝtataj estas de fremduloj kaj de liaj propraj paŝtistoj. Ĉi tie sin paŝtas aroj da dise paŝtigantaj kaprinoj, entute dek unu, je la ekstremo de l'insulo, kaj taŭgaj viroj
- 105 ilin priĝardas. Ĉiu el ili kondukas ĉiutage al la amantoj bruton, kiu ŝajnas esti la plej bona el la bonnutritaj kaprinoj. Sed mi priĝardas kaj protektas ĉi tiujn porkojn kaj ĉiam mi sendas al ili la plej bonan el la porkoj, zorge ĝin elektante.”
- Tiel li parolis; sed Oduseus diligente kaj avide manĝis
- 110 la viandon kaj la vinon trinkis, silente, sed malbonon li elpensis kontraŭ la amantoj. Sed kiam li estis manĝinta kaj refreŝiginta sian koron per la nutraĵo, tiam Eumaios plenigis la lignan tason, el kiu li kutime trinkis, ĝisrande per vino kaj ĝin donis al li, kaj li akceptis ĝin kaj ĝojis en sia animo kaj lin alparolante li diris la flugilhavajn vortojn:
- 115 „Amiko! kiu do aĉetis vin per propraj havaĵoj? kiu estis



tiom riĉa kaj potenca, kiom vi diris? Ankaŭ vi diras, ke li pereis por venĝi pro Agamemnon. Lin nomu al mi, ĉar eble mi konas tian viron, kian vi alcelas. Zeus ja nepre scias kaj ankaŭ la  
 120 aliaj senmortaj Dioj, ĉu mi estas lin vidinta kaj povas ion sciigi al vi pri li; ĉar multe mi vagadis.”

Lin post tio respondis la porkpaŝtisto, la ĉefo de l' servistoj:

„Grizulo! neniuj viro, reveninta de vagirado kaj portanta sciigon pri li, konvinkus lian edzinon kaj lian karan filon,  
 125 sed vane vaguloj, bezonantaj flegadon, mensogas kaj ne volas rakonti la veron. Ĉar ĉiu, kiu vagante venas en la landon de Ithaka, iras al mia mastrino kaj klaĉas trompajn vortojn; kaj ŝi, lin bonfavore akceptante, lin gastigas kaj pri ĉio lin eldemandas kaj larmoj ruliĝas de sub la palpebroj de l' mal-  
 130 ĝojanta, kiel estas la kutimo de virinoj, kiam ilia edzo estas pereinta aliloke. Rapide ankaŭ vi, grizulo, elpensus fiktivaĵon, esperante, ke eble oni tiam donos vestaĵojn al vi, mantelon kaj subveston. Sed hundoj kaj rapidaj birdoj jam estos forŝirintaj lian haŭton de la ostaro kaj nepre la vivo jam forlasis  
 135 lin; aŭ eble lin formangiĝis la fiŝoj en la maro kaj lia ostaro nun kuŝas sur la kontinento, kovrite de multa sablo. Tiel li tie pereis kaj al liaj karuloj nur postrestis ĉagreno, al ĉiuj, sed precipe al mi; ĉar neniun alian same afablan mastron mi  
 140 ankoraŭ trovos, kiom ajn mi serĉe irados, eĉ ne se ree mi venus al la domo de miaj patro kaj patrino, kie mi iam naskiĝis kaj kie ili mem edukis min. Tamen mi ne plu tiom malĝojas pro ili, kvankam mi arde deziras revidi ilin kaj esti en mia prapatra lando; sed precipe min tenas sopiro al la forestanta Oduseus.  
 145 Mi nekuraĝas, fremdulo! lin nomi, kvankam li forestas; ĉar supermezure li min ŝatis kaj tutkore pri mi zorgis; sed ĉiam mi lin nomas mia kara frato pli maljuna.”

Lin siavice alparolis la persistema dieca Oduseus:

„Amiko! Ĉar vi nepre kontraŭdiras kaj neas, ke li ankoraŭ  
 150 iam revenos kaj ĉar via koro ĉiam malfida restas: nu do, mi ne plu diros simple, sed per ĵuro, ke Oduseus revenos. Kaj la rekompencon por tiu bona sciigo mi ricevu tuj post kiam li reveninte estos atinginta sian propran palacon; [tiam vi min vestu per belaj vestoj, mantelo kaj subvesto;] ĉar antaŭ  
 155 tio mi nenion akceptos, kvankam mi estas ege bezonanta; [ĉar estas de mi same malamata kiel la pordego de Hades tiu, kiu, delogite de sia mizero, klaĉas mensogaĵojn.] Nun sciu unualoke inter la Dioj Zeus kaj via gastama tablo kaj la

- kameno de l' neriproĉebla Oduseus, al kiu mi rifuĝas: tut-  
 160 certe ĉi ĉio plenumiĝos, kiel mi diras: ankoraŭ en ĉi tiu jaro  
 revenos ĉi tien Oduseus; kiam la nuna luno malkreskos kaj  
 la posta kreskos, tiam li revenos hejmen kaj venĝos ĉiun, kiu ĉi  
 tie senhonorigas lian edzinon kaj lian brilgloran filon."
- 165 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:  
 „Grizulo! Mi do certe ne donos al vi tiun rekompenccon por  
 bona sciigo, ĉar ankaŭ Oduseus ne plu ankoraŭ hejme venos.  
 Sed kviete trinku kaj nun ni pensu pri aliaj aferoj kaj ne plu  
 vi min memorigu pri ĉi ĉio. Ĉar vere la koro en mia brusto  
 170 ekmalĝojas ĉiam, kiam iu ekmemorigis min pri mia zorgema  
 mastro. Kaj rilate al via ĵuro: ni lasu tiun nepriparolita,  
 sed revenu Oduseus, kiel mi por li deziras kaj ankaŭ Penelope  
 kaj la grizulo Laertes kaj la disimila Telemachos. Sed nun mi  
 sentas neforgeseblan doloron pro tiu junulo, la filo de Oduseus,  
 175 Telemachos. Kiam la Dioj lin estis kreskigintaj simila al  
 juna arbobranĉo, kaj kiam mi jam opiniis, ke li, admirinda pro  
 staturo kaj eksteraĵo, ne estos inter la viroj malsupera, tiam  
 iu el la senmortuloj aŭ iu el la homoj blindigis la taŭĝan  
 prudentecon en lia spirito; ĉar por aŭdi sciigon pri sia patro  
 180 li foriris al la sanktega Pulos; sed la eminentaj amantoj nun  
 embuskas kontraŭ li, dum li estas hejmen revenanta, por ke  
 la idaro de l' disimila Arkesios sennome kaj senglore malaperu  
 el Ithaka. Sed nu, ni ne plu parolu pri li, ĉu li estos kaptata  
 aŭ elsavos sin kaj ĉu la Kron-ido protekte etendos sian manon  
 185 super lin. Sed nu, grizulo! rakontu nun al mi pri viaj propraj  
 ĉagrenoj kaj ankaŭ ĉi tion laŭvere al mi diru, por ke mi bone  
 sciu: kiu kaj de kie inter la homoj vi estas? kie troviĝas via  
 urbo kaj kie vivas viaj gepatroj? per kia ŝipo vi alvenis?  
 Kiel alveturigis vin la ŝipanaro al Ithaka? al kiu popolo ili  
 190 sin gloris aparteni? Ĉar mi opinias, ke neniel vi venis ĉi tien  
 piede."

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

- „Certe mi ĉi ĉion tute laŭvere rakontos al vi. Se ni havus  
 ambaŭ nun por kelka tempo manĝon kaj dolĉan vinon por  
 195 kviete manĝi, sidante en ĉi tiu dometo, dum la aliaj sin okupas  
 pri la laboro: tiam mi facile povus dum tuta jaro rakonti,  
 kaj tamen ankoraŭ mi ne estus je la fino, pri la ĉagrenoj de mia  
 koro kaj pri ĉio, kion mi jam trasuferis laŭ la destino de l' Dioj.  
 Mi min gloras esti devena el la vasta Kreta kaj esti la filo  
 200 de riĉa viro; ankaŭ multaj aliaj filoj naskiĝis kaj estis edukataj  
 en lia domo, la idoj de lia edzino; sed mia patrino estis aĉetita

- sklavino kaj lia kromvirino, sed tamen min same estimis kiel  
 205 siajn legitimajn infanojn la Hulak-ido Kastor, kies filo mi  
 min gloras esti kaj kiu tiam inter la Kretanoj estis honorata  
 kiel Diaĵo meze de l' popolo pro siaj prospero kaj riĉeco kaj  
 pro siaj multgloraj filoj. Sed la mortosorto forkondukis lin al  
 la loĝejo de Hades; tiam liaj trokuraĝaj filoj dividis lian  
 210 posedaĵon kaj lotĵetis pri ĝi; sed al mi nur tre malmulton ili  
 donis kaj havigis domon. Post tio mi hejmen kondukis kiel  
 edzinon la filinon de multposedaj gepatroj, pro mia braveco,  
 ĉar mi ne estis sentaŭgulo nek milittimema; sed nun ĉi ĉio  
 estas perdita; sed tamen mi opinias, ke vi, kiam vi min alri-  
 gardas, ankoraŭ povas rekoni la ombron de tio, kia mi iam  
 215 estis; ĉar vere, min ege premas grandega mizero. Sed nepre,  
 kuraĝon kaj forton por trarompi la vicojn de l' malamikoj  
 donis al mi Ares kaj Athene; kiam mi elektis kuraĝajn virojn  
 por embusko, elpensante malbonon kontraŭ la malamikoj,  
 neniam antaŭsentis mia brava koro la morton, sed multe  
 220 plej antaŭe alkurante, mi ĉiam trafis per la lanco ĉiun el la  
 malamikecaj viroj, kiu malsuperis min je rapideco de piedoj.  
 Tia mi estis en la milito; sed agrikulturon mi ne ŝatis, nek  
 hejmamon, kiu rezultigas belegajn infanojn, sed ĉiam estis  
 225 al mi karaj remilhavaj ŝipoj kaj militoj kaj glatigitaj lancoj  
 kaj sagoj, malĝojigaĵoj, kiuj abomenegaj estas al aliaj. Sed  
 al mi ĉi ĉio estis ĉiam kara, kion eble iu Diaĵo estis metinta  
 en mian koron. Unuj ja ŝatas alian okupon ol la aliaj.
- Antaŭ ol la filoj de l' Aĉaioj ekpaŝis sur la teron de Troia,  
 230 mi naŭfoje komandis virojn kaj rapidveturajn ŝipojn kontraŭ  
 fremdajn popolojn kaj mi ĉiufoje akiris tre multe da milit-  
 kaptajo. El tiu mi ĉiam elektis por mi mem sufiĉan parton  
 kaj poste ankoraŭ multe lotakiris; rapide plimultiĝis mia  
 posedo kaj tiel mi poste fariĝis respektinda kaj honorinda  
 235 inter la Kretanoj. Sed kiam la laŭttondra Zeus projektis  
 tiun fatalan militiron, kiu senfortigis la genuojn de multe  
 da viroj, tiam ili invitis min kaj la grandfaman Idomeneus,  
 ke ni konduku la ŝipojn al Ilion; kaj ekzistis neniu ebleco  
 rifuzi, ĉar de tio min retenis kalumniaj klaĉoj inter la popolo.
- 240 Tie ni, la filoj de l' Aĉaioj, dum naŭ jaroj militis; sed en la  
 deka jaro ni ruinigis la urbon de Priamos kaj reiris hejmen  
 per la ŝipoj; tiam iu Diaĵo disigis la Aĉaiojn. Sed kontraŭ  
 mi, mizerulo, projektis tiam malfeliĉon la konsildona Zeus.  
 Ĉar nur unu monaton mi restis hejme, ĝuante pro miaj infanoj  
 245 kaj pro la edzino de mia junaĝo kaj miaj havaĵoj; sed post

tio min instigis mia koro bone ekipi ŝipojn kaj kun disimilaj  
kunuloj velveturi al Aiguptos. Naŭ ŝipojn mi ekipsis kaj baldaŭ  
kolektiĝis la ŝipanaro. Dum ses tagoj tiam miaj fidelaj kunuloj  
250 festmanĝis kaj mi ilin disponigis pri multaj viktimoj por oferi al  
la Dioj kaj prepari al si la manĝon. Kaj surŝipiĝinte, ni for-  
veturis la sepan tagon for de Kreta per forte blovanta, favora  
norda vento, senpene kaj kvazaŭ kunflue. Neniu el miaj ŝipoj  
255 do difektiĝis, sed sendanĝeraj kaj sanaj ni sidis en ili kaj la  
vento kaj la direktilistoj direktis la ŝipojn. Post kvin tagoj  
ni atingis la belfluan Aiguptos [kaj mi ankrigis en la rivero  
Aiguptos la ambaŭflanke kurbigitajn ŝipojn]. Tiam mi ordonis  
260 al miaj fidelaj kunuloj, ke ili restu tie apud la ŝipoj kaj gardu  
la ŝipojn kaj mi instigis la spionojn, ke ili iru al observejo;  
sed ĉi tiuj, nebridante sian trokuraĝon kaj konsentante al sia  
sento de forto, senprokraste detruis la belegajn kampojn  
de l'Aiguptaj viroj, forkondukis la virinojn kaj malgrandajn  
265 infanojn kaj mortigis la virojn. Sed baldaŭ la militkriado  
atingis la urbon. Tiam la urbanoj, ekaŭdinte la bruadon, je la  
komenco de l' tagiĝo venis eksteren. Kaj pleniĝis la tuta ebenaĵo  
de piedbatalantoj kaj militoĉaroj kaj de la fulmado de kupro.  
Tiam la fulmjetegulo Zeus panikon pereigan kaŭzis inter miaj  
270 kunuloj kaj neniu kuraĝis malcedi kontraŭ la malamiko:  
ĉar de ĉiuj flankoj ilin ĉirkaŭis pereo. Tie ili mortigis multajn  
el ni per la akra kupro, aliajn ili vivaj forkondukis por devigite  
por ili labori. Sed tiam Zeus mem min igis ekpensi en mia  
spirito pri jena plano — ho! ke mi prefere estus mortinta kaj  
275 atinginta mian mortosorton tie en Aiguptos, ĉar ankoraŭ  
pli multaj malfeliĉoj min atendis — tuj mi deprenis la bele  
fabrikitan kaskon de mia kapo kaj la ŝildon de miaj ŝultroj  
kaj la lancon mi faligis el mia mano; nun mi iris renkonte al  
la militoĉaro de l' reĝo kaj ĉirkaŭprenis kaj kisis liajn genuojn;  
280 ĉi tiu min ekkompatis kaj savis kaj li sidigis min sur la ĉaro  
kaj min ploranta kondukis al sia domo. Estas vere, ke tre  
multaj alkuris kontraŭ min kun siaj fraksenlignaj lancoj, arde  
dezirante min mortigi, ĉar evidente ili ege koleraj estis, sed  
li detenis ilin, ĉar li timis la malamon de l' gastprotekta Zeus,  
kiu tre indignas pro malbonaj agoj.  
285 Tiam mi tie restadis sep jarojn kaj multajn trezorojn mi  
kolektis inter la Aiguptaj viroj, ĉar ĉiuj donis al mi donacojn.  
Sed kiam, dum la preterturniĝado de l' jaroj, la oka jaro  
estis veninta, tiam venis Phoinika viro, sperta je trompaĵoj,  
fripono, kiu jam multe da malbono estis kaŭzinta inter la homoj;

- 290 ĉi tiu min persvadis per sia ruza spirito kaj min kunprenis, ĝis  
ni atingis Phoenike, kie sin trovis lia domo kaj liaj posedaĵoj. Tie  
mi restadis ĉe li dum tuta jaro; sed kiam, dum la preterturniĝado  
de l' jaro, la monatoj kaj la tagoj estis finiĝintaj kaj revenis la  
295 sezonoj, tiam li kondukis min sur marveturan ŝipon al Libue,  
trompe pretekstante, ke tien mi portos ŝarĝon kun li, sed inten-  
cante min vendi tie kaj ricevi grandegan prezon. Mi lin devigite  
sekvis sur la ŝipon, kvankam suspektante. Rapide velveturis  
la ŝipo, per forte blovanta, favora norda vento, meze sur la  
300 maro sude de Kreta; sed Zeus al ili projektis pereon. Sed  
kiam ni estis preterpasintaj Kreta kaj neniu alia lando plu  
montriĝis, sed nur ĉielo kaj maro, tiam la Kron-ido aperigis  
malluman nubon super la kava ŝipo kaj malheliĝis sub ĝi  
305 la maro. Dume Zeus tondrigis kaj ĵetegis en la ŝipon sian  
ekfulmon; kaj la tuta ŝipo tremis, trafite de l' fulmo de Zeus  
kaj ĝi tutpleniĝis de sulfuraodoro; kaj ili ĉiuj falis el la ŝipo.  
Same kiel markornikoj ili naĝis ĉirkaŭ la nigra ŝipo sur la ondoj  
kaj la Diaĵo forprenis de ili la hejmenvojaĝon. Sed al mi,  
310 havanta dolorigan timon en mia animo, enmanigis Zeus mem  
la maston grandegan de l' ŝipo kun nigra antaŭsteveno, por  
ke mi ankoraŭfoje evitu la pereon. Firmtenante min al tiu,  
mi estis kuntrenata de la pereigaj ventoj.

- Tiel mi naŭ tagojn estis kuntrenata de la ondoj, sed en la  
deka malluma nokto la grandegaj, ĉiam turniĝantaj ondoj  
315 min proksimigis al la lando de l' Thesprotoj. Tie min senpage  
gastigis la reĝo de l' Thesprotoj, la heroo Pheidon; ĉar lia  
kara filo venis al mi, starigis min per helpa mano kaj min,  
elĉerpitan pro malvarmo kaj laceco, kondukis al sia hejmo,  
ĝis kiam li estis atinginta la domon de sia patro; tie li min  
320 ĉirkaŭvestis per mantelo kaj subvesto.

- Tie mi sciiĝis pri Odusseus; ĉar li diris al mi, ke li estis  
gastiginta kaj regalinta lin, kiam li estis reiranta hejmen;  
ankaŭ li montris al mi ĉiujn trezorojn, kiujn estis kolektinta  
Odusseus, kupron kaj oron kaj arte prilaboritan feron. Eĉ  
325 ĝis la deka generacio ĉi ĉio povus subteni kaj nutri la idaron,  
tiom da ties trezoroj kuŝis en la loĝejo de l' reĝo. Sed li diris,  
ke ĵus Odusseus estas irinta al Dodona, por ekscii el la alt-  
foliara kverko de l' Diaĵo la volon de Zeus, kiel li, jam longe  
330 forestanta, povos reveni al la fruktodona lando de Ithaka,  
ĉu malkaŝe, ĉu sekrete. Ankaŭ la reĝo, verŝoferante en sia domo,  
ĵuris al mi mem, ke la ŝipo jam estas trenita en la maron kaj  
la kunuloj jam estas pretaj, kiuj lin akompanos al la kara

- lando de liaj prapatroj. Sed min li lasis jam antaŭe forveturi;
- 335 ĉar ĝuste iris ŝipo de Thesprotaj viroj al la multtritika Doulichion. Pheidon ordonis, ke oni multzorge min tien akompanu al reĝo Akastos; sed plaĉis al la ŝipanoj pereiga decido en ilia koro pri mi, por ke mi ankoraŭfoje venu en malfeliĉon kaj mizeron. Ĉar kiam malproksime de l' tero forveturis la
- 340 martrafenda ŝipo, tiam ili tuj projektis por mi la tagon de l' sklaveco. Ili demetis de mi la vestojn, mian mantelon kaj mian subveston, kaj ĵetis ĉirkaŭ min aliajn vestaĵojn, mal-luksajn ĉifonojn kaj subveston disŝiritajn, kiujn vi ankaŭ mem per viaj okuloj vidi povas; vespere ni tiam alvenis apud la kampoj de l' malproksime videbla Ithaka; tiam ili min
- 345 per bonplektita ŝnuro firme ligis en la bonferdeka ŝipo, sed mem elŝipiĝinte, ili rapide prenis la vespermanĝon ĉe la bordo de l' maro. Sed la Dioj mem malligis senpene la ŝnuron; rapide mi forŝovis miajn ĉifonojn post la kapon kaj subenirinte laŭ-
- 350 longe de l' glata direktilotrabo, mi etendis mian bruston sur la ondojn kaj tiam mi naĝante remadis per ambaŭ manoj kaj tre rapide mi estis el la maro, malproksime de ili. Tiam suprenirinte al loko, kie sin trovis arbeto de multfloraj
- 355 kaj rebenoj, mi kuŝiĝis, min kaŝante; laŭte ĝemante ili nun tien kaj reen iradis. Sed — ĉar ŝajnis al ili ne konsilinde serĉadi pli interne en la lando — baldaŭ ili reiris sur la kavan ŝipon; tiel la Dioj mem senpene min kaŝis kaj min gvidante, ili kondukis min al ĉi tiu loĝejo de prudenta viro; ĉar estas al mi destinite ankoraŭ resti vivanta."
- 360 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:  
 „Kompatinda fremdulo! vere, profunde vi tuŝis mian koron, rakontante ĉi ĉion, kiom vi suferis kaj kiom vi vagadis. Sed tio ne estas vera, mi opinias — kaj vi ne konvinkos min —
- 365 kion vi diris pri Oduseus. Kial necesas, ke vi tiel malfeliĉan viron facilanime trompas? Mi ja ankaŭ mem tre bone scias pri la hejmenvojaĝo de mia mastro, nome ke li treege estis malamata de ĉiuj Dioj, ĉar ili lin tute ne lasis morti meze de l' Troianoj aŭ en la brakoj de liaj karuloj, post kiam li estis multpene fininta la tutan militon. Tiuokaze ĉiuj Aĉaioj
- 370 ja estus starigintaj tombmonteton por li kaj ankaŭ por sia filo li estus akirinta grandan gloron por estontaj tempoj; sed nun senglora lin fortrenis la ventegoj. Sed mi ĉi tie vivas forizolite ĉe la porkoj; ankaŭ mi ne kutimas iri al la urbo, se ne kelkiam la tre prudenta Penelope min instigas veni, kiam de aliloke venis sciigo; sed tiam ĉiuj sidas ĉirkaŭ la

- 375 informanto kaj pri ĉio lin eldemandas, tiel same ili, kiuj  
priploras la longtempe forestantan mastron, kiel ankaŭ ili,  
kiuj ĝojas diboĉante senpune lian havaĵon; sed al mi ne plaĉas  
esplori kaj demandi, de kiam per sia parolo min trompis
- 380 Aitola viro, kiu estis mortiginta viron kaj post longa vagado  
tra ĉiaj landoj venis al mia loĝejo; kaj mi gastame lin akceptis.  
Li pretendis, ke li vidis mian mastron inter la Kretanoj ĉe  
Idomeneus, dum li estis kalfatranta sian ŝipon, kiun la ventegoj  
estis rompintaj. Ankaŭ li pretendis, ke Oduseus en la somero
- 385 aŭ aŭtuno, kunportante multajn trezorojn, revenos kun siaj  
disimilaj kunuloj. Ankaŭ vi, grizulo tre malĝoja! ĉar iu Diaĵo  
vin kondukis al mi, ne klopodu igi min favora al vi per mensogoj  
kaj ne min trompu: ĉar ne pro tio mi respektos kaj regalos  
vin, sed ĉar mi timas la gastprotektan Zeus kaj vin mem kom-  
patas.”
- 390 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:  
„Vere, vi havas ege nekredeman koron en via brusto, tiel  
ke eĉ ne per ĵuro mi vin povis decidigi kredi min kaj vin ne  
povas konvinki. Nu do, ni faru interkonsenton, kaj estu atest-  
antoj al ni ambaŭ la Dioj, kiuj loĝas sur la Olumpos. Kiam
- 395 via mastro estos reveninta en sia ĉi tiea domo, tiam vi min  
vestu per vestaĵoj, per mantelo kaj subvesto kaj lasu min  
foriri, por ke mi iru al Doulichion, kien mi deziras iri en mia  
animo, sed se via mastro ne revenos, kiel mi diras, tiam instigu  
viajn servistojn kaj ili min ĵetu de alta roko, por ke ankaŭ
- 400 alia almuzulo sin gardu vin trompi.”  
Lin respondante alparolis la dieca porkpaŝtisto:  
„Fremdulo! tiel mi tutcerte akirus belfamecon kaj gloron  
pro mia virto ĉe la homoj, tiel same nun, kiel ankaŭ poste,  
se mi, post kiam mi vin estas kondukinta en mian loĝejon
- 405 kaj doninta al vi porgastajn donacojn, tiam vin mortigus  
kaj deprenus vian karan vivon! Libervole tiam mi pekus  
kontraŭ la Kron-ido Zeus! Sed estas nun la tempo por la vesper-  
manĝo; se nur plej baldaŭ hejmen venos miaj kunuloj, por ke  
ni preparu en la dometo manĝon bongustan.”
- 410 Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al la alia. Sed jam venis proksimen  
la porkoj kaj la porkpaŝtantaj viroj. Ili enfermis la porkinojn  
en la stalojn por dormkuŝiĝi, kaj terura gruntado eksonis  
de la ekstere tranoktontaj virporkoj. Tiam la dieca porkpaŝtisto  
ordonis al siaj kunuloj:  
„Vi ĉi tien konduku la plej bonan el la porkoj, por ke mi  
buĉu ĝin honore al la fremdulo el malproksima lando kaj



415 krome ankaŭ ni de ĝi profitos, kiuj jam longan tempon penante  
 ĉagrenon havas pro la blankdentaj porkoj, dum aliaj la frukton  
 de nia penlaborado senpune fordibočas.”

Tiel parolinte, li defendis lignon per la senkompata kupro  
 kaj la aliaj enkondukis tre grasan kvinjaran porkon. Post  
 420 tio ili ĝin lokis ĉe la kamenon; sed la porkpaŝtisto ne forgesis  
 la senmortulojn — ĉar li posedis bonan animon — sed dediĉe  
 li ĵetis la harojn de l' kapo de l' blankdenta porko en la fajron  
 kaj preĝis al ĉiuj Dioj [, ke la tre prudenta Oduseus revenu  
 al sia domo]; post tio, supren levante la manojn, li ĝin batis  
 425 per peco de kverkligno, kiun li estis flanken metinta dum la  
 fendado; la vivo ĝin forlasis; tiam ili tratranĉis ĝian gorgon  
 kaj forbrogis ĝiajn harojn kaj rapide ĝin distranĉis; post tio  
 la porkpaŝtisto, dediĉante partetojn de ĉiuj membroj, envolvis  
 krudan karnon en grasan lardaĵon, ĵetis ĉi ĉion en la fajron kaj  
 430 disŝutis sur ĝin farunon de hordeo; tiam ili tranĉdividis la  
 ceteran viandon kaj ĝin pikis ĉirkaŭ la rostilojn kaj akurate  
 ĝin rostis kaj tiam ĉion fortiris de la rostiloj kaj kune metis  
 sur la kuirejajn stablojn. Nun ekstaris la porkpaŝtisto por  
 detranĉi ĝin, ĉar pli ol aliaj li sciis en sia animo la konvenaĵojn.  
 Tiel li ĉion dispecigis en sep porciojn: la unuan li preĝante  
 435 metis aparte por la nimfoj kaj por Hermes, la filo de Maia,  
 kaj la aliajn li donis al ĉiu el ili. Sed al Oduseus li donis kiel  
 honorigon la longan dorsaĵon de l' blankdenta porko kaj per  
 tiu ĝojigis la animon de l' reĝo. Kaj lin alparolante diris al  
 li la elpensema Oduseus:

440 „Estu, Eumaios! same kara al patro Zeus, kiel vi estas kara  
 al mi, pro tio, ke tiom vi honoras min, kvankam mi estas  
 mizera, per bonaj donacoj.”

Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Manĝu, sortbatita fremdulo! kaj ĝuu ĉion, kio estas proviza.  
 La Diaĵo ja al ni havigas kelkion kaj malpermesas la alian,  
 445 kiel li volas en sia animo; ĉar ĉion li povas.”

Li parolis kaj dediĉis la unuaaĵojn al la ĉiamaj Dioj kaj  
 li verŝoferis la perlantan vinon kaj tiam donis la pokalon en  
 la manojn de l' urbdetruulo Oduseus; ĉi tiu sidis ĉe sia porcio.  
 Panon al ili disdonis Mesaulios, kiun la porkpaŝtisto estis  
 450 mem akirinta en la foresto de sia mastro kaj sen kunsocio de sia  
 estrino kaj de l' maljunulo Laertes; ĉar li estis aĉetinta lin  
 per siaj propraj havaĵoj de Taphiaj viroj. Ĉiuj nun etendis  
 la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj mangaĵoj. Sed kiam  
 ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam

455 forprenis la panon de ili Mesaulios kaj ĉiuj, satigite de pano kaj viando, rapide iris al la kuŝejo.

Sed proksimiĝis malbona nokto senluma; la tutan nokton Zeus pluvigis kaj blovadis forta sudokcidenta vento, ĉiam pluvdona. Tiam meze de ili parolis Oduseus, provante la  
460 porkpaŝiston, ĉar tutkore ĉi tiu prizorgis lin, ĉu ĉi tiu demetos sian mantelon kaj donos ĝin al li, aŭ ĉu li ordonos tion al iu el siaj servistoj:

„Vi nun aŭskultu je mi, Eumaios kaj vi ĉiuj, liaj kunuloj! Mi volas ion al vi peti kaj rakonti historion al vi. Min instigas al tio la malsaĝiga vino, kiu stimulas eĉ la tre prudentajn  
465 virojn al kantado kaj kontenta ridado kaj lin instigas al dancado kaj eĉ kelkfoje vortojn eldirigas, kiuj pli bone estus neparolataj. Sed ĉar mi jam klaĉi komencis, mi ne volas ĝin silenti. Ho! ke mi ankoraŭ estus same junaĝa kaj ke mia forto ankoraŭ estus same firma kiel, kiam ni ĉirkaŭ la muroj de Troia envicigis  
470 la virojn kaj embuskigis ilin. Tiam komandis Oduseus kaj la Atre-ido Menelaos, kaj kiel tria kune kun ili ĉefis mi; ĉar ili mem insistis je tio. Sed kiam ni estis atingintaj la urbon kaj la krutan muregon, tiam ĉirkaŭ la urbo en densa arbustaĵo, meze de kanaro kaj marĉa herbejo, ni kuŝiĝis, forkaŝitaj sub  
475 niaj ŝildoj, sed proksimiĝis malbona prujna nokto, post kiam la norda vento estis senfortiĝinta; kaj de supre venis neĝo, malvarma kiel pluvglacio, kaj glacikristalo sin fiksas sur niajn ŝildojn. Tiam ĉiuj aliaj havis mantelojn kaj survestojn kaj dormis kviete, kovrinte la ŝultrojn per la ŝildoj; sed mi la mantelon  
480 mian estis senpripense postlasinta al miaj kunuloj, kiam mi iris, ĉar mi opiniis, ke neniel mi frostos, sed mi estis kunirinta, nur havante mian ŝildon kaj mian brilan ĝisgenuan antaŭtukon. Sed jam estis en la tria parto de l' nokto kaj la steloj jam estis pasintaj la mezon de l' ĉielo kaj tiam mi parolis al Oduseus,  
485 kiu apuda estis, dum mi lin ekpuŝis per la kubuto — kaj tuj atente li aŭskultis —:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! ne plu longan tempon mi estos inter la vivantoj; sed la vintra frostoj min mortigas, ĉar mi ne havas mantelon. Demonio min certe delogis iri alhavanta nur subveston; kaj nun mi vidas ne plu eviteblan pereon.”

490 Tiel mi parolis kaj post tio li ekhavis jenan planon en sia animo, kiel li ĉiam estis lerta en la konsilo kaj en la batalo; parolante per mallaŭta voĉo li diris al mi la vortojn:

„Nun silentu, por ke neniu alia el la Aĉaioj vin aŭdu.”

Li parolis kaj apogis sian kapon sur la kubuto kaj diris la vortojn:

495 „Aŭskultu vi, amikoj! didevena sonĝo venis al mi en la dormo. Tro malproksime ni estas foririntaj de la ŝipoj; se nur estus iu por diri al la Atre-ido Agamemnon, la reganto de la popoloj, ĉu li povos ordoni, ke venu pli multaj viroj de la ŝipoj.”

Tiel li parolis; tiam rapide sin levis Thoas, la filo de Andraimon kaj deĵetis sian purpurkoloran mantelon kaj forrapidis al la ŝipoj. Sed mi ĝojante kuŝiĝis en liajn vestojn, ĝis kiam aperis la ortrona Eos. [Ho, ke mi ankoraŭ estus same juneca kaj ke mia forto ankoraŭ estus same firma: tiam ja certe donus iu el la porkpaŝtistoj en la dometo mantelon al mi, pro du kialoj: 505 pro amikeco kaj pro respekto por brava viro. Sed nun min malestimas ili; ĉar mi alhavas malluksan veston al mia korpo.]”

Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Grizulo! la historio, kiun vi rakontis, estas senriproĉa kaj neniun nekonvenan aŭ senutilan vorton vi parolis. Tial al vi 510 mankos nek la vesto, nek io alia, kion laŭ konveno devas ricevi elprovita peteganto, kiun oni renkontas, sed nur por nun; sed morgaŭ matene vi denove vestu vin per viaj propraj ĉifonoj. Ĉar ĉi tie ni ne havas multajn mantelojn kaj interŝanĝeblajn vestojn por nin vesti, sed ĉiu viro nur havas unu. 515 [Sed kiam la kara filo de Odusseus estos reveninta, tiam li donos mem al vi vestaĵojn, mantelon kaj subveston kaj li lasos vin foriri, kien viaj koro kaj animo vin instigas iri].”

Tiel parolinte, li eksaltis de sia seĝo kaj pretigis por li apud la fajro kuŝejon kaj ĵetis sur ĝin la felojn de ŝafoj kaj kaprinoj. 520 Tie Odusseus kuŝiĝis kaj tiam Eumaios ĵetis sur lin sian dikan kaj grandan mantelon, kiu kutime kuŝis flanke de li kiel ŝanĝo-vesto, kiam terura ventega vetero ekestis.]

Tiel tie kuŝiĝis Odusseus kaj la junaĝaj viroj sin etendis flanke de li por dormi. Sed al la porkpaŝtisto ne plaĉis la tiea 525 litaĵo kaj la dormado malproksime de l' porkoj, sed li sin armis por iri eksteren. Kaj ĝojis Odusseus pro tio, ke li en lia foresto tre bone prizorgis lian havaĵon. Unue Eumaios ĵetis la akran glavon ĉirkaŭ siajn fortikajn ŝultrojn, kaj tiam li sin ĉirkaŭvestis per tre dika mantelo, kiu ŝirmis kontraŭ la vento, tiam 530 prenis la felon de bonnutrita, granda kapro kaj kaptis la akran lancon, la defendilon kontraŭ hundoj kaj viroj. Nun li foriris por iri kuŝiĝi tie, kie la blankdentaj porkoj dormis sub volviĝanta roko, sur loko, ŝirmita kontraŭ la norda vento.

## DEK KVINA KANTO.

## LA ALVENO DE TELEMACHOS ĈE EUMAIOS.

- Sed dume Pallas Athene estis foririnta al la vasta Lakedaimon, por rememorigi al la brila filo de l'grandanima Oduseus la revenon kaj por lin instigi reiri hejmen. Tie ŝi trovis Telemachos kaj la brilgloran filon de Nestor, kuŝantaj en la antaŭdomo de l'multgloreĝa Menelaos; ŝi trovis la Nestor-idon kaptita de dolĉa dormo; sed la agrabla dormo ne ekkaptis Telemachos, sed en lia animo maltrankvilo pro lia patro lin maldormigis dum la tuta didevena nokto. Proksimiĝante al li lin alparolis la fajrŝprucokula Athene:
- 10 „Telemachos! ne plu konvenas al vi vagadi malproksime de via domo, ĉar vi postlasis viajn havaĵojn ĉe tiel trokuraĝaj viroj en via domo; se nur ili ne diboĉos ĉiom, interdividante viajn posedaĵojn, dum vi vojaĝon vanan faras! Nu do, plej baldaŭ instigu Menelaos, bonegan je la militkrio, ke li lasu
- 15 vin foriri, por ke vi ankoraŭ hejme trovu vian neriproĉeblan patrinon. Ĉar jam ŝin instigas ŝiaj patro kaj fratoj edziniĝi kun Eurumachos. Ĉi tiu ja superas ĉiujn amantojn per siaj donacoj kaj eĉ multe plimultigis siajn edziĝodonojn. Estu singarda, ke ŝi ne kunportu el la domo iun havaĵon kontraŭ
- 20 via volo. Vi ja scias, kia estas la inklinio en la brusto de l'virino: prefere ŝi pligrandigas la posedon de tiu, kiu kun ŝi edziĝas, sed pri siaj antaŭaj infanoj kaj pri la mortinta kara edzo el sia junaĝo ŝi ne plu pensas kaj ne demandas. Tial iru mem kaj
- 25 ĉion konfidu al tiu el la servistinoj, kiu al vi ŝajnas la plej bona, ĝis kiam la Dioj estos indikintaj al vi multgloran edzinon. Sed nun mi diros ion alian al vi kaj bone pri ĝi atentu en via animo. Gardeme la plej eminentaj el la amantoj embuskas kontraŭ vi en la markolo inter Ithaka kaj la rokeca Samos,
- 30 arde dezirante vin mortigi, antaŭ ol vi atingos la landon de viaj prapatroj [, sed mi opinias ke tio ne okazos; pli baldaŭ la tero kovros multajn el la amantoj, kiuj fordiboĉas vian havaĵon]. Tial detenu vian fortike konstruitan ŝipon malproksime de l'insuloj kaj ankaŭ nokte veturu; kaj favoran venton sendos
- 35 malantaŭ vian ŝipon unu el la senmortuloj, kiu vin gardas kaj protektas. Sed tuj post kiam vi estos atinginta la bordon de Ithaka, tiam lasu iri al la urbo vian ŝipon kaj ĉiujn kunulojn, sed mem unue iru al la porkpaŝtisto [, kiu estas la gardisto

de viaj porkoj kaj kiu havas ankoraŭ same afablan inklinon  
40 al vi, kiel antaŭe]. Tie pasigu la nokton kaj lasu lin iri en la  
urbon por alporti al la tre prudenta Penelope la sciigon, ke vi  
sendifekta estas kaj revenis el Pulos.”

Tiel parolinte, ŝi foriris al la alta Olumpos; tuj li vekis nun  
45 la Nestor-idon el la dolĉa dormo [, lin ekpuŝante per la piedo,  
kaj diris al li la vortojn]:

„Vekiĝu, Nestor-ido Peisistratos, venigu la unuhufajn  
ĉevalojn kaj ilin jungu antaŭ la ĉaron, por ke ni finu nian  
vojaĝon.”

Lin siavice alparolis la Nestor-ido Peisistratos:

„Telemachos! kvankam ni ege deziras forvojaĝon, tamen  
50 tute ne eble estas veturi dum la nokto malluma; sed baldaŭ  
estos mateno. Atendu do, ĝis kiam la heroeca Atre-ido, la  
pro sia lanco famkonata Menelaos, portos al ni la donacojn  
kaj metos ilin sur la ĉaron kaj per vortoj afablaj nin alparolante,  
lasos nin forvojaĝi. Gasto ja ĉiujn tagojn memoras pri tiu  
55 gastiginto, kiu amikecon al li montris.”

Tiel li parolis kaj tuj aperis la ortrona Eos. Nun Menelaos,  
bonega je la militkrio, sin levis el sia lito, flanke de l'belhara  
Helena, kaj proksimiĝis al ili. Kaj tuj post kiam lin estis rimar-  
60 kinta la kara filo de Odusseus, tiam rapide li almetis ĉirkaŭ  
la korpon la briletan subveston kaj grandan mantelon la heroo  
jetis ĉirkaŭ siajn fortikajn ŝultrojn, kaj tiam eksteren li iris  
kaj ĉe li haltante, li lin alparolis [, Telemachos, la kara filo  
de l'dieca Odusseus]:

„De Zeus edukita Atre-ido Menelaos, reganto super la popo-  
65 loj! Nun min lasu forvojaĝi al la kara lando de miaj prapatroj,  
ĉar nun mia koro deziras hejmen reiri.”

Lin respondis post tio Menelaos, bonega je la militkrio:

„Telemachos! neniel mi longan tempon vin retenos ĉi tie,  
dum vi sopiras al hejmenvojaĝo; ĉar mi ankaŭ malŝatas alian  
70 gastiganton, kiu supermezure montras amikecon aŭ supermezure  
malamas; pli bona estas ĉio modera. Same malbone estas,  
kiam iu instigas sian gaston forvojaĝi kontraŭ lia volo, kiel  
kiam oni detenas iun, kiu volas rapide iri for. [Ĉeestantan  
gaston oni devas ame prizorgi, sed gaston volantan forvojaĝi  
75 oni lasu forveturi.] Sed atendu, ĝis kiam mi estos alpor-  
tinta kaj metinta sur la ĉaron la belajn donacojn, kiujn vi  
vidos per viaj propraj okuloj, kaj ĝis kiam mi estos ordoninta  
al la virinoj, ke ili preparu en la loĝĉambrego manĝon el la  
ene ĉeestanta provizo: — ambaŭ, tiel same gloro kaj laŭdo,

kiel ankaŭ refreŝigo estas, kiam gastoj, bone manĝinte, foriras  
 80 por vojaĝi sur la granda, senfina tero — kaj se vi volas vin  
 direkti tra Hellas kaj tra la mezo de Argos, por ke mi mem vin  
 akompanu, tiam mi jungos sub la jugon la ĉevalojn por vi  
 kaj mi vin gvidos al la urboj de l'homoj; kaj neniu nin lasos  
 forvojaĝi sen donacoj, sed ĉiu almenaŭ ion al ni donos, por  
 ke ni ĝin kunprenu, ĉu tripiedon belkupran aŭ pelvon, aŭ  
 85 duon da muloj aŭ oran pokalon."

Lin siavice alparolis la saĝa Telemachos:

„De Zeus edukita Atre-ido Menelaos, reganto super la popo-  
 loj! Mi preferas tuj reiri al mia hejmo; ĉar kiam mi foriris,  
 mi ne postlasis gardiston super miaj posedaĵoj. Se nur ne,  
 90 serĉante mian didevenan patron, mi pereos mem, aŭ se nur ne  
 perdiĝos iu multvalora trezoro el mia loĝejo."

Sed kiam tion estis aŭdinta Menelaos, bonega je la militkrio,  
 tiam li tuj ordonis al sia edzino kaj siaj servistinoj, ke ili  
 preparu en la loĝĉambrego manĝon el la ene ĉeestanta provizo.  
 95 [Tiam proksimiĝis al li la Boetho-ido Eteoneus, ĵus leviĝinta  
 el sia litaĵo, kiu ne loĝis je granda distanco de li. Al li ordonis  
 Menelaos, bonega je la militkrio, bruligi fajron kaj rosti viandon  
 kaj ĉi tiu, tion aŭdinte, ne malobeis]. Mem li nun malsupren-  
 100 iris al la trezorejo bonodora, sed ne sola: kune kun li iris  
 Helena kaj Megapenthes. Sed kiam ili estis venintaj tie, kie  
 kuŝis la valoraĵoj, tiam la Atre-ido prenis dutenilhavan pokalon  
 kaj al sia filo Megapenthes li ordonis porti arĝentan vinmik-  
 sujon. Helena stariĝis ĉe la kestoj, en kiuj kuŝis la mult-  
 105 koloraj vestaĵoj, kiujn ŝi mem artplene estis fabrikinta. Unu  
 el ili elprenante, la dieca inter la virinoj ĝin kunportis, la plej  
 belan je multkoloro kaj la plej grandan kaj same kiel stelo  
 ĝi brilis; ĝi kuŝis plej malsupre el ĉiuj aliaj. Nun ili paŝis  
 110 tra la domo, ĝis kiam ili venis ĉe Telemachos; kaj lin alparolis  
 la blondhara Menelaos:

„Telemachos! vere, kiel vi deziras en via animo, tiel igu  
 vin plenumi vian hejmenvojaĝon Zeus, la laŭttondra edzo  
 de Hera. Kaj el la donacoj, kiuj kiel valoraĵoj kuŝas en mia  
 loĝejo, mi donos al vi tion, kio estas plej bela kaj plej kara.  
 115 [Mi donos al vi arte fabrikitan vinmiksujon; ĝi estas tute  
 arĝenta kaj supre borderita per randoj el oro, laboritaĵo de  
 Hephaistos. Ĝin donis al mi la heroo Phaidimos, la reĝo de  
 l'Sidonioj, kiam lia domo akceptis min, dum mia revojaĝo  
 ĉi tien; sed nun mi volas ĝin donaci al vi]".

120 Tiel parolinte, la heroo kaj Atre-ido donis en liajn manojn

la dutenilhavan pokalon; tiam la forta Megapenthes alportis la brilan, arĝentan vinmiksujon kaj ĝin metis antaŭ lin. Kaj fine la belvanga Helena proksimiĝis, portante la vestaĵon en la manoj kaj diris la vortojn kaj parolis:

125 „Donacon ankaŭ mi, ho kara infano, volas al vi doni, nome ĉi tion, je memoraĵo pri la manoj de Helena, por ke alhavu ĝin via edzino, je l'tago de l'arde dezirata geedziĝo; ĝis tiam ĝi kuŝu en la dormoĉambro de via kara patrino. Kaj ĝoje revenu en vian fortike konstruitan loĝejon kaj en vian prapatran landon.”

130 Tiel parolinte, ŝi enmanigis al li la vestaĵon kaj li ĝojante ĝin akceptis; kaj la heroo Peisistratos prenis la donacojn kaj metis ilin en la korbom sur la ĉaro kaj ĉion li admire rigardis en sia koro. Tiam ilin kondukis en la domon la blondhara Menelaos kaj tie ili sidiĝis sur apogseĝojn kaj brakseĝojn.

135 Nun al ili alportis servistino akvon en bela, ora kruĉo kaj ĝin elverŝis sur iliajn manojn super arĝenta pelvo; tiam ŝi antaŭmetis al ili glatpoluritan tablon. Tiam la respektinda mastrumistino alportis panon kaj ĝin antaŭmetis[, post kiam ŝi estis alportinta jam multajn aliajn manĝaĵojn, ĉar volonte

140 ŝi donis el la provizo]. Flanke la Boetho-ido detranĉis la vianĉaĵojn kaj donis al ĉiu lian porcion; vinon verŝis la filo de l'multglora Menelaos. Ili nun etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj manĝaĵoj. Sed kiam ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam Telemachos kaj la brilglora

145 filo de Nestor jungis la ĉevalojn, suriris la arte prilaboritan ĉaron kaj elveturis el la antaŭpordego kaj el la laŭte resonanta kolonaro. Post ilin kuris la Atre-ido, la blonda Menelaos, portante en sia dekstra mano mielĉan vinon en ora pokalo, por ke ili verŝoferu antaŭ ol foriri; li haltis antaŭ la ĉevaloj kaj adiaŭante li alparolis ilin:

„Bonfartu vi, junuloj! kaj ankaŭ transportu miajn salutojn al Nestor, la reganto super la popoloj! ĉar vere, li estis tiel afabla al mi, kiel patro, dum ni, la filoj de l'Aĉaioj, estis militantaj en Troia.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

155 „Ni nepre, de Zeus edukita heroo, ĉi ĉion post nia alveno rakontos al li, kiel vi deziras. Ho, ke same certe mi, en Ithaka reveninte, renkontus en mia domo Odusseus kaj povus rakonti ĉi ĉion al li, kiel mi nun foriras, spertinte de via flanko plenan amikecon kaj kunportante multajn valorajn trezorojn.”

160 Kiam li estis tiel parolinta, alflugis je lia dekstra flanko



birdo, aglo, portanta en siaj ungoj blankan, grandegan anseron malsovaĝan el la korto; viroj kaj virinoj ĝin postkuris kriante, sed ĝi, veninte proksime al ili, flugis je la dekstra flanko preter  
 165 la ĉevalojn antaŭen. Kaj ili, ĝin vidante, ĝojis kaj estis al ĉiuj la animo en la brusto kuraĝigata. Nun meze de ili komencis paroli la Nestor-ido Peisistratos:

„Nun pripensu, de Zeus edukita Menelaos, reganto super la popoloj, ĉu la Diaĵo montris por ni ĉi tiun antaŭsignon, aŭ ĉu por vi mem.”

170 Tiel li parolis kaj pripensis Menelaos, kara al Ares, kiel li povos klarigi la signon kaj laŭkonvene respondi al li. Sed jam antaŭ li respondis la streĉvesta Helena kaj ŝi diris la vortojn:

„Aŭskultu vi je mi, ĉar mi profetos al vi, kiel la senmortuloj inspiras en mian animon kaj kiel mi opinias, ke vere okazos.

175 Same kiel tiu aglo, veninta el la montaro, kie estas lia devena loko kaj lia idaro, forrabis tiun anseron, grasnutritan en la korto, tiel ankaŭ Oduseus, post kiam li estas multe da malbonoj trasuferinta kaj multe rondvagadinta, hejmen revenos kaj venĝos; aŭ eble li jam hejme estas kaj elpensas pereon kontraŭ ĉiuj amantoj.”

Sin siavice alparolis la saĝa Telemachos:

180 „Tiel nun okazigu Zeus, la laŭttondra edzo de Hera; tiam mi, ankaŭ tie, danke vin honoros kiel Diaĵon.”

Li parolis kaj ekbatis per la vipo sur la ĉevalojn; kaj tre rapide ili kuris arde tra la urbon al la ebenaĵo. La tutan tagon ili skuadis la jugon, kiun ili ĉirkaŭhavis. Jam la suno malleviĝis kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis kaj ili nun atingis Pherai  
 185 kaj la domon de Diokles, la filo de Orsilochos, kiu estis la infano de Alpheios. Tie ili pasigis la nokton kaj ĉi tiu donis al ili gastdonacojn.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam ili subjugigis la ĉevalojn, suriris la arte prilaboritan ĉaron kaj elveturis el la antaŭpordego kaj el la laŭte resonanta kolonaro [kaj li vipis la ĉevalojn por inciti ilin kaj ne malobee ili kurrapidis]. Baldaŭ ili nun atingis la alte kuŝantan urbon Pulos; kaj tiam Telemachos alparolis la filon de Nestor:

195 „Nestor-ido! ĉu vi iel povos al mi promesi, ke vi plenumos jenan deziron mian? Ni ja gloras nin esti daŭre gastamikoj unu de la alia pro la amikeco de niaj patroj kaj ankaŭ ni estas samaĝaj; krome ĉi tiu vojaĝo ankoraŭ pli multe al ni donis  
 200 unuanimecon. Ne konduku min malproksimen de mia ŝipo,

ho didevenulo! sed postlasu min ĉi tie, por ke via maljuna patro ne retenu min en sia domo, dezirante min gastigi; ĉar estas necese, ke mi hejme alvenu plej baldaŭ.”

205 Tiel li parolis kaj la Nestor-ido pripensis en sia animo, kiel li povos al li konvene ĉi tion promesi kaj plenumi. Tiel al li ŝajnis, dum li pri tio pensis, esti plej bone: li turnis la ĉevalojn al la rapida ŝipo kaj al la bordo de l'maro kaj la belegajn donacojn  
li igis transporti sur la malantaŭan stevenon de l'ŝipo, la vestaĵon kaj la oron, kiun Menelaos estis doninta al Telemachos; kaj lin instigante, li diris al li la flugilhavajn vortojn:

210 „Rapide nun surŝipiĝu kaj ordonu tion saman al ĉiuj kunuloj, antaŭ ol mi hejme alvenos kaj ĉion rakontos al la grizulo. Ĉar tion mi bone scias en mia spirito kaj mia animo: li kun sia tiel pasia animo vin ne lasos forveturi, sed ĉi tien li venos por mem inviti vin kaj mi opinias, ke ne sensukcese li reirus; ĉar eĉ sen tio li jam ege koleros.”

215 Tiel parolinte, li direktis la belkolharajn ĉevalojn returne al la urbo de l' Pulanoj kaj baldaŭ atingis sian loĝejon.

Dume Telemachos instigis siajn kunulojn kaj al ili ordonis:

„Enordigu vi la ilaron, kunuloj! sur la nigra ŝipo kaj ni mem nin surŝipiĝu, por ke ni finu nian vojaĝon.”

220 Tiel li parolis; kaj ili bonvole aŭskultis kaj obeis al li kaj mem rapide surŝipiĝis kaj sidiĝis ĉe la remapogiloj.

Ĉi ĉion li pene prizorgis kaj oferdonis ĉe la posta steveno de l'ŝipo; subite lin proksimiĝis fremdlanda viro, sin forsavinta el Argos, post kiam li tie estis mortiginta viron. Li

225 estis profeto kaj rilate al sia generacio li estis devena de Melampus, kiu antaŭe iam loĝis en Pulos, la patrino de l'ŝafaro, kaj kiu treege riĉa enloĝis sian domon inter la Pulanoj. Sed tiam li estis foririnta al lando de fremdaj homoj, sin savante for de sia patrujo kaj for de l'grandkuraĝa Neleus, la plej brava

230 inter la vivantoj, kiu dum tuta jaro perforte posedis liajn multajn trezorojn. Dume Melampus kuŝis katenita per malkomfortaj ligiloj en la domo de Phulakos, suferante terurajn dolorojn pro la filino de Nereus kaj pro la kompleta blindiĝo, kiun estis iriginta en lian spiriton la abomena Erinus. Sed li evitis

235 la mortosorton kaj pelis la laŭte muĝantajjn bovojn el Phulake al Pulos kaj punis la hontindan faron de l'disimila Neleus kaj la knabinon li kunportis kiel edzinon por sia frato al ties loĝejo.

240 Post tio li iris al lando de aliaj homoj, al la ĉevalonutra Argos; ĉar estis al li destinite tie loĝi, regante super multaj Argeioj. Tie li edziĝis kun virino kaj konstruis al si alttegmentan domon

- kaj li naskigis Antiphates kaj Mantios, du fortajn filojn. Antiphates naskigis la grandkuraĝan Oikles kaj Oikles la armeinciteman Amphiaraos, kiun la egidporta Zeus kaj Apollon supermezure amis en sia koro kun ĉia favoro; tamen li ne atingis la sojlon de l'maljuneco, sed li pereis en Thebai sekve de l'donaco al sia edzino. Ties filoj estis Alkmaion kaj Amphilochos. Mantios plue naskigis Polupheides kaj Kleitos. Sed la ortrona
- 245 Eos forrabis Kleitos pro lia beleco, por ke li vivu inter la senmortuloj. Sed la fieraniman Polupheides faris Apollon la multsupere plej bona profeto inter la mortidevuloj, post kiam mortis Amphiaraos; ĉi tiu, koleriĝinte kontraŭ sia patro, cedis
- 250 al Huperesia, kie li loĝis kaj profetis al ĉiuj mortidevuloj. Ties filo — Theoklumenos estis lia nomo — tiam proksimiĝis kaj haltis antaŭ Telemachos; ĉi tiun li trovis verŝoferanta kaj preĝanta apud la nigra ŝipo kaj lin alparolante, li diris al li la flugilhavajn vortojn:
- 260 „Amiko! ĉar mi vin trovas sur ĉi tiu loko oferanta, tial mi vin petegas pro viaj aferoj kaj via Diaĵo kaj plue ankaŭ pro via propra kapo kaj viaj kunuloj, kiuj vin akompanas; diru al mi la veron pri tio, kion mi demandos kaj ĝin ne kaŝu: kiu kaj de kie inter la homoj vi estas? kie estas via urbo kaj kie vivas viaj gepatroj?”
- 265 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:  
„Tutcerte mi ĉi tion diros al vi, fremdulo, tute laŭvere. El Ithaka mi estas devena kaj mia patro estas Oduseus, aŭ pli ĝuste: iam li estis mia patro, sed nun li pereis je ĉagrena
- 270 morto. Tial mi nun iris kun miaj kunuloj kaj mia nigra ŝipo por ekaŭdi pri mia longan tempon forestanta patro.”  
Lin siavice alparolis la disimila Theoklumenos:  
„Same ankaŭ mi nun vivas ekster la patrujo, post kiam mi mortigis viron samgentan — kaj multajn fratojn kaj parencojn li havas en al ĉevalonutra Argos, kiuj potence regas super la
- 275 Aĉaioj — por eviti la morton kaj la nigran mortosorton per iliaj manoj mi nun min forŝavis, ĉar estas verŝajne mia destino vagadi inter la homoj. Tial min akceptu sur via ŝipo, ĉar kiel forkurinto mi vin petegas, por ke ili ne mortigu min; ĉar mi kredas ke ili min jam persekutas.”  
Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:
- 280 „Neniel mi kontraŭ via volo vin detenas de mia proporcie konstruita ŝipo, sed min sekvu; kaj tie mi vin gastigos kaj regalos per ĉio, kion ni posedas.”  
Tiel parolinte, li deprenis de li la kupran lancon kaj tiun

deponis sur la ferdekon de l'ŝipo ambaŭflanke kurbigita; post  
 285 tio li mem suriris la martrafendan ŝipon kaj sidiĝis tiam sur  
 la malantaŭa ferdeko, kaj li sidigis je sia flanko Theoklumenos;  
 dume la aliaj malligis la poststevenajn ŝnuregojn.

Tiam Telemachos instigis siajn kunulojn kaj al ili ordonis  
 pretigi la ilaron kaj ili rapide obeis. Nun ili hisis la abian  
 290 maston kaj ĝin starigis en la kavaĵon de l'meza trabo, ĝin  
 fiksligis per la stajo kaj post tio supentiris la blankajn velojn  
 per bonplektitaj rimenoj. Kaj la fajrŝprucokula Athene sendis  
 al ili favoran venton, forte alrapidantan el la etero, por ke la  
 ŝipo plej baldaŭ fluge traveturu la saletan akvon de l'maro.

295 [Tiel ili preterpasis Krounoi kaj la belflua Chalkis.]

Nun malleviĝis la suno kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis, kaj  
 tiam la ŝipo veturis laŭlonge de Pheai, antaŭen puŝate de  
 l'favora vento de Zeus, kaj plue laŭlonge de l'dieca Elis, kie  
 la Epeioj regas. De tie Telemachos direktis la ŝipon al la pin-  
 300 trokaj insuloj, pripensadante, ĉu li evitos la morton, aŭ estos  
 pereigata.

Ambaŭ Oduseus kaj la dieca porkpaŝtisto tiam ĝuste estis  
 vespermanĝantaj en la dometo kaj kune kun ili la aliaj viroj  
 manĝis. Sed kiam ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj  
 manĝo, tiam Oduseus meze de ili parolis, provante la pork-  
 305 paŝtiston, ĉu ĉi tiu ankoraŭ zorge lin gastigos kaj lin invitos  
 resti tie en sia dometo, aŭ ĉu li instigos lin iri al la urbo:

„Aŭskultu vi nun je mi, Eumaios kaj ĉiuj aliaj kunuloj!  
 mi deziras iri morgaŭ matene al la urbo por almozpeti, por ke  
 mi ne formanĝu ĉiom de vi kaj viaj kunuloj. Tial min bone  
 310 konsilu kaj donu al mi bonan gvidanton, por ke li tien min  
 konduku; tra la urbo mi vagados mem, devigate de l'neceso,  
 por provi, ĉu eble iu al mi donos tason da akvo kaj iom da  
 pano. Ankaŭ mi povus, irante al la domo de l'dieca Oduseus,  
 315 porti informojn al la tre prudenta Penelope kaj min intermiksi  
 inter la trokuraĝajn amantojn, por provi ĉu eble ili donos manĝon  
 al mi, ĉar ili ja havas sennombrajn refreŝigajn manĝaĵojn;  
 tiam mi volus tuj ĉe ili labori kaj fari, kion ili ajn deziras.  
 Ĉar tion mi diros al vi kaj estu vi atenta kaj aŭskultu je mi:  
 320 per la favoro de Hermes, la kondukisto, kiu ja havigas belecon  
 kaj gloron al la laboroj de ĉiuj viroj, neniu alia mortidevulo  
 povas konkuri kun mi je ĉia serva laborado: je la ĝusta ama-  
 sigo de l'brulligno en la kameno, je la disfendado de seka  
 ligno, je la detranĉado kaj rostado de viando kaj je la verŝado  
 de vino kaj je ĉio, per kio la subuloj servas la nobelojn.”

325 Lin vi tiam ege malkontentiĝinte alparolis, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Ve al mi! ho gasto, kial eniris tia penso en vian spiriton? Aŭ ĉu vi deziras tute pereji tie, ĉar vi ja volas intermiksi vin en la aron da amantoj, kies trokuraĝo kaj perfortemo atingas la feran ĉielon. Iliaj servistoj ne estas tiaj kia vi, sed ili estas junuloj bone vestitaj per mantelo kaj subvesto, kaj ĉiam tiuj, kiuj ilin servas, estas brilete oleitaj je la kapo kaj belaj ili estas je la vizaĝo, kaj la belpoluritaj tabloj ĉiam estas plen-

335 ŝarĝitaj per pano kaj viando kaj vino. Tial restu: ĉar neniu estas ĝenata de via ĉeesto, nek mi nek iu alia de miaj kunuloj, kiuj kun mi estas. Sed kiam la kara filo de Odusseus estos reveninta, tiam li vin vestos per vestaĵoj, per mantelo kaj subvesto kaj li lasos vin foriri, kien vin instigas iri viaj koro kaj animo.”

340 Lin respondis post tio la persistema dieca Odusseus:

„Estu, Eumaios, same kara al patro Zeus, kiel vi estas kara al mi, ĉar vi ripozon donis al mi post miaj rondvagado kaj terura suferado. Nenio alia ja estas pli malfeliĉiga por mortidevuloj ol vivo vagada; sed pro sia mizera stomako suferas malĝojigan ĉagrenon ĉiuj viroj, kiujn trafas vagado kaj doloro kaj malfeliĉo. Sed nu, ĉar vi volas min reteni kaj instigas min, ke mi atendu Telemachos, nu do, rakontu al mi pri la patrino de l'dieca Odusseus kaj pri lia patro, kiun li forvojaĝante postlasis sur la sojlo de l'maljuneco, ĉu ili ankoraŭ

345 vivas en la radioj de l'suno, aŭ ĉu ili jam estas mortintaj kaj en la loĝejo de Hades.”

Lin siavice alparolis la porkpaŝtisto, la ĉefo de l'servistoj:

Certe mi ĉi tion, ho gasto, tute laŭvere rakontos al vi. Laertes ankoraŭ estas vivanta, sed ĉiam li preĝadas al Zeus, ke la vivo

355 foriĝu el liaj membroj en lia domo; ĉar ege li vekrias pro sia forestanta filo kaj pro la sagaca edzino de sia junaĝo, kiu lin treege malĝojigis, tial ke ŝi forkonsumiĝis kaj tro frue lin faris grizulo. Kaj ŝi forvivis de ĉagreno pro sia multglora filo kaj mortis doloran morton; tiel neniu mortu, kiu el la ĉi tieaj

360 loĝantoj estas kara al mi kaj montras al mi amikecon. Dum ŝi ankoraŭ estis viva malgraŭ sia profunda malĝojo, tiam ĉiam estis al mi agrable ŝin eldemandi kaj esplori pri ĉiaj aferoj, ĉar ŝi mem min estas edukinta kune kun la malvastvesta Klumene, sia forta filino, kiun ŝi naskis lasta el siaj infanoj;

365 kune kun tiu mi estis edukata kaj ŝi malmulte malpli min honoris ol ŝin. Sed kiam ni ambaŭ estis atingintaj la mult-

sopiratan maturan junecon, tiam ili ŝin donis en Samos kiel edzinon kaj ricevis sennombrajn edziĝdonacojn. Sed min per vestoj tre belaj vestis mia estrino, per mantelo kaj subvesto kaj por miaj piedoj ŝi donacis al mi sandalojn kaj tiam min sendis ĉi tien en la kamparon kaj ankoraŭ pli multe ol antaŭe 370 ŝi min ŝatis en sia koro. Sed nun ĉi ĉion mi malhavas. Sed al mi mem la feliĉegaj Dioj favoras mian laboron, kiun mi prizorgas. Da tio mi kutimas manĝi kaj trinki kaj doni al respektinduloj. Sed de mia mastrino ne estas eble aŭdi komplezan vorton aŭ sperti komplezan faron. Ĉar per tiuj trokuraĝaj 375 viroj trafis malfeliĉo nian domon; kaj tamen arde deziras servistoj interparoli kun sia mastrino kaj pri ĉio demandi kaj manĝi kaj trinki kaj poste, revenante al la kamparo, ankoraŭ kunporti ion, kio refreŝigas ĉiam la animon de servistoj.”

380 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„[Nu, tiel vi do, jam kiam vi estis ankoraŭ infano, ho porkpaŝtisto Eumaios, forvagiĝis malproksime de via patrujo kaj de viaj gepatroj.] Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj rakontu ĝin laŭvere, ĉu la multthoma urbo larĝstrata, en kiu loĝis via 385 patro kaj via honorinda patrino, estis detruata, aŭ ĉu eble viroj malamikecaj, dum vi estis lasita sola apud la ŝafoj kaj bovoj, vin kunprenis al sia ŝipo kaj vin vendis kaj kondukis [al la domo de ĉi tiu viro, kiu al ili donis justan aĉetprezon].”

Lin siavice alparolis la porkpaŝtisto, la ĉefo de l'servistoj:

390 „Gasto! ĉar vi pri tio demandas kaj esploras min, aŭskultu do silente kaj ĝuu kaj kviete sidante trinku vinon; la nunaj noktoj estas neeldireble longaj; oni povas dormi, sed ankaŭ oni povas plezure aŭskulti. Kaj ankaŭ neniel estas necese enlitiĝi antaŭ la kutima tempo. Plue longa dormado estas 395 malutila. Sed kiun el la aliaj instigas la koro kaj animo al tio, tiu foriru por dormi; sed je la komenco de l'tagiĝo li matenmanĝu kaj akompanu la porkojn de l'reĝo. Sed ni ambaŭ, trinkante kaj manĝante en la dometo, ĝoju, rememorante 400 kune iamajn dolorajn malfeliĉojn; ĉar post la suferado ĝojas, eĉ memorante pri siaj ĉagrenoj, viro, kiu tre multe traserferis kaj multe rondvagadis. Sed tion mi diros al vi, pri kio vi demandas kaj esploras:

Kuŝas iu insulo, nomata Suria — eble vi aŭdis pri ĝi — norde de Ortugia, kie la suno sin direktas returne, neniel tiel ege 405 multthoma, sed tamen fruktodona, multbova kaj multŝafa kaj ankaŭ vinriĉa kaj multgrena. Neniam tie malsato trafas la popolon, kaj ankaŭ neniu alia malaminda malsano venas



- inter la mizerajn mortidevulojn; sed kiam en la urbo la generacioj de l' homoj maljuniĝas, tiam venas Apollon kun argenta arkpafilo, kune kun Artemis, kaj proksimiĝante, li ilin mortigas per siaj mildaj sagoj. Tie estas du urboj kaj inter ili la tuta lando estas dividita en du partojn; super tiuj ambaŭ estis reĝo mia patro, la Ormen-ido Ktesios, simila al la senmortuloj.
- 415 Tie iam alvenis ŝipfamaj Phoinikaj viroj, friponoj, kunportantaj sur sia nigra ŝipo sennombrajn ornamaĵojn. Restadis en la domo de mia patro Phoinika virino, bela kaj altkreska kaj sperta je brila laboro. Ŝin la Phoinikoj trompis per flataj
- 420 vortoj. Kiam ŝi iam estis puriganta vestojn, tiam unue iu el ili apud la kava ŝipo ame sin kunigis kun ŝi, kio kutimas delogi la sentojn de delikata virino, eĉ se unu el ili estus virtema. Poste li demandis al ŝi, kiu ŝi estas kaj de kie ŝi devenas; tuj ŝi tiam indikis la alttegmentan loĝejon de mia patro, dirante:
- 425 „Mi gloras min esti el la multkupra Sidon kaj mi estas la filino de l' treege riĉa Arubas; sed kiam mi iam revenis de la kampo, tiam min forrabis viroj Taphiaj, piratoj, kaj ĉi tien kondukinte min, ili min vendis en la domo de ĉi tiu viro; kaj tiu donis justan aĉetprezon.”
- 430 Ŝin siavice alparolis la viro, kiu sekrete estis ame kuniginta sin kun ŝi:  
 „Ĉu vi do nun kun mi returne kuniri volus hejmen, por revidi la alttegmentan domon de viaj patro kaj patrino kaj ankaŭ por revidi ilin mem? Ĉar ili ankoraŭ vivas kaj estas nomataj riĉaj.”
- Lin siavice alparolis la virino kaj ŝi respondis per la vortoj:
- 435 „Certe, tio povus okazi, almenaŭ se vi, ŝipanoj, volus vin devigi per ĵuro, ke vi sendifekte min kondukos hejmen.”
- Tiel ŝi parolis kaj ili ĉiuj ĵuris kiel ŝi deziris. Sed kiam ili estis ĵurintaj kaj tute elparolintaj la ĵuron, tiam denove meze de ili la virino parolis kaj respondis per la vortoj:
- 440 „Nun estu vi silentaj. Neniu el viaj kunuloj min alparolu per vortoj, kiam li min renkontos, ĉu en la strato, ĉu ie apud la fonto, por ke neniu, irinte al lia domo, ĝin rakontu al la maljunulo kaj por ke tiu ne, min suspektante, min katenu per malkomfortaj ligiloj kaj kontraŭ vi elpensu pereon. Vi estu
- 445 do memoraj pri mia parolo kaj plej baldaŭ vi enspezu la prezon por viaj komercaĵoj. Sed kiam estos via ŝipo plena de interesangaj artikloj, tiam venu baldaŭ sciigo pri tio al nia domo; ĉar ankaŭ oron mi kunportos, kiom mi povos ekhavi en



450 miaj manoj. Ankaŭ alian veturoprezon mi povus al vi doni, se mi volus. La filon de l'eminenta viro mi ja prizorgas, jam tre taŭgan por profite esti vendata, kiu ĉiam min postkuras eksteren; tiun mi povus kunpreni al la ŝipo kaj vi ricevos por li grandegan aĉetprezon, kie ajn vi vendos lin inter fremdaj homoj."

Tiel parolinte ŝi foriris al la bela domo de mia patro; dume  
455 ili tutan jaron tie restis ĉe ni kaj multajn komercaĵojn ili aĉetis kaj ŝarĝis en la kavan ŝipon. Sed kiam la kava ŝipo estis plensarĝita, tiel ke ili povis reiri, tiam ili sendis kurieron por sciigi al la virino. Venis al la domo de mia patro tre lerta  
460 viro kun ora kolĉeno, alterne kunlaĉita kun pecetaĵ da sukceso. Ĝin la servistinoj kaj mia honorinda patrino en la loĝĉambrego pripalpadis per la manoj kaj rigardadis per la okuloj, proponante aĉetprezon; dume li silente kapsignis al la servistino. Kaj kapsigninte, li rapide reiris al la kava ŝipo; kaj ŝi, kapt-  
465 ante min je la mano, min elkondukis el la domo. En la antaŭdomo ŝi ankoraŭ trovis la pokalojn kaj la tablojn de la gastoj, kun kiuj mia patro ordinare sin okupis. Ĉi tiuj jam estis foririntaĵ al la kunvenejo kaj al la popola interkonsiliĝo. Rapide ŝi kaŝis sub sian brustoveston tri pokalojn kaj ilin kunprenis  
470 kaj mi ŝin sekvis en sensaĝeco. La suno jam malleviĝis kaj ĉiuj stratoj krepuskiĝis, kiam ni, rapide marŝante, atingis la faman havenon, kie sin trovis la rapidvetura ŝipo de l' Phoinikaj viroj. Kaj, surŝipiginte nin, ili mem suriris la ŝipon  
475 kaj forveturis sur la malseka vojo de l' maro; kaj Zeus al ili sendis favoran venton. Ses tagojn ni veturadis tiel same dumnokte kiel dumtage, sed kiam la Kron-ido Zeus aperigis la sepan tagon, tiam la sagpafa Artemis trafis la virinon kaj same kiel mara mevo ĉi tiu kun obtuza bruo falis en la holdon.  
480 Kaj ili ĵetis ŝian kadravron en la maron kiel kaptajojn por fokoj kaj fiŝoj. Sed mi postrestis kun malĝoja koro. Nun la vento kaj la fluo ilin pelis al Ithaka, kie Laertes min aĉetis per propraj posedaĵoj. Tiumaniere mi vidis ĉi tiun landon per miaj okuloj."

485 Lin siavice la didevena Oduseus respondis per la vortoj:  
„Eumaios! vere tre profunde vi tuŝis mian koron en mia brusto, ĉi ĉion rakontante, kiom da doloroj vi suferis en via animo. Sed tucerte Zeus havigis al vi krom la malbonon ankaŭ la bonon, ĉar post multaj suferoj vi venis en la domo de viro  
490 mildanima, kiu zorgeme al vi havigas manĝon kaj trinkon kaj tiel vi do vivas agrablan vivon. Male mi ĉi tie venis, dum

mi ankoraŭ ĉiam vagi devas tra multaj urboj de homoj."

495 Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu kun la alia kaj post tio ili iris  
dormi, sed ne dum longa tempo, sed nur mallonge; ĉar baldaŭ  
venis la ortrona Eos.

Dume la kunuloj de Telemachos malligis la velojn kaj  
rapide mallevis la maston kaj tiam la ŝipon remis per la remiloj  
al la ankrejo. Post tio ili elĵetis la ankroŝtonojn kaj ligis la  
malantaŭajn ŝnuregojn; kaj tiam ili mem sin elŝipigis ĉe  
500 la ondoresaltejo de l' maro kaj ili pretigis al si la matenmanĝon  
kaj miksis la perlantan vinon. Sed kiam ili estis satigintaj  
sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam meze de ili la tre pru-  
denta Telemachos ekparolis la vortojn:

„Vi nun remu la nigran ŝipon al la urbo, sed mi aliros al  
la kampoj kaj paŝtistoj kaj kiam mi estos vidinta la laboron  
505 sur miaj kampoj, mi hodiaŭ vespere revenos al la urbo. Sed  
morgaŭ matene mi volas al vi antaŭmeti, kiel rekompenco  
por via akompano, bonan manĝon de viando kaj dolĉgusta  
vino.”

Lin siavice alparolis la disimila Theoklumenos:

„Kien do iros mi, ho kara filo? Al kies loĝejo mi iru inter  
510 la viroj, kiuj super la rokeca Ithaka regas? Aŭ ĉu mi iru rekte  
al via patrino kaj via domo?”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Aliokaze mi instigus vin iri al mia domo; ĉar tie neniel  
estas malhavo de gastdonacoj; sed por vi mem ne estas konsil-  
515 inda tio, ĉar mi forestos kaj ankaŭ mia patrino vin ne vidos;  
ĉar ne multfoje ŝi aperas en la loĝĉambrego inter la amantoj,  
sed for de ili ŝi kutime teksas teksaĵon en la supra ĉambro.  
Sed mi indikos alian viron al vi, al kiu vi povas iri, Eurumachos,  
la brilgloran filon de l'sagaca Polubos, al kiu la Ithakanoj  
520 nun rigardas kiel al Diaĵo. Li ja estas la multe plej kuraĝa  
viro kaj plej arde deziras edziĝi kun mia patrino kaj akiri la  
reĝecon de Odusseus. Sed tion scias la Olumpano Zeus, loĝanta  
en la etero, ĉu li eble por ili estigos ankoraŭ antaŭ la edziĝo  
la tagon de l'pereo.”

525 Kiam li estis tiel parolinta, de dekstre flugis al li birdo,  
spiralfugema falko, la rapida kuriero de Apollon. En la ungoj  
ĝi havis kolombon kaj ĝin senplumigis kaj la plumojn ĝi dis-  
faligis teren inter la ŝipo kaj Telemachos mem. Tiam lin vokis  
530 aparte de liaj kunuloj Theoklumenos kaj li premis lian manon  
kaj li diris la vortojn kaj parolis:

„Telemachos! ne kontraŭ la volo de l'Diaĵo flugis tiu birdo

je la dekstra flanko; ĉar lin vidante, mi ekkomprenis, ke ĝi estas antaŭsigna birdo. Neniu alia familio estas pli digna je la reĝeco ol la via en la popolo de Ithaka, sed ĉiam vi estas la plej bravaj."

535 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Ke tiu parolo, ho gastamiko, plenumiĝu! Tiam vi baldaŭ spertus mian amikecon kaj ricevus multajn donacojn de mi, tiel ke ĉiu, vin renkontante, vin nomus feliĉega."

Li parolis kaj diris post tio al Peiraion, sia fidela kunulo:

540 „Klut-ido Peiraios! vi ja ankaŭ aliajn fojojn estis la plej obeema el miaj kunuloj, kiuj min akompanis al Pulos; tial ankaŭ nun kunprenu ĉi tiun fremdulon en vian loĝejon kaj zorge lin gastigu kaj respektu lin, ĝis kiam mi estos reveninta."

Lin siavice alparolis la lanĉfama Peiraios:

545 „Telemachos! eĉ se vi longan tempon tie restadus, mi bone lin prizorgos kaj gastdonacoj al li ne mankos."

Tiel parolinte, li suriris la ŝipon kaj ordonis al siaj kunuloj surŝipiĝi mem kaj malligi la malantaŭajn ŝnuregojn. Rapide ili surŝipiĝis kaj sidigis ĉe la remapogiloj. Dume Telemachos

550 ligis sub la piedoj la belajn sandalojn kaj prenis de la ferdeko la fortikan lancon, akrigitan per kupra pinto; kaj la aliaj malligis la malantaŭajn ŝnuregojn. Tiam ili forpuŝis la ŝipon de la bordo kaj veturis al la urbo, kiel estis ordoninta al ili Telemachos, la kara filo de l'dieca Odusseus. Dume ĉi tiun, rapide antaŭen marŝantan, portis liaj piedoj, ĝis kiam li alvenis al la brutejo, kie sin trovis liaj sennombraj porkoj, meze de kiuj la porkpaŝtisto kutimis pasigi la nokton, ĉar bona li estis kaj favorinklina al siaj mastroj.

## DEK SESA KANTO.

### TELEMACHOS REKONAS ODUSSEUS.

Ambaŭ, Odusseus kaj la dieca porkpaŝtisto, je la tagiĝo estis preparantaj en la dometo sian matenmanĝon, post kiam ili estis ekbruligintaj fajron, kaj post tio ili sendis eksteren la paŝtistojn kun la kolektitaj porkoj. Subite vostsvingeti

5 komencis la laŭtbojemaj hundoj pro la proksimiĝo de Telemachos, sed ili ne ekbojis. Rimarkis la dieca Odusseus, ke la hundoj vostsvingetis kaj la bruo de paŝantaj piedoj atingis

liajn orelojn. Rapide li nun alparolis Eumaios per la flugilhavaj vortoj:

- „Eumaios! verŝajne venos ĉi tien iu amiko de vi, aŭ eble  
10 alia konato, ĉar ne bojas la hundoj, sed ili vostsvingetas kaj mi aŭdas la obtuzan bruon de paŝantaj piedoj.”

Ankoraŭ ne tute estis eldirita la parolo, kiam lia kara filo jam staris en la enirejo. Mirplene eksaltis la porkpaŝtisto kaj el liaj manoj falis la vazoj, en kiuj li estis miksanta la perlantan  
15 vinon. Li iris renkonte al sia mastro kaj kisis lian kapon kaj ambaŭ liajn belajn okulojn kaj ambaŭ liajn manojn; kaj abundaj larmoj ruliĝis el liaj okuloj. Kiel patro kun amplena koro bonvenigas sian filon, revenantan en la deka jaro el lando malapuda, sian tutsolan, malfrue naskiĝintan, pro kiu li  
20 suferis multajn ĉagrenojn, tiel la dieca porkpaŝtisto ĉirkaŭbrakis la disimilan Telemachos kaj ĉie lin kisadis, kvazaŭ li estus evitinta la morton; kaj plendante li diris la flugilhavajn vortojn:

- „Vi do tamen revenis, Telemachos, mia dolĉa pupilo. Mi jam opiniis, ke neniam plu mi vin revidos, post kiam vi estis  
25 foririnta per la ŝipo al Pulos. Sed nu, eniru nun, ho kara filo! por ke mi ĝoju en mia koro, vin rigardante, kiu nur ĝuste el fremdaj landoj reestas en la patrujo. Ĉar tute ne multfoje vi vizitas la kampojn kaj paŝtistojn, sed vi restadas en la urbo; ĉar tiel verŝajne plaĉas al via animo, tie vidi la impertinentan aron de tiuj amantoj.”

- 30 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Tiel okazos, paĉjo! pro vi ja venis mi ĉi tien, por ke mi vidu vin per miaj okuloj kaj aŭdu de vi informon, ĉu mia patrino ankoraŭ restadas en sia domo, aŭ ĉu jam iu alia el la viroj edziĝis kun ŝi kaj ĉu la lito edzeca de Odusseus eble  
35 pro manko je litkovraĵoj tie staras, plena de malpurajaraneajoj.”

Lin siavice alparolis la porkpaŝtisto, la ĉefo de l'servistoj:

- „Tutcerte ŝi ankoraŭ ĉiam restas kun persistema animo en sia loĝejo. Sed la noktoj kaj la tagoj ĉiam mizerplene preterpasas al ŝi, dum ŝi larmojn verŝadas.”

40 Tiel parolinte, li deprenis de li la kupran lancon. Nun Telemachos eniris kaj paŝis trans la ŝtonan sojlon. Kaj lia patro Odusseus cedis de sia seĝo por la proksimiĝanto, sed Telemachos de sia flanko lin retenis kaj parolis:

- 45 „Residiĝu, fremdulo! ni trovos ankaŭ aliloke en nia dometo sidlokon. Jen estas la viro, kiu pri tio zorgos.”

Tiel li parolis kaj Odusseus reiris al la seĝo kaj denove sidiĝis.

Sed la porkpaŝtisto por Telemachos nun sternis verdan branĉetaron sur la planko kaj sur tiun li metis ŝafofelon. Tie sidiĝis tiam la kara filo de Odusseus. Nun antaŭmetis al ili la porkpaŝtisto pladojn da rostitaj viandaĵoj, kiujn ili estis postlasintaj de la manĝo je l'antaŭa tago; post tio li rapide amasigis panon en la korbetojn kaj miksis mioldolĉan vinon en kuvo; post tio li sidiĝis kontraŭe de l'dieca Odusseus. Ĉiuj nun etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj refreŝigaj manĝaĵoj.

55 Sed kiam ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam Telemachos alparolis la diecan porkpaŝtiston:

„Paĉjo! de kie venis ĉi tiu gasto? Kiel la ŝipanaro lin kondukis al Ithaka? Al kiu popolo ili sin gloris aparteni? Ĉar mi opinias, ke li neniel piede ĉi tien venis.”

60 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios: „Certe mi ĉi ĉion, ho kara infano! tute laŭvere rakontos al vi. Li sin gloras esti devena el la vasta Kreta kaj li diras, ke li vagadante travojaĝis multajn urbojn de mortidevuloj; tiel ja destinis al li demono. Sed nun li estas forkurinta el ŝipo de viroj Thesprotaj kaj li estas veninta al mia dometo kaj mi

65 lin nun al vi transdonas. Agu kiel vi volas; sed li sin gloras esti via peteganto.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Eumaios! vere, tre malĝojigaj estas la vortoj, kiujn vi

70 parolis; ĉar kiel mi povos akcepti tiun fremdulon en mia loĝejo? Mi mem ankoraŭ juna estas kaj ankoraŭ ne povas fidi miajn manojn por defendi lin kontraŭ la viro, kiu unua lin ofendas; kaj la koro de mia patrino pripensadas en ŝia animo, dum ŝi tamen ne decidi povas, ĉu ŝi restos tie ĉe mi kaj zorgos pri

75 la domo, respektante la edzecan liton kaj timante la malbonfamon inter la popolo, aŭ ĉu ŝi nun jam sekvas la viron, kiu en ŝia domo estas la plej eminenta el ĉiuj Aĉaiaj amantoj kaj donas donacojn plej multajn. Sed tamen mi vestos tiun fremdulon, ĉar li venis al via loĝejo, per belaj vestoj, per

80 mantelo kaj subvesto, kaj mi donos al li glavon ambaŭflanke tranĉipovan kaj sandalojn por la piedoj kaj mi lasos lin foriri, kien liaj koro kaj animo lin instigas iri. Sed se vi volas, tiam lin retenu en via dometo kaj prizorgu lin; vestojn mi sendos ĉi tien kaj ankaŭ ĉiun nutraĵon por liaj manĝoj, por ke li ne malriĉigu vin kaj viajn kunulojn. Sed tien, inter la amantojn,

85 mi ne lasus iri lin: ĉar tro granda estas ilia senbrida trokuraĝo; mi timas, ke ili lin insultus kaj tio por mi estus terura ĉagreno. Sed estas malfacile, eĉ por forta viro, fari ion, kiam oni staras

kontraŭ pli multnombraj, ĉar ili ja estas multe pli potencaj.”

- 90 Lin siavice alparolis la persistema dieca Oduseus:  
 „Amiko! ĉar estas ja ankaŭ al mi permesite kunparoli:  
 vere, mia koro disŝiriĝas dum mi aŭdas, kiajn trokuraĝajn  
 farojn efektivigas — laŭ tio, kion vi diras — la amantoj en  
 via domo, kontraŭ la volo de vi, kiu tamen estas tiel brava.
- 95 Diru al mi, ĉu libervole vi subigas vin, aŭ ĉu la homoj en la  
 tuta lando vin malamas, obeante la voĉon de Diaĵo, aŭ ĉu  
 vi eble kulpigas viajn fratojn, al kiuj ja fidas viro en la batalo,  
 eĉ se granda malpaco ekestas. Ho! se mi kun mia propra kuraĝo  
 100 estus same juna kiel vi, aŭ se mi estus la filo de l'neriproĉebla  
 Oduseus aŭ se mi estus li mem, [— ho, ke li revenus de sia  
 vagado, ĉar estas ankoraŭ eble esperi —] ke tiam tuj detranĉus  
 al mi la kapon fremdulo, se mi ne fariĝus por ĉiuj tiuj amantoj  
 pereiga, [post kiam mi estus enirinta en la domon de l'Laert-  
 105 -ido Oduseus]. Kaj eĉ se ili kaŭze de sia multnombro min  
 subigus, ĉar mi estus sola, tiam mi tamen preferus morti,  
 pereigite en mia propra domo, ol senĉese vidi tiujn hontindajn  
 farojn, [ke fremduloj estas malkaresataj kaj ke ili hontind-  
 maniere treneĝadas tra la bela domo la servajn virinojn],  
 110 ke la vino estas tute fortrinkata kaj ke ili tuttrankvile forman-  
 ĝadas senĉese la manĝaĵojn kaj iliaj malbonagoj neniam finiĝas.”  
 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:  
 „Certe, fremdulo, mi ĉi ĉion tute laŭvere rakontos al vi.  
 Neniel la tuta popolo min malamas kaj kondutas malamike  
 115 kun mi, nek mi kulpigas miajn fratojn, al kiuj ja fidas viro en  
 la batalo, eĉ se granda malpaco ekestas. Ĉar nur ununurajn  
 idojn donis al nia gento la Kron-ido: Arkeisios naskigis kiel  
 filon nur Laertes; kaj sola filo de de sia patro estis ankaŭ  
 120 Oduseus; kaj kiel solan filon ankaŭ min postlasis en sia loĝejo  
 Oduseus, sed li ne havis plezuron pro mi. Ĉar ĉiuj, kiuj regas  
 kiel princoj super la insuloj, super Doulichion kaj Samos kaj  
 la multarbara Zakunthos, kaj ĉiuj, kiuj potencas super la rokeca  
 125 Ithaka, ili ĉiuj sin svatas al mia patrino kaj fordiboĉas mian  
 domon. Kaj ŝi nek rifuzas la malamindan geedziĝon, nek povas  
 decidi al ĝia efektivigo. Kaj dume ili malriĉigas festenante  
 mian domon. Baldaŭ ili ankaŭ pereigos min mem. Sed certe,  
 ĉi ĉio kuŝas sur la genuoj de l'Dioj. — Paĉjo, nun rapide iru  
 130 kaj diru al la saĝa Penelope, ke mi estas sendifekta kaj revenis  
 el Pulos. Sed mi ĉi tie restos. Sed nur ŝin informu kaj tiam  
 revenu ĉi tien; neniu el la aliaj Aĉaioj aŭdu pri ĝi; ĉar multaj  
 intencas kontraŭ mi malbonon.”



- 135 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:  
 „Mi aŭdas kaj komprenas vin. Vi tion ordonas al mi, dum  
 mi jam intencis fari ĝin. Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj rakontu  
 ĝin lauve, ĉu mi en tiu sama irado ankaŭ kiel kuriero iru  
 al la malfeliĉa Laertes, kiu ĝis nun, kvankam ege malĝojante  
 pro Odusseus, tamen ĉiam kontrolis la kamplaboron kaj kun  
 140 la servistoj trinkis kaj manĝis en sia domo, sed nun, de post  
 kiam vi foriris per la ŝipo al Pulos, laŭdire estas ankoraŭ ne  
 manĝinta kaj trinkinta kiel kutime, nek rigardinta al la  
 kamplaboro, sed, kun ĝemoj kaj plendoj vekriante, li tie sidadas  
 145 kaj dume la karno ĉirkaŭ liaj ostoj konsumiĝas.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

- „Des pli ĉagrene; sed tamen, kvankam kun malĝoja koro,  
 ni devas lin lasi kun lia doloro; ĉar se eble estus al la morti-  
 devuloj ĉion elekti mem, tiam ni unue elektus la tagon de  
 150 l'reveno de mia patro. Tial tuj revenu, post kiam vi estos  
 informinta mian patrinon kaj ne vagiru tra la kampoj por serĉi  
 Laertes, sed diru al mia patrino, ke plej baldaŭ ŝi sekrete  
 instigu la servan mastrumistinion, ke ŝi iru al li; ŝi ja povas  
 informi la maljunulon.”

- Li parolis kaj instigis la porkpaŝtiston; ĉi tiu prenis en la  
 155 manojn la sandalojn kaj, liginte ilin sub la piedojn, li iris  
 al la urbo.

- Dume ne restis nerimarkita al Athene la porkpaŝtisto Eumaios,  
 foriranta el la loĝejo, kaj ŝi nun venis apuden; rilate la staturon  
 ŝi similis al virino, bela kaj altkreska kaj sperta je brila laboro.  
 Ŝi haltis antaŭ la pordo de l' dometo kaj sin montris al Odusseus,  
 160 sed Telemachos ne vidis ŝin kontraŭe de si kaj ne rimarkis  
 ŝin — ĉar neniel al ĉiuj sin montras videblaj la Dioj — sed  
 nur Odusseus vidis ŝin kaj ankaŭ la hundoj, sed ili ne ekbojis  
 sed grumblante forkuris al la alia flanko de l' korto. Nun ŝi  
 donis al li signon per la okulharoj kaj la dieca Odusseus ĝin  
 165 rimarkis kaj li iris el la dometo ĝis preter la alta muro de l' korto  
 kaj tie haltis antaŭ ŝi. Kaj lin alparolis Athene:

- „Didevena Laert-ido, elpenslerta Odusseus! nun rakontu  
 al via filo la tutan veron kaj nenion kaŝu al li, por ke vi ambaŭ,  
 projektinte la morton kaj la mortosorton kontraŭ la amantoj,  
 170 iru al la glorega urbo. Ankaŭ mi mem ne longan tempon estos  
 for de vi, ĉar arde mi deziras al la batalo.”

Ŝi parolis kaj ektuŝis lin per sia ora bastono Athene. Unue  
 ŝi metis ĉirkaŭ lian bruston bellavitan mantelon kaj subveston  
 kaj ŝi pligrandigis lian staturon kaj lin faris pli juneca; denove



175 li estiĝis brunhaŭta kaj liaj vangoj sensulkiĝis kaj la barboharoj ĉirkaŭ lia mentono estiĝis malhelaj. Kiam ŝi estis tiel aginta, ŝi iris returne kaj Oduseus iris en la dometon. Mire lin alrigardis lia kara filo, sed ektiminte li deturnis siajn okulojn  
180 al alia direkto, pro timo ke li estas Diaĵo. Kaj lin alparolante, li diris la flugilhavajn vortojn:

„Aliforme vi al mi aperis ĵus, fremdulo, ol antaŭe kaj aliajn vestojn vi alhavas kaj via haŭto ne plu estas sama. Certe vi estas iu el la Diaĵoj, kiuj enloĝas la vastan ĉielon. Sed estu bonfavora, por ke ni al vi donu agrablajn oferojn kaj orajn  
185 donacojn, arte prilaboritajn; sed nin indulgu.”

Lin post tio respondis la persistema dieca Oduseus:

„Mi tute ne estas iu Diaĵo; kial vi min komparas kun la senmortuloj? Sed via patro mi estas, pro kiu vi ĝemante suferas multajn dolorojn, subigante vin al la perfortaĵoj de tiuj viroj.”  
190 Tiel parolinte, li kisis sian filon kaj de siaj vangoj li lasis nun flui la larmojn, kiujn li antaŭe ĉiam konstante estis reteninta. Sed Telemachos — ĉar ankoraŭ li ne estis konvinkita, ke li estas lia patro — denove lin respondante alparolis per la vortoj:

„Ne, vi certe ne estas mia patro Oduseus, sed demono,  
195 kiu min volas trompi, por ke mi ankoraŭ pli multe vekriante ĝemadu. Ĉar neniumaniere mortdestina viro povus per sia propra intelekto ion tian efektiviĝi, se ne Diaĵo, mem alproksimiĝinte lin, senpene lin farus laŭ sia volo junulo aŭ grizulo. Ĵus ja estis vi grizulo kaj mallukse vi estis vestita; sed nun  
200 vi similas al la Dioj, kiuj enloĝas la vastan ĉielon.”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Telemachos! tute ne decas al vi supermezure miri kaj miregi pro tio, ke estas via patro en la lando; ĉar certe ne venos ankoraŭ alia Oduseus ĉi tien krom mi mem, kiu tia, kia  
205 vi min vidas, multe suferinte kaj multe vagadinte, revenis en la dudeka jaro en la landon de miaj prapatroj. Sed tio, pri kio vi miras, estas la faro de l'militakiraĵon donanta Athene, kiu min tia faris, kia ŝi volis — ĉar tion ŝi kapablas — jen ŝi  
210 min faris simila al almozulo, jen al juna viro, alhavanta ĉirkaŭ la korpo belajn vestojn. Facile ja estas por la Dioj, kiuj enloĝas la vastan ĉielon, plibeligi aŭ malbeligi mortdestinan homon.”

Tiel parolinte li sidiĝis; kaj tuj Telemachos ĉirkaŭbrakis  
215 sian bravan patron kaj vekriis, verŝante larmojn kaj al ili ambaŭ vigliĝis la deziro al vekriado. Laŭte ili ĝemploris, ankoraŭ

pli ade plendante ol rabobirdoj, maragloj aŭ kurbungaj vulturoj, al kiuj kamparanoj forrabis la idojn, antaŭ ol ili estis flugkapablaj. Tiel ili ambaŭ verŝis kompatindajn larmojn de sub siaj okulharoj.

220 Kaj tiel estus malleviĝinta la lumo de l'suno, dum ili ĝemploradis, se ne rapide estus alparolinta Telemachos sian patron:

„Kaj sur kia ŝipo, kara patro! do kondukis vin la ŝiparo ĉi tien al Ithaka? Al kiu popolo ili sin gloris aparteni? Ĉar mi opinias, ke neniel vi venis ĉi tien piede.”

225 Lin siavice alparolis la persistema dieca Oduseus:

„Certe mi rakontos al vi, ho kara infano, la veron. La ŝipfamaj Phaiakoj min alkondukis, kiuj ankaŭ aliajn virojn kutimas akompani, kiu ajn al ili venas; kaj ili min dormanta sur la rapida ŝipo kondukis trans la maron kaj min kuŝigis

230 en Ithaka kaj brilajn donacojn ili donis al mi, kupron kaj oron multamase kaj teksitajn vestojn. Ĉi ĉio kuŝas en kaverno laŭ la konsilo de l'Dioj; sed nun mi venis ĉi tien laŭ la indiko de Athene, por ke ni interkonsiliĝu pri la pereigo de tiuj

235 malamikecaj viroj. Sed nu, denomburu kaj diru al mi la nombron de l'amantoj, por ke mi sciu kiom kaj kiaj viroj ili estas; tiam mi konsideros kaj pripensos en mia neriproĉebla animo, ĉu ni ambaŭ, sen la helpo de aliaj, kapablos kontraŭstari al ili, aŭ ĉu ni devos serĉi aliajn helpontojn.”

240 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Patro, estas vere, ke ĉiam mi aŭdis pri via granda famo, ke vi estas bonega lanchatalisto pro viaj fortaj manoj kaj sagaca je la konsiliĝo; sed nun tro brave vi parolis; mirego min ekkap-

245 tas: ĉar estus ja tute neeble, ke du viroj kontraŭbatalus multajn fortulojn. Ĉar envere ne estas nur deko da amantoj, nek duoble tiom da ili; sed multe pli multaj. Baldaŭ vi tie ekscios la nombron. [El Doulichion estas kvindek du eminentaj junuloj kaj ses servistoj ilin sekvas; el Samos estas dudek kvar viroj,

250 el Zakunthos dudek Achaiaj junuloj kaj el Ithaka mem dek du, ĉiuj eminentuloj; kaj ankaŭ kun ili estas la heroldo Medon kaj la dieca kantisto kaj du servistoj, lertaj je la detranĉado de viando]. Se ni ekbatalus kontraŭ tiuj ĉiuj en la domo,

255 tiam mi timas, ke estus tre amara kaj terura por vi la venĝo pro iliaj perfortaĵoj. Tial konsideru, ĉu vi povos elpensi iun kunhelponton, kiu kun bonfavora animo volos nin asisti.”

Lin siavice alparolis la persistema dieca Oduseus:

„Certe mi tion diros al vi, sed vi atentu kaj aŭskultu je mi,

260 kaj pripensu, ĉu sufiĉos al ni ambaŭ Athene kune kun patro Zeus, aŭ ĉu mi ankoraŭ pensu pri alia helpanto."

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Vere, taŭgaj helpantoj estas ambaŭ tiuj, kiujn vi nomas,  
265 alte sidantaj en la nuboj kaj kiuj superas ankaŭ la aliajn homojn kaj la Diojn senmortajn."

Lin siavice alparolis la persistema dieca Oduseus:

„Certe ne longan tempon tiuj ambaŭ estos for de l'varma batalo, kiam inter la amantoj kaj ni en mia domo estos decida  
270 data la furioza interbatalo. Sed vi nun iru je la komenco de l'tagiĝo hejmen kaj vin miksu inter la trokuraĝajn amantojn. Sed min post tio kondukos al la urbo la porkpaŝtisto, dum mi estos simila al mizera almozisto kaj grizulo. Kaj se ili malhonoros min eĉ nia loĝejo, tiam via koro toleru en la brusto,  
275 se malbonon mi suferos, eĉ se ili je la piedoj eksteren min trenegos tra la domo aŭ min ĵetos per iu objekto; tiam vi toleru, tion vidante. Sed tamen vi povas ilin alparoli per afablaj vortoj kaj insisti, ke ili ĉesigu sian senprudentan agadmanieron;  
280 sed ili ja tamen ne persvadiĝos; ĉar jam proksimiĝas al ili la fatala tago. [Sed nun mi diros ion alian al vi, kaj vi pri tio atentu en via spirito: tuj kiam la multkonsila Athene tion inspiras al mia spirito, mi donos al vi signon per la kapo kaj tion rimarkinte tuj forprenu ĉiujn militbatalilojn kiuj kuŝas  
285 en la ĉambrego kaj ĉiujn kune deponu en la internon de l'alta armilejo; kaj kiam la amantoj, rimarkante ilian foreston, eldemandos vin, tiam ilin trompu per afablaj vortoj: „mi ilin forprenis el la fumo, ĉar ili ne similas plu al la armiloj, kiujn iam Oduseus, forirante al Troia, postlasis, sed malheligiĝis ĉiuj, kiujn atingis la fumo de l' fajro. Krome la Kron-ido ankoraŭ inspiris en mian spiriton ĉi tiun pli gravan ekpenson, ke vi ne iel, vinebriiĝinte, komencu inter vi malpacon kaj vundu unu la alian kaj tiel hontindigu la manĝon kaj vian svatiĝadon; ĉar la fero el si mem altiras jam la virojn." Sed  
290 nur por ni ambaŭ vi postlasu du glavojn kaj du lancojn kaj prenu en la manojn du bovledajn ŝildojn, por ke ni povu ilin ekkapti, kiam ni kuratakos; kaj tiam Pallas Athene kaj la konsilodona Zeus konfuzos ilin]. Sed nun mi diros ion alian al vi kaj vi  
300 pri tio atentu en via spirito: se vere vi estas mia filo kaj devena el mia sango, tiam lasu neniun ekscii, ke Oduseus estas en la lando. Nek Laertes ĝin do sciu, nek la porkpaŝtisto, nek iu el la servistoj, nek Penelope mem, sed solaj vi kaj mi unue ekkonu la inklinon de l' virinoj. Ankaŭ ni povas ankoraŭ

305 provi kelkiujn el la servaj viroj, por ekscii, kiuj nin ambaŭ eble ankoraŭ honoras kaj respektas en sia animo kaj kiuj ne atentis nin kaj malestimas vin, kiu tamen estas tiel brava."

Lin respondante alparolis lia brilglora filo:

„Patro! mi opinias, ke vi certeposte ekkonos mian karakteron, 310 ĉar neniel min regas facilanimeco, sed tamen mi kredas, ke tia provo tute ne estos profitiga al ni ambaŭ: sed mi petas, ke vi mem pripensu tion. Longan tempon vi ja rondirados senutile, se vi volas ĉiun provi kaj kontroli la kamplaboron; kaj dume 315 kviete ili fordiboĉas trokuraĝe niajn posedaĵojn en la domo kaj indulgon ili ne havas. Sed tamen mi konsilas al vi ekscii pri la virinoj, kiuj vin malestimas kaj kiuj senkrimaj estas. Sed rilate al la viroj en la brutejoj mi dezirus, ke ni ne provu 320 ilin nun, sed faru tion poste, kiam vi estos vidinta veran antaŭsignon de l'egidporta Zeus."

Tiel ili interparolis pri ĉi ĉio unu kun la alia.

Dume en Ithaka albordiĝis la fortike ĉarpentita ŝipo, kiu estis portinta el Pulos Telemachos kaj ĉiujn kunulojn. Kiam ili estis alvenintaj ene de la profundega haveno, tiam ili trenis 325 la nigran ŝipon sur la firman teron kaj iliaj grandkuraĝaj servistoj forportis la ilaron kaj tuj transportis la belegajn donacojn al la domo de Klutios. Kaj ili antaŭsendis al la domo de Oduseus heroldon, por porti la sciigon al la tre prudenta 330 Penelope, „Telemachos estas en la lando kaj ordonis, ke la ŝipo pluen veturu al la urbo," por ke la potenca reĝino ne, kun maltrankvilo en la koro, verŝu sentoplenajn larmojn. Ambaŭ, la heroldo kaj la dieca porkpaŝtisto, reciproke sin renkontis por sciigi al la virino unu saman komunikon. Kaj 335 kiam ili estis atingintaj la domon de l' dieca reĝo, tiam la heroldo meze de ŝiaj servistinoj diris al ŝi:

„Jam estas reveninta, ho reĝino! via kara filo."

Post tio la porkpaŝtisto, proksimiĝinte, diris al Penelope ĉion, kion ŝia kara filo estis ordoninta, ke li diru. Sed kiam li 340 estis tute komunikinta sian komision, tiam li reiris al la porkoj kaj forlasis la ĉambregon kaj la korton.

Sed la amantoj ĉagreniĝis kaj en sia koro malgajiĝis kaj ili iris el la ĉambrego ĝis ekster la alta muro de la korto kaj tie sidiĝis antaŭ la pordo.

345 Inter ili ekparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

„Amikoj! Vere grava faro trokuraĝe estas plenumita de Telemachos je ĉi tiu vojaĝo kaj tamen ni opiniis, ke ĝi ne estos finfarata de li. Nu do! ni trenu en la maron nigran ŝipon, la

plej bonan, kaj ni en ĝin kolektu remkapablajn maristojn,  
 350 por ke ili plej rapide komuniku al la embuskantoj, ke ili  
 senprokraste revenu hejmen.”

Ankoraŭ ne tute estis findirita lia parolo, kiam Amphinomos,  
 sin turnante de sia loko, subite vidis la ŝipon, jam ene de la  
 profundega haveno, dum ili jam malhisis la velojn kaj havis  
 la remilojn en la manoj. Kaj gaje ekridante, li parolis meze  
 de siaj kunuloj:

355 „Ni ne plu bezonas rapide sendi komunikon, ĉar jen, jam  
 ili estas en la haveno. Certe iu el la Dioj tion al ili diris, aŭ  
 eble ili vidis preterveturi la ŝipon, sed ĝin ne povis atingi.”

Tiel li parolis kaj ekstarinte ili kuris al la bordo de la maro;  
 tie ili trenis rapide la nigran ŝipon sur la firman teron kaj iliaj  
 360 grandkuraĝaj servistoj forportis la ilaron. Post tio la amantoj  
 ĉiuj kune iris al la kunvenejo kaj neniun, nek el la junuloj  
 nek el la grizuloj, ili lasis kunsidi inter ili. Nun meze de ili  
 parolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

„Mirinde, kiel la Dioj ĉi tiun viron liberigis de pereol  
 365 Dumtage sidis sur la ventecaj montopintoj spionoj, senĉese,  
 unu post la alia. Kaj post kiam la suno estis malleviginta,  
 ni neniam pasigis la nokton sur la firma tero, sed veturante  
 per la rapida ŝipo sur la maro, ni atendis la diecan tagiĝon,  
 embuskante kontraŭ Telemachos por lin kapti kaj mortigi.

370 Kaj tamen lin dume evidente rekondukis demono hejmen.  
 Sed ni ĉi tie projektis morton malĝojan kontraŭ tiu Telemachos  
 kaj ke li ne elsavu sin. Ĉar mi opinias, ke ne estos atingata  
 nia celo, dum li ankoraŭ vivas. Li mem ja saĝa estas je

375 konsiliĝo kaj prudento kaj la popolo tute ne plu ŝatas montri  
 komplezon al ni. Nu do, ni agu, antaŭ ol li kolektos la Aĉaiojn  
 al kunveno. Ĉar mi ne opinias, ke li hezitos, sed li daŭrigos  
 sian koleron kaj meze de ĉiuj ekstarante, li diros, ke ni projektis

380 kontraŭ li minacan morton, sed ne ekkaptis lin. Kaj ili, aŭdante  
 tiun malbonan faron, ne aprobos ĝin. Se nur ili ne plenumos  
 ion malbonan kontraŭ ni kaj nin forpelos el nia propa lando,  
 tiel ke ni devos iri al la lando de aliaj homoj! Sed tial ni antaŭe  
 lin mortigu sur la kamparo malproksime de la urbo, aŭ kiam

385 li survoje estos ĉi tien; kaj lian posedon kaj liajn trezorojn  
 ni konvene dividu inter ni kaj ilin konservu por ni mem, sed  
 lian loĝejon ni povus doni kiel proprajon al lia patrino kaj al  
 tiu, kiu edziĝos kun ŝi. Sed se mia parolo al vi malplaĉas kaj  
 se vi preferas, ke li restu viva kaj konservu sian tutan prapatran

390 heredaĵon, tiam ni ne plu tie kunvenu kaj fordiboĉu liajn

abundajn korgojigajn havaĵojn, sed ĉiu klopodu de el sia propra domo svatiĝi al ŝi per edziĝdonacoj. Kaj tiam ŝi edziniĝu kun tiu, kiu al ŝi proponas plej multnombrajn donacojn kaj venas al ŝi laŭ la destino de l'sorto."

Tiel li parolis, sed ĉiuj restis senbrujaj kaj silentaj. Fine meze de ili ekparolis kaj diris Amphinomos, la brilglora filo de Nisos, la ido de l'reĝo Aretos, kiu estis la ĉefa el la amantoj el la multtritika kaj herboriĉa Doulichion kaj ankaŭ per siaj vortoj tre plaĉis al Penelope, ĉar li posedis bonan intelekton. Ĉi tiu bonvole ekparolis kaj diris meze de ili:

400 „Amikoj! mi tamen tute ne volus mortigi Telemachos; ĉar estas abomene mortigi iun de reĝa deveno; sed unue ni demandu pri la decidoj de la Dioj. Kaj se ĝin aprobas la diaj leĝoj de l'granda Zeus, tiam mi mem mortigos lin kaj mi konsilos tion ankaŭ al ĉiuj aliaj. Sed se la Dioj ĝin malŝatas, tiam mi vin instigas ĉesigi viajn intencojn."

Tiel parolis Amphinomos kaj al ili plaĉis lia parolo. Tuj post tio ili ekstaris kaj iris al la domo de Oduseus kaj tie alveninte, ili sidigis sur la glatpoluritajn seĝojn.

Nun ion alian ekpensis la tre prudenta Penelope, nome aperi 410 antaŭ la amantoj kun ilia sentima trokuraĝo. Ĉar en sia ĉambro ŝi eksciis pri la pereco, kiu minacis ŝian filon. Ĝin estis ja dirinta al ŝi la heroldo Medon, kiu estis eksciinta iliajn intencojn. Rapide ŝi iris al la porvira ĉambrego kun siaj servaj virinoj. 415 Sed kiam ŝi, la dieca inter la virinoj, estis veninta ĉe la amantoj, tiam ŝi haltis flanke de l'pordokadro de l'fortike ĉarpentita ĉambrego, post kiam ŝi antaŭe estis ŝovinta antaŭ siajn vangojn la briletan vualon, kaj ŝi riproĉis Antinoos kaj diris la vortojn kaj parolis:

„Trokuraĝa Antinoos, malbonfaranto! estas vere, ke oni diras inter la popolo de Ithaka, ke vi estas el ĉiuj samaĝanoj 420 la plej bona je interkonsiliĝo kaj paroloj. Sed montriĝas, ke tia vi ne estas. Frenezulo, kial vi do elpensas kontraŭ Telemachos morton kaj pereon [kaj ne pri tiuj zorgas, kiuj vin petege proksimiĝas kaj kiuj ja estas protektataj de Zeus]? Krome ne estas permesite, ke unu al la alia faru malbonon. Aŭ ĉu vi ne plu scias pri la tempo, kiam via patro rifuĝante 425 ĉi tien venis kiel peteganto, ĉar li timis la popolon? Ĉar terure ĝi estis koleriĝinta, ĉar li, akompanante Taphiajn rabistojn, mizerigis la Thesprotojn; ĉar ĉi tiuj estis amikoj al ni. Lin ili volis mortigi kaj forŝiri lian koron kaj fordiboĉi liajn multajn 430 kaj abundajn havaĵojn; sed Oduseus ilin malhelpis kaj detenis,



kvankam ili arde deziris venĝi. Kaj nun vi fordibočas senrepage liajn propraĵojn kaj svatiĝas al lia edzino kaj volas mortigi lian filon kaj ege vi ĉagrenas min. Sed mi konsilas al vi ĉesigi kaj instigi al tio la aliajn.”

Lin siavice alparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

- 435 „Filino de Ikarios, tre prudenta Penelope! Ekkuraĝu: pri tio ne maltrankviliĝu en via animo. Ne ekzistas tia viro kaj neniam li ekzistos aŭ naskiĝos, kiu metus manon al via filo Telemachos, almenaŭ ne, dum mi ankoraŭ vivas kaj vid-
- 440 kapablas sur la tero. Ĉar tiel mi parolas, kaj vere, estos plenumate: baldaŭ tiam lia nigra sango fluos ĉirkaŭ nia lancopinto, ĉar ankaŭ min la urbruiniga Odusseus ofte sidigis sur siajn genuojn kaj donis en miajn manojn rostitan viandon kaj havigis
- 445 ruĝan vinon: tial Telemachos estas multsupere plej kara inter ĉiuj viroj al mi kaj mi konsilas al li neniel timi la morton, almenaŭ ne de l'flanko de la amantoj; sed eviti la morton venantan de la Dioj ne estas eble.”

„Tiel li parolis por kuraĝigi ŝin; sed tamen li mem projektis kontraŭ li pereon.

- 450 Tiam ŝi iris returne supren al sia brila supretaĝa ĉambro kaj tie priploris sian edzon Odusseus, ĝis kiam la fajrŝprucokula Athene ŝutis dolĉan dormon sur ŝiajn palpebrojn.

- Je vesperiĝo venis la dieca porkpaŝtisto al Odusseus kaj lia filo; ĝuste ili starante preparis la vespermanĝon, post kiam ili estis buĉintaj unujaran virbovon. Sed Athene, proksimi-
- 455 ĝinte al la Laert-ido Odusseus, lin dume estis ektuŝinta per sia bastono kaj refarinta lin grizulo kaj lian korpon revestinta per malluksaj vestoj, por ke la porkpaŝtisto ne rekonu lin, vidante lin antaŭ si, kaj ne iru al la sagaca Penelope por tion sciigi, anstataŭ teni la sekreton en sia spirito.

- 460 Kaj tiam unua Telemachos diris al li la vortojn:

„Ĉu vi do revenis, dieca Eumaios? Pri kio oni parolas en la urbo? Ĉu jam estas en la urbo la kuraĝaj amantoj, reveninte el la embusko, aŭ ĉu ili tie ankoraŭ volas min haltigi, dum mi jam hejme estas?”

Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

- 465 „Ne interesis al mi pri tio esplori kaj demandi, kiam mi trairis la urbon. Mia koro min instigis, plej rapide reiri ĉi tien, post kiam mi estis alportinta mian komunikon. Sed kune kun mi alvenis rapida sendito de viaj kunuloj, kuriero, kiu unua diris al via patrino la sciigon. Sed cetera mi almenaŭ
- 470 scias la jenon, ĉar mi ĝin vidis per propraj okuloj. Jam mi



marŝis, reirante, ekster la urbo, kie kuŝas la monteto de Hermes, kiam mi vidis rapidan ŝipon veturanta en nian havenon. Multaj viroj estis sur ĝi. Ĝi estis plena de ŝildoj kaj dupintaj lancoj; 475 kaj mi opiniis, ke jen ili estas, sed certe mi ne scias ĝin.”

Tiel li parolis; kaj ridetis la forta, kuraĝa Telemachos dum li ekrigardis per siaj okuloj al sia patro, sed li evitis la rigardon de la porkpaŝtisto.

Kaj kiam ili estis sian laboron finintaj kaj preparintaj la manĝon, tiam ili manĝis kaj nenies koro malhavis sian justan 480 parton de la manĝo. Sed kiam ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam ili pensis pri la enlitiĝo kaj ĝuis la donacon de l'dormo.

---

## DEK SEPA KANTO.

### TELEMACHOS IRAS URBON.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam Telemachos, la kara filo de l'dieca Oduseus, ligis sub la piedoj la belajn sandalojn, kaptis sian fortikan lancon, kiu havis la 5 ĝustan formon por liaj manoj kaj tiam, arde dezirante al la urbo, li diris al sia porkpaŝtisto:

„Paĉjo, mi nun iros al la urbo, por ke min vidu mia patrino; ĉar mi opinias, ke ŝi ne ĉesigos sian ploradon kaj malĝojan ĝemadon, antaŭ ol ŝi estos vidinta min mem; sed antaŭe mi 10 ordonas al vi jene. Konduku tiun mizeran fremdulon al la urbo, por ke li tie almozpetu manĝon. Kaj kiu volas, ja donos al li tritikopanon kaj tason da trinko; sed al mi neniel eble estas toleri ĉiajn homojn, dum mi mem ĉagrenojn havas en la animo. Kaj se la fremdulo pro tio eble tre koleriĝos, tiam 15 por li estos des pli malĝojige; ĉar estas al mi plaĉe, diri la veron.”

Lin respondante alparolis la elpansema Oduseus:

„Amiko! ankaŭ mi mem deziras ne plu esti retenata: estas por almozulo pli profitodone almozpeti tra la urbo kaj tra la kamparo sian manĝon. Kaj kiu volas, ja iom donos al mi. Ĉar 20 mi ne plu havas tian aĝon, ke mi povas resti en la brutejo, [tiel, ke mi povos obei je ĉio al la ordonoj de l'mastro]. Tial kviete foriru; tre baldaŭ ĉi tiu viro, al kiu vi donis la ordonon, min urben kondukos, kiam mi estos varmiginta min ĉe la fajro

kaj estos veninta la sunovarmo. Ĉar terure ĉifonaj estas miaj  
 25 vestoj; mi timas, ke la matena prujno min ekkaptos. Kaj vi  
 ja diras, ke la urbo kuŝas malapude.”

Tiel li parolis; kaj Telemachos foriris tra la korton, rapide  
 paŝante per la piedoj, kaj li projektis malbonon kontraŭ la  
 amantoj.

Sed kiam li estis atinginta sian bele kuŝantan loĝejon, tiam  
 li forportis sian lancon kaj starigis ĝin kontraŭ altan kolonon  
 30 kaj post tio li eniris kaj transpaŝis la ŝtonan sojlon. Lin multe  
 plej unua vidis lia mamnutrintino Eurukleia, kiu ĝuste estis  
 sternanta felojn sur la arte prilaboritaj brakseĝoj. Ekplorante ŝi  
 35 kuris rekte al li kaj ankaŭ la aliaj servistinoj de l'persistanima  
 kaj ŝultroj. Ĝuste venis el sia ĉambro la tre prudenta Penelope,  
 simila al Artemis aŭ al la ora Aphrodite kaj ekplorante ŝi  
 40 kapon kaj liajn ambaŭ okulojn belajn kaj plendante ŝi diris  
 al li la flugilhavajn vortojn:

„Ĉu vi do revenis, Telemachos, mia dolĉa pupilo? Mi jam  
 opiniis, ke neniam mi revidos vin, depost kiam vi estis foririnta  
 per la ŝipo al Pulos, sekrete kaj kontraŭ mia volo, por ekaŭdi  
 sciigon pri via kara patro. Nu do, rakontu al mi ĉion, kiel vi  
 ĝin vidis.”

45 Ŝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Mia patrino! ne igu min vekrii kaj ne ektuŝu mian koron  
 en la brusto: ĉar mi ja evitis la minacan pereon; sed vin lavu,  
 almetu purajn vestojn ĉirkaŭ vian korpon, [suriru kun viaj  
 servaj virinoj al la supretaĝa ĉambro] kaj promesu al ĉiuj  
 50 Dioj oferi sukcesodonajn hekatombojn, por provi, ĉu eble Zeus  
 plenumos agojn de puno. Sed nun mi iros al la kunvenejo, por  
 inviti fremdulon, kiu min akompanis, kiam mi venis ĉi tien.  
 Lin mi antaŭsendis kun miaj disimilaj kunuloj kaj mi petis  
 55 al Peiraios lin kunpreni al sia propra domo kaj zorge lin gastigi  
 kaj honori, ĝis kiam mi estos reveninta.”

Tiel li parolis kaj liaj vortoj estis bone atentataj de ŝi. Kaj  
 ŝi sin lavis, almetis purajn vestojn ĉirkaŭ sian korpon kaj  
 promesis al ĉiuj Dioj oferi sukcesodonajn hekatombojn por provi,  
 60 ĉu eble Zeus plenumos agojn de puno.

Telemachos dume estis paŝinta, portante la lancon en la  
 mano, tra la ĉambregon eksteren; kaj lin sekvis du rapidpiedaj  
 hundoj. Nun Athene ŝutis sur lin diecan gracion; pro tio la  
 tuta popolo lin admire rigardis, kiam li proksimiĝis. Kaj

65 kolektiĝis ĉirkaŭ lin la trokuraĝaj amantoj, afable parolantaj sed sekrete elpensantaj en sia koro malbonon. Sed li evitis la multnombran aron da ili, sed kie sidis Mentor kaj Antiphos kaj Halitherses, kiuj de la komenco estis amikoj de lia patro, 70 tien li iris kaj li sidiĝis ĉe ili; kaj ĉi tiuj pri ĉio al li demandis. Nun proksimiĝis al ili la lanĉfama Peiraios, kiu ĝuste tra la urbo kondukis la fremdulon al la kunvenejo. Ne plu longan tempon restis nun Telemachos malproksime de la fremdulo, sed li iris al li. Kaj tiam unua Peiraios diris al li la vortojn: 75 „Telemachos! rapide nun instigu viajn servajn virinojn iri al mia loĝejo, por ke mi al vi resendu la donacojn, kiujn al vi donis Menelaos.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Peiraios! ni ja ne scias, kiel finiĝos la afero: se la trokuraĝaj 80 amantoj min sekrete mortigos en mia loĝejo kaj mian tutan prapatran posedon dividos, tiam mi volas, ke vi mem konservu ilin kaj de ili ĝuu, pli volonte ol ke iu el ili ekhavos ilin. Sed se mi mortigon kaj mortosorton kontraŭ ili estos elpensinta kaj efektiviginta, tiam ĝojante ilin transportu al la domo de mi ĝojanta.”

Tiel parolinte li kondukis la multsuferintan fremdulon al 85 sia loĝejo. Kaj kiam ili estis atingintaj la bele kuŝantan loĝejon, tiam ili metis siajn mantelojn sur la apogseĝojn kaj brakseĝojn kaj poste, irante en la bele glatigitan banokuvon, ili sin lavis. Sed kiam la servistinoj estis ilin banintaj kaj oleintaj per olivoleo, tiam ili ĵetis ĉirkaŭ ilin lanajn mantelojn kaj sub- 90 vestojn kaj tiam ili iris el la banokuvo kaj sidiĝis sur la apogseĝojn. Nun servistino portis al ili akvon en bela, ora kruĉo kaj ĝin verŝis super arĝenta pelvo sur iliajn manojn por purigi tiujn kaj metis antaŭ ĉiu glatpoluritan tablon. Kaj la respektinda mastrumistino portis al ili panon kaj ĝin antaŭmetis, post kiam 95 ŝi estis alportinta ankoraŭ multajn aliajn manĝaĵojn, ĉar volonte ŝi donis el la provizo. Kontraŭe de ili sidiĝis lia patrino kaj sidante en sia apogseĝo flanke de l'pordokadro de la ĉambrego ŝi ŝpinis per delikataj lanfadenoj. Ambaŭ nun etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj manĝaĵoj. Sed kiam ili estis satigintaj sian avidon al trinko kaj manĝo, tiam meze 100 de ili ekparolis la tre prudenta Penelope:

„Telemachos! mi supreniros al la supretaĝa ĉambro kaj kuŝiĝos sur mia lito, kiu estiĝis multĝema al mi, ĉiam malseki- gata de miaj larmoj, de post kiam Odusseus foriris kun la Atre- ido al Ilion. Kaj tamen vi ne decidi povas, antaŭ ol la trokuraĝaj

105 amantoj estos revenintaj en ĉi tiun domon, klare sciigi, ĉu vi eble ion aŭdis pri la reveno de via patro.”

Ŝin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Nu do, mi rakontos al vi, patrino, la veron. Ni foriris al Pulos kaj Nestor, la reganto de la popoloj. Li min akceptis  
110 en sia alta domo kaj zorge min gastigis, same kiel patro sian filon, ĵus revenintan post longa foresto aliloke: tiel zorge li gastigis min kun siaj multgloraj filoj. Sed pri la persistanima Oduseus li diris neniam esti ekaŭdinta de iu el la surteruloj,  
115 ĉu li ankoraŭ vivas aŭ jam estas mortinta, sed li lasis forveturi min per siaj ĉevaloj kaj fortike kunmetita ĉaro al la Atre-ido, la lanefama Menelaos. Tie mi vidis la Argeian Helena, pro kiu la Argeioj kaj Troianoj laŭ la volo de la Dioj multe suferis.  
120 Tiam tuj al mi demandis Menelaos, bonega je la militkrio, pro kiu bezono mi venis al la dieca Lakedaimon; kaj mi rakontis al li la tutan veron. Kaj tiam li min respondante alparolis per la vortoj: „Ve! tutcerte ili deziris kuŝigi en la lito de viro  
125 kuraĝa, dum ili estas mem malfortaj. Kiel kiam cervino kuŝigas siajn ĵus naskitajn laktosučajn idojn en la kuŝejo de forta leono kaj post tio paŝtante esploras la herboriĉajn valojn; la leono  
130 tiam venas al sia kuŝejo kaj preparas malhonoran morton al patrino kaj idoj; tiel ankaŭ Oduseus preparos al ili malhonoran morton. Ke li ankoraŭ estus, ho patro Zeus kaj Athene kaj Apollon! tia, kia li iam en la bele konstruita Lesbos ekstaris kaj konkurse luktis kontraŭ Philomeleides kaj lin fortece  
135 teren ĵetis kaj ĉiuj Aĉaioj pro tio ĝojis — ho, ke Oduseus, ankoraŭ estante tiel forta, interbatalus kontraŭ la amantoj! Tiam ja ĉiuj baldaŭ trovus sian pereon kaj amariĝus iliaj edziĝoplanoj. Tion, pri kio vi nun demandas kaj petegas, mi certe ne diros malvarmete kaj evitante la veron kaj mi  
140 vin ne trompos; sed kion al mi rakontis la verema maljunulo de l'maro, de tio mi kaŝos neniun vorton al vi, nek ĝin prisilentos.

Ĉi tiu diris, ke li estas lin vidinta, dum li suferis fortajn dolorojn, en la loĝejo de l'nimfo Kalupso, kiu perforte retenadas lin. Kaj tial li ne povas atingi sian prapatran landon. Ĉar li  
145 ne disponas je ŝipoj remilhavaj kaj kunuloj, kiuj lin povus akompani sur la larĝa dorso de l'maro.”

Tiel parolis la Atre-ido, la lanefama. Kaj tion plenuminte mi reiris, ĉar favoran venton al mi donis la senmortuloj, kiuj rapide min kondukis al mia kara patrujo.”

150 Tiel li parolis kaj li tuŝis ŝian koron en la brusto. Tiam ankaŭ meze de ili ekparolis la disimila Theoklumenos:

„Respektinda edzino de l'Laert-ido Odusseus! Vere, li ne ĝuste scias ĉi ĉion, tial aŭskultu je miaj vortoj; laŭvere mi ja al vi profitos kaj nenion mi kaŝos. Nun sciuj unualoke inter  
 155 la Dioj Zeus kaj via gastama tablo kaj la kameno de l'neripro-  
 ĉebla Odusseus, al kiu mi rifuĝas, ke vere Odusseus jam estas  
 en sia prapatra lando, ie ajn restante, aŭ ŝtelirante, dum li  
 jam esploras pri tiuj malbonaj fifaroj kaj kontraŭ ĉiuj amantoj  
 li projektas jam pereon. [Ĉar tiel mi konkludis, kiam mi,  
 160 sidante sur la bonferdeka ŝipo, observis antaŭsignan birdon  
 kaj mi vokis ĝin al Telemachos].”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Ke estus, ho gasto, tiu parolo via plenumiĝonta: tiam vi  
 baldaŭ spertus mian amikecon kaj ricevus multajn donacojn,  
 165 tiel ke ĉiu, kiu vin renkontus, vin nomus feliĉega.”

Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al la alia.

Dume sin amasigis la amantoj antaŭ la domo de Odusseus,  
 ĵetante per ĵetdiskoj kaj ĉaslancoj, sur la malmola pavimo,  
 kie ili ankaŭ antaŭe kutimis montri sian trokuraĝon. Sed kiam  
 170 estis la tempo por la manĝo kaj venis el ĉiuj direktoj la ŝafoj  
 returne de la kampo, kondukataj de siaj ordinaraĵoj paŝtistoj,  
 tiam meze de ili parolis Medon — kiu plej multe el ĉiuj heroldoj  
 plaĉis al ili kaj ĉiam partoprenis al iliaj manĝoj —:

„Junuloj! ĉar vi ĉiuj estas amuzintaj vian koron per la  
 175 konkursoj, tial nun iru en la domon, por ke ni pretigu la manĝon:  
 ĉar ne malbone estas preni al si la manĝon je la ĝusta tempo.”

Tiel li parolis kaj ili ekstaris kaj foriris kaj obeis al liaj  
 vortoj: Sed kiam ili estis atingintaj la bele kuŝantan palacon,  
 tiam ili deponis siajn mantelojn sur apogseĝojn kaj brakse-  
 180 ĝojn; post tio la servistoj buĉis grandajn ŝafojn kaj grasajn  
 kaprinojn kaj ankaŭ ili buĉis grasigitajn porkojn kaj bovon  
 el la brutaro kaj per ĉi ĉio ili pretigis la manĝon.

Dume Odusseus kaj la dieca porkpaŝtisto rapidis por iri de  
 la kamparo al la urbo. Tiam inter ili unua ekparolis la pork-  
 paŝtisto, la ĉefulo el la servistoj:

185 „Gastamiko! ĉar vi do deziras iri ankoraŭ hodiaŭ al la urbo,  
 kiel ordonis mia mastro — estas vere ke estus mi preferinta, ke  
 vi ĉi tie postrestus kiel gardanto de l'brutejo: sed mi respektas  
 kaj timas lin, por ke li min ne mallaŭdu poste: ĉar malagrablaj  
 190 estas la riproĉoj de mastroj — nu do, ni iru; ĉar grandparte  
 jam estas preterpasinta la tago kaj baldaŭ je la vesperiĝo  
 estos tro malvarme por vi.”

Lin respondante alparolis la elpensema Odusseus:

„Mi komprenas kaj rimarkas tion; mi jam intencis tion, kion vi ordonas. Nu do, ni iru kaj vi ĝisfine estu mia gvidanto.  
195 Sed, se eble vi havas bastonon ĝustforme tranĉitan, tiam ĝin donu al mi por apogi min sur ĝi, ĉar vi ja diris, ke la vojo estas tre glitiga.”

Li parolis kaj ĉirkaŭ siajn ŝultrojn li ĵetis la malpuregan dorsosakon, multloke ŝiritan; kaj ŝnuro servis kiel portrimeno.  
Kaj Eumaios donis al li la deziratan apogbastonon. Nun  
200 ambaŭ foriris kaj la brutejon gardis la poste restantaj hundoj kaj paŝtistoj. Kaj Eumaios kondukis al la urbo sian mastron, similantan al mizera almozulo kaj grizulo kaj apogantan sin sur bastono; kaj malluksaj estis la vestaĵoj, per kiuj li estis vestita ĉirkaŭ la korpo.

Sed kiam ili, marŝante sur la rokeca vojo, estis proksimaj  
205 al la urbo kaj estis alvenintaj ĉe la fortike cirkaŭbarita, bele fluanta fonto, el kiu la urbanoj kutimis ĉerpi akvon kaj kiun estis farintaj Ithakos kaj Neritos kaj Poluktor — kaj ĉirkaŭe estis sanktarbaro el tremoloj akvonutrataj, ĉiuflanke rond-  
210 forma kaj de sur alta roko fluis malsupren la malvarma akvo kaj supre sur la roko staris altaro de l'fontonimfoj, kie ĉiuj preterirantoj kutimis oferi — tiam ilin atingis Melantheus, la filo de Dolios, kiu ĝuste pelis al la urbo la kaprinojn, kiuj estis la plej bonegaj el ĉiuj aroj, por la manĝo de l'amantoj; kaj lin akompanis du aliaj paŝtistoj. Ilin vidante, li diris  
215 insultante terurajn kaj hontajn vortojn kaj li incitis la animon de Odusseus kaj parolis:

„Jen vere unu sentaŭgulo kuntrenas la alian sentaŭgulon, kiel ja ĉiam la Diaĵo kondukas samspeculon al samspeculo.  
220 Kien vi gvidas, malbeninda porkpaŝtisto! tiun manĝegulon, tiun ĝenan almozulon kaj aĉan malgajiganton de la manĝo? Ĉe multaj pordokadroj li haltos kaj li frotos kontraŭ ili siajn ŝultrojn, almozpetante panopecojn kaj ne glavojn nek pelvojn. Se nur vi donus lin al mi por resti kiel gardanto ĉe la brutejo kaj por esti mia stalservisto kaj por alporti foliaĵojn al la kapridoj,  
225 tiam li eble, trinkante selakton, ankoraŭ ricevus fortikajn femurojn. Sed ĉar efektive li lernis nur malbonajn aĵojn, tial li ne volas komenci laboradon, sed li preferas, kun kurbiĝinta dorso almozpetante inter la popolo, nutri sian nesatigeblan ventron. Sed ĉi tion mi eldiras al vi kaj estos ankaŭ plenumate:  
230 se li venos en la loĝejo de l'dieca Odusseus, tiam li estos de la pugnoj de l'viroj ĵetata per multaj piedbenketoj, kiuj ambaŭflanke senhaŭtigos kaj frotvundos liajn kapon kaj ripojn.”

Tiel li parolis kaj preterirante li eksaltis kaj en sia malsagego per la piedo lin frapis kontraŭ la kokson; tamen li ne  
 235 puŝis lin de la vojeto, sed firme ĉi tiu restis staranta. Kaj Oduseus pripensis, ĉu li lin postkuros kaj forprenos de li la vivon per la bastono, aŭ ĉu li levos lin de l'tero kaj frakasos lian kapon kontraŭ la teron; sed li toleris kaj eltenis en sia animo. Sed la porkpaŝtisto ofendinsultis Melantheus, lin rigardante ĝuste en la vizaĝon kaj etdante la manojn, li verve preĝis:

240 „Fontaj nimfoj, filinoj de Zeus! se iam Oduseus je via honoro forbruligis femurostojn de ŝafidoj kaj kapridoj, kovrante ilin per tavoloj da graso, tiam vi plenumu al mi ĉi tiun deziron: ke tiu viro revenu kaj iu Diaĵo lin ĉi tien konduku! tiam li  
 245 ĉesigus ĉiun fierecon vian, kiun vi kunportas impertinente, vi, kiu ĉiam vagadas tra la urbo; kaj dume netaŭgaj paŝtistoj pereigas la kaprinojn.”

Lin siavice alparolis Melanthios, la paŝtisto de l'kaprinoj:  
 „Ha, ha! kiel parolis tiu hundo, sperta pri pereigaĵoj!  
 250 certe mi lin iam el Ithaka forkondukos sur nigra ŝipo bonferdeka, por ke mi gajnu multan profiton per li. Ho, ke same certe Apollon, la Diaĵo kun arĝenta arkpafilo, ankoraŭ hodiaŭ pafmortigus Telemachos en lia domo, aŭ ke li same certe estus mortigata de l'amantoj, kiel por Oduseus perdiĝis malproksime de lia lando la tago de l'reveno.”

Tiel parolinte, li forlasis ilin, ĉar ili malrapide iris; sed li  
 255 rapide marŝis kaj tre baldaŭ atingis la palacon de l'reĝo. Tuj li eniris kaj sidigis meze de l'amantoj, kontraŭe de Eurumachos; ĉar ĉi tiun li plej multe ŝatis. Tiam la agemaj servistoj antaŭmetis al li lian porcion de la viandaĵoj kaj la respektinda mastrumistino alportis panon kaj ĝin antaŭmetis al li por manĝi.

Nun haltis Oduseus kaj la dieca porkpaŝtisto, proksimiĝinte  
 260 al la palaco kaj aŭdebliĝis al ili la sonoj de l'kava liro, ĉar ĝuste komencis kanti por ili Phemios. Tiam Oduseus, kaptante la manon de l'porkpaŝtisto, lin alparolis:

„Eumaios, tutcerte ĉi tio estas la bela palaco de Oduseus!  
 265 facile ĝi ja konebla estas laŭ la aspekto, ankaŭ inter multaj aliaj. Unu parto ja alligita estas al la alia kaj artplene per muro kaj listeloj la antaŭkorto estas alkonstruita kaj la pordego duparta estas fortike prilaborita; neniu viro kapabla ĝin perforti. Ankaŭ mi rimarkas, ke multaj viroj en ĝi preparas  
 270 festenon, ĉar rostodoro sin levas el ĝi kaj sonas en ĝi la liro, kiun la Dioj faris la kunulino de l'manĝo.”



- Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:  
 „Facile vi tion rimarkis, ĉar ankaŭ cetere vi ne estas sen-  
 prudenta. Sed nu do, ni pripensu, kiel nun ĉio okazos: unua  
 275 vi eniru la bele kuŝantan palacon kaj vin miksu inter la amantojn  
 dum mi ĉi tie postrestos; aŭ, se tion vi volas, vi ĉi tie atendu  
 kaj tiam mi antaŭen iros. Sed ne tro longan tempon ĉi tie  
 restu, por ke ne iu, rimarkante vin ekstere, vin ĵetu aŭ batu;  
 mi konsilas al vi ĉi tion pripensi.”
- 280 Lin post tio respondis la persistema dieca Oduseus:  
 „Mi komprenas kaj pripensas tion; mi jam intencis tion,  
 kion vi ordonas. Nu do, vi antaŭen iru, dum mi ĉi tie  
 atendos; mi tute ne sensperta estas pri batoj kaj ĵetoj. Sed  
 285 tolerema estas mia animo, ĉar multajn malbonojn mi suferis  
 sur la ondoj kaj en la milito; krom ĉi ĉio ankaŭ ĉi tio ankoraŭ  
 okazu. Sed neniel estas eble kaŝi la avidon de l'malsata  
 stomako pereiga, kiu al la homoj kaŭzas multajn malfeliĉojn  
 kaj pro kiu eĉ sipoj kun bonaj rembenkoj estas ekipataj por  
 veturi trans la senripoze ondantan maron, por alporti mizeron  
 al la malamikoj.”
- 290 Tiel ili parolis pri ĉi ĉio unu kun la alia.  
 „Sed kuŝis tie hundo kaj ĝi levis la kapon kaj orelojn,  
 Argos, la hundo de l'persistanima Oduseus, kiun li estis  
 iam mem elnutrinta, sed li ne profitis de ĝi, ĉar antaŭ ol tio  
 estis ebla, li jam estis foririnta al la sankta Ilion. Antaŭe  
 la junaj viroj kutimis ĝin kunpreni por ĉasi sovaĝajn kaprinojn  
 295 kaj cervojn kaj leporojn; sed nun, ĉar ĝia mastro forestis, ĝi  
 kuŝis malestimata sur granda amaso da sterko de muloj kaj bovoj,  
 kiu antaŭ la pordego de l'korto amase kuŝis, por ke la servistoj  
 ĉiufoje da ĝi forprenu, por sterki la grandan bienan kampon  
 300 de Oduseus. [Tie kuŝis la hundo Argos, plene kovrita de  
 hundpedikoj]. Sed nun, tuj kiam ĝi rekonis la proksimiĝantan  
 Oduseus, ĝi svingetis per la vosto kaj lasis pendi ambaŭ  
 orelojn, sed ĝi ne plu kapablis iri pli proksimen al sia mastro.  
 Tiam ĉi tiu, deturnante sian kapon, forviŝis larmon, senpene  
 305 tion kaŝante al Eumaios kaj tuj li eldemandis lin per la vortoj:  
 „Eumaios! vere, tre mirinde estas, ke tie kuŝas tiu hundo  
 sur la sterkamaso! Estas vere, ke ĝi havas belan staturon, sed  
 tamen mi ne certe povus diri, ĉu ĝi kun tiu bela aspekto  
 ankaŭ estis rapida je la kurado, aŭ ĉu ĝi estas nur tia, kiaj  
 la hundoj, kiuj estas nutritaj ĉe la tabloj de l'viroj kaj kiujn  
 310 la altranguloj nur kiel pompaĵon bone prizorgas.”
- Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Tutcerte, se tiu hundo de viro, mortinta malproksime de sia patrujo, estus ankoraŭ tia je eksteraĵo kaj laboroforto, kia ĝin postlasis Oduseus, irante al Troia, tiam vi baldaŭ  
 315 admire rigardus ĝian rapidecon kaj fortecon. Ĉar vere, neniu ĉasaĵo tiam sukcesis forkuri en la arbeto de l'densa arbaro, kiam ĝi ĝin persekutis; ankaŭ ĝi estis plej taŭga je la sekvado de postsignoj. Sed nun ĝi suferas pro mizereco, ĉar ĝia mastro pereis aliloke ekster sia patrujo kaj la malatentaj servistinoj  
 320 ne prizorgas ĝin. [Ĉar kiam la mastroj ne plu persone ilin bridas, tiam sklavoj ne plu inklinas al konvena laborado; ĉar la laŭttondra Zeus forprenas la duonon de l'devosento de viro, kiam lin atingas la tago de l'sklaveco].”

Tiel parolinte, li eniris la bele kuŝantan palacon kaj li iris  
 325 rekte al la loĝĉambrego, al la eminentaj amantoj. Dume la sorto de l'nigra morto forprenis Argos, tuj post kiam ĝi estis revidinta Oduseus en la dudeka jaro.

Multe plej unua la disimila Telemachos nun vidis iri la  
 330 porkpaŝtiston tra la ĉambrego kaj rapide li tiam kapsignis al li por lin venigi. Ĉi tiu ĉirkaŭrigardis kaj tiam prenis benkon, kiu staris, kie la detranĉisto kutime sidis, kiam li disdonis la abundajn viandaĵojn al la amantoj dum ilia manĝo en la domo; ĉi tiun benkon li kunportis kaj metis apud la tablon de Telemachos, kontraŭe de li kaj tiam li sur ĝin sidiĝis. Kaj  
 335 la heroldo nun prenis lian porcion da la manĝaĵo el la korbo kaj ĝin antaŭmetis al li.

Baldaŭ post li eniris la domon Oduseus, similante al mizera  
 340 almozulo kaj al grizharulo kaj sin apogante sur sia bastono; kaj malluksaj estis la vestaĵoj, per kiuj li estis vestita ĉirkaŭ sia korpo. Li sidiĝis sur la sojlon fraksenan je l'interna flanko de l'pordo, apogante sin kontraŭ la cipresa pordokadro, kiun la ĉarpentisto estis iam spertece glatiginta kaj rektiginta per la ŝnurrektigilo. Tuj Telemachos venigis nun la porkpaŝtiston al si kaj kiam li estis preninta tutan panon el la belega korbo kaj ankaŭ tiom da viando, kiom liaj manoj povis teni kaj ĉirkaŭpreni, tiam li lin alparolis:

„Portu ĉi tion al tiu fremdulo kaj ĝin donu al li kaj ankaŭ  
 345 konsilu al li, ke li rondiru ĉe ĉiujn amantojn kaj petu almozon al ili; ĉar por bezonanta viro ne estas bone, ke li havas hontosenton.”

Tiel li parolis; kaj la porkpaŝtisto iris, kiam li estis aŭdinta siajn vortojn kaj lin proksimiĝante, li diris al li la flugilhavajn vortojn:

- 350 „Fremdulo! Telemachos donas al vi ĉi tion kaj krome konsilas al vi, ke vi rondiru ĉe ĉiujn amantojn kaj petu almozon al ili; ĉar li diras, ke hontosento ne estas bona por almozulo.”  
 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:  
 „Reĝo Zeus! Telemachos estu feliĉa inter la viroj kaj okazu  
 355 al li ĉio, kion li deziras en sia animo.”  
 Li parolis kaj per ambaŭ manoj li akceptis kaj tie ĝin metis antaŭ siajn piedojn, sur la malpuregan sakon; kaj li manĝis tiel longe, kiel kantadis la kantisto en la ĉambrego. Kiam li estis fininta la manĝon — kaj sammomente la dieca kantisto  
 360 finis sian kanton — tiam la amantoj laŭte ekkriegis en la ĉambrego. Sed subite Athene ekstaris proksime al la Laert-ido Oduseus kaj ŝi lin instigis, ke li kolektu panopecojn ĉe l'amantoj, por ke li eksciu, kiuj el ili kondutos laŭkonvene kaj kiuj nedece; sed tamen ŝi ne estis gardonta iun kontraŭ la pereoj.  
 365 Nun li ekiris por peti al ĉiu viro aparte donacon, komencante je la dekstra flanko kaj etendante al ĉiuj direktoj la manon, kvazaŭ li estus almozulo de sia junaĝo. Kompatante ili donis ion al li kaj mire ili lin rigardis kaj ili demandis unu al la alia, kiu li estas kaj de kie li venis. Sed meze de ili parolis Melanthios, la paŝtisto de l'kaprinoj:  
 370 „Aŭskultu vi je mi, amantoj de l'gloreaga reĝino! rilate al tiu fremdulo; ĉar mi antaŭe lin jam vidis. Mi scias, ke la porkpaŝtisto lin ĉi tien kondukis, sed pri li mem mi ne certe scias, de kie li sin gloras esti devena.”  
 Tiel li parolis; kaj tuj Antinoos riproĉis la porkpaŝtiston per la vortoj:  
 375 „Malbonfama porkpaŝtisto! kial do ĉi tiun vi kondukis al la urbo? Aŭ ĉu ni ankoraŭ ne havas sufiĉe da aliaj vaguloj, ĝenaj almozuloj kaj aĉajn malgajigantojn de la manĝo? Aŭ ĉu vi ankoraŭ ne kontenta estas, ĉar ili ĉi tie sin kolektas kaj formanĝas la proprajon de via mastro, tiel ke vi ankaŭ ĉi tiun ankoraŭ venigis?”  
 380 Lin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:  
 „Antinoos! Vere, ne laŭdece vi parolis, kvankam vi estas eminenta viro. Kiu ja el si mem invitos fremdulon de aliloke kaj lin venigos, escepte se li estus unu el tiuj, kiuj laboras por la popola bonfarto, ĉu profeto, ĉu kuracisto de malsanoj,  
 385 ĉu konstruisto de ŝipoj au ĉu dieca kantisto, kiu ĉarmas kantante? Ĉi tiuj ja estas venigataj de ĉiuj mortidevuloj sur la tero senfina. Sed almozulon ja neniu invitos, ĉar ĉion li formanĝas al li. Sed pli ol la aliaj amantoj vi ĉiam malkompleza estas al

la servistoj de Oduseus, kaj precipe al mi. Tamen mi pri tio  
 390 tute ne atentis, dum ankoraŭ vivas en sia domo la saĝanima  
 Penelope kaj la disimila Telemachos."

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Silentu, ne respondu lin per multaj vortoj! Antinoos kuti-  
 395 mas ja ĉiam inciti per malagrablaj vortoj kaj ankaŭ aliajn  
 li instigas al tio."

Li parolis kaj tiam diris al Antinoos la flugilhavajn vortojn:

„Antinoos! vere, kiel patro por sia filo, tiel bone vi zorgas por  
 mi kaj tial vi nun al mi konsilas, ke mi ĉi tiun per vortoj ordonaj  
 forpeli el mia domo. Tion neniam okazigu Diaĵo. Sed prenu  
 400 iom kaj tion al li donu; mi ne envias vin; eĉ mi vin petas pri  
 tio. Ne postlasu ĝin pro honto por mia patrino aŭ iu alia [el  
 la servistoj en la domo de l'dieca Oduseus]. Sed tia penso ne  
 troviĝas en via brusto: ĉar vi multe preferas manĝi mem ol  
 doni al iu alia."

405 Lin siavice respondante alparolis Antinoos:

„Telemachos! fanfaronulo! nekontraŭstarebla ĵe kuraĝo!  
 kion vi diris? Se ĉiuj amantoj tiom al li sendus, kiom mi, tiam  
 ili lin detenus tri monatojn malproksime ekster ĉi tiu palaco."

410 Tiel li parolis kaj li prenis de sub la tablo la piedbenketon,  
 kiu tie staris kaj sur kiun li kutimis meti siajn briletajn piedojn  
 dum la festenado. Sed la aliaj ĉiuj iom al li donis kaj plenigis  
 lian dorsosakon per pano kaj viando. Baldaŭ nun Oduseus  
 intencis iri returne al la sojlo por gustumi da la donacoj de  
 l'Aĉaioj; sed unue li haltis ĉe Antinoos kaj diris al li la vortojn:

415 „Donu iom al mi, amiko! vere, ne ŝajnas al mi, ke estas  
 vi la plej maleminenta el la Aĉaioj, sed vi ŝajnas esti la  
 plej nobela, ĉar vi similas al reĝo. Tial al vi decas, ankoraŭ  
 pli multe ol al la aliaj, ke vi donu da via manĝaĵo; kaj tiam  
 mi ĉie sur la tero senfina vin laŭdos. Ĉar ankaŭ mi enloĝis iam,  
 420 kiel riĉulo inter la homoj, luksan loĝejon kaj ofte mi ion donis  
 al vagulo, al ĉiu, kia ajn li estis kaj pro kia bezono ajn li venis.  
 Ankaŭ mi havis sennombrajn servistojn kaj ankoraŭ multon  
 alian, per kio oni feliĉe vivas kaj pro kio oni estas nomata  
 riĉa. Sed la Kron-ido Zeus ĉi ĉion detruis — ĉar tion li evidente

425 volis — ĉar li instigis min, ke iru mi kun multvagademaj  
 rabistoj al Aiguptos kaj faru tiun longan vojaĝon, por ke mi  
 pereu. Tie mi ankrigis en la rivero Aiguptos la ambaŭflanke  
 kurbigitajn ŝipojn. Tiam mi ordonis al la fidelaj kunuloj, ke  
 ili restu tie apud la ŝipoj kaj gardu la ŝipojn kaj mi instigis la  
 430 spionojn, ke ili iru al observejo; sed ĉi tiuj, nebridante sian

- trokuraĝon kaj konsentante al sia sento de forto, senprokraste detruis la belegajn kampojn de l'Aiguptaj viroj, forkondukis la virinojn kaj malgrandajn infanojn kaj mortigis la virojn. Sed baldaŭ la militkriado atingis la urbon. Tiam la urbanoj,
- 435 ekaŭdinte la bruadon, je la komenco de l'tagiĝo venis eksteren. Kaj pleniĝis la tuta ebenaĵo de piedbatalantoj kaj militoĉaroj kaj de la fulmado de kupro. Tiam la fulmjetegulo Zeus panikon pereigan kaŭzis inter miaj kunuloj kaj neniu kuraĝis malcedi kontraŭ la malamiko: ĉar de ĉiuj flankoj nin ĉirkaŭis pereco.
- 440 Tie ili mortigis multajn el ni per la akra kupro, aliajn ili vivaj forkondukis por devigite por ili labori. Sed min kundonis ili al Kupros, al gastamiko, kiu ĝuste tien venis, la Ias-ido Dinetor kiu potence regis super Kupros. De tie mi nun venis ĉi tien, dum mi trasuferis grandajn malfeliĉojn."
- 445 Lin siavice respondis Antinoos kaj li parolis:  
 „Kiu Diaĵo sendis al ni ĉi tiun malbonon kiel ĝenaĵon dum la manĝo? Stariĝu tiel en la mezon, malproksime de mia tablo; alie vi povus baldaŭ alveni en tiu malfeliĉiga Aiguptus kaj en Kupros; vere, vi estas impertinenta kaj senhonta almozulo!
- 450 [Laŭvice vi haltas ĉe ĉiu aparte; kaj ili hazarde fordonas, ĉar ne ekzistas hezito aŭ kompatato, kiam oni bonfaras per la havaĵoj de iu alia, ĉar granda provizo estas je ĉies dispono]”.
- Cedante malantaŭen, lin alparolis la elpensema Oduseus:  
 „Ho! vi do tamen ne posedas ankaŭ prudenton krom vian belan
- 455 eksteraĵon! Certe, vi el viaj propraj havaĵoj eĉ ne donus saleron al almozulo, kiu al vi venus, ĉar nun, sidante ĉe la tablo de aliaj, vi eĉ ne decidi povas, preni iom da tiu manĝaĵo kaj ĝin doni al mi; ĉio ja abunde estas proviza.”
- Tiel li parolis, sed Antinoos ĉiam pli koleriĝis en sia koro kaj kolere lin alrigardante, li diris la flugilhavajn vortojn:
- 460 „Nun mi opinias, ke ne plu sendifekte vi returne iros el la ĉambrego eksteren, ĉar nun vi eĉ parolaĉas insultojn.”
- Tiel li parolis kaj prenante la piedbenketon li ĵetis kaj lin trafis kontraŭ la dekstra ŝultro, supre sur la ekstremo de l'dorso. Sed Oduseus staris firme kiel roko kaj la ĵetilo de Antinoos
- 465 ne ŝancelis lin; sed silente li skuis la kapon, projektante revenĝon. Tiam li reiris al la sojlo kaj tie sidiĝis kaj la tutplanan dorsosakon li demetis kaj li diris meze de l'amantoj:
- „Aŭskultu vi nun je mi, amantoj de l'gloreĝa reĝino! por ke mi eldiru, kion al mi instigas diri la koro en mia brusto.
- 470 Vere, nek ĉagreno, nek malĝojo ekestas en la animo, kiam viro, batalanta por siaj posedaĵoj, ĉu por siaj bovoj aŭ por

siaj arĝentblankaj ŝafoj, estas trafata. Sed min Antinoos trafis, ĉar turmentis min la mizera, pereiga stomako, kiu al  
475 la homoj kaŭzas multajn malbonojn. Sed se eble ekzistas Dioj kaj venĝdiinoj por almozpetuloj, tiam la fino de l'morto atingu Antinoos ankoraŭ antaŭ lia edziĝo."

Lin siavice alparolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

„Kviete manĝu, fremdulo! tie sidante, aŭ foriru aliloken, por ke la junuloj vin ne trenu je piedoj kaj je manoj tra la tuta  
480 domo, se tiumaniere vi parolas kaj por ke ili ne vin senkarnigu."

Tiel li parolis, sed ĉiuj ege koleris kontraŭ li. Kaj tiel parolis kelkiu el la trokuraĝaj junuloj:

„Antinoos! vere, ne decis al vi, ke tiun mizeran vagulon vi trafis! Malfeliĉulo! se li estus eble ĉielloĝanta Diaĵo! Ankaŭ  
485 la Dioj ja ofte, similante al malproksimaj fremduloj kaj havante ĉiajn staturojn, vizitas la urbojn kaj rigardas atente la trokuraĝon de l'viroj kaj ilian honestecon."

Tiel parolis la amantoj, sed li ne maltrankviligis pro iliaj vortoj. Sed granda ĉagreno kaptis la koron de Telemachos pro la trafito, kaj tamen li ne lasis teren fali larmon el siaj  
490 palpebroj, sed silente li skuis la kapon, projektante revenĝon.

Tuj kiam la tre prudenta Penelope estis aŭdinta, ke estas li trafita en la loĝĉambrego, ŝi parolis meze de siaj servistinoj:

„Ke tiel Apollon, fama pro sia pafarko, trafu ankaŭ vin mem!"

505 Ŝin siavice alparolis la mastrumistino Eurunome per la vortoj:

„Se nur okazus plenumiĝo de niaj deziroj: tiam neniu el tiuj viroj ĝisvivus la beltronan Eos!"

Ŝin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Panjo! estas vere, ke ili estas ĉiuj malamindaj, ĉar ili  
500 ĉiam elpensas malbonon; sed Antinoos estas same abomeninda kiel la nigra mortosorto. Rondiras tra la ĉambrego iu malfeliĉa fremdulo, almozpetanta inter la viroj, ĉar mizero lin devigas al tio; tiam ĉiuj aliaj plenigis lian sakon kaj donis al li, sed male li lin trafis per piedbenketo supre kontraŭ la dekstra ŝultro."

505 Tiel ŝi parolis, sidante en la ĉambro, meze de l'servaj virinoj. Dume la dieca Oduseus estis manĝanta da la manĝaĵoj. Ŝi nun venigis al si la diecan porkpaŝtiston kaj lin alparolis:

„Iru, dieca Eumaios! kaj petu al tiu fremdulo, ke li ĉi  
510 tien venu, por ke mi alparolu lin kaj al li demandu, ĉu li eble ion estas aŭdinta aŭ per propraj okuloj estas vidinta pri la

persistanima Oduseus; ĉar ŝajnas, ke li estas multvagadinto.”

Sin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

„Se nur silentus, ho reĝino! tiuj Aĉaioj! via koro estus  
ravata, ĉar tiel bele li scias rakonti! ĉar tri noktojn mi lin  
515 havis ĉe mi kaj tri tagojn mi retenis lin en mia dometo; ĉar  
unue li venis al mi, kiam li estis forkurinta de la ŝipo. Sed  
tamen li ankoraŭ ne estis je la fino, rakontante pri sia malfeli-  
ĉeco. Kiel kiam viro konstante alrigardas kantiston, kiam  
ĉi tiu, instruite de l’Dioj, kantadas inter la mortidevuloj  
520 ĉarmajn kantojn kaj senĉese ili deziras aŭskulti je li, kiam  
li kantas: tiel li ravis min, kiam li sidis en mia loĝejo. Li  
diras, ke li estas gastamiko de Oduseus de la tempo de sia  
patro kaj ke li loĝas en Kreta, kie estas la naskiĝa lando de  
Minos. De tie li nun venis ĉi tien, suferante dolorojn kaj for-  
525 puŝite de unu loko al la alia sur la maro; ankaŭ li pretendas,  
ke li estas aŭdinta, ke Oduseus ankoraŭ vivas kaj estas prok-  
sima, en la fruktodona lando de l’Thesprotaj viroj, kaj kunportos  
multajn trezorojn al sia hejmo.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Iru do, lin voku ĉi tien, por ke li mem rakontu ĉi tion en  
530 mia ĉeesto. La amantoj sin amuzu, sidante ekstere, aŭ ĉi tie  
en la domo, ĉar ilia koro estas inkлина al gajeco. Ĉar iliaj propraj  
posedaĵoj kuŝas nedifektitaj en iliaj domoj, manĝaĵoj kaj dolĉa  
vino; da tiuj manĝas nur iliaj servistoj, sed ili mem al nia  
535 domo ĉiutage venas kaj buĉante bovojn kaj ŝafojn kaj grasajn  
kaprinojn, ili diboĉe festenas kaj fortrinkas la perlantan vinon,  
senpripense; kaj dume ĉi ĉio amase perdiĝas. Ĉar estas neniu  
viro, kia Oduseus estis, por deteni tiun malbenafon el la  
domo. Sed se venus Oduseus kaj atingus la landon de siaj  
540 prapatroj, tiam li baldaŭ kun sia filo venĝus la perfortaĵojn  
de tiuj viroj.”

Tiel ŝi parolis; nun subite ternis laŭte Telemachos kaj la  
bruo sonis tra la tuta domo. Kaj Penelope ridis kaj rapide  
alparolis Eumaios per la flugilhavaj vortoj:

„Iru do, venigu tiun fremdulon kontraŭen de mi. Ĉu vi ne  
545 rimarkis, ke ternis mia filo ĉe ĉiuj vortoj miaj? Tial tutcerte  
ne restos neplenumata la mortigo de l’amantoj, [de ĉiuj kune,  
kaj neniu el ili evitos la morton kaj la mortosorton]. Sed mi  
diros ion alian al vi kaj bone pri ĝi atentu en via spirito: se  
mi rimarkos, ke ĉion li rakontas laŭvere, tiam mi lin vestos  
550 per belaj vestaĵoj, per mantelo kaj subvesto.”

Tiel ŝi parolis kaj foriris la porkpaŝtisto, kiam li estis aŭdinta



ŝiajn vortojn kaj lin proksimiĝante, li diris al li la flugilhavajn vortojn:

555 „Estiminda fremdulo! vin vokas la tre prudenta Penelope, la patrino de Telemachos; ŝin instigas ŝia animo demandi ion al vi pri sia edzo, kvankam ŝi jam estas suferinta multajn dolorojn pro li. Kaj se ŝi rimarkos, ke ĉion vi rakontas laŭvere, tiam ŝi vin vestos per mantelo kaj subvesto, kiujn vi bezonas plej urĝe. Vian stomakon vi ja ankaŭ povos nutri, almozetante manĝaĵojn inter la popolo; ĉar kiu volas, certe donos iom al vi.”

560 Lin siavice alparolis la persistema, dieca Oduseus:

565 „Eumaios! baldaŭ mi ĉion rakontus laŭvere al la filino de Ikarios, la tre prudenta Penelope. Ĉar multe mi scias pri li kaj saman mizeron ni suferis. Sed iom mi timas tiun aron da malamikecaj amantoj, kies trokuraĝo kaj perforto atingas la feran ĉielon. Ĉar ankaŭ nun, kiam tiu viro, dum mi iris tra la ĉambrego kaj tute ne faris malbonon, min trafis kaj kaŭzis al mi doloron, nek Telemachos, nek iu alia min protektis. Tial nun insiste petu al Penelope, ke ŝi, kvankam ŝi estas tre 570 dezira, tamen atendu en sia ĉambro, ĝis kiam estos malsuprenirinta la suno. Tiam ŝi min eldemandu pri la tago de l'reveno de sia edzo, [sidigante min proksime al la fajro; ĉar vere, malluksajn vestojn mi alhavas; ankaŭ vi mem ĉi tion scias, ĉar unue mi venis kiel peteganto ĉe vi.]”

575 Tiel li parolis kaj foriris la porkpaŝtisto, kiam li estis aŭdinta liajn vortojn. Kaj kiam li estis transpaŝinta la sojlon, Penelope lin alparolis:

„Ĉu vi ne kondukas lin ĉi tien, Eumaios? kiel la vagulo tion ekpensis? Ĉu li eble supermezure timas iun, aŭ ĉu li pro alia kaŭzo hontas en ĉi tiu domo? Nebona estas vagulo hontema!”

Ŝin respondante alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

580 „Li parolas konvene, kiel ankaŭ iu alia pensus, ĉar li volas eviti la trokuraĝon de tiuj impertinentaj viroj. Tial li insiste al vi petas, ke vi atendu, ĝis kiam la suno estos malsuprenirinta. Ankaŭ por vi mem ja estas tiel multe pli bone, reĝino! sola paroli kun tiu fremdulo kaj aŭskulti je li.”

585 Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Ne senprudente tiu fremdulo antaŭsentas, kio eble povus okazi; ĉar nenie viroj trokuraĝaj inter la mortidevaj homoj elpensas tiel terurajn farojn kiel ili.”

590 Tiel ŝi parolis; kaj foriris la dieca porkpaŝtisto al la aro de l'amantoj, post kiam li klare ĉion estis al ŝi dirinta.

Rapide li nun diris al Telemachos la flugilhavajn vortojn, tenante sian kapon proksime al li, por ke ne ekaŭdu la aliaj:

„Amiko! mi foriros nun, por gardi la porkojn kaj ĉion alian tiean, vian kaj mian proprajojn. Vi nun zorgu ĉi tie pri ĉio.  
595 Unualoke zorgu pri vi mem kaj estu singarda en via animo, por ke nenio al vi okazu: ĉar multaj el la Aĉaioj intencas malbonon kontraŭ vi, sed ilin pereigu Zeus, antaŭ ol ili fariĝos malfeliĉo por ni mem!”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Tiel okazos, paĉjo! sed vi foriru nur posttagmeze; kaj  
600 morgaŭ frumatene revenu kaj alkonduku belajn oferbestojn. Dume mi prizorgos per helpo de l'senmortuloj ĉion ĉi tiean.”

Tiel li parolis kaj la porkpaŝtisto residiĝis sur la glatpoluritan benkon. Kaj kiam li estis satiginta sian koron per manĝo kaj trinko, li foriris al siaj porkoj kaj forlasis la ĉambregon kaj  
605 la antaŭkorton, plenajn de kunmanĝintoj; ĉi tiuj sin estis amuzantaj per dancado kaj kantado; ĉar jam estis proksimiĝinta la malfrua posttagmezo.

## DEK OKA KANTO.

### LA PUGNOBATALO INTER ODUSSEUS KAJ IROS.

Jen venis almozulo, konata al la tuta popolo, kiu kutimis almozpeti tra la tuta urbo de Ithaka kaj kiu sin distingis per sia avida stomako, tiel ke li ade manĝis kaj trinkis; sed dikmuskolecon li ne havis, nek forton, kvankam rilate la staturon li  
5 estis tre granda je la aspekto. Li havis la nomon Arnaios; ĉar tiun nomon estis al li doninta, tuj post lia naskiĝo, lia patrino; sed Iros lin nomis ĉiuj junuloj, pro tio ke li ordinare iris por plenumi komisionojn, ĉiufoje kiam iu ajn ordonis tion al li. Ĉi tiu, tie alveninte, volis forpeli Odusseus el lia propra loĝejo kaj insultante li parolis al li la flugilhavajn vortojn:

10 „Forcedu de l'antaŭpordo, grizulo, por ke ne iu baldaŭ je la piedoj vin fortrenu. Ĉu vi ne rimarkas, ke jam ĉiuj al mi palpebrumas kaj instigas min eltreni vin? Sed malgraŭ tio mi ankoraŭ vin indulgas. Sed nun leviĝu, por ke ne ekestu baldaŭ inter ni batalo, ankaŭ per la manoj.”

Kolere lin alrigardante parolis al li la elpensema Odusseus:  
15 „Stultulo! mi nek faras nek parolas malbonon kontraŭ

vi kaj ne envias, se iu eĉ multe prenas el la pankorbeto kaj donas al vi. Sed ĉi tiu sojlo havas lokon por ni ambaŭ kaj vi neniel devas envii la posedon de aliaj; plue ŝajnas al mi, ke estas vi vagulo, kiel ankaŭ mi; kaj laŭ mia opinio nur la Dioj donas  
 20 riĉecon. Sed ne tro multe min incitu al pugnobatalo, por ke vi min ne kolerigu kaj por ke mi ne, kvankam estante grizulo, malseketigu vian bruston kaj viajn lipojn per la sango. Tiam mi havus ankoraŭ pli multan kvieton morgaŭ; ĉar mi opinias, ke vi tute ne revenus duafoje al la domo de l'Laert-ido Odusseus."

25 Lin koleriĝinte alparolis la vagulo Iros:

„Ha, ha! kiel rapidvorte parolas ĉi tiu manĝegemulo, ĝuste kiel maljuna kuiristino! mi povus decidi al malbono kontraŭ li, batante lin per ambaŭ manoj kaj mi povus elbategi teren ĉiujn liajn dentojn el la makzeloj, kvazaŭ li estus kampodetrua porko. Sed ĉirkaŭzonu vin nun, por ke ankaŭ ĉi ĉiuj vidu nin batali. Kiel vi kapablus kontraŭbatali viron pli junan?"

Tiel ili antaŭ la alta pordo sur la glatpolurita sojlo estis tutkolere incitantaj unu la alian; sed ilin aŭdis la brava kaj  
 35 forta Antinoos kaj ĝoje ekridinte li parolis meze de l'amantoj:

„Amikoj! Vere, ĝis nun neniam okazis io tia, kia la amuzajo, kiun la Diaĵo sendis en ĉi tiun domon! Jen, la fremdulo kaj Iros sin provokas reciproke al pugnobatalo! Nu do, rapide ni ilin interbataligu."

40 Tiel li parolis; kaj ĉiuj ridante eksaltis kaj kolektiĝis ĉirkaŭ la ĉifonvestitaj almozuloj. Tiam meze de ili parolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

„Aŭskultu vi je mi, kuraĝaj amantoj! por ke mi diru ion al vi. Jen kuŝas en la fajro stomakoj de kaprinoj, kiujn ni  
 45 plenigis per graso kaj sango kaj kiujn por nia vespermanĝo tie ni metis en la kamenon por rosti ilin. Kiu el ili venkos kaj estos la supera, tiu venu kaj mem elektu unu el ili, kiun li mem deziras; plue li ĉiam manĝos kun ni kaj neniun alian almozulon ni lasos veni mezen de ni por almozpeti."

50 Tiel parolis Antinoos, kaj lia parolo plaĉis al ili. Sed inside meze de ili parolis la elpensema Odusseus:

„Amikoj! neniel eble estas al maljuna viro, subigita de mizero, kontraŭbatali viron pli junan; sed tamen mia malfeliĉiga stomako min instigas, por esti venkata de la batoj.

55 Sed nu, vi ĉiuj nun ĵuru potencan ĵuron, ke neniuj el vi favore al Iros trokuraĝe min batos per muskolhava mano kaj min subigos perforte profite al li."

Tiel li parolis, kaj ili ĉiuj ĵuris, kiel li deziris. Sed kiam ili estis ĵurintaj kaj findirintaj la ĵuron, tiam siavice parolis  
60 meze de ili la brava kaj forta Telemachos:

„Fremdulo! se via koro kaj via kuraĝa animo vin instigas vin defendi kontraŭ tiu viro, tiam ne timu iun alian inter la Achajoj, ĉar kontraŭ pli multaj batalos tiu, kiu batos vin. Gastiganto mi estas, kaj interkonsentas kun mi la reĝoj Antinoos kaj Eurumachos, ambaŭ prudentuloj.”

Tiel li parolis kaj ĉiuj aprobis. Dume Oduseus ĉirkaŭzonis sian pubon per ĉifonoj kaj vidigis siajn femurojn, belajn kaj muskolajn, kaj ankaŭ videbligis liaj larĝaj ŝultroj kaj lia brusto kaj liaj dikmuskolaj brakoj; kaj Athene, lin proksimigante,  
70 plifortigis la membrojn de l'reganto super la popolo. Kaj ĉiuj amantoj supermezure miregis, kaj tiel parolis kelkiuj alrigardante sian najbaron:

„Vere, baldaŭ Iros ne plu estos Iros kaj li havos sian merititan punon. Kiajn femurojn vidigas la grizulo de sub siaj ĉifonoj!”

75 Tiel ili parolis; kaj terure konsterniĝis pro timo la koro de Iros. Sed spite al tio la servistoj lin antaŭen kondukis kaj perforte ĉirkaŭzonis lin malgraŭ lia timo. Kaj timtremetis lia karno ĉirkaŭ liaj membroj. Tiam Antinoos lin riproĉis kaj li diris la vortojn kaj parolis:

„Nun vi dezirus, ke vi nek ekzistus, nek iam estus naskiĝinta,  
80 fanfaronulo! ĉar nun ĵam vi tremetas kaj terure timas jenan viron, maljunulon, subigitan de l'mizero, kiu trafis lin. Sed ĉi tion mi diras al vi kaj certe tio estos plenumata: se ĉi tiu venkos vin kaj estos pli forta, tiam mi ĵetos vin en ŝipon nigran  
85 kaj vin sendos al reĝo Echetos, la pereiganto de ĉiuj mortidevuloj, kiu fortranĉos vian nazon kaj viajn orelojn per la senkompata kupro kaj forŝiros viajn seksajn partojn kaj donos ilin al la hundoj por formanĝi ilin krudaj.”

Tiel li parolis kaj ankoraŭ pli forte ekkaptis tremo la genuojn de Iros. Nun ili kondukis lin en la mezon; kaj ambaŭ levis la pugnojn.

90 Tiam pripensis la persistema dieca Oduseus, ĉu li tiel forte lin batos, ke tuj forlasos lin la vivo post lia falo, aŭ ĉu li ete lin batos kaj etende lin kuŝigos sur la teron. Tiel ŝajnis al li, dum li pripensis, esti plej profitige: ete lin trafi, por ke la  
95 Achajoj ne rekonu lin. Ambaŭ do tiam levis la pugnojn kaj Iros batis sur la dekstran ŝultron de Oduseus, sed ĉi tiu trafis lian nukon sub la orelo kaj li frakasis kaj penetrigis en la

karnon lian makzelon; tuj venis el lia buŝo ruĝa sango; kriante li falis en la polvon kaj li klakadis per la dentoj, dum li piedfrapadis la teron. Sed la eminentaj amantoj pro plezuro supren etendis la manojn kaj preskaŭ mortis de la ridado. Sed dume  
 100 Oduseus kaptis Iros je la piedo kaj tra la antaŭpordo lin trenegis eksteren, ĝis kiam li venis al la korto kaj al la pordo de la kolonaro. Tie li sidigis kaj apogigis lin kontraŭ la ĉirkaŭ-  
 105 barilo de l'korto kaj li enmanigis al li la bastonon kaj lin alparolante li diris la flugilhavajn vortojn:

„Tie nun restu sidanta por deteni porkojn kaj hundojn kaj ne plu volu esti la ĉefo super fremduloj kaj almozuloj, dum vi envere estas timemulo; ĉar alie vi eble spertos ankoraŭ pli grandan malfeliĉon.”

Li parolis kaj ĉirkaŭ la ŝultrojn li ĵetis malpuregan dorso-  
 sakon, multloke ŝiritan; kaj ŝnuro servis kiel portrimeno.  
 110 Post tio li reiris al la sojlo kaj tie sidigis. Ankaŭ la amantoj, gaje ridante, iris en la domon kaj ili lin salutis per la vortoj:  
 „Zeus donu al vi, fremdulo! kaj ankaŭ la aliaj senmortaj  
 Dioj, kion vi plej volonte deziras kaj kio estas kara al via animo,  
 ĉar vi ĉesigis la vagadon de tiu nesatigebla almozisto [inter la  
 115 popolo; kaj nun ni baldaŭ lin forsendos al la kontinento, al reĝo Echetos, la pereiganto de ĉiuj mortidevuloj].”

Tiel ili parolis kaj la dieca Oduseus ĝojis pro tiuj favoraj vortoj.

Antinoos nun antaŭmetis al li stomakon grandan, tutplenan  
 120 de graso kaj sango; kaj Amphinomos prenis el la korbo du panojn kaj ilin metis antaŭ lin kaj el ora pokalo li trinkbonvenigis lin kaj diris:

„Goju, ho patro kaj fremdulo! Vi havu feliĉon en la estonteco, ĉar nun vi estas premata de multaj malbonoj.”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

125 „Amphinomos! ŝajnas al mi, ke estas vi tre saĝa; sed vi ja ankaŭ de tia patro devenas, ĉar mi aŭdis la glorindan famon, ke Nisos el Doulichion estas brava kaj riĉa; kaj oni diras, ke vi estas ties filo kaj vere vi ŝajnas esti viro prudenta. Tial mi diros al vi — kaj estu vi atenta kaj aŭskultu je mi: nenion la  
 130 tero nutras, kio pli malforta estas ol la homo, inter ĉiuj estaĵoj, kiu sur la tero spiras kaj sin movas. Ĉar neniam ĝi pensas pri tio, ke en la estonteco ĝi suferos malbonon, dum la Dioj prosperon al ĝi havigas kaj ĝiaj genuoj ankoraŭ bone sin movas. Sed kiam la feliĉegaj Dioj ankaŭ malĝojigajojn okazigas al ĝi,  
 135 tiam ĝi nur devigite tion toleras kun persista animo. Ĉar tia

estas la naturo de l'surteraj homoj, kiaj la tagoj estas, kiujn  
 alsendas al ili la patro de homoj kaj Dioj. Ĉar estis iam ankaŭ  
 mia destino esti feliĉa inter la homoj, sed mi faris multajn  
 trokuraĝajn agojn nebridante miajn forton kaj potencon kaj  
 140 fidante al mia patro kaj al miaj fratoj. Tial neniu viro iam  
 agu kontraŭ la diaj leĝoj, sed silente li kontentigu pri la dona-  
 coj de l'Dioj, kion ili ajn donacos. Sed kiajn trokuraĝajn agojn  
 mi vidas ĉi tie, plenumatajn de ĉi tiuj amantoj, kiuj fordi-  
 boĉas la havaĵojn kaj malestimas la edzinon de viro, kiu laŭ  
 145 mia opinio ne plu longan tempon estos for de siaj karuloj kaj  
 de l'lando de siaj prapatroj; eble li jam estas tre proksima.  
 Sed Diaĵo vin sendanĝere hejmen konduku kaj vi ne renkontu  
 lin, dum li revenas al la kara lando de siaj prapatroj. Ĉar mi  
 opinias, ke ne sen sanga batalo ili disiĝos, la amantoj kaj tiu  
 150 viro, kiam li estos reveninta sub sian propran domtegmenton."

Tiel li parolis kaj verŝoferinte li trinkis la mioldolĉan vinon  
 kaj tiam redonis la pokalon en la manojn de l'reganto de la  
 popoloj. Sed ĉi tiu paŝis tra la domo kun premita koro kaj  
 zorge skuis la kapon; ĉar jam antaŭvidis lia animo malfeliĉon.  
 155 Sed malgraŭ tio li ne evitis la mortosorton: ĉar ankaŭ lin impli-  
 kis Athene, tiel ke li mortis per la manoj de Telemachos kaj  
 per lia fortika lanco. Sed fine li residiĝis sur la brakseĝon, de  
 kiu li estis ekstarinta.

Sed nun la fajrŝprucokula Diino Athene inspiris en la animon  
 de l'filino de Ikarios, la tre prudenta Penelope, aperi inter  
 160 la amantoj, por ke ege ŝi ŝveligu de deziro la koron de l'amantoj  
 kaj por ke al siaj edzo kaj filo ŝi fariĝu ankoraŭ pli multhonorata  
 ol ŝi estis antaŭe. Singene ŝi ridis kaj ŝi diris la vortojn kaj  
 parolis:

„Eurunome! kvankam antaŭe neniam mi tion deziris, nun  
 165 mia koro sopiras aperi inter la amantoj, kvankam ili estas  
 profunde malamataj de mi; ĉar mi volus diri kelkajn vortojn  
 al mia filo, kiuj povus esti utilaj al li, [nome: ne senĉese inter-  
 rilati kun la trokuraĝaj amantoj, kiuj bele parolas sed poste  
 malbonon kontraŭ li elpensas].”

Sin siavice alparolis la mastrumistino Eurunome per la  
 vortoj:

170 „Certe vi ĉi ĉion, infano, parolis laŭ konveno. Iru do kaj  
 diru al via filo vian konsilon kaj nenion kaŝu al li, sed iru nur  
 post kiam vi estos purlavinta vian haŭton kaj balzaminta  
 viajn vangojn; ne tiel foriru, kun vizaĝo makulita ambaŭ-  
 flanke de larmoj, ĉar ne bone estas ĉiam senĉese malĝoji. Via

175 filo ja nun estas jam plenkreska, pri kiu vi ĉiam plej arde preĝis al la senmortuloj, ke iam vi vidu lin barbhava.”

Ŝin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

Eurunome! ne provu rezoninklinigi min, kvankam vi ĝin faras pro zorga amo, ke mi lavu mian haŭton kaj balzamu  
180 min per oleo: ĉar igis min perdi mian belecon la Dioj, kiuj loĝas sur la alta Olumpos, de post kiam forveturis Oduseus kun siaj kavaj ŝipoj. Sed ordonu al Autonoe kaj Hippodameia, ke ili ĉi tien venu, porke ili staru flanke de mi en la ĉambrego; ĉar sola mi ne iros al la viroj, ĉar pro tio mi hontas.”

185 Tiel ŝi parolis; kaj la maljunulino rapidis el la ĉambro por sciigi tion al la virinoj kaj por instigi ilin, ke ili venu.

Tiam ion alian elpensis la fajrŝprucokula Diino Athene: ŝi ŝutis dolĉan dormon sur la filinon de Ikaros, kaj ĉi tiu tuj  
190 ekdormis, posten kliniĝinte en sia apogseĝo, kaj ĉiuj ŝiaj membroj malstreĉiĝis. Tiam la majestoplena Diino donis al ŝi senpereajn ecojn, por ke la Aĉaioj admire ŝin rigardu. Unue ŝi graciigis ŝian belan vizaĝon per dia beleco, per kia la belharkrona Diino de Kuthera ŝmirornamas sin, kiam ŝi iras al la ĉarmaj ĥordancoj de l'Charitoj; ankaŭ ŝi faris ŝin pli  
195 granda kaj pli diketa je la aspekto kaj ŝi faris ŝin pli blanka ol glatfajlita eburo. Kaj tion farinte foriris la majestoplena Diino. Laŭtvoĉe parolante nun proksimiĝis kaj venis la blankkubutaj servistinoj el la porvirina ĉambro; kaj tuj forlasis  
200 ŝin la dolĉa dormo kaj ŝi frotis siajn vangojn per la manoj kaj parolis:

„Vere, tre agrabla dormeto ĵus sterniĝis sur mi, kiu terure suferadas! Ho! ke tiel dolĉan morton al mi donus la ĉasta Artemis, tuj en ĉi tiu momento, por ke mi ne plu, malĝojante en la animo, forkonsumu mian vivon, dum mi sopiradas al  
205 mia kara edzo, kiu posedis ĉiajn virtojn, ĉar li estis supera al ĉiuj Aĉaioj.”

Tiel parolinte ŝi malsupreniris el la brileta supretaĝa ĉambro, sed ne sola; ĉar ŝin akompanis ankaŭ du servistinoj. Kiam ŝi, dieca inter la virinoj, estis alveninta ĉe la amantoj, tiam ŝi stariĝis flanke de l'pordokadro de la fortike ĉarpentita  
210 ĉambrego, post kiam ŝi estis ŝovinta antaŭ siajn vangojn la briletan vualon; kaj ambaŭflanke de ŝi stariĝis zorgema servistino. Al ĉiuj tieaj viroj senfortiĝis la genuoj kaj en sia koro ili estis sorĉitaj de amo kaj ĉiuj deziris kuŝiĝi flanke de ŝi sur la lito. Sed ŝi parolis al Telemachos, sia kara filo:

215 „Telemachos, ne plu estas via intelekto kaj via racio firmaj.



Ankoraŭ estante infano vi jam multe pli multe en via spirito havis saĝajn pensojn; sed nun, kiam vi estas plenkreska kaj estas atinginta la komencon de l'viraĝo — kaj certe iu, kiu venus de aliloke, rigardante viajn altkreskon kaj belecon, opinius, ke vi estas la filo de feliĉa viro — nun via intelekto kaj via  
 220 racio ne plu estas konvenaj. Kia faro ja okazis ĵus en la ĉambrego! [ĉar vi allasis, ke oni tiel hontinde kondukis kun tiu fremdulo]. Kiel do, se ion tian suferus gasto, restadanta en nia  
 225 domo, per tia doloriga malkaresado? Tio por vi estus honto kaj malhonoro inter la homoj."

Sin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Mia patrino! mi ne estas malkontenta kontraŭ vi ĉar vi koleras pro tio. [Sed mi mem rimarkas ĝin en la animo kaj scias ĉion, kio estas bona kaj kio malbona estas; ĉar antaŭe  
 230 mi estis ankoraŭ infano]. Sed vere, mi ne kapblas pri ĉio saĝe decidi; ĉar ili min konfuzas, kiuj, el ĉiaj regionoj ĉi tie restadante, ĉiam projektas malbonon, kaj mi ne havas defendantojn. Tamen tiu batalo de la fremdulo kaj Iros ne finiĝis laŭ la deziro de la amantoj, ĉar la fremdulo estis la plej forta.  
 235 Ke tiel, ho patro Zeus kaj Athene kaj Apollon, la amantoj en nia loĝejo venkitaj klinus la kapon, unuj en la korto, aliaj en la interno de l'domo, kaj ke senfortiĝus tiel la membroj de ĉiuj, kiel nun tiu Iros ĉe la pordo de l'antaŭkorto sidas kun  
 240 klinita kapo, simila al ebriulo, kaj li ne plu povas rekte stari sur siaj piedoj, nek reveni hejmen laŭ la vojo, kiu kondukas al sia domo, ĉar liaj membroj senfortiĝis."

Tiel ili parolis pri ĉi ĉio unu al la alia. Sed nun Eurumachos alparolis Penelope per la vortoj:

245 „Filino de Ikarios, tre prudenta Penelope! se ĉiuj Achajoj en Iason Argos nun vin vidus, tiam de morgaŭ matene ankoraŭ pli multaj amantoj festmanĝus en via domo, ĉar vi superas ĉiujn virinojn rilate staturon kaj altkreskon kaj taŭgan intelekton en via spirito."

250 Lin post tio respondis la tre prudenta Penelope:

„Eurumachos! vere, miajn perfektajojn, belajn eksterajn kaj staturon, detruis la senmortuloj, de kiam la Argeoj surŝipiĝis por iri al Ilion, kaj inter ili kuniris mia edzo Odusseus. Se li nur revenus kaj prizorgus mian vivon, tiam mia gloro  
 255 estus pli granda kaj tiel estus pli bele. Sed nun mi suferadas, ĉar tiom da malbonoj al mi destinis demono. Estas vere, ke kiam li iris, forlasante sian prapatran landon, li kaptis mian dekstran manon je la pojno kaj min alparolis: „Ho virino!

mi ne opinias ke ĉiuj Aĉaioj kun bonaj tibiŝirmiloj revenos  
 260 sanaj kaj sendifektaj el Troia; ĉar oni diras, ke ankaŭ la Troianoj  
 estas batalpovaj viroj; tiel same ĵetlancistoj kiel ankaŭ sag-  
 papistoj kaj militistoj sur la bataloĉaroj tirataj de rapidpiedaj  
 ĉevaloj, kiuj plej baldaŭ decidas la grandan batalon de  
 265 l'ĉiuopa milito. Tial mi ne scias, ĉu la Diaĵo lasos min reveni,  
 aŭ ĉu mi estos mortigata tie en Troia; tial vi ĉi tie zorgu pri  
 ĉio. Prizorgu mian patron kaj mian patrinon en nia loĝejo  
 same kiel nun, aŭ eĉ ankoraŭ pli multe, dum mi forestos mal-  
 proksime. Sed kiam vi vidos vian filon barbohava, tiam edzi-  
 270 niĝu kun kiu vi volas kaj forlasu vian domon." Tiel li parolis  
 kaj evidente nun ĉi ĉio plenumiĝas. Baldaŭ estos la nokto,  
 kiam la malamata edziniĝo proksimiĝos al mi, mizerulino,  
 de kiu Zeus forprenis la feliĉon. Sed jena terura ĉagreno trafas  
 mian koron kaj mian animon: kio ĉi tie okazas ja antaŭe ne  
 275 estis la kutimo de amantoj: ĉar ili, kiuj svatiĝi volas al emi-  
 nenta virino kaj filino de riĉa patro kaj kiuj konkuras unu kun  
 la alia, tiuj ordinare alkondukas mem la bovojn kaj fortajn  
 ŝafojn por la manĝo de la gekaruloj de l'knabino kaj brilajn  
 280 donacojn ili donas, sed ili ne formanĝas, senpune, la posedaĵojn  
 de iu alia."

Tiel ŝi parolis kaj ekĝojis la persistema dieca Oduseus,  
 ĉar ŝi klopodis flatakiri de ili donacojn kaj ravis ilian koron  
 per afablaj vortoj, dum ŝia koro deziris ion alian.

Sin siavice alparolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

285 „Filino de Ikarios, tre prudenta Penelope! Akceptu la dona-  
 cojn, kiujn kiu ajn el la Aĉaioj ĉi tien volas porti — ĉar ne  
 konvene estus rifuzi al vi donacon — sed ni ne iros for al niaj  
 bienoj aŭ aliloken, antaŭ ol vi estos edziniĝinta kun iu el la  
 Aĉaioj, kiu estas plej eminenta."

290 Tiel parolis Antinoos kaj al ili plaĉis liaj vortoj; kaj ili  
 nun ĉiuj forsendis sian heroldon por alporti donacojn. La heroldo  
 de Antinoos portis grandan, belegan superveston, multkoloran.  
 Sur tiu estis entute dek du oraj bukoj, fiksitaj per bele fleksitaj  
 295 agrafoj. La heroldo de Eurumachos tuj alportis al li kolĉenon  
 arte prilaboritan, oran kaj alterne kunlaĉitan kun petecoj da  
 suckeno kaj brilan kiel la suno. Kaj al Eurudamas alportis du  
 servistoj orelornamaĵojn trigemajn kaj berformajn; kaj multa  
 ĉarmeco brilis el ĝi. Plue el la domo de l'Poluktor-ido, la reĝo  
 300 Peisander, alportis la heroldo kolĉenon, belegan juvelon. Tiel  
 ĉiu el la Aĉaioj alportis alian belan donacon.

Post tio la dieca inter la virinoj supreniris al sia supretaĝa

ĉambro kaj ŝiaj servistinoj sekvis ŝin kaj portis la belegajn donacojn. Sed la amantoj sin turnis al danco kaj rava kanto  
 305 kaj ĝojis kaj ili tie restis, ĝis kiam suriris la vesperstelo. Kaj dum ili estis ĝuantaj, suriris la mallumiga vesperstelo. Tuj nun ili metis en la ĉambregon tri fajrpelvojn por lumi, ĵetis sur ilin brullignaĵon, jam longe sensukan kaj tutsekan kaj  
 310 ĵus fenditan per la kupro, kaj inter tiujn ili metis torĉojn. Kaj alterne nun la servistinoj de l'persistanima Odusseus grandbruligis la fajron. Sed meze de ili nun parolis li mem, la didevena, elpensema Odusseus:

„Servistinoj de l'longe forestanta reĝo Odusseus! nun vi iru al la ĉambro, kie sin trovas la respektinda reĝino; tie  
 315 flanke de ŝi sidante vi ŝpinu la lanajn fadenojn kaj ŝin gajigu en ŝia ĉambro aŭ varpu la lanon per viaj manoj; sed mi havigos lumon al ĉi ĉiuj. Ĉar eĉ se ili volus resti ĝis kiam aperos la beltrona Eos, eĉ tiam ili ne venkus mian paciencon; ĉar tre multeltenema mi estas.”

320 Tiel li parolis kaj ili ekridis kaj reciproke alrigardis sin. Kaj hontinde lin insultis la belvanga Melantho, kiun estis naskiginta Dolios; ŝin estis vartinta Penelope kaj ŝi estis edukinta ŝin kvazaŭ sian propran infanon kaj ŝi estis doninta al ŝi ornamaĵojn, kiom deziris ŝia koro; sed malgraŭ tio ŝi ne sentis malĝojon en sia koro pro Penelope, sed ŝi kutimis ame sin  
 325 kunigi kun Eurumachos, kiun ŝi arde amis. Ĉi tiu insultis Odusseus per ofendaj vortoj:

„Mizera fremdulo! certe oni forbatis vian intelekton el via kapo kaj tial vi ne volas iri al forĝejo aŭ al ia urba nokt-  
 330 pasigejo por tie dormi, sed kontraŭe preferas ĉi tie multe parolaci [kuraĝege, meze de multaj viroj, kaj vi tute ne ektimas en via animo. Ĉu eble la vino ekkaptis vian racion, aŭ ĉu vi ĉiam havas tiun inklinon kaj kutimas klaĉi vanaĵojn?] Aŭ ĉu vi frenezas de ĝojo, ĉar vi venkis Iros, tiun vagulon? Estu singarda, por ke ne leviĝu baldaŭ kontraŭ vi alia viro, pli  
 335 forta ol Iros, kiu per siaj fortikaj manoj vin bategos je la kapo kaj, vin malpuriginte per multa sango, vin ĵetos el la domo.”

Kolere ŝin alrigardante parolis al ŝi la elpensema Odusseus:

„Hundino! tuj mi iros al Telemachos kaj diros al li, kiel vi parolis, por ke li tuj distranĉu en pecojn viajn membrojn, unu post la alia.”

340 Tiel parolante li igis timigite diskuri la virinojn. Ili forrapidis tra la domo kaj la membroj de ĉiuj senfortiĝis de teruro; ĉar ili opiniis, ke li estis parolinta la veron. Dume li staris

ĉe la fajropelvoj kaj grandflame bruligis la fajron, dum li  
 345 rigardis al ili ĉiuj. Sed lia koro pripensis en la brusto ion alian,  
 kio tute ne estis neplenumota.

Sed Athene ankoraŭ tute ne lasis la amantojn ĉesigi sian  
 kordolorigan insultadon, por ke ankoraŭ pli multe plenigu  
 ĉagreno la koron de l'Laert-ido Odusseus. Nun meze de ili  
 350 ekparolis Eurumachos, la filo de Polubos, por ofendi Odusseus,  
 kaj li igis ridi siajn kunulojn:

„Aŭskultu vi je mi, amantoj de l'gloreaga reĝino! por ke  
 mi diru, kion al mi inspiras la koro en la brusto. Ne sen la  
 volo de l'Dioj venis ĉi tiu viro en la domon de Odusseus; ĝuste  
 al mi ŝajnas, kvazaŭ estus super li kaj lia kapo la brilo de bru-  
 355 lantaj torĉoj, ĉar haroj ne staras sur lia kapo, eĉ ne kelkaj.”

Tiel li parolis kaj tuj post tio li diris al la urbruiniga Odusseus:  
 „Fremdulo! ĉu vi volus servi min, se mi kunprenus vin,  
 sur malapuda kampo — kaj sufiĉan pagon vi ricevos — por  
 kolekti dornarbustaĵojn kaj planti altajn arbojn? Tie mi havigus  
 360 al vi la tutan jaron nutron, kaj mi vestus vin per vestoj kaj  
 donus sandalojn por viaj piedoj. Sed ĉar evidente vi nur lernis  
 malbonaĵojn, vi verŝajne ne volos komenci laboron, sed preferos  
 almozpetante rondiri inter la popolo, por trovi la rimedojn  
 por nutri vian nesatigeblan ventron.”

365 Lin respondante alparolis la elpensema Odusseus:

„Eurumachos! se nur povus okazi sur herbejo inter ni kon-  
 kurso je la laborado, en la printempa sezono, kiam la tagoj  
 estas longaj; kaj se mi tiam havus bele kurbigitan falĉilon kaj  
 saman havus vi, por ke ni fastume nin provu reciproke je la  
 370 kamplaboro, ĝis la plena krepuskiĝo, dum ankoraŭ estus  
 trovebla herbo! Aŭ se ni plue ankaŭ devus direkti bovojn el  
 la plej bonaj, du brilhaŭtajn, grandajn, ambaŭ satiĝintajn de  
 herbo, samaĝajn kaj kun sama tirkapablo, kies forto ne mal-  
 granda estas, kaj se estus kvararpenta kampo, kie la terbuloj  
 375 cedas antaŭ la plugfero: tiam vi vidus, ĉu mi povas rekte tranĉi  
 tra plugsulko ĝis la fino. Aŭ se plue la Kron-ido ankoraŭ hodiaŭ  
 kaŭzus ie militon, kaj se mi posedus ŝildon kaj du lancojn kaj  
 tutkupran kaskon, ĝustforme sidantan ĉirkaŭ miaj tempioj: tiam  
 vi vidus, ke mi estus min miksinta inter la unuajn antaŭmili-  
 380 tistojn kaj vi ne parolus tiel insulte pri mia stomako. Sed vi  
 ege trokuraĝas kaj nekompleza estas via karaktero; kaj eble  
 vi imagas esti granda kaj potenca, ĉar vi interrilatas kun  
 senfortuloj kaj nebravuloj. Sed se venus Odusseus kaj atingus  
 la landon de siaj prapatroj, tiam baldaŭ jena perdo, kvankam

385 ĝi tre vasta estas, estus tro malvasta por vi, dum vi klopodus  
forkuri tra la antaŭpordon eksteren.”

Tiel li parolis; sed Eurumachos ankoraŭ pli multe koleriĝis  
en sia koro kaj, kolere lin alrigardante, li diris al li la flugil-  
havajn vortojn:

390 „Ha, mizerulo! vere, baldaŭ mi faros al vi malbonon pro  
tio, ke tiel vi parolas trokuraĝe, meze de multaj viroj, kaj vi  
tute ne ektimas en via animo. Ĉu eble la vino ekkaptis vian  
racion, aŭ ĉu vi ĉiam havas tiun inklinon kaj kutimas klaĉi  
vanaĵojn? [Aŭ ĉu vi frenezas de ĝojo, ĉar vi venkis Iros, tiun  
vagulon?]”

Tiel parolinte li ekkaptis piedbenketon, sed Oduseus, timante  
395 Eurumachos, sidigis ĉe la genuoj de l’Doullichiano Amphi-  
nomos. Nun li trafis la vinverŝiston je la dekstra mano kaj la  
kruĉo multbrue falis teren kaj li mem kriante dorsen falis en  
la polvon. Furioze nun ekkriis la amantoj en la multombra  
400 ĉambrego kaj tiel parolis kelkiuj, alrigardante sian najbaron:

„Ke tiu vagadanta fremdulo estus pereinta ie aliloke antaŭ  
ol li venis ĉi tien; tiam li certe ne estus kaŭzinta inter ni tiom  
da tumulto. Sed nun ni ekmalpacas pro almozuloj kaj ni tute  
ne havos ĝuon de l’bongusta manĝo, kiam tio, kio estas malpli  
bona, estos supera al la bona.”

405 Meze de ili ankaŭ parolis la forta kaj brava Telemachos:  
„Stultuloj! vi furiozas kaj ne plu kaŝas en via animo la  
efikon de troaj manĝo kaj trinko: certe vin al tio instigas iu  
el la Dioj. Sed nun, post kiam vi estas bone manĝintaj, iru  
hejmen kaj enlitigu, tuj kiam la koro vin instigos je tio: ĉar  
mi nenium devigas foriri.”

410 Tiel li parolis kaj ili ĉiuj, mordante siajn lipojn de ĉagreno,  
miris pro Telemachos, ĉar tiel brave li estis parolinta. Kaj  
meze de ili ekparolis Amphinoos kaj diris [la brilglora filo de  
Nisos, la ido de l’reĝo Aretos]:

415 „Amikoj! Neniu el vi ja volas pro lia prudenta parolo lin  
ataki per malamikecaj vortoj kaj lin ĝeni. [Tial vi ne plu  
malbone konduitu kun tiu fremdulo aŭ kun iu alia el la geser-  
vistoj, kiuj sin trovas en la loĝejo de l’dieca Oduseus]. Nu do,  
la vinverŝisto verŝu vinon en la pokalojn, por ke ni, oferinte  
vinon, hejmen iru kaj enlitigu; kaj tiun fremdulon ni lasu en  
420 la domo de Oduseus, por ke li estu prizorgata de Telemachos;  
ĉar en ties domon li ja venis.”

Tiel li parolis kaj la propono, kiun li eldiris, estis plaĉa  
al ili ĉiuj. Kaj por ili miksis vinon en la miksujo la heroo Moulis,

la Doulichia heroldo — li estis la servisto de Amphinomos —  
 425 kaj, haltante antaŭ ĉiu aparte, li disdonis ĝin; tiam ili verŝo-  
 feris al la feliĉegaj Dioj kaj post tio trinkis la mioldolĉan vinon.  
 Sed kiam ili estis verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom deziris  
 ilia koro, tiam ili foriris, ĉiu al sia propra loĝejo, por dormi.

## DEK NAŬA KANTO.

### LA KUNESTO DE ODUSSEUS KAJ PENELOPE. LA PIEDLAVADO.

Sed la dieca Oduseus postrestis en la ĉambrego, per helpo  
 de Athene elpensante pereon kontraŭ la amantoj. Rapide li  
 diris al Telemachos la flugilhavajn vortojn:

„Telemachos! rapide ni nun devas deponi en la internon  
 5 de l' domo la militajn batalilojn, ĉiujn kune, kaj kiam la amantoj,  
 rimarkante ilian foreston, eldemandos vin, tiam ilin trompu  
 per afablaj vortoj: „mi ilin forprenis el la fumo, ĉar ili ne  
 similas plu al la armiloj, kiujn iam Oduseus, forirante al  
 Troia, postlasis, sed malbeliĝis ĉiuj, kiujn atingis la fumo de  
 10 l' fajro. Krome la Diaĵo ankoraŭ inspiris en mian spiriton ĉi  
 tiun pli gravan ekpenson, ke vi ne iel, vinebriiĝinte, komencu  
 inter vi malpacon kaj vundu unu la alian kaj tiel hontindigu  
 la manĝon kaj vian svatiĝadon; ĉar la fero el si mem altiras  
 jam la virojn.”

Tiel li parolis kaj tuj obeis Telemachos al sia kara patro  
 15 kaj li venigis al si la mamnutristinon Eurukleia kaj ŝin  
 alparolis:

„Panjo, nu do, retenu la virinojn en la porvirina ĉambrego,  
 ĝis kiam mi estos deponinta en la armilejon la belajn armilojn  
 de mia patro, kiujn, dum ili neprizorgitaj tie pendas en la  
 porvira ĉambrego, la fumo senbriligas, de post kiam mia patro  
 foriris. Sed tiam mi estis ankoraŭ infano. Tamen nun mi volas  
 20 ilin deponi tie, kie la fumo de l' fajro ne povas ilin atingi.”

Lin siavice alparolis la kara mamnutristino Eurukleia:

„Vi do tamen fine, infano, ekhavas pripensemon, tiel ke vi  
 zorgos pri via domo kaj gardos ĉiujn viajn posedaĵojn. Sed  
 nu do, kiu kuniros kun vi kaj portos la lumon? Ĉar vi mal-  
 25 permesis, ke venu el sia ĉambrego la servistinoj, kiuj kutime  
 portas la lumon.”

Sin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Jena fremdulo: ĉar mi ne toleros nelaborem, de neniu, kiu tuŝas al mia grenmezurilo, eĉ ne se li estas veninta de malproksime.”

Tiel li parolis kaj ne restis liaj vortoj nerimarkitaj de ŝi, sed tuj ŝi fermis la pordon de l'bele kuŝanta porvirina ĉambrego. 30 Ambaŭ nun rapidis, Oduseus kaj lia brilglora filo, kaj portis en la armilejon la kaskojn kaj la tenilhavaĵajn ŝildojn kaj la akrapintajn lancojn; kaj antaŭ ili iris Pallas Athene, portante 35 oran lampon, kaj donis al ili belegan lumon. Tiam Telemachos rapide alparolis sian patron:

„Patro, estas vere granda mirindaĵo tio, kion mi vidas per miaj okuloj. La muroj de l'ĉambrego kaj la belaj transversaj 40 traboj kaj la abiaj tegmentotraboj kaj la alte etendiĝantaj kolonoj sin montras al miaj okuloj tute, kvazaŭ mi vidus la brilon de brulanta fajro. Vere, certe estas en la domo iu el la Diaĵoj, kiuj loĝas en la vasta ĉielo.”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Silentu kaj tenu tion en via spirito kaj ne demandu pri 45 tio: ĉar tio estas la kutimo de la Dioj, kiuj loĝas sur la Olumpos. Sed vi nun enlitiĝu, dum mi postrestos ĉi tie, por kuraĝigi ankoraŭ la servistinojn kaj vian patrinon; ĉar ŝi ja malĝojante 50 demandos min pri ĉio.”

Tiel li parolis; kaj tuj Telemachos rapidis tra la ĉambrego eksteren, sub la akompano de flamantaj torĉoj, por kuŝiĝi en la dormoĉambro, kie li ankaŭ alie kutimis dormkuŝiĝi, 50 ĉiam, kiam venis al li la dolĉa dormo. Tie li ankaŭ tiam kuŝiĝis kaj atendis la diecan Eos. Sed la dieca Oduseus postrestis en la porvira ĉambrego, elpensante per la helpo de Athene perein kontraŭ la amantoj.

Ĝuste iris el sia ĉambro la tre prudenta Penelope, simila al Artemis aŭ al la ora Aphrodite. Rapide ŝiaj servistinoj 55 metis por ŝi ĉe la fajron apogseĝon, spiralforme ornamitan per eburo kaj argento, en kiun ŝi sidiĝis; tiun iam estis fabrikinta la artisto Ikmalios kaj malsupre li estis farinta benketon por la piedoj, firme fiksitan al la seĝo, sur kiu kuŝis granda ŝaffelo. Sur tiun tiam sidiĝis la tre prudenta Penelope. Nun venis ĉiuj blank- 60 kubutaj servistinoj el la porvirina ĉambrego; ĉi tiuj forprenis la multspecajn manĝaĵojn kaj la tablojn kaj pokalojn, el kiuj la trokuraĝaj viroj estis trinkintaj; kaj ili ĵetis la fajron el la fajropelvoĵoj teren kaj amasigis multan alian brullignon sur ili por doni lumon 65 kaj varmon. Tiam jam denove Melantho insultis Oduseus:



- „Fremdulo! ĉu vi ankoraŭ nun ĉi tie nin ĝenos dum la nokto, rondirante tra la domo kaj avide kaŝobservante la virinojn? Iru el la pordo, mizerulo! kaj tie ĝuu vian manĝon: alie mi vin ĵetos per flamanta torĉo kaj tiam vi baldaŭ iros eksteren!”
- 70 Kolere ŝin alrigardante, parolis al ŝi la elpensema Oduseus: „Mizerulino! kial vi tiel min atakas kun koleriĝinta animo? Ĉu eble, ĉar malpura mi estas kaj ĉar mi alhavas vestojn ĉifonajn ĉirkaŭ la korpo kaj ĉar mi almozpetas inter la popolo? La neceso ja devigas min. Sed tian sorton havas almozuloj kaj
- 75 vaguloj. Ĉar ankaŭ mi enloĝis iam, kiel riĉulo inter la homoj, luksan loĝejon kaj ofte mi ion donis al vagulo, al ĉiu, kia ajn li estis kaj pro kia bezono ajn li venis. Ankaŭ mi havis sennombrajn servistojn kaj ankoraŭ multon alian, per kio oni feliĉe vivas kaj pro kio oni estas nomata riĉa. Sed la Kron-ido Zeus
- 80 ĉi ĉion detruis; ĉar tion li evidente volis. Tial, virino, nun estu singarda, por ke vi ne perdu vian tutan eminentecon, je kiu vi almenaŭ nun superas la aliajn servistinojn, se eble via mastrino koleriĝinte indignetus kontraŭ vi, aŭ se revenus Oduseus. Ĉar ankoraŭ permesas la sorto esperon je tio. Sed
- 85 se li efektive pereis kaj ne plu revenos, tiam almenaŭ lia filo Telemachos jam estas tiel vigla pro la favoro de Apollon kaj neniu el la virinoj en la domo restas nerimarkita de li, kiam ŝi malbone agas, ĉar li ne plu estas junaĝa.”
- Tiel li parolis kaj lin aŭdis la tre prudenta Penelope kaj
- 90 ŝi riproĉis la servistinojn kaj diris la vortojn kaj parolis: „Certe, impertinenta, senhonta hundino! vi ne restas nerimarkita de mi, kiam vi faras terurajn hontindaĵojn, pro kiuj vi iam sangmakuligos vian kapon. Tre bone vi ja scias, ĉar vi ĝin aŭdis de mi mem, ke mi intencis demandi en mia loĝejo
- 95 tiun fremdulon pri mia edzo, ĉar ege mi ĉagreniĝas pro li.”
- Tiel ŝi parolis kaj post tio ŝi diris al la mastrumistino Eurunome la vortojn:
- „Eurunome! Alportu do benkon kun ŝaffelo sur ĝi, por ke la fremdulo sidiĝu kaj parolu al mi kaj je mi aŭskultu; ĉar mi volas eldemandi lin.”
- 100 Tiel ŝi parolis kaj tre ageme ĉi tiu alportis belpoluritan benkon kaj ĝin tie metis kaj ĵetis sur ĝin ŝaffelon; sur tiun tiam sidiĝis la persistema, dieca Oduseus. Nun inter ili ekparolis la tre prudenta Penelope:
- „Fremdulo! ĉi tion mi mem unue al vi demandas: kiu kaj
- 105 de kie inter la popoloj vi estas? Kie troviĝas via naskiĝurbo kaj kie vivas viaj gepatroj?”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

- „Virino! neniu el la mortidevuloj sur la tero senfina povus vin riproĉi; ĉar vere, via gloro atingas la vastan ĉielon, same kiel tiu de neriproĉebla reĝo, kiu, regante direspekte super
- 110 multaj fortaj viroj, observas la diajn leĝojn, dum la nigra tero produktas tritikon kaj hordeon kaj la arboj estas plensarĝitaj je fruktoj kaj la ŝafoj ĉiam plimultiĝas kaj la maro havigas fiŝojn sekve de favora fiŝkaptado kaj sub lia regado bonfartas
- 115 la popoloj. Tial demandu al mi en via domo pri aliaj aferoj, sed ne demandu pri mia deveno kaj mia prapatra lando, por ke vi ne ankoraŭ pli multe plenigu mian koron de ĉagreno pro la memoro al tio; ĉar ege multdolora mi estas. Plue tute ne konvenas al mi vekrii kaj ĝemplori en la domo de iu alia,
- 120 ĉar nebone estas, ĉiam senĉese malĝojadi: ĉar mi timas, ke iu el la servistinoj, aŭ eble vi mem, pri mi malkontentiĝus kaj dirus, ke mi estas tutmalseka de larmoj, ĉar mi ebriigis mian spiriton per vino.”

Lin respondis post tio la tre prudenta Penelope:

- „Fremdulo! vere, miajn perfektaĵojn, belajn eksterajon kaj
- 125 staturon, detruis la senmortuloj, de kiam la Argeioj surŝipiĝis por iri al Ilion kaj inter ili kuniris mia edzo Oduseus. Se li nur revenus kaj prizorgus mian vivon, tiam mia gloro estus pli granda kaj tiel estus pli bele. Sed nun mi suferadas; ĉar tiom da malbonoj al mi destinis la Diaĵo. Ĉar ĉiuj, kiuj regas
- 130 kiel princoj super la insuloj, super Doulichion kaj Samos kaj la multarbara Zakunthos, kaj ĉiuj kiuj potencas super la rokeca Ithaka, ĉi ĉiuj kontraŭ mia volo svatiĝas al mi kaj fordiboĉas miajn havaĵojn. Tial mi interesiĝas nek pri fremduloj nek pri
- 135 petegantoj nek pri heroldoj, kiuj laboras por la tutpopola bonfarto. Sed mia koro konsumiĝas, dum mi sopiradas al Oduseus. Sed ili senĉese min instigas al edziniĝo; tamen mi ĉiam elpensas ruzojn por eviti tion. Unue inspiris demono en mian spiriton, ke mi komencu en mia ĉambro grandan teksaĵon
- 140 kaj ekteksu tolaĵon delikatan kaj tre grandan; kaj tuj post tio mi diris al ili: „junuloj, miaj amantoj de post kiam mortis la dieca Oduseus, vi atendu, kvankam vi deziregas mian edziniĝon, ĝis kiam mi estos finfarinta — por ke la teksaĵo ne fariĝu senutila — mortotukon por la heroo Laertes, por la
- 145 tempo, kiam lin trafos la pereiga sorto de l'multdolora morto. Ĉar mi timas, ke iu el la Achaiinoj en la popolo min mallaŭdus, se li, kvankam li tiom posedis, kuŝus sen mortotuko.” Tiel mi parolis kaj ilia kuraĝa koro persvadiĝis. Tiam mi efektive

150 dumtage teksis grandan parton, sed ĉiufoje mi nokte ĝin mal-  
 teksis ĉe la lumo de brulantaj torĉoj, kiujn mi metis apud  
 ĝin. Tiel dum tri jaroj mia ruzo restis nerimarkita kaj mi  
 konstante kontentigis la amantojn. Sed kiam la kvara jaro  
 venis kaj proksimiĝis la novaj sezonoj, [kaj dum la malkreskado  
 de l'monatoj multaj tagoj estis preterpasintaj], tiam ili per  
 la helpo de la servistinoj, tiuj malzorgemaj hundinoj, venis  
 155 kaj surprizis min kaj kriis al mi minacajn vortojn. Tiel mi  
 ĝin finfaris, kvankam kontraŭvole kaj devigite. Sed nun mi  
 ne plu povas eviti la edziniĝon, nek elpensi ankoraŭ iun alian  
 ruzon. Kaj ankaŭ miaj gepatroj tre instigas min edziniĝi,  
 dum mia filo indigniĝas pro tiuj, kiuj fordiboĉas lian posedon,  
 160 ĉar li nun rimarkas tion; ĉar li jam estas viro kaj tre kapabla  
 zorgi pri la domo, al kiu Zeus havigas gloron. Sed nu do, tamen  
 al mi rakontu vian devenon, de kie vi estas; ĉar vi ja ne devenas  
 de ŝtono aŭ de kverko, kiel okazas en malnovaj fabeloj.''

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

165 „Respektinda edzino de l'Laert-ido Odusseus! ĉu vi do tute  
 ne ĉesos demandi pri mia deveno? Nu do, mi rakontos ĝin al  
 vi. Estas vere, ke vi kaŭzos al mi ankoraŭ pli multajn ĉagrenojn  
 ol mi jam havas: ĉar tio estas la kutima sorto de viro, kiam  
 li tiom da tempo, kiom mi nun, forestas el sia patrujo, dum  
 170 li vagadas, suferante dolorojn, tra multnombraj urboj de  
 mortidevuloj. Sed malgraŭ tio mi diros al vi tion, pri kio vi  
 demandas kaj esploras. Ekzistas iu lando, Kreta, meze de  
 l'vinkolora maro, bela kaj fruktodona kaj marĉirkaŭata.  
 En ĝi loĝas multaj, sennombraj homoj kaj troviĝas tie naŭdek  
 175 urboj. La diversaj lingvoj estas kunmiksitaĵo unu kun la alia.  
 Tie loĝas Aĉaioj kaj grandkuraĝaj Eteokretoj, plue Kudonoj  
 kaj longharaj Dorioj kaj diecaj Pelasgoj. Kaj inter la urboj  
 estas Knosos, granda urbo, kie Minos, la amiko de l'granda  
 Zeus, ĉiun naŭan jaron estis reelektata kiel reĝo; ĉi tiu estis  
 180 la patro de mia patro, la kuraĝanima Deukalion. Deukalion  
 do naskigis min kaj ankaŭ la reĝon Idomeneus; sed Idomeneus  
 foriris kun la Atre-idoj sur la kurbstevenaj ŝipoj al Ilion;  
 mia glora nomo estas Aithon kaj mi estas pli junaĝa. Sed li  
 185 estas pli maljuna kaj pli kuraĝa. Tie mi vidis Oduseus kaj  
 donis al li gastdonacojn. Ĉar ankaŭ lin la forto de l'vento  
 estis puŝinta al Kreta kaj devojiginta preter Maleia, dum li  
 vojaĝis al Troia; li nun albordiĝis en Amnisos, en maloportuna  
 haveno, kie sin trovas la kaverno de Eileithuia kaj nur apenaŭ  
 190 li evitis la ventegon. Tuj li iris al la urbo kaj informiĝis pri

Idomeneus, ĉar li diris, ke tiu estas lia kara kaj estiminda gastamiko. Sed jam estis je la deka aŭ dek unua tago post la forveturo de ĉi tiu kun la kurbstevenaj ŝipoj al Ilion. Tiam mi  
 195 kondukis lin al nia domo kaj bone lin gastigis kaj zorge mi lin regalas per la abunda provizo, kiu estis en la domo; ankaŭ mi donis al li kaj liaj aliaj kunuloj, kiuj lin akompanis, ĝin kolektante je kosto de l'popolo, hordefarunon kaj perlantan vinon kaj buĉotajn bovojn, por ke ili satigu sian koron. Dekdu tagojn tie restadis la diecaj Aĉaioj; ĉar ilin retenis terura  
 200 norda vento, tiel forta, ke ĝi eĉ malebligis rekte stari sur la tero. Tiun certe ekblovigis iu demono malamikeca; sed la dek trian tagon la vento malfortiĝis kaj ili forvojaĝis."

Tiumaniere li rakontis multajn fingitaĵojn, kiuj ŝajne estis veraj. Ekruliĝis al ŝi larmoj, dum ŝi aŭdis ĉi ĉion, kaj ŝia vizaĝo kvazaŭ fluidiĝis. Kiel sur la altaj montoj fluidiĝas la  
 205 neĝo, kiun, kiam la nordokcidenta vento ĝin estas disetendinta, la sudorienta vento degeligas; kaj kreskadas la fluantaj riveroj, dum ĝi degelas: tiel fluidiĝis ŝiaj belaj vangoj dum ŝi ploradis kaj ĝemadis pro sia edzo, kiu sidis flanke de ŝi. Tial Oduseus  
 210 en sia animo ekkompatis sian ĝemplorantan edzinon, sed liaj okuloj tamen restis, kvazaŭ el korno aŭ el fero, senmovaj inter la palpebroj, ĉar ruze li kaŝis siajn larmojn. Sed kiam ŝi estis satiginta sin per multlarma plorado, tiam denove ŝi lin respondante alparolis per la vortoj:

215 „Nun, fremdulo! mi kredas ke mi povas provi vin, ĉu vi vere tie en via loĝejo gastigis mian edzon kun liaj disimilaj kunuloj, kiel vi pretendas. Diru al mi, per kiaj vestoj li estis vestita ĉirkaŭ la korpo kaj kiel aspektis li mem kaj liaj kunuloj, kiuj lin akompanis."

220 Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:  
 „Virino! estas malfacile paroli pri iu, kiu jam tiel longan tempon forestas; ĉar nun jam estas la dudeka jaro, de kiam li foriris de tie kaj forlasis mian patrujon; sed tamen mi diros, kia al mia memoro li ŝajnas esti estinta. Duoblan, purpuran  
 225 mantelon lanan alhavis la dieca Oduseus. Al tiu estis fiksita buko el oro kun du tubetoj. Je la antaŭa flanko estis sur ĝi ĉizaĵo: hundo tenis inter siaj antaŭpiedoj baraktantan junan cervon makulhavan; ĉiuj admire rigardis, kiel, kvankam ambaŭ  
 230 estis oraj, la hundo tenis kaptita la junan cervon kaj ĝin mordis kaj kiel la cervo, arde dezirante forkuri, baraktis per la piedoj. Ankaŭ mi rimarkis ĉirkaŭ lia korpo la briletan subveston, delikatan kiel la ŝelon de seka cepo: tiel mola ĝi estis kaj brila

235 ĝi estis kiel la suno. Vere, multaj virinoj admire lin rigardis. Sed nun mi diros ion alian al vi kaj vi konservu tion en via memoro: mi ne scias, ĉu Oduseus jam en sia domo alhavis tiujn vestojn ĉirkaŭ sia korpo, aŭ ĉu iu el liaj amikoj donacis ilin al li ĉe lia foriro sur la ŝipo rapida, aŭ ĉu eble ilin donis iu gastamiko; ĉar Oduseus estis kara al multaj: ĉar malmultaj  
 240 inter la Aĉaioj estis similaj al li. Ankaŭ mi donacis al li kupran glavon kaj duoblan mantelon, belan kaj purpuran, kaj ĝispiedan subveston; kaj kun estimo mi lasis lin foriri per lia bonferdeka ŝipo. Ankaŭ lin akompanis heroldo, nemulte pli maljuna ol  
 245 li mem. Ankaŭ pri tiu mi diros al vi, kiel li aspektis. Largŝultra li estis kaj li havis brunegan vizaĝon kaj bukloharojn kaj lia nomo estis Eurubates; multe pli multe ol siajn aliajn kunulojn lin estimis Oduseus, ĉar ĉiam ties opinio estis konforma al lia."

Tiel li parolis kaj ankoraŭ pli multe li vekis al ŝi la deziron  
 250 al vekriado, ĉar ŝi rekonis la signojn, kiujn Oduseus tute laŭvere estis nominta. Sed kiam ŝi estis satiginta sin per la multlarma plorado, tiam ŝi lin respondante alparolis per la vortoj:

„Nun vere, fremdulo! vi estos, kvankam antaŭe kompatinda, kiel amiko kaj kiel viro respektinda en mia loĝejo. Mi mem  
 255 ja iam tiujn vestojn, kiaj vi ilin priskribas, donis al li el mia ĉambro, post kiam mi estis kunfaldinta ilin kaj la brilan bukon mi aldonis kiel ornamajon por li. Sed lin mi ne plu bonvenigos reveninta hejmen al la kara lando de siaj prapatroj. Tiel do  
 260 foriris Oduseus sur sia kava ŝipo je sorto malfeliĉa, por viziti la fatalan Ilion, kiu estas nenominda."

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Respektinda edzino de l'Laert-ido Oduseus! Ne pli longe malornamu vian belan vizaĝon kaj ne plu forkonsumu vian animon, ĝemante pro via edzo. Tamen pro tio mi ne koleretas:  
 265 ĉar multaj virinoj vekrias pro la perdo de malpli eminenta viro, la edzo de sia junaĝo, al kiu ŝi naskis infanojn, ame kuniginte sin kun li [ol estis Oduseus, pri kiu oni diras ke li estis egala al la Dioj]. Sed ĉesigu vian ĝemadon kaj aŭskultu je miaj vortoj: ĉar laŭvere mi rakontos al vi kaj mi ne kaŝos,  
 270 ke mi jam aŭdis pri la reveno de Oduseus, ke proksima li estas, en la fruktodona lando de l'Thesprotaj viroj kaj ke li ankoraŭ estas viva; kaj li kunportas multajn valorajn trezorojn, kiujn li petis de la popolo. Sed siajn fidelajn kunulojn kaj sian kavan ŝipon li perdis sur la vinkolora maro, kiam li forve-

275 turis de l'insulo Thrinakia; ĉar koleris kontraŭ li Zeus kaj Helios, pro tio, ke ties bovojn estis mortigintaj liaj kunuloj. Tial ili pereis ĉiuj en la ondeganta maro; sed lin, sidantan sur la kilo de l'ŝipo, ŝetis la ondoj sur la firman teron, en la lando de l'Phaiakoj, kiuj estas diparencaj; ĉi tiuj favorinkline lin  
 280 supermezure honoris kiel Diaĵon kaj donis multajn donacojn al li kaj volis mem konduki lin sendangere hejmen. Kaj tiam Oduseus jam longan tempon estus estinta ĉi tie; sed jene ŝajnis al lia animo pli profitige, viziti multajn landojn kaj kolekti al si trezorojn. Tiel Oduseus scipovas akiri pli bone  
 285 ol la aliaj mortidestinaj homoj multajn profitojn kaj neniu mortidevulo povus vetkonkuri kun li je tio. Tiel rakontis al mi Pheidon, la reĝo de l'Thesprotoj; kaj, verŝoferante en sia domo, li ĵuris al mi, ke la ŝipo jam estas trenita en la maron  
 290 kaj jam estas pretaj la kunuloj, kiuj lin akompanos al la kara lando de liaj prapatroj. Sed min li lasis jam antaŭe forveturi; ĉar ĝuste iris ŝipo deThesprotaj viroj al la multtritika Doulichion. Ankaŭ li montris al mi ĉiujn trezorojn, kiujn estis kolektinta Oduseus; eĉ ĝis la deka generacio ĉi ĉio povus subteni kaj  
 295 nutri la idaron, tiom da ties trezoroj kuŝis en la loĝejo de l'reĝo. Sed li diris, ke ĵus Oduseus iris al Dodona, por ekscii el la altfoliara kverko de l'Diaĵo la volon de Zeus, kiel li, jam longe forestanta, povos reveni al la fruktodona lando de Ithaka,  
 300 ĉu malkaŝe ĉu sekrete. Tiel ĉi tiu do estas ankoraŭ viva kaj revenos jam tre baldaŭ kaj ne plu longan tempon li forestos de siaj karuloj kaj de sia prapatra lando; sed tamen mi tion certigos al vi per ĵuro: nun sciu unualoke Zeus, la plej supera kaj plej potenca inter la Dioj, kaj la kameno de l'neriproĉebla  
 305 Oduseus, al kiu mi rifuĝas: tutcerte ĉi ĉio plenumiĝos kiel mi diras: ankoraŭ en ĉi tiu jaro revenos ĉi tie Oduseus kiam ĉi tiu luno malkreskos kaj la posta kreskos."

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Ke tiu parolo via, ho gastol estu plenumiĝonta: tiam v  
 310 baldaŭ spertus mian amikecon kaj de mi ricevus multajn donacojn, tiel ke ĉiu, vin renkontante, nomus vin feliĉega. Sed mia animo antaŭsentas, kiel okazos: nek Oduseus ankoraŭ hejme venos, nek vi ricevos akompanion por via forvojaĝo ĉar ne estas en la domo tiaj regantoj, kia Oduseus kutimi  
 315 esti inter la viroj — ve, li iam estis — por doni akompanion a respektindaj fremduloj kaj por ilin gastigi. Sed vi, ho servistinoj lavu liajn piedojn kaj pretigu por li liton, kuŝejon el mantelo kaj briletaj kovraĵoj, por ke li agrable varma estu, dum

kuŝos, atendante la venon de l'ortrona Eos. Kaj tre frumatene  
 320 vi lin morgaŭ banu kaj ŝmiru per oleo, por ke li ene, sidante  
 flanke de Telemachos, en la ĉambrego prenu la matenmanĝon;  
 des pli malbone estos por tiu el la amantoj, kiu kordolorige  
 lin ĝenos; nenion li plu efikos ĉi tie, kiel ajn terure li koleriĝos  
 325 pro tio. Kiel vi povus, fremdulo! pri mi ekscii, ĉu iel mi superas  
 la aliajn virinojn rilate spiriton kaj prudentan konsideron,  
 se vi nelavita kaj ĉifone vestita devus manĝi en la ĉambrego?  
 La homoj vivas nur mallongan tempon. Kiu mem nekompatema  
 estas kaj havas senkompatan inklinon, al tiu deziras ĉiuj  
 330 mortidevuloj ĉagrenon por estontaj tempoj, dum lia tuta vivo;  
 kaj kiam li estas mortinta, lin mallaŭdas ĉiuj; sed kiu estas  
 noblanima kaj havas noblan inklinon, ties gloron ĉie disvasti-  
 gas la fremduloj inter ĉiuj homoj kaj multaj lin nomas nobla."

335 Sin respondante alparolis la elpensema Odusseus:

„Respektinda edzino de l'Laert-ido Odusseus! vere, manteloj  
 kaj briletaj litkovraĵoj estas malamataj de mi, de la tago kiam  
 mi malproksimiĝis de l'neĝkovritaj montoj de Kreta kaj forvo-  
 jaĝis sur longremila ŝipo. Mi do volas kuŝiĝi tiel, kiel antaŭe  
 340 mi pasigis la noktojn sendormajn; ĉar jam multajn noktojn  
 mi pasigis en malluksega kuŝejo kaj tie mi atendis la beltronan,  
 diecan Eos. Ankaŭ neniel estas plaĉa al mia animo la pied-  
 lavado; kaj neniu virino el tiuj, kiuj estas servaj al vi en la  
 345 domo, tuŝos al miaj piedoj, se ne grandaĝa maljunulino ŝi  
 estas, kun zorgema karaktero, kiu jam estas same multe trasu-  
 ferinta en sia animo, kiel mi; nur al iu tia mi ne rifuzus tuŝi  
 al miaj piedoj."

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

350 „Kara fremdulo! — ĉar ankoraŭ neniam venis al mia loĝejo  
 el la malapude loĝantaj fremduloj viro tiel prudenta, kaj pli  
 kara, kiel vi, kiu tiel pripenseme kaj saĝece pri ĉio parolas —  
 jes, mi havas maljunulinon, spertan je prudentaj planoj, kiu  
 355 zorge mamnutris kaj vartis tiun malfeliĉulon kaj lin prenis en  
 siajn manojn, tuj post kiam lin estis naskinta lia patrino;  
 ĉi tiu piedlavos vin, kvankam ŝi estas tre malforta. Nu do,  
 nun leviĝu, tre prudenta Eurukleia! kaj lavu la piedojn de  
 l'samaĝano de via mastro; ankaŭ Odusseus eble jam estas tiel  
 malforta je piedoj kaj je manoj, kiel ĉi tiu; ĉar rapide mal-  
 360 juniĝas en malfeliĉo la mortidevuloj."

Tiel ŝi parolis; kaj la maljunulino kovris sian vizaĝon per  
 la manoj kaj verŝis varmajn larmojn kaj ŝi diris la plendajn  
 vortojn:



„Ve al mi, mizerulino, pro vi, infano! Certe, supermezure  
 vin malamis inter ĉiuj homoj Zeus, kvankam vi havis direspek-  
 365 tan animon. Ĉar ankoraŭ neniu el la mortidestinuloj forbruligis  
 honore al la fulmojetegulo Zeus tiom da grasaj femurostoj,  
 nek oferdonis tiom da bonegaj hekatomboj, kiom vi kutime  
 al li donis, preĝante, ke vi atingu prosperan maljunecon kaj  
 mem eduki povu vian brilgloran filon. Sed nun perdiĝis por  
 370 vi sola la tago de l'reveno. Kaj tiel eble ankaŭ lin insultis  
 servaj virinoj de malproksimaj fremduloj, kiam li venis en  
 ilian loĝejon, kiel ĉi tiuj hundinoj, ĉiuj kune, nun mokofendas  
 vin, tiel ke vi, por eviti iliajn insultojn kaj multajn hontindajn  
 mokaĵojn, nun ne allasas, ke ili lavu viajn piedojn. Sed mi  
 375 ne kontraŭvole obeas al la ordono de l'filino de Ikarios, la  
 tre prudenta Penelope. Tial mi lavos viajn piedojn, ne nur pro  
 Penelope mem, sed ankaŭ pro vi, ĉar en mia interno tuŝiĝas  
 mia koro pro viaj ĉagrenoj. Sed nu, atentu bone la vortojn,  
 kiuĵn mi diros: jam multnombraj multsuferintaj fremduloj  
 380 venis ĉi tien, sed mi kredas, ke mi ankoraŭ neniu vidis, kiu  
 estis tiel simila al kiu ajn, kiel vi similas rilate staturon, voĉon  
 kaj piedojn al Oduseus.”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Ho maljunulino! same diras ĉiuj, kiuj per siaj okuloj  
 vidis nin ambaŭ, ke ni estas tre similaj unu al la alia, kiel  
 385 vi mem ja ankaŭ rimarkas kaj diras.”

Tiel li parolis; nun la maljunulino prenis briletan pelvon,  
 en kiu ŝi kutimis lavi la piedojn, verŝis multe da malvarma  
 akvo en ĝin kaj tiam aldonis varman akvon. Sed Oduseus  
 nun sidiĝis malapude de l'kameno kaj rapide li sin turnis al  
 390 malluma angulo; ĉar tuj li antaŭsentis en sia animo, ke ŝi  
 verŝajne, kaptante lian kruron, rimarkos la cikatron kaj ke  
 tiel ĉio estiĝos malkaŝita. Jam ŝi volis piedlavi sian mastron  
 kaj pro tio proksimiĝis: sed subite ŝi rekonis la cikatron, kiun  
 iam estis al li kaŭzinta apro per sia blanka dento, kiam li  
 iris al la Parnassos por viziti Autolukos kaj liajn filojn, [la  
 395 kuraĝan patron de sia patrino, kiu superis ĉiujn homojn je  
 ruzaĵoj kaj falsaj ĵuroj; Diaĵo mem, Hermes, estis al li havi-  
 ginta tiujn ecojn; ĉar honore al tiu li ĉiam forbruligis plaĉajn  
 femurostojn de ŝafoj kaj kapridoj, kaj pro tio ĉi tiu ĉiam favo-  
 rinklino lin helpis.

Ĉi tiu Autolukos, veninte en la fruktodonan landon de Ithaka,  
 400 tie estis trovinta la ĵus naskitan infanon de sia filino; ĉi tiun  
 estis metinta Eurukleia sur liajn genuojn, kiam li estis fininta

sian vespermanĝon kaj tiam ŝi diris la vortojn kaj parolis:  
 „Autolukos! vi nun mem elpensu nomon, por doni ĝin al  
 la kara infano de via infano, kiun vi ja arde deziris.”

405 Sin siavice respondis Autolukos kaj li diris:

„Miaj bofilo kaj filino! vi do donu al li la nomon, kiun mi  
 diros: koleriĝinte kontraŭ multaj mi venis ĉi tien, kontraŭ  
 viroj kaj virinoj sur la multnutra tero: tial Odusseus estu la  
 410 nomo, per kiu oni lin nomu. Kaj kiam poste li venos plenkres-  
 kinta al la Parnassos, al la granda domo, kie naskiĝis lia patrino  
 kaj kie troviĝas miaj trezoroj, tiam mi donos al li da tiuj kaj  
 lasos lin ĝojanta forvojaĝi.”

Pro tio foriris Odusseus tien, por ke tiu al li donu brilajn  
 donacojn. Kaj bonvenigis lin Autolukos kaj la filoj de Auto-  
 415 lukos per manpremo kaj per vortoj ĝentilaj. Ankaŭ Amphithea,  
 la patrino de lia patrino, ĉirkaŭbrakis Odusseus kaj kisis lian  
 kapon kaj ambaŭ liajn belajn okulojn. Tuj Autolukos ordonis  
 al siaj gloregaj filoj prepari la manĝon; kaj ili aŭdis lian instigon  
 420 kaj tuj ili enkondukis kvinjaraĝan virbovon, senfeligis kaj  
 preparis lin kaj tute lin dishakis en grandajn partojn; post  
 tio ili lerte ĉi tiujn tranĉdividis en malgrandajn pecojn kaj  
 tiujn ili pikis ĉirkaŭ la rostilojn kaj zorge rostis kaj tiam ili  
 disdonis al ĉiu justan parton. Tiel ili tiam dum la tuta tago  
 425 ĝis la malleviĝo de l'suno festenis kaj al nenies koro mankis  
 konvena manĝo; sed kiam la suno malleviĝis kaj alproksimiĝis  
 la krepusko, tiam ili enlitigis kaj elektis la ĝuon de l'dormo.

Sed kiam aperis la frumatena, rozofingra Eos, tiam iris al  
 430 ĉaso la filoj de Autolukos kun la hundoj kaj meze de ili kuniris  
 la dieca Odusseus. Ili supreniris sur la krutan monton Parnassos,  
 tutkovritan de arbaroj kaj baldaŭ ili atingis la multventajn  
 intermontaĵojn. Ĝuste nun la suno ekradiis super la kampoj,  
 sin levante el la malrapide fluanta, profunda Okeanos, kiam  
 435 la ĉasantoj atingis valon. Antaŭ ili kuris, flarserĉante post-  
 signojn, la hundoj kaj post ili iris la filoj de Autolukos kaj  
 kune kun ili iris, ĝuste malantaŭ la hundoj, la dieca Odusseus,  
 svingegante sian longombran lancon. Sed tie kuŝis grandega  
 440 virapro en sia denskreska kuŝejo; nek blovis tra ĝi la fortaj,  
 malseke blovantaj ventoj, nek iam ĝin trafis la brila suno  
 per siaj radioj, nek tute penetris en ĝin la pluvo: tiel dens-  
 kreska ĝi estis kaj kuŝis en ĝi sufiĉe granda amaso da folioj.  
 Nun li ekaŭdis la bruon de piedoj de viroj kaj hundoj, kiam  
 445 ili, proksimiĝante, incitis ĉi tiujn kontraŭ lin. Jen li renkonte  
 kuris el la arbustaro, dum rekte stariĝis lia hararo kaj dum

li ilin rigardis per flamantaj okuloj kaj li haltis proksime al ili. Tiam plej unua kurrapidis antaŭen Oduseus, levante per dikmuskola mano sian longan lancon kaj arde dezirante trafi lin; sed la apro jam antaŭ tio, flanken saltante, lin trafis  
 450 super la genuo kaj lin pikis per sia dentego profunde en la karnon sed lian oston li ne tuŝis. Tamen Oduseus lin trafis ĝuste en la dekstra postkolo kaj tute penetris tra ĝin la pinto de l'brila lanco; kriante li falis en la polvon kaj la vivoforto  
 455 forflugis de li. Tuj nun ageme la karaj filoj de Autolukos okupis sin pri li kaj dume lerte ili bandaĝis la vundon de l'neriproĉebla, dieca Oduseus kaj ili haltigis la ruĝegan sangon per sorĉkantaĵo kaj post tio rapide reiris al la domo de sia kara patro.

Sed kiam Autolukos kaj la filoj de Autolukos lin estis zorge  
 460 sanigintaj kaj estis donintaj al li brilegajn donacojn, tiam ili ĝoje baldaŭ lasis lin ĝojanta reiri al sia kara Ithaka. Kaj liaj patro kaj respektinda patrino ĝojis, kiam li estis reveninta kaj ili al li demandis pri ĉio, kiel li estis ekhavinta tiun cikatron.  
 465 Kaj detale li al ili rakontis, kiel lin estis trafinta per sia blanka dentego apro, dum li estis ĉasanta, kiam li estis irinta kun la filoj de Autolukos al la Parnassos].

Apenaŭ la maljunulino estis tuŝinta per sia manplato tiun cikatron kaj palpinta ĝin, ŝi rekonis kaj delasis la piedon, tiel ke ŝi falis malsupren. La kruro falis en la pelvon kaj la kupro  
 470 eksonoris kaj balanciĝis al la alia flanko; kaj la akvo el ĝi fluis sur la teron. Ĝojo kaj ĉagreno sammomente kaptis ŝian animon kaj ambaŭ okuloj ŝiaj pleniĝis de larmoj kaj ŝia voĉo rifuzis pluan servadon. Fine ŝi karesis lian mentonon kaj parolis al Oduseus:

„Vere vi estas Oduseus, kara infano! tamen mi ne rekonis  
 475 vin, antaŭ ol mi povis pripalpi mian mastron.”

Ŝi parolis kaj per siaj okuloj ŝi vidis al Penelope, ĉar ŝi volis sciigi al ŝi, ke estas ŝia kara edzo en la domo. Sed ĉi tiu ne kapablis senpere tion vidi aŭ rimarki, ĉar Athene estis distrinta ŝian spiriton. Sed Oduseus, palpante per la mano, kaptis per  
 480 la dekstra mano la gorgon de Eurukleia kaj per la alia mano li ŝin tiris pli proksimen al si kaj diris:

„Panjo! kial vi min volas fari malfeliĉa? Vi mem ja estas min nutrita per via propra mammo; kaj nun mi fine revenis, trasuferinte multajn dolorojn, en la dudeka jaro al mia prapatra lando. Sed ĉar vi ekvidis ĝin kaj iu Diaĵo ĝin inspiris en  
 485 vian animon, nun silentu, por ke ne ankoraŭ iu alia en la domo

ĝin eksciu. [Ĉar ĉi tion mi al vi eldiros kaj ĝi estos plenumata: se la Diaĵo subigos pere de mia mano la amantojn eminentajn, tiam mi ankaŭ ne indulgos vin, kvankam vi estas mia mamnutrintino, kiam mi mortigos la aliajn servajn virinojn en mia loĝejo.]”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Eurukleia:

„Mia infano! kiaj vortoj ĵus eliĝis el la vico de viaj dentoj? Vi ja scias, kiel firma kaj nefleksebla estas mia energio kaj mi kondutos same kiel ŝtono malmola aŭ fero. Sed nun mi diros  
495 ion alian al vi kaj bone pri tio atentu en via koro: se la Diaĵo subigos pere de via mano la amantojn eminentajn, tiam mi nomos al vi la virinojn en la domo, tiel same tiujn, kiuj males-  
timas vin, kiel ankaŭ tiujn, kiuj estas senkulpaj.”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

500 „Panjo! kial do vi volas nomi tiujn? Tio tute ne necesas. Facile ankaŭ mi mem rimarkos ilin kaj ekkonos ĉiun el ili. Sed prisilentu la aferon kaj ĉion lasu al la Dioj.”

Tiel li parolis kaj la maljunulino forrapidis el la ĉambrego por alporti alian akvon por lavi la piedojn; ĉar la unua estis  
505 tute forfluinta. Sed kiam ŝi estis piedlavinta lin kaj lin ŝmirinta brileta per olivoleo, tiam Oduseus ree tiris sian benkon pli proksimen al la fajro por varmigi sin kaj la cikatron li kovris per siaj ĉifonoj. Nun inter ili ambaŭ ekparolis la tre prudenta Penelope:

„Fremdulo! ĉi tion malmultan mi mem ankoraŭ al vi deman-  
510 dos: ĉar jam baldaŭ estos tempo por agrabla noktripozo, almenaŭ por tiuj, kiujn malgraŭ ilia malĝojo la dormo ekkaptas. Sed al mi demono havigis nemezureblan ĉagrenon: ĉar estas vere, ke dumtage mi ĝuetas, kvankam vekriante kaj ĝemante, kiam mi vidas mian propran laboraĵon kaj la laboraĵon de la  
515 servistinoj en la domo; sed kiam proksimiĝas la nokto kaj la dormo kaptas ĉiujn homojn, tiam mi kuŝas en mia lito kaj multnombraj dolorigaj zorgoj turmentadas senĉese mian koron, dum mi vekriadas. [Kiel, kiam la filino de Pandareos, la grizbruna najtingalo, belege kantas, kiam la printempo ree  
520 komenciĝas; sidante sub la densa foliaro de l'arboj, ŝi tiam, ofte alternante la tonon, disaŭdigas sian laŭtsonan voĉon, plendante pro sia kara filo Itulos, kiun ŝi iam erare mortigis per la kupro, la filon de reĝo Zethos: tiel ankaŭ mia animo estas tien kaj reen movata de dubo], ĉu mi restos ĉe mia filo  
525 kaj ĉion sendifekte gardos, miajn posedaĵojn kaj miajn geservistojn kaj mian alttegmentan, grandan loĝejon, respektante

la edzecan liton kaj timante la malbonfamom inter la popolo, aŭ ĉu mi jam nun la viron sekvos, kiu estas la plej eminenta el ĉiuj, kiuj en mia domo al mi svatiĝas kaj kiu por mi pagos  
 530 prezon nemezureblan. Dum mia filo ankoraŭ estis infano kaj malsaĝa, li ne lasis min foriri el la domo de mia edzo kaj ree edziniĝi, sed nun, dum estas li plenkreska kaj atingis la viragon, ankaŭ li min petas, ke mi el mia domo reiru al mia patro, ĉar li malkontentas pro nia havaĵo, kiun al li senĉese fordibočas  
 535 la Achaioj. Sed nu, klarigu al mi ĉi tiun sonĝon kaj aŭskultu: dudek anserojn mi havas en mia domo, kiuj manĝas la tritikon el la akvo kaj mi ĝojas, ilin rigardante; sed el la montaro venis granda, kurbbeka aglo kaj rompis al ĉiuj la kolon kaj ilin  
 540 mortigis; kaj ili kuŝis amase en mia loĝejo, dum ĝi sin levis returne al la dieca etero. Sed mi vekriis kaj ĝemploris eĉ en mia sonĝo kaj ĉirkaŭ mi kolektis sin la Achaiinoj kun belaj harligoj, dum mi kompatinde plendis, ke tiu aglo estas mortiginta miajn anserojn. Sed revenante, ĝi sidiĝis sur la elstarantan  
 545 tegmentotrabon kaj per mortidevula voĉo ĝi konsolis min kaj diris: „Trankviliĝu, filino de l'vastfama Ikarios! ne estis sonĝo, sed vera antaŭsigno, kiu certe estos plenumata. La anseroj estas la amantoj kaj mi antaŭe estis aglo, sed nun mi  
 550 estas reveninta kiel via edzo, kiu preparos al ĉiuj amantoj hontan morton.” Tiel ĝi parolis kaj tuj la mieldolĉa dormo min forlasis. Sed ĉirkaŭrigardante, mi vidis la anserojn, bekmanĝantaj tritikon ĉe la nutraĵujo, kie ili ankaŭ antaŭe ĉiam manĝis.”

Ŝin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

555 „Virino! neniel estas eble, klarigi vian sonĝon, serĉante en alia direkto, ĉar Oduseus mem klarigis ja al vi, kiel li plenumos ĝin. Kaj por la amantoj nun aperas la perejo, por ĉiuj kune kaj certe neniu evitos la morton kaj la mortosorton.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

560 „Fremdulo! tamen ankaŭ estas sonĝoj vanaj kaj sencelaj kaj tute ne ĉio plenumiĝas por la homoj. [Ekzistas ja du pordegoj de l'senvivaj sonĝoj: unu estas fabrikita el korno, la alia el eburo. Ĉiuj sonĝoj, kiuj iras tra la pordego el segita eburo, trompas kaj kunportas neplenumiĝontajn promesojn; sed kiuj tra la glatpolurita pordego el korno iras eksteren, tiuj  
 565 alportas tion, kio vere estas plenumota al iu ajn el la mortidevuloj, kiu vidis ĝin. Sed mi ne opinias, ke mia terura sonĝo venis el tiu korna pordego; tamen estus tio vere estinta agrabla  
 570 al mi kaj mia filo]. Sed nun mi diros ion alian al vi kaj bone

pri ĝi atentu en via koro: tie jam estas venonta la malbeninda tagiĝo, kiu min disigos de l'loĝejo de Oduseus; ĉar nun mi antaŭmetos al la amantoj kiel konkursilojn la hakilojn, kiujn Oduseus en sia loĝejo kutimis starigi envice, entute dek du, 575 kiel kilapogilojn; kaj stariĝante je granda distanco, li pafis sagon tra ilin. Nun mi ŝarĝos la amantojn per la jena konkurso: kiu plej facile streĉos per siaj manoj la pafarkon kaj pafos la sagon tra ĉiujn dek du hakilojn, tiun mi sekvos kiel edzino, 580 forlasante ĉi tiun loĝejon de l'edzo de mia junaĝo, mian ege belan domon, tutplenan de riĉaĵoj, pri kiu mi opinias, ke mi ankoraŭ ofte ĝin memoros, eĉ en miaj sonĝoj."

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Respektinda edzino de l'Laert-ido Oduseus! ne plu prokrastu pli longe tiun konkurson en via domo; ĉar vere! 585 pli frue revenos ĉi tien la elpensema Oduseus, antaŭ ol unu el ili ĉiuj povos uzi tiun glatigitan pafarkon, streĉi sur ĝi la tendenon kaj pafi la sagon tra la feraĵn hakilojn."

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Se vi, fremdulo! sidante flanke de mi en la ĉambrego, volus min ĝojigi ankoraŭ pli longe per viaj vortoj, tiam tut- 590 certe la dormo ne ŝutiĝus sur miajn palpebrojn. [Sed neniel estas eble, ke ĉiam sendormaj estas la homoj, ĉar je ĉio la senmortuloj ordon estas fiksintaj al la mortidevuloj sur la tero grendona]. Sed nun mi supreniros al la supretaĝa ĉambro kaj kuŝiĝos sur mia lito, kiu estiĝis multĝema al mi, ĉiam 595 malsekigata de miaj larmoj, de post kiam Oduseus foriris al la malbeninda Ilion, kies nomo estas nenominda. Tie mi volas kuŝiĝi. Sed dume vi kuŝiĝu en ĉi tiu domo, ĉu vi volas sterni sur la planko litaĵon, ĉu la servistinoj al vi pretigos liton."

600 Tiel parolinte, ŝi supreniris al la brila supretaĝa ĉambro, sed ne sola, ĉar kune kun ŝi iris krome du servaj virinoj. Kaj alveninte en sia supretaĝa ĉambro kun siaj servistinoj, ŝi priploris sian karan edzon Oduseus, ĝis kiam la fajrŝprucokula Athene ŝutis sur ŝiajn palpebrojn dolĉan dormon.

## DUDEKA KANTO.

LA OKAZAĴOJ ANTAŬ LA MORTIGO DE  
L' AMANTOJ.

- Sed la dieca Oduseus pretigis al si kuŝejon en la antaŭdomo: unue li sternis sur la tero longharan bovofelon kaj sur tiun li metis multajn felojn de ŝafoj, kiujn la Achairoj kutimis oferbuĉi; kaj kiam li estis kuŝiĝinta, Eurunome ĵetis sur lin mantelon.
- 5 Tie nun kuŝis maldormante Oduseus, dum li elpensis en sia animo malbonon kontraŭ la amantoj; nun venis el la palaco la servaj virinoj, kiuj ankaŭ antaŭe kutimis ame sin kunigi kun la amantoj, ridante kaj gajigante unu la alian. Sed pro tio lia koro indigniĝis en la brusto kaj senripoze li pripensadis
- 10 en siaj spirito kaj animo, ĉu li ilin postkuro kaj preparos al ĉiu el ili la morton, aŭ ĉu li ankoraŭ allasos, sed nun la lastan fojon, ke ili prostituu kun la amantoj; kaj lia koro grumblis pro kolero en lia interno. Same kiel hundino protekte iradas ĉirkaŭ siaj delikataj idoj kaj grumblas kaj bojas al ĉiu viro,
- 15 kiun ŝi ne konas, kaj deziras batali kontraŭ li, tiel ankaŭ lia interno grumblis de indigno pro tiuj malbonaj faroj. Sed frapante sur la bruston, li riproĉis sian koron per la vortoj:
- „Ĝin toleru, mia koro! ankoraŭ pli brutecajn aĵojn vi iam eltenis, je tiu tago, kiam la Kuklopo kun sia nekonstraŭ-
- 20 starebla sovaĝeco formangegis miajn fortajn kunulojn; tamen vi tiam eltenis, ĝis mia ruzaĵo min liberigis el la kaverno, dum mi jam atendis morti.”

- Tiel li parolis, riproĉante sian koron en la brusto. Tiam lia ĉiam tolerema koro restis tute kvieta, sed lia korpo maltrankvile sin turnis tien kaj reen. Kiel kiam viro super granda
- 25 fajro flamanta movadas tien kaj reen stomakon, plenigitan per graso kaj sango, ĉar arde li deziras ke tre baldaŭ estu ĝi rostita, tiel ankaŭ li sin tien kaj reen turnadis en sia kuŝejo, dum li pripensadis, kiel do li povos meti manon sur la amantojn
- 30 senhontajn, li sola kontraŭ multaj. Nun proksimiĝis al li Athene, malsuprenirinte el la ĉielo kaj je staturo ŝi similis al virino. Ŝi kliniĝis super lian kapon kaj diris al li la vortojn:
- „Kial do vi ree maldormas, plej malfeliĉa el ĉiuj viroj! Ĉi tie ja estas via hejmo kaj ĉi tie estas via edzino en via loĝejo
- 35 kaj ankaŭ via filo, tiel brava, kia verŝajne multaj dezirus sian filon.”



Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Certe vi ĉi ĉion, Diino! laŭ konveno parolis: sed mia koro ankoraŭ pri la jeno pensas en la brusto, kiel mi povos meti manon sur la amantojn senhontajn, mi sola kontraŭ multaj; 40 ĉar ili ĉiam estas multnombraj en la domo. [Krome mi ankaŭ pripensas en mia spirito pri ĉi tio, kio estas ankoraŭ pli grava: ĉar eĉ se mi ilin mortigos per la favoro de Zeus kaj de vi, kiel mi tiam povos mem eviti la pereon? mi vin petas tion bone pripensi.]”

Lin siavice alparolis la fajrŝprucokula Diino Athene:

45 „Trokuraĝulo! oni ja fidas jes al malpli eminenta kunulo, kiu ja nur estas mortidevulo kaj ne estas same sperta pri konsiloj: sed mi Diino estas, kiu vin senĉese protektas en ĉiuj viaj penoj. Tamen mi malkaŝe al vi diros: eĉ se ni ambaŭ 50 ĉirkaŭus kvindek arojn da homoj mortidevaj, dezirantaj nin mortigi en la batalo, eĉ tiam vi povus forrabi iliajn bovojn kaj fortajn ŝafojn. Sed nun ekkaptu vin la dormo: lacegige estas maldormi kaj gardi la tutan nokton, kaj baldaŭ vi venkos viajn malfeliĉojn.”

Tiel ŝi parolis kaj ŝi ŝutis dormon sur liajn palpebrojn kaj 55 mem returne iris al la Olumpos la majestoplena Diino.

Sammomente kiam lin subigis la dormo, liberiganta la animon de zorgoj kaj malstreĉanta la membrojn, vekigis lia ĉiam zorgema edzino kaj sidante sur sia mola lito, ŝi ekploris. Sed kiam ŝi estis satiginta de plorado en sia koro, tiam unue la 60 dieca inter la virinoj preĝis al Artemis:

„Artemis, respektinda Diino, filino de Zeus! Ho, ke senprokraste nun forprenus vi de mi la vivon, pafante sagon en mian bruston, aŭ ke ventego fortiregus kaj kuntrenus min laŭlonge de l' nebulecaj vojoj kaj min ĵetus teren ĉe la bordo 65 de la ĉirkaŭ la tero fluanta Okeanos, [kiel kiam la ventegoj fortrenis la filinojn de Pandareos: al ili la Dioj estis pereigintaj la gepatrojn kaj kiel orfoj ili postrestis en la domo, sed la dieca Aphrodite ilin vartadis kaj prizorgis per fromaĝo kaj dolĉa 70 mielo kaj bongusta vino; kaj Hera donacis al ili super ĉiuj aliaj virinoj belecon kaj prudenton kaj la ĉasta Artemis havigis al ili graciecon kaj Athene al ili instruis fabriki famajn laboritaĵojn. Sed kiam la dieca Aphrodite supreniris al la alta Olumpos por peti por la knabinoj la efektiviĝon de l' prospera 75 edziniĝo al la fulmoĵetegulo Zeus — ĉi tiu ja bone ĉion scias, la feliĉon kaj la malfeliĉon de la mortidevaj homoj — tiam la Harpuioj fortrenis la knabinojn kaj ilin transdonis al la

abomenaj Erinusoj por servi ilin: ke tiel senpostsigne mal-  
 aperigus min la loĝantoj de l'Olumpa palaco, aŭ ke min trafus  
 80 Artemis kun belaj harligoj, por ke mi, pensante pri Oduseus,  
 eĉ malsupreniru sub la teron, sed nur ne ĝojigu la animon de  
 malpli eminenta viro.] Sed jeno ankoraŭ estas tolerebla mal-  
 bono, kiam iu dumtage ploradas, treege malĝojante en la koro,  
 85 se tamen dumnokte la dormo lin ekkaptas — ĉar tiu forgesigas  
 ĉion, la bonon kaj malbonon, tuj kiam ĝi estas ŝutiginta super  
 la palpebrojn — sed iu demono krome ankoraŭ sendas al mi  
 malicajn songojn: ĉar ĉi tiun nokton li ree dormis flanke de  
 mi, tute similante al si mem, kia li iam foriris kun la armeo  
 90 kaj mia koro tiam ekĝojis, ĉar mi ne opiniis, ke estas songo,  
 sed mi kredis, ke jam estas vero.”

Tiel ŝi parolis; kaj tuj aperis la ortrona Eos. Sed nun la  
 dieca Oduseus ekaŭdis la voĉon de sia ploranta edzino kaj tuj  
 li pripensis kaj jam ŝajnis al lia animo, ke ŝi rekonis lin kaj  
 95 staras nun ĉe lia kapo. Tial li kunprenis la mantelon kaj la  
 felojn, sur kiuj li estis dorminta, ilin formetis sur brakseĝon  
 en la loĝĉambrego kaj la bovofelon li forportis kaj metis ekster  
 la pordon; tiam, etendante la manojn, li preĝis al Zeus:

„Patro Zeus! se vi, Diaĵoj, laŭ via propra volo min kondukis  
 surtere kaj surmare al mia patrujo, post kiam vi unue estis  
 100 ege suferigintaj min, tiam nun iu el la maldormantaj homoj  
 diru al mi feliĉanoncan vorton en mia loĝejo kaj krome ekstere  
 aperu al mi alia signo de Zeus.”

Tiel li parolis preĝante kaj lin aŭdis la saĝega Zeus kaj tuj  
 li tondrigis de sur la radia Olumpos, [de alte el la nuboj;  
 105 kaj ekĝojis la dieca Oduseus]. Kaj feliĉanoncan vorton eldiris  
 proksime al li virino grenmuelanta en la loĝejo, kie staris la  
 mueliloj de li, la reganto super la popoloj. Per tiuj ĉiam entute  
 dek du virinoj diligente sin okupis fari hordeofarunon kaj  
 tritikfarunon, la medolon por la viroj. Ĉiuj aliaj nun dormis,  
 post kiam ili estis muelintaj sian grenon; sed nur ŝi ankoraŭ  
 110 ne ĉesigis la laboron, ĉar ŝi estis la plej malforta: ĉi tiu nun  
 haltigis sian muelilon kaj diris la parolon, antaŭsignon por  
 la reĝo:

„Patro Zeus! kiu regas super Dioj kaj homoj! vere, laŭte vi  
 tondrigis el la steloplana ĉielo, kaj tamen nenie troviĝas nuboj;  
 certe per tio vi montras al iu antaŭsignon. Tiel ankaŭ nun  
 115 plenumu al mi, mizerulino, la vorton, kiun mi diras: ke ĉi  
 tiun tagon la amantoj je la lasta fojo prenu sian bongustan  
 manĝon en la loĝejo de Oduseus, ili, kiuj senfortigis miajn

genuojn pro kordoloriga laceco, dum mi muelis hordefarunon; ke ili nun la lastan fojon festmanĝu.”

120 Tiel ŝi parolis kaj la dieca Oduseus ĝojis pro tiu feliĉanonce parolo kaj pro la tondro de Zeus; ĉar li esperis, nun venĝi kontraŭ la malbonfarantoj.

Dume la aliaj servistinoj en la bela palaco de Oduseus estis vekigintaj kaj ekbruligis en la kameno senripoze flamantan fajron. Nun ankaŭ Telemachos, la disimila junulo, sin levis el sia lito, post kiam li estis almetinta sian subveston. Post 125 tio li ĵetis ĉirkaŭ sian ŝultron la akran glavon, ligis sub siaj briletaj piedoj la belajn sandalojn kaj kaptis la fortikan lancon, pintigitan per akra kupra pinto. Tiam li stariĝis sur la sojlon kaj parolis al Eurukleia:

„Kara panjo! ĉu estime vi traktis tiun fremdulon en la domo, 130 donante al li liton kaj nutraĵon, aŭ ĉu li kuŝas tute sen prizorgo? Ĉar tia estas mia patrino, kvankam cetere ŝi estas prudenta: hazarde ŝi honoras unu el la mortidevaj homoj, la malpli eminentan, kaj alian, kiu estas pli nobeldevena, ŝi lasas forvojaĝi, ne farinte al li honoron.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Eurukleia:

135 „Certe, mia infano! vi nun kulpigus ŝin senkaŭze. Ĉar li sidis kaj trinkis vinon, kiom li mem deziris kaj li diris ke li ne plu malsatas je nutraĵoj; ĉar mem ŝi lin demandis pri tio. Sed kiam li pensis pri enlitiĝo kaj dormiro, tiam ŝi ordonis al la 140 servistinoj pretigi por li liton, sed li, kiel iu, kiu estas plej mizera kaj malfeliĉa, ne volis dormi en lito kaj kovraĵoj, sed sur haraĵa bovofelo kaj sur feloj de ŝafoj li ekdormis en la antaŭdomo; kaj ni ankoraŭ metis sur lin mantelon.”

Tiel ŝi parolis kaj Telemachos tuj rapidis tra la ĉambregon 145 eksteren, havante en la manoj sian lancon; kaj kune kun li iris liaj rapidpiedaj hundoj. Li nun kuris al la kunsidejo, al la Achajoj kun bonaj tibiŝirmiloj.

Dume ŝi, dieca inter la virinoj, Eurukleia, la filino de la Peisenor-ido Ops, ordonis al la servistinoj:

150 „Vi vigligu! vi unuj diligente balau la ĉambregon kaj ŝprucakvumu la plankon kaj metu sur la bele fabrikitajn brakseĝojn purpurajn tukojn; vi aliaj viŝpurigu per spongoj ĉiujn tablojn kaj purigu la vinmiksulojn kaj la arte faritajn pokalojn dutenilhavaĵn; kaj vi aliaj iru por akvo al la fonto kaj rapidirante ĝin alportu. Ĉar ne plu longan tempon la aman- 155 toj forestos el la ĉambrego, sed ili revenos tre frue, ĉar estas hodiaŭ por ĉiuj homoj festotago.”

Tiel ŝi parolis kaj ili bonvole je ŝi aŭskultis kaj ŝin obeis: dudek el ili iris al la fonto malhelakva, dum la aliaj tie lerte komencis sian laboron en la ĉambrego.

- 160 Nun eniris la korton la servistoj de l'Aĉaioj; ĉi tiuj tiam bone kaj lerte disendis brullignon kaj jam revenis ankaŭ de la fonto la virinoj. Al ili nun ankaŭ venis la porkpaŝtisto, kondukante tri grasporkojn, kiuj estis la plej bonaj el la tuta porkaro. Ĉi tiujn li lasis paŝtiĝi en la bela antaŭkorto kaj dume
- 165 mem li alparolis Oduseus per afablaj vortoj:

„Fremdulo, ĉu la Aĉaioj nun vin iom pli estime rigardas, aŭ ĉu ili ankoraŭ malrespektas vin en la ĉambrego, kiel antaŭe?”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

- „Ke la Dioj, Eumaios! punus la hontindaĵojn, kiujn ili
- 170 trokuraĝe laŭ malhonorinda maniero faras en la domo de iu alia, dum ili eĉ ne iomete da hontosento havas.”

- Tiel ili parolis pri ĉi ĉio unu al la alia. Tiam proksimen al ili paŝis Melanthios, la paŝtisto de l' kaprinoj, kondukante kaprinojn, kiuj superis ĉiujn aliajn kaprinojn el la brutaro,
- 175 kiel manĝon por la amantoj; kaj du aliaj paŝtistoj lin akompanis. La kaprinojn li ligis sub la laŭte resonanta kolonaro, sed mem li tiam alparolis Oduseus per insultaj vortoj:

- „Fremdulo! ĉu vi ankoraŭ nun ĉi tie ĝenas en la domo, almozpetante al la viroj kaj ne irante eksteren? Mi nepre
- 180 opinias, ke ni ambaŭ ne plu disiros, antaŭ ol vi estos spertinta miajn manojn, ĉar vi ne almozpetas laŭ konveno; ankaŭ aliloke ja estas festmanĝoj de Aĉaioj.”

Tiel li parolis; sed tute ne lin alparolis la elpensema Oduseus, sed silente li skuis sian kapon, sekrete projektante vengon.

- 185 Nun al ili venis tria, Philoitios, la ĉefo de l' servistoj, kondukante negravedan bovinon por la amantoj kaj grasajn kaprinojn. [Ilin estis transmetintaj pramistoj, kiuj ankaŭ aliajn homojn akompanas, kiu ajn al ili venas]; ĉi tiujn li nun firme ligis sub la laŭte resonanta kolonaro, sed mem li
- 190 proksimiĝante eldemandis la porkpaŝtiston:

- „Kiu do estas jena fremdulo, porkpaŝtisto! kiu antaŭ nelonge venis al nia domo? al kiuj viroj li sin gloras aparteni? kie do loĝas lia familio kaj kie kuŝas lia prapatra lando? La malfeliĉulo! kaj tamen je staturo li similas al reganta reĝo;
- 195 sed la Dioj senglorigas homojn multvagantajn, ĉiufoje, kiam ili destinas al ili mizeron, eĉ se ili estas reĝoj.”

Li parolis kaj paŝante al li, li lin salutis per la dekstra mano kaj lin alparolante li diris al li la flugilhavajn vortojn:

„Estu bonvena, estimata fremdulo! okazu al vi feliĉo en la  
 200 estonteco; nun vi estas ja premata de multaj malfeliĉoj. Patro  
 Zeus! neniŭ alia el la Dioj estas pli pereiga ol vi; vi ne kompatas  
 la virojn, kiujn vi tamen mem vivigis, sed igas ilin renkonti  
 malbonon kaj dolorigajn ĉagrenojn. Mi ekŝvitis, kiam mi vin  
 vidis, kaj miaj okuloj estas larmoplenaj, kiam mi pensas pri  
 205 Oduseus, ĉar mi opinias, ke ankaŭ li vagadas inter la homoj,  
 alhavante tiajn ĉifonojn, se li almenaŭ vivas ankoraŭ kaj vidas  
 la lumon de l' suno. Sed se li jam estas mortinta kaj sin trovas  
 en la loĝejo de Hades, tiam ve al mi, pro l' eminenta Oduseus  
 210 kiu al mi donis, kiam mi ankoraŭ estis juna, la gardadon de  
 la bovoj en la lando de la Kephallenoj. Nun ili estas ege mult-  
 nombraj kaj ĉe neniŭ viro pli prospere kreskus la idaro de  
 larĝfrontaj bovoj; sed aliaj min ordonas, ke mi tiujn bovojn  
 ĉi tien konduku, por ke ili mem formanĝu ilin. Kaj ili ne atentis  
 215 pri la filo en la domo kaj ili ne timtremas pro la venĝo de la  
 Dioj: ĉar ili jam arde deziras dividi la havaĵojn de l' longe  
 forestanta reĝo. Sed mia animo ofte en la brusto konsideras  
 ĉi tion: vere estus tre malbone, dum ankoraŭ vivas lia filo,  
 220 iri kun la bovoj al alia lando, al fremda popolo; sed tio estas  
 ankoraŭ pli terura, resti ĉi tie kaj suferi ĉagrenon, dum mi  
 paŝtas por aliaj viroj la bovojn. Certe mi jam antaŭ longe  
 estus rifuĝinta kaj irinta al iu alia el la multpotencaj reĝoj, ĉar  
 ne plu tolereble estas; sed ankoraŭ ĉiam mi memoras pri tiu  
 225 malfeliĉulo, ĉu li eble de ie ajn revenos kaj dispelos la amantojn  
 en la domo.”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Bovpaŝtisto! ĉar vi ŝajnas esti nek malbona nek malsaĝa  
 viro kaj ĉar mi ankaŭ mem rimarkas, ke ne mankas al via  
 spirito prudenteco, tial mi diros al vi jene kaj per ĵuro potenca  
 230 mi priĵuros: nun sciu unualoke inter la Dioj Zeus, kaj via  
 gastama tablo kaj la kameno de l' neriproĉebla Oduseus, al  
 kiu mi rifuĝas: vere! dum vi ankoraŭ estos ĉi tie, revenos  
 Oduseus al sia hejmo: per viaj propraj okuloj vi vidos, se vi  
 volas, ke estas mortigataj la amantoj, kiuj ĉi tie regas.”

235 Lin siavice alparolis la paŝtisto de la bovoj:

„Ke la Kron-ido, fremdulo! plenumus tiun parolon! tiam  
 vi rimarkus, kiel bone partoprenus je tio miaj povo kaj fortikaj  
 manoj.”

[Sammaniere ankaŭ preĝis Eumaios al ĉiuj Dioj, ke la tre  
 prudenta Oduseus revenu al sia hejmo].

240 Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu kun la alia. Dume la amantoj

estis projektantaj kontraŭ Telemachos morton kaj pereon; sed subite al ili aperis de maldekstre birdo, altflugema aglo, kaj ĝi portis en siaj ungegoj timeman kolumbon. Tiam meze de ili ekparolis Amphinomos kaj li diris:

245 „Amikoj, ĉi tiu intenco nia, la mortigo de Telemachos, ne sukcesos al ni; tial ni prefere pensu pri manĝado.”

Tiel parolis Amphinomos kaj lia parolo plaĉis al ili. Kaj irinte en la domon de l' dieca Oduseus, ili deponis siajn mantelojn sur apogseĝojn kaj brakseĝojn kaj dume la paŝtistoj buĉis grandajn ŝafojn kaj kaprinojn grasajn kaj ankaŭ ili buĉis grasigitajn porkojn kaj bovon el la brutaro; kaj kiam ili estis rostintaj la internaĵon, ili ĝin dividis kaj miksis vinon en la vinmiksujoj; kaj la porkpaŝtisto disdonis la pokalojn. Fine Philoitios, la ĉefo de l' servistoj, disdividis al ili panon, 250 kuŝantan en belaj korboj, kaj Melantheus verŝis al ĉiu vinon. Ĉiuj nun etendis la manojn al la pretaj antaŭ ili kuŝantaj manĝaĵoj.

Telemachos, elpensante prudentajn planojn, nun sidigis Oduseus interne de l' fortike fondita loĝĉambrego, flanke de l' ŝtona sojlo, kie li estis lokinta malbelaĉan benkon kaj 260 malgrandan tablon; post tio li antaŭmetis al li konvenan porcion da l'internaĵoj, verŝis en oran pokalon vinon kaj diris al li la vortojn:

„Tie nun sidiĝu kaj trinku vinon meze de la viroj. Mi mem malhelpos insultojn kaj malamikecajn farojn de ĉiuj amantoj; ĉar ĉi tiu domo ne apartenas al la tuta popolo, sed ĝi estas de 265 Oduseus kaj li por mi akiris ĝin. Kaj vi, amantoj! detenu vian animon de riproĉoj kaj de malamikaĵoj, por ke ne ekestu iu malpaco kaj malkonsento.”

Tiel li parolis kaj ili ĉiuj, mordante per la dentoj siajn lipojn, miris pro Telemachos, ĉar kuraĝe li estis parolinta. 270 Meze de ili nun parolis Antinoos, la filo de Eupeithes:

„Ni akceptu, Achaioj! la parolon de Telemachos, kvankam ĝi estas incita: tre minace li ja alparolis lin. La Kron-ido Zeus ja malebligis nian intencon; alie ni certe jam estus silentigintaj lin en lia domo, kvankam li estas parolanto laŭtvoĉa.”

275 Tiel parolis Antinoos; sed Telemachos ne atentis pri liaj vortoj.

Dume la heroldoj kondukis tra la urbo la sanktan hekatombon por la Dioj; kaj kolektiĝis la longharaj Achaioj sub la multnombra foliaro de l' sanktarbaro de la sagpafulo Apollon.

Sed kiam la amantoj estis rostintaj la dorsan viandon kaj

280 ĝin estis deprenintaj de la rostilo, tiam ili ĝin dividis en egalajn partojn kaj prenis al si la bonegan manĝon. Kaj la servistoj antaŭmetis al Oduseus same grandan parton, kiel ankaŭ ili mem akiris, ĉar tiel al ili ordonis Telemachos, la kara filo de l'dieca Oduseus.

Sed Athene ankoraŭ tute ne lasis la amantojn ĉesigi sian kordolorigan insultadon, por ke ankoraŭ pli multe plenigu 285 ĉagreno la koron de l' Laert-ido Oduseus. Estis inter la amantoj iu viro, inklina al maljustaĵoj, kiu nomiĝis Ktesiphos kaj havis sian loĝejon en Samos; ĉi tiu, fidante pro siaj nemezur-eblaj riĉaĵoj, svatiĝis al la edzino de l' longe forestanta Oduseus. 290 Ĉi tiu tiam diris meze de l' trokuraĝaj amantoj:

„Aŭskultu vi je mi, amantoj grandkuraĝaj! por ke mi diru ion al vi. Estas vere ke jam longe la fremdulo havas sian porcion, kiel konvenas, same grandan kiel nia: cetero, ne estus 295 bele, nek juste, malprofitigi gastojn de Telemachos, kiu ajn alvenas en ĉi tiu domo. Sed nu, nun ankaŭ mi donacos al li gastdonacon, por ke li ankaŭ mem honoran donacon donu, ĉu al la servistino, kiu banas lin, ĉu al iu alia el la servistoj, kiuj estas en la palaco de l' dieca Oduseus.”

Tiel parolinte, li prenis el korbo bovpiedon, kiu en ĝi kuŝis 300 kaj tiun per dikmuskola mano ĵetegis al li, sed Oduseus ĝin evitis, iomete klinante sian kapon flanken kaj li ridis en sia koro je ege rikana ridaĉo; kaj la bovpiedo trafis la fortike konstruitan muron. Nun Telemachos insultis Ktesiphos per la vortoj:

„Ktesiphos, vere! tio estis por via animo tre profitiga! vi 305 ne trafis tiun fremdulon, ĉar li mem evitis vian ĵetilon. Alie mi ja certe estus vin trafinta meze en la korpo per mia akrapinta lanco kaj tiam via patro devus prizorgi ĉi tie vian enterigon anstataŭ vian edziĝon. Tial neniu montru en mia domo hont-indajn farojn! ĉar jam mi estas penskapbla kaj scias ĉion, 310 kio estas bona kaj kio estas malbona: sed antaŭe mi estis ankoraŭ infano. Sed tamen ni ankoraŭ toleras ĉi ĉion, dum ni alrigardas ke la ŝafoj estas buĉataj, la vino fortrinkata kaj la nutraĵoj formanĝataj: ĉar estas malfacile ke unu viro kontraŭstaras multajn; sed nu do, ne plu malice faru malbonajn 315 agojn. Se vi arde deziras nun min mem mortigi per la kupro, tiam mi eĉ tion preferus, kaj estus multe pli bone por mi, ke mi mortus, ol ĉiam alrigardi tiujn hontindajn farojn, nome ke fremduloj estas malkaresataj kaj ke vi hontindmaniere trenegas tra la bela domo la servajn virinojn.”



320 Tiel li parolis kaj ili restis senbruaĵ kaj silentaj. Sed fine meze de ili parolis la Damastor-ido Agelaos:

„Amikoj! neniŭ el vi ja volas pro lia prudenta parolo lin ataki per malamikecaĵ vortoj kaj lin ĝeni; tial vi ne plu malbone konduitu kun tiu fremdulo aŭ kun iu alia el la geservistoj, 325 kiuj sin trovas en la loĝejo de l' dieca Oduseus. Sed al Telemachos kaj al lia patrino mi volus fari afablan proponon, por provi, ĉu ĝi plaĉos al la koro de ili ambaŭ. Dum ankoraŭ al vi la koro en la brusto esperis, ke revenos iam la tre prudenta 330 Oduseus al sia loĝejo, tiam ne estis mallaŭdinde, ke vi atendis kaj prokrastigis la amantojn en la domo, ĉar tio estus estinta multe pli bona, se estus reveninta Oduseus kaj returne estus veninta en sian hejmon: sed nun ja klara estas tio, ke li ne plu estas revenonta. Nu do, iru al via patrino kaj sidigu flanke de ŝi kaj diru al ŝi, ke nun ŝi edziniĝu kun tiu, kiu estas la 335 plej eminenta el ni kaj donas al ŝi plej multajn donacojn, por ke vi ĝojante povu administri vian tutan patran heredaĵon, manĝante kaj trinkante, dum ŝi prizorgos la domon de iu alia.”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Ne, Agelaos! pro Zeus kaj pro la doloroj de mia patro, 340 kiu ie malproksime de Ithaka pereis aŭ ankoraŭ rondvagadas, mi ne prokrastas la edziniĝon de mia patrino, sed male mi konsilas al ŝi edziniĝi kun tiu, kiun ŝi volas kaj krome mi donos sennombrajn donacojn. Sed mi hontas ŝin forpeli kontraŭ ŝia volo el la domo: neniam la Diaĵo tion okazigu.”

345 Tiel parolis Telemachos; tiam Pallas Athene kaŭzis al la amantoj senĉesan ridadon kaj ŝi konfuzegis ilian racion: jam ĉiuj ridaĉis kun makzeloj konvulsie moviĝantaj kaj ili eĉ manĝegis krudan viandon kaj iliaj okuloj pleniĝis de larmoj kaj ilia animo antaŭsentis ĝemploradon. Tiam meze de ili 350 parolis la disimila Theoklumenos:

„Ve mizeruloj! kian teruran malbonon vi nun suferas! de nokta mallumo estas ĉirkaŭkovritaj viaj kapoj kaj vizaĝoj kaj malsupre viaj genuoj; vekriado vin ĉirkaŭas kvazaŭ fajro kaj viaj vangoj estas larmoplenaj kaj per sango estas makulitaj la muroj kaj la belaj transversaj traboj. Plena de fantomoj 355 estas la enirejo kaj plena ankaŭ estas la antaŭkorto de fantomoj, kiuj rapidas al la mallumo de l' mortintejo; la suno foriĝis de l' ĉielo kaj terura mallumo estas sternita sur ĝi.”

Tiel li parolis, sed ili ĉiuj gaje pro li ekridis. Kaj meze de ili ekparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

360 „Frenezas tiu fremdulo, kiu ĵus de aliloke venis ĉi tie! Tial,

junuloj! rapide vi lin konduku eksteren el la domo, por ke li iru al la kunvenejo, ĉar ĉi tie ĉio al li ŝajnas simila al la nokto.”

Lin siavice alparolis la disimila Theoklumenos:

„Eurumachos! neniel mi al vi demandas, ke vi havigu al  
365 mi akompanantojn; mi havas ankoraŭ miajn okulojn kaj orelojn  
kaj ambaŭ piedojn [kaj la racio en mia brusto estas ankoraŭ  
taŭga kaj tute ne malestiminda]; per tiuj mi eliros eksteren,  
ĉar mi vidas, ke alproksimiĝas al vi malbono, kiun forkuro  
aŭ evitos neniu el vi, amantoj, kiuj en la domo de l'disimila  
370 Odusseus trokuraĝe kondukas kun fremdaj viroj kaj plenumas  
terurajn farojn.”

Tiel parolinte, li forlasis la bele kuŝantan palacon kaj reiris al Peiraios, kiu afable lin gastigis.

Sed ĉiuj amantoj, alrigardante unu la alian, nun denove komencis inciti Telemachos, mokridante pro liaj gastoj;  
375 kaj tiel parolis kelkiu el la trokuraĝaj junuloj:

„Telemachos! neniu alia estas pli malfeliĉa je siaj gastoj ol vi. Ekzemple vi havas kiel gaston tiun eksterordinare malican vagulon, kiu nur deziras al manĝo kaj vino kaj tute ne estas sperta je laboro aŭ peno, sed estas embaraso por la  
380 tuta tero; siavice alia gasto ĵus ekstaris por profeti. Sed se vi volas obei je mia konsilo — kaj tio estus multe pli bona — tiam [ni ĵetu tiujn fremdulojn en multremilan ŝipon kaj] sendu lin al la Sikeloj, kie vi por li ricevos sufiĉe grandan aĉetsumon.”

Tiel parolis la amantoj; sed li ne donis atenton al iliaj vortoj,  
385 sed silente rigardis al sia patro, ĉiam atendante, kiam ĉi tiu metos manon sur la senhontajn amantojn.

Sed la filino de Ikarios, la tre prudenta Penelope, estis metinta kontraŭe de l'enirejo belegan seĝon kaj tie aŭdis la vortojn de ĉiu el la viroj en la ĉambrego. Ridante ili al si pretigis bongustan kaj sufiĉan matenmanĝon, ĉar tre multajn  
390 brutojn ili estis buĉintaj; sed nenio alia estus al ili pli malagrabla ol la vespermanĝo, kiun baldaŭ estis pretigontaj al ili la Diino kaj la forta heroo, ĉar antaŭe ili estis plenumintaj terurajn hontindaĵojn.

## DUDEK UNUA KANTO.

## LA PAFARKO DE ODUSSEUS.

- Nun la fajrŝprucokula Diino Athene inspiris en la spiriton de l' filino de Ikarios, la tre prudenta Penelope, antaŭmeti al la amantoj en la loĝĉambrego de Odusseus la pafarkon kaj la grizetan feron por vetkonkuro kaj por la komenco de ilia mortigo.
- 5 Ŝi malsupreniris la altan ŝtuparon de sia loĝejo kaj kaptis per sia mola mano la arte kurbigitan ŝlosilon, belan kaj kupran; ĝia tenilo estis fabrikita el eburo. Post tio ŝi iris kun siaj servaj virinoj al la armilejo en la ekstrema parto de l' domo;
- 10 tie kuŝis la trezoroj de l' reĝo, kupro kaj oro kaj multarte prilaborita fero. Tie ankaŭ kuŝis la kurbigita pafarko kaj la saghava ujo, en kiu troviĝis multaj dolorigaj sagoj, donacoj, kiujn iam en Lakedaimon estis al li doninta okaze de ilia renkontigo lia gastamiko, la Eurut-ido Iphitos, simila al la
- 15 senmortuloj. [Ambaŭ estis renkontintaj unu la alian en Messene, en la domo de l' bravanima Orsilochos. Odusseus estis veninta pro ŝuldo, kiun la tuta popolo al li devis pagi; ĉar tricent ŝafojn kaj la paŝtistojn estis forrabintaj el Ithaka per siaj multremilaj ŝipoj viroj Messeniaj. Pro tio Odusseus,
- 20 ankoraŭ estante junulo, estis kiel sendito farinta tiun longan vojaĝon, ĉar lia patro kaj la aliaj grizharuloj estis elsendintaj lin. Iphitos siaflanke estis veninta por serĉi siajn ĉevalojn, kiuj estis perdiĝintaj al li, dek du ĉevalinoj kaj ŝiaj idoj: laborkapablaj muloj, (kiuj poste fariĝis la kaŭzo de lia pere
- 25 kaj mortosorto, kiam li venis ĉe la kuraĝanima filo de Zeus, la heroo Herakles, la kunkulpulo de teruraj faroj: ĉi tiu lin mortigis, kvankam li estis lia gasto, en sia propra domo, la maliculo! kaj li eĉ ne respektis la venĝon de l' Dioj, nek la manĝon, kiun li ja estis mem metinta antaŭ lin; sed post tio
- 30 li mortigis lin mem kaj prenis por si mem la ĉevalojn fort-hufajn de Iphitos en sian loĝejon). Esplorante pri tiuj ĉevaloj, li renkontis Odusseus kaj donis al li la pafarkon, kiun iam kutimis porti la altkreska Eurutos, sed ĉi tiu estis postlasinta ĝin al sia filo, kiam li mortis en sia alta loĝejo. (Al Iphitos tiam Odusseus donis sian akran glavon kaj sian fortikan lancon,
- 35 kaj tio estis la komenco de ilia sincera gastamikeco; tamen ili neniam pli bone konatiĝis unu kun la alia ĉe gasta manĝo: ĉar jam antaŭe la filo de Zeus mortigis la Eurut-idon Iphitos,

similan al la senmortuloj). Ĉi tiu do donis al li la pafarkon. Sed neniam la dieca Oduseus ĝin kunprenis, kiam li iris sur la nigraj ŝipoj en la militon, sed ĉiam ĝi kuŝis tie en lia loĝejo  
 40 kiel memoraĵo de lia kara gastamiko; sed en sia propra lando li kutimis ĝin kunporti].

Sed kiam estis alveninta la dieca inter la virinoj ĉe tiu armilejo, tiam ŝi paŝis al la kverka sojlo, kiun iam la ĉarpen-  
 isto sperte estis glatiginta kaj rektiginta per la ŝnurrektigilo;  
 45 post tio li estis stariginta sur ĝin pordkadron kaj en tiun li estis lokinta la briletan pordon; tuj ŝi nun rapide malligis la rimenon de l' pordoringo, enigis la ŝlosilon en la truon kaj, premante sur ĝi, ŝi forŝovis la riglilojn de l' pordo. Ĉi tiuj ekgrincis simile al la muĝado de paŝtiganta virbovo en la herbejo: tiel laŭte grincis la bela pordo, puŝpremata de la ŝlosilo, kaj  
 50 baldaŭ ĝi malfermiĝis al ŝi. Nun ŝi iris sur la altan plankon; tie staris la kestoj, en kiuj kuŝis la bonvaloraj vestoj. Tie ŝi nun forprenis, sin streĉante, de la najlo la pafarkon, kune kun la ingo brila, kiu ĝin ĉirkaŭkovris. Kaj tie sidigante kaj metante la pafarkon sur siajn genuojn, ŝi laute esploris kaj  
 55 prenis la pafarkon de l' reĝo el la ingo. Sed kiam ŝi estis satiĝinta de multlarma plorado, tiam ŝi iris al la eminentaj amantoj en la loĝĉambrego, havante en la manoj la ambaŭflanke kurbigitan pafarkon kaj la sagujon [sagoplenan; kaj multaj dolorigaj sagoj estis en ĝi]. Kaj ŝin akompanante, servistinoj portis korbon, en kiu kuŝis multe da fero kaj kupro, la konkursiloj de l' reĝo. Kiam ŝi, la dieca inter la virinoj, estis veninta ĉe la amantoj, ŝi stariĝis flanke de l' pordokadro de la fortike ĉarpen-  
 titita ĉambrego, sed antaŭe ŝi estis malsuprentirinta  
 65 antaŭ siajn vangojn la briletan vualon. Kaj ambaŭflanke de ŝi staris zorgema servistino. Tuj ŝi nun parolis meze de la amantoj kaj ŝi diris la vortojn:

„Aŭskultu vi je mi, amantoj trokuraĝaj! kiuj ĉiam rapidas al ĉi tiu domo por manĝi kaj trinki senĉese, ĉar la domestro  
 70 jam longan tempon forestas: kaj neniun alian pretekston por tio vi povis elpensi, krom ke vi ĝin faris pro deziro edziĝi kun mi kaj fari min edzino de unu el vi. Nu do, amantoj! nun montriĝas al vi la ŝanco je tiu konkursa premio: ĉar mi antaŭmetos al vi la grandan pafarkon de l' dieca Oduseus:  
 75 kaj kiu el vi plej facile streĉos la pafarkon per siaj pugnoj kaj pafos la sagon tra ĉiujn dek du hakilojn, tiun mi volas sekvi kiel edzino, forlasante ĉi tiun loĝejon de l'edzo de mia junaĝo, la domon, ege belan kaj plenan de riĉaj havaĵoj, pri

kiu mi ankoraŭ memoros, mi kredas, eĉ en miaj sonĝoj.”

80 Tiel ŝi parolis kaj ŝi ordonis al Eumaios, la dieca porkpaŝtisto, antaŭmeti al la amantoj la pafarkon kaj la grizetan feron. Ekplorante Eumaios ilin akceptis kaj deponis antaŭ ilin. Ankaŭ la bovpaŝtisto ploris, kiam li vidis la pafarkon de l' reĝo. Sed Antinoos riproĉis ilin kaj li diris la vortojn kaj parolis:

85 „[Stultaj kamparanoj, kiuj nur pensas pri la unuopaj tagoj!] Ha! mizeruloj! kial do vi verŝas larmojn kaj tuŝas al tiu virino la animon en la brusto? Ankaŭ sen tio ŝia animo jam kuŝas en doloroj, ĉar ŝi perdis sian karan edzon. Tial vi silente sidiĝu kaj manĝu, aŭ vi eliru eksteren kaj tie ploru,

90 dum vi postlasas al ni ĉi tie la pafarkon, por ke ĝi servu al ni, amantoj, en decida konkurso; ĉar mi kredas, ke ne facile estos, streĉi tiun glatpoluritan pafarkon. Ĉar tia viro ne estas inter ĉi ĉiuj, kia estis Oduseus. Mi mem lin estas vidinta — ĉar

95 mi ankoraŭ estas memora pri tio — sed tiam mi estis ankoraŭ malgranda infano.”

Tiel li parolis, kvankam la animo en lia brusto esperis ke li streĉos la tendenon kaj pafos la sagon tra la ferajn hakilojn. Sed male li estis unua spertonta la sagon el la manoj de l'

100 neriproĉebla Oduseus, kiun li tiam, sidante en lia loĝejo, estis malrespektinta kaj ĉiujn siajn kunulojn li estis instiginta al tio sama. Meze de ili nun parolis la forta kaj brava Telemachos:

„Ve! tutcerte la Kron-ido Zeus min faris sensaĝega. Nun diras mia patrino kara, kiom ajn prudenta ŝi alie estas, ke ŝi sekvas iun alian kiel edzinon kaj forlasos ĉi tiun domon.

105 Kaj tamen mi ankoraŭ ridas pro tio kaj ĝojas kun malprudenta animo. Nu do, amantoj! nun montriĝas al vi la ŝanco je tiu konkursa premio, virino, kia nuntempe neniu estas en la Achaia lando, nek en la sankta Pulos, nek en Argos, nek en Mukenai [, nek en Ithaka mem aŭ en la nigrakolora kontinento].

110 Sed ankaŭ vi mem ĉi tion scias: kial estus necese laŭdi mian patrinon? Sed nu, vi ne prokrastu kun pretekstoj kaj ne plu vi hezitu streĉi la pafarkon; dume mi rigardos. Ankaŭ mi mem volonte provus mian forton per la pafarko: ĉar se mi ĝin streĉos kaj pafos la sagon tra la la ferajn hakilojn, tiam mia respektinda patrino ne forlasus, je mia malĝojo, ĉi tiun domon, sek-vante iun alian kiel edzino, dum mi ĉi tie postrestus, kvankam mi jam kapablas uzi la belajn konkursilojn de mia patro.”

115 Li parolis kaj rekte eksaltante li demetis de siaj ŝultroj la purpurkoloran mantelon kaj ankaŭ demetis de siaj ŝultroj la

120 akran glavon. Unue li nun fosis unu longan kavajon en la tero kaj en tiun starigis ĉiujn hakilojn kaj ilin lokis en rekta linio laŭ la ŝnurrektigilo kaj ĉirkaŭe li frape plifirmigis la teron; miregoekkaptis ĉiujn, kiuj vidis, kiel bonorde li ilin starigis, kaj tamen antaŭe neniam li estis ĝin vidinta. Post tio li starigis sur la sojlon kaj provis streĉi la pafarkon. Trifoje li premtordis  
 125 ĝin, arde dezirante ĝin streĉi, sed trifoje liaj fortoj ne sufiĉis, kvankam li ankoraŭ esperis en sia animo, streĉi la tendenon kaj pafi la sagon tra la ferajn hakilojn. Kaj efektive li estus ĝin streĉinta, kiam la kvaran fojon forte li suprentiris la tendenon, sed Oduseus kapneis al li kaj lin retenis, kvankam  
 130 li arde ĝin deziris. Tiam denove meze de ili parolis la forta kaj brava Telemachos:

„Ve! tutcerte mi ankaŭ poste restos sensignifa kaj malforta, [aŭ mi ankoraŭ estas tro juna kaj ankoraŭ ne povas fidi miajn manojn, por defendi min kontraŭ la viro, kiu unua min ĝenos]. Sed nu! nun provu vi, kiuj ja estas pli kapablaj je forteco,  
 135 streĉi la pafarkon kaj ni finu la konkurson.”

Tiel parolinte, li metis la pafarkon el siaj manoj sur la teron kaj ĝin starigis kontraŭ la fortike ĉarpentitan, glatpoloritan pardon kaj tie li ankaŭ apogigis la akran sagon kontraŭ la belan arkoringon; post tio li denove sidiĝis sur la brakoseĝon, de kiu li ĵus sin estis levinta. Nun meze de ili  
 140 parolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

„Miaj kunuloj! vi ĉiuj nun laŭvice, de maldekstre al dekstre, starigu, komencante ĉe la loko, kie la vinverŝisto komencas la enverŝadon.”

Tiel parolis Antinoos kaj liaj vortoj plaĉis al ili. Unua sin levis Leiodes, la filo de Oinops, kiu kutime estis por ili  
 145 la oferanto kaj ĉiam sidis en la plej interna angulo, flanke de l' bela vinmiksujo. Nur de li iliaj trokuraĝaj faroj estis malamataj kaj tial li malŝategis ĉiujn amantojn; ĉi tiu do tiam unua prenis la pafarkon kaj la akran sagon. Post tio li starigis sur la sojlon kaj provis la pafarkon, sed li ne ĝin streĉis;  
 150 ĉar jam dum li suprentiris la tendenon, laciĝis liaj neharditaj, delikataj manoj. Tiam li diris meze de l'amantoj:

„Amikoj! mi ne streĉas ĝin; ankaŭ iu alia ĝin prenu. Ĉar multajn eminentulojn ĉi tiu pafarko prirabos de spiro kaj vivo; ĉar vere, estas multe pli bone morti, ol vivante malsukcesi  
 155 je tio, pro kio mi ĉiam venas ĉi tien, ĉiam atendente, tagon post tago. [Estas vere, ke nun ankoraŭ multaj esperas en sia koro kaj arde deziras, edziĝi kun Penelope, la edzino de Odus-

seus; sed kiam li estos provinta kaj vidinta la pafarkon, tiam  
 160 li klopodu svatiĝi per edziĝdonacoj al iu alia el la belvestitaj  
 Achaiinoj: tiam ŝi edziniĝu kun tiu, kiu al ŝi donas la plej  
 multnombrajn donacojn kaj venas al ŝi, de l' sorto por ŝi dest-  
 inita].”

Tiel li parolis kaj li metis la pafarkon el siaj manoj kaj ĝin  
 starigis kontraŭ la fortike ĉarpentitan, glatpoluritan pordon  
 165 kaj tie li ankaŭ apogigis la akran sagon kontraŭ la belan arkor-  
 ingon; post tio li denove sidiĝis sur la brakoseĝon, de kie  
 li ĵus sin estis levinta. Antinoos lin insultis kaj diris la vortojn  
 kaj parolis:

„Leiodes! Kiaj vortoj ĵus eliĝis trans la vicon de viaj dentoj!  
 terure kaj abomene! — mi indigniĝas tion aŭdante — ĉu do  
 170 vere tiu pafarko prirabos multajn eminentulojn de spiro kaj  
 vivo, ĉar vi ĝin ne kapablas streĉi! Sed via patrino ja vin ne  
 naskis tiel muskolhava, ke poste vi povu fariĝi taŭga ark-  
 streĉisto kaj sagpafisto; sed aliaj eminentaj amantoj baldaŭ  
 streĉos ĝin.”

175 Tiel li parolis kaj li ordonis al Melanthios, la paŝtisto de  
 l' kaprinoj:

„Estu vigla, Melantheus! ekbruligu fajron en la ĉambrego  
 kaj metu apud ĝin seĝon grandan, sur kiu estas sternita granda  
 felo; plue portu grandan diskon da talko, kiu estas proviza  
 ene, por ke ni, tenante ĝin nelonge ĉe la fajro kaj ŝmirante  
 180 ĝin per graso, provu la pafarkon kaj finu la konkurson.”

Tiel li parolis kaj rapide Melanthios ekbruligis senripoze  
 flamantan fajron, tiam alportis seĝon, sur kiu estis sternita  
 granda felo, kaj tiun metis apud ĝin; post tio li alportis grandan  
 diskon da talko, kiu estis proviza ene: per tiu ili ŝmiris la  
 pafarkon, ĝin tenante nelonge ĉe la fajro, kaj ĝin provis, sed  
 185 ili ne kapablis streĉi ĝin, ĉar tute ne sufiĉis iliaj fortoj. Nur  
 Antinoos kaj la disimila Eurumachos, la ĉefoj de l' amantoj,  
 ankoraŭ persistis, ĉar rilate al braveco ili estis multsupere  
 plej eminentaj.

Nun sammomente eliris kune la domon la bovpaŝtisto kaj  
 la porkpaŝtisto de l' dieca Odusseus; kaj tuj post ilin iris el  
 190 la domo la dieca Odusseus mem. Sed kiam ili estis ekster la  
 pordo kaj ankaŭ ekster la antaŭkorto, tiam Odusseus laŭte  
 ilin vokis kaj ilin alparolis per afablaj vortoj:

„Bovpaŝtisto kaj ankaŭ vi, ho porkpaŝtisto! mi volonte  
 ion al vi dirus; aŭ ĉu mi ĝin kaŝos? tamen mia animo min  
 195 instigas diri ĝin. Kiun inklinton vi havus por helpi Odusseus,



se de ie ajn subite li venus ĉi ĉie kaj se iu Diaĵo lin ĉi tien rekondukus? Ĉu vi tiam helpus la amantojn aŭ Oduseus? Eldiru vi tion, kiel viaj koro kaj animo al vi ordonas.”

Lin siavice alparolis la paŝtisto de la bovoj:

200 „Patro Zeus! se vi plenumus ĉi tiun deziron mian, ke tiu viro revenus kaj iu demono lin rekondukus, tiam li ekscius, kiel forte mia tuta povo kaj miaj manoj lin helpus.”

Sammaniere ankaŭ Eumaios preĝis al ĉiuj Dioj, ke revenu la tre prudenta Oduseus al sia loĝejo. Sed kiam li estis ekkon-  
205 inta ilian veran inklinon, tiam denove li ilin respondante alparolis per la vortoj:

„Li jam estas hejme; jen! estas mi mem, kiu, trasuferinte multajn malfeliĉojn, revenis en la dudeka jaro en la landon de miaj prapatroj. Mi nun ankaŭ ekscias, ke nur de vi ambaŭ el  
210 ĉiuj servistoj mia reveno estas dezirata; el la aliaj mi nenium aŭdis deziri, ke mi returne venu en mian domon. Tial al vi ambaŭ mi rakontos laŭvere, kiel plue okazos: se la Diaĵo pere de mi subigos la trokuraĝajn amantojn, tiam mi donos al vi ambaŭ edzinon kaj mi havigos al vi riĉaĵojn kaj loĝejon, konstruitan  
215 en mia proksimeco kaj ambaŭ vi estos de nun al mi kunuloj kaj fratoj de Telemachos. Sed nu! mi krome ankaŭ al vi montros tre klaran signon, por ke vi certe min rekonu kaj fidu min en via koro: la cikatron, kiun iam al mi kaŭzis apro per sia blanka  
220 dento, kiam mi estis ĉasirinta kun la filoj de Autolukos al la Parnassos.”

Tiel parolinte, li forigis la ĉifonojn de la granda cikatro. Apenaŭ ili ambaŭ estis ĝin vidintaj kaj atente rigardintaj ĉion, ili ekploris kaj ĉirkaŭprenis per la manoj la saĝan Oduseus kaj bonvenigante ili kisis liajn kapon kaj ŝultron. Tiel same  
225 ankaŭ Oduseus kisis iliajn kapon kaj manojn. Kaj nun la lumo de la suno estus malsuprenirinta dum ilia plorado, se ne Oduseus mem reteninta estus ilin, ĉar li diris:

„Vi nun ĉesigu viajn ploradon kaj ĝemadon, por ke neniu ĝin rimarku, elirante el la domo, kaj tiam ĝin rakontu ankaŭ  
230 ene. Sed vi nun eniru unuope kaj ne ni ĉiuj kune: unue mi kaj poste vi ambaŭ. Kaj jena estu nia interkonsenta signo; nome ĉiuj aliaj, kiom ili estas, la amantoj eminentaj, rifuzos doni al mi la pafarkon kaj la sagujon; sed vi, dieca Eumaios!  
235 portu sentime tra la ĉambrego al mi la pafarkon kaj enmanigu ĝin al mi; plue ordonu al la virinoj, ke ili fermu la forlike kunmetitajn pordojn de l' porvira ĉambrego, kaj se iu ekaŭdos ene, en nia fermita ĉambrego, vekriadon kaj bruon de l' viroj,

tiam ŝi nepre ne venu ekster la ĉambregon, sed ĉiuj silente tie  
 240 restu ĉe sia laboro. Kaj al vi, dieca Philoities, mi ordonas  
 fermi per la riglilo la pordojn de la antaŭkorto kaj rapide  
 ilin firmligi per ŝnuro.”

Tiel parolinte, li eniris la bele kuŝantan palacon; tie li iris  
 al la benko, de kie li estis ekstarinta kaj sur ĝin sidiĝis. Post  
 tio ankaŭ envenis unuope la du servistoj de l' dieca Oduseus.

245 Dume Eurumachos ankoraŭ estis manipulanta la pafarkon  
 en siaj manoj, jen ĉi tie jen tie ĝin varmigante en la brilo de  
 l' fajro; sed malgraŭ tio li ne kapablis streĉi ĝin kaj ege mal-  
 ĝojis lia fiera koro. Malkontente li tiam ekparolis kaj diris  
 la vortojn kaj ekkriis:

„Ve! mi ĉagreniĝas pro mi mem kaj ankaŭ pro ĉiuj aliaj!  
 250 Ne tiom mi plendas pro ĉi tiu edziĝo, kvankam mi bedaŭras  
 ĝin — estas ankaŭ multaj aliaj Achaiinoj, tiel same en la marĉir-  
 kaŭata Ithaka mem, kiel ankaŭ en aliaj urboj — sed ke ni  
 vere tiom malsuperas je forto la disimilan Oduseus, ke ni  
 255 ne kapablas streĉi la pafarkon; tio estas malhonoro, eĉ ĉe la  
 posteularo, kiam ili tion ekscios.”

Lin siavice alparolis Antinoos, la filo de Eupheithes:

„Eurumachos! tiel ne okazos! tion vi ja ankaŭ mem kom-  
 prenas. Hodiaŭ ja estas inter la popolo la festotago, sankta  
 al la koncerna Dio; kaj kiu tiam streĉus pafarkon? Tial kviete  
 260 ĝin formetu. Sed tiujn hakilojn ni lasu ĉiujn stari, ĉar mi ne  
 opinias ke iu venos en la ĉambregon de l' Laert-ido Oduseus  
 kaj ilin forŝtelos. Nu do, la vinverŝisto verŝu vinon en la  
 pokalojn, por ke ni, oferdoninte vinon, lasu kuŝi la kurb-  
 265 la paŝtisto de l' kaprinoj, konduku la plej bonegajn kaprinojn  
 el ĉiuj brutaroj, por ke ni oferdonu femurostojn al Apollon,  
 fama pro sia pafarko, kaj tiam provu la pafarkon kaj finu la  
 konkurson.”

Tiel parolis Antinoos kaj liaj vortoj plaĉis al ili. Nun la  
 270 heroldoj verŝis al ili akvon sur la manojn kaj junuloj plenigis  
 ĝisrande la miksujojn per vino kaj tiun disdonis al ĉiuj, post  
 kiam ili estis verŝintaj iom da vino en la pokalojn por oferi;  
 sed kiam ili estis verŝoferintaj kaj trinkintaj, kiom ilia animo  
 deziris, tiam ruzanime meze de ili parolis la elpensema Oduseus:

275 „Aŭskultu vi je mi, amantoj de l' glorega reĝino, [por ke  
 mi eldiru, kion al mi instigas diri la koro en mia brusto], sed  
 plej multe mi petegas Eurumachos kaj la disimilan Antinoos —  
 ĉar laŭ konveno li diris tiun parolon: nun ĉesigu vi la streĉ-

adon de l' pafarko kaj lasu ĉion al la Dioj; morgaŭ matene la  
280 Diaĵo donos forton al tiu, kiun li volas — nu do! donu al mi  
la glatpoluritan pafarkon, por ke mi meze de vi nun provu  
miajn manojn kaj mian forton, ĉu mi ankoraŭ havas la saman  
fortecon, kiu antaŭe estis en miaj membroj, aŭ ĉu mia vagado  
kaj la malhavo de bona flegado ilin jam detruis.”

285 Tiel li parolis, sed ĉiuj ege koleriĝis kontraŭ li, timante,  
ke li povos streĉi la glatpoluritan pafarkon. Kaj Antinoos  
lin insultis kaj li diris la vortojn kaj parolis:

„Mizera fremdulo! eĉ ne iom da saĝeco vi posedas! Ĉu ne  
estas vi kontenta, ĉar vi kviete manĝi povas meze de ni, potenc-  
290 uloj, kaj neniom de la manĝo mankas al vi kaj plue vi aŭskulti  
povas je niaj vortoj kaj je nia interparolado? Kaj tamen neniu  
alia fremdulo aŭ almozulo iam aŭdas niajn interparolojn.  
Tutcerte vin ekscitas la mieldolĉa vino, kiu ankaŭ malutilas  
al aliaj, se oni ĝin avide englutegas kaj ne ĝin sobre trinkas.

295 La vino ankaŭ frenezigis la Kentaŭron, la gloregan Eurution,  
en la domo de l' kuraĝanima Peirithoos, kiam li venis ĉe la  
Lapithoj. Sed kiam lia spirito estis freneziginta de vino,  
tiam li, furiozante, plenumis abomenajn farojn en la domo de  
Peirithoos. Ĉagreno ekkaptis la heroojn kaj, eksaltinte, ili  
300 lin trenegis tra la antaŭpordon eksteren kaj detranĉis al li per  
la kupro senkompata la orelojn kaj la nazon: kaj tute frenezig-  
inte en sia spirito, li foriris, kiel sargon kunportante en sia  
senprudenta spirito sian konfuzegon. Sekve de tio estiĝis tiam  
batalo inter la Kentauroj kaj la viroj; sed tamen unualoke al  
si mem li kaŭzis malfeliĉon pro sia vinebrieco. Tiel mi antaŭ-  
305 diras ankaŭ al vi malfeliĉon grandan, se la pafarkon vi streĉos:  
tiam vi ne plu spertos komplezon de iu ajn el nia popolo, sed  
tuj ni vin forsendos sur nigra ŝipo al reĝo Echetos, la pereiganto  
de ĉiuj mortidevuloj; kaj de tie vi nepre ne forsaviĝos. Tial  
310 kviete trinku, kaj ne konkuru kontraŭ viroj pli junecaj.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Antinoos! vere, ne estas honorinde kaj juste, malprofitigi  
gastojn de Telemachos, kiu ajn en ĉi tiu domo alvenas. Ĉu  
do vi atendas, se ĉi tiu fremdulo streĉos la grandan pafarkon  
315 de Oduseus, fidante siajn manojn kaj sian fortecon, ke tiam  
li kondukos min al sia domo kaj min faros sia edzino? Ankaŭ  
li mem ja tute ne esperas tion en sia brusto! Sed neniu el vi  
pro tio ĉi tie kun malĝojanta koro manĝu, ĉar tio ja tute ne  
konvenas.”

320 Sin siavice alparolis Eurumachos, la filo de Polubos:

„Filino de Ikarios, tre prudenta Penelope! neniel ni kredas ke li vin forkondukos kiel edzinon; kaj tio ĵa ne decus; sed ni hontas pro la klaĉado de viroj kaj virinoj kaj timas ke eble iu multe malpli eminenta el la Aĉaioj diros pri ni: jen! multe  
 325 malpli fortaj viroj svatiĝas al la edzino de neriproĉebla viro kaj ili eĉ ne kapablas streĉi la glatpoluritan pafarkon. Sed iu alia, vaganta almuzulo, venis kaj senpene streĉis la pafarkon kaj pafis la sagon tra la ferajn hakilojn.” Tiel ili parolos kaj tio estus malhonoro por ni.”

330 Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Eurumachos! neniel estas eble, ke bonfamaj estas inter la popolo tiuj, kiuj senrespekte fordiboĉas la proprajojn de alt-eminenta viro. Kial vi opinias tion malhonoro? Sed tiu fremdulo estas tre altkreska kaj dikmuskola kaj li sin gloras esti  
 335 la filo de nobeleca patro. Sed nu! vi donu al li la glatpoluritan pafarkon, por ke ni vidu. Ĉar jene mi eldiros al vi kaj tio ankaŭ estos plenumata: se li ĝin streĉos kaj se Apollon donos al li honoron, tiam mi lin vestos per belaj vestaĵoj, per mantelo kaj subvesto kaj mi donacos al li ĵetlancon akran, kiel defendilon kontraŭ hundoj kaj viroj, kaj ambaŭflanke akrigitan glavon kaj ankaŭ mi donos al li sandalojn por liaj piedoj kaj tiam mi lasos lin foriri, kien lin instigas iri liaj koro kaj animo.”

Sin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Patrino mia! neniu el la Aĉaioj estas pli rajthava ol mi,  
 345 por doni kaj rifuzi la pafarkon al kiu ajn mi volas, nek ili ĉiuj, kiuj regas super la rokeca Ithaka, nek ĉiuj, kiuj regas super la insuloj kontraŭe de Elis: el ili ĉiuj neniu kontraŭ mia volo perforte min malhelpos, eĉ se mi volus tute fordoni tiun pafarkon al la fremdulo por kunporti ĝin. Sed iru al via ĉambro kaj zorgu pri via laboro, pri la teksilo kaj la ŝpinaĵo kaj ordonu al viaj servistinoj ke ili komencu sian laboron. Male la viroj zorgu pri la pafarko, ni ĉiuj, sed precipe mi mem, ĉar al mi apartenas la supera potenco en la domo.”

Kaj mireginte ŝi rapide returne iris al sia ĉambro, ĉar ŝi  
 355 estis atentinta en sia animo la vortojn prudentajn de sia filo. Kaj, suprenirinte kun siaj servaj virinoj en sian supretaĝan ĉambron, ŝi priploris sian karan edzon Odusseus, ĝis kiam la fajrŝprucokula Athene ŝutis sur siajn palpebrojn dolĉan dormon.

Sed nun la dieca porkpaŝtisto prenis la kurbigitan pafarkon  
 360 kaj ĝin alportis. Sed ĉiuj amantoj ekkriegis en la ĉambrego; kaj jene parolis multaj el la trokuraĝaj junuloj:

„Kien do vi portas la kurbigitan pafarkon, malenviinda

porkpaŝtisto, stultulo? Baldaŭ la rapidaj hundoj, kiujn vi mem elnutris, vin manĝegos ĉe viaj porkoj, malproksime de  
 365 l' homoj, se Apollon kaj la aliaj senmortaj Dioj estos favor-  
 inklinaj al ni."

Tiel ili parolis kaj ektiminte, ĉar multaj kriegis en la ĉambr-  
 ego, li teren metis la pafarkon sur la loko, kie li staris. Sed de  
 alia flanko Telemachos minacante kriis:

„Paĉjo, portu ĉi tien la pafarkon! Alie vi baldaŭ spertos,  
 370 ke estas nebone obei nur al ili ĉiuj: estu singarda, por ke mi  
 ne forpelu vin al la kampo, ĵetante vin per ŝtonoj, kvankam mi  
 estas pli junaĝa: ĉar je forteco mi estas supera al vi. Se mi nur  
 estus same supera je manoj kaj forteco al ĉiuj amantoj, kiuj  
 troviĝas en mia domo: tiam mi baldaŭ multajn el ili je ilia  
 375 malhonoro forpelus el nia domo al ilia propra loĝejo, ĉar ili  
 ĉiam elpensas malbonon."

Tiel li parolis kaj ĉiuj amantoj gaje ekridis pro li kaj ili  
 ĉesigis sian akran koleron kontraŭ Telemachos. Nun la pork-  
 paŝtisto plue portis la pafarkon tra la ĉambrego kaj proksimiĝ-  
 inte al Odusseus, li ĝin donis en liajn manojn. Post tio li venigis  
 380 el la porvirina ĉambro la mamnutristinon Eurukleia kaj ŝin  
 alparolis:

„Telemachos al vi ordonas, tre prudenta Eurukleia! fermi  
 la fortike kunmetitajn pordojn de l' porvira ĉambrego, kaj  
 se iu ekaŭdos ene, en nia fermita ĉambrego, vekriadon kaj  
 bruon de l' viroj, tiam ŝi nepre ne venu ekster la ĉambron,  
 385 sed ĉiuj silente tie restu ĉe sia laboro."

Tiel li parolis kaj liaj vortoj estis bone atentitaj de ŝi kaj  
 tuj ŝi fermis la pordojn de l' bele kuŝanta ĉambrego.

Senbrue nun ankaŭ Philoitios rapidis el la domo eksteren  
 kaj fermis la antaŭpordegon de l' fortike ĉirkaŭbarita antaŭ-  
 390 korto. Sub la kolonaro kuŝis papirusa ŝnurego de ambaŭflanke  
 kurbigita ŝipo; per tiu li firmligis la pordojn kaj tiam ree mem  
 eniris. Tie li iris al la benko, de kie li estis ekstarinta kaj  
 sidiĝis, rigardante al Odusseus. Ĉi tiu jam havis la pafarkon  
 en la manoj kaj ĝin turnis en ĉiajn direktojn, jen ĉi tie ĝin  
 395 provante, jen tie, por vidi ĉu la vermetoj jam traboris la kornon  
 dum la foresto de l' reĝo. Kaj tiel parolis kelkiuj, dum ili  
 alrigardis sian najbaron:

„Tutcerte li estas admiranto kaj kompetentulo rilate al  
 pafarkoj! Eble ankaŭ en lia propra domo kuŝas tiaj pafarkoj,  
 400 aŭ eble li deziras ĝin imiti; kiel li turnadas ĝin ronde en siaj  
 manoj, tiu vagulo, sperta je malicaĵoj."

Siavice parolis alia el la trokuraĝaj amantoj:

„Ke multe da feliĉo estiĝu lia parto, se iam li sukcesos streĉi tiun pafarkon.”

- Tiel parolis la amantoj. Dume la elpensema Oduseus, tuj  
 405 kiam li estis palpe ĉie inspektinta la grandan pafarkon —  
 same kiel, kiam viro, sperta je citroludado kaj kantado, sen-  
 pene streĉas kordon ĉirkaŭ nova turnstreĉileto, post kiam li  
 estas ambaŭflanke fiksinta la fortike torditan inteston de  
 ŝafo — tiel senpene Oduseus streĉis la grandan pafarkon.  
 410 Post tio li prenis per la dekstra mano la tendenon kaj provis  
 ĝian streĉitecon; kaj bele sonis sub liaj fingroj la tendeno,  
 kiel la voĉo de hirundo. Granda teruro nun ekkaptis la  
 amantojn kaj al ĉiuj senkoloriĝis la vizaĝo. Dume Zeus, montr-  
 ante al li antaŭsignon, laŭte ektondrigis. Tiam ekĝojis la  
 415 persistema dieca Oduseus, ĉar sendis al li antaŭsignon la filo  
 de l' ruzega Kronos. Nun li kaptis la rapidan sagon, kiu nuda  
 kuŝis antaŭ li sur la tablo, dum kuŝis kaŝitaj en la kava sagujo  
 la aliaj, kies akrecon la Achajoj estis baldaŭ spertontaj. Ĉi  
 420 tiun tiam tenante sur la mezo de l' pafarko, li tirstreĉis, sidante  
 sur la benko, la tendenon kaj la sagentranĉon, kaj rekte antaŭen  
 celante, li forpafis la sagon kaj li maltrafis neniun el ĉiuj hakiloj,  
 komencante je la unua tenilo kaj la kupropeza sago ilin tra-  
 flugis kaj venis ekster ilin ja la alia flanko. Tiam li alparolis  
 Telemachos:

- „Telemachos! la fremdulo, kiu en via domo restadas, ne  
 425 hontigas vin, ĉar mi ne maltrafis la celon kaj ankaŭ mi ne  
 longan tempon penis streĉi la pafarkon; ankoraŭ mia forto  
 estas restinta same granda kaj ne fariĝis tia, kiel la amantoj,  
 insultas min, kredis. Sed estas nun la tempo por prepari al  
 la Achajoj ankaŭ vespermanĝon, ankoraŭ je la tagolumo!  
 430 kaj cetere ankaŭ post tio por ĝui kantadon kaj citroludadon,  
 ĉar tio plibriligas la festomanĝon.”

Li parolis kaj okulsignis al li: kaj tuj ĉi tiu ĉirkaŭĵetis al  
 si la akran glavon, [Telemachos, la kara filo de l' dieca  
 Oduseus], metis sian manon ĉirkaŭ la ĵetlancon kaj stariĝis,  
 armita per la brila kupro, proksime al Oduseus, flanke de sia  
 propra brakoseĝo.

---

## DUDEK DUA KANTO.

## LA AMANTOJ ESTAS MORTIGATAJ.

Nun la elpensema Oduseus sin senigis de siaj ĉifonoj, saltis sur la grandan sojlon, havante en la manoj la pafarkon kaj la sagujon, plenan de sagoj, kaj tie elŝutis la rapidajn sagojn antaŭ siajn piedojn kaj li parolis meze de l'amantoj:

5 „Tiel do ankaŭ ĉi tiu decida vetkonkurso estas finita; sed nun mi celos alian celon, kiun ankoraŭ neniu viro trafis, por provi ĉu mi ĝin trafos kaj ĉu havigos gloron al mi Apollon.”

Li parolis kaj rekte al Antinoos li pafis akran sagon. Ĉi tiu ĝuste estis levonta belan pokalon, oran kaj dutenilhavan,  
10 kaj jam li havis ĝin en la manoj, por trinki iom da vino; pri mortigo li tute ne pensis en sia animo: kiu ja meze de festenantaj viroj pensus, ke unu sola inter pli multnombraj, eĉ se li treege forta estus, preparus al li pereigan morton kaj la  
15 nigran mortosorton? Lin nun trafis Oduseus, celante al li, per sago en la gorgo kaj la pinto tute trapenetris la molan kolon. Li falis flanken kaj la pokalo glitis el liaj manoj, kiam li estis trafata kaj tuj elfluis dika ŝpruco da homa sango tra  
20 liajn naztruojn. Per rapida ekmovo li trafis per la piedoj la tablon kaj ĝin de si forpuŝis kaj defaligis la manĝaĵojn teren; la pano kaj la rostita viando malpurigis. Laŭte kriis la amantoj tra la ĉambrego, kiam ili vidis la viron fali kaj ili eksaltis de siaj brakseĝoj kaj ekscitite kuris tra la ĉambrego, dum ili en ĉiujn direktojn ĉirkaŭrigardis al la fortike konstruitaj  
25 muroj: sed nenie estis ŝirmilo aŭ fortika lanco por esti kaptata. Tiam ili insultis Oduseus per vortoj koleraj:

„Fremdulo! estas je via malfeliĉo, ke vi celas al viroj; vi ne plu partoprenos aliajn vetkonkursojn: nun certe vin proksimiĝas minaca pereo. Ĉar nun vi estas ja mortiginta viron, kiu estis multsupere plej eminenta el ĉiuj junuloj en  
30 Ithaka; tial vin ĉi tie formanĝegos la vulturoj.”

[Tiel parolis ĉiu viro, ĉar ili opiniis, ke li nevole estis mortiginta la viron; sed tion la stultuloj ne komprenis, ke ankaŭ al ili ĉiuj la ekstrema pereo estis destinita]. Kocere rigardante, ilin alparolis la elpensema Oduseus:

35 „Hundoj! evidente vi opiniis ke mi ne plu atingos mian hejmon kaj revenos el la lando de l' Troianoj, ĉar vi diboĉadis mian havaĵon kaj perforte kutimis dormi kun miaj servaj



virinoj kaj, dum mi mem ankoraŭ vivis, kaŝe vin svatis al mia edzino, nek timante la Diojn, kiuj loĝas en la vasta ĉielo, nek timante, ke en la estonteco la homoj prave indignos pro vi. Sed nun la ekstrema pereco estas destinita al vi."

Tiel li parolis kaj paliga timo ilin ĉiujn ekkaptis [kaj ĉiu maltrankvile ĉirkaŭrigardis, kien li povos forkuri de l' minaca pereco]. Nur Eurumachos lin respondante alparolis:

45 „Se do vere vi estas la Ithakano Odusseus, kiu nun revenis, tiam vi prave ĉi ĉion diris, kiom malbonfaris la Achaioj, ne nur multajn trokuraĝajn agojn en la domo, sed ankaŭ multajn en la kamparo. Sed jen, jam tie kuŝas, kiu estis kulpa pri ĉi ĉio, Antinoos; li ja nin instigis al ĉi ĉiuj faroj, ne, ĉar iel arde li deziris kaj sopiris al tiu edziĝo, sed ĉar li havis aliajn

50 planojn, kiujn ne plenumis al li la Kron-ido, nome esti mem la reĝo en la lando de l' bele kuŝanta Ithaka kaj per embusko mortigi vian filon. Sed nun li estas mortigita, kiel li meritis; tial vi indulgu vian popolon. Kontraŭe ni kolektos inter la

55 popolo kaj ĉiom ni repagos, kiom estas fortrinkita kaj formangita kaj tial ĉiu el ni kondukos al vi kompenson de dudek bovoj kaj kupron kaj oron ni donos al vi, ĝis kiam via koro estos kontentigita; antaŭ tiam ne estas riproĉinde, se vi koleras."

60 Kolere rigardante, lin alparolis la elpensema Odusseus: „Eurumachos! eĉ se vi ĉiuj donus al mi la tutan prapatran heredaĵon vian kaj ĉiom, kiom vi nun posedas kaj kiom ajn vi ankoraŭ de aliaj aldonus, eĉ tiam mi ne lasus miajn manojn ĉesigi la mortigadon, antaŭ ol vi, amantoj, estos punsuferintaj

65 pro ĉiuj viaj krimoj. Nun al vi nur restas batali kontraŭ mi aŭ forkuri, almenaŭ se iu sukcesos eviti la morton kaj la mortosorton: sed mi opinias, ke neniu sin elsavos el la minaca pereco."

Tiel li parolis kaj senfortiĝis tuj iliaj genuoj kaj ilia koro; sed duafoje ilin alparolis Eurumachos:

70 „Amikoj! ĉi tiu viro ja ne retenos siajn nevenkeblajn manojn, sed ĉar li prenis en la manojn la glatigitan pafarkon kaj la sagujon, li pafos de sur la glatpolurita sojlo siajn sagojn, ĝis kiam li estos mortiginta nin ĉiujn. Nu do, ni pensu pri kontraŭstaro! Vi elingigu viajn glavojn kaj vi tenu la tablojn antaŭ via korpo por defendi vin kontraŭ la rapidmortigaj sagoj;

75 kaj densare ni ĉiuj kuratakos kontraŭ lin, por provi, ĉu ni povos lin forpeli de la sojlo kaj de la pordo kaj ĉu ni povos kuri tra la urbo kaj ĉu tre baldaŭ tie la militokrio aŭdebliĝos; tiam ĉi tiu viro baldaŭ estus sagpafinta nun la lastan fojon."

Tiel parolinte li elingigis sian akran glavon, kupran kaj

80 ambaŭflanke tranĉipovan kaj terure kriante li eksaltis al li. Sed sammomente la dieca Oduseus ekpafis sagon kaj lin trafis en la brusto, flanke de l' brustopinto kaj li penetrigis la rapidan ĵetilon en lian hepaton. El sia mano li lasis fali la glavon sur la teron kaj, antaŭen falante trans la tablon, li ruliĝis teren  
 85 kaj dejetis de la tablo sur la teron la manĝaĵojn kaj la dutenilhavan pokalon; per la frunto li bategis kontraŭ la teron, dum li havis angoregon en la koro, kaj per ambaŭ piedoj frapante, li renversis la brakseĝon kaj nebulo malleviĝis antaŭ liajn okulojn.

Nun kuratakis al la glorega Oduseus Amphinomos kaj li  
 90 eksaltis kontraŭ lin kaj elingigis la akran glavon, por provi, ĉu eble Oduseus cedos antaŭ li for de l' pordo. Sed lin malhelpis Telemachos, kiu lin trafis de malantaŭe per la kurprornamita lanco inter la ŝultroj kaj trapenetrigis la lancon tra lian bruston: kun obtuza eksono li falis teren kaj per sia tuta frunto li bategis  
 95 kontraŭ la plankon. Tiam Telemachos forkuris, lasante sian longombran lancon tie, en la korpo de Amphinomos — ĉar li ege timis, ke iu el la Achajoj, dum li eltirus la longombran lancon, eksaltus al li kaj per la glavo trafus lin aŭ, dum li klinus sin, lin batmortigus — kaj ege rapide li kuris kaj tre  
 100 baldaŭ li alvenis ĉe sia kara patro kaj lin proksimiĝante, li diris al li la flugilhavaĵn vortojn:

„Patro, nun mi portos al vi ŝirmilon kaj du lancojn kaj tutkupran kaskon, bone alĝustiĝantan ĉirkaŭ viaj tempioj; kaj mi iros kaj ankaŭ mem almetos la armilaĵon, kaj aliajn armilojn mi donos al la porkpaŝtisto kaj la bovpasistito; ĉar estas pli bone, se oni estas armita.”

105 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Tiam rapide ilin portu, dum mi ankoraŭ havas sagojn por defendi min, por ke ili ne, dum sola mi estas, forpelu min de l' pordo.”

Tiel li parolis kaj tuj obeis Telemachos al sia kara patro kaj rapide li iris al la armilejo, kie kuŝis liaj famkonataj  
 110 armilaĵoj. Da ili li prenis kvar ŝildojn kaj ok lancojn kaj kvar kuprotegitaĵojn kaskojn, ornamitaĵojn per denshara ĉevalovosto. Kun tiuj li reiris kaj tre baldaŭ li revenis ĉe sia kara patro. Li mem unua tiam almetis ĉirkaŭ la korpon la kupron; sammaniere ankaŭ la du servistoj sin vestis per la belaj armaĵoj,  
 115 kaj tiam ili stariĝis flanke de la batalema kaj ruzelpensema Oduseus. Dume ĉi tiu, dum li ankoraŭ havis sagojn por defendi sin, celis kaj trafis ĉiufoje unu el la amantoj en sia propra

ĉambrego kaj densamase ili falis. Sed kiam ekmankis la sagoj al la pafanta reĝo, tiam li metis la pafarkon kontraŭ la pordo-  
 120 kadron de l' fortike fondita ĉambrego, apud unu el la briletaj flankmuroj. Mem li tiam ĵetis ĉirkaŭ siajn ŝultrojn la ŝildon, fabrikitan el kvarobla tavolo da bovoŝeloj kaj li metis sur sian fortan kapon bonfaritan kaskon, ornamitan per ĉevalovosto kaj terure sin movis supre tien kaj reen la hartufo; plue li  
 125 kaptis du ĵetlancojn, havantajn kupran pinton.

En unu el la fortike konstruitaj flankomuroj estis altsojla pordo — super la fundamenta muro de l' bone fondita ĉambrego; ĝi estis la eliro al la strato, sed tie sin trovis fortike kunmetita pordo — kaj Oduseus ordonis al la dieca porkpaŝtisto, ke li  
 130 stariĝu proksime al ĝi kaj bone atentu tie, ĉar ĝi estis la sola enirejo. Nun meze de ili parolis Agelaos, direktante siajn vortojn al ĉiuj:

„Amikoj! Ĉu ne iu supreniri povus al la pordo altsojla kaj tiam alporti sciigon al la popolo, tiel ke plej baldaŭ militokrio sin levus? Tiam ĉi tiu viro baldaŭ estus sagpafinta nun la lastan fojon.”

135 Lin siavice alparolis Melanthios, la paŝtisto de l' kaprinoj:  
 „Tio tute ne ebla estas, didevena Agelaos! ĉar tre proksima estas la bela pordo de la antaŭkorto kaj malfacile estas atingi la elirejon al la strato: eĉ unu sola defendiforta viro povus deteni ĉiujn. Sed nu, mi portos el la armilejo armilojn al vi  
 140 por armi vin. Ĉar mi opinias, ke en ĝin, kaj nenien alie, Oduseus kaj lia brilglora filo deponis la armilojn.”

Tiel parolinte, Melanthios, la paŝtisto de l' kaprinoj, grimpis tra la lumofendojn de la ĉambrego kaj iris al la armilejo de Oduseus. El tiu li forprenis dudek ŝildojn kaj same multajn  
 145 lancojn kaj same multajn kuprotegitajn kaskojn, ornamitajn per denshara ĉevalovosto. Tiam li forkuris kaj tre rapide li portis kaj donis la armilojn al la amantoj. Tiam senfortiĝis la genuoj kaj la koro de Oduseus, kiam li vidis, ke ili ĉirkaŭmetis al si la armilojn kaj svingegis la longajn lancojn en la manoj. Ĉar ŝajnis al li, ke la batalo fariĝos terura. Rapide li  
 150 nun alparolis Telemachos per la flugilhavaj vortoj:

„Telemachos! tutcerte unu el la virinoj en la domo nin ambaŭ devigas al ĉi tiu pereiga batalo, aŭ eble Melantheus!”

Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Patro! mi mem eraris en ĉi tiu rilato — kaj neniu alia  
 155 estas kulpa pri ĝi — ĉar mi lasis malfermita la fortike kunmetitan pordon de la armilejo; kaj tion observis spionanto pli prudenta

ol mi. Tial, dieca Eumaios! iru kaj fermu la pordon de l' armilejo kaj atentu, ĉu estas iu el la virinoj, kiu tion faras, aŭ ĉu Melanthos, la filo de Dolios, kiun mi ja suspektas."

160 Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al la alia. Dume denove iris al la armilejo Melanthios, la paŝtisto de l' kaprinoj, por forporti belajn armilaĵojn; sed tion rimarkis la dieca porkpaŝtisto kaj tuj li alparolis Oduseus, kiu staris apud li:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! Jen denove 165 iras tiu pereigema viro, kiun ni jam suspektis, al la armilejo. Diru nun al mi laŭvere, ĉu mi lin mortigu, almenaŭ se mi estos la pli forta, aŭ ĉu mi ĉi tien lin konduku, por ke li estu punata pro la multaj krimoj, kiujn li mem finfaris en via domo."

170 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Mi kaj Telemachos retenos la eminentajn amantojn en la interno de l' ĉambrego, kiom ili ajn bataldeziraj estas; sed vi ambaŭ ligu post la dorso liajn manojn kaj piedojn kaj lin 175 post kiam vi estos ligintaj fortike plektitan ŝnuron al li, tiam lin suprentiru laŭlonge de l'alta kolono kaj lin proksimigu al la tegmentotraboj, por ke li, ankoraŭ longan tempon estante viva, suferu terurajn dolorojn."

Tiel li parolis kaj ili atente je li aŭskultis kaj obeis: rapide ili iris al la armilejo kaj ili restis nerimarkitaj de la ene estanta 180 viro. Li ja estis serĉanta armilojn en la malantaŭa parto de la armilejo, dum ili ambaŭ staris atendante ambaŭflanke de l' pordokadro. Sed kiam Melanthios, la paŝtisto de l' kaprinoj, volis paŝi trans la sojlon, havante en unu mano belan kaskon kaj en la alia larĝan ŝildon, malnovan kaj makuliĝintan de 185 rusto, de l' heroo Laertes, kiun li kutimis porti kiel junulo — sed tiam ĝi tie kuŝis kaj la kunkudroj de l' rimenoj estis mal-kudriĝintaj — tiam ili ambaŭ eksaltis al li kaj kaptis lin kaj je la haroj ili lin kuntrenis internen kaj teren lin ĵetis sur la plankon dum lia koro jam malĝojis; post tio ili torde 190 turnis liajn piedojn kaj manojn kaj tiujn treege firme kunligis per kordoloriga ŝnuro, kiel li ordoninta estis, [la filo de Laertes, la persistema, dieca Oduseus], kaj post kiam ili estis ligintaj fortike kunmetitan ŝnuron al li, tiam ili lin suprentiris laŭlonge de l'alta kolono kaj lin proksimigis al la tegmentotraboj. Tiam lin insulte alparolis vi, ho porkpaŝtisto Eumaios:

195 „Nun vi vere bonege, Melanthios! povas gardi ĉi tiun nokton, etendite sur mola kuŝejo, kiel konvenas al vi; ankaŭ nun ne restos nerimarkite de vi, kiam proksimiĝos el la fluoj

de Okeanos la frumatena, ortrona Diino, je tempo, kiam vi kutimas konduki al la amantoj kaprinojn, por prepari por ili la manĝon en la domo."

- 200 Tiel ĉi tiu tie estis postlasata, pendante je pereiga ŝnuro. Sed ili ambaŭ realmetis la armilojn kaj fermis la brilan pordon kaj post tio iris al la kuraĝa, ruzanima Odusseus. Tie nun ili staris kun ardega kuraĝo, ili kvarope sur la sojlo kaj la amantoj multope kaj bravaj, interne de l' ĉambrego. Sed nun al ili  
205 proksimiĝis la filino de Zeus, Athene, similante al Mentor rilate staturon kaj voĉon. Ŝin vidante, ekĝojis Odusseus kaj li diris la vortojn:

„Mentor! detenu la pereon kaj estu memora pri mi, la kara kunulo via, kiu ĉiam faris al vi bonon; krome vi estas samaĝa kiel mi."

- 210 Tiel li parolis, kvankam li konjektis, ke estas Athene, kiu kutimas instigi la militistojn. Sed siaflanke la amantoj laŭte ekkriis en la ĉambrego; unua ŝin insultis la Damastor-ido Agelaos:  
„Mentor! vin gardu, por ke ne rezoninklinigu vin per vortoj siaj Odusseus batali kontraŭ la amantoj kaj helpi lin mem.  
215 Ĉar mi opinias ke nia plano tiel estos plenumata; kiam ni estos mortigintaj tiujn, la patron kaj la filon, tiam kune kun ili ankaŭ vi mortigata estos, pro tio, kion vi intencas fari ĉi tie en la domo: per via propra kapo vi estos punata pro tio. Sed kiam ni estos forprenintaj vian vivoforton per la kupro,  
220 tiam ni kunigos ĉiujn posedaĵojn, kiujn vi havas en-kaj eksterdome, kun la posedaĵoj de Odusseus, kaj ĉi ĉion ni dividos inter ni; ankaŭ viajn filojn kaj viajn filinojn ni ne lasos vivaj en via domo, kaj ni ne allasos, ke via zorgema edzino restadu en la urbo de Ithaka."

- Tiel li parolis kaj Athene koleriĝis ankoraŭ pli multe en  
225 sia koro kaj ŝi insultis Odusseus per koleraj vortoj:

- „Ne plu vi havas, Odusseus, nekontraŭstareblan kuraĝon nek iun defendiforton, kian vi havis, kiam pro la blankkubuta Helena, la idino de nobla patro, vi bataladis senĉese dum naŭ jaroj kontraŭ la Troianoj kaj mortigis multajn virojn en la  
230 terura militado [kaj kiam per via konsilo estis venkokupata la larĝstrata urbo de Priamos]. Kial do nun, kiam vi estas reveninta al via loĝejo kaj viaj posedaĵoj, vi vekrias, ĉar vi devas esti kuraĝa kontraŭ ŝiaj amantoj? Sed nu, amiko! stariĝu ĉi tie, flanke de mi, kaj miajn agojn atentu, por ke vi  
235 vidu, kiel meze de viroj malamikecaj la Alkim-ido Mentor rekompencas viajn bonfarojn al vi."

Si parolis, sed ankoraŭ ne plene ŝi donis al li la venkon decidan, sed unue ŝi volis provi la kuraĝon kaj defendoforton de Oduseus kaj de lia multglora filo. Mem ŝi tiam sin levis supren al la plafonotraboj de l' fulgumiĝinta ĉambrego  
 240 kaj tie sidiĝis, simila je la eksterajo al hirundo.

Dume incitis al batalo la Damastor-ido Agelaos kaj Euru-  
 nomos kaj Amphimedon kaj Demoptolemos kaj la Poluktor-  
 ido Peisandros kaj la brava Polubos: ĉi tiuj ja multe superis  
 245 rilate kuraĝon la aliajn amantojn, kiuj ankoraŭ vivis kaj batalis  
 por sia vivo; ĉar la aliajn jam estis mortigintaj la pafarko kaj  
 la multaj sagoj. Meze de ili nun parolis Agelaos, direktante al  
 ĉiuj siajn vortojn:

„Amikoj! nun ĉi tiu viro baldaŭ retenos siajn nevenkeblajn  
 manojn: ĉar ankaŭ Mentor jam de li foriris, post kiam li diris  
 250 sian vanan fanfaronajon, kaj nur ili ankoraŭ postrestis antaŭ  
 la pordo. Tial vi nun ne ĉiuj kune ĵetu viajn longajn ĵetlancojn  
 al li, sed nu! unue vi sesope ĵetu viajn lancojn, por provi,  
 ĉu eble Zeus permesos, ke estu trafata Oduseus kaj ni akiru  
 gloron. Pri la aliaj ni ne havu zorgon, se li nur estos falinta.”

255 Tiel li parolis kaj ili ĉiuj ĵetis siajn lancojn, kiel li ordonis,  
 arde dezirante lin mortigi; sed Athene faris ĉiujn ĵetojn mal-  
 trafaj. [Unu el la amantoj trafis la pordokadron de l' bone  
 fondita ĉambrego, alia la fortike kunmetitan pordon kaj de  
 tria penetris la peze kuprotegita fraksena lanco en la flankan  
 260 muron]. Sed kiam ili estis evitintaj la lancojn de l'amantoj,  
 tiam meze de ili ekparolis la persistema dieca Oduseus:

„Amikoj! nun ankaŭ mi ordoni al vi volas, ĵeti viajn lancojn  
 en la aron da amantoj, kiuj krom siajn antaŭajn krimojn nun  
 ankaŭ deziras nin prirabi de nia vivo.”

265 Tiel li parolis kaj ili ĉiuj ĵetis siajn akrajn lancojn, celante  
 rekte antaŭen. Oduseus mortigis Demoptolemos, Telemachos  
 mortigis Euruades, la porkpaŝtisto mortigis Elatos kaj la  
 bovpaŝtisto mortigis Pisandros. Ĉi ĉiuj kune tiam per la dentoj  
 270 mordis la vastan plankon kaj cedis returne la amantoj al la  
 posta parto de l' ĉambrego. Nun la aliaj alrapidis kaj tiris la  
 lancojn el la kadavroj.

Ankoraŭfoje la amantoj ĵetis siajn akrajn lancojn, dezirante  
 lin mortigi, sed Athene faris la plej multajn ĵetojn maltrafaj.  
 Unu el la amantoj trafis la pordokadron de l' bone fondita  
 275 ĉambrego, alia la fortike kunmetitan pordon kaj de tria penetris  
 la peze kuprotegita frakcena lanco en la flankan muron. Tamen  
 Amphimedon trafis grate Telemachos je la mano ĉe la pojno,

sed la kupro nur difektis la supran tavolon de l' haŭto. Ankaŭ  
 280 Ktesippos vundetis al Eurumachos per sia longa ŝetlanko la  
 ŝultron super la ŝildrando; sed tiam la lanco flugis super ĝin  
 kaj falis teren. Nun denove la kuraĝa, ruzanima Oduseus kaj  
 liaj karuloj ŝetis siajn akrajn lancojn en la arojn da amantoj.  
 Nun la urbruiniga Oduseus trafis Eurudamas, Telemachos  
 285 trafis Amphimedon kaj la porkpaŝtisto trafis Polubos; plue  
 la paŝtisto de la bovoj trafis Ktesiphos en la brusto kaj ĝojeg-  
 ante li diris al li:

„Ho Poluthers-ido insultema! neniam plu fanfaronu,  
 cedante al via sensaĝeco, sed lasu la parolon al la Dioj, ĉar  
 ili ja vere estas multe pli potencaj! Ĉi tio al vi estu gast-  
 290 donaco interŝanĝe por la bovpiedo, kiun vi donis antaŭ nelonge  
 al la disimila Oduseus, kiam li kiel almozisto iris tra la  
 domo.”

Tiel parolis la paŝtisto de l' kurbkornaĵ bovoj. Oduseus  
 nun trafis per sia longa lanco de proksime la Damastor-idon  
 kaj Telemachos trafis la Euenor-idon Leiokritos per sia lanco  
 295 meze en la mola ventro kaj li penetrigis tute tra ĝin la kupran  
 pinton. Li falis teren kaj per sia tuta frunto li bategis kontraŭ  
 la plankon. Sed nun Athene suprenlevis la hompereigan egidon,  
 supre sur la plafonotraboj; kaj tuj ilia spirito konfuziĝis.  
 Time nun ili ekforkuris tra la tuta ĉambrego, kiel la bovoj de  
 300 brutaro, kiujn la tien kaj reen fluganta tabano atakas kaj  
 furiozigas, en la postprintempa tempo, kiam la tagoj estas  
 longaj. Sed ili, same kiel kurbungegaj kaj kurbbekaj agloj,  
 rapidege flugante malsupren de sur la montoj, sin ŝetas sur  
 la birdojn — kaj densare ĉu tiuj timege flugas al la ebenaĵo,  
 305 sed la agloj sin faligas sur ilin kaj ilin mortigas kaj nek defendo  
 nek forsaviĝo estas ebla al la birdoj kaj la homoj plezure rigardas  
 al tiu ĉaso — sammaniere ili sin ŝetis en la ĉambrego sur la  
 amantojn kaj ilin batmortigis laŭvice, sin turnante al ĉiuj  
 direktoj; kaj abomena vekriado ekestis de la faligitoj kaj la  
 tuta planko ŝaŭmis de sango.

310 Tiam Leodes alkuris kaj ĉirkaŭprenis la genuojn de Oduseus  
 kaj petegante li diris al li la flugilhavajn vortojn:

„Preĝante mi kaptas viajn genuojn, Oduseus! tial min  
 indulgu kaj kompatu; mi diras al vi ke mi neniam per miaj  
 vortoj aŭ faroj malhonoris iun el la virinoj en la domo; sed  
 315 ĉiam mi klopodis deteni la aliajn amantojn, kiam iu ajn  
 el ili faris ion tian; sed neniam ili persvadiĝis, kiam mi diris  
 ke ili detenu siajn manojn de l' malbono; tial pro sia trokuraĝeco



ili atingis teruran mortosorton. Sed mi, kiu estis inter ili la oferisto, falos, nenion malbonfarinte: tiel poste neniam ekzistas dankeco pro bonaj faroj.”

- 320 Kolere rigardante, lin alparolis la elpensema Oduseus:  
 „Se do vere vi vin gloras esti la oferisto inter ili, tiam vi certe estos ofte preĝinta en la domo ke ekhavu la agrabla hejmenvojaĝo mia malfeliĉan finon en fremda regiono, sed ke mia edzino sekvu vin kaj nasku al vi infanojn. Tial vi nepre  
 325 ne evitos la dolorigan morton.”

Tiel parolinte, li kaptis per dikmuskola mano glavon, apud li kuŝantan, kiun Agelaos estis lasinta fali teren, kiam li estis mortigata; per tiu li lin batis meze tra la nukon. Kaj dum li eligis krion, lia kapo falis en la polvon.

- 330 La Terpi-ido Phemios provis eviti la nigran mortosorton, la kantisto, kiu devigite kutimis kanti meze de l'amantoj. Li staris apud la altsojla pordo, havante en la manoj la laŭtsonan liron kaj li pripensis en sia animo, ĉu li kaŝe foriros el  
 335 la ĉambrego kaj sidiĝos ĉe la arte fabrikita altaro de l' domprotektata Zeus, kie Laertes kaj Oduseus forbruligis ofte multajn femurostojn de bovoj, aŭ ĉu li al Oduseus kuros kaj ties genuojn petege ĉirkaŭprenos. Tiel al li ŝajnis, dum li pripensis, esti plej bone: ĉirkaŭbraki la genuojn de la Laert-ido Oduseus.  
 340 Rapide li nun metis la kavan liron sur la teron, inter la vinmiksujoj kaj la arĝentnajla brakseĝo kaj tiam li kuris al Oduseus kaj ĉirkaŭkaptis ties genuojn kaj petegante li diris al li la flugilhavajn vortojn:

„Preĝante mi kaptas viajn genuojn, Oduseus! Tial min indulgu kaj kompatu. Poste vi mem bedaŭron havos, se vi

- 345 estos mortiginta min, la kantiston, kiu honore al Dioj kaj homoj kantas. Min neniu instruis, sed iu Diaĵo inspiris en mian spiriton ĉiajn kantojn kaj kiam mi kantas ion por vi, tiam al mi ŝajnas, kvazaŭ mi kantas por Diaĵo. Tial ne deziru senkapigi  
 350 min. Ankaŭ Telemachos, via kara filo, atesti povus, ke tute ne libervole aŭ pro avido al profito mi kutimis veni ĉi tien, por kanti por la amantoj post la manĝo, sed perforte ili min ĉi tien kondukis, ĉar ili estis multe pli multnombraj kaj potencaj.”

Tiel li parolis kaj lin aŭdis la brava kaj forta Telemachos

- 355 kaj rapide li diris al sia patro, kiu staris proksime al li:  
 „Ĉesu kaj ne vundu ĉi tiun senkulpulon per la kupro! Ankaŭ la heroldon Medon, kiu ĉiam min prizorgis en mia loĝejo, kiam mi estis ankoraŭ infano, ni savu, almenaŭ se lin ne

mortigis jam Philoitios aŭ la porkpaŝtisto, aŭ se li ne renkontis  
360 vin, dum vi kuratakis tra la ĉambrego.”

Tiel li parolis kaj lin aŭdis la prudentsperta Medon; ĉar  
kuntirite li kuŝis sub brakseĝo kaj la felo de bovo ĵus sen-  
haŭtigita kuŝis sur li, ĉar tiel li provis eviti la nigran sorton.  
Rapide li nun grimpis de sub la brakoseĝo kaj tuj demetis  
365 la bovofelon, kaj tiam li kuris al Telemachos kaj ĉirkaŭprenis  
liajn genuojn kaj petegante li diris al li la flugilhavajn vortojn:

„Amiko! jen mi estas; ĉesu kaj diru al via patro ke li, la  
ege forta, min ne difektu per la akra kupro, dum li koleras  
kontraŭ la amantoj, kiuj senĉese fordiboĉadis liajn havaĵojn  
370 en lia loĝejo, dum ili, la stultuloj, tute ne respektis vin.”

Ridetante lin alparolis la elpensema Oduseus:

„Ĉar ĉi tiu vin protektis kaj savis, tial kvietiĝu, por ke vi  
ekkomprenu en via animo kaj ankaŭ sciigu al aliaj, ke bona  
agado estas multe pli preferinda ol malbona agado. Sed nun  
375 eliru vi la ĉambregon kaj ekstere vi sidiĝu en la antaŭkorto,  
for de l' mortigado, vi kaj la multkanta kantisto kaj tie vi  
atendu, ĝis kiam mi estos finfarinta en la domo, kion mi devas  
fari.”

Tiel li parolis kaj ili tuj eliris ekster la ĉambregon; kaj  
ambaŭ sidiĝis ĉe la altaro de l' granda Zeus, time ĉirkaŭrig-  
380 ardante al ĉiuj direktoj kaj ankoraŭ ĉiam atendante la morton.

Atente nun Oduseus ĉirkaŭrigardis en sia loĝĉambrego, ĉu  
ankoraŭ iu el la viroj viva sin tenis kaŝita por eviti la nigran  
mortosorton. Sed ĉiujn kune li ilin vidis kuŝi en sango kaj  
polvo, multnombraj, kiel fiŝoj, kiujn la fiŝkaptistoj per sia  
385 multmaŝa reto tiras sur la kurban marbordon el la grizkolora  
maro — kaj ili ĉiuj amase kuŝas sur la sablo, sopirante al la  
ondoj de la maro kaj la brila suno de ili forprenas la vivon —  
tiel tiam ankaŭ la amantoj amase kuŝis unu sur la alia. Tiam  
390 parolis al Telemachos la elpensema Oduseus:

„Telemachos! nu do, nun venigu al mi la mamnutristinon  
Eurukleia, por ke mi diru ion al ŝi, kion mi ĵus ekpensis en  
mia animo.”

Tiel li parolis kaj Telemachos tuj obeis al sia kara patro  
kaj skuante la pordon li alparolis la mamnutristinon Euru-  
kleia:

395 „Rapide nun venu ĉi tien, grandaĝa maljunulino, kiu la  
ĉefino estas de la servaj virinoj en nia domo; venu; vin vokas  
mia patro, por diri ion al vi.”

Tiel li parolis kaj liaj vortoj estis bone atentataj de ŝi;

kaj ŝi malfermis la pordon de l' bele kuŝanta porvirina ĉam-  
 400 brego kaj rapide iris, sed ŝin antaŭiris Telemachos. Tie ŝi  
 tiam trovis Odusseus meze de l' mortigitaj korpoj, makulita  
 de sango kaj malpuraĵo, same kiel leono, kiu rondiras, manĝeg-  
 inte la karnon de bovo el la kamparo — ĝia tuta brusto kaj  
 405 ĝiaj ambaŭflankaj vangoj estas sangmakulitaj kaj terura estas  
 ĝia aspekto — tiel ankaŭ Odusseus estis ŝprucmakulita sur  
 siaj piedoj kaj manoj. Tuj kiam ŝi ekvidis la kadavrojn kaj la  
 egan sangobanon, tiam ŝi estis laŭte alvokonta la Diojn,  
 ĉar grandan faritaĵon ŝi rigardis, sed Odusseus ŝin malhelpis  
 kaj retenis, kvankam ŝi arde tion deziris kaj ŝin alparolante  
 410 li diris al ŝi la flugilhavajn vortojn:

„Maljunulino! en via interno ĝoju, sed vin retenu kaj ne  
 alvoku laŭte la Diojn; ne estas dece preĝi al la Dioj meze de  
 mortigitaj viroj. [Sed ilin subigis la destino de la Dioj kaj  
 iliaj propraj trokuraĝaj faroj: ĉar ili neniun kutimis respekti  
 415 el la surteraj homoj, nek maleminentulon nek nobelon, kiu  
 petegante al ili venis; tiel pro sia trokuraĝeco ili atingis teruran  
 mortosorton.] Sed nu do, nomu al mi la virinojn en la domo,  
 tiel same tiujn, kiuj malestimas min, kiel ankaŭ, kiuj estas  
 senkulpaj.”

Lin siavice alparolis la kara mamnutristino Eurukleia:

420 „Tutcerte, kara infano! mi rakontos al vi la veron. Kvindek  
 virinoj estas en via loĝejo, [servistinoj, al kiuj ni instruis  
 fari sian laboron, ŝpini la lanon kaj toleri la sklavecon]: el  
 ili entute dek du fordonis sin al senhonteco kaj ili nek respektas  
 425 min nek Penelope mem. [Estas vere ke antaŭ nelonge Tele-  
 machos estiĝis plenkreska, sed lia patrino ne lasis lin komandi  
 super la servaj virinoj]. Sed nu! mi volas supreniri al la brileta  
 supretaĝa ĉambro kaj diri ĉi ĉion al via edzino, al kiu havigis  
 iu Diaĵo la dormon.”

430 Sin respondante alparolis la elpensema Odusseus:

„Ankoraŭ ne ŝin veku, sed diru al la virinoj, kiuj antaŭe  
 faris hontindaĵojn, ke ili venu ĉi tien.”

Tiel li parolis; kaj la maljunulino rapidis el la ĉambro por  
 sciigi tion al la virinoj kaj por instigi ilin ke ili venu.

435 Post tio li vokis al si Telemachos kaj la bovpaŝtiston kaj la  
 porkpaŝtiston kaj diris al ili la flugilhavajn vortojn:

„Unue vi nun fortrenu la kadavrojn kaj vi ordonu al la  
 virinoj ke ili vin helpu; post tio vi purigu la belegajn brakoseĝ-  
 ojn kaj la tablojn per akvo kaj per spongoj truhavaj. Sed  
 440 kiam vi estos ordigintaj la tutan ĉambregon, tiam vi konduku

la servistinojn ekster la bone fonditan loĝĉambregon, inter la kupoldometon kaj la fortikan ĉirkaŭbarilon de la antaŭkorto, kaj tie ilin batfaligu per longpintaj glavoj, ĝis kiam vi estos forprenintaj de ĉiuj la vivon kaj estos ilin igintaj forgesi pri  
 445 la amo volupta, kiun ili ĝuis sub la amantoj, kiam ili kaŝe sin kunigis kun ili.”

Tiel li parolis; nun venis densare ĉiuj virinoj, terure vekri-  
 ante kaj verŝante abundajn larmojn. Unue ili forportis la  
 450 mortigitajn korpojn kaj ilin metis unu kontraŭ la alian sub la kolonaron de l' fortike ĉirkaŭbarita korto. Kaj Oduseus mem komandis kaj rapidigis ilin; kaj ili ĉiujn portis eksteren, kvankam kontraŭ sia volo. Sed post tio ili purigis la belegajn brakoseĝojn kaj la tablojn per akvo kaj per spongoj truhavaj. Dume Telemachos kaj la bovpaŝtisto kaj la porkpaŝtisto  
 455 frotpurigis per skrapiloj la plankon de l' fortike konstruita loĝĉambrego kaj la servistinoj forportis la malpuraĵon kaj ĝin ĵetis ekster la ĉambregon. Sed kiam ili estis ordigintaj la tutan ĉambregon, tiam ili kondukis la servistinojn ekster la bone fonditan loĝĉambregon, inter la kupoldometon kaj la fortikan ĉirkaŭbarilon de la antaŭkorto kaj ilin puŝkulpelis  
 460 en malvastan angulon, de kie tute ne estis eble forkuri. Tiam meze de ili ekparolis la prudenta Telemachos:

„Vere, ne je morto honesta mi deziras forpreni la vivon de tiuj, kiuj ŝutis malhonoron super mian kapon kaj super mian patrinon kaj kiuj nokte dormis flanke de l'amantoj.”

465 Tiel li parolis kaj ligante ŝnuron de ŝipo kun nigra antaŭsteveno al granda kolono de l' kupoldometo, li ĵetis ĉirkaŭ ĉies kolon banton kaj tiam streĉis kaj suprentiris la ŝnuron, por ke neniu povu atingi la teron per siaj piedoj. Kiel kiam larĝflugilaj turdoj aŭ kolumboj kelkfoje sin ĵetas en bantkaptilon, kiu troviĝis en la arbeto, kiam ili dezire flugas  
 470 al sia nesto — sed terura ripozejo ilin subite ekkaptis — tiel ankaŭ ili tie pendis kaj iliaj kapoj formis longan vicon kaj ĉirkaŭ ĉies kolo estis banto, por ke ili mortu la plej kompatindan morton. Per la piedoj ili baraktis ankoraŭ kelkan tempon, kvankam tute ne longe.

Nun ili kondukis Melanthios el la armilejo tra la antaŭdomon kaj la antaŭkorton, detranĉis per la senkompata kupro liajn nazon kaj orelojn, elŝiregis liajn seksajn partojn, por esti krudaj formanĝegataj de la hundoj kaj fine dehakis kun kolera animo liajn manojn kaj piedojn.

Post tio ili lavis siajn manojn kaj piedojn kaj revenis al

- Oduseus en la loĝĉambregon; plenumita nun estis la laboro.
- 480 Nun Oduseus alparolis la karan mamnutristinon Eurukleia:  
 „Nun alportu, maljunulino! sulfuron, la rimedon kontraŭ ĉiu malbono kaj ankaŭ portu al mi fajron, por ke mi purigu la ĉambregon per sulfurofumo. Ankaŭ petu al Penelope, ke ŝi venu ĉi tien kun siaj servaj virinoj; instigu ankaŭ ĉiujn aliajn servistinojn en la domo, ke ili venu.”
- 485 Lin siavice alparolis la kara mamnutristino Eurukleia:  
 „Certe vi ĉi ĉion, mia infano, parolis laŭ konveno. Sed nu, mi portu al vi vestojn, mantelon kaj subveston, ĉar vi ne tiel staru en la ĉambrego, je viaj larĝaj sultroj nur kovrite per ĉifonoj; tio prave estus mallaŭdata.”
- 490 Ŝin respondante alparolis la elpensema Oduseus:  
 „Fajron mi nun unualoke havu en la ĉambrego.”  
 Tiel li parolis kaj ne malobeis la kara mamnutristino Eurukleia kaj ŝi portis fajron kaj sulfuron. Kaj Oduseus taŭge purigis per sulfurofumo la ĉambregon kaj la tutan domon kaj la antaŭkorton.
- 495 Denove nun foriris la maljunulino tra la bela domo de Oduseus, por sciigi la virinojn kaj por ilin instigi, ke ili venu. [Ĉi tiuj nun iris el la porvirina ĉambrego, portante torĉojn en la manoj]. Ĉiuj nun ĉirkaŭis kaj bonvenigis Oduseus kaj, lin salutante, kisis liajn kapon kaj ŝultrojn, dum ili prenis
- 500 liajn manojn; kaj dolĉa deziro al plorado kaj ĝemado lin ekkaptis, ĉar ĉiujn li rekonis en sia koro.

---

## DUDEK TRIA KANTO.

### PENELOPE REKONAS ODUSSEUS.

- Nun la maljunulino ĝojridante supreniris al la supretaĝa ĉambro, por rakonti al sia mastrino, ke ŝia kara edzo estas en la domo; rapidis ŝiaj genuoj kaj rapidpaŝetis ŝiaj piedoj. Kaj sin klinante super ŝian kapon ŝi haltis kaj diris al ŝi la vortojn:
- 5 „Vekiĝu, Penelope, kara infano! por vidi per viaj propraj okuloj, kion vi ĉiujn tagojn arde deziras; venis Oduseus kaj, kvankam veninte nur malfrue, li nun fine estas hejme kaj li mortigis la trokuraĝajn amantojn, kiuj ade malfeliĉon kaŭzis al lia domo kaj fordiboĉis lian posedon kaj perforte kondukis kun lia filo.”

- 10    Ŝin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:  
 „Kara panjo! freneza vin faris la Dioj, kiuj ja kapablas  
 fari senprudenta eĉ tiun, kiu estis plej prudenta kaj kiuj  
 ankaŭ povas havigi al senintelektulo saĝecon: ili certe vin  
 blindigis, ĉar antaŭe vi havis taŭgan racion. Kial vi min mokas,  
 15 dum mia animo jam estas multdolora, rakontante tiujn fing-  
 aĵojn, kaj kial vi min vekis el agrabla dormo, kiu ĉirkaŭis  
 miajn palpebrojn kaj min tenis kaptita? Ĉar mi ne plu tiel  
 bone dormis, de kiam Oduseus foriris por viziti la fatalan  
 20 Ilion, kiu estas nenominda! Sed nu, nun iru malsupren kaj  
 reiru al la porvirina ĉambro. Ĉar se iu alia el la virinoj, kiuj  
 estas servaj al mi, estus veninta por rakonti tion al mi kaj  
 min estus vekinta el la dormo, tiam pro tio mi baldaŭ je ŝia  
 honto estus forsendinta ŝin por iri returne en la porvirinan  
 ĉambron; sed pardonigas via grandaĝeco vin.”

- 25    Ŝin siavice alparolis la kara mamnutristino Eurukleia:  
 „Neniel mi vin mokas, kara infano, sed envere venis Odus-  
 seus kaj nun estas en la domo, kiel mi diras: li estas tiu fremdulo  
 kiun ĉiuj malhonoris en la loĝĉambrego. Telemachos jam  
 longe sciis ke li estas hejme, sed pripensece li tenis kaŝitaj  
 30 la intencojn de sia patro, ĝis kiam ĉi tiu estis puninta la per-  
 fortecon de l' trokuraĝaj viroj!”

Tiel ŝi parolis kaj Penelope ekĝojis kaj eksaltante de sia  
 lito ŝi ĉirkaŭbrakis la maljunulinon kaj lasis ruliĝi larmojn  
 el siaj palpebroj kaj ŝin alparolante ŝi diris la flugilhavajn  
 vortojn:

- 35    „Nu do, ho kara panjo, diru al mi laŭvere: se li do vere  
 hejme venis, kiel vi diras, kiel li do metis manojn sur tiujn  
 senhontajn amantojn, dum li ja sola estis kaj ili multnombre  
 ĉiam restadis en la domo?”

- Ŝin siavice alparolis la kara mamnutristino Eurukleia:  
 40    „Mi nek vidis nek eksciis ĝin, sed nur aŭdis ilian vekriadon,  
 kiam ili estis mortigataj; ni sidis terurigitaj en la interna  
 parto de la fortike konstruita porvirina ĉambro, dum la bone  
 kunmetita pordo estis fermita, ĝis kiam fine via filo Telemachos  
 venigis min el la ĉambro; ĉar lia patro estis lin sendinta por  
 45 voki min. Tiam mi trovis Oduseus, starantan meze de l'  
 kadavroj de la mortigitaj; ili kuŝis ĉirkaŭ li, etenditaj sur la  
 planko malmola, unu sur la alia. Tion vidante, vi estus ĝojinta  
 en via koro, [nome ke li estis makulita per sango kaj malpuraĵo,  
 50 kvazaŭ leono]. Sed nun amase ili ĉiuj kuŝas apud la pordego  
 de la antaŭkorto, kaj grandan fajron li ekbruligis kaj nun li

estas puriganta per sulfuro la belegan domon; kaj min li sendis por venigi vin. Sed sekvu min, por ke vi ambaŭ fordonu vian koron al ĝojo, post kiam vi trasuferis multajn malfeliĉojn. Nun do fine plenumiĝis tio, kion vi tiel longan tempon jam arde deziras: li vivas kaj estas reveninta al sia kameno kaj li estas retrovinta vin kaj sian filon en sia domo; kaj la amantojn, kiuj malhonore kun li kondutis, tiujn ĉiujn li vengpunis en sia domo."

Sin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Kara panjo! ankoraŭ ne tro multe ĝojegu kaj ĝojridu. Vi ja scias, kiel arde estus dezirata lia veno en nia domo de ni ĉiuj, precipe de mi kaj mia filo, kiu al ni ambaŭ naskiĝis: sed via rakonto, kiel vi ĝin al mi sciigas, certe ne estas vera, sed evidente iu el la senmortuloj mortigis la nobelajn amantojn, indignante pro ilia trokuraĝeco kordoloriga kaj iliaj malbonaj faroj. Ĉar ili nenium kutimis respekti el la surteraj homoj, nek maleminentulon nek nobelon, kiu petegante al ili venis; tial pro sia senpripenseco ili suferis malbonon. Sed Oduseus perdis ie malproksime la revenon al la Achaia lando kaj ankaŭ perdis sian vivon."

Sin post tio respondis la kara mamnutristino Eurukleia:

„Mia infano! kia vorto eliĝis el la vico de viaj dentoj! Dum via edzo estas ene ĉe sia kameno, vi pretendas ke neniam li revenos hejmen; via koro vere estas ĉiam nefidema. Sed nu! mi diros al vi ankoraŭ iun alian evidentan signon, la cikatron, kiun iam apro per sia blanka dento al li kaŭzis: tiun mi rimarkis dum mi piedlavis lin; kaj tuj mi volis diri ĝin al vi; sed li la manon metis antaŭ mian buŝon kaj malpermesis al mi kun pripensema animo, ke mi ĝin diru. Sed min sekvu: mi fordonos mian vivon se mi estos vin trompinta, kaj tiam mi mortu plej kompatindan morton."

Sin post tio respondis la tre prudenta Penelope:

„Kara panjo! estus malfacile al vi kompreni la planojn de l' Dioj ĉiamaj, kiom ajn multscia vi estas. Sed tamen ni iru al mia filo, por ke mi vidu la mortigitajn amantojn kaj tiun, kiu ilin mortigis."

Tiel parolinte, ŝi subeniris el sia supretaĝa ĉambro kaj ade ŝia koro pripensis, ĉu de malapude ŝi eldemandos sian karan edzon, aŭ ĉu proksimiĝinte ŝi kaptos liajn kapon kaj manojn kaj ilin kisos. Kaj kiam ŝi estis enirinta kaj transpasinta la ŝtonan sojlon, tiam ŝi sidiĝis kontraŭe de Oduseus en la brileto de l' fajro apud la transa ĉambromuro; sed li sidis



kontraŭ alta kolono, suben rigardante kaj atendente, ĉu lia forta edzino lin alparolos, ĉar ŝi lin vidis per siaj propraj okuloj. Sed longan tempon ŝi silente sidis, ĉar mirego ekkaptis ŝian koron: jen ŝi kredis lin rekoni, rigardante atente lian  
 95 vizaĝon, jen ŝi lin ne povis rekoni pro la ĉifonaj vestoj kiujn li alhavis ĉirkaŭ sia korpo. Tiam Telemachos ŝin riproĉis kaj li diris la vortojn kaj parolis:

„Patrino mia nepatrinea kun malĝentila koro! kial vi restas tiel malproksime de mia patro kaj kial vi ne sidigas flanke de li kaj ne lin eldemandas kaj esploras? Vere, alia  
 100 virino ne tiel sidigas kun obstina animo malapude de sia edzo, kiu, trasuferinte multajn malfeliĉojn, estus reveninta en la dudeka jaro al sia prapatra lando. Sed ĉiam via koro estas pli malmola ol ŝtono.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

105 „Mia infano! la animo en mia brusto mutiĝis de mirego kaj mi ne kapablas paroli unu vorton aŭ lin eldemandi aŭ lin vidi rekte en la vizaĝon. Sed se vere li estas Oduseus kaj revenis hejme, tiam ni ambaŭ certe ankoraŭ pli bone nin  
 110 rekonos reciproke: ĉar ni havas signojn, kiujn, kaŝitajn por aliaj, nur ni ambaŭ konas.”

Tiel ŝi parolis kaj ridetis la persistema dieca Oduseus kaj rapide li diris al Telemachos la flugilhavaĵajn vortojn:

„Telemachos! lasu nur vian patrinon en nia domo min provi; baldaŭ ŝi komprenos pli bone. Sed nun, ĉar estas mi  
 115 malpura kaj alhavas ĉifonajn vestojn, tial ŝi malestimas min kaj ankoraŭ ne opinias, ke estas mi. Sed ni pripensu, kiel ĉio plej bone okazos. Ĉar eĉ tiu, kiu mortigis nur unu viron el la popolo kaj kiu ne havas multajn helpantojn post la mor-  
 120 tigo, tiu sin forsavas, forlasante siajn parencojn kaj la landon de siaj prapatroj, sed mi mortigis tiujn, kiuj estis la defendantoj de la urbo kaj la plej eminentaj el la junuloj en Ithaka; kaj mi konsilas al vi ĉi tion bone pripensi.”

Lin siavice alparolis la tre prudenta Telemachos:

„Tion konsideru mem, ho kara patro! Ĉar oni diras ke via  
 125 prudentgvido estas plej bona inter la homoj kaj neniu alia viro inter la mortdestinaj homoj povus vin egali je tio. [Ni bataldeziraj sekvos vin kaj mi opinias ke mi ne malhavos defendan forton, almenaŭ rilate al la kapableco, kiun mi havas].”

Lin respondante alparolis la prudenta Oduseus:

130 „Nu do, mi diros al vi, kiel al mi ŝajnas esti plej bone.

Unue vi vin lavu kaj almetu belajn vestojn kaj post tio ordonu al la servistinoj en la domo ke ankaŭ ili almetu belajn vestojn. Plue la dieca kantisto kun laŭtsona liro antaŭiru vin dum gaja dancado, por ke ĉiu, kiu ekstere ĝin ekaŭdos, ĉu pasante sur  
 135 la vojo, ĉu loĝante en la ĉirkaŭaĵo, opiniu ke estas edziĝfesto; ĉar ne estigu ĉie konata tra la urbo la famo pri la mortigo de l'amantoj, antaŭ ol ni estos venintaj eksterurbe en nia multarba  
 140 bieno; tie ni plue pripensos, kion profitigan la Olumpano al ni indikos."

Tiel li parolis kaj ili atente aŭskultis je li kaj lin obeis. Unue do ili sin lavis kaj almetis belajn vestojn kaj ankaŭ la servistinoj sin ornamis; kaj la dieca kantisto prenis la kavan  
 145 liron kaj vekis en ili la deziron al dolĉa kantado kaj agrabla dancado. Kaj laŭte resonis la granda domo de la frapetantaj piedoj de l' dancantaj viroj kaj belzonaj virinoj. Tiel parolis kelkiu, aŭdante tion ekster la domo:

„Certe iu edziĝis kun la multdezirata reĝino. La hontulino!  
 150 ŝi eĉ ne decidi povis, ĝisfine gardi la grandan domon de l'edzo de sia junaĝo, ĝis kiam li revenis."

Tiel parolis kelkiuj; sed tion ili ne sciis, kio estis okazinta.

Dume la mastrumistino Eurunome banis en lia domo la grandkuraĝan Oduseus kaj lin ŝmiris per olivoleo kaj ĵetis  
 155 ĉirkaŭ lin mantelon belan kaj subveston; tiam Athene ŝutis sur lian kapon grandan belecon kaj lin faris pli granda kaj dika je la aspekto; kaj ŝi lasis de lia kapo dependi lanecajn harojn, similajn al la floraro de la hiacinto. Kiel, kiam artkapabla viro oron en arĝenton enkadrigas, kiun Hephaistos  
 160 kaj Pallas Athene instruis en ĉia arto kaj tial li fabrikas graciajn laboraĵojn — tiel ŝi ŝutis graciecon super lian kapon kaj liajn ŝultrojn.

Tiam li iris el la banokuvo, simila al la senmortuloj je la staturo. Denove li sidiĝis sur la brakoseĝon, de kiu ĵus li estis  
 165 ekstarinta, kontraŭe de sia edzino kaj ŝin alparolis per la vortoj:

„Strangulino! inter ĉiuj delikataj virinoj donis supermezure al vi la loĝantoj de l'Olumpa palaco koron neemocieblan. Vere, alia virino ne tiel sidiĝus kun obstina animo malapude de sia edzo, kiu, trasuferinte multajn malfeliĉojn, estus reveninta  
 170 en la dudeka jaro al sia prapatra lando. Sed nu do, patrineto! pretigu kuŝejon por mi, por ke mi ankaŭ sola kuŝigu; ĉar vere! ŝi havas feran koron en la brusto!"

Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Strangulo! mi tute ne fieras, nek vin malestimas, nek tro

175 miregas, ĉar tre bone mi scias, kiel vi aspektis, kiam sur la longremila ŝipo vi foriris el Ithaka. Sed nu do, pretigu por li fortikan liton, Eurukleia, en la taŭge fondita dormejo, kiun li mem konstruis; tie por li metu fortikan liton kaj sur ĝin  
180 ĵetu kiel litaĵon felojn kaj mantelojn kaj briletajn kovraĵojn."

Tiel ŝi parolis, provante sian edzon. Sed malkontentiginte Oduseus alparolis sian edzinon kun zorgema karaktero:

„Virino! vere kordolorigaj estis la vortoj kiujn vi ĵus parolis. Kiu do metis mian liton sur alian lokon? Malfacila tio estus,  
185 eĉ por ege lerta viro, se ne iu Diaĵo venis mem kaj metis ĝin laŭ sia volo senpene sur alian lokon. Sed el la viroj neniu viva mortidevulo, eĉ ne se havus li junecan forton, facile ĝin povus ŝanceli de ĝia loko, ĉar speciala signo estas farita en la arte fabrikita lito: ĉar mi mem ĝin pene faris, kaj neniu alia.  
190 Interne de l' ĉirkaŭbarilo kreskis longfolia olivujo, prospere floranta; kaj dika ĝi estis kiel kolono; ĉirkaŭ tiu mi konstruis dormoĉambron, ĝis kiam mi estis finfarinta ĝin el dense amasigitaj ŝtonoj kaj tiam supre faris fortikan tegmenton kaj en la pordokadrojn mi lokis bone kunmetitajn pordojn,  
195 fortike ĉarpentitajn. Kaj post tio mi dehakis de la longfolia olivujo la supron kaj hakglatigis per la kupra hakilo la trunkon, komencante ĉe la radiko, bone kaj spertece, kaj pere de la ŝnurrektigilo mi ortigis ĝin kaj lerte ĝin faris fosto de l' lito kaj tiam per borilo mi ĝin ĉie traboris. Komencante je tiu  
200 fosto, mi faris lerte la liton, ĝis kiam mi estis finfarinta ĝin, dum mi ĝin ornamis per oro kaj arĝento kaj eburo. Kaj fine mi streĉetendis sur la liton rimenojn el bovoledo kun purpura brilo. Tiel estas tio kion mi diras kiel signon al vi, sed tamen mi ne scias, virino! ĉu mia lito ankoraŭ staras neŝanceleble sur sia loko, aŭ ĉu jam iu alia viro ĝin translokigis, post kiam li forhakis sube la trunkon de l'olivujo."

205 Tiel li parolis kaj ŝiaj genuoj kaj ŝia koro senfortiĝis tuj, kiam ŝi rekonis la signojn, kiujn Oduseus estis laŭvere al ŝi rakontinta; esplorante ŝi tiam kuris rekte al li kaj ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de Oduseus kaj kisis lian kapon kaj lin alparolis:

„Ne estu, Oduseus! kolera kontraŭ mi, ĉar ankaŭ alie  
210 vi estis ĉiam la plej prudenta el la homoj; sed la Dioj havigis al ni mizeron, ĉar ili enviis al ni, ke ni, restante unu ĉe la alia, ĝuu la junaĝon kaj kune atingu la sojlon de l' maljuneco. Sed nun pro tio vi ne koleriĝu, nek estu malkontenta, ke mi ne tuj, kiam mi vin vidis, tiel ame vin akceptis, kiel nun: ĉiam

215 ja malmoliĝis mia koro en la brusto pro timo, ke iu el la mortidevuloj, ĉi tien veninte, per vortoj min trompos: ĉar multaj intencas ruzojn malicajn! [Eĉ la Argeia Helena, la filino de Zeus, ne estus ame kuniginta sin kun fremdlanda viro, se ŝi  
 220 estus sciinta, ke la militemaj filoj de l'Aĉaioj ŝin hejmen rekondukos, al la kara lando de ŝiaj prapatroj. Sed iu Diaĵo ŝin instigis fari tiun hontindan agon: ĉar tiun blindiĝon, el kiu ankaŭ por ni ekestis la komenco de nia ĉagreno, ŝi neniam antaŭe estis allasinta en sian koron]. Sed nun, post kiam vi  
 225 nomis al mi la klarajn signojn [de nia edzeca lito, kiun neniu alia mortidevulo iam vidis escepte vi kaj mi kaj unu sola servistino, Aktoris, kiun al mi donis mia patro, kiam vi iris ĉi tien al via loĝejo kaj kiu por ni ambaŭ gardadis la pordon  
 230 de l' fortika dormoĉambro], nun vi konvinkas mian koron, kvankam ĝi estis antaŭe tre sensenta."

Tiel ŝi parolis kaj ankoraŭ pli multe ŝi vekis en li la deziron al vekriado kaj plorante li tenis en siaj brakoj sian ĉiam zorgeman edzinon, kiu estis plaĉa al lia koro. Kiel kiam la bordo montriĝas kaj estas ĝojiga al naĝantaj ŝipanoj, kies fortike  
 235 konstruitan ŝipon, kuntrenitan de la ventego kaj de la ŝvelegintaj ondoj, Poseidon frakasis — nur malmultaj tiam naĝante sin savas el la grizkolora maro al la firma tero, dum multe da saleta ŝaŭmo sin fiksas ĉirkaŭ ilian korpon kaj ĝojante ili fine paŝas sur la teron, evitinte la pereon — same ĝojiga estis al  
 240 ŝi la vido de ŝia edzo kaj eĉ ne unu momenton ŝi forprenis de lia kolo siajn blankajn brakojn.

Nun ambaŭ estus daŭrigintaj sian ploradon, ĝis kiam aperis la rozofingra Eos, se ne la fajrsprucokula Diino Athene estus elpensinta ion alian. Longan tempon ŝi retenis la nokton je la fino de ĝia vojo kaj la ortronan Eos ŝi restigis ĉe Okeanos kaj ne allasis ke ŝi jungu siajn rapidpiedajn ĉevalojn, kiuj  
 245 alportas la lumon al la homoj, Lampos kaj Phaethon, la ĉevalid-ojn, kiuj alkondukas Eos. Tiam la elpensema Oduseus alparolis sian edzinon:

„Virino! ni ankoraŭ ne venis ĝis la fino de ĉiuj danĝeroj, sed nin ankoraŭ atentos en la estonteco nemezureblaj penoj,  
 250 multaj kaj gravaj, kiujn mi ĉiujn devas ĝisfine trasuferi. Tiel ja antaŭdiris al mi la fantomo de Teiresias je tiu tago, kiam mi malsupreniris en la loĝejon de Hades, por esplori pri la reveno por miaj kunuloj kaj ankaŭ por mi mem. Sed venu,  
 255 ni iru en nian liton, virino! por ke ni fine kuŝiĝu kaj nin refreŝigu per dolĉa dormo.”

Sin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„La lito estos por vi preta, tuj kiam vi tion deziras en via koro, ĉar nun la Dioj al vi permesis reveni en vian fortike konstruitan domon kaj en la landon de viaj prapatroj. Sed 260 ĉar vi pri tio ekparolis kaj iu Diaĵo tion inspiris en vian animon, tial diru al mi ĉi tiun danĝeron, ĉar mi opinias ke tamen mi ankaŭ poste pri ĝi ekscios, sed ne estas pli malbone tuj pri ĝi ekaŭdi.”

Sin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Malfeliĉulino! kial do vi tiel insiste min instigas diri ĝin! 265 Sed mi ĝin diros kaj nenion kaŝos. Sed via koro tute ne ĝojiĝos; kaj ankaŭ mi mem ne ĝojas, ĉar li ordonis al mi iri al tre multaj urboj de mortidevuloj, portante faciluzeblan remilon en miaj manoj, ĝis kiam mi alvenos ĉe tiuj homoj, kiuj la maron ne 270 konas kaj ankaŭ ne manĝas kun salo miksitajn manĝaĵojn; ankaŭ ne konas ili ŝipojn kun ruĝaj antaŭstavenoj, nek faciluzeblajn remilojn, kiuj estas la flugiloj por la ŝipoj. Plue li diris al mi tre klaran signon, kaj mi ne silentos pri ĝi: ĉar kiam alia piediranto min renkontos kaj opinios ke mi portas 275 grenŝovelilon sur mia forta ŝultro, tiam mi devas, laŭ tio, kion li al mi ordonis, puŝstarigi la remilon en la teron kaj plenumi honore al la reĝo Poseidon belan oferon, virŝafon kaj virbovon kaj gravedigan virapron kaj tiam reveni hejmen kaj 280 tie oferi sanktajn hekatombojn al ĉiuj senmortaj Dioj laŭvice, kiuj loĝas en la vasta ĉielo. Fine proksimiĝos al mi tre maldolora morto, ne surmare, kiu min mortigos, dum mi iom post iom malfortiĝos en prospera maljuneco; kaj ĉirkaŭ mi feliĉe vivos mia popolo; kaj li diris ke ĉi ĉio plenumiĝos.”

285 Lin siavice alparolis la tre prudenta Penelope:

„Se do vere la Dioj intencas al vi doni plej feliĉan maljunecon, tiam ni povas esperi ke fine vi estos evitinta ĉiujn malfeliĉojn.”

Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al la alia.

Dume Eurunome kaj la mamnutristino pretigis, ĉe la lumo 290 de brulantaj torĉoj, la liton kaj metis sur ĝin kovraĵojn molajn. Sed kiam ili estis pretigintaj diligente la fortikan liton, [la maljunulino reiris al sia dormoĉambro por enlitiĝi], tiam Eurunome, la gardistino de l' geedza dormejo, portante torĉon en siaj manoj, ilin ambaŭ antaŭiris al la lito. Kaj kiam ŝi 295 estis ilin kondukinta en la dormoĉambron, ŝi iris returne. Kaj ĝoje ili nun paŝis al la loko, kie staris ilia malnova lito.

Dume Telemachos kaj la bovpaŝtisto kaj la porkpaŝtisto ĉesigis la dancadon per la piedoj kaj ankaŭ la virinoj ĝin

ĉesigis kaj ĉiuj nun enlitiĝis en la ĉambroj multnombraj de la domo.

- 300 Sed kiam ambaŭ estis ĝuintaj la agrablan edzecan amon, tiam ili havis la plezuron rakonti unu al la alia: ŝi, kiom ŝi toleris en sia loĝejo, la dieca inter la virinoj, dum ŝi devis alrigardi la pereigan aron de l'amantoj, kiuj pro ŝi kutimis
- 305 buĉi multajn brutojn, bovojn kaj fortajn ŝafojn, dum senĉese multe da vino estis ĉerpata el la ujoj; kaj la didevena Oduseus, kiom da malfeliĉoj li estis kaŭzinta al aliaj homoj kaj kiom li mem eltenis kaj trasuferis, ĉi ĉion li rakontis; kaj kun ĝojo ŝi aŭskultis kaj ne malsuprenlitis la dormo sur ŝiajn palpebr-ojn, antaŭ ol li estis rakontinta ĉion.
- 310 [Li do komencis sian rakonton, kiel li unue estis subiginta la Kikonojn kaj post tio estis irinta al la fruktodona lando de viroj Lotophagaj; plue kion estis farinta la Kiklopo kaj kiel li estis venĝinta siajn fortajn kunulojn, kiujn sen kompatato estis formanĝinta la Kiklopo; plue kiel li estis veninta ĉe Aiolos, kiu gastame lin estis akceptinta kaj volis doni al li akompanon sendanĝeran, sed ankoraŭ ne estis destinite al li
- 315 atingi sian karan patrujon, sed ventego, returne lin kuntrenante, lin forpelis, dum li laŭte ĝemadis, sur la fiŝoplana maro; plue ankaŭ, kiel li alvenis en Telepulon, la urbo de la Laistrugonoj, kiuj detruis liajn ŝipojn kaj pereigis liajn kunulojn kun
- 320 bonaj tibiŝirmiloj, (ĉiujn; sed nur Oduseus sin elsavis sur sia nigra ŝipo); ankaŭ li rakontis pri la ruzoj kaj la diversspecaj sorĉartoj de Kirke kaj kiel li estis irinta per la multremila ŝipo en la mallumetan domon de Hades por demandi profetaĵon al la fantomo de l' Thebaia Teiresias kaj kiel li tie estis vidinta ĉiujn siajn kunulojn kaj ankaŭ sian patrinon, kiu estis lin nas-
- 325 kinta kaj elnutrinta, kiam li estis ankoraŭ malgranda; kaj ankaŭ kiel li estis aŭdinta la voĉon de l' laŭte kantantaj Seirenoj kaj kiel li estis alveninta ĉe la rokeca Planktai kaj ĉe la terura Charubdis kaj ĉe Skulla, de kiu ankoraŭ neniam la viroj sendifekte estis forsavintaj sin; plue ankaŭ, kiel liaj kunuloj estis mortigintaj la bovojn de Helios kaj kiel la alttondriga
- 330 Zeus la ŝipon rapidan estis trafinta per sia fajra fulmo kaj liaj bravaj kunuloj ĉiuj kune estis pereintaj, sed nur li mem la pereigan sorton estis evitinta; plue kiel li atingis la insulon Ogugia kaj la nimfon Kalupso, kiu lin retenadis en sia volbiĝanta kaverno, ĉar arde ŝi deziris ke li fariĝu ŝia edzo kaj kiu
- 335 lin nutris kaj promesis ke ŝi faros lin senmorta kaj eterne juna dum ĉiuj pluaj tagoj; sed neniam ŝi persvadis la koron en lia

brusto; plue kiel li, multe trasuferinte, alvenis ĉe la Phaiakoj, kiuj supermezure lin estimis en sia koro kiel Diaĵon kaj lin  
 340 akompanis per ŝipo al la kara lando de liaj prapatroj, post kiam ili estis al li donintaj abunde kupron kaj oron kaj ankaŭ vestaĵojn. Ĉi tion li laste rakontis al ŝi, kiam la dolĉa dormo, malstreĉanta la membrojn kaj liberiganta la koron de zorgoj, lin ekkaptis].

Tiam ion alian elpensis la fajrŝprucokula Diino Athene:  
 345 kiam ŝi opiniis ke Odusseus en sia animo sufiĉe estas ĝuinta la amon de sia edzino kaj la dormon, tiam ŝi tuj instigis la ortronan, frumatenan Diinon, sin levi el la Okeanos, por porti al la homoj la lumon. Nun leviĝis el sia mola lito Odusseus kaj li donis al sia edzino la ordonon:

350 „Virino! jam ni ambaŭ estas satiĝintaj de multaj malfeliĉoj kaj suferoj, vi, dum vi ĉi tie ploradis pro mia multzorga hejmenvojaĝo, kaj mi, ĉar Zeus kaj la aliaj Dioj sendis al mi ĉagrenojn kaj kvankam mi deziregis, min detenadis de la lando de miaj prapatroj. Sed ĉar nun ni ambaŭ ree estas kuŝigintaj nin en la arde sopiritan liton edzecan, vi nun zorgu en la domo pri la  
 355 posedaĵoj, kiujn mi ankoraŭ havas, sed rilate al la brutoj, kiujn formangis de mi la trokuraĝaj amantoj, grandan parton mi mem militakiros kaj la ceteran donos al mi la Aĉaioj, ĝis kiam ili estos replenigintaj ĉiujn miajn stalojn. Sed mi  
 360 nun iros al la multarba bieno, por vidi mian bravan patron, kiu pro mi treege malĝojas. Sed al vi, virino! mi tion ordonas, ĉar tre sagaca vi estas: ĉar kiam supreniros la suno, tuj vastiĝos la famo pri la amantoj, kiujn mi mortigis en mia loĝejo; [tial supreniru kun viaj servaj virinoj al la supretaĝa ĉambro  
 365 kaj tie restu sidanta kaj pri neniu vin okupu kaj pri nenio demandu].”

Li parolis kaj almetis ĉirkaŭ siajn ŝultrojn la belajn armilojn kaj tiam li vekis Telemachos kaj la bovpastiston kaj la porkpastiston kaj al ili ĉiuj li ordonis preni en la manojn la militajn armilaĵojn. Kaj ili ne malobeis, sed sin armis per la  
 370 kupro, kaj tiam malfermis la pordon kaj eliris; kaj ilin antaŭiris Odusseus. Jam ekestis lumo sur la tero, sed Athene, envolvante ilin en noktsimilan nebulon, rapide ilin kondukis el la urbo.

---



## DUDEK KVARA KANTO.

## DUA KANTO PRI LA FANTOMOJ. INTERKONSENTO.

- Hermes, devena de l' monto Kullene, nun vokis el la palaco la animojn de l'amantoj; en siaj manoj li havis la belan, oran bastonon, per kiu li sorĉdormigas la okulojn de l' viroj, kiujn li volas dormigi, kaj aliajn, kiam ili dormas, vekas; per tiu
- 5 li ekmovis kaj kondukis ilin kaj ili zumetante lin sekvis. Kiel kiam vespertoj en la interno de vastega kaverno zumante flugetas, kiam unu, sin kroĉante kontraŭ la rokeca muro, sin liberigas el la longa vico kaj, apogante unu la alian, ili tiam sin tenas supre: tiel ili zumetante lin sekvis kaj antaŭ ili iris
- 10 la savalporta Hermes laŭlonge de l' mallumetaj vojoj. Ili iris preter la fluojn de Okeanos kaj la rokon Leukas kaj ankaŭ ŝvebis preter la pordegon de Helios kaj la landon de l' songoj; baldaŭ ili atingis la asfodelan herbejon, kie loĝas la fantomoj, la ombrobildoj de l' mortintoj.
- 15 Tie ili renkontis la fantomon de la Pele-ido Achilleus kaj plue la fantomojn de Patroklos kaj de l' neriproĉebla Antilochos kaj de Aiaks, kiu je staturato kaj eksteraĵo estis supera al la aliaj Danaoj, escepte al la neriproĉebla Pele-ido.
- Tiel ili kolektiĝis ĉirkaŭ ĉi tiun; tiam malĝojante proksimiĝis
- 20 la fantomo de l'Atre-ido Agamemnon; kaj ĉirkaŭ li sin estis kolektintaj ĉiuj aliaj, kiuj kune kun li en la domo de Aigisthos estis mortintaj kaj atingintaj sian mortosorton. Lin unua alparolis la fantomo de l' Pele-ido:
- „Atre-ido! ni opiniis, ke vi super la aliaj heroecaj viroj
- 25 ĉiam estis kara al la fulmĵetegulo Zeus, ĉar vi ja estis reĝo super multaj fortaj viroj en la lando de l' Troianoj, kie ni, Aĉaioj, trasuferis multajn malfeliĉojn. Sed spite al tio la pereiga mortosorto, kiun neniu povas eviti, el ĉiuj kiuj naskiĝas, estis jam tre baldaŭ proksimiĝonta al vi. Ho! ke vi estus
- 30 atinginta la morton kaj la mortosorton en la lando de l' Troianoj, kiam vi estis ankoraŭ honorata pro via reĝeco! Tiam ĉiuj Aĉaioj estus por vi starigintaj tombmonteton, kaj ankaŭ por via filo vi estus akirinta grandan gloron en la estonteco; sed nun al vi destinite estis, de plej kompatinda morto esti trafata.”
- 35 Lin siavice alparolis la fantomo de l'Atre-ido:  
„Feliĉa filo de Peleus, disimila Achilleus! kiu ja mortis

en Troia, malproksime de Argos; ĉar ĉirkaŭ vi ankoraŭ aliaj plej kuraĝaj filoj de Troianoj kaj Aĥaioj estis mortigataj, dum ili interbatalis pro via korpo: kaj vi kuŝis en la turnetiĝanta polvo, granda kaj kovrante grandan spacon, forgesinte

40 vian lertecon je la batalado per la militoĉaro. Sed ni la tutan tagon bataladis kaj certe ni tute ne estus ĉesigintaj la batalon, se Zeus ne estus ĝin fininta per ventego. Kaj kiam ni estis vin portintaj el la militokampo al la ŝipoj, tiam ni purigis vian

45 belan korpon per akvo varmeta kaj ŝmiraĵo kaj tiam ĝin metis sur liton. Kaj ĉirkaŭ vi la Danaoj verŝis multajn varmajn larmojn kaj fortranĉis siajn harojn. Ankaŭ via patrino, aŭdinte la komunikon, supreniris el la maro kun la mardiinoj senmortaj. Kaj eksonis terura vekrio super la maro, tiel ke ekkaptis tremeto ĉiujn Aĥaiojn. Certe ili estus eksaltintaj

50 pro timo kaj irintaj sur la kavajn ŝipojn, se ne estus ilin reteninta viro kun malnova kaj granda sperto, Nestor, kies konsilo ankaŭ antaŭe evidentiĝis plej bona; ĉi tiu bonvole ilin alparolis kaj diris meze de ili:

„Vi haltu, Argeioj! Vi ne forkuru, junuloj de l'Aĥaioj!

55 Estas lia patrino, kiu el la maro supreniras kun la mardiinoj senmortaj, por partopreni la enterigon de sia mortinta filo.”

Tiel li parolis kaj la grandkuraĝaj Aĥaioj ĉesis forkuri. Tiam vin ĉirkaŭis la filinoj de l' grizharulo de l' maro, kompatinde vekriante, kaj ili vin vestis per diaj vestoj, kaj la naŭ

60 Muzoj ĉiuj per bela voĉo alterne kantis la funebran kanton; tiam oni vidis neniun el la Argeioj, kiu ne verŝis larmojn, tiel kortuŝa estis la laŭta kantado de l' Muzoj. Dum dek sep sinsekvaj noktoj kaj tagoj ni priploris vin, tiel same la senmortaj Dioj kiel ankaŭ la mortidevaj homoj, sed la dek okan

65 tagon ni transdonis vian korpon al la brulŝtiparo kaj ĉirkaŭ vi ni buĉis multajn tre grasajn ŝafojn kaj kurbkornajn bovojn. Tiam vi estis forbruligata, vestite per dia vestaĵo kaj ĉirkaŭate de multaj kruĉoj da olivoleo kaj da dolĉa mielo; kaj multaj Aĥaiaj herooj procesie iradis, alhavante sian armaĵon, ĉirkaŭ

70 la brulanta fajro, ĉu piede ĉu sur la militoĉaro; kaj laŭta bruado ekestis. Sed kiam la flamo de Hephaistos estis konsuminta vin, tiam ni frumatene kolektis vian blankan ostaron, Achilleus! kaj verŝis sur ĝin nemiksitan vinon kaj olivoleon. Via patrino tiam donis oran vazon; ŝi diris, ke tiu estis donaco

75 de Dionusos kaj artaĵo de l' multfama Hephaistos. En tiu kuŝas via blanka ostaro, brilglora Achilleus! kune kun la ostoj de l' mortinta Menoiti-ado Patroklos, kaj aparte la ostaro de

Antilochos, kiun vi estimis multe pli multe ol ĉiujn viajn aliajn  
 kunulojn escepte la mortintan Patroklos. Super tiujn ostojn  
 80 tiam ni, la brava armeo de lancbatalaj Argeioj, starigis grandan,  
 bonegan tombmonteton, sur elstaranta parto de l' marbordo,  
 apud la larĝa Hellespontos, por ke ĝi estu videbla de malprok-  
 sime el la maro por la viroj, kiuj vivas nun kaj kiuj vivos en la  
 estonteco. Post tio via patrino promesis en la mezo de l' vet-  
 85 ludejo belegajn premiojn, kiujn ŝi estis petinta de la Dioj,  
 por la plej eminentaj el la Aĉaioj. Jam de multaj herooj vi  
 partoprenis la enterigon kiam, post la morto de iu reĝo, la  
 junuloj zonas sin kaj sin pretigas por gajni premiojn: sed plej  
 90 admire vi estus rigardinta, se vi estus vidinta tiujn belegajn  
 premiojn, kiujn honore al vi promesis la Diino, la arĝentpieda  
 Thetis; ĉar ege kara vi estis al la Dioj. Tiel vi eĉ ne post via  
 morto perdis vian nomon, sed ĉiam kaj ĉe ĉiuj homoj via gloro  
 95 estos belega, Achilleus! Sed kiun ĝuon mi nun havas post kiam  
 mi pene finis la militon? Ĉe mia reveno Zeus ja kontraŭ mi  
 projektis malĝojan pereon per la manoj de Aigisthos kaj de  
 mia pereigema edzino."

Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu kun la alia. Nun proksimiĝis  
 al ili la kondukisto kaj Argusmortiginto, kiu ĝuste alkondukis  
 100 la animojn de l'amantoj, mortigitaj de Oduseus. Ambaŭ  
 miregante paŝis rekte al ili, tuj kiam ili vidis ilin. Rekonis  
 la fantomo de l'Atre-ido Agamemnon la karan filon de Melaneos,  
 la gloregan Amphimedon: ĉar ĉi tiu, kiu iam enloĝis sian  
 105 domon en Ithaka, estis lia gastamiko. Lin unua alparolis la  
 fantomo de l'Atre-ido:

„Amphimedon! Kio do al vi okazis, ke vi ĉiuj, elektitaj  
 viroj kaj samaĝanoj, estas enirintaj la malluman terinternon?  
 Ne pli bone oni povus elekti kaj kolekti la plej eminentajn  
 virojn en la urbo. Ĉu vin subigis sur la ŝipoj Poseidon, post  
 110 kiam li estis kaŭzinta kontraŭ vi la fortegan blovadon de teru-  
 raj ventoj? Aŭ ĉu malamikecaj viroj vin mortigis sur la firma  
 tero, dum vi volis rabi bovojn kaj belajn arojn da ŝafoj? Aŭ  
 ĉu ili batalis por defendi sian urbon kaj siajn edzinojn? Diru  
 tion al mi, kiu pri tio demandas, ĉar mi min gloras esti via  
 115 gastamiko. Ĉu vi ne plu memoras pri la tempo, kiam ni tien  
 venis al via domo kun la disimila Menelaos, por instigi Oduseus  
 akompani nin sur la bonferdekaj ŝipoj al Ilion? Daŭris tutan  
 monaton transiri la vastan maron al Troia, post kiam ni fine  
 persvadis la urbruinigan Oduseus."

120 Lin siavice alparolis la fantomo de Amphimedon:

„[Gloreĝa Atre-ido, reĝo super la popoloj, Agamemnon!]  
 Ĉi ĉion mi ankoraŭ memoras, didevenulo! kiel vi diras; sed  
 nun mi ĉion tre klare kaj laŭvere al vi rakontos, la mizeran  
 finon de nia morto, kiel ĝi okazis. Ni ĉiuj svatiĝis al la edzino  
 125 de l' longan tempon forestanta Oduseus; sed ŝi nek rifuzis  
 la malamatan edziniĝon, nek plenumis ĝin, dum ŝi ĉiam  
 kontraŭ ni pripensis morton kaj nigran mortosorton. Interalie  
 ŝi ankaŭ elpensis en sia animo ĉi tiun ruzaĵon: ŝi komencis  
 130 en sia ĉambro grandan teksaĵon kaj ekteksis tolaĵon delikatan  
 kaj tre grandan kaj tuj post tio ŝi diris al ni: „Junuloj, miaj  
 amantoj de post kiam mortis la dieca Oduseus, vi atendu,  
 kvankam vi deziregas mian edziniĝon, ĝis kiam — por ke la  
 teksaĵo ne fariĝu senutila — mi estos finfarinta mortotukon  
 135 por la heroo Laertes, por la tempo, kiam lin trafos la pereiga  
 sorto de l' multdolora morto. Ĉar mi timas ke iu el la Achaiinoj  
 en la popolo min mallaŭdus, se li, kvankam li tiom posedis,  
 kuŝus sen mortotuko.” Tiel ŝi parolis kaj nia kuraĝa koro  
 persvatiĝis. Tiam ŝi efektive dumtage teksis grandan parton;  
 140 sed ĉiufoje ŝi nokte ĝin malteksis en la lumo de torĉoj brulantaj,  
 kiujn ŝi metis apud ĝin. Tiel dum tri jaroj ŝia ruzo restis  
 nerimarkita kaj ŝi konstante kontentigis la amantojn. Sed  
 kiam la kvara jaro venis kaj proksimiĝis la sezonoj [kaj kiam  
 dum la malkreskado de la lunoj multaj tagoj estis pasintaj],  
 tiam unu el la servistinoj, kiu certe ĝin sciis, ĝin diris al ni kaj  
 145 ni ŝin trovis malteksanta la tukon belegan. Tiel ŝi ĝin nun  
 finfaris, kvankam kontraŭvole kaj devigite.

Je la tempo, kiam ŝi montris al ni la tolaĵon, post kiam ŝi  
 estis finteksinta la grandan teksaĵon kaj ĝin estis lavinta tiel  
 ke ĝi brilis kvazaŭ la suno aŭ la luno, tiam iu malbona demono  
 kondukis — mi ne scias de kie — Oduseus al ekstrema parto  
 150 de la lando, kie la porkpaŝtisto loĝis en sia domo. Tie alvenis  
 la kara filo de l' dieca Oduseus, kiu ĝuste venis per sia nigra  
 ŝipo el la multsabla Pulos: ambaŭ nun iris, elpensinte mizeran  
 morton kontraŭ la amantoj, al la glorega urbo, kaj Oduseus  
 155 iris lasta, ĉar Telemachos iris antaŭ li. Sed Oduseus, alhavante  
 ĉifonajn vestojn ĉirkaŭ sia korpo kaj similante al mizera  
 almozulo kaj al grizharulo [apogante sin sur sia bastono —  
 kaj malluksaj estis la vestaĵoj per kiuj li estis vestita ĉirkaŭ  
 sia korpo], estis kondukata urbon de la porkpaŝtisto. Kaj neniu  
 el ni povis rekoni lin kiel Oduseus kiam li subite aperis,  
 160 eĉ ne ili, kiuj estis pli maljunaj, sed ni malhonoris lin per vortoj  
 insultaj kaj per ĵetoj.

Kelkan tempon li toleris kun eltenema animo ke li estis  
 ĵetata kaj malhonorata en sia propra domo; sed kiam la volo  
 de l'egidporta Zeus instigis lin, tiam li forprenis kun Telemachos  
 165 la belegajn armilojn, ilin deponis en la armilejon kaj ŝovis  
 la riglilojn antaŭ la pordon; tiam li ruzege ordonis al sia edzino,  
 antaŭmeti al la amantoj la pafarkon kaj la grizkoloran feron,  
 kiel vetkonkurilojn por ni, malfeliĉuloj, kaj kiel komencon  
 de nia mortigo. Neniu el ni kapablis streĉi la tendenon de l'  
 170 fortika pafarko, ĉar niaj fortoj estis tute ne sufiĉaj. Sed kiam  
 fine la granda pafarko venis en la manojn de Odusseus, tiam  
 ni ĉiuj laŭtvoĉe kriis per minacaj vortoj, ne doni al li la paf-  
 arkon, eĉ ne se tre insiste li tion petus, sed nur Telemachos  
 175 lin instigis kaj ordonis. Tiam la persistema dieca Odusseus  
 ĝin prenis en siajn manojn kaj senpene li streĉis la pafarkon  
 kaj pafis la sagon tra la ferajn hakilojn; post tio li paŝis sur la  
 sojlon kaj tie haltis kaj terure ĉirkaŭrigardante li elŝutis la  
 rapidajn sagojn el la ujo kaj li trafis la reĝon Antinoos. Post  
 180 tio li ankaŭ pafis, celante rekte antaŭen, al la aliaj siajn dolorig-  
 ajn sagojn. Kaj densamase ili falis. Nun fariĝis klare, ke iu  
 el la Dioj estis ilia helpanto: ĉar ili tuj faligis ilin laŭ vicoj  
 tra la tuta ĉambro, konsentante al sia kolero; kaj terura vekri-  
 185 ado eksonis de tiuj, kiuj estis faligataj teren kaj la tuta planko  
 fumiĝis de ilia sango. Tiel, Agamemnon, ni ĉiuj pereis, kaj  
 ankoraŭ nun neprizorgitaj kuŝas niaj korpoj en la domo de  
 Odusseus: ĉar pri ĉi tio ankoraŭ ne scias niaj amikoj, ĉiu en  
 sia loĝejo, kiuj forlavus la ruĝegan sangon de la vundoj kaj  
 190 ĝemplorante nin kuŝigus sur la homportilon; ĉar tio estas la  
 honorigo de l' mortintoj."

Lin siavice alparolis la fantomo de l'Atre-ido:

„Feliĉa filo de Laertes, elpenslerta Odusseus! vere, vi  
 posedas edzinon kun granda virteco. Kiel nobla estis la spirito  
 195 de l' neriproĉebla Penelope, la filino de Ikarios! Kiel fidele  
 ŝi ĉiam pensis pri Odusseus, la edzo de sia junaĝo! Tial la gloro  
 de ŝia virteco neniam perdiĝos kaj la senmortuloj havigos al  
 la surteruloj ĉarman kanton honore al la prudenta Penelope;  
 ŝi ne elpensis, kiel faris la filino de Tundareus, malbonajn  
 200 farojn, mortigante la edzon de sia junaĝo; sed tiun prikantos  
 hontinda kanto, ĉar ŝi havigis malfavoran fifamecon al la delik-  
 ataj virinoj, eĉ se vere iu el ili estus virteca."

Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al alia, starante en la loĝejo  
 de Hades, en la interno de l' tero.

205 Sed kiam ili estis malsuprenirintaj el la urbo, tiam ili baldaŭ

atingis la belan, bone prizorgitan bienon de Laertes, kiun iam mem Laertes estis akirinta, post kiam li estis tre multe peninta. Tie li havis sian domon, kaj ĉirkaŭ ĝi etendis sin je ĉiuj flankoj la sklavodomo, en kiu kutimis manĝi, sidi kaj  
 210 tranokti liaj labordevaj servistoj, kiuj faris, kion li deziris. En lia domo ankaŭ estis Sikela maljunulino, kiu ĉiam zorge flegis la maljunulon sur la kamparo, malproksime de l'urbo. Tie Oduseus diris al siaj servistoj kaj al sia filo la vortojn:  
 „Vi eniru nun la fortike konstruitan domon kaj rapide  
 215 buĉu la plej bonan el la porkoj por la manĝo; sed dume mi provos mian patron, por vidi ĉu eble li rekonos min kaj tuĵ min vidos per la okuloj, aŭ ĉu ne plu li min konos, ĉar longan tempon mi forestis.”

Tiel parolinte, li donis al siaj servistinoj siajn militajn  
 220 armilojn. Ĉi tiuj nun rapide kuris al la domo, sed Oduseus iris al la multfrukta fruktarbejo por provi sian patron. Sed, malsuprenirante al la granda fruktarbejo, li ne trovis Dolios, nek iun alian el la servistoj aŭ filoj; ĉar ĉi tiuj ĝuste estis for, por serĉkolekti arbetojn por servi kiel bariloj de l' fruktarbejo, kaj la grizharulo Dolios ilin antaŭiris. Nur sian patron li trovis en la bele aranĝita fruktarbejo, dum li estis sarkanta ĉirkaŭ arbeto; li estis vestita per ĉifona kitelo, fikita kaj malpurega kaj ĉirkaŭ siajn tibiojn li estis liginta kunkudritajn bovoŝelojn kiel tibiŝirmilojn, por eviti skrapvundetojn kaj  
 230 gantojn li alhavis ĉirkaŭ siaj manoj por protekti sin kontraŭ la dornoj; supre li surhavis kaprinledan kapuĉon sur la kapo, dum lia ĉagreno ĉiam kreskadis. Tuĵ kiam la persistema dieca Oduseus lin rimarkis, forkonsumiĝintan de maljuneco kaj havantan grandan ĉagrenon en sia spirito, tiam li haltis sub  
 235 alta pirujo kaj verŝis larmon. Tiam li pripensis en sia animo kaj spirito, ĉu li kisos kaj ĉirkaŭbrakos sian patron kaj ĉion diros, kiel li estas reveninta kaj atinginta sian prapatran landon, [aŭ ĉu li unue eldemandos lin pri ĉio kaj lin provos]. Tiel ŝajnis al li, dum li ĝin pripensis, esti plej bone: unue per  
 240 ruzaj vortoj provi sian patron. Pri ĉi ĉio pensante, la dieca Oduseus iris rekte al li. Ĉi tiu kun kliniĝinta kapo estis ankoraŭ sarkanta ĉirkaŭ la arbeto: tiam proksimiĝante lia brilglora filo alparolis lin:

„Grizulo! ne mankas al vi kapablo por prilabori zorge la  
 245 fruktarbejon, sed bone vi ĉion prizorgas kaj tute nenio, nek arbeto, nek figujo nek vinberĝardeno, nek olivujo, nek pirujo, nek legomobedo malhavas prizorgon en via fruktarbejo.

- Sed nun mi diros ion alian al vi kaj ne pro tio kolerigu en via spirito: mankas al vi mem prizorgo bona kaj vin premas mal-
- 250 ĝojiga maljuneco kaj malpura vi aspektas kaj ĉifone vi estas vestita. Vere, pro via mallaboremo via mastro certe ne malzorgas pri vi kaj ankaŭ vi tute ne havas sklavan aspekton, kiam oni rigardas vian staturon kaj grandon; ĉar vi ŝajnas estis reĝa viro. Sed al iu tia konvenas, ĉiufoje kiam li estas sin baninta
- 255 kaj preninta la manĝon, dormi, en mola lito: tio ja decas al maljunuloj. Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj laŭvere ĝin rakontu: de kiu el la viroj vi estas la servisto? Kies fruktarbejon vi prizorgas? Ankaŭ ĉi tion diru al mi laŭvere, por ke mi bone sciu: ĉu vere ĉi tie ni alvenis en Ithaka, kiel al mi diris tiu, kiun
- 260 mi ĵus renkontis, kiam mi venis ĉi tien; tute ne eksterordinare inteligenta li estis, ĉar li ne decidi povis diri al mi ĉion kaj aŭskulti je miaj vortoj, kiam mi demandis pri mia gastamiko, ĉu tiu eble ankoraŭ vivas kaj sanas, aŭ ĉu li jam estas mortinta
- 265 kaj en la domo de Hades. Ĉar mi eldiros al vi kaj vi atentu kaj aŭskultu je mi: iam mi gastigis viron en mia kara prapatra lando, kiam li hejme venis al ni kaj ankoraŭ neniu alia mortidevulo el la malproksime loĝantaj fremduloj, kiuj venis en mian domon, estis al mi pli kara: li sin gloris esti devena
- 270 el Ithaka kaj li diris ke la Arkeisi-ido Laertes estas lia patro. Lin mi enkondukis en mian loĝejon kaj bone gastigis kaj zorge regalis per la provizo abunda en mia domo kaj ankaŭ mi donis al li porgastajn donacojn, kiel konvenis: talantojn da bele
- 275 prilaborita oro mi donis al li kaj ankaŭ mi donis tutarĝentan vinmiksujon florornamitan kaj dekdu simplajn mantelojn kaj same multajn kovraĵojn kaj same multajn belajn supervestojn kaj krome same multajn subvestojn kaj plue ankoraŭ kvar belstaturajn virinojn, spertajn je belega laboro, kiujn li mem elektis laŭ sia plaĉo."
- 280 Lin post tio respondis lia patro, verŝante larmojn:  
 „Fremdulo, certe, vi estas en la lando, pri kiu vi demandas, sed nun potencas super ĝi viroj trokuraĝaj kaj senpripensemaj; sed vane vi estis al li kompleza donante tiujn multajn donacojn; ĉar se vi lin viva estus trovinta en la lando de Ithaka, tiam li
- 285 estus vin lasinta forvojaĝi nur post kiam li estus rekompence al vi doninta abunde donacojn kaj bonan prizorgon: tion ja meritas tiu, kiu unua montris gastamon. Sed nu do, diru al mi ĉi tion kaj laŭvere rakontu: kiom da jaroj jam pasis de post kiam vi lin gastigis, vian malfeliĉan gaston, mian filon — Ve, iam li ĝin estis — la mizerulon? Lin ie malproksime de



- 290 siaj karuloj kaj de sia prapatra lando eble formanĝis la fiŝoj  
 en la maro aŭ li fariĝis sur la firma tero la kaptaĵo de bestoj  
 kaj rabobirdoj. Kaj nek lia patrino nek lia patro, neniu el ni  
 ambaŭ, kiuj lin vivigis, lin plorante envolvis en la morto-  
 tukon; ankaŭ lia dotoriĉa edzino, la prudenta Penelope, ne  
 295 povis priplori sian edzon, kuŝanta sur la mortolito, kiel ja  
 decis, nek premfermis liajn okulojn: tio ja estas honoriga  
 faro por la mortintoj. Ankaŭ ĉi tion diru al mi laŭvere, por ke  
 mi bone sciu: kiu kaj de kie inter la homoj vi estas? kie sin  
 trovas via naskiĝurbo kaj kie loĝas viaj gepatroj? Kie estas  
 300 via rapida ŝipo, kiu kondukis ĉi tien vin kaj viajn disimilajn  
 kunulojn? Aŭ ĉu vi venis kiel kunvojaĝanto sur la ŝipo de iu  
 alia kaj ĉu la ŝipanaro, vin surteriginte, vojaĝis pluen?"

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

- „Certe mi ĉi ĉion tute laŭvere al vi rakontos. Mi estas el  
 Alubas, kie mi enloĝas belegan loĝejon kaj mi estas la filo  
 305 de l' reĝo Apheidas, la Polupemon-ido; mia propra nomo estas  
 Eperitos; sed demono min vagforigis de Sikania, tiel ke mi  
 kontraŭ mia volo venis ĉi tie. Kaj mia ŝipo nun ĉi tie staras  
 sur la bordo, malproksime de l'urbo. Sed koncerne al Oduseus:  
 310 nun jam estas la kvina jaro de kiam li foriris de tie kaj forlasis  
 la landon de miaj prapatroj; la malfeliĉulo! Kaj tamen la  
 birdoj donis favoran antaŭsignon ĉe lia forveturo, ĉar dekstre  
 ili flugis, kaj ĝojante pro tiuj signoj, mi lasis lin foriri kaj  
 ĝojis ankaŭ li ĉe lia forvojaĝo; ĉar nia koro ankoraŭ esperis  
 ke iam ni ree nin renkontos reciproke kiel gastamikoj kaj donos  
 unu al la alia brilajn donacojn.”

- 315 Tiel li parolis kaj nigra nubo de ĉagreno ekĉirkaŭis la mal-  
 junulon kaj, per ambaŭ manoj kaptante la malpuran polvon  
 de l' tero, li ĝin ŝutis, senĉese vekriante, sur sian grizan  
 kapon. Tiam tuŝiĝis la animo de Oduseus kaj akre supreniris  
 en li la deziro pri plorado al lia nazo, kiam li rigardis sian karan  
 320 patron. Li eksaltis kaj kuris al li kaj lin ĉirkaŭbrakante li  
 kisis lin kaj diris:

- „Jen, mi mem ĝin estas, patro! pri kiu vi demandas kaj  
 kiu nun revenis en la dudeka jaro en mian prapatran landon.  
 Nun ĉesigu vian ploradon kaj vian multlarman ĝemadon.  
 Ĉar mi eldiros ĝin al vi — sed estas necese ke mi ege rapidu —  
 325 la amantojn mi mortigis en mia loĝejo, vengante pro ilia  
 kordolorigaj hontindaĵoj kaj malbonaj faroj.”

Lin siavice respondis Laertes kaj li parolis:

„Se do vere vi estas Oduseus, mia filo, kiu nun ĉi tien

revenis, tiam diru al mi signon evidentan, por ke mi konvinkigu.”

330 Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Unue viaj okuloj vidu ĉi tiun cikatron, kiun sur la Parnassos apro kaŭzis al mi per blanka dento, kiam mi estis irinta tien; ĉar vi kaj mia respektinda patrino min sendis tien al Autolukos,

335 kiujn li iam, ĉi tie veninte, estis al mi promesinta kaj konsentinta. Sed nu, mi ankaŭ nomos al vi la arbojn en via bele aranĝita fruktarbejo, kiujn vi iam donis al mi; mi, ankoraŭ estante infano, demandis al vi pri ĉiu el ili, dum mi vin sekvis en la ĝardeno; ni tiam iris meze inter la arboj kaj vi indikis kaj

340 kaj dek pomujojn kaj kvardek figujojn; ankaŭ vi tiam montris al mi kvindek vicojn da vinberujoj, kiujn vi volis al mi doni; kaj ĉiu el ili donas fruktojn en alia tempo — kaj ĉiuspecaj vinberoj pendas sur ili — kiam de supre la pluvo de Zeus ilin prospere kreskigas.”

345 Tiel li parolis; kaj senfortiĝis tuj la genuoj kaj la koro de l' maljunulo, ĉar li rekonis la signojn, kiujn Oduseus laŭvere estis al li nominta. Tuj li ĉirkaŭprenis sian karan filon per la brakoj, kaj la persistema dieca Oduseus lin premis al ŝi, kiam li svenis. Sed kiam li denove ekspiris kaj lia vivoforto

350 revenis en lian animon, tiam li tuj respondis kaj parolis la vortojn:

„Patro Zeus! vi do ankoraŭ ekzistas, Dioj sur la alta Olumpos, se do vere la amantoj estas punsuferintaj pro sia senpripensa trokuraĝo. Sed nun mi estas terure tima en mia koro, ke baldaŭ ĉiuj Ithakanoj venos ĉi tien kaj rapide en ĉiujn flankojn

355 sendos komunikojn al la urboj de la Kephallenoj.”

Lin respondante alparolis la elpensema Oduseus:

„Kuraĝigu: pri tio ne estu maltrankvila en via koro. Sed ni iru al la domo, kiu kuŝas apud la fruktarbejo; tien mi jam antaŭsendis Telemachos kaj la bovpastiston kaj la porkpastiston, por pretigi plej rapide la manĝon.”

Tiel parolinte, ili ambaŭ iris al la belega loĝejo. Kaj kiam ili estis atingintaj la bele kuŝantan loĝejon, tiam ili trovis Telemachos kaj la bovpastiston kaj la porkpastiston, dum ili estis detranĉantaj multan viandon kaj mikasantaj perlantan vinon.

365 Dume la Sikela servistino banis en lia loĝejo la grandaniman Laertes kaj lin ŝmiris per olivoleo kaj tiam ĵetis ĉirkaŭ lin mantelon belan; nun Athene, proksimiĝante al li, plifortiĝis

la membrojn de l' reganto super la popoloj kaj lin faris pli grandkreska ol antaŭe kaj pli diketa je la aspekto. Tiam li iris el la banokuvo; kaj lia kara filo miris kiam li vidis lin simila al la Dioj senmortaj je la eksteraĵo, kaj lin alparolante li diris al li la flugilhavajn vortojn:

370 „Patro! tutcerte iu el la Dioj ĉiamaj vin faris pli bela je la aspekto rilate al staturado kaj grandeco.”

375 Lin siavice alparolis la prudenta Laertes:

„Ho patro Zeus kaj Athene kaj Apollon! se mi nur estus ankoraŭ same forta kiel, kiam mi, komandante la Kephalleniojn, venkokupis Nerikos, la forti ke konstruitan urbon, apud la marbordo de la kontinento kaj se mi, ankoraŭ estante same forta kaj portante la armilaĵon ĉirkaŭ miaj ŝultroj, hieraŭ estus povinta en nia domo vin helpi kaj ataki la amantojn! Tiam mi estus senfortiginta la genuojn de multaj el ili en la ĉambrego kaj en la interno de via koro vi estus ĝojinta.”

Tiel ili pri ĉi ĉio parolis unu al la alia.

Sed kiam la aliaj estis finintaj la laboron kaj pretigintaj la manĝon, tiam ili ĉiuj envice sidiĝis sur apogseĝojn kaj brakseĝojn. Ĝuste ili volis etendi la manojn al la manĝo, kiam proksimiĝis la maljunulo Dolios kaj kune kun li liaj filoj, laciĝinte revenantaj de la kamplaboro, ĉar estis irinta al ili kaj ilin veniginta ilia patrino, la Sikela maljunulino, kiu ilin estis edukinta kaj ĉiam zorge flegis la maljunulon, de kiam la maljuneco lin estis kaptinta. Tuj kiam ili vidis Oduseus kaj lin rekonis en sia koro, ili mireginte haltis en la ĉambro. Sed Oduseus, sin al ili turnante, ilin alparolis per afablaj vortoj:

390 „Grizulo! sidiĝu ĉe la manĝo kaj forgesu vian miregon; ĉar jam longe ni estas en ĉi tiu ĉambro, dezirante etendi la manojn al la nutraĵo, dum ni daŭre atendadis vin.”

Tiel li parolis kaj Dolios kuris kun etenditaj brakoj rekte al li kaj, kaptante la manon de Oduseus je la pojno, li ĝin kisis kaj lin alparolante, li diris al li la flugilhavajn vortojn:

400 „Karulo! ĉar fine vi estas reveninta, kiel ni arde deziris sed ne plu atendis, kaj ĉar la Dioj mem kondukis vin, nu do, prosperon al vi kaj estu tutkore bonvena kaj donu al vi la Dioj sian benon! Ankaŭ ĉi tion al mi laŭvere rakontu, por ke mi bone sciu: ĉu la tre prudenta Penelope jam certe scias, ke 405 vi estas reveninta ĉi tien, aŭ ĉu ni rapide sendu kurieron?”

Lin respondante, alparolis la elpensema Oduseus:

„Grizharulo! ŝi jam scias; kial vi do penus pro tio?”

Tiel li parolis kaj la maljunulo sidiĝis sur bele glatigitan

benkon. Sammaniere la filoj de Dolios ĉirkaŭante la faman  
410 Oduseus, bonvenigis lin per vortoj kaj verve premis liajn  
manojn; post tio ili sidigis envice flanke de Dolios, sia patro.

Tiel ili en la ĉambro sin okupis pri la manĝo.

Dume rapide disvastigis ĉie tra la urbo kiel kuriero la famo  
neklara, rakontanta la teruran morton kaj la mortosorton  
415 de l'amantoj. Kaj ĉiuj, kiuj aŭdis pri tio, kune kuris el ĉiuj  
flankoj antaŭ la domon de Oduseus, ĝemante kaj vekriante,  
kaj ili elportis la kadavrojn el la loĝejo kaj ĉiu enterigis siajn  
mortintojn; sed la kadavrojn de amantoj el aliaj urboj ili  
420 forsendis, ĉiun al sia propra loĝejo, metinte ilin sur rapidajn  
fiŝistajn ŝipojn. Post tio ili densamase iris kun malĝoja koro  
al la kunsidejo. Sed kiam ili estis kolektiĝintaj kaj kunvenintaj,  
tiam inter ili ekstaris Eupeithes kaj li ekparolis meze de ili:  
pro lia filo lin ja premis neforgesebla ĉagreno en la animo,  
425 Oduseus; pro tiu larmverŝante li nun ekparolis kaj diris  
meze de ili:

„Amikoj! Vere, teruran agon ĉi tiu viro projektis kontraŭ  
la Achajoj! Unue li forkondukis multajn bravajn virojn sur  
siaj ŝipoj kaj tiam la kavaĵn sipojn li lasis perdiĝi kaj la ŝipan-  
aron li pereigis; kaj nun li, reveninte, mortigis la multsupere  
plej eminentajn el la Kephallenoj. Sed nu do! antaŭ ol li  
430 rapide rifuĝos al Pulos aŭ al la dieca Elis, kie regas la Epeioj,  
ni iru kaj persekutu lin, alie ni ja ankaŭ poste ĉiam estos  
hontaj. Ĉar tio ja estas malhonoro por ni, ankaŭ kiam ĝin  
ekscios la posteularo, se ni vere ne venĝos kontraŭ la  
435 mortigintoj de niaj filoj kaj fratoj; al mi almenaŭ ne plu estus  
plaĉe en mia koro, ankoraŭ resti viva, sed mi dezirus morti  
plej baldaŭ kaj esti inter la malfeliĉaj fantomoj. [Nu do, ni  
iru, por ke ili ne transiru la maron, antaŭ ol ni ilin atingos].”

Tiel li parolis verŝante larmojn kaj kompato ekkaptis ĉiujn  
Achajojn. Nun proksimiĝis al ili Medon kaj la dieca kantisto,  
440 veninte el la loĝejo de Oduseus, post kiam la dormo estis  
ilin forlasinta kaj ambaŭ haltis meze de ili; mirego ekkaptis  
ĉiun viron. Tiam meze de ili parolis Medon, sperta je prudentaj  
planoj:

„Vi aŭskultu nun je mi, Ithakanoj! Ĉar neniel kontraŭ  
la volo de l' senmortaj Dioj Oduseus projektis kaj plenumis  
445 tiujn agojn; mem mi vidis la senmortan Dion, kiu de proksime  
helpis Oduseus kaj je ĉio li similis al Mentor. Ĉi tiu senmorta  
Dio tiam protekte staris antaŭ Oduseus, dum li kuraĝigis lin

evidente kaj tiam li kuratakis tra la ĉambrego, konfuzante la amantojn; kaj densamase ĉi tiuj falis.”

- 450 Tiel li parolis kaj paliga teruro ilin ĉiujn ekkaptis. Tiam ankaŭ meze de ili parolis la maljuna heroo Halitherses, la Mastor-ido; nur ĉi tiu ja kutimis vidi en estontan kaj estintan tempojn; ĉi tiu favorinkline ekparolis kaj diris meze de ili:  
 „Vi aŭskultu nun je mi, Ithakanoj! kaj vi aŭdu, kion mi diros. Pro via propra malboneco, ho amikoj! ĉi ĉio okazis: vi ja  
 455 ne obeis al mi, nek al Mentor, la reganto super la popoloj, kiam ni konsilis al vi, deteni de ilia malprudenta konduto viajn filojn, kiuj kun pereiga senpripenseco plenumis terurajn agojn, fordiboĉante la posedon kaj malhonorante la edzinon  
 460 de plej eminenta viro, pri kiu ili opiniis ke neniam li revenos. Tial nun okazu tiel — kaj vi obeu je mia konsilo — kiel mi eldiros: ni ne persekutu ilin, por ke neniu pro sia propra kulpo estu trafata de malfeliĉo.”

- Tiel li parolis kaj pli ol la duono de l' viroj eksaltis kun laŭta kriegado — sed la aliaj ĉiuj kune restis sidantaj sur sia  
 465 loko — ĉar al ili ne plaĉis en la koro lia propono sed ili prefere obeis al Eueithes kaj rapide ili forkuris al siaj armiloj. Sed kiam ili estis almetintaj ĉirkaŭ la korpon la blindige brilan kupron, tiam ili densare kolektiĝis antaŭ la muroj de l' vaste etendiĝanta urbo. Pro nesageco nun Eueithes prenis sur sin  
 470 la komandon super ili: kaj li opiniis ke nun li venĝos la morton de sia filo, sed estis ne destinite al li reveni, sed jes atingi tie sian mortosorton.

Dume Athene alparolis la Kron-idon Zeus:

- „Ho Kron-ido, nia patro, plejaltulo inter ĉiuj regantoj! Diru al mi, kiu vin demandas: kiun planon kaŝas via spirito  
 475 en via interno? Ĉu vi ankoraŭ pli longe kaŭzos militon pereigan kaj teruran batalbruon aŭ ĉu vi nun estigos pacon inter ambaŭ partioj?”

Ĝin respondante alparolis la nubokolektulo Zeus:

- „Mia infano! kial vi al mi pri tio demandas kaj esploras? Ĉu do ne vi mem elpensis tiun planon, ke vere Odusseus revenos  
 480 kaj venĝos kontraŭ tiuj viroj? Agu, kiel vi volas; sed diros mi al vi, kiel estas konvene. Ĉar la dieca Odusseus nun estas venĝinta kontraŭ la amantoj, estu farata jena interkonsento, ĵure sankciota: li restu por ĉiam la reĝo, sed ilin forgesigu  
 485 ni pri la mortigo de filoj kaj fratoj; kaj ili vivu en amikeco unu kun la alia kiel antaŭe kaj abunde regu prospero kaj paco.”

Tiel parolante li instigis Athene, jam longe fervorantan kaj rapide ŝi malsupreniris de la pintoj de l'Olumpos.

490 Sed kiam ili estis satigitaj sian avidon al korrefreŝiga manĝo, tiam meze de ili ekparolis la dieca Odusseus:

„Unu el vi eksteren iru kaj vidu, ĉu ili jam estas venintaj proksime.”

Tiel li parolis kaj unu el la filoj de Dolios iris eksteren, kiel li estis ordoninta kaj li starigis sur la sojlon kaj vidis ilin ĉiujn jam tre proksimaj; rapide li diris al Odusseus la flugilhavajn vortojn:

495 „Jen ili estas, jam proksimaj; tial plej rapide ni nin armu.”

Tiel li parolis kaj ili rapide sin levis kaj almetis sian armilaĵon, kvarope, inkluzive Odusseus, kaj plue la ses filoj de Dolios; inter ili ankaŭ Laertes kaj Dolios almetis la armilaĵon, kvankam ili jam estis grizharuloj kaj nur devigite militistoj.

500 Sed kiam ili ĉiuj estis almetintaj ĉirkaŭ la korpon la blindige briln kupron, tiam ili malfermis la pordon kaj iris eksteren; kaj antaŭ ili paŝis Odusseus.

505 Sed al ili proksimiĝis Athene, la filino de Zeus, similante al Mentor je la eksterajo kaj je voĉo. Ŝin vidante ekĝojis la persistema, dieca Odusseus kaj rapide li diris al Telemachos, sia kara filo:

„Telemachos! nun vi ja scios zorgi, ĉar vi mem nun vin enmiksas en la batalon de l' viroj, kie la plej kuraĝaj decide intermilitas, ke vi ne hontigu la generacion de ni, prapatroj viaj, kiuj iam tra la tuta tero distingigis per kontraŭstara kuraĝo kaj per vira braveco.”

510 Lin siavice alparolis la prudenta Telemachos:

„Vi vidos, se vi volas, kara patro! ke mi kun mia propra kuraĝo neniel hontigos vian generacion, kiel vi opinias.”

Tiel li parolis kaj ekĝojis Laertes kaj diris la vortojn:

515 „Kia belega tago estas hodiaŭ por mi, ho karaj Dioj! vere, mi treege ĝojas. Miaj filo kaj nepo vetkonkuras unu kun la alia je braveco.”

Lin proksimiĝante alparolis la fajrŝprucokula Athene:

„Arkeisi-ido, el ĉiuj miaj kunuloj plej kara al mi! nun preĝu al la fajrŝprucokula filino kaj al ŝia patro Zeus kaj tiam svingu vian longombran lancon kaj tre rapide ĝin forjetu.”

520 Tiel ŝi parolis kaj Pallas Athene enirigis en lin kuraĝon grandan. Kaj post kiam li estis preĝinta al la filino de l' granda Zeus, li svingis sian longombran lancon kaj tre rapide ĝin forjetis kaj li trafis Eupheithes tra la kaskon kun la kupraj

vangŝirmiloj. Kaj la kasko ne detenis la lancon sed la kupra  
 525 pinto tute penetris tra ĝin kaj kun obtuza bruo li falis teren  
 kaj lia armaĵo ektintis ĉirkaŭ lia korpo.

Dume Oduseus kaj lia brilglora filo sin ĵetis inter la antaŭajn  
 batalantojn kaj batis per siaj glavoj kaj pikis per siaj ambaŭ-  
 flanke pintigitaj lancoj. Kaj ĉiujn ili estus mortigitaj kaj de  
 ili forprenintaj la revenon, se ne Athene, la filino de la egidporta  
 530 Zeus, estus kriinta per laŭta voĉo kaj reteninta ĉiujn batal-  
 antojn:

„Nun ĉesu, Ithakanoj, la teruran militon, por ke, ne farante  
 sangobanon, vi plej baldaŭ disiĝu.”

Tiel parolis Athene kaj ilin ekkaptis paliga timo; kaj de  
 535 teruro la armiloj falis el iliaj manoj kaj ĉio falis teren, kiam  
 la Diino estis aŭdiginta sian voĉon; kaj ili forkuris al la urbo,  
 arde dezirante savi sian vivon. Terure nun kriis la persistema  
 dieca Oduseus kaj sin klinante antaŭen li ekkuregis kiel alte  
 fluganta aglo. Sed tiam la Kron-ido ĵetegis sian fajran fulmon  
 540 kaj ĝi falegis antaŭ la fajrŝprucokula filino de potenca patro.  
 Tiam la fajrŝprucokula Athene alparolis Oduseus:

„Didevena Laert-ido, elpenslerta Oduseus! haltu kaj  
 ĉesigu la batalon de l' milito, komuna al ĉiuj, por ke ne koleriĝu  
 eble kontraŭ vi la Kron-ido, la laŭttandra Zeus.”

545 Tiel parolis Athene kaj li obeis al ŝi kaj ĝojis en sia animo.  
 Kaj poste estigis inter ambaŭ partioj interkonsenton ĵure  
 sankciitan Pallas Athene, la filino de la egidporta Zeus  
 [similante al Mentor je la staturo kaj voĉo].



